Bernhard Pabst

Berlina Komentario

pri la

Fundamento

de

Esperanto

Dua Parto
Vortaro Oficiala

Berlino 2014

Propono por citado: BK (dato).

Pabst, Bernhard. Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto. Dua Parto – Vortaro Oficiala. Berlino 2014.

La eldono de Decembro 2013 de ĉi tiu verko aperis sub la titolo „Berlina Komentario pri la Vortaro Oficiala de Esperanto“.

Stato 2014-06-20. © 2012-2014 Bernhard Pabst.
Kontakto bernhard.pabst[ĉe]gmx.de (anstataŭigu „[ĉe]“ per „@“).

Enkonduko

La lasta eldono de tiu ĉi verko de Decembro 2013 aperis sub la titolo „Berlina Komentario pri la *Vortaro Oficiala* de Esperanto“. Ĝi enhavas la ĉ. 5000 oficialajn lingvo-elementojn („vortojn“) de Esperanto kun komentoj kaj klarigoj (*). Jam tiam estis planite prepari plian volumon, kiu komentas ankaŭ la aliajn partojn de la Fundamento, nome la Antaŭparolon, Gramatikon kaj Ekzercaron, krome la ĝeneralajn aspektojn de la Akademiaj Korektoj kaj la Oficialaj Aldonoj. Tiu volumo nun ekzistas en unua (ankoraŭ nekompleta) versio. Ambaŭ partoj kune estigas la „Berlinan Komentarion pri la *Fundamento* de Esperanto“ – tiel la nova titolo.

Enhave la nuna „Dua Parto: Vortaro Oficiala“ estas korektita kaj kompletigita per aldonaj informoj. Ĉefe temas pri pliaj indikoj de fruaj trovlokoj de vorto kaj referencoj al vortoj kun simila signifo.

Berlino, Junio 2014 La aŭtoro

(*) Lasta stato de prilaboro de 2014-03-08 trovebla je http://www.pdf-archive.com/2014/03/08/esperanto-bk-2014-03-07/.

Enkonduko al la eldono Dec. 2013

La 26-an de julio 1887 (la 14-an de julio laŭ la tiama rusa kalendaro) la cara cenzuro permesis aperigi verketon, kiun poste ĉiuj esperantistoj konis kiel la Unuan Libron de Esperanto. 125 jarojn poste ni prezentas al ili tiun ĉi unuan eldonon de „Berlina Komentario pri la Vortaro Oficiala“ (BK). Ĝi enhavas ĉiujn lingvo-elementojn de la Fundamento de Esperanto (1905) kaj de la naŭ Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro, pri kiuj decidis la Lingva Komitato kaj poste la Akademio de Esperanto inter 1909 kaj 2007. Laŭ la preskriboj de la Antaŭparolo (A) pri netuŝebleco de la Fundamento la lingvo-elementoj estas skrupule prezentitaj tiel, kiel ili aperas en la oficialaj dokumentoj, „tute senŝanĝe“ (A 4.4). Ĉefa celo estas kompleta, preciza kaj fidinda inventario de la „Vortaro Oficiala“ (nocio tiel en A 7.2).
Tia verko ĝis nun ne ekzistas. La (neoficiala) datum-bazo nomita „Akademia Vortaro“ (AV) en la retejo de la Akademio de Esperanto prezentas la materialon en plur-aspekte alia maniero. Precipe ĝi ne elmontras en kiu parto kaj kunteksto lingvo-elemento en la Fundamento precize estas uzata. Ĝi ankaŭ ne ebligas spuri la historion de radiko en pli fruaj verkoj kiel ekzemple la Unua Libro 1887 (UL) aŭ la Dua Libro 1888 (DL) ktp. nek postsekvi la „sorton“ de radiko en la Akademiaj Korektoj (AK) aŭ la Oficialaj Aldonoj (OA), komparon vd. en specimeno 1.
La Fundamentaj kaj Oficialaj elementoj estas – ni esperas - komplete prezentitaj. Jen kaj jen mankas ankoraŭ unuopaj komentoj. Ĉefe la indikoj pri la deveno de iuj elementoj – ekzemple el UL, DL, la vortaro Rusa-Internacia de 1889 (RE) aŭ aliaj fontoj - ne jam estas kompletaj. Estas planite aldoni tiujn informojn iom post iom. *Praversioj* de BK estis publikigitaj en

- http://www.ipernity.com/blog/bernardo/442529 (html),
- http://libroj.byethost14.com/ai/ai20.php (datumbazo) kaj en
- http://www.pdf-archive.com/2014/01/24/bk-2014-01-23 (pdf, ekzistas ankaŭ kiel mobi)

Tiu ĉi „Dua Parto“ enhavas la liston de la Fundamentaj kaj Oficialaj („Akademiaj“) lingvo-elementoj. Ĝi estas la speciala parto pri konkretaj, unuopaj „vortoj“. En preparo estas plia Unua Parto, kiu enhavu komentarion pri diversaj „transvortaj“, abstraktaj aspektoj kaj demandoj de la Fundamenta kaj Oficiala vort-provizo kaj estos la ĝenerala parto. Ĝi ankaŭ enhavos la klarigojn de ĉiuj mallongigoj uzataj en ambaŭ parto, la liston de la uzata literaturo ktp. Jen ni prezentas nur la plej oftajn por ebligi rapidan orientiĝon. Specimenon de la Unua Parto oni trovas malsupre.

Grava helpilo pri la 1-a ĝis 7-a Oficialaj Aldonoj estis la verko Oficialaj Lingvoelementoj de Esperanto (OLEO 2008) de Andreas Kück (Germanio), al kiu mi tre dankas, ke mi povis uzi lian verkon kaj pro liaj konsiloj pri BK. Apartan dankon mi krome ŝuldas al jenaj kolegoj, kiuj prikomentis la tradukojn en VO al siaj denaskaj lingvoj

franca	Thierry (Francio)
hispana	Javier Guerrero (Hispanio, Katalunio)
kataluna	Javier Guerrero (Hispanio, Katalunio)
portugala	Túlio Flores (Brazilo)
rusa	Stanislavo (Rusio)

La germanajn tradukojn mi mem prikomentis. Mankas ĝis nun komentariistoj por la angla, itala kaj – aparte grave - pola.
Al Javier (Katalunio) mi krome dankas pro lia teknika helpo, al Michael Lennartz (Germanio) pro la konverto al la supre citita datumbazo.

Berlino, Decembro 2013 La aŭtoro

Aranĝo

Malunueca prezento-maniero

Laŭ la preskriboj de la Antaŭparolo pri netuŝebleco de la Fundamento la lingvo-elementoj estas skrupule prezentitaj tiel, kiel ili aperas en la oficialaj dokumentoj, „tute senŝanĝe“ kaj „eĉ kune kun siaj eraroj“ (A 4.4). Pro tio aperas ĉiuspecaj manieroj skribi ekzemple la titolojn de vortaraj artikoloj: medit’ (UV – nur minuskloj, apostrofo), Mediterane/o (OA 8 – oblika streko kaj vort-kategoria indikilo „o“), medium-o (OA 2 – streketo kaj „o“), Medol-o (OA 4 – komenca majusklo, streketo kaj „o“), MONOTONA (OA 6 – nurmajuskla skribo, neniu disigilo de la vort-kategoria vokalo) k.a. Pri (eblaj) preseraroj, arkaismoj k.t.p. la Komentario atentigas per komentoj en pintaj krampoj, ekzemple: „{legu: ...}“.

Alfabeta ordo de la vortaraj artikoloj

Same pro respekto de la netuŝebleco, la alfabeta ordo estas tiu de la Universala Vortaro. Ĝi ne distingas – malsame al la ordo, kutima en nuntempaj vortaroj - inter diakritaj literoj kaj iliaj respektivaj bazaj literoj. En la alfabeta ordo egalas ĉ al c, ĝ al g, ĵ al j, ĥ al h, ŝ al s kaj ŭ al u. Pro tio ekzistas la duoblaj ĉapitroj „C, Ĉ“, „G, Ĝ“ k.t.p. kaj ekzemple „ĉar“ (konjunkcio el UV) sekvas rekte post „car’ [OA 1]“ (rusa imperiestro), marĉand’ troveblas *antaŭ* marcipan’ k.t.p.

Ordo interne de vortara artikolo

La ordo interne de vortara artikolo estas la sekva. Se mankas trovloko en Berlina Komentario, tio signifas, ke ĝi ne ekzistas en la oficialaj dokumentoj. La diversaj trovlokoj estas disigitaj per longa streko (—).

1.	Enskribo en la Universala Vortaro en la ĝusta alfabeta trovloko	UV
2.	Okaza indiko de fako(j) en pintaj krampoj (eksterfundamentaj)	{div}
3.	Enskribo en la lecion-finaj vortlistoj de la Ekzercaro en la propra artikolo	FE
4.	Enskribo en la Universala Vortaro ekster la ĝusta alfabeta trovloko	UV
5.	Enskribo en la lecion-finaj vortlistoj de la Ekzercaro ekster la propra artikolo	FE
6.	Enskriboj en la Fundamentaj Gramatikoj	FG
7.	Akademiaj Korektoj	AK
8.	Plej frua(j) fonto(j) trovita(j) ĝis nun	div.
9.	Ĉiuj citaĵoj enhavantaj la lingvo-elementon el la Antaŭparolo	A
10.	Ĉiuj citaĵoj enhavantaj la lingvo-elementon el la Ekzercaro	FE
11.	Okazaj citaĵoj enhavantaj la lingvo-elementon el aliaj (*eksterfundamentaj*) fontoj, ekz. la Dua Libro (DL), la vortaro de Kabe (Kabe) k.a. (*kursive*), se ili ŝajnas esti helpaj por la ĝusta interpreto de la elemento.	div.
12.	Ĉiuj derivaĵoj de la koncerna elemento laŭ la supra sinsekvo, markitaj per ●	
13.	Lingvaj Respondoj de Zamenhof pri la koncerna elemento	LR
14.	Ĉiuj decidoj de la Akademio pri la koncerna elemento	
15.	Okazaj rimarkoj de la Berlina Komentario pri la koncerna elemento	Rim.

Ekzemplo (la supraj trovlokoj estas indikitaj per siaj ciferoj en angulaj krampoj):

[1] **montr’** - montrer | show | zeigen | показывать | pokazywać. {[2] mankas pri montr’} — [3] **montri** - montrer | show | zeigen | показывать | pokazywać [FE 18]. {[4]-[6] ne ekzistas por montr’} — [7] [AK] show (*vb*.). — [8] [UL]. — [9] Al ĉiu, kiu montros al mi ian nebonan esprimon en la Fundamenta libro, mi respondos trankvile: jes, ĝi estas eraro, ... [A 4.7]. {sekvas plia trafo el [A 9.1]}. — [10] Montru al ili vian novan veston [FE 18.11]. {sekvas pliaj trafoj el FE}. {[11] ne necesa por montr’}
[12] ● **montrita** — La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ... [FE 30.2].
[12] ● {sekvas pliaj derivaĵoj de montr’}
{[13]-[15] ne ekzistas pri montr’]}

Mallongigoj – Fontoj

Fontoj aperas en rektaj krampoj – [...]. OA 1 krome havas la font-indikon * (asterisko, signifanta „Zamenhofa radiko“).

[UV]	1893 - Universala Vortaro; ekzemple: [UV not'] = vd. la kap-vorton „not'“ en UV.
[FE]	1898 - Fundamenta Ekzercaro; ekzemple: [FE 32.1] = § 32, frazo 1 de la Fundamenta Ekzercaro
[FG]	1887 - Fundamenta Gramatiko en franca, angla, germana, rusa kaj pola lingvoj; ekzemple: [FG 16.1] = § 16, 1a alternativo de la Gramatikoj
[A]	1905 - Antaŭparolo; ekzemple: [A 5.2] = Alineo 5, dua frazo de la Antaŭparolo
[OA 1]	1909 - Unua Oficiala Aldono al la Universala Vortaro.
[AK 1914]	1914 - Akademiaj Korektoj (pro la milito aperis nur en 1922 kaj 1923)
[OA 2]	1919 - Dua Oficiala Aldono al Universala Vortaro
[OA 3]	1921 - Tria Oficiala Aldono al Universala Vortaro
[OA 3.1]	
[OA 3.2]	
[1923]	1923 - Aldono de la elemento analog'
[1929]	1929 - Aldono de la elemento mis-
[OA 4]	1929 - Kvara Aldono al Universala Vortaro
[OA 5]	1934 - Kvina Aldono al Universala Vortaro
[OA 6]	1935 - Sesa Aldono al Universala Vortaro
[1953]	1953 - Aldono de la elemento –end'
[OA 7]	1958 - Sepa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro
[OA 8]	1974 - Oka Oficiala Aldono al Universala Vortaro
[OA 9]	2007 - Naŭa Oficiala Aldono al Universala Vortaro
[UL]	1887 - Unua Libro (Zamenhof)
[DL]	1888 - Dua Libro (Zamenhof)
[DL-Ald]	1888 – Aldono al la Dua Libro (Zamenhof)
[Blov]	1888 – Neĝa Blovado (Grabowski)
[Einst]	1888 – Plena lernolibro por Germanoj (Einstein)
[RE]	1889 - Plena Vortaro Rusa-Esperanta (Zamenhof)
[MV]	1889 - Meza Vortaro Esperanta-Germana (Zamenhof)
[Beau]	1899 – Beaufront (1899 = jaro de la antaŭparolo; 4-a eldono 1904)
[E-isto]	1889-1895 – „La Esperantisto“ (sola Esperanto-periodaĵo en tiu epoko)
[FK]	1903 – Fundamenta Krestomatio (Zamenhof)
[EG 1]	1904 – Jürgensen, Esperanto-Germana, 1a eld. 1904
[EG 2]	1907 – Jürgensen, Esperanto-Germana, 2a eld. 1907
[ER]	1910 – Vortaro Esperanta-Rusa (Zamenhof)
[Kabe]	1910 – Vortaro de Esperanto (Kabe)
[PIE]	1910 – Vortaro Pola-Esperanta (Grabowski)
[LR]	Lingva Respondo laŭ la eld. 1990; ekzemple: LR 1889 aŭ LR 52 B
[EV]	1923 ss – Enciklopedia Vortaro (Wüster).
[PV]	1930 – Plena Vortaro
[PVS]	1953 – Suplemento al Plena Vortaro (Waringhien)
[GD]	1957 – Grand Dictionnaire Espéranto – Français (Waringhien); preta 1955.
[PIV]	1970 – Plena Ilustrita Vortaro (Waringhien), preta 1968.
*	Per asterisko OA 1 (1909) (nekomplete) markas Zamenhofajn vortojn, plej multaj el [EG 1], [EG 2] aŭ [Beau], ekzemple: **ekskrement'** [OA 1] * excrément | excrement | ... — [Beau] [EG 2].
---	traduko mankas – simbolo uzata de OA 3 (1921) por mankantaj tradukoj al portugala kaj pola
z	„Zamenhofa“, uzata de OA 4 (1929)

Indikoj kiel [EG 1] ne signifas, ke vorto eble troveblas jam en pli frua fonto, ekz. en [E-isto].

Mallongigoj uzataj en naciaj tradukoj de UV

(Heilk.)	Heilkunde (medicino)

Mallongigoj uzataj en Akademiaj Korektoj

(*anat*.)	anatomie (en francaj AK), t.e. anatomio
(анат.)	анатомия (en rusaj AK), t.e. anatomio
(*adv*.)	adverb (en anglaj AK), t.e. adverbo
(*bot*.)	botanique (en francaj AK), t.e. botaniko
(*chim*.)	chimie (en francaj AK), t.e. kemio
(*intr*.).	intransitive (en francaj kaj anglaj AK), t.e. netransitiva
(*masc*.)	masculin (en francaj AK), t.e. vir-genra
(*med*.)	medicine (en anglaj AK), t.e. medicino
(*milit*.)	militaire (en francaj AK), t.e. militaj aferoj
(*mus*.)	musique (en francaj AK), t.e. muziko
(*subst*.)	substantive (en anglaj AK), t.e. substantivo
(*subst*.)	substantif (en francaj AK), t.e. substantivo
(*trans*.)	transitive (en francaj kaj anglaj AK), t.e. transitiva
(*zool*.)	zoologie (en francaj AK), t.e. zoologio
(*vb*.)	verb (en anglaj AK), t.e. verbo

Mallongigoj de fakoj uzataj en OA 2

Listo de la uzataj esperantaj mallongigoj mankas en OA 2. Ili staras kursive en rondaj krampoj kaj estas parto de la oficiala teksto. Temas pri jenaj elementoj:

(anat)	anatomio
(*arĥ*)	arĥitekturo
(bot.)	botaniko
(ekl.)	eklezio
(farm.)	farmacio
(fig.)	figurativa
(filoz.)	filozofio
(fin.)	financo aŭ financaj aferoj (?)
(fiz.)	fiziko
(fiziol.)	fiziologio
(geom.)	geometrio
(*gr.*)	gramatiko
(*gram.*)	gramatiko
(hist.)	historio
(ĥem.)	ĥemio
(jur.)	juro
(kartl.)	kartlud(ad)o (?)
(*min.*)	mineralo aŭ mineralogio (?)
(milit.)	militaj aferoj (?)
(muz.)	muziko
(teatr.)	teatro, teatraj aferoj (?)
(*trans.*)	transitiva
(trig.)	trigonometrio
(versf.)	versfarado
(zool.)	zoologio

Mallongigoj de lingvoj uzataj en OA 8

A	angla – mallongigo por lingvo uzata de OA 8 (1974)
F	franca – mallongigo por lingvo uzata de OA 8 (1974)
G	germana – mallongigo por lingvo uzata de OA 8 (1974)
H	hispana – mallongigo por lingvo uzata de OA 8 (1974)
I	itala – mallongigo por lingvo uzata de OA 8 (1974)
P	portugala – mallongigo por lingvo uzata de OA 8 (1974)

Lingvo-sigloj laŭ ISO

{ca}	kataluna – lingvo-siglo laŭ ISO
{de}	germana – lingvo-siglo laŭ ISO
{en}	angla – lingvo-siglo laŭ ISO
{es}	hispana – lingvo-siglo laŭ ISO
{fr}	franca – lingvo-siglo laŭ ISO
{it}	itala – lingvo-siglo laŭ ISO
{pl}	pola – lingvo-siglo laŭ ISO
{pt}	portugala – lingvo-siglo laŭ ISO
{ru}	rusa – lingvo-siglo laŭ ISO

Mallongigoj – Fakoj

Indikoj pri fakoj aperas en pintaj krampoj – {...}. Kiel ĉiuj simboloj kaj tekstoj en pintaj krampoj ili **ne** estas originalaj, sed aldonitaj de tiu ĉi Komentario. Ili servas precipe por rapide trovi ĉiujn vortojn de iu fako aŭ temo.

{ANAT}	anatomio
{ARKI}	arkitekturo
{ASTR}	astronomio
{BOT}	botaniko
{GRAM}	gramatiko
{JUR}	juro
{KEM}	kemio
{KUIR}	kuir-arto
{LIT}	literaturo
{LUD}	ludoj
{MED}	medicino
{MEZ}	mezuroj
{MIL}	milit-aferoj
{MON}	mono
{MUZ}	muziko
{RELI}	religio
{VEST}	vestoj
{ZOO}	zoologio

Mallongigoj – Komentoj

Komentoj aperas en pintaj krampoj – {...}. Kiel ĉiuj simboloj kaj tekstoj en kurbaj krampoj ili **ne** estas originalaj, sed aldonitaj de tiu ĉi komentario.

{2012: ...} Indikas modernan ortografion de aŭ arkaismojn en la jaro 2012, ekzemple: „anticipieren {2012: antizipieren}“ legu: „En **Anticip'** [OA 3.2] de 1921 aperas la germana traduko en la arkaa ortografio *anticipier*en (kun –c-). La moderna ortografio en la jaro 2012 estas *antizipieren* (kun –z-)“;
karcer' [OA 1] ... | Karzer {2012: Gefängnis, Verlies, Kerker, Karzer (ark.)} | ...: La germana traduko Karzer el OA 1 de 1909 en la jaro 2012 ne plu estas kutima; nuntempe oni tradukas per *Gefängis*, *Verlies*, *Kerker*, dum *Karzer* estas arkaa (aŭ nur plu regione kutima).

{legu: ...} Indikas ĝustigon de preseraro aŭ transskribo pro mankantaj pres-tipoj en naci-lingvaj tradukoj, ekzemple: „Oeffnung {legu: Öffnung}“: la presisto ne disponis pri „Ö“ kaj transskribis per „Oe“;
„arqueologia {legu: arqueología}“: en la originalo la hispana traduko estas erare skribita per simpla –i-, dum jam tiu-epoke devis kaj nuntempe devas esti skribita per akcentita –í-
Same: **Abiturient-o** {legu: abiturient-o} [OA 4]; **BALETO** {legu: baleto} [OA 6.1]: OA 3 ĝis OA 6 uzas grafikan, „nenaturan“ usklecon (skribo per komenca majus-klo aŭ nurmajuskla skribo) sen gramatika funkcio; pri tio atentigas {legu: ...}.

{de 1901} Indikas ĝustigon de germana ortografio laŭ la reguloj de la Unua Ortografia Reformo de 1901, ekzemple
kantor' [UV 1893] ... | Cantor {de 1901: Kantor} | ...: De post la Unua Ortografia Reformo de 1901 ĝis nuntempe oni skribas en la germana *Kantor* kaj ne plu *Cantor* kiel notita en la Universala Vortaro de 1893.

{de 1918} Indikas ĝustigon de rusa ortografio laŭ la reguloj de la tiujara ortografia reformo.

{de 1936} Indikas ĝustigon de pola ortografio laŭ la reguloj de la tiujara ortografia reformo.

{de 1990} Indikas ĝustigon de franca ortografio laŭ la reguloj de la tiujara ortografia reformo.

{de 1996} Indikas ĝustigon de germana ortografio laŭ la reguloj de la Dua Ortografia Reformo de 1996.

{(ark.) ...} Indikas arkaan tradukon, anstataŭinda per la sekvanta vorto, ekzemple: „assecuriren {(ark.) versichern}“: assecuriren estas arkaa, en 2012 oni uzas versichern.

Rim.: Rimarkoj de Berlina Komentario.

Ĝeneralaj mallongigoj

ark.	arkaa
cit.	citita laŭ, aŭ: citita en.
div.	diversaj
ekz.	ekzemple
ps.	pseŭdonimo
Z.	Zamenhof

Literaturo (elekto)

Tie ĉi estas listigitaj nur la ofte cititaj verkoj. Fontoj nur okaze cititaj aperas en piednotoj.

Aktoj	1967	Aktoj de la Akademio 1963-1967
AV	2012	Akademia Vortaro [Datum-bazo en la retejo www.akademio-de-esperanto.org
Beaufront, Louis de	1902	Dictionnarie Esperanto-Français. Paris: Hachette 4-a eld. (onzième mille) 1904; enkonduko „Pour les adeptes“ datita „1er janvier 1902“.
Bein, Kazimierz	1910	Vortaro de Esperanto. Paris: Hachette. Senŝanĝaj represoj 1911, 1922, 1925.
Biblia Vortaro	1975-1984	
Biblio	1926	La sankta biblio. Malnova kaj nova testamentoj tradukitaj el la originalaj lingvoj. Londono [k.a.]: Brita kaj Alilanda Biblia Societo [k.a.] 1926.
Boirac, Èmil	1909	Plena vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-franca. Vol. 1 1909, vol. 2 1910. Dijon: Darantière.
Cherpillod, André	1990	La Zamenhofa Radikfarado.
Christaller, Paul	1923	Deutsch-Esperanto Wörterbuch. Berlin, Dresden: Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel 1923. [2-a plilarĝita eldono, 1-a eldono 1910].
Grosjean-Maupin	1930	Plena Vortaro, 1-a eld. 2-a ŝanĝita kaj poste ĉiam senŝanĝe represita eld. 1934.
Ito, Kanzi		vd. je Ludovikito.
Kabe		vd. Bein, Kazimierz
Kück, Andreas	2008	Oficialaj Lingvoelementoj de Esperanto (OLEO)
Ludovikito (ps.)	1991	Ludovikaj vortaroj el la 19-a jarcento. Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof – kromkajero 5. S.l. [Kioto]: Eldonejo ludovikito 1991
Neves, Gonçalo	2011	Historia Vortaro de Esperanto 1887-1888. Bad Bellingen: Edition Iltis 2011.
OLEO	2008	Oficialaj Lingvoelementoj de Esperanto, vd. ĉe Kück, Andreas
PAG	1980	Plena Analiza Gramatiko, vd. ĉe Waringhien.
PIV	1970	Plena Ilustrita Vortaro, vd. ĉe Waringhien.
PV	1930	Plena Vortaro, vd. ĉe Grosjean-Maupin.
Vilborg, Ebbe		Etimologia Vortaro de Esperanto
Waringhien, Gaston		Lingvo kaj Vivo.
Wüster, Eugen	1923 ss	Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana (manuskripto 1918-1920).
Zamenhof, L.L.		Fundamento de Esperanto, 9-a eld. 1963. 10-a eld. 1991 (senŝanĝa krom aldona „Antaŭvorto al la 10-a eldono“).

Komparo kun la datum-bazo „Akademia Vortaro“

La elemento „fokus’“ en BK kaj AV

Jen ekzemplo pri la malsama trakto de oficialaj vortelementoj en BK kaj AV. BK havas:

fokus’ - foyer | focus | Fokus | фокусъ | ognisko. {FIZ} {MAT} — [AK 1914] foyer *(phys.)* | Brennpunkt {2012: Fokus, Brennpunkt} | фокус оптический | ognisko (matemat.). — [RE].

La Fundamento, nome la Universala Vortaro (stato de 1893) tradukas la radikon **fokus’** al la germana per la internaciismo „Fokus“. La Akademiaj Korektoj de 1914 [AK] proponas anstataŭe la germanan elinternaĵon „Brennpunkt“. En moderna Germana de 2012 oni laŭsituacie uzas ambaŭ formojn, kaj eksteraĵon kaj elinternaĵon. Tiu informo perdiĝas en AV:

Elemento	Baz-formo	Sta-tu-so	BRO	France	Angle	Germane	Pole	Ruse
FOKUS/	fokus/o	F		foyer *(phys.)* [AK]	focus	Brennpunkt [AK]	ognisko (matemat.) [AK]	фокус оптический [AK]

Oni ne plu vidas la tradukon de Zamenhof en la Universala Vortaro, sed nur tiun de la Akademiaj Korektoj.

La de la Komentario aldonitaj, do eksterfundamentaj, fako-indikoj en pintaj krampoj „{FIZ}“ (fiziko) kaj „{MAT}“ (matematiko) helpas rapide trovi ĉiujn vortojn de iu fako en la Vortaro Oficiala.

La fonto-indiko „[RE]“ montras, ke la vorto „fokus-“ unuan fojon estis registrita en la Plena Vortaro Rusa-Esperanto de 1889. De tie Zamenhof transprenis ĝin al la Meza Vortaro Germana-Esperanta, same de 1889 [MV], fine al UV 1893, kiu fariĝis Fundamenta en 1905.

Komentario pri la Vortaro Oficiala

A

Aa – Aa [FE 1] — â | a as in “last“ | a | a | a [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: **a** ... [FE 1]. — **a** [OA 7] = nomo de la litero a, unua litero de la Esperanta alfabeto. — **Lingva Respondo 1893:** La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. [Respondo 56, *Esperantisto*, 1893, p. 32].

a - marque l’adjectif; ex. hom’ homme - hom’a humain | termination of adjectives; e. g. hom’ man - hom’a human | bezeichnet das Adjektiv; z. B. hom’ Mensch - hom’a menschlich | означаетъ прилагательное; напр. hom’ человѣкъ - hom’a человѣческій | oznacza przymiotnik; np. hom’ człowiek - hom’a ludzki. — **a** - marque l’adjectif | termination of adjectives | bezeichnet das Adjektiv | означаетъ прилагательное | oznacza przymiotnik [FE 5]. — **a** - L’adjectif finit toujours par *a*. | Adjectives are formed by adding *a* to the root. | Das Eigenschaftswort endet immer auf *a*. | Прилагательное всегда оканчивается на *a*. | Przymiotnik zawsze kończy się na *a*. [FG 3.1]. — [UL].

abat’ - abbé | abbot | Abt | аббатъ | opat. — [AK] аббат, игумен, настоятель. — [RE]. — **Rim.**: En 2012 аббат estas uzata por estro de neortodoksa (ĉefe katolika) monaĥejo, dum tiun de ortodoksa monaĥejo oni nomas настоятель, игумен.

Abdik’ {legu: abdik’} [OA 3.1] {en} to abdicate | {fr} abdiquer | {de} dem Throne entsagen, abdanken | {es} abdicar | {pt} abdicar | {it} abdicare | {pl} abdykowac {legu: abdykować} | (demeti la reĝecon).

abel’ - abeille | bee | Biene | пчела | pszczoła. {ZOO} — [RE].

abi’ - sapin | fir | Tanne | ель | jodła. {BOT} — [RE].

abism’ [OA 1] * abime {legu: abîme; de 1990: abime} | abyss | Abgrund | пропасть, бездна | przepaść.

Abiturient-o {legu: abiturient-o} [OA 4], {fr} élève ayant terminé ses études secondaires, bachelier | {en} top-form boy in secondary school, who obtained his leaving-certificate examination | {de} Abiturient | {it} studente secondario che ha superato l’esame di maturita | {es} bachiller | {pt} bacharel {malofta, en 2012 pli kutima: pré-universitário} | {ca} batxiller | mezgrada lernanto, kiu finis la gimnazian kursaron, sukcese plenuminte la koncernan ekzamenon. — **Rim.**: En 2012 estas vaste uzata en la rusa: абитуриент, kiu havas de la 1950-aj jaroj novan sencon: junulo, kiu finis mezgradan lernejon kaj planas enmatrikuliĝi al alta aŭ meza profesia lernejo.

ablativ’ - ablatif | ablative | Ablativ | творительный падежъ | narzędnik. {GRAM} — [RE].

abnegaci-o [OA 2.2] abnégation | abnegation | Entsagung. — [EG 2] Verleugnung, Entsagung, Aufopferung.

abomen’ - abomination | abomination | Abscheu | отвращеніе | odraza. — **abomeno** - abomination | abomination | Abscheu | отвращеніе | odraza [FE 26]. — [RE].

● **abomena** - Via vino estas nur ia abomena acidaĵo [FE 35].

● **abomene** - Fi, kiel abomene! [FE 26]

abon’ - abonner | subscribe | abonniren {de 1901: abonnieren} | подписываться | prenumerować. — **aboni** - abonner | subscribe | abonniren {de 1901: abonnieren} | подписываться | prenumerować [FE 27]. — [AK 1914] s’abonner (à) | подписываться (на журнал), абонироваться {en 2012 nur: подписываться (на журнал, газету); абонироваться tute arkaiĝis}. — [RE].

● **abono** - abonpago (= pago por la abono) [FE 27].

● **abonpago** - ... abonpago (= pago por la abono) [FE 27].

abort' [OA 1] * avorter | abort, miscarry | abortieren | выкинуть (недоноска) {en 2012 выкинуть estas uzata nur en vulgara parolo: сделать аборт; недоносок (abortita bebo) estas uzata nur kiel insulto, en normala parolo oni uzas: недоношенный ребенок} | poronić. — [EG 2].

abrikot' - abricot | apricot | Aprikose | абрикосъ | morela. {BOT} — [RE].

abrupt-a [OA 2.2] brusque | abrupt | schroff. — [EG 2] abgerissen, schroff, abrupt.

absces' - abcès | abscess | Geschwür, Eiterbeule | нарывъ {en 2012 same ofte, aparte en medicinaj rondoj: абсцесс} | wrzód. {MED} — [AK 1914] Eitergeschwür | robień. — [RE].

absint' - absinthe | absinthium | Wermuth {de 1901: Wermut} | полынь {en 2012 la planto estas plu nomata полынь, sed la brando farita el ĝi абсент} | piołunkówka. {KUIR} — [AK] {en} absinth | {pl} absynt. — [RE].

absolute – [A, mankas en UV] ... sed ĝis tiu tempo la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa [A 1.3]. Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara [A 6.1]. — **absolut'** [OA 1] * absolu | absolute | unbeschränkt, absolut | абсолютный | absolutny. — **absolut'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [DL] *La nombro 10,000,000, pri kiu estas parolita en mia unua verko, ŝajnas al multaj absolute ne ricevebla* [DL II.1.1]. — [RE].

Absorb' [OA 3.1] {en} to occupy wholly, to absorb | {fr} aborber {legu: absorber} (l'esprit) | {de} den Geist ganz in Anspruch nehmen, absorbieren | {es} ocuparlo todo, absorber | {pt} occupar {de 2009: ocupar} todo, absorver | {it} occupar il pensiere, assorbire la mente | {pl} absorbowac {legu: absorbować}. — **Rim.**: En la rusa de 2012 абсорбировать (absorbi), абсорбция (absorbado).

Abstin-i, [OA 4] {fr} être abstinent | {en} to abstain | {de} enthaltsam sein, abstinent leben | {it} essere astinente | {es} abstenerse, guardar abstinencia | {pt} abster-se | {ca} ésser abstemi. — [Beau] **abstinenc**, abstinence. — **Rim.**: En la rusa de 2012 абстиненция (abstino) do "sindeteno de konsumado de alkoholo"; абстинентный синдром (abstina sindromo).

abstrakt' [OA 1] * abstrait | abstract | abstrakt | отвлеченный, абстрактный | abstrakcyjny, oderwany. — [RE].

absurd' [OA 1] * absurde | absurd | absurd | нелѣпый {en 2012 ankaŭ абсурдный} | niedorzeczny. — [Beau] absurd. absurdo, absurdité.

Abund' [OA 3.1] {en} abundant | {fr} abondant | {de} reichlich, in Fülle | {es} abundante {validas kiel traduko kaj en la hispanan kaj en la portugalan, legu: | {pt} abundante} | {it} abbondante | {pl} obfity | (malmanka). — [Kabe]. — **Rim.**: En la rusa en 2012 обильный.

aĉ' [OA 1] * *sufikso por montri malŝatan, malestiman sencon*. — **Rim.**: Z proponis en sia „Cirkulera Letero al la ... LK – Pri Neologismoj" de 1906-11-22 la sufikson „aĉ'" jene: „Estas enkondukata nova sufikso „aĉ" por montri malestimon (ekzemple „ĉevalaĉo" = malbona ĉevalo)." [LZ I 316] = [PVZ 7, 402]. Ripetita en 1907 [PVZ 8, 179].

acer' - érable | maple | Ahorn | кленъ | klon. {BOT} — [RE].

aĉet' - acheter | buy | kaufen | покупать | kupować. — **aĉeti** - acheter | buy | kaufen | покупать | kupować [FE 14]. — [UL]. — Mi aĉetis dekduon (aŭ dek-duon) da kuleroj kaj du dekduojn da forkoj. Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj. [FE 14]. Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi. La surtuto estas aĉetita de mi, sekve ĝi apartenas al mi. [FE 25]. Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero [FE 31]. Mi aĉetis dekon da ovoj [FE 32]. Mi aĉetis por la infanoj tableton kaj kelke da seĝetoj [FE 38].

● **sub'aĉet'** - corrompre | corrupt | bestechen | подкупать | przekupywać. — [AK] {en} suborn, bribe.

acid' - aigre | sour | sauer | кислый | kwaśny. {KEM} — **acida** - aigre | sour | sauer | кислый | kwaśny [FE 35]. — [AK 1914] acide, aigre | acid, sour. — [UL].

● **acido** - En tiuj ĉi boteletoj sin trovas diversaj acidoj: vinagro, sulfuracido, azotacido kaj aliaj [FE 35.6]. {KEM}

● **acidaĵo** - Via vino estas nur ia abomena acidaĵo [FE 35.7].

● **acideco** - La acideco de tiu ĉi vinagro estas tre malforta [FE 35.8].

● **azotacido** - En tiuj ĉi boteletoj sin trovas diversaj acidoj: vinagro, sulfuracido, azotacido kaj aliaj [FE 35.6]. {KEM}

● **sulfuracido** - En tiuj ĉi boteletoj sin trovas diversaj acidoj: vinagro, sulfuracido, azotacido kaj aliaj [FE 35.6].

ad' - marque durée dans l'action {ĝusta lingvaĵo postulas artikolon: marque la durée}; ex. paf' coup de fusil - paf'ad' fusillade | denotes duration of action; e. g. danc' dance - danc'ad' dancing | bezeichnet die Dauer der Thätigkeit {de 1901: Tätigkeit}; z. B. danc' der Tanz - danc'ad' das Tanzen | означаетъ продолжительность дѣйствія; напр. ir' идти - ir'ad' ходить, хаживать | oznacza trwanie czynności; np. ir' iść - ir'ad' chodzić. — **ad** - marque durée dans l'action {ĝusta lingvaĵo postulas artikolon: marque la durée}; ex. pafo coup de fusil - pafado fusillade | denotes duration of action; e. g. danco dance - dancado dancing | bezeichnet die Dauer der Thätigkeit {de 1901: Tätigkeit}; z. B. danco der Tanz - dancado das Tanzen | означаетъ продолжительность дѣйствія: напр. iri идти - iradi ходить, хаживать | oznacza trwanie czynności; np. iri iść - iradi chodzić [FE 13]. — [AK} означает продолжительность действия или многократный вид; напр. ir/ идти — ir/ad/ ходить, хаживать. — [UL]. — **Rim.**: En 2012 хаживать estas arkaa.

● **diradi** — Li ĉiam diradis al mi la veron [FE 24].

● **ir'ad'** — ходить, хаживать | chodzić — **iradi** - ходить, хаживать | chodzić [FE 13]

● **laboradi** — Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj laboradi senĉese [FE 13].

● **saltadi** — Mi saltadis la tutan tagon de loko al loko [FE 40].

● **uzadi** — Sed estas bone uzadi la vorton „je" kiel eble pli malofte [FE 29].

● **danc'ad'** — dancing | das Tanzen [UV ad'] — **dancado** - dancing | das Tanzen [FE 13 ad']

● **flugado** — ... ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado ... [FE 28].

● **kantado** — La kantado estas agrabla okupo [FE 40].

● **kunligado** — Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj [FE 27]

● **legado** — Ekzerco de legado [FE 2] [FE 3] [FE 4].

● **malsanado** — malsanado [FE 42]

● **paf'ad'** — fusillade [UV ad'] — **pafado** fusillade [FE 13] — La pafado daŭris tre longe [FE 40].

● **parolado** — Lia hieraŭa parolo estis tre bela, sed la tro multa parolado lacigas lin [FE 40].

● **skribado** — Skatolo, en kiu oni tenas plumojn, estas plumujo, kaj bastoneto, sur kiu oni tenas plumon por skribado, estas plumingo [FE 40].

● **uzado** — Ĝia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj [FE 27]. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo ... [FE 27].

— **Lingva Respondo 1902 [Pri –ad]**: Vd. [LR 8, let. al Th. Cart (1902-05-07), O.V. p. 526].

Adapt' [OA 3.1] {en} to adapt | {fr} adapter | {de} anpassen, adaptieren | {es} adaptar | {pt} adaptar | {it} adattare | {pl} adaptowac {legu: adaptować}. — [EG 2] adaptieren, neu einrichten.

adept' [OA 1] * adepte | adept | Adept | приверженецъ {en 2012 ankaŭ адепт (nur por sekvantoj de iu religio)} | adept. — [DL] *... ĉar dek milionoj adeptoj (!) {nun: da adeptoj} nenian {de 1888: neniam} estos kolektitaj, tial la afero tute ne havas estontecon* [DL I.3.c]. — [RE].

adiaŭ - adieu | good-by | lebe wohl | прощай | bądź zdrów. — [AK] {en} adieu, good-bye. — [UL]. — A-dí-aŭ [FE 3].

adici-i [OA 2.2] additionner | to add up | addieren. {MAT} — [EG 2] addieren.

adjektiv' - adjectif | adjective | Eigenschaftswort {en 2012 sinonime ankaŭ: Adjektiv} | имя прилагательное | przymiotnik. {GRAM} — [RE].

adjutant' [OA 1] * aide de camp | adjutant | Adjutant | адъютантъ | adjutant. — [RE].

administr' - admininistrer | administer | verwalten | управлять {en 2012 ankaŭ vaste uzata: администрировать} | zarządzać. — [RE].

Administraci' [OA 3.2] {en} administration | {fr} administration | {de}

Administration {en 2012 pli kutima: Verwaltung} | {es} administracion {legu: administración} | {pt} administração | {it} amministrazione | {pl} --- {traduko mankas}. — [Beau] administration (service, personnel de l'administration). — **Rim.**: En la rusa de 2012: администрация}

admir' - admirer | admire | bewundern | дивиться {en 2012 дивиться plejparte arkaiĝis} | podziwiać. — [AK] дивиться, изумляться, восхищаться. — [RE].

admiral' [OA 1] * amiral | admiral | Admiral | адмиралъ | admirał. — [RE].

Admiralitat' [OA 3.2] {en} admiralty | {fr} amirauté | {de} Admiralität | {es} almirantia {legu: almirantía (ark.), en 2012: almirantazgo} | {pt} almirantado | {it} ammiragliato | {pl} --- {traduko mankas}. — **Rim.**: En la rusa de 2012: адмиралитет (tuto de admiraloj de lando).

admon' - exhorter | exhort | ermahnen | увѣщевать | upominać. — [AK 1914] engager, exhorter. — [RE].

adopt' [OA 1] * adopter | adopt | adoptieren | усыновлять | adoptować.

ador' - adorer | adore | anbeten | обожать | uwielbiać. — [RE].

adrenalin/o. [OA 9] Hormono produktata de la surrenaj glandoj kaj sekreciata en la sangon okaze de mensa aŭ korpa premo (danĝero k.s.) por prepari la korpon al urĝa agado, fuĝo, sindefendo k.s.: *adrenalino akcelas la koran ritmon kaj altigas la sangopremon*. Formulo: $C_6H_3(OH)_2$-CH(OH)-CH_2-NH-CH_3. — [EV 1923].

adres' — [FE 42, mankas en UV]. — **adres'** [OA 1] * adresse (de lettre) | address | Adresse | адресъ | adres. — **adres/o** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 8]. — [UL] [RE].

● **adresita** - El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; la dua: al Lia Grafa Moŝto, Sinjoro P.; la tria: al Lia Moŝto, Sinjoro D.

adult' – adultérer {(ark.). 2012: tromper} | adulterate | ehebrechen | прелюбодѣйствовать {en 2012 ark. kaj uzata nur en religia sfero; en normala parolo: изменять (супругу) | cudzołożyć. — [AK 1914] commettre un adultère | commit adultery. — [RE].

advent' [OA 1] Avent | Advent | Advent | филипповъ постъ | adwent.

adverb' - adverbe | adverb | Nebenwort {en 2012 pli kutima: Adverb} | нарѣчие | przysłówek. {GRAM} — **adverbo** - adverbe | adverb | Nebenwort {en 2012 pli kutima: Adverb} | нарѣчие | przysłówek [FE 30]. — [AK 1914] Umstandswort {2012: Adverb}. — [DL] [RE]. — La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj [FE 30.2]. — **Rim.**: *La adverboj (evortoj), kiuj estas kreitaj el aliaj vortoj, finiĝas je la litero „e"; ĉiuj aliaj adverboj ne havas konstantan finiĝon kaj apartenas al la vortoj simplaj* [DL 6.1]. — **Rim.**: Kp. ankaŭ la artikolon pri „-e".

advokat' [OA 1] * avocat | counsel, advocate | Advokat {en 2012 pli kutima: Rechtsanwalt} | адвокатъ | adwokat. — [RE].

aer' - air | air | Luft | воздухъ | powietrze. — **aero** - air | air | Luft | воздухъ | powietrze [FE 26]. — [UL]. — Super la tero sin trovas aero [FE 26.10].

● **aer'um'** - aérer | expose to the air | lüften | провѣтривать | przewietrzać.

aerolit' [OA 1] aérolithe {ne plu uzata, en 2012: météorite} | aerolite | Luftstein {(ark.). 2012: Meteorit} | аэролитъ {en 2013 ne plu uzata, ark. por „ŝtona meteorito"} | aerolit. {ASTR} — [EG 2]. — Kp. meteor- [OA 2.1].

Aeroplan' [OA 3.2] {en} aeroplan {en 2012 pli kutima: airplane} | {fr} aéroplane {ne plu uzata, en 2012: avion} | {de} Flugzeug | {es} aeroplano {en 2012 pli kutima: avión} k. t. p. { | {pt} avião, aeroplano | {ru} аэроплан}. — [EV 1923].

afabl' - affable | affable | freundlich | ласковый | uprzejmy. — [AK 1914] affable, aimable | приветливый, любезный. — [RE].

● **mal'afabl'** - grogneur | surly | mürrisch | угрюмый | mrukliwy. — [AK] opryskliwy. — [RE].

afekt' - affectionner | affect | affectiren {de 1901: affektieren (ark.). 2012 nur plu uzata la perfekta participo pasiva „affektiert"} | жеманиться | afektować. — [AK 1914] affecter, être affecté, minauder | be affected, mince | sich zieren | аффектировать {(ark.), en 2012 ne plu uzata}, жеманиться, рисоваться.

afer' - affaire | affair | Sache, Angelegenheit | дѣло {de 1918: дело} | sprawa. — **afero** - affaire | affair | Sache, Angelegenheit | дѣло {de 1918: дело} | sprawa [FE 13]. — [AK] affaire (en général), chose | sprawą rzecz. — [UL]. — ... li

esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto [A 2.3]. Tiel same por ke nia afero bone progresadu, estas necese, ke … [A 3.2]. … kiujn la esperantistoj - se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero - povas rigardadi kiel modela, … [A 3.6]. … pro la unueco de nia afero ĉiu bona esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la fundamenton de nia lingvo … [A 10.2]. — Inter aliaj aferoj tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko ... [FE 13.3]. Li estas tre kredema: eĉ la plej nekredeblajn aferojn, kiujn rakontas al li la plej nekredindaj homoj, li tuj kredas [FE 41.14]. Ni ĉiuj kunvenis, por priparoli tre gravan aferon; sed ni ne povis atingi ian rezultaton, kaj ni disiris [FE 42.1].

afiks' [OA 1] affixe | affix | Affix | аффиксъ {en 2012: аффикс} | przy rostek {legu: przyrostek}. {GRAM} — [EG 2].

afiŝ' [OA 1] affiche | poster, placard | Anschlag (an Säule) {2012: Plakat, Anschlag (ark.)} | афиша | afisz. — [RE].

Aflikt' [OA 3.2] {en} to distress, grieve, afflict | {fr} affliger | {de} betrüben, quälen | {es} afligir | {pt} afligir | {it} affliggere | {pl} --- {traduko mankas}.

aforism' [OA 1] * aphorisme | aphorism, maxim | Aphorismus | афоризмъ {de 1918: афоризм} | aforyzm.

afrank' [OA 1] affranchir | pay the postage | frankieren | франкировать | frankować.

Afrik/o. [OA 8] La kontinento sude de Eŭropo. — A. Africa, F. Afrique, G. Afrika, H. {es} Africa {legu: África}, I. {it} Africa, P. {pt} Africa {legu: África}. {GEO} — [Beau] Afrique. [EG 2].

afust' [OA 1] affût {de 1990: affut} (de canon) | gun-carriage | Lafette | лафетъ {de 1918: лафет} | laweta. {MIL}

aĝ' - âge | age | Alter | вѣкъ, возрастъ | wiek. — [AK] возраст. — [UL].

● **plen'aĝ'** - majeur | of full age | mündig | совершеннолѣтній | pełnoletni [UV plen'].

ag' - agir | act | handeln, verfahren | поступать | postępować. — **agi** - agir | act | handeln, verfahren | поступать | postępować [FE 25]. — [RE]. — Honesta homo agas honeste [FE 25].

● **ago** - Via ago estas tre laŭdinda [FE 41].

agac' - agacement | setting on edge | Stumpfwerden der Zähne | оскомина | drętwość. {MED} — [AK 1914] agacement (*des dents*) | setting on edge (*teeth, etc.*) | Stumpfheit der Zähne | cierpnąć (zęby). — [RE].

agat' [OA 1] * agate | agate | Achat | агатъ {de 1918: агат} | agat. {MIN} — [RE].

agent' [OA 1] agent | agent | Agent | агентъ {de 1918: агент} | ajent. — [DL] *Li korespondas telegrafe kun ĉiuj agentoj* [DL 7.18]. [RE].

Aĝi' [OA 3.2] {en} agio | {fr} agio | {de} Agio | {es} agio | {pt} agio {legu: ágio} | {it} aggio | {pl} --- {traduko mankas}. — [EG 2].

agit-i (*fig.*) [OA 2.1]. — [RE].

agl' - aigle | eagle | Adler | орелъ | orzeł. {ZOO} — **aglo** - aigle | eagle | Adler | орелъ | orzeł [FE 22]. — [UL]. — Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota [FE 22]. — [DL]: *Rigardu, kiel la aglo batas kun la flugiloj!* [DL 14.2].

agoni' [OA 1] * agonie | death-agony | Agonie, Todeskampf | агонія {de 1918: агония} | konanie. — [RE].

agord' - accorder | tune | stimmen | настраивать | nastrajać. {MUZ} — [AK] accorder, mettre au diapason (*musique*) | tune (*vb*). — [RE]. — **Lingva Respondo 1903**: „agordi – signifas ‚ordigi' instrumenton, aranĝi la kordojn tiel, ke ilia sono estu *ĝusta, bona per si mem*; akordo = *reciproka* harmonio" [LR 47 G, Listo de korektoj al la manuskripto de *Vocabulaire Français-Esperanto* de Th. Cart 1903, PVZ VI, 51-66].

agrabl' - agreable {legu: agréable} | agreeable | angenehm | пріятный {de 1918: приятный} | przyjemny. — **agrabla** - agréable | agreeable | angenehm | пріятный {de 1918: приятный} | przyjemny [FE 9]. — [UL]. — La kanto de la birdoj estas agrabla [FE 9.2]. La kantado estas agrabla okupo [FE 40.9].

● **agrable** - Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas; ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman kapablon? [FE 17.10] Morti pro la patrujo estas agrable [FE 20.23]. Li parolas, kaj lia parolo fluas dolĉe kaj agrable [FE 31.8].

● **malagrabla** - ... ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili [FE 11.2].

agraf' [OA 1] agrafe | clasp | Agraffe | застежка | agrafka, haftka.

agres/i. [OA 9] Ataki ne provokite; ataki kiel unua ne estante mem minacata de atako: *agresi personon*; *agresi landon*. — [PIV 1970].

● **agres/em/a**. [OA 9] Ĉiam preta ataki, aŭ inklina kutime ataki, eĉ ne provokite. — [PIV 1970].

agronom' [OA 1] [OA 7] {En piednoto en [OA 1] apud astrolog': „Same: agronomo, antropologo, k. t. p."} — [Kabe].

agronomi' [OA 1] * agronomie | husbandry | Feldbaukunde, Agronomie | агрономія {de 1918: агрономия} | agronomja {de 1936: agronomia}. — {En piednoto:} Vidu: Astrologo, la noton. — [RE].

aidos/o. [OA 9] Akirita malsufiĉo de la imunsistemo. Grava malsano, kiu malfortigas la korpajn defendojn kontraŭ ĉiaj malsanoj, plej ofte transdonata per seksaj kontaktoj aŭ infektita sango. {MED} — [PIVS 1987] aideso {kun -e-}.

aĵ' - quelque chose possédant une certaine qualité ou fait d'une certaine matière: ex. mol' mou - mol'aĵ' partie molle d'une chose | made from or possessing the quality of; e. g. sek' dry - sek'aĵ' dry goods | etwas von einer gewissen Eigenschaft, oder aus einem gewissen Stoffe; z. B. mal'nov' alt - mal'nov'aĵ' altes Zeug, frukt' Frucht - frukt'aĵ' etwas aus Früchten bereitetes | нѣчто съ данымъ {tajperaro, legu: данным} качествомъ или изъ даннаго матеріала; нпр. mol' мягкій - mol'aĵ' мякишъ; frukt' плодъ - frukt'aĵ' нѣчто приготовленное изъ плодовъ | oznacza przedmiot posiadajacy pewną własność albo zrobiony z pewnego materjału; np. mal'nov' stary - mal'nov'aĵ' starzyzna; frukt' owoc - frukt'aĵ' coś zrobionego z owoców. — **aĵ** - quelque chose possédant une certaine qualité ou fait d'une certaine matière: ex. mola mou - molaĵo partie molle d'une chose | made from or possessing the quality of; e. g. malnova old - malnovaĵo old things frukto fruit - fruktaĵo something made from fruit | etwas von einer gewissen Eigenschaft, oder aus einem gewissen Stoffe; z. B. malnova alt - malnovaĵo altes Zeug; frukto Frucht - fruktaĵo etwas aus Früchten bereitetes | нѣчто съ даннымъ качествомъ или изъ даннаго матеріала; напр. mola мягкій - molaĵo мякишъ; frukto плодъ - fruktaĵo нѣчто приготовленное изъ плодовъ | oznacza przedmiot posiadający pewną własność albo zrobiony z pewnego materjału; np. malnova stary - malnovaĵo starzyzna; frukto owoc - fruktaĵo coś zrobineego z owoców [FE 25]. — [UL].

● **altaĵo** — Tiu ĉi granda altaĵo ne estas natura monto [FE 35].

● **ark'aĵ'** – voûte {de 1990: voute} | vault | Gewölbe | сводъ | sklepiente [UV ark'].

● **beletr/aĵ/o**. [OA 9] Verko beletra.

● **bonaĵo** — Bo-ná-ĵo [FE 2].

● **ĉirkaŭ'aĵ'** - alentours | environs | Umgegend | окрестность {en 2013 nur en pluralo: окрестности} | okolica [UV aĵ'].

● **fek/aĵ/o**. [OA 9] Ekskremento eligita el la anuso.

● **fortik'aĵ'** - forteresse | fortress | Festung | крѣпость {de 1918: крепость} | twierdza [UV fortik'].

● **fotografaĵo** - La fotografisto fotografis min, kaj mi sendis mian fotografaĵon al mia patro [FE 32, mankas en UV].

● **frandaĵo** — Glaciaĵo estas dolĉa glaciigita frandaĵo [FE 35].

● **garanti'aĵ'** - gage | pawn, pledge | Pfand | залогъ | zastaw. [UV garanti'].

● **grafik/aĵ/o** [OA 9] **1** Bildo grafika: *grafikaĵoj ilustris la poemaron*. **2** Desegnaĵo prezentanta fenomenojn aŭ abstraktajn rilatojn per kurboj, surfacoj k.s., ofte kun nombraj indikoj: *la grafikaĵo prezentis la dividon de la membraro laŭ profesioj*.

● **kod/aĵ/o**. [OA 9] Grupo da signoj, prezentanta koditan informon.

● **meĉ'aĵ'** - amadou | amadou, match | Feuerschwamm | трутъ | hubka [UV meĉ'].

● **pis/aĵ/o**. [OA 9] Urino.

— **Lingva Respondo 1907 [Pri la sufikso *aĵ* apud verbaj radikoj]:** Vi diras, ke kiam verba radiko ricevas la sufikson *aĵ*, tiam ni ofte ne scias, ĉu ĝi signifas "io, kio faras" aŭ "io, kio estas farata". Kelkaj Esperantistoj opinias, ke la sufikso povas havi nur *unu* el la diritaj du sencoj, ekzemple nur la aktivan, kaj ĉiufoje, kiam ili trovas la diritan sufikson kun la senco pasiva, ili rigardas tion ĉi kiel simplan eraron. Tiu ĉi opinio tamen estas neĝusta: *aĵ* per si mem havas nek sencon ekskluzive aktivan, nek sencon ekskluzive pasivan, kaj tial ĝi povas esti uzata en *ambaŭ* sencoj. Severe precizigi la signifon de tiu ĉi sufikso en la senco aŭ nur aktiva aŭ nur pasiva - laŭ mia opinio - estas ne konsilinde, ĉar tio ĉi tute senbezone ligus nin kaj devigus nin ofte uzadi tro longajn formojn. Ĝenerale mi

devas ripeti ĉi tie tion, kion mi jam kelkajn fojojn esprimis ĉe aliaj okazoj: ni ne devas peni, ke nia lingvo estu *tro* preciza, ĉar tiam ni nin mem nur katenus kaj ofte, por esprimi plej simplan ideon, ni devus uzi vorton deksilaban; ĉiufoje, kiam ni sen timo de malkompreniĝo povas doni al la uzanto liberecon, ni devas tion ĉi fari kaj permesi al li uzi laŭvole *diversajn* formojn (se ili nur ne estas kontraŭ la leĝoj de nia lingvo aŭ kontraŭ la logiko aŭ komprenebleco), anstataŭ postuli, ke li nepre uzu ĉiam *nur unu* formon. En ĉiuj okazoj (tre maloftaj), kiam la simpla uzado de *aĵ* povas doni ian *malkompreniĝon*, ni povas ja tre bone helpi al ni (kiel vi mem tute prave proponis) per la uzado de participo aktiva aŭ pasiva (ekzemple “ŝmirantaĵo” kaj “ŝmirataĵo”, kiuj ambaŭ prezentas formojn tute regule kreitajn laŭ la leĝoj de nia lingvo); sed ĉar, el 100 verbaj vortoj kun *aĵ*, 99 estas tute *klaraj*, kial do ni devas senbezone kateni nin kaj, precizigante la signifon de *aĵ* nur aktive aŭ nur pasive, konstante esti devigataj uzadi “antaĵo” aŭ “ataĵo” en ĉiuj aliaj okazoj? Por kio uzi ekzemple la longajn formojn “estantaĵo”, “kreskantaĵo”, aŭ “sendataĵo”, “kraĉataĵo” k.t.p., se ni egale klare povas esprimi tion saman per la pli mallongaj “estaĵo”, “kreskaĵo”, “sendaĵo”, “kraĉaĵo” k.t.p., pri kies senco povas ekzisti nenia dubo? Sekve se vi volas klarigi la signifon de *aĵ* kun verbaj radikoj, tiam anstataŭ diri, ke *aĵ* kun verbo signifas nur “io, kio faras”, aŭ nur “io, kio estas farata”, mi konsilas al vi diri: *aĵ* kun verbo signifas “ion, kio enhavas en si la ideon de la donita verbo” ĉu tiu ĉi ideo estas aktiva aŭ pasiva - tion ĉi la sufikso *aĵ* tute ne devas montri al ni, ĉar tion ĉi montras la senco de la vorto mem aŭ - en okazo de speciala *neceseco* - la aldono de la sufikso de aktiveco aŭ pasiveco. Tiu ĉi “speciala neceseco” tamen aperas nur tre malofte, ĉar eĉ ĉe tiuj verboj, kiuj povas doni egale bone aĵon aktivan kaj pasivan, la senco de la aĵo estas facile komprenebla el la kunteksto; ekzemple se mi diros “mi donas tion ĉi al vi kiel garantiaĵon de mia reveno”, neniu ja povas dubi, ke ni parolas ne pri garanti*at*aĵo, sed pri garanti*ant*aĵo. Vian opinion, ke ofte (kiam povas ekzisti nenia dubo) ni povas eĉ forĵeti la *aĵ* kaj uzi simple nur la substantivan finiĝon *o*, - mi trovas tute prava; sed en la plimulto da okazoj inter *o* kaj “aĵo” estas granda diferenco. –

— P.S. Per stranga renkontiĝo de la cirkonstancoj mi ĵus ricevis leteron, kiu prezentas bonan ilustraĵon al tio, kion mi supre diris pri tro granda logikeco. Mia korespondanto skribas (iom ŝerce), ke la esprimo “Parolo de X en la kunveno Y” estas tute mallogika kaj malpreciza: anstataŭ “parolo” oni devas en tia okazo diri “antaŭpublikparolataĵo”. Ĉu vi aprobas tian precizan vorton? [LR 9, Respondo 11, La Revuo, 1907, Aprilo].

ajl’ - ail | onion, garlic | Knoblauch | чеснокъ | czosnek. {KUIR} — [AK] {en} garlic. — [RE].

ajn - que ce soit; ex. kiu qui - kiu ajn qui que ce soit | ever; e.g. kiu who - kiu ajn whoever | auch nur; z. B. kiu wer - kiu ajn wer auch nur | бы ни; напр. kiu кто - kiu ajn кто бы ни | kolwiek, bądź; np. kiu kto - kiu ajn ktokolwiek, ktobądź. — **ajn** - que ce soit | ever | auch nur | бы-ни | kolwiek, bądź [FE 30]. — [AK 1914] ajn (kiu ...) auch nur, auch immer (wer ...). — [UL]. — Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „ajn”, ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn [FE 30.9].

akaci’ [OA 1] acacia | acacia | Akazie | акація | akacja. {BOT} — [RE].

akademi’ [OA 1] * académie | academy | Akademie | академія | akademja. — [DL 1888] *Cetere, ĉiuj proponoj, kiujn mi ricevas, ..., estos prezentataj al la juĝo de ... ia el la jam konataj instruitaj akademioj, ... [DL I]. Se ia kompetenta akademio min sciigos, ke ĝi volas preni tiun ĉi laboron, mi tuj sendos al ĝi la tutan materialon, ... [DL I]. Se tamen nenia el la instruitaj akademioj volos preni mian aferon, tian {de 1888: tiam} mi daŭrigos la publikigadon de l' proponoj, ... [DL I].* {Tri pliaj trafoj} [DL 19]. [RE].

akapar-i [OA 2.2] accaparer | to corner | wucherisch aufkaufen — [EG 2] wucherisch aufkaufen.

akar’ - mite | mite | Milbe | клещъ, червь | kleszcz, ślepak. {ZOO} — [AK] acare, mite, ciron | mite (*insect*) | клещ. — [RE].

akcel’ - dépêcher {en 2012 pli kutima: accélérer} | accelerate | fördern {(ark.). 2012: beschleunigen} | споспѣшествовать {(ark.). 2012: ускорять, содействовать} | popierać, przyspieszać. — [AK] accélérer, hâter. — [RE].

akcent' - accent | accent | Accent {de 1901: Akzent} | ударение | akcent. — [AK] {en} accent (tonic). — [RE].

akcept' - accepter | accept | annehmen | принимать | przyjmować. — **akcepti** - accepter | accept | annehmen | принимать | przyjmować [FE 23]. — [AK] accepter, accueillir. — [RE]. — ... kaj la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro [FE 23].

— **Lingva Respondo 1908**: La esprimo "mi estas feliĉa akceptonte vin" estas bona, kvankam mi preferus diri pli simple "mi estas feliĉa, ke mi vin akceptos". La frazo "mi inklinas ne faronte tion" ne ŝajnas al mi bona; mi dirus: "mi estas inklina ne fari tion". [Respondo 40, *La Revuo*, 1908, Majo].

Akcesor' [OA 3.2] {en} accessory | {fr} accessoire | {de} nebensächlich, dazukommend {2012 ankaŭ: akzessorisch} | {es} accessorio {pres-eraro, legu: accesorio} | {pt} accessorio {legu: accessório; de 2009: acessório} | {it} accessorio {legu: accessòrio} | {pl} --- {traduko mankas}. — Rim.: {ru} 2012: акцессорный — [EG 2] accesorisch {de 1901: akzessorisch}

akci' [OA 1] action (finance) | share | Aktie | акція | akcja (papier). {EKON} — [RE].

akcident-o [OA 2.2] accident | accident | Zufall, Unfall — [EG 2] Zufall.

akcipitr' - autour | hawk | Habicht | ястребъ | jastrząb. {ZOO} — [RE].

akciz' [OA 1] accise (impot sur les boissons etc.) {nur plu uzata en Kanado, en Francio ark.} | excise | Akzise {(ark.) nur plu uzata por historia imposto} | акцизъ | akcyza. — [RE].

akir' - acquérir | acquire | erwerben | пріобрѣтать | uzyskać. — [AK] uzyskać, zdobyć. — [RE].

Aklam' [OA 3.1] {en} to acclaim | acclamer | zujauchzen {2012: (ark.)}, durch Zuruf abstimmen, Beifall zurufen | {es} aclamar | {pt} acclamar {de 2009: aclamar} | {it} acclamare | {pl} aklamowac {legu: aklamować}.

akn' - bouton, grains de ladrerie | pimple | Finne {(ark.). en 2012: Pickel} | угорь (сыпь) {en 2013 ankaŭ: акне} | węgry, krosty. {MED} — [AK] acné, bouton. — [RE].

akompan' - accompagner | accompany | begleiten | сопровождать | towarzyszyć. — **akompani** - accompagner | accompany | begleiten | сопровождать | towarzyszyć [FE 18]. — [AK] сопровождать, акомпанировать {en 2012 акомпанировать uzata nur en muziko (pianisto akompanis kantiston per sia muzikludo)}. — [UL] [RE]. — ... post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo [FE 18].

akord' [OA 1] * accord (mus., gram., etc.) | accord | Akkord | аккордъ (муз.), согласованіе (грамм.) | akord. {MUZ} {GRAM} — [RE]. — **Lingva Respondo 1903**: „agordi – signifas ‚ordigi' instrumenton, aranĝi la kordojn tiel, ke ilia sono estu *ĝusta, bona per si mem*; akordo = *reciproka* harmonio" [LR 47 G, Listo de korektoj al la manuskripto de *Vocabulaire Français-Esperanto* de Th. Cart 1903, PVZ VI, 51-66].

akr' - aigu | sharp | scharf | острый | ostry. — **akra** - aigu | sharp | scharf | острый | ostry [FE 7]. — [AK] aigre, piquant, vif, perçant, tranchant. — [UL]. — La dentoj de leono estas akraj [FE 7]. La tranĉilo tranĉas bone, ĉar ĝi estas akra [FE 16].

● **malakra** - La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon kaj mi devis uzi mian poŝan tranĉilon [FE 34].

akrid' - sauterelle | grass-hopper | Heuschrecke | саранча | szarańcza. {ZOO} — [RE].

akrobat-o [OA 2.1] — [EG 2] Akrobat

aks' - axe | axle | Achse | ось | oś. — [RE].

Aksel-o, [OA 4] {fr} aisselle | {en} armpit | {de} Achselhöhle | {it} ascella | {es} axila, sobaco | {pt} sovaco {ankaŭ: axila} | {ca} aixella. {ANAT} — [EG 2].

aksiom' [OA 1] axiome | axiom | Axiom, Grundsatz | аксіома | aksjomat. — [RE].

akt' [OA 1] * acte (théâtre, document) | act, deed | Akt (der), Akte (die) | актъ | akt. — [RE].

aktiva — El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon [FE 29, mankas en UV]. — **aktiv'** [OA 1] * actif (gram.) | active | aktiv, tätig | активный |

czynny. {GRAM} — **aktiv'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [Beau] actif.

aktor' [OA 1] * acteur | actor | Schauspieler | актеръ | aktor. — [RE].

Aktual-a, {legu: aktual-a} [OA 4] {fr} actuel | {en} present, of present interest | {de} zeitgemäss {legu: zeitgemäß} | {it} attuale, di attualità | {es} actual | {pt} actual {2012: atual} | {ca} actual. — [ER].

akupunktur/o. [OA 9] Kuracmetodo el la tradicia ĉina medicino, kiu konsistas en pikado de difinitaj korpopunktoj per pingloj. — [EV 1923] akupunktur-i {verbo}. [PIV 1970].

akurat' [OA 1] * ponctuel | punctual | pünktlich | аккуратный | akuratny, punktualny. — [DL] *... hieraŭ ni manĝis akurate je l' tria horo [DL 16.11]*. [RE].

akuŝ' - accoucher | lie in | niederkommen, entbunden werden | разрѣшится отъ бремени | powić. — [AK] accoucher (*intr.*) | be confined (*in childbed*) (*intr.*) | powić, odbyć połóg.

● **akuŝ'ist'in'** - sage-femme | midwife | Hebamme | акушерка | akuszerka. — [RE akuŝ'ist'].

— **Lingva Respondo 1907 [Pri „akuŝi]**: Vd. [LR 20 A, let. al Cart (1907-02-24), O.V. p. 539].

akut-a [OA 2.2] aigu | acute, sharp | akut — [EG 2] akut.

Akuz' [OA 3.1] {en} to accuse | {fr} accuser | {de} anklagen, beschuldigen | {es} acusar | {pt} accusar {de 2009: acusar} | {it} accusare | {pl} oskarzac {legu: oskarzać}. — [Kabe] {antaŭe kulp/ig/i – [RE]}.

akuzativ' - accusatif | accusative | Accusativ {de 1901: Akkusativ} | винительный падежъ | biernik. — **akuzativo** - accusatif | accusative | Accusativ {de 1901: Akkusativ} | винительный падежъ | czwarty przypadek [FE 28]. {GRAM} — [DL]. [RE]. — Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj [FE 28.2]. ... tiel same ni ankaŭ diras: "la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon", kaj la vortoj „ĝardenon", „tablon" staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en" kaj „sur" tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, ... [FE 28.3]. Anstataŭ la vorto „je" ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio [FE 29.3]. El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon [FE 29.8]. Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas ... [FE 29.10]. — [DL 1888]: *... se la senco ne montras klare, kian prepozicion ni devas uzi, ni ĉian {de 1888: ĉiam} povas uzi la vorton „je", aŭ la akuzativon sen prepozicio* [DL 8.7]. — **Rim.**: Kp. ankaŭ la artikolon pri „-n".

akv' - eau | water | Wasser | вода | woda. — **akvo** - eau | water | Wasser | вода | woda [FE 9]. — [UL]. — Ak-vo [FE 2]. Donu al la birdoj akvon, ĉar ili volas trinki [FE 9]. Inter aliaj aferoj tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko kaj alporti domen plenan grandan kruĉon [FE 13]. Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto ... [FE 15]. Vi devas nur iri al la fonto ĉerpi akvon; ... [FE 17]. Mia opinio estas: prenu mem akvon, se vi volas trinki [FE 19]. Fluanta akvo estas pli pura, ol akvo staranta senmove [FE 22]. ... el la kaldrono, en kiu sin trovas bolanta akvo, eliras vaporo [FE 25]. Akvo estas fluidaĵo [FE 35]. La suno rebrilas en la klara akvo de la rivero [FE 42].

● **super'akv'** - inonder, submerger | overflow, deluge | überschwemmen | наводнять | zalewać [UV super]. — **Rim.**: Kp. diluv/o [OA 4].

● **akv'o'melon'** - melon d'eau | water-melon | Wassermelone | арбузъ | arbuz [UV melon']. {BOT} — [RE].

Akvafort-o (gravuraĵo) [OA 4] {fr} {(gravuraĵo) mankas en Kajero II}, {fr} estampe gravée à l'eau-forte | {en} etching, aquafortis engraving | radiertes Blatt | {it} acquaforte (incisione ad) | {es} aguafuerte | {pt} aguaforte {legu: água-forte} | {ca} aiguafort. — [EG 2].

akvarel' [OA 1] aquarelle | aquarelle, water colours | Aquarell | акварель | akwarela. — [EG 2].

akvari' [OA 1] aquarium | aquarium | Aquarium | акварій | akwarjum. — [EG 2].

akvilegi-o [OA 2.2] ancolie | columbine | Aglei {BOT} — [EG 2] Glockenblume, Aglei.

al - à | to | zu (ersetzt zugleich den Dativ) | къ (замѣняетъ также дательный падежъ) | do (zastępuje też celownik). — **al** - à | to | zu (ersetzt zugleich den Dativ) | къ (замѣняетъ также дательный падежъ) |

do (zastępuje też przypadek trzeci) [FE 5]. — [AK] à, vers. — [UL]. — Al [FE 2]. — Donu al la birdoj akvon, ĉar ili volas trinki [FE 9].

● **aliĝi** — La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj [FE 39].

● **al'milit'** - conquérir | conquer | erobern | завоевывать | zawojować. — Kp. Konker-i, [OA 4].

● **al'mezur'** – essayer, ajuster | adapt | anpassen | примѣривать | przymierzać [UV mezur']. — [AK] {en} try on, fit on, adjust.

● **al'tranĉ'** - couper, tailler | cut out | zuschneiden | кроить | przykroić [UV tranĉ'].

— **Lingva Respondo 1908 [Pri "al" anstataŭ akuzativo]**: En tre *multaj* okazoj la prepozicio "al" povas tre bone esti uzata, por esprimi direkton; tamen ne en *ĉiuj* okazoj oni povas tion fari. Anstataŭ "mi veturas Londonon" oni povas tre bone diri "mi veturas al Londono" sed se anstataŭ la frazo "la muso kuris sub la liton" ni dirus "*al* sub la lito", la senco de la frazo iom ŝanĝiĝus. "Al" ordinare montras nur la *celadon*, la vojon al iu loko, dum la akuzativo povas enhavi en si ankaŭ la ideon de *atingo* de la celo; sekve la frazo "la muso kuris *al* sub la lito" montrus, ke la muso kuris en la *direkto* al sub la lito, sed pro ia kaŭzo ĝi ne atingis la lokon sub la lito, aŭ almenaŭ ni ne vidis tiun atingon. Tamen mi ripetas, ke en la plimulto da okazoj la diferenco inter "al" kaj akuzativo estas tiel malgranda, ke mi volis siatempe eĉ proponi komunan regulon, ke anstataŭ akuzativo de direkto oni povas ĉiam uzi la prepozicion "al" kun nominativo. La personoj, por kiuj la akuzativo de direkto prezentas ian malfacilaĵon, povas eĉ nun sen ia peko kontraŭ la gramatiko uzi en tiaj okazoj la prepozicion "al". Se ekzemple anstataŭ "venu ĉi tien" vi diros "venu al ĉi tie", oni povos diri, ke via *stilo* estas ne tute klasika, sed oni ne povos diri, ke vi faris gramatikan *eraron*. [Respondo 36, *La Revuo*, 1908, Majo].

alabastr' [OA 1] albâtre | alabaster | Alabaster | алебастръ | alabaster. — [RE].

alarm' [OA 1] * alarmer | alarm | alarmieren | бить тревогу | alarmować. — [EG 2].

alaŭd' - alouette | lark | Lerche | жаворонокъ | skowronek. {ZOO} — [RE].

albano [OA 8]. — [EG 2].

Albin-o, [OA 4] {fr} albinos | {en} an albino | Albino | {it} albino | {es} albino | {pt} albino | {ca} un albí. — [EG 2] albinos-o.

album' [OA 1] * album | album | Album | альбомъ | album. — [RE].

alcion' – alcyon {neniam uzata. 2012: martin-pêcheur} | halcyon | Eisvogel | зимородокъ | zimorodek. {ZOO} — [RE]. [EV 1923] alcedo {scienca sinonimo}.

ald-o [OA 2.2] alto (*voix*) | alto (*voice*) | Altstimme {MUZ} — [RE] [EG 2] Alt[stimme].

ale' [OA 1] * allée | alley | Allee | аллея | aleja. — [DL] *Promenante sur la aleo, ni renkontis la gedoktorojn N., ...* [DL 12.9]. [RE].

alegori' [OA 1] * allégorie | allegory | Allegorie | аллегорія | alegorja. — [RE].

Aleksandro — Aleksandro ne volas lerni, kaj tial mi batas Aleksandron [FE 9.7, mankas en la ĝusta alfabeta pozicio en UV]. — **Aleksandr'** [UV ĉj' {de} {ru} {pl}]. — **Aleksandr'** {deklarita Fundamenta de} [OA 7] (vira antaŭnomo).

● **Ale'ĉj'** [UV ĉj' {de} {ru} {pl}].

Alen-o, [OA 4] {fr} alène | {en} awl | {de} Ahle | {it} lesina | {es} lesna {en 2012 pli kutima: lezna} | {pt} sovela | {ca} alena. {TEK} — [EG 2]. [EG 1] alo.

alergi/o. [OA 9] Malsano kaŭzita de forta reago de la imunsistemo kontraŭ substancoj, kiuj normale estas sendanĝeraj, ekzemple manĝaĵoj, poleno, polvo k.s. {MED} — [PIV 1970].

alfabeto — ALFABETO [FE 1, mankas en UV] - ALPHABET | THE ALPHABET | Das Alphabet | АЗБУКА | ABECADŁO [FG alfabet]. {GRAM}. — **alfabet'** [OA 1] alphabet | alphabet | Alphabet {de 1996 ankaŭ: Alfabet} | алфавитъ | alfabet. — **alfabet'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [RE]. — **Rim.**: *La titolo „ALFABETO" mankas en FE, 2-a eld. 1898 kaj estis aldonita por la reeldono en la Fundamento en 1905.*

algebr' [OA 1] * algèbre | algebra | Algebra | алгебра | algiebra. {MAT} — [RE].

Alĝerio [OA 8] {GEO} — [Beaufront, L'Espérantiste 8-9/1898, p. 92-100]. [EG 2] Algerien.

alg-o [OA 2.1] {BOT} {ZOO} — [EG 2] alg-oj, Algen.

algoritm/o [OA 9] (en matematiko, komputado k.s.) Aro da precizaj reguloj aŭ preciza priskribo de la agoj farendaj por

solvi problemon aŭ atingi celon: *algoritmo de obligado*; *la Eŭklida algoritmo*; *prezenti algoritmon per komputila programo*. {MAT} — [Butin 1952] Algorithmus, methodisches Rechenverfahren.

alĥemi-o [OA 2.1]. {KEM} — [RE]. — [OA 8] II.A.1. La ses formoj: alkemio, arkaismo, arkitekturo, kemio, mekaniko kaj monarko estas oficialigitaj kiel paralelaj al la Oficiala alĥemio kaj al la Fundamentaj arĥaismo, arĥitekturo, ĥemio, meĥaniko kaj monarĥo.

ali' - autre | other | ander | иной | inny. — **alia** - autre | other | ander | иной | inny [FE 12]. — [UL]. — ... li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto [A 2.3]. ... ĉio alia, kion mi verkis aŭ verkos, ... estas nur verkoj privataj ... [A 3.6]. La erareco en la nacia traduko de tiu aŭ alia vorto ne prezentas grandan malfeliĉon, ĉar, komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto [A 4.5]. ... trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, kaj li perdus sian konfidon kaj apogon [A 4.6]. — El ŝiaj multaj infanoj unuj estas bonaj kaj aliaj estas malbonaj [FE 12.5]. Inter aliaj aferoj tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko ... [FE 13.3]. ... tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino [FE 23.3]. La hirundo flugis trans la riveron, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj [FE 26.14]. Ĝia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj [FE 27.2]. ... ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra [FE 27.3]. Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj [FE 28.2]. ... ke ĝi {la birdo} de alia loko flugis al la ĝardeno [FE 28.3]. La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj [FE 30.2]. Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ... [FE 30.10]. En tiuj ĉi boteletoj sin trovas diversaj acidoj: vinagro, sulfuracido, azotacido kaj aliaj [FE 35.6]. La tuta supraĵo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj kreskaĵoj [FE 35.18]. La lignisto vendas lignon, kaj la lignaĵisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn [FE 37.14]. Ŝi edziniĝis kun sia kuzo, kvankam ŝiaj gepatroj volis ŝin edzinigi kun alia persono [FE 39.7]. ... skatoleto aŭ alia objekto, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarujo [FE 40.15].

● **alie** — Ĝis la tempo, kiam ia ... institucio decidos alie ... [A 3.4].

● **tiu aŭ alia** — ... ĉiu regnano sciu, ke li neniam dependos de la kapricoj de tiu aŭ alia persono ... [A 3.1]. La erareco en la nacia traduko de tiu aŭ alia vorto ne prezentas grandan malfeliĉon, ... [A 4.5]. ... la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara [A 6.1]. Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna ... [A 8.1].

● **unu de la alia** — Vortoj, kiuj formas kune unu ideon, estas skribataj kune, sed dividataj unu de la alia per streketo, ... [UV, enkonduko 2].

alibi-o [OA 2.1] — [EG 2] Alibi

aligator' [OA 1] * alligator | alligator | Alligator | аллигаторъ | aligator. {ZOO} — [EG 2].

aline-o [OA 2.2] alinéa | break (*print*) | Absatz (*im Schriftw[esen]*). — [EG 2] Absatz, Alinea.

alinur-o [OA 2.2] langouste | rock lobster | Heuschrekenkrebs {evidente preseraro: estu Heuschreckenkrebs} {ZOO}

alk' - élan | elk | Elennthier {de 1901: Elenntier (ark.). 2012: Elch} | лось | łoś. {ZOO} — [AK] élan (*zool.*). — [RE].

alkemi/o. [OA 8] Moderna formo de: alĥemio. — A. alchemy, F. alchimie, G. Alchimie, H. {es} alquimia, I. {it} alchimia, P. {pt} alquimia. {KEM} — [OA 8] II.A.1. La ses formoj: alkemio, arkaismo, arkitekturo, kemio, mekaniko kaj monarko estas oficialigitaj kiel paralelaj al la Oficiala alĥemio kaj al la Fundamentaj arĥaismo, arĥitekturo, ĥemio, meĥaniko kaj monarĥo.

alkohol' [OA 1] * alcool | alcohol | Alkohol | алкоголь | alkohol. — [RE].

alkov' alcôve | alcove | Alkoven | альковъ | alkowa. — [RE].

almanak' [OA 1] * almanach | almanack | Almanach | альманахъ | kalendarz. — [RE].

almenaŭ - au moins | at least | wenigstens | по крайней мѣрѣ | przynajmniej. — [AK] au moins, du moins — [UL].

almoz' - aumône | alms | Almosen | милостыня | jałmużna. — [RE].

aln' - aune | alder | Erle | ольха | olsza. {BOT} — [AK] aune (*bot.*) — [RE].

Alo-o, [OA 4] {fr} aloès (bot.) | {en} aloe | {de} Aloe (Pflanze) | {it} aloe | {es} áloe | {pt} aloes {legu: aloés} | {ca} áloe {legu: àloe}. {BOT} — [RE].

alt' - haut | high | hoch | высокій | wysoki. — **alta** - haut | high | hoch | высокій | wysoki [FE 35]. — [UL].

● **altaĵo** — Tiu ĉi granda altaĵo ne estas natura monto [FE 35].

● **alteco** — La alteco de tiu monto ne estas tre granda [FE 35].

altar' - autel | altar | Altar | алтарь | ołtarz. — **altaro** - autel | altar | Altar | алтарь | ołtarz [FE 36]. — [UL]. — La gefianĉoj staris apud la altaro [FE 36].

alte' - althée {2012: althéa aŭ hibiscus} | althee | Eibisch | проскурнякъ | ślaz. {BOT} — [AK] {en} marshmallow. — [RE].

altern' - alterner | alternate | untereinander abwechseln {en 2012 ankaŭ: alternieren} | чередоваться | zmianiać się kolejno. — [RE].

alternativ-o [OA 2.1] — [EG 2] Alternative.

alud' - faire allusion | allude | anspielen | намекать | dawać przytyk. — [AK] napomknąć. — [RE].

alumet' - allumette | match | Zündhölzchen | спичка | zapałka. — [UL].

Alumini-o, [OA 4] {fr} aluminium | {en} aluminium | {de} Aluminium | {it} alluminio | {es} aluminio | {pt} aluminio {legu: alumínio} | {ca} alumini. {KEM} — [EG 2].

alun' - alun | alum | Alaun | квасцы | ałun. — [RE].

am' - aimer | love | lieben | любить | kochać, lubić. — **ami** - aimer | love | lieben | любить | lubić, kochać [FE 8]. — [UL]. — Mi amas la patron [FE 8.4]. Mi ne amas obstinajn homojn [FE 10.7]. Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna [FE 13.1]. Li amas min, sed mi lin ne amas [FE 18.1]. Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn; mi ankaŭ tre amas iliajn (infanojn) [FE 18.10]. Mi amas min mem, vi amas vin mem, li amas sin mem, kaj ĉiu homo amas sin mem [FE 18.12]. Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem [FE 18.13]. Malbonaj infanoj amas turmenti bestojn [FE 33.6]. En varmega tago mi amas promeni en arbaro [FE 34.11]. Li amas tiun ĉi knabinon pro ŝia beleco kaj boneco [FE 35.16]. Ĉu vi amas vian patron? Kia demando! kompreneble, ke mi lin amas [FE 41.7].

● **amata** — Aŭgusto estas mia plej amata filo [FE 22.11]. Mi estas amata. Mi estis amata. Mi estos amata. Mi estus amata. Estu amata. Esti amata [FE 25.1].

● **amo** — Oni ne forgesas facile sian unuan amon [FE 18.19].

● **malamo** — ... kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna [FE 13.1].

● **am'ind'um'** - courtiser | court, make love | den Hof machen | любезничать | umizgać się [UV am'ind'um'].

● **malaminda** — Sed pri ŝia fratino ni povas diri, ke ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si; ... [FE 23.4].

● **teatramanto** - Teatramanto ofte vizitas la teatron kaj ricevas baldaŭ teatrajn manierojn [FE 32.1].

— **Lingva Respondo 1907**: La formoj "amatas", "amitas" k.t.p., anstataŭ "estas amata", "estas amita", per si mem ne prezentus ian rompon en nia lingvo, kaj, se la Lingva Komitato volus ilin aprobi, oni povus tre bone ilin uzi. Tamen, se la privataj aŭtoroj per sia *propra* iniciativo volus uzi tiujn formojn, mi tion ĉi ne konsilus. Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tia okazo, se *as, is* k.t.p. signifus "estas", "estis" sed, kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo "esti", tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon *ne* havas. [Respondo 15, *La Revuo*, 1907, Aprilo].

Amar-a, [OA 4] {fr} amer | {en} bitter | {de} bitter | {it} amaro | {es} amargo | {pt} amargo | {ca} amargant. — [ER] {antaŭe: mal'dolĉ'a}.

amas' - amas, foule | crowd, mass | Haufen, Menge | куча, толпа | kupa, tłum. — **amaso** - amas, foule | crowd, mass | Haufen, Menge | куча, толпа | kupa, tłum [FE 32]. — [UL]. — Sur la bordo de la maro staris amaso da homoj [FE 32].

● **popol'amas'** - populace | mob, populace | Pöbel | чернь | pospólstwo, gmin [UV popol'].

amator/o. [OA 8] Neprofesiulo, kiu amas kaj praktikas ian aktivecon sportan, artan, sciencan... — A. amateur; F. amateur; G. Liebhaber (einer Sache) {2012 pli kutima: Amateur}; H. {es} aficionado, (amateur); I. {it} amatore, cultore; P. {pt} amador, curioso. — [EG 2] Liebhaber.

ambasad/o. [OA 8] Ambasadoro kun ties sekvantaro, konsilantaro ktp. — A. embassy, F. ambassade, G. Botschaft (diplomatisches Amt), H. {es} embajada, I. {it} ambasciata, P. {pt} embaixada.

ambasador' [OA 1] ambassadeur | ambassador | Gesandter {(ark.), en 2012: Botschafter} | посланникъ | ambasador. — [EG 2].

ambaŭ - l'un et l'autre | both | beide | оба | obaj. — **ambaŭ** - l'un et l'autre | both | beide | оба | obaj [FE 11]. — [AK] l'un et l'autre, tous deux — [RE]. — ... ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili [FE 11.2].

— **Lingva Respondo 1911 [Pri la uzado de "ambaŭ"]**: „Ambaŭ" signifas: "ĉiuj du", t.e. ĝi estas uzata anstataŭ "ĉiuj", kiam ni parolas nur pri du personoj aŭ objektoj. Tial la konjunkcian uzadon de "ambaŭ" en la frazo "ni loĝas en Londono ambaŭ en somero kaj en vintro" mi trovas tute ne aprobinda (estas konsilinde diri: "*kiel* en somero, *tiel ankaŭ* en vintro", aŭ "ne nur en somero, sed ankaŭ en vintro"). Kvankam mi ofte uzis la formon "la ambaŭ", tamen mi opinias nun, ke pli logike estas uzi la vorton "ambaŭ" *sen* artikolo. [Respondo 54, *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, p. 221].

ambici' [OA 1] ambition | ambition | Ehrgeiz | честолюбіе | ambicja.

ambos' - enclume | anvil | Amboss | наковальня | kowadło. — [RE].

ambr' [OA 1] ambre | ambergris | Ambra | амбра | ambra. — [RE].

ambrozi' [OA 1] * ambroisie | ambrosia | Ambrosia | амврозія | ambrozja. — [RE].

ambulanc' [OA 1] ambulance | ambulance | Ambulanz | подвижной лазаретъ | ambulans. — [EG 2].

ameb/o. [OA 9] Unuĉela vivulo, sin movanta per ŝajnpiedoj (loboj aŭ fadenoj de ĉelinterna substanco), vivanta en akvo, malseka tero aŭ parazite en bestoj aŭ homoj, ofte ŝanĝanta sian formon. (*Amoeba*, *Entamoeba* k.a. parencaj genroj.) {ZOO} — [EV 1923] [PV 1930].

amel' - amidon | starch | Stärkemehl | крахмалъ | krochmal. {KUIR} — [RE].

amend/i. [OA 9] Ŝanĝi parton de leĝo, rezolucio aŭ simila teksto per formala proceduro: *amendi leĝoproponon*; *amendi rezolucion*. **—** [EV 1923].

● **amend/o** [OA 9]. Ago amendi kaj ties rezulto (tekstoparto amende ŝanĝita aŭ aldonita). — [EV 1923] [PV 1930] amendo = amendamento.

Amerik/o. [OA 8] La kontinento inter Atlantiko kaj Pacifiko, konsistanta el tri partoj: Norda, Centra kaj Suda Amerikoj. — A. America, F. Amérique, G. Amerika, H. {es} América, I. {it} America, P. {pt} America {legu: América}. {GEO} — [E-isto 1889, p. 16; 1893, p. 81, 94, 96] Amerika Filozofia Societo; Ameriko (Amerikaj bestejoj; Amerika oficejo de la ‚Esperantisto'). [Beau] Amerik(o), Amérique. [EG 2] Amerika.

ametist-o [OA 2.1] — [EG 2] Amethyst.

amfibi' - amphibie | amphibium | Amphibie | земноводное животное | płaz. {ZOO} — [RE].

amfiteatr-o [OA 2.1]. {ARKI} — [RE] [EG 2] Amphitheater.

amfor' [OA 1] * amphore | amphora | Amphore | амфора | amfora. — [EG 2] Amphora.

amik' - ami | friend | Freund | другъ | przyjaciel. — **amiko** - ami | friend | Freund | другъ | przyjaciel [FE 10]. — [UL]. — ... por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, ... [A 1]. Kiu volas perfektiĝi en Esperanto, al tiu mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn, ..., kiuj estas eldonitaj de niaj plej kompetentaj amikoj por ĉiu nacio aparte ... [A 5.3]. — Rakontu al mia juna amiko belan historion [FE 10.6]. Tiuj ĉi du amikoj promenas ĉiam duope [FE 14.13]. Kiam oni estas riĉa (aŭ riĉaj), oni havas multajn amikojn [FE 16.21]. Ne riproĉu vian amikon, ĉar vi mem plimulte meritas riproĉon; li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto [FE 22.7]. Vi parolas sensencaĵon, mia amiko [FE 35.1].

● **amikeco** — Mi vivas kun li en granda amikeco [FE 35.19].

● **malamiko** - ... ekzemple: ni povas diri "pardoni al la malamiko" kaj "pardoni la

malamikon", sed ni devas diri ĉiam "pardoni al la malamiko lian kulpon" [FE 29.11]. Malamiko venis en nian landon [FE 33]. La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj [FE 39.14].

am'ind'um' - courtiser | court, make love | den Hof machen | любезничать | umizgać się.

amnesti' [OA 1] amnistie | amnesty | Amnestie |амнистія | amnestja. — [RE].

amoniak' - ammoniac | ammoniac | Ammoniak, Salmiak | нашатырный спиртъ | amoniak. {KEM} — [AK 1914] Ammoniak. — [RE].

● **sal'amoniak'** - sal ammoniac | sal ammoniac | Salmiak | нашатырь | salmiak [UV sal'amonika]. {KEM}

Amor-o [Z], [OA 4] {fr} (myth.) dieu de l'Amour, Cupidon, Eros | {en} God of Love, Cupid | {de} Liebesgott, Amor | {it} amore {legu: Amore}, Cupido | {es} Amor (mit.), Cupido | {pt} Amor {ankaŭ: Cupido, Eros} | {ca} Cupidó {legu: Cupido}. {MIT} — [Einst OV 1888] [GE 1904].

amortiz-i [OA 2.1] — [EG 2] amortisieren.

ampleks' - extension | extension | Umfang | объемъ | objętość. — [AK 1914] dimension, étendue | extent, size | Grösse {legu: Größe}, Umfang. — [RE].

ampol/o. [OA 8] Eta vazo, ordinare el vitro, uzata interalie a) en kemia laboratorio, b) por hermete enteni medikamentojn, c) por envakue enteni la filamentojn de elektra lampo. — A. phial, ampoule, bulb; F. ampoule, fiole; G. Phiole, Kolben (chem. Glasgefäss {legu: Glasgefäß}), Ampulle, Glühbirne; H. {es} ampolla, bombilla, pipeta, redoma; I. {it} ampolla, fiala, fialetta, bulbo; P. {pt} ampola.

amput' [OA 1] amputer | amputate | amputieren | ампутировать | amputować. {MED} — [EG 2].

amulet-o [OA 2.1] — [EG 2] Amulett.

amuz' - amuser | amuse | belustigen | забавлять | bawić. — [RE].

an' - membre, habitant, partisan; ex. regn' l'état - regn'an' citoyen | inhabitant, member; e. g. Nov-Jork {tiel, sen apostrofo} New York - Nov-Jork'an' New Yorker | Mitglied, Einwohner, Anhänger; z. B. regn' Staat - regn'an' Bürger; Varsovi'an' Warschauer | членъ, житель, приверженец; напр. regn' государство - regn'an' гражданинъ; Varsovi'an' Варшавянинъ | członek, mieszkaniec, zwolennik; np. regn' państwo - regn'an' obywatel; Varsovi'an' Warszawianin. — **an** - membre, habitant, partisan; ex. regno l'état - regnano citoyen | inhabitant, member; e. g. Nov-Jorko New York - Nov-Jorkano New Yorker | Mitglied, Einwohner, Anhänger; z. B. regno Staat - regnano Bürger; Varsoviano Warschauer | членъ, житель, приверженец; напр. regno государство - regnano гражданинъ; Varsoviano Варшавянинъ | członek, mieszkaniec, zwolennik; np. regno państwo - regnano obywatel; Varsoviano Warszawianin [FE 37]. — [UL].

● **an'ar'** - troupe | troop | Trupp, Truppe | труппа | gromada, trupa. — **Rim.**: Kp. trup' [OA 1].

● **Kalvinano** — Luteranoj kaj Kalvinanoj estas kristanoj [FE 37.8].

● **krist'an** - chrétien | christian | Christ | христіанинъ | chrześci janin [UV Krist']. — Luteranoj kaj Kalvinanoj estas kristanoj [FE 37.8].

● **Luterano** — Luteranoj kaj Kalvinanoj estas kristanoj [FE 37.8].

● **Nov-Jork'an'** - New Yorker [UV an']. — **Nov-Jorkano** - New Yorker [FE 37 an'].

● **Parizano** — La Parizanoj estas gajaj homoj [FE 37.5].

● **policano** — Nia urbo havas bonajn policanojn, sed ne sufiĉe energian policestron [FE 37.7].

● **provincano** — Li estas nelerta kaj naiva provincano [FE 37.10].

● **regn'an'** - citoyen | {angla mankas} | Bürger | гражданинъ | obywatel [UV an']. — **regnano** - citoyen | {angla mankas} | Bürger | гражданинъ | obywatel [FE 37 an']. — Por ke ia regno estu forta kaj glora ... estas necese, ke ĉiu regnano sciu, ke li ... devas obei ĉiam nur klarajn, tute difinitajn fundamentajn leĝojn de sia lando, ... [A 3.1]. — Ĉiuj loĝantoj de regno estas regnanoj [FE 37.2].

● **Rusujano** — Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj [FE 37.9].

● **samregnano** — La loĝantoj de unu regno estas samregnanoj ... [FE 37.11]

● **samreligiano** — ... la konfesantoj de unu religio estas samreligianoj [FE 37.11].

● **samurbano** — La loĝantoj de unu regno estas samregnanoj, la loĝantoj de

unu urbo estas samurbanoj, la konfesantoj de unu religio estas samreligianoj [FE 37.11].

● **ŝipano** — La ŝipanoj devas obei la ŝipestron [FE 37.1].

● **urbano** — Urbanoj estas ordinare pli ruzaj, ol vilaĝanoj [FE 37.3].

● **Varsovi'an'** - Warschauer | Варшавянинъ | Warszawianin [UV an']. — **Varsoviano** Warschauer | Варшавянинъ | Warszawianin [FE 37 an'].

● **vilaĝ'an'** - paysan | countryman | Bauer | крестьянинъ | wieśniak [UV vilaĝ']. — **vilaĝano** - paysan | countryman | Bauer | крестьянинъ | wieśniak [FE 37]. — [AK] villager, peasant. — Urbanoj estas ordinare pli ruzaj, ol vilaĝanoj [FE 37.3].

anagal-o [OA 2.2] mouron (rouge) | scarlet pimpernel | Gauchheil (rotes) {BOT} — [EG 2] Gauchheil *(botan.)*

anagram-o [OA 2.1] — [Beau] anagramme. [EG 2] Anagramm.

anakronism-o [OA 2.1] — [Beau] anachronisme. [EG 2] Anachronismus.

analiz' [OA 1] * analyser | analyse | zergliedern {ark.}, analysieren | анализировать | analizować. — [DL 1888] *... kian {de 1888: kiam} pasus la jaro, mi intencis eldoni libreton, en kiu estus analizitaj ĉiuj pensoj esprimitaj de l' publiko [DL A 2.1]. ... ili teorie parolis pri leĝoj de bonsoneco; anstataŭ analizi, ĉu mi bone kreis la vortaron [DL I.3].* [RE].

analog' [OA 7]. — **Rim.**: La radikon **analogi'** [OA 1] oni ŝanĝis al *analog'(a)* en 1923, kaj *analogi'* ne plu estas oficiala (publikigita en cirkulero de la 12-a de Majo 1923 kaj konfirmita per OA 7).

analogi' [OA 1] analogie | analogy | Analogie | аналóгія | analogja. — **Rim.**: La radikon *analogi'(o)* oni ŝanĝis al *analog'(a)* en 1923, kaj *analogi'* ne plu estas oficiala (publikigita en cirkulero de la 12-a de Majo 1923 kaj konfirmita per OA 7). — [RE].

ananas' - ananas | ananas | Ananas | ананасъ | ananas {BOT}. — [AK] {en} pine-apple. — [RE].

anapest-o [OA 2.1] {POEZ} — [EG 2] Anapäst *(Versfuß)*.

Anarĥi' anarki' [OA 3.2] {en} anarchy | {fr} anarchie | {de} Anarchie | {es} anarquia {legu: anarquía} | {pt} anarchia {2012: anarquia} | {it} anarchia | {pl} --- {traduko mankas}. — [EG 2].

anas' - canard | duck | Ente | утка | kaczka {ZOO}. — [RE].

● **mol'anas'** - canard à duvet {2012 ankaŭ: eider} | eider-duck | Eiderente | rara | miękopiór [UV mol']. {ZOO}

anatomi' [OA 1] * anatomie | anatomy | Anatomie | анатомія | anatomja. — [Beau] anatomie {kp. anatomisto E-isto 30/1889}.

anĉ/o. [OA 9] Maldika elasta langeto, kies vibrado kreas la tonojn ĉe kelkaj instrumentoj, ekz. hobojo, klarneto kaj saksofono. {MUZ} — [EV 1923] anĉ-o = langeto 2. [PV 1930].

anĉov' [OA 1] anchois | anchovy | Anchovis | анчоусъ | serdela. — [EG 2]. — **Rim.**: **1.** Malgranda manĝebla fiŝo, ordinare konservata en oliva oleo*,* uzata kiel spicaĵo *(Engraulis encassicolis).* [Kabe 1910]. — **2.** Regas granda konfuzo en la diversaj lingvoj por la nocioj: sardelo, sardino, anĉovo, ... - Plej akcepteblaj difinoj ŝajne estas: *a) Sardelo:* komerca termino por fiŝetoj el la familio klupeedoj, precipe engraŭloj, peklitaj en ladskatoloj aŭ bareloj. *b) Sardino:* 1. Vulgara sinonimo de: pilĉardo. 2. Komerca termino por specioj de klupeedoj, precipe pilĉardoj, sprotoj kaj haringetoj, konservataj en oleo, en tomatosaŭco, k.s. *c) Anĉovo:* spicitaj engraŭloj aŭ sprotoj [Albault 1963].

anekdot' [OA 1] * anecdote | anecdote | Anekdote | анекдотъ | anegdota. — [RE].

aneks-i [OA 2.1] — [EG 2] annektieren.

anemon-o [OA 2.1] {BOT} — [EG 2] Anemone.

anĝel' - ange | angel | Engel | ангелъ | anioł. {RELI} — [UL] [RE].

angelik-o [OA 2.2] angélique (*bot.*) | garden angelica | Engelwurz {BOT} — [EG 2] Engelwurz.

angil' - anguille | eel | Aal | угорь (животное) | węgorz. {ZOO} — [RE].

angin' [OA 1] angine | quinsy | Angina, Braune | ангина | angina. {MED} — [RE].

angl' [OA 7] (nomo de ano de popolo) — [UL].

● **angl**a – [A, mankas en UV]. Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (precipe en la angla parto) tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2].

ANGORO [OA 6.1] 1-e: *Malsaneca sento de sufoko kun korprematec*o; 2-e: *Sento de sufoko, kaŭzata de timego, maltrankvileco* |

{en} anguish | {fr} angoisse | {de} (Quälende, Herzens-, Todes-) Angst | {es} angustia | {it} angoscia | {pl} duszność, tesknota. — [Marta].

angul' - angle | corner, angle | Winkel | уголъ | kąt. — **angulo** - coin, angle | corner, angle | Winkel | уголъ | kąt [FE 23]. — [AK 1914] angle, coin | Winkel, Ecke. — [UL]. — Sed pri ŝia fratino ni povas diri, ke ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si; kaj la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro [FE 23.4]. Mi disŝiris la leteron kaj disĵetis ĝiajn pecetojn en ĉiujn angulojn de la ĉambro [FE 42.3].

Anilin-o, [OA 4] {fr} aniline | {en} aniline | {de} Anilin | {it} anilina | {es} anilina | {pt} anilina | {ca} anilina. {KEM} — [EG 2].

anim' - âme | soul | Seele | душа | dusza. — **animo** - âme | soul | Seele | душа | dusza [FE 31]. — [UL]. — La korpo estas morta, la animo estas senmorta [FE 31.6].

● **facilanima** — Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj ... [A 1]. ... ni devas tion ĉi fari ne facilanime, sed nur en okazoj de efektiva neceseco [A 9].

animal/o. [OA 8] Komuna vorto por bestoj kaj homoj, opone al vegetaloj kaj mineraloj. — A. animal (as opposed to vegetable or mineral), F. animal, G. Lebewesen, H. {es} animal, I. {it} animale, P. {pt} animal. {ZOO}

aniz' - anis | anise | Anis | анисъ | anyż. {BOT} — [AK] {en} anise (*arom. plant*). — [RE].

ankaŭ - aussi | also | auch | также | także. — **ankaŭ** - aussi | also | auch | также | także [FE 14]. — [AK] aussi, encore. — [UL]. — Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li, kaj ... li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto [A 2.3]. — Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; due mi dankas vin por la prunto; trie mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon [FE 14.6]. Kie estas la knaboj? — Ili estas en la ĝardeno [FE 16.8]. — Kie estas la knabinoj? — Ili ankaŭ estas en la ĝardeno [FE 16.9]. Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn; mi ankaŭ tre amas iliajn (infanojn) [FE 18.10]. Anstataŭ „la" oni povas ankaŭ diri „l'" (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo) [FE 27.4]. ... oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, ..., oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, ... [FE 27.5]. ... tiel same ni ankaŭ diras: ... [FE 28.3]. Anstataŭ la vorto „je" ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio [FE 29.3]. Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem [FE 32.3]. Mia frato ne estas granda, sed li ne estas ankaŭ malgranda: li estas de meza kresko [FE 33.1]. Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu; ... [FE 39.11]. Lia edzino estas tre laborema kaj ŝparema, sed ŝi estas ankaŭ tre babilema kaj kriema [FE 41.12].

ankoraŭ - encore | yet, still | noch | еще | jeszcze. — [mankas en FE 20] — [AK] encore, jusqu'à présent. — [UL]. — Mi ĝin ankoraŭ ne serĉis; kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin jam ne trovos [FE 20.8]. Ne riproĉu vian amikon, ĉar vi mem plimulte meritas riproĉon; li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto [FE 22.7]. — La tempo pasinta jam neniam revenos; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas [FE 22.8]. Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ... [FE 30.10]. La riĉeco de tiu ĉi homo estas granda, sed lia malsaĝeco estas ankoraŭ pli granda [FE 35.15].

ankr' - ancre | anchor | Anker | якорь | kotwica. {MAR} — [RE].

Anno — Petro, Anno kaj Elizabeto estas miaj gefratoj [FE 36, mankas en UV]. — **Ann'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (virina antaŭnomo).

anomali-o [OA 2.1] — [Beau] anomalie. [EG 2] Anomalie.

anonc' - annoncer | annonce, advert | annonciren | объявлять | ogłaszać. — [AK 1914] faire une annonce | announce, advertise | anzeigen, ankündigen. — [RE].

anonim' [OA 1] * anonyme | anonymous | anonym | анонимный | anonimowy. — [Beau] anonyme.

anser' - oie | goose | Gans | гусь | gęś. {ZOO} — [RE].

anstataŭ - au lieu de | instead | anstatt, statt | вмѣсто | zamiast. — **anstataŭ** - au lieu de | instead | anstatt, statt | вмѣсто | zamiast [FE 16]. — [UL]. — Ci skribas (anstataŭ „ci" oni uzas ordinare „vi") [FE 16.2]. Anstataŭ kafo li donis al mi teon kun sukero, sed sen kremo [FE 26.11]. Anstataŭ „la" oni povas ankaŭ diri „l'" (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo) [FE 27.4]. Anstataŭ la vorto „je" ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio [FE 29.3]. Ekzemple, ni povas diri "obei al la patro" kaj "obei la patron" (anstataŭ "obei je la patro") [FE 29.9].

● **anstataŭ'i** - remplacer | replace | ersetzen | замѣнять | zastępować.

— **Lingva Respondo 1908 [Pri „por" aŭ „anstataŭ" antaŭ infinitivo]**: Vd. ĉe „por".

— Lingva Respondo 1911 [Pri la akuzativo post „anstataŭ"]: Kiel ĉiu alia prepozicio, tiel ankaŭ "anstataŭ" per si mem postulas ĉiam la nominativon; se tamen ofte oni trovas ĉe bonaj aŭtoroj post "anstataŭ" la akuzativon, tiu ĉi lasta estas uzita ne pro la prepozicio, sed pro aliaj cirkonstancoj. Ekzemple, en la frazo: "Petro batis Paŭlon anstataŭ Vilhelmon", la lasta parto de la frazo prezentas nur *mallongigon* (= anstataŭ *bati* Vilhelmon), kaj la akuzativo forigas ĉiun dubon pri tio, ke anstataŭigita estis ne la batanto, sed la batato. [Respondo 51, *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, p. 2].

ant' - marque le participe présent actif | ending of pres. part. act. in verbs | bezeichnet das Participium pres. act. | означаетъ причастіе настоящаго времени дѣйст. залога | oznacza imiesłów czynny czasu teraźniejszego. — **ant** - marque le participe actif | ending of pres. part. act. in verbs | bezeichnet das Participium praes. act. | означаетъ причасіе настоящаго времени дѣйств. залога | oznacza imieslów czynny czasu teraźniejsz [FE 14]. — **ant** - Le *participe présent actif*, {est caractérisé} par *ant*: *far'ant'a* - faisant, *far'ant'e* - en faisant. | The present participle active ends in *ant*, e. g. *far'ant'a*, „he who is doing"; *far'ant'e*, „doing". | Partizipium präsentis aktivi {endet} auf *ant*; z.B. *far'ant'a*, machender; *far'ant'e*, machend. | Дѣйствит. залога настоящаго времени — *ant* (*far|ant|a* дѣлающій, far|ant|e дѣлая). | Imiesłów czynny czasu teraźniejszego — *ant* (*far/ant/a* czyniący, *far/ant/e* czyniąc). [FG 6f]. — [UL].

● **atakanto** - Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn [FE 14].

● **batanto** — Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato [FE 22.3].

● **libr'o'ten'ant'o** - teneur de livres | bookkeeper | Buchhalter | бухгалтеръ | buchalter [UV libr'].

● **promenante** — Promenante sur la strato, mi falis [FE 22.2]. ... unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis [FE 39.11].

— **Lingva Respondo 1911 [La senco de la participa sufikso]**: Se anstataŭ la kunsufiksa vorto "estanta" ni uzus ian simplan sensufiksan vorton (ekzemple: "nuna"), tiam ĝia substantiva formo kompreneble neniel povus signifi homon, sed povus signifi nur abstraktaĵon; sed la sufikso de participo enhavas en si mem la ideon pri io *konkreta* (*iu* aŭ *io*, kiu ...as), sekve verbo, substantivigita per participa sufikso, povas esprimi nur konkretaĵon (ulon aŭ aĵon). Kaj ĉar en la grandega plimulto da okazoj la participa sufikso, laŭ sia senco mem, esprimas ulon, tial laŭ la principo de sufiĉo ni ne bezonas konstante aldonadi al ĝi la sufikson *ul*, kaj nur en tiuj maloftaj okazoj, kiam per la dirita sufikso ni volas esprimi ne ulon, sed aĵon, ni aldonas la sufikson *aĵ*. [LR 114 B, Respondo 50, *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, p. 1].

Antarkt/o. [OA 9] La regiono kaj kontinento ĉirkaŭ la suda poluso. — Kp. Arkt/o.

● **Antarkt/a** [OA 9]. Rilata al Antarkto; tia kiel (en) Antarkto: *la Antarkta Cirklo*; *Antarkta klimato*; *Antarkta glacio*. — [EG 2] **antarkt-a**, antarktisch.

antaŭ - devant | before | vor | предъ | przed. — **antaŭ** - devant | before | vor | предъ | przed [FE 8]. — [AK] devant, avant. — [UL]. — ... estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo [A 1.1]. ... la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ

ĉio esti netuŝeblaj [A 4.1]. ... ĉiu bona esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la fundamenton de nia lingvo [A 10.2]. — Antaŭ la domo staras arbo [FE 8.11]. Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito faris al li plezuron [FE 20.6]. Kiam vi venos al mi, li jam antaŭe diros al mi la veron (aŭ li estos dirinta al mi la veron; aŭ antaŭ ol vi venos al mi, li diros al mi la veron) [FE 24.6]. La pastro, kiu mortis antaŭ nelonge (aŭ antaŭ nelonga tempo), loĝis longe en nia urbo [FE 25.12]. La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo [FE 33.4]. Oni metis antaŭ mi manĝilaron, ... [FE 34.10]. Antaŭ nia militistaro staris granda serio da pafilegoj [FE 38.11].

● **antaŭa** — Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, kion fari [FE 38.10].

● **antaŭe** — Kiam vi vidis nin en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron (aŭ li estis dirinta al mi la veron) [FE 24.4]. Kiam vi venos al mi, li jam antaŭe diros al mi la veron (aŭ li estos dirinta al mi la veron; aŭ antaŭ ol vi venos al mi, li diros al mi la veron) [FE 24.6]. Mi ne farus la eraron, se li antaŭe dirus al mi la veron (aŭ se li estus dirinta al mi la veron) [FE 24.8]. Kiam mia patro venos, diru al mi antaŭe la veron (aŭ estu dirinta al mi la veron) [FE 24.10]. ... sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri, ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo ... [FE 28.3]. Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino ... [FE 32.5].

● **antaŭparolo** [A, titolo]. ... la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita [A 11.2].

● **antaŭ'tuk'** - tablier, devantier {ne plu uzata} | apron | Schürze | передникъ | fartuch. {VEST}

anten' [OA 1] antenne | antenna | Fühlhorn | щупальце | macka. — [EG 2].

antibiotik/o. [OA 9] Organika substanco produktata de mikroboj aŭ ĥemie sintezata, kiu povas malhelpi plimultiĝon de bakterioj kaj aliaj mikroboj, kaj eĉ ilin mortigi: *penicilino estas vaste uzata antibiotiko*; *multajn infektajn malsanojn oni kuracas per antibiotiko*. {MED} — [PIV 1970].

Anticip' [OA 3.2] {en} to anticipate | {fr} anticiper | {de} vorausnehmen, voraustun, vorausgreifen, anticipieren {2012: antizipieren} | {es} anticipar | {pt} antecipar | {it} anticipare | {pl} --- {traduko mankas}. — [EG 2] antizipieren.

antikv' - antique | antique | alt, altethümlich {preseraro, legu alterthümlich, de 1901: altertümlich, 2012 ankaŭ: antiquiert} | древній | starożytny. — [AK] antique, ancien | ancient, antique. — [RE 1889]: antikv'ist, antikv'.

antilop' [OA 1] antilope | antelope | Antilope | antilope {evidente tro ofte presita} | антилопа | antylopa. {ZOO} — [RE].

antimon' - antimoine | antimony | Antimon | сурьма | antymon. {KEM} — [RE].

antipati' [OA 1] * antipathie | antipathy | Abneigung {2012 ankaŭ: Antipathie} | антипатія | antypatja. — [RE].

antipod' [OA 1] * antipode | antipodes | Antipode | антиподъ | antypod. — [RE 1889]: antipod'oj {pluralo}.

antitez-o [OA 2.1] — [EG 2] Antithese.

antologi-o [OA 2.1] — [EG 2] Anthologie.

Antono — El ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa [FE 10, mankas en UV]. — **Anton'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

antropolog' [OA 1] [OA 7] {En piednoto apud astrolog' en [OA 1]:} Same: agronomo, antropologo, k. t. p.

antropologi' [OA 1] * anthropologie | anthropology | Anthropologie | антропологія {de 1918: антропология} | antropologja. — [EG 2].

Anunciaci' - Annonciation de la Vierge | Annunciation | Verkündigung Mariä | Благовѣщеніе | Zwiastowanie. {RELI} — [RE].

anus/o. [OA 9] Malfermaĵo, kiu troviĝas ĉe la fino de la nutrokanalo, kaj tra kiu eliras la fekaĵoj (komunuze nomata *postaĵotruo*). {ANAT} — [EG 2] After.

aort-o [OA 2.1] {ANAT} — [EG 2] Aorta (große Puls- oder Schlagader).

aparat' [OA 1] * appareil | apparatus | Apparat | аппаратъ | aparat. — [RE].

apart' - qui est à part, separé {preseraro, legu: séparé} | separate | besonder, abgesondert | особый | osobny. — [AK 1914] particulier, séparé, spécial | separate, special. — [UL]. — **Rim.**: Nur la

germanaj tradukoj estas adverboj, la aliaj tradukoj adjektivoj. La germanaj adjektivoj estas „besonderer“, „abgesonderter“; „besonder“ ne ekzistas, la adverbo estas „besonders“. Laŭ BRO 4 apart/a (adjektivo).

● **aparte** - à part | separately | besonders | oddzielnie [UV, enk. 2]. — ... tiel ekzemple la vorto « frat'in'o », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enk. 2].

Apartament' [OA 3.2] {en} apartments | {fr} appartement | {de} Appartement | {es} apartamiento | {pt} aposento {en 2012 apenaŭ uzata; pli kutima: apartamento} | {it} appartamento | {pl} apartament. — [EG 2].

aparten' - appartenir | belong | gehören | принадлежать | należeć. — **aparteni** - appartenir | belong | gehören | принадлежать | należeć [FE 5]. — [AK] należeć (do kogo). — [UL]. — La rozo apartenas al Teodoro [FE 5]. La domo apartenas al li [FE 18]. La surtuto estas aĉetita de mi, sekve ĝi apartenas al mi [FE 25].

apati' [OA 1] * apathie | apathy | Apathie | апатія | apatja. — [Beau] apathie. [EG 2] Apathie, Teilnahmslosigkeit.

Apelaci' [OA 3.2] {en} legal appeal, appellation | {fr} en appeler | {de} appellieren | {es} apelar | {pt} appelar {de 2009: apelar} | {it} appellarsene | {pl} apelowac {legu: apelować}. — [EG 2] appellieren. — **Rim.**: Ĉiuj referenc-lingvoj tradukas per verbo, nur la angla per substantivo.

apenaŭ - à peine | scarcely | kaum | едва | ledwie. — **apenaŭ** - à peine | scarcely | kaum | едва | ledwie [FE 19]. — [UL]. — Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis unu sinjorinon, ..., kiu eliris el la arbaro ... [FE 19.5]. Apenaŭ ŝia patrino ŝin rimarkis, ŝi kriis al ŝi: “Nu, mia filino?” [FE 21.1].

aper' - paraître, apparaître {de 1990: paraitre, apparaitre} | appear | erscheinen | являться | zjawiać się. — [RE].

● **mal'aper'** - disparaître {de 1990: disparaitre} | dissappear | verschwinden | исчезать | znikać.

aperitiv/o. [OA 9] Trinkaĵo, ordinare alkohola, trinkata (kiel apetitvekilo) antaŭ manĝo. {KUIR} — [PV 1930].

APERTURO [OA 6.1] *Malfermaĵo* | {en} aperture | {fr} ouverture | {de} Oeffnung (z. B. Loch, Spalte u. a.) {legu: Öffnung} | {es} apertura | {it} apertura | {pt} apertura. — [ER] {antaŭe mal/ferm/aĵ/o}.

apetit' [OA 1] * appétit | appetite | Appetit | апетитъ | apetyt. — [RE].

api-o [OA 2.2] ache (*bot.*) | smallage | Eppich {BOT} — [EG 2] Eppich, (wilde) Sellerie.

aplaŭd' - applaudir | applaud | applaudiren {de 1901: applaudieren} | аплодировать | oklaskiwać. — [AK 1914] Beifall spenden {2012 pli kutima: applaudieren} | хлопать в ладоши, аплодировать. — [RE].

Aplik' [OA 3.1] {en} to apply | {fr} appliquer | {de} anwenden | {es} aplicar | {pt} applicar {legu: aplicar} | {it} applicare | {pl} zastosowac {legu: zastosować}. — [EG 2].

APLOMBO [OA 6.1] *Tre granda memfido; nekonsternebleco* | {en} self-assurance, imperturbability | {fr} aplomb | {de} Selbstbewusstsein, -sicherheit (im Auftreten) | {es} aplomo (serenidad) | {it} disinvoltura | {pl} aplomb. — [Beau] aplomb (assurance imperturbable).

apog' - appuyer | lean | anlehnen | опирать | opierać. — [AK 1914] lean upon, support (*trans*.) | anlehnen, stützen | opierać (o co). — [RE].

apoge' [OA 1] apogée (astr.) | apogee | Apogäum, Erdferne | апогей | apogeum, szczyt. {ASTR} — [Beau] apogée (astr.).

apokrif' [OA 1] apocryphe | apocryphal | apokryphisch | апокрифъ | apokryf. — [Beau] apocryphe.

apolog' [OA 1] apologue | apologue | Apolog | апологъ | apolog. — [Beau] apologue.

apopleksi' [OA 1] apoplexie | apoplexy | Schlagfluss {(ark.), 2012: Schlaganfall, Apoplex, Apoplexie} | апоплексія | apopleksja. {MED} — [RE].

apostol' [OA 1] apôtre | apostle | Apostel | апостолъ | apostoł. {RELI} — [RE].

apostrof-o [OA 2.1] {GRAM} — [EG 2] Apostroph.

apotek' [OA 1] pharmacie | drug-store | Apotheke | аптека | apteka. — [RE].

apoteoz-o [OA 2.1] — [EG 2] Apotheose, Vergötterung.

apozici-o (*gram.*) [OA 2.1] {GRAM} — [EG 2] Apposition.

apr' - sanglier | wild boar | Eber | боровъ, вепрь, кабанъ | wieprz. {ZOO} — [AK] кабан, вепрь | dzik. — [RE].

April' - Avril {2012: avril} | April | April | Апрѣль | Kwiecień. — **Aprilo** - Avril {2012: avril} | April | April | Апрѣль | Kwiecień [FE 12]. — [DL]. [RE]. — Januaro estas la unua monato de la jaro, Aprilo estas la kvara, Novembro estas la dek-unua, Decembro estas la dek-dua [FE 12.13]. — [DL 1888] — *La dek du monatoj de l' kristana jaro estas: Januaro, Februaro, Marto, Aprilo, Majo, Junio, Julio, Aŭgusto, Septembro, Oktobro, Novembro, Decembro* [DL 16.6].

aprob' - approuver | approve | billigen, gut heissen {legu: heißen} | одобрять | aprobować. — [RE].

apud - auprès de | near by | neben, an | возлѣ, при | przy, obok. — **apud** - auprès de | near by | neben, an | при, возлѣ | przy, obok [FE 8]. — [AK] neben, an, bei | возле, подле, около. — [UL]. — La filo staras apud la patro [FE 8.6]. En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki [FE 15.1]. ... tra la fenestro, kiu sin trovas apud la pordo, la vaporo iras sur la korton [FE 25.14]. Kiam li estis ĉe mi, li staris tutan horon apud la fenestro [FE 26.16]. La gefianĉoj staris apud la altaro [FE 36.5]. Li sidas apud la tablo kaj dormetas [FE 38.5]. ... unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis [FE 39.11]. — [DL 1888] *Starante sur la supro de l' monteto, kiu estas apud nia domo, li vidis la tutan ĉirkaŭaĵon [DL 12.6]. Mi ne loĝas ĉe mia frato, mi loĝas aparte; sed mia loĝejo estas apud la lia [DL 16.20].* {Kvin pliaj trafoj en DL}.

ar' - une réunion de certains objets; ex. arb' arbre - arb'ar' forêt | a collection of objects; e. g. vort' word - vort'ar' dictionary | Sammlung gewisser Gegenstände; z. B. arb' Baum - arb'ar' Wald; ŝtup' Stufe - ŝtup'ar' Treppe, Leiter | собраніе данныхъ предметовъ; напр. arb' дерево - arb'ar' лѣсъ, ŝtup' ступень - ŝtup'ar' лѣстница | oznacza zbiór danych przedmiotów; np. arb' drzewo - arb'ar' las; ŝtup' szczebel, stopień - ŝtup'ar' drabina, schody. — **ar** - une réunion de certains objets; ex. arbo arbre - arbaro forêt | a collection of objects; e.g. arbo tree - arbaro forest; ŝtupo step - ŝtuparo stairs | Sammlung gewisser Gegenstände; z.B. arbo Baum - arbaro Wald; ŝtupo Stufe - ŝtuparo Treppe, Leiter | собраніе данныхъ предметовъ; напр. arbo дерево - arbaro лѣсъ; ŝtupo ступень - ŝtuparo лѣстница | zbiór danych przedmiotów; np. arbo drzewo - arbaro las; ŝtupo szczebel - ŝtuparo drabina [FE 19]. — [UL]. — **Rim.**: Pri objektoj oni diras *groupe* aŭ *collection* en la franca, ne *réunion*.

● **arb'ar'** - forêt | {angla mankas} | Wald | лѣсъ, | las [UV ar']. — **arbaro** - forêt | forest | Wald | лѣсъ | las [FE 19 ar']. — **arbaro** - Ar-bá-ro [FE 3].

● **burokrat/ar/o**. [OA 9] Tuto de la burokratoj *1* (en unu ŝtato k.s.). — [PV 1930].

● **koment/ar/o**. [OA 9] Komentario. Kolekto aŭ serio da komentoj *2*, precipe tiaj, kiuj celas komprenigi la malfacilaĵojn de teksto aŭ verko: *eldono de Korano kun komentaro*.

● **ŝtup'ar'** - Treppe, Leiter | лѣстница | drabina, schody [UV ar']. — **ar** – {franca mankas} | stairs | Treppe, Leiter | лѣстница | drabina [FE 19 ar'].

● **vort'ar' -** dictionary [UV ar'] — **vortaro** - la « Universala Vortaro » [A 2.1]. ... ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro ... nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2]. La « Fundamento de Esperanto » tute ne devas esti rigardata kiel la plej bona lernolibro kaj vortaro de Esperanto [A 5.1]. Kiu volas perfektiĝi en Esperanto, al tiu mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn, ... [A 5.3]. [pliaj trafoj en A]. — Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron [FE 34.14]. — UNIVERSALA VORTARO DE LA LINGVO INTERNACIA ESPERANTO [UV, titolo]. Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enk. 1].

— **Rim.: Lingva Respondo 1908 [Pri la sufikso *ar*]:** Vi diras, ke la sufikson *ar* ni devas uzi nur por esprimi aron da tiaj objektoj, kiuj estas esence ligitaj inter si kaj prezentas ian unuecon, kolektivan objekton (ekzemple "vortaro", "arbaro", "homaro"); sed por ia nombro da samspecaj objektoj, kiuj ne estas esence ligitaj inter si kaj ne prezentas kune ian unu ideon, vi konsilas uzi la esprimon "aron da" (ekzemple: "li ellernis aron da vortoj", "tie kuŝis aro da dehakitaj arboj" k.t.p.). Vian opinion mi

trovas ĝusta. Pri la dua senco de la vorto “aro” (mezuro) volu kompari mian respondon № 24. (LR 10, Respondo 33, *La Revuo*, 1908, Majo)

arabesk-o (*arĥ*) [OA 2.1] {ARKI} — [Beau] arabesque. [EG 2] Arabeske.

arabo [OA 8] — [E-isto 1893, p. 85]. [Beau] Arabo (un) Arabe. [EG 2] Araber.

arane’ - araignée | spider | Spinne | паукъ | pająk. {ZOO} — [RE].

aranĝ’ - arranger | arrange | einrichten | устроивать | urządzać. — [RE].

arb’ - arbre | tree | Baum | дерево | drzewo. {BOT} — **arbo** - arbre | tree | Baum | дерево | drzewo [FE 8]. — **arbo** - arbre | tree | Baum | дерево | drzewo [FE 19 ar‘]. — [UL]. — Antaŭ la domo staras arbo [FE 8.11]. La birdo ne forflugis: ĝi nur deflugis de la arbo, alflugis al la domo kaj surflugis sur la tegmenton [FE 31.20]. Sur la arbo sin trovis multe (aŭ multo) da birdoj [FE 32.11].

● **arb’et’aĵ’** - arbrisseau, buisson | shrub, bush | Strauch | кустъ | krzak. {BOT}

● **arbaro** - forêt | forest | Wald | лѣсъ | las [FE 19 ar’]. — Ar-bá-ro [FE 3]. Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris el la arbaro kaj petis de ŝi trinki [FE 19.5]. La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej proksima arbaro [FE 21.6]. ... kaj la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro [FE 23.4]. En varmega tago mi amas promeni en arbaro [FE 34.11]. En somero ni trovas malvarmeton en densaj arbaroj [FE 38.4].

● **arbeto** - Mi ne pendigis mian ĉapon sur tiu ĉi arbeto; sed la vento forblovis de mia kapo la ĉapon, kaj ĝi, flugante, pendiĝis sur la branĉoj de la arbeto [FE 39.12].

● **avokad/uj/o**, **avokad/arb/o**. [OA 9 avokad’] Arbo el tropika Ameriko, kies frukto estas avokado. (*Persea americana*.) {BOT}

● **gujav/uj/o**, **gujav/arb/o**. [OA 9 gujav’] Arbo el tropika Ameriko, kreskigata pro sia frukto gujavo. (*Psidium guajava*.) {BOT}

● **mandarin/uj/o**, **mandarin/arb/o**. [OA 9 mandarin’] Arbeto, kies frukto estas mandarino. (*Citrus reticulata*.) {BOT}

● **mang/uj/o**, **mang/arb/o**. [OA 9 mang’] Tropika fruktarbo indiĝena en suda Azio, kies frukto estas mango. (*Mangifera indica*.) {BOT}

arbalest-o [OA 2.2] arbalète | crossbow | Armbrust {MIL} — [EG 2] Armbrust.

arbitr’ - arbitraire | arbitrary | willkürlich | произвольный | samowolny. — [RE].

Arbitraci’ [OA 3.2] {en} arbitration | {fr} arbitrage | {de} Schiedspruch, Arbitrage | {es} arbitraje | {pt} arbitragem | {it} arbitrato | {pl} arbitracja. {JUR} — [EG 2].

ARBUSTO [OA 6.2] *(Botaniko) Arbusto, kies trunko estas ligneca ĉe la bazo, kaj herbeca ĉe la supro* | {en} shrub | {fr} arbuste | {de} Strauch | {es} mata | {it} arbusto | {pl} krzak. {BOT} — [EG 2].

arĉ’ - archet | bow (fiddle) | Violinbogen | смычекъ | smyczek. {MUZ} — [AK 1914] bow, (*Violin {legu: violin}, etc.*) | Fiedelbogen. — [RE].

Ard’ [OA 3.1] {en} to be ardent, to glow | {fr} être ardent | {de} glühen | {es} arder | {pt} arder | {it} essere ardente | {pl} palac {legu: palać}. — [EG 2].

arde’ - héron | heron | Reiher | цапля | czapla. {ZOO} — [RE].

ardez’ - ardoise | slate | Schiefer | аспидъ (минералъ) | łupek. {GEOL} — [AK] {en} slate (*substance*). — [RE].

are/o [OA 9] **1** Mezuro de surfaco: *ŝi mezuris la areon de la kampo*; *la areo de la ĉambro estas 20 kvadrataj metroj*; *tiu lando havas areon de pli ol cent mil kvadrataj kilometroj*. **2** Parto de surfaco; tereno: *tie estas parka areo, kie oni povas promeni*; *kulturata areo*. — [EG 2] Flächeninhalt.

aren’ - arène | wrestling-place | Arena, Rennbahn | арена, ристалище | arena. — [AK] {en} arena. — [RE].

areometr’ [OA 1] aréomètre | areometer | Aräometer | ареометръ | areometr. — [EG 2].

arest’ - arrêter | arrest | verhaften | арестовать | aresztować. — **aresti** - arrêter | arrest | verhaften | арестовать | aresztować [FE 22]. — [RE].

● **arestito** — La soldatoj kondukis la arestitojn tra la stratoj [FE 22.14].

arĝent’ - argent (métal) | silver | Silber | серебро | srebro. {KEM} — **arĝento** - argent (métal) | silver | Silber | серебро | srebro [FE 19]. — [UL].

● **arĝenta** — Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, kiu estis en la loĝejo [FE 19.4]. “Certe, mi alportis arĝentan vazon speciale por tio, por doni trinki al tiu ĉi sinjorino! [FE 19.7]. Ŝi kombas al si la harojn per arĝenta kombilo [FE 34.5].

argil' - argile | clay | Thon {de 1901: Ton} | глина | glina. {GEOL} — [RE].

argument' - argumenter | argue | beweisen | доказывать | dowodzić. — [AK 1914] argumentieren, beweisen, Schlüsse ziehen. — [RE].

Arĥaik' arkaik' [OA 3.2] {en} archaic | {fr} archaïque | {de} altertümlich {2012: archaisch, veraltet} | {es} arcaico | {pt} archaico {legu: arcaico} | {it} arcaico | {pl} --- {traduko mankas}. — [EG 2] (malnoviĝinta) veraltet.

arĥaism' – [A, mankas en UV] Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo [A 8.2]. Sed, prezentante parton de la fundamento, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, ... [A 8.3]. — **arĥaism'** [OA 8] = vorto aŭ esprimo ne plu uzata en la komuna lingvo. — [OA 8] II.A.1. La ses formoj: alkemio, arkaismo, arkitekturo, kemio, mekaniko kaj monarko estas oficialigitaj kiel paralelaj al la Oficiala alĥemio kaj al la Fundamentaj arĥaismo, arĥitekturo, ĥemio, meĥaniko kaj monarĥo. — [EG 2] Archaismus.

Arĥeolog', arkeolog' [OA 3.2] {en} archæologist | {fr} archéologue | {de} Archäolog {legu: Archäologe}, Altertumsforscher | {es} arqueologo {legu: arqueólogo} | {pt} archeologo {legu: arqueólogo} | {it} archeologo | {pl} archeolog. — [Kabe] arĥeologo {antaŭe: arĥeologi/ist/o}.

Arĥeologi', arkeologi' [OA 3.2] {en} archæology | {fr} archéologie | {de} Archäologie, Altertumskunde | {es} arqueologia {legu: arqueología} | {pt} archeologia {legu: arqueologia} | {it} archeologia | {pl} archeologja. — [RE 1888]: arĥeologi'.

Arĥipelag', arkipelag' [OA 3.2] {en} arcipelago | {fr} archipel | {de} Archipel | {es} archipielago {legu: archipiélago} | {pt} archipelago {legu: arquipélago} | {it} arcipelago | {pl} archipelag. — [RE 1889]: arĥipelag'.

Arĥitekt', arkitekt' [OA 3.2] {en} architect | {fr} architecte | {de} Architekt | {es} arquitecto | {pt} architecto {de 2009: arquiteto} | {it} architetto | {pl} architekt. — [RE 1889]: arĥitekt'. — **Rim.**: La formo „arkitekt'" kun -k- estas propono de Z el lia „Cirkulera Letero al la ... LK – Pri Neologismoj" de 1906-11-22, kiu estu paralele uzebla apud la tiama „arĥitekturisto" [LZ I 317].

arĥitektur' - architecture | architecture | Architectur {de 1901: Architektur} | архитектура | architektura. — [OA 8] II.A.1. La ses formoj: alkemio, arkaismo, arkitekturo, kemio, mekaniko kaj monarko estas oficialigitaj kiel paralelaj al la Oficiala alĥemio kaj al la Fundamentaj arĥaismo, arĥitekturo, ĥemio, meĥaniko kaj monarĥo. — [RE arĥitekt']. — **Rim.**: AV komentas: „Laŭ Ockey en "Akademia Vortaro-Radikaro" iaspeca decido pri la elementoj ARKITEKTUR/ kaj MONARK/ estis farita en la jaro 1922. Ambaŭ elementoj estis aldonitaj en 8OA. Ankoraŭ ne estas eltrovite, kio efektive okazis rilate al tiuj elementoj en 1922. Supozeble temas pri decido pri uzado de K anstataŭ Ĥ post R, kaj ne pri efektiva aldono al UV de ARKITEKTUR/ kaj MONARK/. Ĉi tie [= en AV] do ARKITEKTUR/ kaj MONARK/ aperas kun indiko pri 8OA."

Arĥiv', Arkiv' [OA 3.2] {en} archiv | {fr} archives | {de} Archiv | {es} archive | {pt} archive {legu: arquivo} | {it} archivie | {pl} archivum. — [RE 1889]: arĥiv'.

ari' [OA 1] air (mus.) | air | Arie | арія | arja. {MUZ} — [RE].

aristokrat' [OA 1] * aristocrate | aristocrat | Aristokrat | аристократъ | arystokrata. — [OA 8] II.B.5. Estas oficialigitaj jenaj vortoj: aristokratio, demokratio, fotografio, litografio kiel paruloj al la Fundamenta fotografi kaj al la Oficialaj: aristokrato, demokrato kaj litografi. — [RE].

aristokrati/o. [OA 8] Reĝimo, en kiu la politika povo apartenas al la aristokrataro. — A. aristocracy (form of government), F. aristocratie, G. Aristokratie, Adelsherrschaft, H. {es} aristocracia, I. {it} {it} aristocrazia, P. {pt} aristocracia. — [OA 8] II.B.5. Estas oficialigitaj jenaj vortoj: aristokratio, demokratio, fotografio, litografio kiel paruloj al la Fundamenta fotografi kaj al la Oficialaj: aristokrato, demokrato kaj litografi.

aritmetik' [OA 1] * arithmétique | arithmetic | Arithmetik | ариѳметика | arytmetyka. {MAT} — [RE].

ark' - arc | arch, bow | Bogen | дуга | łuk. — [RE].

● **ark'aĵ'** – voûte {de 1990: voute} | vault | Gewölbe | сводъ | sklepiente. {ARKI}

arkad' [OA 1] arcade | arcade | Arkade | аркада | arkada. {ARKI} — [Beau] arcade.

arkaism/o. [OA 8] Moderna formo de: arĥaismo. — A. archaism, obsolete word; F. archaïsme, G. Archaismus, H. {es} arcaísmo, I. {it} arcaismo, P. {pt} arcaísmo. — [OA 8] II.A.1. La ses formoj: alkemio, arkaismo, arkitekturo, kemio, mekaniko kaj monarko estas oficialigitaj kiel paralelaj al la Oficiala alĥemio kaj al la Fundamentaj arĥaismo, arĥitekturo, ĥemio, meĥaniko kaj monarĥo.

arkitektur/o. [OA 8] Moderna formo de: arĥitekturo. — A. architecture, F. architecture, G. Architektur, H. {es} arquitectura, I. {it} architettura, P. {pt} arquitetura. — [OA 8] II.A.1. La ses formoj: alkemio, arkaismo, arkitekturo, kemio, mekaniko kaj monarko estas oficialigitaj kiel paralelaj al la Oficiala alĥemio kaj al la Fundamentaj arĥaismo, arĥitekturo, ĥemio, meĥaniko kaj monarĥo.

Arkt/o. [OA 9] La regiono ĉirkaŭ la norda poluso. — Kp. Antarkt/o [OA 9].

● **Arkt/a** [OA 9]. Rilata al Arkto; tia kiel (en) Arkto: *la Arkta Oceano*; *la Arkta Cirklo*; *Arkta klimato*. — [EG 2] arkt-a, arktisch.

arleken' - arlequin | harlequin | Hanswurst {2012 ankaŭ: Harlekin} | арлекинъ, шутъ | błazen, arlekin. — [RE].

arm' - armer | arm | rüsten | снаряжать, вооружать | uzbrajać. — [AK] {en} to arm | вооружать.

arme' [OA 1] * armée | army | Armee | армія | armja. {MIL} — [RE].

armeno [OA 8] — [EG 2] Armenier.

arnik-o [OA 2.1] {BOT} — [EG 2] Wohlverleih, Arnika.

arogant' - arrogant | arrogant | anmassend, hochmüthig {legu: anmaßend, hochmütig; 2012: arrogant} | наглый, высокомѣрный | zarozumiały. — [AK] наглый, нахальный.

arom' [OA 1] * arome {legu: arôme} | aroma | Aroma | ароматъ | aromat, woń.

arpeĝ' [OA 1] arpège | arpeggio | Arpeggio | арпеджіо | arpeggio. {MUZ}

arsenik' - arsenic | arsenic | Arsenik | мышьякъ | arszenik.

art' - art | art | Kunst | искусство | sztuka, kunszt. — [RE 1889]: artist'.

arteri-o [OA 2.1]. {ANAT} — [RE]. — [EG 2] Arterie.

artifik' - artifice | artifice | Kniff | уловка | fortel. — [AK 1914] artifice, subterfuge | List, Kniff | fortel, sztuka.

artik' - articulation | joint | Gelenk | суставъ | staw. {ANAT} — [AK] staw (anat.).

artikol' - article | article | Artikel | статья, членъ | artykuł. — **artikolo** - article | article | Artikel | членъ, статья | artykuł, przedimek [FE 27]. {GRAM} — [AK] article (litt., gram.). — La artikolo „la" estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj [FE 27.1]. — [DL 1888]: *artikul'. La vorto "la" estas nomata "artikulo" {nun: artikolo}; ĝi estas uzata tian, kian {de 1888: kiam} ni parolas pri objektoj konataj. Anstataŭ "la" oni povas ankaŭ diri "l' ", se ĝi ne estos malbonsone* [DL 1.7]. *Se iu ne komprenas bone la uzon de la artikulo, li povas tute ĝin ne uzi, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa* [DL 1.8]. *Aliaj ekbrilis per senfinaj filozofadoj kaj skribis instruitajn artikulojn* [DL I.3.b]. *Kelkajn fojojn mi eĉ legis longajn artikulojn {nun: artikolojn} pri mia afero ...* [DL I.3.c].

artileri' [OA 1] artillerie | artillery | Artillerie | артиллерія | artylerja. {MIL} — [RE].

artiŝok' - artichaut | artichoke | Artischoke {2012: Artischocke} | артишокъ | karczoch. {BOT}

artrit' - goutte | gout | Gicht | ломота въ суставахъ | artretyzm. {MED} — [AK] подагра.

as' - as | ace | Ass (Kart[en]sp[iel]) | тузъ | as. {LUD}

as - marque le présent d'un verbe | ending of the present tense in verbs | bezeichnet das Präsens | означаетъ настоящее время глагола | oznacza czas teraźniejszy. — **as** - marque le présent d'un verbe | ending of the present tense in verbs | bezeichnet das Präsens | означаетъ настоящее время глагола | oznacza czas teraźniejszy [FE 5]. — Le *présent* est caractérisé par *as*; ex.: *mi far'as* — je fais. | The present tense ends in *as*, e. g. *mi far'as*, „I do". | Das Präsens endet auf *as*; z.B. *mi far'as*, ich mache. | Настоящее время принимаетъ окончаніе *as* (напримѣръ: *mi far|as* я дѣлаю). | Czas teraźniejszy ma zakończenie *as*. (Przykład: *mi far/as* ja czynię). [FG 6a]. — [UL].

asbest/o. [OA 9] Mola griza fibra minerala substanco, el kiu oni povas fari teksaĵon izolantan kontraŭ varmego kaj

fajro. — [OA 9] Noto: La oficialigita difino de *asbesto* bedaŭrinde enhavas eraron. Asbesto ne estas ĉiam griza. Tiu eraro estis malkovrita nur kiam estis tro malfrue por haltigi la oficialigan proceduron. La Akademio intencas iam oficiale ĝustigi tiun difinoteksto. — [EG 2] Asbest.

asekur' - assurer | insure | assecuriren {(ark.) versichern} | страховать | asekurować. — [AK 1914] assurer (*par contrat*) | versichern.

asemble/o. [OA 8] Interkonsiliĝa aŭ leĝodona instanco aŭ organo de iu organizaĵo, kontraste al la ekzekutiva responda instanco. — A. assembly, F. assemblée, G. Versammlung, H. {es} asamblea, I. {it} assemblea, P. {pt} assembléia {de 2009: assembleia}. — [PVS] {ne ĉe Z.}.

asert' [OA 1] assurer, affirmer | assert | versichern, behaupten | утверждать | twierdzić. — [EG 2] asserieren {ark.}, behaupten.

asesor' [OA 1] * assesseur | assessor | Assessor | ассесоръ | asesor.

asfalt' [OA 1] asphalte | asphalt | Asphalt | асфальтъ | asfalt. — [RE].

asign' - assigner | assign | anweissen {legu: anweisen} | ассигновать | asygnować, przekazać. — [RE].

asimil-i (*trans*) [OA 2.1] — [EG 2] assimilieren.

asist/i. [OA 8] Pro devo aŭ profesio helpi en fake difinita maniero: *~i kirurgon ĉe operacio; sociala ~antino en fabriko*. — A. to assist (officially), to be in attendance (as experts or advisers), to support, to take part in; F. assister, servir d'assistant; G. beistehen, assistieren; H. {es} asistir, servir de asistente; I. {it} assistere, essere assistente; P. {pt} assistir, auxiliar.

asoci' [OA 1] association | association | Association | ассоціація | stowarzyszenie.

asonanc-o [OA 2.1] {MUZ} — [EG 2] Assonanz.

asparag' - asperge | asparagus | Spargel | спаржа | szparag. {BOT}

aspekt' [OA 1] aspect | aspect | Anblick, Aussehen | наружность | wygląd. — [EG 2] Aussehen, Anblick.

asperg-i [OA 2.2] asperger | to sprinkle | besprengen {RELI} — [EG 2] *(mit Weihwasser)* besprengen, benetzen.

aspid' - aspic | asp, adder | Natter | аспидъ (змѣй) | żmija. {ZOO} — [RE].

Aspir' [OA 3.2] {en} to aspire | {fr} aspirer à, tendre à | {de} streben nach | {es} aspirar | {pt} aspirar | {it} aspirare a, agognare | {pl} aspirowac {legu: aspirować}.

aspirin/o. [OA 9] Medikamento uzata precipe kontraŭ doloro, febro kaj inflamo, konsistanta el substanco kun la ĥemia formulo CH_3-CO-O-C_6H_4-COOH. {MED} — [EV 1923] [PIV 1970].

astm' [OA 1] asthme | asthma | Asthma, Atemnot | астма | astma. {MED}

astr' [OA 1] * astre | planet, star, heavenly body | Gestirn | небесное свѣтило | ciało niebieskie. {ASTR}

astrolog' [OA 1] * astrologue | astrologer | Astrolog | астрологъ {de 1918: астролог} | astrolog. — [EG 2]. {En piednoto: „Same: agronomo, antropologo, k. t. p.“} — **Rim.**: Pri la signifo de tiu piednoto vd. Waringhien, Scienca Revuo vol. 7, n-ro 28 (1955), p. 137-143 (141), kiu demandas: „Ĉu la piednoto de la Unua O.A. signifas. ke ĉiu agantnomo finiganta per -nom' aŭ -log' estas oficiala, se la responda sciencnomo kun -nomi' aŭ -logi' estas tia? (5) Se jes, ĉu oni ne devas etendi tiun regulon al la aliaj analogaj pseŭdo-sufiksoj [nome al „-grafi', -krati', -mani', -mati', pati', -urgi' kaj zofi', al kiuj ankaŭ respondas nomoj de agantoj sen -i- (geografo, demokrato, megalomano, diplomato. homeopato, dramaturgo. teozofo ktp.)“]? (6) Aŭ ĉu ne estus pli simple oficialigi nur la tiuspecajn agantonomojn kaj krome unu sufikson -i-, kun la signifo de .”abstrakta sed ne matematika okupiĝo de la koncerna aganto"? (7)“. Por diskuto vd. la Ĝeneralan Parton.

astrologi' [OA 1] astrologie | astrology | Astrologie | астрологія | astrologja. — [RE].

astronom' [OA 1] * astronome | astronomer | Astronom | астрономъ | astronom.

astronomi' [OA 1] astronomie | astronomy | Astronomie | астрономія | astronomja. — [RE].

at' - marque le participe présent passif | ending of pres. part. pass. in verbs | bezeichnet das Participium praes. passivi | означаетъ причастіе настоящаго времени страдат. залога | oznacza imiesłów bierny czasu teraźniejszego. — **at** - marque le participe présent passif | ending of pres. part. pass. in verbs | bezeichnet das Participium praes. passivi | означаетъ причастіе настоящаго времени страд.

залога | oznacza imiesłów bierny czasu teraźniejszego [FE 22]. — **at** - Le *participe présent passif* [est caractérisé], par *at*: *far'at'a* - étant fait, qu'on fait | The present participle passive ends in *at*, e. g. *far'at'e*, „being done" | Partizipium präsentis passivi — *at*; z.B. *far'at'a*, der gemacht wird | Страдат. залога настоящ. времени — *at* (*far|at|a* дѣлаемый) | Imiesłów bierny czasu teraźn. — *at* (*far/at/a* czyniony) [FG 6h]. — [UL].

● **aĉetata** — Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi [FE 25.4].

● **adresato** — ĉar nur pri tiaj vortoj ni povas esti certaj, ke nia adresato ilin nepre trovos en sia vortaro [A 7.1].

● **altrudata** — ... tiuj ĉi vortoj devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj [A 7.1].

● **amata** — Aŭgusto estas mia plej amata filo [FE 22.11]. Mi estas amata. Mi estis amata. Mi estos amata. Mi estus amata. Estu amata. Esti amata [FE 25.1].

● **aprobata** —… por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn oficialajn, …, de la vortoj kaj reguloj rekomendataj private, kiuj eble ne al ĉiuj esperantistoj estas konataj aŭ eble ne de ĉiuj estas aprobataj [A 5.4].

● **batato** — Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato [FE 22.3].

● **dividata** — Vortoj, kiuj formas kune unu ideon, estas skribataj kune, sed dividataj unu de la alia per streketo, tiel ekzemple la vorto « frat'in'o », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enkonduko 2].

● **far'at'a** - étant fait, qu'on fait | der gemacht wird | дѣлаемый | czyniony [FG 6h].

● **far'at'e** - „being done" [FG 6h].

● **havata** — Mono havata estas pli grava ol havita [FE 22.12].

● **konata** —… por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn oficialajn, …, de la vortoj kaj reguloj rekomendataj private, kiuj eble ne al ĉiuj esperantistoj estas konataj aŭ eble ne de ĉiuj estas aprobataj [A 5.4].

● **konstruata** — Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita [FE 25.6]. Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn [FE 25.10].

● **kreata** — Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; … [FE 27.5].

● **nekonata** — ... en korespondado kun personoj nekonataj estas bone ĉiam peni uzadi nur vortojn el la «Fundamento» ... [A 7.1].

● **nomata** — Patro kaj patrino kune estas nomataj gepatroj [FE 36.1].

● **pagata** — Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi [FE 25.7].

● **presata** — ... tiuj ĉi aŭhaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj ... [A 8.3].

● **regato** — … [fundamentaj leĝoj], kiuj estas egale devigaj por la regantoj kaj regatoj … [A 3.1].

● **rekomendata** —… por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn oficialajn, …, de la vortoj kaj reguloj rekomendataj private, kiuj eble ne al ĉiuj esperantistoj estas konataj aŭ eble ne de ĉiuj estas aprobataj [A 5.4]. … tiuj ĉi vortoj devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj [A 7.1]. ... ĉio bona, kio ne troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel rekomendata [12].

● **rigardata** — ... jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: … [A 2.1]. … ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj; ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, … [A 3.4]. Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardataj kiel oficialaj [A 3.5]. La « Fundamento de Esperanto » tute ne devas esti rigardata kiel la plej bona lernolibro kaj vortaro de Esperanto [A 5.1]. … tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo ... [A 7.1]. ... ĉio bona, kio ne troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel rekomendata [12].

● **rompata** — ... eĉ ĉe la plej granda perfektiĝado la unueco de Esperanto neniam estos rompata [A 8.3].

● **serĉata** — Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi [FE 25.9].

● **skribata** — Vortoj, kiuj formas kune unu ideon, estas skribataj kune, sed dividataj unu de la alia per streketo, tiel ekzemple la vorto « frat'in'o », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enkonduko 2].

● **tolerata** — … jam estus ŝanĝo, kiu … en verko fundamenta ne povas esti tolerata [A 4.3].

● **turnata** — … li petas, ke la okuloj de ĉiuj esperantistoj estu ĉiam turnataj ne al li, sed al tiu ĉi libro [A 3.3].

● **uzata** — La artikolo „la" estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj [FE 27.1]. Metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo) [FE 32.6].

● **uzateco** — Kiam ... registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon ..., tiam ... [A 1.2].

— **Lingva Respondo 1907**: La formoj "amatas", "amitas" k.t.p., anstataŭ "estas amata", "estas amita", per si mem ne prezentus ian rompon en nia lingvo, kaj, se la Lingva Komitato volus ilin aprobi, oni povus tre bone ilin uzi. Tamen, se la privataj aŭtoroj per sia *propra* iniciativo volus uzi tiujn formojn, mi tion ĉi ne konsilus. Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tia okazo, se *as, is* k.t.p. signifus "estas", "estis" sed, kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo "esti", tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon *ne* havas. [Respondo 15, *La Revuo*, 1907, Aprilo].

atak' - attaquer | attack | angreifen | нападать | napadać, atakować. — **ataki** - attaquer | attack | angreifen | нападать | atakować [FE 14]. — [RE].

● **atakanto** - Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn [FE 14.14].

atavism-o [OA 2.1] — [EG 2] Atavismus.

ateism-o [OA 2.1] {RELI} — [EG 2] Atheismus.

Ateist' [OA 3.2] {en} atheist | {fr} athée | {de} Atheist | {es} ateo | {pt} ateo {legu: ateu} | {it} ateista | {pl} --- {traduko mankas} — [EG 2] Atheist.

atenc' - attenter | attempt | einen Anschlag (Attentat) machen | покушаться | robić zamach. — [AK] {en} make an attempt against, assault.

atend' - attendre | wait, expect | warten, erwarten | ждать, ожидать | czekać. — **atendi** - attendre | wait, expect | warten, erwarten | ждать, ожидать | czekać [FE 22]. — [UL]. — Venu, ni atendas vin, Savonto de la mondo [FE 22.9]. Kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi ion novan, sed baldaŭ ni vidis, ke ni trompiĝis [FE 40.7]. Mi foriras, sed atendu min, ĉar mi baldaŭ revenos [FE 42.5].

● **atendite** — Li venis al mi tute ne atendite [FE 22.15].

atent' - attentif | attentive | aufmerksam | внимательный | uważny. — **atenta** - attentif | attentive | aufmerksam | внимательный | uważny [FE 26]. — Li diras, ke mi estas atenta [FE 26.17]. Li petas, ke mi estu atenta [FE 26.18].

atest' - témoigner | attest, affirm | zeugen, bezeugen, bescheinigen | свидѣтельствовать | świadczyć. — [AK] {en} attest, testify (*certify*). — [RE].

ating' - atteindre | attain, reach | erlangen, erreichen | достигать | dosięgać. — **atingi** - atteindre | attain, reach | erlangen, erreichen | достигать | dosięgać [FE 42]. — Ni ĉiuj kunvenis, por priparoli tre gravan aferon; sed ni ne povis atingi ian rezultaton, kaj ni disiris [FE 42.1].

Atlantik/o. [OA 8] La oceano inter Eŭropo kaj Ameriko. — A. Atlantic, F. l'Atlantique; G. Atlantik, Atlantischer Ozean; H. {es} Atlántico, I. {it} Atlantico, P. {pt} Atlântico. {GEO}

atlas/o. [OA 8] Libroforma kolekto de mapoj, desegnaĵoj, bildoj, fotoj ktp. pri aparta temo: *geografia, historia, anatomia, moda* ~*o*. — A. atlas, F. atlas; G. Atlas, Kartensammlung; H. {es} atlas, I. {it} atlante, P. {pt} atlas. — [OA 8] II.A.4. Estas oficialigitaj sateno (ia ŝtofo) kaj atlaso (kolekto de kartoj, ktp . .), malgraŭ la jama oficialeco de atlaso (= sateno). — [RE].

atlas-o [OA 2.2] satin | satin | Atlasköper (Stoff, Seide) — [OA 8] II.A.4. Estas oficialigitaj sateno (ia ŝtofo) kaj atlaso (kolekto de kartoj, ktp.), malgraŭ la jama oficialeco de atlaso (= sateno). — [EG 2] Atlas(köper), Atlas (Kartensammlung).

atlet' [OA 1] * athlète | athlete | Athlet | атлетъ | atleta.

atmosfer' [OA 1] * atmosphère | atmosphere | Atmosphäre | атмосфера | atmosfera. — [RE].

atom' [OA 1] atome | atom | Atom | атомъ {de 1918: атом} | atom. — [RE].

atribu' [OA 1] attribuer | attribute | zuschreiben | приписывать | przypisywać. — [EG 2] zuschreiben, beimessen.

Atribut' [OA 3.2] {en} attribute | {fr} attribut (signe distinctif) | {de} Attribut | {es} atributo | {pt} atributo | {it} attributo | {pl} atrybut. {GRAM}

atripl' - patte d'oie | chenopodium | Melde | лебеда | łoboda. {BOT} — [AK 1914] arroche (bot.) | orach (*bot.*) | Gänsefuss (Pflanze) {legu: Gänsefuß}

atut' - atout | trump | Trumpf | козырь | kozera. {LUD} — [AK] {en} a trump (*cards*).

aŭ - ou | or | oder | или | albo, lub. — **aŭ** - ou | or | oder | или | albo, lub [FE 14]. — [UL].

aŭd' - entendre | hear | hören | слышать | słyszeć. — **aŭdi** - entendre | hear | hören | слышать | słyszeć [FE 9]. — [UL]. — Ni vidas per la okuloj kaj aŭdas per la oreloj [FE 9.5]. En la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis du pafojn [FE 40.1]. Kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi ion novan, sed baldaŭ ni vidis, ke ni trompiĝis [FE 40.7].

aŭdac/a. [OA 8] Riskema fari ion malgraŭ la danĝeroj aŭ malhelpoj. — A. audacious, bold, daring; F. audacieux; G. kühn, verwegen; H. {es} audaz, atrevido; I. {it} {it} audace; P. {pt} audaz.

aŭdienc' [OA 1] * audience | audience, interview | Audienz | аудіенція {de 1918: аудиенция} | audjencja. — [RE].

aŭditori-o [OA 2.2] auditoire (local), amphithéâtre | auditorium | Auditorium. — [RE]. — [EG 2] Auditorium.

AŬGURI [OA 6.1] *Diveni per esotera povo* | {en} to augur | {fr} augurer | {de} weissagen | {es} augurar, agorar | {it} indovinare il futuro | {pl} wrożyć. — [EG 2] **aŭgur-o** – Wahrsagung, Vorbedeutung.

Aŭgust' - Août {de 1990: aout} | August | August | Августъ | Sierpień. — [RE]. — **Rim.**: Vd. la rimarkon ĉe Aŭgusto.

Aŭgusto — Aŭgusto estas mia plej amata filo [FE 22.11, mankas en UV]. — **Aŭgust'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo). — [DL 1888]: *Aŭgusto estas bona, Mario estas pli bona ol Aŭgusto, sed Ernestino estas la plej bona el ĉiuj miaj gefratoj [DL 2.11]. Aŭgucĵo kaj Aŭgunjo estas bonaj infanoj [DL 10.13].* — **Rim.**: **1.** Estas dube, ĉu la monato-nomo Aŭgust' [UV] kaj la vira antaŭnomo Aŭgusto [FE 22.11] estas unu elemento kun du malsamaj signifoj aŭ du malsamaj, sed (hazarde) samformaj radikoj (homofonoj). Niaopinie temas pri du elementoj. Alikaze ne estus necese, ke [OA 7] deklaris la antaŭnomon Fundamenta. La monato-nomo ja ĉiukaze aperas en la ĝusta alfabeta vico en UV. **2.** Kiel montras [DL 10.13] Aŭgust' povas esti vira aŭ virina antaŭnomo. La difino de OA 7 estas tro malvasta.

aŭkci' [OA 1] * encan {uzata nur en aparta esprimo; ĝenerale: enchères} | auction | Auktion | аукціонъ {de 1918: аукцион} | licytacja. — [Cart 1903] [EG 2].

AŬREOLO [OA 6.1] 1-e: *Luma rondo ĉirkaŭ la kapo de sanktulo ĉe pentraĵoj;* 2-e: *Prestiĝo* | {en} aureola | {fr} aureole | {de} Heiligenschein; (fig.) Ruhmesglanz | {es} aureola; (fig.) gloria, prestigio | {it} aureola | {pl} aureola. — [EG 2] (glorkrono) Aureole, Heiligenschein.

aŭskult' - écouter | listen | anhören, horchen | слушать | słuchać. — [UL].

Aŭstrali/o. [OA 8] La kontinento de la suda hemisfero okcidente de Pacifiko. — A. Australia, F. Australie, G. Australien, H. {es} Australia, I. {it} Australia, P. {pt} Austrália. {GEO} — **Aŭstralio** [OA 8] — **Rim.**: Aŭstralio aperas kaj en la listo de difinitaj vortoj kaj en la sendifina listo de landnomoj en OA 8.

aŭt/o. [OA 8] Mallongigo de: aŭtomobilo. — A. car, automobile; (US) auto; F. auto; G. Kraftwagen, Auto; H. {es} auto; I. {it} auto; P. {pt} auto(móvel). — [PV] {ne ĉe Z}.

aŭtentik' [OA 1] authentique | authentic | authentisch, echt | подлинный | autentyczny.

aŭtobiografi-o [OA 2.1] — [EG 2] Autobiographie, Selbstbiographie.

aŭtobus/o. [OA 8] Granda publika aŭtomobila veturilo, kiu transportas pasaĝerojn de stacio al aliaj laŭ difinitaj linioj. — A. motor-bus, bus; F. autobus; G. Autobus {ark.}, Bus; H. {es} autobús, I. {it} autobus, P. {pt} auto-ônibus {kvankam registrita en la brazilaj vortaroj, ĉi tiu formo ne estas uzata en la praktiko. Oni uzas "ônibus". En Portugalio oni uzas "autocarro"}. — [EV 1923] {ne ĉe Z.}. — Kp. omnibus' [OA 1].

aŭtograf-o [OA 2.1] — [EG 2] Autograph.

Autokrati' [OA 3.2] {en} autocracy | {fr} autocratie | {de} Autokratie | {es} autocracia | {pt} autocracia | {it} autocrazia | {pl} autokracja. — [EG 2] Autokratie.

aŭtokrat-o [OA 2.1] — **aŭtokrat'** (2) [OA 7] — [EG 2] Autokrat, Selbstherrscher.

aŭtomat' [OA 1] * automate | automaton | Automat | автоматъ | automat. — [RE].

aŭtomobil' [OA 1] automobile | motor-car | Automobil | автомобиль | automobil.

Aŭtonom-a {legu: aŭtonom-a} [OA 4], {fr} autonome | {en} autonomous | {de} sich selbst Gesetze gebend, selbständig {de 1996: selbstständig}, unabhängig {2012 ankaŭ kaj prefere: autonom} | {it} autonomo | {es} autónomo | {pt} autónomo {en Brazilo ankaŭ: autônomo} | {ca} autónom {legu: autònom}. — [PV 1930].

aŭtor' – [A, mankas en UV] — Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj li neniam permesis al si (almenaŭ konscie) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj ... Tial, por meti finon al ĉiuj malkompreniĝoj kaj disputoj, kaj por ke ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi, la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, kiuj laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de longe fariĝis fundamento por Esperanto ... ... ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem. — **aŭtor'** [OA 1] * auteur | author | Autor, Urheber {2012: Autor, Verfasser} | авторъ | autor. — **autor'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [RE].

aŭtoritat' – [A, mankas en UV]. — **aŭtoritat'** [OA 1] * autorité | authority | Autorität | авторитетъ | autorytet. — **autoritat'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [RE].

● **aŭtoritata** - ... tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, ... [A 1.2]. Ĝis la tempo, kiam ia por ĉiuj aŭtoritata kaj nedisputebla institucio decidos alie ... [A 3.4]. ... per konsiliĝado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo ... [A 7.1]. ... ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron oficialan, kiel «Aldonon al la Fundamento» [A 7.2]. Se ia aŭtoritata centra institucio trovos ... [A 8.1]. ... aŭtoritata centra institucio ... [A 10.4].

● **aŭtoritateco** - ... ia centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro [A 9.4].

aŭtun' - automne | fall (of the year) | Herbst | осень | jesień. — **aŭtuno** - automne | autumn | Herbst | осень | jesień [FE 32]. — [AK] {en} autumn, fall. — [UL]. — Multaj birdoj flugas en la aŭtuno en pli varmajn landojn [FE 32.10].

av' - grand-père | grandfather | Grossvater {legu: Großvater] | дѣдъ, дѣдушка | dziad. — **avo** - grand-père | grandfather | Grossvater {legu: Großvater} | дѣдъ, дѣдушка | dziad, dziadek [FE 9]. — [AK] dziadek. — Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo [FE 9.9]. — [UL].

avantaĝ/o. [OA 8] Tio, kio donas ian superecon, pli grandan profiton, aŭ enhavas pli grandan utilon, oportunon. — A. advantage; F. avantage; G. Vorteil, Vorzug; H. {es} ventaja, I. {it} vantaggio, P. {pt} vantagem. — **Rim.**: ... la signifo *Vorzug*, *Vorteil*. Estas vere, ke en nia lingvo mankas vorto, kiu precize esprimas tiun ĉi lastan ideon. La vortoj *profito*, *utilo*, *supereco*, *privilegio* plej ofte ne kontentigas la bezonon, pro tio ŝajnas al mi dezirinde, ke ni havu la vorton *avantaĝo* por la ideo, germ. *Vorzug*, *Vorteil*, angl. *adventage*, franc. *avantage*, hisp. *ventaja* [Jean Borel, Germana Esperantisto n-ro 7, 1910, p. 159]. [EV 1923].

avar' - avare | covetous | geizig | скупой | skąpy. — [UL].

avel' - noisette, aveline | hazel-nut | Haselnuss | обыкновенный орѣхъ | orzech laskowy. {BOT} — [AK] noisette.

aven' - avoine | oats | Hafer | овесъ | owies. {BOT}

aventur' - aventure | adventure | Abenteuer | приключеніе | przygoda. — **aventuro** - aventure | adventure | Abenteuer | приключеніе | przygoda [FE 23]. — Ŝi rakontis al li sian tutan aventuron [FE 23.2].

avenu/o. [OA 8] Larĝa strato, ambaŭflanke borderita per arboj, ofte kun perspektivo al monumento aŭ pejzaĝo. — A. avenue, F. avenue; G. Anfahrt, (breite bepflanzte) Strasse, (Avenue); H. {es} avenida, I. {it} viale, P. {pt} avenida.

avert' - avertir, prévenir | warn | warnen | предостерегать | przestrzegać. — [AK] avertir, prévenir, détourner.

AVIADO {legu: aviado} [OA 5.2] *(Aera navigacio). Arto aerveturadi per aparatoj pli pezaj ol aero* | aviation | aviation | Fliegerei, Flugwesen | {es} aviación | {it} aviazione | {pl} awjacja.

avid' - avide, convoiteux | eager, covetous | gierig | жадный | chciwy. — [AK] avide | greedy, eager. — [RE].

aviz' - avis | advice | Avis | увѣдомленіе | awizacya. — [AK 1914] a notice, notification | Ankündigung, Anzeige.

avokad/o. [OA 9] Frukto de avokadujo, kun verda aŭ bruneta ŝelo (el kiu oni povas ĝin manĝi), tre nutra, butereca karno, kaj unu sola tre granda malmola kerno. — [PIV 1970].

● **avokad/uj/o**, **avokad/arb/o**. [OA 9] Arbo el tropika Ameriko, kies frukto estas avokado. (*Persea americana*.) — [PIV 1970].

azen' - âne | ass | Esel | оселъ | osioł {ZOO}. — [UL]. — A-zé-no [FE 3].

Azi/o. [OA 8] La nordhemisfera kontinento, kiu okcidente limas Eŭropon kaj Afrikon. — A. Asia, F. Asie, G. Asien, H. {es} Asia, I. {it} Asia, P. {pt} Asia {legu: Ásia}. {GEO} — [E-isto 1893, p. 85, 90] Azio (lando Azia).

azil-o [OA 2.1] — [EG 2] Asyl.

azot' - azote | azot | Stickstoff | азоть | azot. {KEM} — **azoto** - azote | azote | Stickstoff | азоть | azot [FE 35]. — [AK] {en} nitrogen, azote. — [RE].

● **azotacido** - En tiuj ĉi boteletoj sin trovas diversaj acidoj: vinagro, sulfuracido, azotacido kaj aliaj [FE 35.6].

B

Bb - b | b as in "be" | b | б | b [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **bo** ... [FE 1]. — **bo** [OA 7] = nomo de la litero b, dua litero de la Esperanta alfabeto. — Lingva Respondo 56 (1893) [Pri la nomoj de la literoj]: La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

babil' - babiller {malmulte uzata, pli kutima: bavarder} | chatter | schwatzen, plaudern | болтать | paplać. — **babili** - babiller | chatter | schwatzen, plaudern | болтать | paplać [FE 20]. — **babil'** - babiller | chatter | {germana mankas} | болтать | paplać [UV em']. — **babili** - babiller | chatter | plaudern | болтать | paplać [FE 19 em']. — [UL]. — Ordonu al li, ke li ne babilu [FE 20].

● **babil'em'** - babillard | talkative | [germana mankas] | болтливый | gaduła [UV em']. — **babilema** - babillard {en Francio eksmoda; 2012 pli kutima: bavard} | talkative | geschwätzig | болтливый | gadula {tiel: –l- anstataŭ strekita –ł-} [FE 19 em']. — Lia edzino estas tre laborema kaj ŝparema, sed ŝi estas ankaŭ tre babilema kaj kriema [FE 41].

bacil-o [OA 2.1] {MED} — [EG 2] (med.) Bazillus (Stabtierchen).

bagatel' - bagatelle | trifle, toy | Kleinigkeit | мелочь, бездѣлица | drobnostka. — **bagatelo** - bagatelle | trifle, toy | Kleinigkeit | мелочь, бездѣлица | drobnostka [FE 41]. — [RE]. — Li estas tre ekkolerema kaj ekscitiĝas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo [FE 41.13].

bajonet' - baïonnette | bayonet | Bajonett | штыкъ | bagnet. {MIL} — [RE].

bak' - cuire | bake | backen | печь, испекать | piec, wypiekać. — [AK] (faire) cuire (au four). — [UL].

bakteri-o [OA 2.1] {ZOO} — [EG 2] Bakterie.

bala' - balayer | sweep | fegen | мести, заметать | zamiatać. — [AK] {en} sweep (*vb*.). — [UL]. — Ba-lá-i [FE 2]. — Ba-lá-u [FE 3]. Balau [FE 4].

balad-o (*poezio*) [OA 2.1] {LIT} — [RE] [EG 2] Ballade.

balanc' - balancer | balance, swing | schaukeln | качать | huśtać, kołysać. — [UL].

balast' [OA 1] * ballast, lest | ballast | Ballast | балластъ | balast. — [RE].

balbut' - bégayer, balbutier | stammer | stottern, stammeln | заикаться | jąkać się. — [RE].

baldaken' - baldaquin | canopy | Baldachin | балдахинъ | baldachin. — [AK] baldaquin, dais. — [RE].

baldaŭ - bientôt | soon | bald | сейчасъ, скоро | zaraz. — **baldaŭ** - bientôt | soon | bald | сейчасъ, скоро | zaraz [FE 23]. — [UL]. — ... kaj la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro [FE 23.4]. Estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ [FE 25.8]. Teatramanto ofte vizitas la teatron kaj ricevas baldaŭ teatrajn manierojn [FE 32.1]. La tablo staras malrekte kaj kredeble baldaŭ renversiĝos [FE 33.11]. Kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi ion novan, sed baldaŭ ni vidis, ke ni trompiĝis [FE 40.7]. Mi foriras, sed atendu min, ĉar mi baldaŭ revenos [FE 42.5].

balen' - baleine | whale | Wallfisch {de 1901: Walfisch. 2012: Wal} | китъ | wieloryb. {ZOO} — [RE].

● **balen'ost'** - baleine | whale-bone | Fischbein | китовый усъ | fiszbin.

BALETO {legu: baleto} [OA 6.1] *Teatra senparola danco kun muziko kaj mimiko* | {en} ballet | {fr} ballet | {de} Bühnentanz, Schautanz, Tanzstück {2012 nur: Ballet} | {es} bailable (bailable (danza teatral) {legu: bailable (danza teatral)}, ballet | {it} balletto | {pl} balet. — [DL 1888] *Ŝi estas la unua baletistino en nia teatro* [DL 7]. [RE].

balistik-o [OA 2.1] — [Beau] balistique (sc.). [EG 2] Ballistik.

balkon' [OA 1] * balcon | balcony | Balkon | балконъ | balkon. — [DL 1888] *Unu fojon en nokto la alilandulo vekiĝis; li dormis ĉe malfermita pordo de balkono, la kurtenoj antaŭ la pordo sin dismovis de bloveto de l' vento, kaj al li ŝajnis, ke de l' kontraŭa balkono venas mirinda brilo* [DL 17.3.1]. {Dektri pliaj trafoj en DL}. [RE].

balo - Bá-lo [FE 2, mankas en UV]. — **bal'** [OA 1] * bal | ball, dancing | Ball (Tanz) | балъ | bal. — **bal'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [DL 1888] *Je l' vespero en la granda salono de baloj dancis la reĝidino kun la ombro* [DL 17.57.1]. {Plia trafo en DL}. [RE].

balon-o [OA 2.1] — [EG 2] Ballon.

balot-i [OA 2.2] voter | to ballot | ballotieren — [RE] [EG 2] ballottieren {kun -tt-; ark. en 2012: wählen, abstimmen}.

balustrad' - garde-fou, balustrade | balustrade | Geländer | перила | poręcz. {ARKI} — [RE].

balzamin-o [OA 2.1] — [EG 2] Balsamine.

balzam-o [OA 2.2] baume | balsam | Balsam. — [RE] [EG 2] Balsam.

bambu' - bambou | bamboo | Bambus | бамбукъ | bambus. {BOT} — [RE].

ban' - baigner | bath | baden | купать | kąpać. — **bani** - baigner | bath | baden | купать | kąpać [FE 40]. — [AK] baigner (trans.). — [UL].

● **ŝvitbanejo** — La kuracisto konsilis al mi iri en ŝvitbanejon [FE 40.14].

banal-a [OA 2.2] banal | banal, hackneyed | abgedroschen {2012: banal, abgedroschen} — [Kabe].

banan-o [OA 2.1] {BOT} — [Beau] banane. [EG 2] Banane.

band' - bande, troupe | band | Bande, Rotte | банда, шайка | banda, zgraja. — [RE].

bandaĝ-o [OA 2.1] {MED} — [RE] [EG 2] Verband, Bandage.

banderol' [OA 1] * bande (de papier) | paper band, wrapper | Kreuzband | бандероль | banderola. — [RE].

bandit-o [OA 2.1] — [EG 2] Bandit.

bank' [OA 1] * banque | bank | Bank (Geld-) | банкъ | bank. {EKON} — [RE].

banked/o. [OA 9] Komuna ceremonia manĝo kun multaj partoprenantoj (por festi aŭ honori ion, ofte kun festparoladoj k.s.). — [PV 1930].

BANKIERO [OA 6.1] *Posedanto de banko* | {en} banker | {fr} banquier | {de} Bankherr, Bankhausbesitzer {(ark.), 2012: Bankier} | {es} banquero | {it} banchiero | {pl} bankier. — [RE] [EG 2] Bankier.

bankrot' [OA 1] * faire faillite | become bankrupt | Bankerott machen {2012: Bankrott machen} | банкротиться | bankrutować. — [RE].

bant' - nœud | loop | Schlefe [pres-eraro, legu Schleife] | бантъ | pętlica. — [AK 1914] nœud (*de ruban*) | knot (*of ribbon, etc.*) | Bandschleife. — [RE].

bapt' - baptiser | baptise | taufen | крестить | chrzcić. {RELI} — [UL].

● **bapt'an'** - compère | god-father | Gevatter | кумъ | kum. — [AK] {en} sponsor, gossip, God-relation.

● **bapt'o'fil'** - filleul | god-son | Taufsohn | крестный сынъ, крестникъ | chrześniak.

● **bapt'o'patr'** - parrain | god-father | Pathe {de 1901: Pate}, Taufvater | крестный отецъ | chrestny ojciec. — [AK] {en} Godfather.

bar' - barrer | bar, obstruct | versperren | загораждать | zagradzać. — [UL].

● **bar'il'** - haie | hedge | Zaum {evidenta pres-eraro, legu: Zaun} | заборъ | parkan. — [AK] {en} barrier.

barak-o (*domaĉo*) [OA 2.1] — [EG 2] Baracke.

barakt' – gigotter {legu: gigoter}; piétiner | sprawl, trip | zappeln | барахтаться | trzepotać. — [AK] gigoter, se débattre | throw oneself about, struggle. — [RE].

barb' - barbe | beard | Bart | борода | broda. — [UL].

barbar' [OA 1] * barbare | barbarous | barbarisch | варваръ | barbarzyńca. — [RE].

barbir' - barbier | barber | Barbier | цырульникъ, фельдшеръ | felczer. — [RE].

barĉ' - soupe de betteraves | red-beet-soup | Beetensuppe | борщъ | barszcz. {KUIR} — [AK 1914] beetroot soup | Runkelrübensuppe. — [RE].

bard' [OA 1] * barde | bard | Barde | бардъ | bard. {MUZ} [E-isto 2/1889] [EV 1923].

barel' - tonneau | keg, barrel | Fass, Tonne | бочка | beczka. — [UL]. — **Rim.**: Kp. tonelo, tuno.

Barelief' [OA 3.2] {en} low-relief | {fr} bas-relief | {de} flacherhabene Arbeit, Bas-Relief | {es} bajo relieve | {pt} baixo relevo | {it} bassorilievo | {pl} --- {traduko mankas}. — [EV 1923] {ne ĉe Z.; antaŭe mal/alt/relief/o}.

Barier' [OA 3.2] {en} barrier | {fr} barrière | {de} Barriere, Schranke | {es} barrera | {pt} barreira | {it} barriera | {pl} --- {traduko mankas}. — [EG 2].

barikad-o [OA 2.1] — [Beau] barricade. [EG 2] Barrikade.

bariton' [OA 1] * baryton | baritone | Bariton | баритонъ | baryton. {MUZ} — [Beau] [EG 2] Bariton.

bark' - barque | bark | Barke | барка | barka. {MAR} — [AK] {en} bark (*ship*). — [RE].

barometr' [OA 1] * baromètre | barometer | Barometer | барометръ | barometr. {METEO} — [RE]

baron' [OA 1] * baron | baron | Baron | баронъ | baron. — *[DL 1888]: Via barona moŝto, helpu min en mia mizero!* [DL 16.30]. [RE].

bas' [OA 1] * basse (voix) | bass (mus.) | Bass | басъ | bas. {MUZ} — [RE].

basen-o (*de haveno, de fontano, de maro, k. t. p.*) [OA 2.1] — [EG 2] Bassin.

bask' - basque | lappet | Schoss, Rockschoss {legu: Schoß, Rockschoß} | пола | poła. {VEST} — [AK] basque (*d'habit*), pan | basque (*of bodice, coat, etc.*). — [RE].

baskul/o [OA 9] **1** Aparato konsistanta el trabo, stango, tabulo aŭ simila afero, kies unu ekstremaĵo leviĝas, kiam la alia malsupreniras. — [PIV 1970]. **2** Ludilo konsistanta el tabulo aŭ stango, kiu estas ekvilibrigita sur mezpunkto, kaj sur kies ekstremaĵoj povas sidi personoj alterne leviĝantaj kaj malleviĝantaj laŭ la movo de la tabulo aŭ stango. — [PIV 1970]. **3** Cirkvito, meĥanismo k.s., kiu analoge al baskulo *1* povas alterni inter du statoj.

bast' - écorce d'arbre | bark (of a tree) | Bast | лубъ, лубокъ | łyko. {BOT} — [AK] {en} bast, inner bark (*tree*). — [RE].

bastard' [OA 1] * bâtard | bastard | Bastard | незаконнорожденный | bękart. — [Beau] bâtard. [EG 2] Bastard.

bastion' - bastion | bulwark | Bollwerk | бастіонъ | baszta, warownia. {MIL} — [RE].

baston' - bâton | stick | Stock | палка | kij, laska. — **bastono** - bâton | stick | Stock | палка | kij, laska [FE 31]. — [UL]. — La fera bastono, kiu kuŝis en la forno, estas nun brule varmega [FE 31.17].

● **bastoneto** - Skatolo, en kiu oni tenas plumojn, estas plumujo, kaj bastoneto, sur kiu oni tenas plumon por skribado, estas plumingo [FE 40.16].

● **lam'baston'** - béquille | crutch | Krücke | костыль | kula (do chodzenia) [UV lam'].

bat' - battre | beat | schlagen | бить | bić. — **bati** - battre | beat | schlagen | бить | bić [FE 9]. — [UL]. — Aleksandro ne volas lerni, kaj tial mi batas Aleksandron [FE 9.7]. Mi volis lin bati, sed li forkuris de mi [FE 18.2]. Kaj ŝi tuj kuris bati ŝin [FE 21.5]. Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato [FE 22.3]. Malsaĝulon ĉiu batas [FE 37.20].

● **batanto** — Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato [FE 22.3].

● **batato** — Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato [FE 22.3].

● **bathufo** — Bat-hú-fo [FE 2].

batal' - combattre | fight | kämpfen | бороться | walczyć. — [UL]. — ... kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ... [A 1.5]. — La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj [FE 39.14]. — [DL 1888]: *Li batalos, ĉar li ne dormos trankvile, ĝis li estos venkinta la malamikon* [DL 5.11]. *La legendoj rakontas pri grandeguloj, kiuj volis batali kun la dioj* [DL 11.8]. {Plia trafo en [DL 17.34]}. [DL-Ald]: *... la vortoj egale feliĉe kreitaj sed malegale sonantaj - kelkan tempon batalos inter si kiel sinonimoj ...* [DL-Ald 20.6].

● **batal'il'** - arme | weapon | Gewehr | оружие | broń. — [AK 1914] Waffe, Wehr {2012: Wehr (ark.)}. — [RE 1889 A]: batal'il'ej.

● **interbatala** — tiu perfektiĝado fariĝados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga rompado kaj ŝanĝado, ..., sed per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera [A 6.4].

batalion' [OA 1] bataillon | battalion | Bataillon | баталіонъ | bataljon. {MIL} — [RE].

bateri' [OA 1] batterie | battery | Batterie | батарея | baterja. {MIL} {ELEKTR} — [RE].

batist-o (*speco de tuko*) [OA 2.1] — [RE] [Beau] batiste. [EG 2] Batist.

baz' [OA 1] * base | basis, base | Base (arch., chem) | основаніе, база | podstawa. {ARKI} {KEM} — [EG 2].

bazalt-o [OA 2.1] {GEOL} — [Beau] basalte. [EG 2] Basalt.

bazar' – marché, foire | market, fair | Markt | базаръ | targ, rynek. — [AK 1914] bazar, marché | bazar | Markt, Basar. — [RE].

bazilik-o (*arĥ.*) [OA 2.1] {ARKI} — [EG 2] Basilika.

bazilisk' [OA 1] * basilic | basilisk | Basilisk | василискъ | bazyliszek. {MIT} — [EG 2] Basilisk.

beb/o. [OA 8] Tre juna infano. — A. baby, F. bébé; G. Saügling {legu: Säugling}, Kleinkind, Baby; H. {es} bebé, "baby"; I. {it} bimbo, bimbetto, ("bebè"); P. {pt} bebê. — [PVS] {ne ĉe Z.; antaŭe infan'et'o, lakt'infan'o, ekz. Rhodes 1908 ĉe *baby*}.

bed' - couche | bed (garden) | Beet | гряда | grzęda, zagon. — [AK] couche, platebande. — [RE].

bedaŭr' - regretter | pity, regret | bedauern | жалѣть | żałować. — [AK] {en} regret, be sorry. — [UL].

bek' - bec | beak | Schnabel | клювъ | dziób. — [RE].

bel' - beau | beautiful | schön, hübsch | красивый | piękny. — **bela** - beau | beautiful | schön, hübsch | красивый, прекрасный | piękny, ładny [FE 10]. — **bela** - beau | красивый [FE 37 ul']. — [UL] schön. — [AK 1914] schön. — Rakontu al mia juna amiko belan historion [FE 10.6]. Sur la ĉielo staras la bela suno [FE 10.12]. En la tago ni vidas la helan sunon, kaj en la nokto ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn [FE 10.13]. La pli juna filino, …, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi [FE 11.3]. "Tre volonte, mia bona,"; diris la bela knabino [FE 15.2]. "Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas fari al vi donacon" [FE 15.5]. Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto [FE 17.1]. Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, kiu estis en la loĝejo [FE 19.4]. La filo de la reĝo, kiu revenis de ĉaso, ŝin renkontis; kaj, vidante, ke ŝi estas tiel bela, li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola kaj pro kio ŝi ploras [FE 21.7]. Mia fratino estas tre bela knabino [FE 33.17]. Hodiaŭ estas bela frosta vetero, tial mi prenos miajn glitilojn kaj iros gliti [FE 34.7]. Lia hieraŭa parolo estis tre bela, sed la tro multa parolado lacigas lin [FE 40.6]. Li kantas tre belan kanton [FE 40.8]. La diamanto havas belan brilon [FE 40.10].

● **bele** — "Estus tre bele," respondis la filino malĝentile, "ke mi iru al la fonto!" [FE 19.1]. Ha, kiel bele! [FE 26.23].

● **beleco** — Li amas tiun ĉi knabinon pro ŝia beleco kaj boneco [FE 35.16].

● **belulo** - bel homme | красавецъ [FE 37 ul'].

● **bellana** — Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, precipe aroj da bellanaj ŝafoj [FE 34.15].

beladon' - belladonne {2012: belladone} | belladonna | Tollkirsche | сонная одурь | pokrzyk, wilcza jagoda. {BOT} — [AK] {en} belladonna, deadly nightshade. — [RE].

beletr/o. [OA 9] Arta literaturo plezurocela aŭ distrocela, precipe tia, kiu rakontas pri okazaĵoj kaj personoj imagitaj.

— [PV 1930] beletro = beletristiko [vd. la sekvan radikon].

● **beletr/aĵ/o**. [OA 9] Verko beletra.

● **beletr/ist/o**. [OA 9] Beletra verkisto aŭ specialisto.

beletristik' [OA 1] belles-lettres | belleslettres | Belletristik | беллетристика | beletrystyka. — [EG 2] Belletristik. [Kabe 1910]: Nescienca, neteknika literaturo; bela literaturo: romanoj, versaĵoj, noveloj, k. t. p. [EV 1923]: *(bela literaturo)*, schöne Literatur, Belletristik. **~a** [...]. **~isto** = beletristo. — **Rim.**: PIV 2005 difinas: „Esplorado k pristudo de beletro." Tio ne harmonias kun la samsignifaj tradukoj al ĉiuj kvin referenc-lingvoj, kiuj unuece signifas „bela literaturo", „beletro", celas do la literaturon mem (kontraste al faka aŭ scienca literaturo), ne ĝian pristudadon. La dif. ankaŭ ne harmonias kun la historia kompreno de Kabe 1910 ĝis PV 1934, laŭ kiu *beletristiko* estas sinonima al *beletro.* Tiu kompreno fine troveblas ankaŭ en modernaj vortaroj, ekz. en Butler 1967 aŭ Krause 1999. Temas do pri „formo nova" en la senco de A 8 kaj la Ak. tion devus eksplici ti cele al laŭeble granda klareco en la senco de A 3.3 (kp. proletario / proleto).

belgo [OA 8] — [E-isto 1893, p. 85] Belgujo. [EG 2] Belgier.

belisk-o [OA 2.1]

bemol/o. [OA 9] Muziknota kromsigno, kiu montras malaltigon de tono: ♭ . {MUZ} — [PV 1930].

ben' - bénir | bless | segnen | благословлять | błogosławić. {RELI} — **beni** - bénir | bless | segnen | благословлять | błogosławić [FE 33]. — [UL].

● **malbeni** — Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita [FE 33.7].

bend/o. [OA 8] Mallarĝa kaj longa peco el ia maldika materio. — A. tape, band; F. bande (d'étoffe, ...); G. Binde, Band, Streifen; H. {es} tira, venda, banda; I. {it} fascia, benda, banda, nastro; P. {pt} tira, fita, faixa. — [EV 1923] {ne ĉe Z.; antaŭe stri/o}.

benk' - banc | bench | Bank (zum Sitzen) | скамья | ławka. — **benko** - banc | bench | Bank | скамья | ławka [FE 26]. — [UL].

● **benketo** — Mi sidas sur seĝo kaj tenas la piedojn sur benketo [FE 26.7].

benzin' [OA 1] benzine {eksmoda, 2012: essence} | benzine | Benzin | бензинъ | benzyna. — [EG 2].

ber' - baie | berry | Beere | ягода | jagoda. {BOT} — [AK] baie (bot.). — [RE].

beril-o (*min.*) [OA 2.1] {GEOL} — [EG 2] Beryll (Stein).

Berlino - Li venigis al si el Berlino multajn librojn [FE 39.10, mankas en UV]. — **Berlin'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (urbnomo). — E-isto 4a jaro, n. 6 (42) 1893, p. 94: „... Berlino havas kontraŭ ĉiuj 1,000 viroj 1,080 virinojn, Dresdeno 1.113, Frankfurto sur Majno 1,123. ...".

Berto — Li fianĉiĝis kun fraŭlino Berto [FE 39, mankas en UV]. — **Bert'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (virina antaŭnomo).

best' - animal | beast | Thier {de 1901: Tier} | животное | zwierzę. {ZOO} — **besto** - animal | beast | Thier {de 1901: Tier} | животное | zwierzę [FE 5]. — [AK] animal, bête | animal, beast. — [UL]. — Leono estas besto [FE 5.2]. Malbonaj infanoj amas turmenti bestojn [FE 33.6].

bet' - betterave | red beet | Runkelrübe {2012: Rote Bete} | свекловица | ćwikła, burak. {BOT} — [RE].

beton/o. [OA 9] Konstrumaterialo, miksaĵo el sablo, ŝtonetoj, cemento kaj akvo. — [PV 1930].

betul' - bouleau | birch (tree) | Birke | береза | brzoza. {BOT} — [RE].

bezon' - avoir besoin de | need, want | brauchen | нуждаться | potrzebować. — **bezoni** - avoir besoin de | need, want | brauchen | нуждаться | potrzebować [FE 14]. — [UL]. — ... trie mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon [FE 14.6]. Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion „je" [FE 29.1].

— **Lingva Respondo 1891 [Pri la uzado de formoj simplaj anstataŭ kunmetitaj]**: La vorto "bezonesti" estas kunmetita tute regule, kaj vi povas ĝin uzadi. Sed entute ni konsilas pli uzadi ĉiam formojn simplajn anstataŭ kunmetitaj. Kunmetado de vortoj estas karaktera eco de la lingvo germana, kaj al tiu ĉi lingvo ĝi efektive donas grandan riĉecon de formoj; sed en nia lingvo la vortoj pleje estas pli naturaj kaj pli bonsonaj se ili estas ne

kunligataj, sed uzataj aparte. [LR 4 A, *La Esperantisto*, 1891, p. 23].

bibli' [OA 1] * Bible | Bible | Bibel | библія {minuskle; en 2012 Библия majuskle (krome de 1918 і → и)} | biblja. {RELI} — [UL]. **Rim.**: **1** Mankas en la vortaro de UL, tamen aperas sur p. 22 en la titolo de la dua tekst-ekzemplo „II. El la Bibli,o“ (sekvas parto de la genezo). **2** DL ne havas ĝin, RE 1889 ne helpas, ĉar ĉiuj vortaraj artikoloj komenciĝas per majusklo, en MV 1889 ĝi mankas, en EG 1 (1904) majuskle. **3** Same minuskle skribita estas *koran'*.

bibliograf' (2) [OA 7] — [EV 1923] {antaŭe bibliografi/ist/o}.

bibliografi-o [OA 2.1] — [EG 2] Bibliographie.

bibliotek' [OA 1] * bibliothèque | library | Bibliothek | бібліотека | bibljoteka. — [DL] [RE].

bicikl' [OA 1] bicycle {2012: bicyclette aŭ vélo} | bicycle | Zweirad {2012: Fahrrad} | велосипедъ | bicykl. — [Beau] **bicikl**, bicycle. ● **biciklisto**, bicycliste ● **bicikleto**, bicyclette. [EG 2] (Fahr-, Zwei-) Rad; **~isto** Radfahrer. [GE 2] **Rad** (Fahrrad) – biciklo, bicikleto, velocipedo. [PIE 1910] bicykl. [Kabe 1910] **Biciklo**. Durada velocipedo, kies antaŭa rado estas multe pli granda, ol la posta. **Biciklisto**. Sportisto, uzanta biciklon. **Bicikleto**. Durada velocipedo kun egale grandaj radoj. — **Rim.**: Kp. **velociped'** [OA 1] kaj **cikl-o** [OA 2.1].

bien' - bien | goods, estate | Gut, Landgut | имѣніе | posiadłość ziemska, majątek. — [AK] bien, avoir, propriété. — [RE].

bier' - bière | beer | Bier | пиво | piwo. {KUIR} — [UL].

bifstek' [OA 1] bifteck | beefsteak | Beefsteak | бифштексъ | befsztyk. {KUIR} — [EG 2].

bigot' [OA 1] * bigot | bigot | Frömmler | ханжа | bigot. — [EG 2] bigota {adjektivo}.

bilanc' [OA 1] bilan | balance sheet | Bilanz | балансъ {de 1918: баланс} | bilans. — [RE].

bilard-o [OA 2.1] {LUD} — [RE] [Beau] billard. [EG 2] Billard.

bild' [OA 1] * image | image, picture | Bild | изображеніе, картина | obraz. — [EG 2] Bild. [RE] изображеніе – figur', figur'aĵ' (p. 65), картина – pentr'aĵ' (p. 72). — **Rim.**: Ekuzata de Théophile Cart en sia lernolibro „Instruado de Esperanto per bildaro“. (L'instruction de l'Esperanto par l'image). Paris: Presa Esperantista Societo 1905, 16 p., kp. P. Corret: «Mi amantas», *Lingvo Internacia*, 12-a jaro, 1907, n-ro 7 (159), p. 318-320 (320).

Bilet' [OA 3.2] {en} ticket | {fr} billet | {de} Billet {2012: ark.}, Fahrkarte, Eintrittskarte | {es} billete | {pt} bilhete | {it} biglietto | {pl} --- {traduko mankas}. — [RE].

bind' - relier | bind (books) | binden (Bücher) | переплетать | oprawiać. — [UL].

Binokl' [OA 3.2] {en} binocle, double eyeglass, opera-glass | {fr} jumelle {legu plurale: jumelles} (de théâtre, etc.) | {de} Binocle {2012: ark.}, Opernglass {legu: Opernglas} | {es} gemelos de teatro | {pt} binoculo {legu: binóculo} | {it} binoccolo | {pl} --- {traduko mankas}. — [EG 2].

biograf' (2) [OA 7] — [EV 1923] {antaŭe biografi/ist/o}.

biografi-o [OA 2.1] — [RE] [Beau] biographie. [EG 2] Biographie, Lebensbeschreibung.

biolog' (1) [OA 7] — [EV 1923] {antaŭe biologi/ist/o}.

biologi' [OA 1] * biologie | biology | Biologie | біологія | biologja. — [Beau] biologie.

bird' - oiseau | bird | Vogel | птица | ptak. {ZOO} — **birdo** - oiseau | bird | Vogel | птица | ptak [FE 5]. — [UL]. — Bír-do [FE 2]. — Rozo estas floro kaj kolombo estas birdo [FE 5]. La birdoj flugas. La kanto de la birdoj estas agrabla. Donu al la birdoj akvon, ĉar ili volas trinki. La knabo forpelis la birdojn [FE 9]. La birdo flugas en la ĉambro (= ĝi estas en la ĉambro kaj flugas en ĝi). La birdo flugas en la ĉambron (= ĝi estas ekster la ĉambro kaj flugas nun en ĝin) [FE 26]. tiel same ni ankaŭ diras: “la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon”, kaj la vortoj „ĝardenon”, „tablon” staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en” kaj „sur” tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri, ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo (ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado) [FE 28]. La birdo ne forflugis: ĝi nur deflugis de la arbo, alflugis al la domo kaj surflugis sur la tegmenton [FE 31]. Multaj birdoj flugas en la aŭtuno en pli varmajn

landojn. Sur la arbo sin trovis multe (aŭ multo) da birdoj [FE 32]. Ĉevalido estas nematura ĉevalo, kokido - nematura koko, bovido - nematura bovo, birdido - nematura birdo [FE 36.14].

● **birdido** - … birdido - nematura birdo [FE 36.14].

Biret-o, [OA 4] {fr} barrette, toque | {en} biretta, cap | {de} Barett | {it} berretta | {es} birrete | {pt} barrete | {ca} birreta. {VEST} — [EG 2] Barett.

Birmo [OA 8] {GEO} — [Rhodes 1908, 516]: **Burmah**, Birmo, Birmanujo. [EV 1923] {ne ĉe Z.}.

Bis, [OA 4] {fr} bis! | {en} again! | {de} noch einmal! | {it} bis! | {es} bis! | {pt} bis! | {ca} bis! — [Beau] bis (pour la seconde fois, encore une fois). [EG 2] (int.) noch einmal! da capo!

biskvit' - biscuit | biscuit | Zwieback | бисквитъ | sucharek. {KUIR} — [AK] biscuit (pâtisserie). — [RE].

bismut' - bismuth | bismuth | Bismuth {de 1901: Bismut; 2012 ankaŭ: Wismut} | висмутъ | bismut. {KEM} — [RE].

bisturi-o [OA 2.1] {MED} — [Beau] bistouri. [EG 2] Bistouri, Ritzmesser.

bit/o. [OA 9] Pozicio de duuma cifero en duuma kodaĵo: *kontrola parecbito*; *la tria bito de la nombroprezento*; *ĉi tia memorĉelo povas enteni 32 bitojn*; *por prezenti tian nombron oni bezonas almenaŭ 10 bitojn*. — [PIVS 1987].

● **bit/ok/o**. [OA 9] Grupo de ok bitoj traktata kiel tutaĵo (kiel unuo en komputado k.s.). — [OA 9] Noto: La Akademio lasas por posta konsidero la demandon, ĉu *bito* estu ankaŭ la nomo de la mezurunuo el informteorio, aŭ ĉu oni tiun nomu *ŝanono*. — [PIVS 1987].

bitum' [OA 1] bitume | bitumen | Bitumen, Erdpech | битумъ | smoła ziemna. — [EG 2].

bivak' [OA 1] bivouac | bivouac | Biwak | бивакъ | biwak. — [EG 2] Biwak.

bizon/o. [OA 9] Sovaĝa remaĉanta parhufa bovosimila mamulo Nord-Amerika kaj Eŭropa. (*Bison bison*, *Bison bonasus*.) {ZOO} — [PV 1930].

blank' - blanc | white | weiss {legu: weiß} | бѣлый | biały. — **blanka** - blanc | white | weiss {legu: weiß} | бѣлый | biały [FE 10]. — [UL]. — *pli blank'a ol neĝ'o* — plus blanc que neige | whiter than snow | weißer als Schnee. | бѣлѣе снѣга | bielszy od śniegu. [FG 3]. — Papero estas blanka [FE 10.1]. Blanka papero kuŝas sur la tablo [FE 10.2]. La blanka papero jam ne kuŝas sur la tablo [FE 10.3]. La papero estas tre blanka, sed la neĝo estas pli blanka [FE 10.14].

blasfem' [OA 1] * blasphème | blasphemy | Gotteslästerung | богохульство | bluźnierstwo. {RELI} — [RE].

blat' - blatte (ins) | scab | Schabe | тараканъ | karaczan. {ZOO} — [AK] blatte, cafard, cancrelas | blackbeetle, cockroach. — [RE].

blazon' [OA 1] blason | blazonry | Wappen | гербъ | herb. — [EG 2].

blek' - beugler, hennir etc. | cry (of beasts) | blöken, wiehern etc. | мычать, блеять, ржать и т. п | beczeć, rżeć. — [AK] crier (en parlant des animaux), beugler, hennir, ... — [RE].

blind' - aveugle | blind | blind | слѣпой | ślepy. — [RE].

Blok' [OA 3.1] {en} block, lump | {fr} bloc | {de} Block, Klotz | {es} maza | {pt} --- {traduko mankas, estu: bloco } | {it} blocco, masso | {pl} blok. — [RE].

Blokad' [OA 3.1] {en} blockade | {fr} blocus | {de} Blockade | {es} bloqueo | {pt} bloqueio | {it} blocco | {pl} --- {traduko mankas}. — [EG 2] blok/ad/o.

blond' - blond | fair | blond | русый, бѣлокурый | blondyn, płowy. — [AK] {en} blond, fair. — [RE].

blov' - souffler | blow | blasen, wehen | дуть | dąć, dmuchać. — **blovi** - souffler | blow | blasen, wehen | дуть | dąć, dmuchać [FE 39]. — [AK] {en} blow (*trans*.). — [UL].

● **forblovi** - ... la vento forblovis de mia kapo la ĉapon ... [FE 39.12].

blu' - bleu | blue | blau | синій | niebieski. – **blua** - bleu | blue | blau | синій | nibieski {pres-eraro, legu: niebieski} [FE 6]. — [UL]. — La ĉielo estas blua [FE 6].

bluf/i. [OA 9] Ŝajnigi sin supera al kontraŭulo por konduki tiun al eraro: *ne timu lian minacon, ĉar li blufas*. — [PV 1930].

bluz' [OA 1] blouse | blouse | Bluse | блуза | bluza. {VEST} — [EG 2] Bluse.

bo' - marque la parenté resultant du mariage; ex. patr' père - bo'patr' beau-père | relation by marriage; e. g. patr'in' mother - bo'patr'in' mother-in-law | durch Heirath (eigene oder fremde) erworben; z. B. patr' Vater - bo'patr' Schwiegervater; frat' Bruder - bo'frat' Schwager | пріобрѣтенный

бракомъ (своимъ или чужимъ); напр. patr' отецъ - bo'patr' тесть, свекоръ; frat' братъ - bo'frat' шуринъ, зять, деверь | nabyty przez małżeństwo (własne lub obce); np. patr' ojciec - bo'patr' teść; frat' brat - bo'frat' szwagier. — **bo** - marque la parenté résultant du mariage; ex. patro père - bopatro beau-père | relation by marriage; e. g. patrino mother - bopatrino mother-in-law | durch Heirath erworben; z. B. patro Vater - bopatro Schwiegervater; frato Bruder - bofrato Schwager | пріобрѣтенный бракомъ; напр. patro отецъ - bopatro тесть, свекоръ; frato братъ - bofrato шуринъ, зять, деверь, | nabyty przez małżeństwo; np. patro ojciec - bopatro teść; frato brat - bofrato szwagier [FE 33]. — [UL].

● **bo'frat'** – Schwager | шуринъ, зять, деверь | szwagier. [UV bo']. — **bofrato** - Schwager | шуринъ, зять, деверь | szwagier [FE 33 bo'].

● **bo'patr'** - beau-père | [angla mankas] | Schwiegervater | тесть, свекоръ | teść [UV bo']. — **bopatro** - beau-père | [angla mankas] | Schwiegervater | тесть, свекоръ | teść [FE 33 bo'].

● **bo'patr'in'** - mother-in-law [UV bo']. — **bopatrino** - mother-in-law [FE 33 bo'].

boa' - boa | boa | Riesenschlange {2012 ankaŭ: Boa} | боа, удавъ | boa. {ZOO} — [AK] {en} boa (*serpent*).

boac/o. [OA 9] Arkta remaĉanta mamulo portanta kornojn (en la Fundamento nomata *norda cervo*). (*Rangifer tarandus*.) {ZOO} — [PV 1930]. boaco = norda cervo (*rangifer*).

boat' - bateau, canot | boat, bark | Boot | ботъ | bat, łódź. {MAR}

boben' - bobine | spool, bobin | Spule | катушка | cewka, szpulka.

boj' - aboyer | bark (dog's) | bellen | лаять | szczekać. — [UL].

bojkot-i [OA 2.1] — [EG 2] boykottieren.

boks' [OA 1] boxer | box (fight) | boxen | боксировать | boksować.

bol' - bouillir | boil (vb.) | sieden | кипѣть | kipić, wrzeć. — **boli** - bouillir | boil | sieden | кипѣть | kipieć, wrzeć [FE 25]. — [UL].

● **bolanta** — ... el la kaldrono, en kiu sin trovas bolanta akvo, eliras vaporo [FE 25.14].

Bolivio [OA 8] {GEO} — [Rhodes 1908, 515]: **Bolivia**, Bolivio.

bombard' [OA 1] * bombarder | bombard | bombardieren | бомбардировать | bombardować. {MIL}

Bombast-o, [OA 4] {fr} enflure (fig.), style ampoulé, emphase | {en} bombast, turgidness | {de} Bombast, schwulstige Redeweise, Redeschwall | {it} ampollosita | {es} ampulosidad, énfasis | {pt} enfase {legu: ênfase}, estilo empolado | {ca} émfasi, ampulositat {legu: èmfasi, ampul·lositat}. — [EV 1923] {ne ĉe Z.}.

bomb-o [OA 2.1] {MIL} — [Beau] bombe. [EG 2] Bombe.

bombon' - bonbon | dainties | Bonbon | конфектъ | cukierek. — [AK 1914] a sweet, bonbon | Bonbon, Zuckerwerk {2012: Bonbon, Zuckerwerk (ark.)}.

bon' - bon | good | gut | хорошій, добрый | dobry. — **bona** - bon | good | gut | добрый | dobry [FE 8]. — **bon'** - good [UV - e angla]. — **bon'** - bon | good | gut | добрый | dobry [UV ec'] — **bona** bon | good | gut | добрый | dobry [FE 11 ec']. — **bon'** - bon | [angla mankas] | gut | хорошій | dobry [UV mal']. — **bona** - bon | good | gut | хорошій | dobry [FE 10 mal']. — [UL]. — La patro estas bona [FE 8]. Bonaj infanoj lernas diligente [FE 9]. Mi deziras al vi bonan tagon, sinjoro! [FE 10]. Bonan matenon! [FE 10]. El ŝiaj multaj infanoj unuj estas bonaj kaj aliaj estas malbonaj [FE 12]. "Tre volonte, mia bona,"; diris la bela knabino [FE 15]. Kiam la bona virino trankviligis sian soifon, ŝi diris al la knabino: "Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas fari al vi donacon" [FE 15]. Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota [FE 22]. Li estas bona parolanto [FE 31]. La ekstero de tiu ĉi homo estas pli bona, ol lia interno [FE 31]. Ligno estas bona brula materialo [FE 31]. Mia onklino estas bona virino [FE 33]. La regnestro de nia lando estas bona kaj saĝa reĝo [FE 37]. Nia urbo havas bonajn policanojn, sed ne sufiĉe energian policestron [FE 37]. Nia regimentestro estas por siaj soldatoj kiel bona patro [FE 37].

● **bon'e** - bien | well | gut | хорошо | dobrze [UV -e]. — La tranĉilo tranĉas bone, ĉar ĝi estas akra [FE 16]. "Bone, ĉar vi estas tiel servema, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano." [FE 19]. Se la lernanto scius bone sian lecionon, la instruanto lin ne punus [FE 20]. Ni estu

gajaj, ni uzu bone la vivon, ĉar la vivo ne estas longa [FE 20]. Sed estas bone uzadi la vorton „je" kiel eble pli malofte [FE 29]. La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj [FE 30].

● **bonaĵo** — Bo-ná-ĵo [FE 2]. Bonaĵo [FE 4].

● **bon'ec'** - bonté | goodness | Güte | доброта | dobroć [UV ec']. — **boneco** - bonté | goodness | Güte | доброта | dobroć [FE 11 ec'] — La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi [FE 11]. Li amas tiun ĉi knabinon pro ŝia beleco kaj boneco [FE 35].

● **malbona** – mauvais | evil | schlecht | дурной | zły [FE 10 mal']. — Malbonaj infanoj amas turmenti bestojn [FE 33]. En malbona vetero oni povas facile malvarmumi [FE 42].

● **malboneco** - ... tio ĉi estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino, por vidi, kiel granda estos la malboneco de tiu ĉi knabino [FE 19].

● **malbonigi** — Oni tiel malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron [FE 33].

● **bongusta** — Mi manĝis bongustan ovaĵon [FE 35].

● **bonsoneco -** ... se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo [FE 27].

bor' - percer | bore (vb.) | bohren | буравить | wiercić, świdrować.

boraks' - borax | borax | Borax | бура | boraks {KEM}.

bord' - bord, rivage | shore | Ufer | берегъ | brzeg. — **bordo** - bord, rivage | shore | Ufer | берегъ | brzeg [FE 32]. — [UL]. — Sur la bordo de la maro staris amaso da homoj [FE 32.9].

bordel' [OA 1] * bordel | brothel | Bordell | бордакъ | burdel. — [EG 1]

border' - border | border | säumen, besäumen | обрубать (кайма) | obrębiać, bramować. — [AK 1914] border, hem | säumen, einfassen.

bors' - bourse | bourse, exchange | Börse (der Kaufleute) | биржа | giełda. — [AK] bourse (local).

bosk-o [OA 2.2] bosquet | bosk | Lustwäldchen — [EG 2] Lustwäldchen.

bot' - botte | boot | Stiefel | сапогъ | but. — **boto** - botte | boot | Stiefel | сапогъ | but [FE 37]. — **boto** - botte | boot | Stiefel | сапогъ | but [FE 31 ist']. — [UL]. — La botisto faras botojn kaj ŝuojn [FE 37.13].

● **botisto** - bottier | boot-maker | Schuster | сапожникъ | szewc [FE 31 ist']. — La botisto faras botojn kaj ŝuojn [FE 37.13].

botanik' [OA 1] * botanique | botany | Botanik | ботаника | botanika. {BOT}

botel' - bouteille | bottle | Flasche | бутылка | butelka. — **botelo** - bouteille | bottle | Flasche | бутылка | butelka [FE 34]. — [UL]. — Ĉu vi havas korktirilon, por malŝtopi la botelon? [FE 34.2].

● **boteleto** — En tiuj ĉi boteletoj sin trovas diversaj acidoj: vinagro, sulfuracido, azotacido kaj aliaj [FE 35.6].

bov' - boeuf {legu: bœuf} | ox | Ochs, Stier | быкъ | byk {ZOO}. — **bovo** - bœuf | ox | Ochs | быкъ | byk [FE 33]. — **bov'** - bœuf | ox | Ochs | быкъ | byk [UV id']. — **bovo** - bœuf | ox | Ochs | быкъ | byk [FE 36 id']. — [UL] Stier, Ochs. — [AK 1914] Ochs, Rind. — Mi havas bovon kaj bovinon [FE 33]. Ĉevalido estas nematura ĉevalo, kokido - nematura koko, bovido - nematura bovo, birdido - nematura birdo [FE 36.14].

● **bov'id'** – veau | calf | Kalb | теленокъ | cielę [UV id']. — **bovido** - veau | calf | Kalb | теленокъ | cielę [FE 36 id']. — Ĉevalido estas nematura ĉevalo, kokido - nematura koko, bovido - nematura bovo, birdido - nematura birdo [FE 36.14].

● **bovino** — Mi havas bovon kaj bovinon [FE 33.21].

bovl/o. [OA 8] Larĝa, duonsfera taso, ordinare el argilo aŭ fajenco. — A. bowl, F. bol, G. (Trink)schale {legu: Trinkschale, Schale} ; H. {es} tazón, bol; I. {it} ciotola; P. {pt} tijela {legu: tigela}, escudela. — [EG 1].

bracelet-o [OA 2.1] bracelet | bracelet | Armband. — [EG 2] Armband. — **Rim**.: Kp. ĉirkaŭ'man' [UV man'].

bradip/o. [OA 9] Centr-Amerika kaj Sud-Amerika mamulo, kiu pendas de arbobranĉoj per la hokaj ungegoj de siaj tre longaj dufingraj aŭ trifingraj membroj, kaj sin movas tre malrapide. (*Bradypus*.) {ZOO} — [Fab I, 80] Ni, homoj, konas ja preskaŭ ĉiuj la rapidecon de la vaporforta veturado, ...

Sed ĉi tiu flugado estas kiel la irado de la besto nomata bradipo aŭ kiel ŝoviĝado de limako en komparo kun la rapideco de la radio de lumo.

brak' - bras | arm | Arm | рука, объятія | ramię. {ANAT} — **brako** - bras | arm | Arm | рука, объятія | ramię [FE 40]. — En la poŝo de mia pantalono mi portas monujon, kaj en la poŝo de mia surtuto mi portas paperujon; pli grandan paperujon mi portas sub la brako [FE 40.18].

bram' - brême | bream | Brassen {legu singularon: Brasse} | лещъ | leszcz. {ZOO}

braman-o [OA 2.1] {RELI} — [EG 2] Brahmane.

bran' - son | bran | Kleie | отруби | otręby. — [AK] son (de grain).

branĉ' - branche | branch | Zweig | вѣтвь | gałaź. {BOT} — **branĉo** - branche | branch | Zweig | вѣтвь | gałaź [FE 39]. — [UL] Zweig. — [AK 1914] Ast, Zweig. — Mi ne pendigis mian ĉapon sur tiu ĉi arbeto; sed la vento forblovis de mia kapo la ĉapon, kaj ĝi, flugante, pendiĝis sur la branĉoj de la arbeto [FE 39.12].

brand' - eau-de-vie | brandy | Branntwein | водка | wódka. {KUIR} — **brando** - eau-de-vie | brandy | Branntwein | водка | wódka [FE 34]. — [UL]. — Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo [FE 34.10].

brank' - branchies, ouïes | gill, fish-ear | Kieme | жабра | dychawka. {ZOO}

brasik' - chou | cabbage | Kohl | капуста | kapusta {BOT}. — [AK 1914] Krautkopf, Kohl {2012: Kohl, Krautkopf (ark.)}.

brav' - brave, solide | valiant, brave | tüchtig | дѣльный, удалый | dzielny, chwacki. — **brava** - brave, solide | valliant, brave | tüchtig | дѣльный, удалый | dzielny, chwacki [FE 34]. — [AK] {fr} brave, vaillant. — Nia lando venkos, ĉar nia militistaro estas granda kaj brava [FE 34.12].

Brazilo [OA 8] {GEO} — **Lingva Respondo 1911 [Pri la nomoj de landoj]**: De la komenco ĝis nun mi ĉiam uzadis la nomon "Egipto" ne por la lando, sed por la *popolo*; la landon mi nomadis "Egiptujo". Mi tion faradis ne pro nesufiĉa pripenso, sed tute pripensite kaj intence. En la *novaj* landoj (ekzemple en ĉiuj landoj Amerikaj), la lando fakte kaj morale apartenas ne al ia difinita gento, sed egalrajte al ĉiuj siaj loĝantoj; tial estas afero tute natura, ke tie la lando ne uzas por si (per *uj*), la nomon de ia gento, sed kontraŭe, ĉiuj ĝiaj loĝantoj uzas por si (per *an*) la nomon de la lando. Tute alia afero estis (kaj tradicie restis) en la landoj malnovaj: ĉiun pecon da tero okupis ia speciala gento, nomis la landon sia speciala genta propraĵo kaj ĉiujn aligentajn loĝantojn aŭ ekstermis, aŭ permesis al ili vivi en la lando kiel "fremduloj" tial la landoj malnovaj preskaŭ ĉiam portas la nomon de tiu aŭ alia gento, kaj en Esperanto, ĝis la tempo, kiam ni havos nomojn pure geografiajn, ni tion esprimas per la sufikso *uj*. La apud-Nila lando en la tempo de sia plej grava historia valoro estis lando *antikva*, aranĝita laŭ la principo "lando apartenas al unu gento", ĝi sekve nepre devas havi la sufikson *uj*, por ke ni povu esprimi la tre gravan por antikva lando diferencon inter la gento-mastro kaj la gentoj-fremduloj; ni scias ja el la Biblio, ke tiu diferenco en Egiptujo estis tre granda! Ĉiuj *novaj* landoj, ne aranĝitaj laŭ la principo "lando apartenas al unu gento", neniam devas uzi la sufikson *uj;* ni devas sekve diri "Usono", "Kanado" k.t.p. Se mi dum longa tempo uzadis "Brazil*uj*o", "Ĉil*uj*o" k.t.p., mi konfesas nun, ke tio estis eraro. Ni povus diri "Brazilo, Ĉilo" k.t.p., tamen mi ne konsilas tion fari, parte pro tio, ke por la Slavoj kaj la Germanoj, kiuj alkutimiĝis al "Brazil*i*a", "Brazil*i*en", "Ĉil*i*ec", la vortoj "Brazilo", "Ĉilo" ĉiam sonus kiel nomoj de *popoloj*, parte pro tio, ke la longatempe uzitaj formoj "Brazilo", "Ĉilo" en la senco de *popolo* donus nun grandan konfuzon, se la samajn formojn ni uzus nun en senco de lando. Sed tute oportune eviti samtempe ĉiujn tri malbonaĵojn (t.e. eraron, kontraŭkutimecon kaj konfuzon) ni povas tre bone, se ni de nun uzados por la diritaj landoj la formojn "Brazilio", "Ĉilio" kaj tiel mi konsilas agi. Tiel same ni neniam devas diri "Meksik*uj*o" ni devus diri "Meksiko", sed, por fari diferencon inter la urbo kaj la samnoma lando, mi konsilas fari tion, kion ni faris kun aliaj similcirkonstancaj landoj, t.e. nomi la urbon "Meksiko" kaj la landon "Meksik*i*o" (kiel Alĝero-Alĝerio, Tuniso-Tunisio k.t.p.).

Nun restas la demando pri la landoj *Eŭropaj*. Pli aŭ malpli frue venos eble la tempo, kiam ĉiuj Eŭropaj landoj ricevos nomojn neŭtrale geografiajn; sed tiel longe, kiel ni uzas por ili nomojn de gentoj, ni

devas ĉiam uzi tiujn nomojn kun la sufikso *uj*. Estas vero, ke ekzistas tri Eŭropaj regnoj, por kiuj la sufikso *uj* estas ne tute logika (Aŭstrujo, Belgujo kaj Svisujo), kaj se la Akademio trovus necesa anstataŭigi en ili la *uj* per *i*, mi tion ne malkonsilus; sed fari *propravole* escepton por tiuj tri regnoj mi al niaj verkistoj ne konsilus, ĉar la Esperantistoj jam tro forte alkutimiĝis al la ĝisnunaj, neniom ĝenantaj nomoj de tiuj tre gravaj kaj ofte citataj regnoj, kaj por fari rompon en tiu alkutimiĝo mi ne vidas ian gravan neceson. Ĉar la tuta esenco de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur *interkonsento*, tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco; oferi la unuan al la dua mi konsilus nur en tia okazo, se nia Lingva Komitato tion postulus. [Respondo 47, *Oficiala Gazeto*, III, 1911, p. 291].

brečĉ-o [OA 2.1] — [Beau] brec {kun –c anstataŭ –ĉ}, brèche. [EG 2] Bresche, Lücke, Wallbruch.

bred/i. [OA 8] 1. Teni kaj reprodukti (bestojn) por la homuzado. 2. Plibonigi kulturformojn de plantoj kaj bestoj produktante novajn per krucado aŭ selekto. — A. to breed; F. élever, produire (bêtes, plantes), améliorer (race); G. züchten, aufziehen; H. {es} criar; I. {it} allevare; P. {pt} criar (animais), cultivar (plantas), melhorar (raça).

BREMSO [OA 5.2] *(Mekaniko). Mekanika aŭ elektra aparato por malakceli, haltigi aŭ reguligi movon aŭ funkciadon de maŝino* | {en} brake | {fr} frein | {de} Bremse | {es} freno (de una máquina) | {it} freno | {pl} bremzo. — **Rim.**: Antaŭe halt'ig'il'o, ekz. en Kabe 1910.

bret' - tablette | tablet, shelf | Wandbrett, Regal | полка | półka. — [AK] tablette, étagère, rayon | shelf, rack. — **Rim.**: Nun por *Regal* kaj *étagère* kutime bretaro, t.e. pluraj bretoj unu super la alia, dum breto plu nur celas unu eron de bretaro.

brid' - bride | bridle | Zaum | узда | uzda.

brigad-o [OA 2.1] {MIL} — [Beau] brigade (milit.). [EG 2] Brigade.

brik' - brique | brick | Ziegel | кирпичъ | cegła. — [AK 1914] Backstein, Ziegelstein.

bril' - briller | shine | glänzen | блистать | błyszczeć. — **brili** - briller | shine | glänzen | блистать | błyszczeć [FE 5]. — [UL]. — La suno brilas [FE 5.5]. La diamanto havas belan brilon [FE 40.10]. Du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo. [FE 40.11]. La suno rebrilas en la klara akvo de la rivero [FE 42.6].

briliant' - brillant | brilliant | Brillantstein | бриліантъ | brylant. — [AK] brilliant (diamant) | brilliant, gem | Brilliant (Stein), geschliffener Diamant.

brit/o [OA 9] **1** Ano de Britujo. **2** Ano de la antikva indiĝena gento de Britujo *1*. — [EG 1] [EG 2] Brite.

● **Brit/uj/o** [OA 9]. **1** Insulo en Eŭropo, inter Francujo kaj Irlando. **2** Regno, kiu inkluzivas Britujon *1* kaj Nord-Irlandon. Internacia landokodaĵo: GB. {GEO} — [Bat 1891] *Benjamin Britain* - nomata iafoje Malgrand-*Britain* por diferenco de Grand-Britujo (*Great Britain*). [EG 1] [EG 2] Britannien.

broĉ' [OA 1] broche | brooch | Brosche | брошь | brosza.

brod' - broder | stitch, embroider | sticken | вышивать | haftować. — [AK] {en} embroider.

brog' - échauder | scald | brühen | обваривать кипяткомъ | parzyć.

brokant-i [OA 2.2] brocanter | to broke | schachern — [EG 2] schachern.

brokol/o. [OA 9] Speco de legoma brasiko, parenca al florbrasiko, kun kapo verda (ĉe iaj specoj tamen violkolora aŭ eĉ blanka) konsistanta el nefirma floraro. (*Brassica oleracea italica*.) {BOT} — [PV 1930].

brom' [OA 1] * brome | bromine | Brom | бромъ | brom. {KEM}

bronkit-o [OA 2.1] {MED} — [Beau] bronchite. [EG 2] Bronchitis.

bronz' - bronze | bronze | Bronze | бронза | bronz.

bros' - brosse | brush | Bürste | щетка | szczotka. – **broso** - brosse | brush | Bürste | щетка | szczotka [FE 39]. — [UL]. — En la kota vetero mia vesto forte malpuriĝis; tial mi prenis broson kaj purigis la veston [FE 39.1].

broŝur' [OA 1] * brochure | pamphlet | Broschüre | брошюра | broszura.

brov' - sourcil | eye-brow | Augenbraue | бровь | brew. {ANAT}

bru' - faire du bruit | noise {substantiva} | lärmen, brausen | шумѣть | szumieć, hałasować. — **brui** - faire du bruit | make a noise {verba} | lärmen, brausen | шумѣть | szumieć, hałasować [FE 38]. — [UL].

● **bruo** — Kun bruo oni malfermis la pordegon, kaj la kaleŝo enveturis en la korton [FE 38.8].

brul' – brûler {de 1990: bruler} (être en feu) | burn (v. n.) | brennen (v. n.) | горѣть {de 1918: гореть} | palić się. — **bruli** – brûler {de 1990: bruler} (être en feu) | burn (v. n.) | brennen (v. n.) | горѣть | palić się [FE 31]. — **brul'** - brennen (selbst) | горѣть {de 1918: гореть} | palić się [UV ig] — **bruli** - brennen (selbst) | горѣть {de 1918: гореть} | palić się [FE 13 ig']. — [UL]. — Kia granda brulo! kio brulas? [FE 31.15]

● **brulo** — Kia granda brulo! kio brulas? [FE 31.15]

● **brula** — Ligno estas bona brula materialo [FE 31.16].

● **brule** — La fera bastono, kiu kuŝis en la forno, estas nun brule varmega [FE 31.17].

● **brulanta** — En la kandelingo sidis brulanta kandelo [FE 40.17].

● **brul'ig'** - brennen (etwas) | жечь | palić [UV ig']. — **bruligi** - brennen (etwas) | жечь | palić [FE 13 ig']. — [AK 1914] brul- = brennen (intr.); brul-ig- = brennen (tr.). — Post infekta malsano oni ofte bruligas la vestojn de la malsanulo [FE 39.5].

● **brul'um'** - inflammation | inflammation | Entzündung | воспаленіе | zapalenie. {MED} — **Rim.**: Arkaismo por **inflam-o** (med.) [OA 4], vd. tie.

brun' - brun | brown | braun | бурый | brunatny.

brust' - poitrine | breast | Brust | грудь | pierś. {ANAT} — [UL]. — **Rim**.: Kp. mam'.

brut' - brute, bétail | brute | Vieh | скотъ | bydło. — **bruto** - brute, bétail | brute | Vieh | скотъ | bydło [FE 34]. — [AK] {en} head of cattle.

● **brutaro** — Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, precipe aroj da bellanaj ŝafoj [FE 34.15].

bub' - polisson | wicked boy | Bube | мальчишка | ulicznik. — [AK] gamin | lad, urchin.

bubal' - buffle | buff, buffle | Büffel | буйволъ | bawół. {ZOO} — [AK] {en} buffalo.

buĉ' - tuer, assommer | slaughter, butcher | schlachten | заклать | zabijać, rzezać. — [AK] tuer, massacrer, abattre (animaux).

bud' - boutique | booth, shop | Bude | балаганъ | buda. — [AK] boutique, échoppe. — **Rim.**: **1.** [ER 1909]: балаганъ, бу́дка. **2.** Kp. **butik'**. **3.** Senco limiĝis pro **barak-o** (*domaĉo*) [OA 2.1] kaj **kaban-o** [OA 2.2].

Budĝet' [OA 3.1] {en} budget | {fr} budget | {de} Budget | {es} presupuesto | {pt} orcamento {legu: orçamento} | {it} bilancio preventivo | {pl} budzet {legu: budżet}. — [RE]. — [OA 8] II.A.3. Estas oficialigitaj la novaj formoj buĝeto {EV 1923} kaj proleto apud la jam oficialaj budĝeto kaj proletario. [OA 8] II.A.RIM.II. Ĉiuj formoj deklaritaj kiel "toleritaj" de la Akademio en Junio 67 (Aktoj de la Akademio, 1963-1967, p. 73 {= 2-a eld. 2007, p. 62} estas nun oficialigitaj, escepte de du: dekori kaj konversi, kiuj konservas sian kvaliton de "toleritaj". — 20. Junio 1967 - La Akademio alprenis jenajn decidojn:

§ 1 {alia temo}

§ 2.– a) Estas tolerata la nova ortografio buĝeto anstataŭ la ĝis nun oficiala budĝeto.

§ 2.– b) – ĉ) {aliaj temoj}

§ 3 {alia temo}

Vd. ankaŭ buĝeto.

buduar' [OA 1] * boudoir | boudoir | Boudoir | будуаръ | buduar.

buf' - crapaud | toad | Kröte | жаба | ropucha. {ZOO}

bufed' - buffet | buffet | Buffet | буфетъ | bufet, kredens. — [AK] buffet, restaurant.

buĝet/o. [OA 8] Detala antaŭkalkulo de en- kaj el-spezoj por difinita periodo, ofte prezentita en formala dokumento. — A. budget, F. budget; G. Haushaltsplan, Budget; H. {es} presupuesto, ("budget"); I. {it} bilancio, preventivo; P. {pt} orçamento. — [EV 1923]. — [OA 8] II.A.3. Estas oficialigitaj la novaj formoj buĝeto kaj proleto apud la jam oficialaj budĝeto kaj proletario. [OA 8] II.A.RIM.II. Ĉiuj formoj deklaritaj kiel "toleritaj" de la Akademio en Junio 67 (Aktoj de la Akademio, 1963-1967, p. 73 {= 2-a eld. 2007, p. 62} estas nun oficialigitaj, escepte de du: dekori kaj konversi, kiuj konservas sian kvaliton de "toleritaj". — 20. Junio 1967 - La Akademio alprenis jenajn decidojn:

§ 1 {alia temo}

§ 2.– a) Estas tolerata la nova ortografio buĝeto anstataŭ la ĝis nun oficiala budĝeto.

§ 2.– b) – ĉ) {aliaj temoj}

§ 3 {alia temo}

Vd. ankaŭ budĝeto.

buk' - boucle | latch, buckle | Schnalle | пряжка | sprzączka. — [AK] {en} buckle, clasp.

buked' - bouquet | nosegay | Strauss (Blumen) | букетъ | bukiet.

bukl' - boucle | buckle, lock | Locke | локонъ | lok, pukiel. — [AK] bouche (de cheveux) | curl, ringlet.

buks' [OA 1] buis | box (tree) | Buchsbaum | буксъ | bukszpan. {BOT}

bul' - boule, motte | clod | Kloss {legu: Kloß} | комъ, клецка | bryla, kluska. — [AK] {en} lump, clod, ball. — **Rim.**: клецка (pastobuleto kuirita en buljono) mankas en [ER 1909].

bulb' - oignon | bulb | Zwiebel | луковица | cebula. {BOT} — [AK] bulbe, oignon | bulb, onion. — **Rim.**: Origine dusignifa en ĉiuj kvin referenc-lingvoj: 1. Globforma radiko. 2. Cepo, legoma bulbo (*Allium cepa*). — **Lingva Respondo 1907 [Pri „okulpomo"]**: Tiun ĉi esprimon (uzatan germane, ruse, pole) mi trovas pli bona ol „bulbo". [LR 39B, 1907, PVZ VIII, 39]. — **Rim.**: Z tradukis la germanan medicinan fakvorton *Bulbus* (ĝenerallingve pli kutima: *Augapfel*) per „okulpomo" en sia artikolo „Kronika katara konjunktivito" en FK 1903; en la 17-a eld. 1954 sur p. 219.

bulgaro [OA 8] — [E-isto 1889, p. 24] *Sofia, la ĉefurbo de Bulgarujo; la Bulgara gazeto ‚Struma'; gramatiko de la lingvo Esperanto por Bulgaroj.*

buljon' - bouillon | broth | Bouillon | бульонъ | buljon. {KUIR}

bulk' - pain blanc | manchet loaf | Semmel | булка | bułka. {KUIR} — [AK] petit pain blanc | manchet loaf, roll (*bread*).

Bulonj' – Pli detale mi parolos pri tio ĉi en la Bulonja kongreso [A 6.5] [A, mankas en UV]. — **Bulonj'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (urbnomo)

BULTENO [OA 5.1] *Perioda informilo de socieo* | bulletin | bulletin | periodischer schriftlicher Bericht | {es} boletin {legu: boletín} (periódico) | {it} bollettino | {pl} buletyn.

bulvard' [OA 1] * boulevard | boulevard | Boulevard | бульваръ | bulwar.

burd' - bourdon | humblebee | Hummel | шмель | trzmiel. {ZOO} — [AK] bourdon (*zool.*) | bumble-bee, humble-bee.

burĝ' - bourgeois | burgher | Bürger (nicht adeliger) | мѣщанинъ | mieszczanin.

burĝon' - bourgeon | bud | Knospe | почка (растеній) | pączek. {BOT}

burlesk-a [OA 2.1] — [Beau] burlesque. [EG 2] burlesk, possenhaft, drollig.

burnus-o [OA 2.1] {VEST} — [Beau] burnous. [EG 2] Burnus, Beduinenmantel.

burokrat/o [OA 9] **1** Oficisto en administrejo (ŝtata), rigardata kiel parto de sistemo por regado kaj administrado. (Se oni parolas konkrete pri persono, oni preferas vortojn kiel *oficisto*, *administranto*, *funkciulo* k.s.) **2** (malŝate) Persono, kiu rigore sekvas la administrajn regulojn kaj rutinojn, sed ignoras la bazan celaron de la laboro aŭ la demokratian devon reagi al publikaj kritikoj. — [PV 1930].

● **burokrat/ar/o**. Tuto de la burokratoj *1* (en unu ŝtato k.s.). — [PV 1930].

● **burokrat/ism/o 1** Sistemo de (kvazaŭa) regado fare de la burokrataro; administra sistemo, en kiu la burokratoj *1* havas tro da povo aŭ influo. **2** (malŝate) La procedo-troigaj tendencoj de burokrato *2*; sistema flegado aŭ apogado de tiaj tendencoj.

buŝ' - bouche | mouth | Mund | ротъ | usta. — buŝo - bouche | mouth | Mund | ротъ | usta [FE 8]. — [UL]. — Mi manĝas per la buŝo kaj flaras per la nazo [FE 8.10]. Mi havas nur unu buŝon, sed mi havas du orelojn [FE 12.2]. "Mi faras al vi donacon," daŭrigis la feino, "ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono." [FE 15.7] Kaj kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri grandaj diamantoj [FE 17.3]. "Ŝajnas al mi, ke el ŝia buŝo elsaltas perloj kaj diamantoj! [FE 17.5]. ... kaj, dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj [FE 17.8]. Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas … [FE 17.10]. "Bone, ĉar vi estas tiel servema, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano." [FE 19.10]. La reĝido, kiu vidis, ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj, petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas [FE 23.2].

● **buŝ'um'** - muselière | mouth-basket | Maulkorb | намордникъ | kaganiec. — [AK] {en} muzzle.

buŝel' - boisseau | bushel | Scheffel | четверикъ | korzec. {MEZ}

bust' [OA 1] buste | bust | Büste | бюстъ | bjust.

buter' - beurre | butter | Butter | масло (коровье) | masło. {KUIR} — [UL].

butik' - boutique | shop, hall | Laden, Krambude {2012: Boutique, Laden, Krambude (ark.)} | лавка (торговая) | sklep. — [AK] {en} small shop. — **Rim.**: Kp. **bud'**.

buton' - bouton | button | Knopf | пуговица | guzik. — [UL].

● **buton'um'** - boutonner | button | zuknöpfen | застегивать | zapinać. — **Rim.**: Sinonimo: **buton'i**.

C, Ĉ

Cc - ts (tsar) | ts as in "wits" | c, z | ц | c [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **co** ... [FE 1]. — **co** [OA 7] = nomo de la litero c, tria litero de la Esperanta alfabeto. — **Rim**.: [Lingva Respondo 56 (1893): Pri la nomoj de la literoj]. La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

Ĉĉ - tch (tchèque) | ch as in "church" | tsch | ч | cz [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **ĉo** ... [FE 1]. — **ĉo** [OA 7] = nomo de la litero ĉ, kvara litero de la Esperanta alfabeto. — Lingva Respondo 56 (1893) [Pri la nomoj de la literoj]: La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

ĉagren' - chagriner | disappoint | verdriessen {legu: verdrießen} | причинять досаду | martwić. — [AK] {en} vex, annoy. — [UL].

ĉam' - chamois | wild goat | Gemse | серна | dzika koza, giemza. {ZOO}

ĉambelan' - chambellan | chamberlain | Kammerherr | камергеръ | szambelan. — [RE]

ĉambr' - chambre | chamber | Zimmer | комната | pokój. — **ĉambro** - chambre | room | Zimmer | комната | pokój [FE 8]. — [AK] {en} room, chamber. — [UL]. — La patro estas en la ĉambro [FE 8.12]. Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro [FE 18.17]. La birdo flugas en la ĉambro (= ĝi estas en la ĉambro kaj flugas en ĝi) [FE 26.3]. La birdo flugas en la ĉambron (= ĝi estas ekster la ĉambro kaj flugas nun en ĝin) [FE 26.4]. En la ĉambro sidis nur kelke da homoj [FE 32.13]. Magazeno, en kiu oni vendas cigarojn, aŭ ĉambro, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarejo [FE 40]. Mi disŝiris la leteron kaj disĵetis ĝiajn pecetojn en ĉiujn angulojn de la ĉambro [FE 42].

● **ĉambristino** - Ni havas diversajn servantojn: kuiriston, ĉambristinon, infanistinon kaj veturigiston [FE 37.18].

● **dormoĉambro** - Li eliris el la dormoĉambro kaj eniris en la manĝoĉambron [FE 31.19].

● **manĝoĉambro** - Li eliris el la dormoĉambro kaj eniris en la manĝoĉambron [FE 31.19].

ĉampan' - champagne (vin de) | champagne | Champagner | шампанское | szampan. {KUIR}

ĉampion/o. [OA 9] Venkinto en grava sportokonkurso (urba, landa, tutmonda...). — [PV 1930] 1 Porbatalanto de partio, doktrino, societo kc. 2 Venkinto en sportkonkurso, rekordulo.

ĉan' - chien de fusil | cock | Hahn (am Schiessgewehre) {legu: Hahn (am Schießgewehr} | курокъ | kurek. — [AK] {en} cock (*of a gun*).

ĉap' - bonnet | bonnet | Mütze | шапка | czapka. {VEST} – **ĉapo** - bonnet | bonnet | Mütze | шапка | czapka [FE 39]. — [AK] {en} cap, bonnet. — [UL]. — Mi ne pendigis mian ĉapon sur tiu ĉi arbeto; sed la vento forblovis de mia kapo la ĉapon, kaj ĝi, flugante, pendiĝis sur la branĉoj de la arbeto [FE 39.12]. — **Rim.**: Kp. ĉapelo, kufo.

ĉapel' - chapeau | hat | Hut | шляпа | kapelusz. {VEST} – **ĉapelo** - chapeau | hat | Hut | шляпа | kapelusz [FE 8]. — [UL]. — Jen kuŝas la ĉapelo de la patro [FE 8.2]. Mi jam havas mian ĉapelon; nun serĉu vi vian [FE 18.16]. Li portas rozokoloran superveston kaj teleroforman ĉapelon [FE 31.23].

ĉapitr' - chapitre | chapter | Kapitel | глава (книги) | rozdział.

car' [OA 1] * tsar | czar | Zar | царь | car. — [EG 2].

ĉar - car, parce que | for | weil, denn, da | ибо, такъ какъ | albowiem, ponieważ. — **ĉar** - car, parce que | for | weil, da, denn | ибо, такъ какъ | albowiem, ponieważ [FE 9]. — [AK] {en} for, since, because. — [UL]. — Ĉar [FE 2]. — Donu al la birdoj akvon, ĉar ili volas trinki [FE 9.3]. Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon [FE 13.1]. “Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas fari al vi donacon” (ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino) [FE 15.6]. La tranĉilo tranĉas bone, ĉar ĝi estas akra [FE 16.4]. La infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi [FE 16.13]. La infanoj ploras, ĉar ili volas manĝi [FE 16.14]. Li estas mia onklo, ĉar mia patro estas lia frato [FE 18.9]. “Bone, ĉar vi estas tiel servema, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano.” [FE 19.10]. Ni estu gajaj, ni uzu bone la vivon, ĉar la vivo ne estas longa [FE 20.21]. Ne riproĉu vian amikon, ĉar vi mem plimulte meritas riproĉon; li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto [FE 22.7]. La hirundo flugis trans la riveron, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj [FE 26.14]. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo [(...)], povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa [FE 27.3]. ... la vortoj „ĝardenon”, „tablon” staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en” kaj „sur” tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton ... [FE 28.3]. La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj [FE 30.2]. Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem [FE 32.3]. Nia lando venkos, ĉar nia militistaro estas granda kaj brava [FE 34.12]. Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklaraĵon [FE 35.4]. La hebreoj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas de Izraelo [FE 36.13]. Forigu vian fraton, ĉar li malhelpas al ni [FE 39.6]. Venigu la kuraciston, ĉar mi estas malsana [FE 39.9]. Rakontu al mi vian malfeliĉon, ĉar eble mi povos helpi al vi [FE 41]. Mi kredeble ne povos veni al vi hodiaŭ, ĉar mi pensas, ke mi mem havos hodiaŭ gastojn [FE 41]. Mi foriras, sed atendu min, ĉar mi baldaŭ revenos [FE 42.5].

— **Lingva Respondo 1891 [Pri la deveno de „ĉar“]**: Volapük havas la rusan vorton “ibo”, dum ni donis por ĝi la ŝanĝitan francan vorton “ĉar”! [*La Esperantisto*, 1891, p. 49-50].

ĉarlatan’ - charlatan | charlatan | Charlatan {2012: Scharlatan} | шарлатанъ | szalbierz.

ĉarm’ - charmant | charm | anmuthig {de 1901: anmutig; 2012 ankaŭ: charmant} | милый | nadobny.

ĉarnir’ - charnier {charnier estas amastombejo; ĝuste: charnière} | hing | Charnier {2012: Scharnir} | шарниръ | nit, wycięcie. — [AK] charnière, gond | hinge. — [RE].

ĉar-o [OA 2.2] char | car | Karren.

ĉarpent’ - charpenter | do carpenter’s work | zimmern | плотничать | ciosać.

● **ĉarpent’ist’** - charpentier | carpenter | Zimmermann | плотникъ | cieśla.

ĉarpi’ - charpie | lint for a wound | Charpie {ark.} | корпія | skubanka {MED}. — [RE]. [Kabe 1910]: Fadenoj el malnova tolaĵo, uzataj iam por bandaĝi la vundojn: *La ĉarpio jam de longe estas anstataŭita per la sorbema kotono.*

ĉas’ - chasser (vénerie) | hunt | jagen, Jagd machen | охотиться | polować. — **ĉasi** - chasser (vénerie) | hunt | jagen, Jagd machen | охотиться | polować [FE 21]. — La filo de la reĝo, kiu revenis de ĉaso, ŝin renkontis [FE 21.7].

● **ĉas’aĵ’** - gibier | game, venison | Wild | дичь | zwierzyna.

ĉasi/o. [OA 9] Baza framo de rada veturilo, portanta karoserion, motoron, aksojn, radojn ktp. {TEK} — [PV 1930].

ĉast’ - chaste | chaste | züchtig, keusch | цѣломудренный | niepokalany, czysty.

ĉe - chez | at | bei | y, при | u, przy. — **ĉe** - chez | at | bei | y, при | u, przy [FE 15]. — [AK 1914] chez, à, en présence de | bei, zu. — [UL]. — “Mi faras al vi donacon,” daŭrigis la feino, „ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono.“ [FE 15.7]. „Bone, ĉar vi estas tiel servema, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano.“ [FE 19.10]. Kiam li estis ĉe mi, li staris tutan horon apud la fenestro

[FE 26.16]. Je la lasta fojo mi vidas lin ĉe vi (aŭ: la lastan fojon) [FE 29.5]. Li estas tre ekkolerema kaj ekscitiĝas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo [FE 41.13]. — [DL 1888] *... mi tuj sendos al ĝi la tutan materialon, kiu estas ĉe mi ... [DL I.4]. Ke ĉe ĉiu pli granda afero estas uzata divido de laboro, la skribinto tute forgesis! [DL II.3]. Sinjoroj la kalkulantoj forgesis tiun simplan leĝon, ..., ke tio, kio ĉe unu homo postulas 30 jarojn, ĉe cent homoj okupos sole 4 monatojn, ... [DL II.3]. Por ne piki la fingron ĉe l' kudrado, oni portas fingringon [DL 14.13]. Mi ne loĝas ĉe mia frato, mi loĝas aparte; sed mia loĝejo estas apud la lia [DL 16.20]. Restu tajloro ĉe via laboro [DL 18].* {Multaj pliaj trafoj en DL}. — **Rim.**: Kp. apud, en, sur, je.

ced' - céder | yield, give up | abtreten, weichen | уступать | ustępować.

cedr' - cèdre | cedar | Ceder {de 1901: Zeder} | кедръ | cedr {BOT}.

ĉef' - principal | chief | Haupt, Chef | глава, главный | szef, główny. — [AK] {en} chief (*adj.*), head. — [RE 1889 A]: ĉef'anĝel'. — **Rim.**: Substantivo nur en la germana, en la aliaj referenc-lingvoj adjektivo, kiel eksplicitas la angla AK. Koherigu legante „Haupt-, Chef-" (kiel en *Hauptstadt*, *Chefsache*) aŭ aldonante *hauptsächlich*.

● **ĉef'episkop'** - archevêque | archbishop | Erzbischof | архіепископъ | arcybiskup [UV episkop']. {RELI} — [RE A].

cejan' - aubifoin, bluet | corn-flower | Kornblume | василекъ | bławatek {BOT}. — [AK] bluet.

ĉek' [OA 1] chèque | cheque | Scheck, Zahlschein | чекъ | czek. {EKON}

ĉel' - cellule | cell | Zelle | ячея, ячейка, келья | cela, komórka. — [RE].

cel' - viser | aim | zielen | цѣлиться | celować. — **celi** - viser | aim | zielen | цѣлиться | celować [FE 28]. — [UL].

● **celo** — **Cé-lo** [FE 2]. — … tiel same ni ankaŭ diras: „la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon", kaj la vortoj „ĝardenon", „tablon" staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en" kaj „sur" tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri, ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo (ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado) [FE 28.3].

celeri-o [OA 2.1]

celuloz-o [OA 2.1] {KEM} — [EG 2] (chem.) Zellulose.

cement' - ciment, lut | cement, lute | Cement {de 1901: Zement}, Kitt | цементъ | cement, kit.

ĉemiz' - chemise | shirt | Hemd | сорочка | koszula. — **ĉemizo** - chemise | shirt | Hemd | сорочка | koszula [FE 35]. — [UL]. — Ĉe-mí-zo [FE 2]. — Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35.13].

ĉen' – chaîne {de 1990: chaine} | chain | Kette | цѣпь | łańcuch. — [UL].

cend' [OA 1] cent (monnaie) | cent (coin) | Cent | центъ | cent. {MON}

cent - cent | hundred | hundert | сто | sto. — **cent** - cent | hundred | hundert | сто | sto [FE 12]. — **cent** – 100 [FG 4.1]. — [UL]. — Mi havas cent pomojn [FE 14.1].

● **cento** — Cén-to [FE 2]. Cento [FE 4]. — Mi havas centon da pomoj [FE 14.2].

● **ducent** — Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo [FE 32.8].

● **Kvin'cent tri'dek tri** — 533 [FG 4 – fr, en, de, ru, pl]

● **okcent** — Mil okcent naŭdek tri [FE 12.10].

● **sepcent** — Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua [FE 12.19].

● **tricent** — Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro [FE 14.12].

centigram-o [OA 2.1] {MEZ}

centilitr-o [OA 2.1] {MEZ}

centimetr' [OA 1] * centimètre | centimeter | Zentimeter | центиметръ | centymetr. {MEZ}

centimo — Centimo, pfenigo kaj kopeko estas moneroj [FE 41.15, mankas en UV]. — **centim'** [OA 1] * centime | centime | Centime | центимъ | centym. — **centim'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7].

centr' – [A, mankas en UV] Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova [A 8.1]. ... fari tion ĉi (...) povas ne apartaj personoj, sed nur ia

centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro [A 9.4]. ... ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidos pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ĉio bona, kio ne troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel rekomendata [A 10.4]. — **centr'** [OA 1] * centre | centre | Zentrum | центръ | centrum, środek. — **centr/o** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 8].

central/o. [OA 8] Centra loko, kie oni produktas ion ĉirkaŭe distribueblan (elektron, betonon, ...) aŭ funkciigas telefonan sistemon, aŭ kie oni administras komunan agadon (sindikatoj, partioj, ...). — A. centre (of activity), (generating) station, (telephone)exchange; F. une centrale; G. Zentrale, Kraftwerk, Gewerkschaftszentrale; H. {es} central, I. {it} centrale, P. {pt} central.

Centraliz' [OA 3.2] {en} to centralize | {fr} centraliser | {de} zentralisieren | {es} centralizar | {pt} centralizar | {it} accentrare | {pl} centralizowac {legu: centralizować}.

cenzur' [OA 1] censure | censure | Zensur | цензура | cenzura.

cep/o. [OA 8] Legomo, specio el la genro ajlo, kulturata por sia bulbo (Allium cepa). — A. onion, F. oignon (légume), G. Zwiebel, H. {es} {es} cebolla, I. {it} cipolla, P. {pt} cebola. {BOT}

Ceramik-o [Z], [OA 4] {fr} art céramique | {en} ceramics | Töpferkunst | {it} ceramica | {es} cerámica | {pt} cerâmica | {ca} cerámica {legu: ceràmica}.

cerb' - cerveau | brain | Gehirn | мозгъ | mózg. {ANAT}

ceremoni' [OA 1] * cérémonie | ceremony | Zeremonie | церемонія | ceremonja.

ĉeriz' - cerise | cherry | Kirsche | вишня | wiśnia. {BOT} — [UL].

ĉerk' - cercueil | coffin | Sarg | гробъ | trumna. — [UL].

ĉerp' - puiser | draw | schöpfen (z. B. Wasser) | черпать | czerpać. – **ĉerpi** - puiser | draw | schöpfen (z. B. Wasser) | черпать | czerpać [FE 13]. — [AK] {en} draw (*water, etc.*). — Inter aliaj aferoj tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko kaj alporti domen plenan grandan kruĉon [FE 13.3]. Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino ... [FE 15.3]. Vi devas nur iri al la fonto ĉerpi akvon ... [FE 17.11].

cert' - certain | certain, sure | sicher, bekannt, gewiss | вѣрный, извѣстный | pewny, znany. — **certa** - certain | certain, sure | sicher, gewiss | вѣрный, извѣстный {de 1918: верный, известный) | pewny [FE 19]. — [UL]. — [AK 1914] sicher, gewiss. — [ER 1909] вѣрный {de 1918: верный}.

— **Lingva Respondo [Pri la senco de „certa"]**: Krom sia ĉefa senco, la vorto "certa" havas ankoraŭ la sencon de „iu" (ne en la senco de "kiu ajn", sed en la senco de "iu difinita"); la uzado de "certa" en la senco de "iu" tute ne estas franclingvaĵo, ĉar tiel same oni uzas tiun vorton en la lingvoj germana, rusa, pola kaj aliaj. [Respondo 57, *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, p. 223]. — **Rim.**: Kp. „unu".

● **certe** — Certe, mi alportis arĝentan vazon speciale por tio, por doni trinki al tiu ĉi sinjorino! [FE 19.7].

● **cert'ig'** - assurer | assure | versichern | увѣрять | zapewniać.

cerv' - cerf | deer | Hirsch | олень | jeleń. {ZOO}

● **nord'a cerv'** - renne | reindeer | Rennthier {de 1901: Renntier; 2012: Rentier, Ren} | сѣверный олень | renifer, ren. {ZOO} — **Rim.**: Sinonimo estas **boac/o**. [OA 9].

ĉes' - cesser | cease, desist | aufhören | переставать | przestawać. — **ĉesi** - cesser | cease, desist | aufhören | переставать | przestawać [FE 13]. — [AK] cesser (intr.). — [UL]. — La infano ne ĉesas petoli [FE 20.24].

● **senĉesa** — Sen-ĉé-sa [FE 2].

● **senĉese** — Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj laboradi senĉese [FE 13.2].

— **Lingva Respondo 1911 [Pri „daŭri" kaj ĉesi]**: Vd. ĉe „daŭri".

ceter' - autre (le reste) | rest, remainder | übrig | прочій | pozostały. — **cetera** - autre (le reste) | rest, remainder | übrig | прочій | pozostaly {legu: pozostały} [FE 35]. — [UL]. — Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35]. — [DL 1888]: *La lavistino alportis mian tolaĵon: ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj viŝilojn (oni nomas ĝin tolaĵo, kvankam ne ĉio estas farita el tolo)* [DL 9.5].

ĉeval' - cheval | horse | Pferd | конь | koń. {ZOO} — **ĉevalo** - cheval | horse | Pferd | конь | koń [FE 36]. — [UL]. — Ĉevalido estas nematura ĉevalo ... [FE 36.14] — **Lingva Respondo 1901**: La nomoj de ŝako estas: ... *Springer* ĉevalo ... [LR 19. Let. al Th. Thorsteinsson (1901), O.V. p. 522]. Z per tio ripetas al nova esperantisto la kutimon de E-isto Marto 1892, p. 43: „Klarigo de la literoj, kiujn ni uzos en ŝako: ... Ĉ = ĉevalo ...".

● **ĉevalido** - Ĉevalido estas nematura ĉevalo ... [FE 36.14]

Ĉevron-o, [OA 4] {fr} chevron (arch.) | {en} rafter | Dachsparren | {it} corrente, travicello (del tetto) | {es} cabrio, cabrial {ark.}, cabriol {ark.} | {pt} asna {ankaŭ: caibro} | {ca} coster de sostre. {ARKI} — [EG 2]. — **Rim.**: La hispanaj tradukoj „cabrial" kaj „cabriol" malaperis de la oficiala Vortaro de la Hispana Reĝa Akademio (DRAE) inter la 21-a eldono (1992) kaj la 22-a (2001).

ci - tu, toi, | thou | du | ты | ty. — **ci** - tu, toi, | thou | du | ты | ty [FE 16]. — Ci skribas (anstataŭ „ci" oni uzas ordinare „vi") [FE 16.2]. — [DL 1888]: *„Vi" ni diras egale al unu persono aŭ objekto kaj al multaj; tio ĉi estas farita pro oportuneco, ĉar, parolante kun iu, ni ofte ne scias, kiel diri al li: „vi" aŭ „ci" („ci" signifas la duan personon de l' ununombro; sed tiu ĉi vorto estas trovata sole en la plena vortaro; en la lingvo mem ĝi preskaŭ nenian estas uzata) [DL 4].*

● **ci'a** - ton, ta | thy, thine | dein | твой | twój. — Cí-a [FE 2].

— **Lingva Respondo 1908**: La neuzado de "ci" tute ne estas senkonscia imitado de la ekzistantaj lingvoj, - kontraŭe, ĝi estas specialaĵo de la lingvo Esperanto, specialaĵo bazita sur pure praktikaj konsideroj kaj esploroj. La plej bona maniero kompreneble estus, se ni al pli-ol-unu personoj dirus "vi" kaj al unu persono ĉiam "ci" sed ĉiuj nuntempaj kulturaj popoloj tiel alkutimiĝis al la ideo, ke "ci" enhavas en si ion senrespektan, ke ni neniam povus postuli de la Esperantistoj, ke ili al ĉiu unu persono diru "ci" ni devus sekve havi apartan pronomon de ĝentileco (kaj tia pronomo efektive ekzistis en Esperanto antaŭ la jaro 1878). Sed la praktiko de ĉiuj ekzistantaj lingvoj montris, ke tia "formo de ĝentileco" estas ofte tre embarasa, ĉar tre ofte ni ne scias, kiamaniere ni devas nin turni al tiu aŭ alia persono (ekzemple al infano k.t.p.): "ci" ŝajnas al ni eble ofenda, pronomo de ĝentileco ŝajnas al ni ridinde ceremonia. En tiaj okazoj oni en la ekzistantaj lingvoj uzas diversajn artifikojn, kiuj tamen tre ofte estas tre embarasaj, kiel por la parolanto, tiel por la aŭskultanto (ekzemple anstataŭ "ci" kaj "vi" oni diras "li", "oni", "sinjoro", "fraŭlo" k.t.p.). Por forigi ĉiujn ĉi tiujn embarasojn, ekzistas nur unu rimedo: diri al ĉiu, ĉiuj kaj ĉio nur "vi". Malkompreniĝon tio ĉi neniam povas kaŭzi, ĉar en la tre maloftaj okazoj de neklareco ni povas ja precizigi nian parolon, dirante "vi, *sinjoro*", aŭ "vi *ĉiuj*", "vi *ambaŭ*" k.t.p. Por la personoj, kiuj tre sentas la bezonon de "ci" (ekzemple kiam ili sin turnas al Dio aŭ al amata persono), la uzado de "vi" ŝajnas neagrabla nur en la *unua tempo* (tiam ili ja havas la rajton uzi "ci"), sed post kelka praktiko oni tiel facile alkutimiĝas al la uzado de "vi", ke ĝi perfekte kontentigas kaj oni trovas en ĝi absolute nenion "malvarman". Ĉio dependas ja nur de la *kutimo*. [LR 87, Respondo 28, *La Revuo*, 1908, Februaro].

ĉi - ce qui est le plus près; ex. tiu celui-là - tiu ĉi celui-ci | denotes proximity; e. g. tiu that - tiu ĉi this; tie there - tie ĉi here | die nächste Hinweisung; z. B. tiu jener - tiu ĉi dieser; tie dort - tie ĉi hier | ближайшее указаніе; напр. tiu тотъ - tiu ĉi этотъ; tie тамъ - tie ĉi здѣсь | określenie najbliższe; np. tiu tamten - tiu ĉi ten; tie tam - tie ĉi tu. — **ĉi** - ce qui est le plus près; ex. tiu celui-là - tiu ĉi celui-ci | denotes proximity; e. g. tiu that tiu ĉi this; tie there - tie ĉi here | die nächste Hinweisung; z. B. tiu jener - tiu ĉi dieser; tie dort - tie ĉi hier | ближайшее указаніе; напр. tiu тотъ - tiu ĉi этотъ; tie тамъ - tie ĉi здѣсь | wskazanie najbliższe; np. tiu tamten - tiu ĉi ten; tie tam - tie ĉi tu [FE 13]. — [UL]. — Aldonante al la vortoj montraj la vorton „ĉi", ni ricevas montron pli proksiman [FE 30.7]; ekzemple: tiu (pli malproksima), tiu ĉi (aŭ ĉi tiu) (pli proksima); tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime) [FE 30.8].

● **ĉi tie** — … tiu (pli malproksima), tiu ĉi (aŭ ĉi tiu) (pli proksima); tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime) [FE 30.8].

● **ĉi-tiea** [FE 30.10]. — Rim.: La sola trafo en la F-to, kie aperas ligostreketo inter ĉi kaj la sekvanta vorto (tiel jam en la 1-a eld. de FE de 1894). Kp. LR 104 B malsupre ĉe „tiu ĉi".

● **ĉi tiu** — … tiu (pli malproksima), tiu ĉi (aŭ ĉi tiu) (pli proksima); tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime) [FE 30.8].

● **tie ĉi** – [franca mankas] | here | hier | здѣсь | tu [UV ĉi]. — **ĉi** – [franca mankas] | here | hier | здѣсь | tu [FE 13 ĉi]. — „Ĉu mi venis tien ĉi,“ diris al ŝi la malĝentila … knabino, „por doni al vi trinki?“ [FE 19.6]. Se li scius, ke mi estas tie ĉi, li tuj venus al mi [FE 20.11]. … li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola … [FE 21.7]. Mi restas tie ĉi laŭ la ordono de mia estro [FE 26.15]. For de tie ĉi! [FE 26.24].

● **tio ĉi** — … nur verkoj privataj, kiujn la esperantistoj — se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero — povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga [A 3.6]. … se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus ŝanĝo, … kiu en verko fundamenta ne povas esti tolerata [A 4.3]. Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos ... [A 6.2]. {Pliaj samspecaj trafoj de **tio ĉi** en A, sed ne citita tie ĉi}. — … ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, … [FE 15.6]. {Pliaj samspecaj trafoj de **tio ĉi** en FE, sed ne citita tie ĉi}.

● **tiu ĉi** - celui-ci | this | dieser | этотъ | ten [UV ĉi] — **ĉi** - celui-ci | this | dieser | этотъ | ten [FE 13 ĉi]. — Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon … [A 1.2]. Tiun ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori kaj kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus la komenco de nia morto [A 1.5]. Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj li neniam permesis al si (almenaŭ konscie) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj [A 2.2]. {Pliaj samspecaj trafoj de **tiu ĉi** en A, sed ne citita tie ĉi}. — Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, … [FE 13.1]. Inter aliaj aferoj tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon … [FE 13.3]. Tiu ĉi urbo havas milionon da loĝantoj [FE 14.3]. {Pliaj samspecaj trafoj de **tiu ĉi** en FE, sed ne citita tie ĉi}. Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enkonduko 1].

— **Lingva Respondo 1889 [Pri la formo “ĉio ĉi”]**: Anstataŭ “ĉio tio ĉi” vi povas tre bone diri “ĉio ĉi”, ĉar la vorto “ĉi” jam per si mem signifas proksiman montron. [*La Esperantisto*, 1889, p. 15].

— **Lingva Respondo 1911 [„ĉi“ ordinare antaŭ la montra vorto]**: Ni havas egalan rajton uzi la “ĉi” *antaŭ* aŭ *post* la pronomo (aŭ adverbo); sed ĉar la “ĉi” estas tiel forte ligita kun sia pronomo, ke ili ambaŭ prezentas kvazaŭ unu vorton, kaj ĉar tiu kvazaŭ-unu-vorto per la loko de sia akcento faras impreson de neharmonia escepto inter ĉiuj vortoj de Esperanto, tial pro belsoneco ordinare estas preferinde starigi “ĉi” *antaŭ* la montra vorto. La uzado de streketo inter la montra vorto kaj “ĉi” (t.e. skribado “tiu-ĉi” aŭ “ĉi-tiu” anstataŭ “tiu ĉi” aŭ “ĉi tiu”) ŝajnas al mi nur simpla erara kutimo, kiun nenio pravigas. [LR 104 B, Respondo 52, *Oficiala Gazeto*, IV, n-ro 1 (34), 1911, p. 2].

ĉia - chaque | every | jedweder, jeglicher | всякій, всяческій | wszelaki. — [AK] {en} every, every kind of. — [UL]. — Ĉí-a [FE 2]. — Aldonante la literon „ĉ”, ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu [FE 30.5, mankas en UV].

ĉial - Aldonante la literon „ĉ”, ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu [FE 30.5, mankas en UV]. — **ĉial** [OA 7] = el ĉia kaŭzo, motivo.

ĉiam - toujours | always | immer | всегда | zawsze. — **ĉiam** - toujours | always | immer | всегда | zawsze [FE 14]. — [UL] ĉian. — Tiuj ĉi du amikoj promenas ĉiam duope [FE 14]. Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune [FE 15]. Oni diras, ke la vero ĉiam venkas [FE 16]. La filino iris, sed ĉiam murmurante [FE 19]. Karaj infanoj, estu ĉiam honestaj! [FE 20] ... li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto [FE 22]. Li ĉiam diradis al mi la veron [FE 24]. Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi [FE 25]. Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam nur la nominativon [FE 28]. El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon [FE 29]. ...

ekzemple: ni povas diri “pardoni al la malamiko” kaj “pardoni la malamikon”, sed ni devas diri ĉiam “pardoni al la malamiko lian kulpon” [FE 29]. Aldonante la literon „ĉ”, ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu [FE 30.5]. Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35]. Via parolo estas tute nekomprenebla kaj viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble [FE 41]. Tiu ĉi grava tago restos por mi ĉiam memorinda [FE 41].

● **ĉiama** - Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi-tiea, tieulo, tiamulo k. t. p. (= kaj tiel plu) [FE 30].

— **Rim.**: UL kaj DL *ĉian* (kun –n); ĉiam (kun –m) de post DL Ald 1888: „La sola ŝanĝo, kiun mi {Zamenhof} trovas necesa fari mem, estas: anstataŭ „ian,“ „ĉian,“ „kian,“ „nenian,“ „tian“ — devas esti: „iam,“ „ĉiam,“ „kiam,“ „neniam,“ „tiam“ (por malegaligi la vortojn „ian“ etc. kaj „ia,n“ etc).“

cic/o. [OA 9] Elstaraĵo ĉe la mamo de homoj kaj aliaj mamuloj, tra kiu ĉe inoj la idoj suĉas lakton. — [PIV 1970].

● **cic/um/o**. [OA 9] Longa cicoforma botelkovrilo kun truo ĉe la pinto, tra kiu infano suĉas lakton. — [PIV 1970].

cidoni-o [OA 2.2] coing | quince | Quitte {BOT} — [EG 2] Quitte.

cidr’ [OA 1] cidre | cider | Zider, Apfelwein | сидръ | cydr. {KUIR}

ĉie - partout | everywhere | überall | повсюду | wszędzie. — [UL]. — Aldonante la literon „ĉ”, ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu [FE 30.5].

ĉiel’ - ciel | heaven | Himmel | небо | niebo. — **ĉielo** - ciel | heaven | Himmel | небо | niebo [FE 6]. — [AK] {en} sky, heaven. — [UL]. — Ĉi-é-lo [FE 2]. Ĉielo [FE 4]. — La ĉielo estas blua [FE 6]. Sur la ĉielo staras la bela suno [FE 10]. “Ho, ĉielo!” ekkriis la patrino, “kion mi vidas? ... [FE 21]. Du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo [FE 40].

● **ĉiel’ark’** - arc-en-ciel | rain-bow | Regenbogen | радуга | tęcza. — [AK] {en} rainbow.

● **ĉiel’ir’** - Ascension | Ascension | Himmelfahrt Christi | Вознесеніе Господне | Wniebowstąpienie. — Rim.: Minuskle jam en UV 1a eld. 1893, tamen majuskle en MV 1889: *Ĉiel’ir’* Himmelfahrt Christi [MV].

ĉiel - de chaque (toute) manière | in every manner | auf jede Weise | всячески | wszelkim sposobem. — Aldonante la literon „ĉ”, ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu [FE 30.5].

ĉies — Aldonante la literon „ĉ”, ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu [FE 30.5, mankas en UV]. — **ĉies** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] = apartenanta al ĉiu.

ĉif’ - froisser, chiffonner | crumple, muss | zerknittern, zerknüllen | мять | miętosić. — [AK] {en} crumple, tumble.

cifer’ - chiffre | cipher | Ziffer | цифра | cyfra. — [AK] {en} a cipher, numerical figure.

● **cifer’plat’** - cadran | dial | Zifferblatt | циферблатъ | tarcza zegarowa.

ĉifon’ - chiffon | rag | Lappen, Lumpen | лоскутъ | szmata.

Ĉifr’ [OA 3.2] {en} cipher | {fr} chiffre (écriture secrète) | {de} Chiffre | {es} cifra | {pt} cifra | {it} scrittura cifrata | {pl} --- {traduko mankas}.

cigan’ [OA 1] * tzigane {2012 pli ofta: tsigane} | gypsy | Zigeuner | цыганъ | cygan. — [RE].

cigar’ - cigare | cigar | Cigarre {de 1901: Zigarre} | сигара | cygaro. — **cigaro** - cigare | cigar | Cigarre | сигара | cygaro [FE 40]. — [UL]. — **cigaro** - cigare | cigar | Cigarre | сигара | cygaro [FE 20 uj’]. — Magazeno, en kiu oni vendas cigarojn, aŭ ĉambro, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarejo; skatoleto aŭ alia objekto, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarujo; tubeto, en kiun oni metas cigaron, kiam oni ĝin fumas, estas cigaringo [FE 40.15].

● **cigarejo** — Magazeno, en kiu oni vendas cigarojn, aŭ ĉambro, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarejo [FE 40.15].

● **cigaringo** — ... tubeto, en kiun oni metas cigaron, kiam oni ĝin fumas, estas cigaringo [FE 40.15].

● **cigarujo** — porte-cigares | cigar-case | Cigarrenbüchse {de 1901: Zigarrenbüchse} | портъ-сигаръ | cygarnica [FE 20 uj’]. — ... skatoleto aŭ alia objekto, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarujo [FE 40.15].

cigared' - cigarette | cigarette | Cigarette {de 1901: Zigarette} | папироса | papieros. — [UL].

cign' - cygne | swan | Schwan | лебедь | łabędź. {ZOO}

cikad-o [OA 2.2] cigale | cicada | Cikade {de 1901: Zikade} {ZOO}

ĉikan' - cancaner | chicane | Klatschereien machen {tio neniam estis ĝusta germana, legu: klatschen} | сплетничать | rozsiewac plotki {preseraro, legu: rozsiewać plotki}. — [AK 1914] chicaner | cavil at, gossip mischievously | schikanieren. — [RE]. — **Rim.**: Z atribuis al ĉikan' la signifon „babili malicaĵojn" (сплетничать | klatschen | rozsiewać plotki | cancaner}. Jam Kabe 1910 tamen difinis: „**Ĉikani.** Intence fari al iu malhelpojn, fari malagrablaĵojn al iu por montri sian superecon." Tio poste estis esprimata per la franca kaj germana AK, dum la angla AK redonas la originan rusan sencon. Do ankaŭ post apero de AK en 1922 restis malsamaj signifoj, jen rusa, angla, pola, jen franca, germana. Nur post la oficialigo de klaĉ-i per OA 4, ĉikan' nun sendube alprenis la signifon de la franca kaj germana AK kaj nun koheras kun la etimologio, vd. Albault 1963, p. 317.

● **Ĉi-ká-no** [FE 2]. **Cikano** [FE 4] {preseraro, legu Ĉikano kiel en FE eld. 1-4}.

cikatr' - couture, cicatrice | scar, cicatrice | Narbe | рубецъ | blizna. {MED} — [AK] cicatrice.

cikl-o [OA 2.1] — [Beau] cycle. — **Rim.**: Kp. **bicikl'** [OA 1] kaj **velociped'** [OA 1].

ciklon-o [OA 2.1] {METEO} — [Beau] cyclone.

ciklop-o [OA 2.1] {MIT} — [Beau] cyclope.

cikoni' - cigogne | stork | Storch | аистъ | bocian. {ZOO} — [RE A].

cikori' - chicorée | chicory | Cichorie | цикорія | cykorya {BOT}.

cikut' [OA 1] ciguë | hemlock | Schierling | цикута | cykuta.

cilindr' [OA 1] * cylindre | cylinder | Zylinder | цилиндръ | cylinder.

cim' - punaise | bug | Wanze | клопъ | pluskwa. {ZOO}

cimbal' - cymbale | cymbal | Cymbel | кимвалы | cymbały {MUZ}.

ĉimpanz/o. [OA 9] Senvosta simio homsimila kun grandaj elstaraj oreloj, kaj kun brakoj pli longaj ol la kruroj, malhelhara, vivanta en centra kaj okcidenta Afriko. (*Pan troglodytes*.) — [EV 1923] [PIV 1970].

ĉin/o [OA 9] **1** Ano de la ĉefgento de Ĉinujo. **2** (vastasence) Ĉinujano. — [EV 1923] [PIV 1970].

● **Ĉin/uj/o**. [OA 9] Lando en orienta Azio, ĉe la Flava Maro, la Orientĉina Maro kaj la Sudĉina Maro, inter Rusujo kaj Birmo. Internacia landokodaĵo: CN. — [EV 1923] [PIV 1970]. **Rim.**: Antaŭe ĥin-o kaj Ĥin-uj-o, ekz. en [GE 2]. **cinabr'** - cinabre | cinnabar | Zinnober | киноварь | cynober.

cinam' - cannelle | cinnamon | Zimmt {2012: Zimt} | корица | cynamon. {KUIR}

cindr' - cendre | ash, cinder | Asche | пепелъ | popiół.

cinik-a [OA 2.1] — [EG 2] zynisch.

ĉio - tout | everything | alles | все | wszystko. — **ĉio** - tout | everything | alles | все | wszystko [FE 12]. — [UL]. — Li faris ĉion per la dek fingroj de siaj manoj [FE 12]. La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi [FE 17]. Ŝia fratino en ĉio estas kulpa; mi pagos al ŝi por tio ĉi!" [FE 21]. La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino [FE 23]. Aldonante la literon „ĉ", ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu [FE 30.5].

ĉiom - Aldonante la literon „ĉ", ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu [FE 30.5, mankas en UV]. — **ĉiom** [OA 7] = tutkvante.

cipres' - cyprès | cypress | Cypresse | кипарисъ | cyprys. — Ci-pré-so [FE 3]. Cipreso [FE 4].

cir' - cirage | shoe-polish | Wichse | вакса | szuwaks.

cirk' [OA 1] * cirque | circus | Zirkus | циркъ | cyrk. — [EG 2] Zirkus.

ĉirkaŭ - autour de, environ | about, around | um, herum, gegen | около, кругомъ | około, dokoła. — [UL].

● **ĉirkaŭ'aĵ'** - alentours | environs | Umgegend | окрестность | okolica.

● **ĉirkaŭ'i** - entourer | encircle, environ | umgeben | окружать | otaczać.

● **ĉirkaŭ'o** - circuit, enceinte | circumference | Umfang, Umkreis | окружность | obwód.

● **ĉirkaŭ'man'** - bracelet | bracelet | Armband | браслетъ | bransoletka. — **Rim.**: Sinonimo estas **bracelet-o** [OA 2.1].

● **ĉirkaŭ'pren'** - embrasser | embrace | umarmen | обнимать | obejmować, ściskać.

● **ĉirkaŭ'skrib'** - circonscrire | circumscribe | umschreiben | описывать | opisywać.

cirkel' - cercle, compas | circle, compass | Zirkel (Instrument) | циркуль | cyrkiel. — [AK] compas | compasses (*geom*.).

cirkl/o. [OA 8] La lokaro de ĉiuj punktoj en ebeno, kiuj havas fiksan distancon al donita punkto, nomata la centro. — A. circle, F. cercle, G. Kreis, H. {es} círculo, I. {it} circolo, P. {pt} circunferência {ankaŭ: círculo}. {GEOM} — [EG 2] (geom.) Kreis.

cirkonstanc' - cirkonstance {pres-eraro, legu: circonstance} | circumstance | Umstand | обстоятельство | okoliczność. — [RE].

Cirkul' [OA 3.1] {en} to circulate | {fr} circuler | {de} zirkulieren | {es} circular | {pt} circular | {it} circolare | {pl} cyrkulowac {legu: cyrkulować}. — [Kabe] {antaŭe: rond/ir/i}.

cirkuler' - circulaire | circular | Cirkular {2012: Rundschreiben, Zirkular (ark.)} | циркуляръ | okólnik.

cirkumcid/i. [OA 9] Detranĉi parton de la haŭta refaldo, kiu ĉirkaŭas la kapon de peniso (la glanon) por lasi tiun libera (pro higienaj, medicinaj aŭ religiaj kialoj): *cirkumcidi infaneton*. — [ER 23].

cirkumfleks-o [OA 2.1] {GRAM}

cirkvit/o. [OA 8] La vojo, laŭ kiu kurento povas cirkuli. — A. circuit (electric); F. circuit (électrique); G. Stromkreis, Leitung; H. {es} circuito (eléctrico); I. {it} circuito (elettrico); P. {pt} circuito (eléctrico) {legu: (elétrico)}. — [PV 1930]. [EV 1923] cirkuito {kun –u-. Ne ĉe Z.}.

Cistern' [OA 3.1] {en} cistern | {fr} citerne | {de} Zisterne | {es} cisterna | {pt} cisterna | {it} cisterna | {pl} cysterna.

cit' - citer | cite | citiren {de 1901: zitieren} | цитировать | przytaczać, cytować. — [AK] {en} cite, quote, name.

citadel' [OA 1] citadelle | citadel | Zitadelle | цитадель | cytadela.

citr' - cithare | guitar | Zither | цитра | cytra {MUZ}. — [AK] {en} cithern, zithern.

citron' - citron | lemon | Citrone {2012: Zitrone} | лимонъ | cytryna. — [UL]. — Citró-no [FE 2]. Citrono [FE 4].

ĉiu - chacun | each, every one | jedermann | всякій, каждый | wszystek, każdy. — **ĉiu** - chacun | each, every one | jedermann | всякій, каждый | wszystek, każdy [FE 10]. — [AK 1914] jeder, jedermann. — Aldonante la literon „ĉ", ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu [FE 30.5].

● **ĉiu'j** - tous | all | alle | всѣ | wszyscy.

civil' [OA 1] * civil | civil (non-military) | zivil | гражданскій | cywilny.

civiliz' - civiliser, éclaircir | civilize, clear up | aufklären | просвѣщать | oświecać. — [AK 1914] civiliser | civilize | zivilisieren, aufklären. — Kp. civilizaci'.

Civilizaci' [OA 3.2] {en} civilisation | {fr} civilisation | {de} Zivilisation | {es} civilizacion {legu: civilización} | {pt} civilizacion {ripeto de la hispana formo, estu: civilização} | {it} civilizzazione | {pl} cywilizacja. — Kp. civiliz'

— Lingva Respondo 1911 - Pri la vortoj kun pseŭdosufiksoj: Kelkaj samideanoj forte malaprobas la uzadon de vortoj kun pseŭdosufiksoj *cio, toro* k.t.p. (ekzemple: "civilizacio", "redaktoro" k.t.p.); ili diras, ke de tiaj vortoj ni devas preni nur la radikan formon (ekzemple: "civiliz", "redakt") kaj ĉiujn devenajn formojn uzi nur kun sufikso aŭ finiĝo pure *Esperanta* (ekzemple: "civilizo", "redaktejo", "redaktisto" anstataŭ "civilazacio", "redakcio", "redaktoro"). Kompreneble, se tia vorto, kiel ekzemple "redaktejo", estus tute identa kun la vorto "redakcio" kaj povus ĝin perfekte anstataŭi, certe neniu el ni plendus, se la vorto "redakcio" baldaŭ malaperus el nia lingvo; sed se iu diras, ke la formoj pseŭdosufiksaj estas *kontraŭ-Esperantaj*, aŭ ke ili prezentas malaprobindan enkondukon de *nova*j *vortoj*, mi opinias, ke li eraras. Tiaj formoj, kiel ekzemple "redakcio", "civilizacio" estas nek kontraŭ-Esperantaj, nek novaj, ĉar laŭ la №15 de nia gramatiko ili plene apartenas al nia lingvo jam de la unua momento de ĝia naskiĝo. Ni povas *esperi*, ke pli aŭ malpli frue la pseŭdosufiksaj vortoj "fremdaj" fariĝos aŭ ĥaismoj kaj cedos sian lokon al vortoj "pure esperantaj" ni povas eĉ *konsili* tion; sed *postuli* tion ni ne povas, ĉar la diritaj vortoj ne sole havas en nia lingvo (laŭ la №15) plenan rajton de ekzistado, sed ankoraŭ dum longa tempo multaj el tiuj pseŭdosufiksaj vortoj estos pli oportunaj, pli naturaj kaj pli kompreneblaj, ol la ilin anstataŭontaj vortoj "pure Esperantaj". Ne venis ankoraŭ la tempo, ke ni estu tro pedantaj. Estas vero, ke sekve de nia toleremeco ni por kelkaj vortoj havos dum

kelka tempo formojn *duoblajn* (ekzemple: “evolucio” kaj “evoluo”); sed ŝajnas al mi, ke estas multe pli bone havi en la unua tempo ian “embarason de riĉeco”, ol malutili al si per ia ne sufiĉe matura dekreto, elĵetante el la lingvo vortojn, kies elĵetindeco ne estas ankoraŭ por ni tute certa. [LR 52 A, Respondo 55, *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, p. 222].

Civit’ [OA 3.2] {en} city | {fr} cité | {de} Stadt | {es} ciudad | {pt} cidade | {it} città | {pl} --- {traduko mankas}. — Kp. urb-.

ĉiz’ - creuser avec le ciseau | chisel | meisseln | долбить | dłutować. — [AK 1914] carve, chisel | meisseln, ziselieren.

ĉj’ - après les 1-5 premières lettres d’un prénom masculin lui donne un caractère diminutif et caressant; ex. Miĥael’ - Mi’ĉj’ - | affectionate diminutive of masculine names; e.g. Johan’ John - Jo’ĉj’ Johnnie | den 1-5 Buchstaben eines männlichen Eigennamens beigefügt verwandelt diesen in ein Kosewort; z. B. Miĥael’ - Mi’ĉj’; Aleksandr’ - Ale’ĉj’ - | приставленное къ первымъ 1-5 буквамъ имени собственнаго мужскаго пола, превращаетъ его въ ласкательное; напр. Miĥael’ - Mi’ĉj’; Aleksandr’ - Ale’ĉj’ - | dodane do pierwszych 1-5 liter imenia własnego męzkiego rodzaju zmienia je w pieszczotliwe; np. Miĥael’ - Mi’ĉj’; Aleksandr’ - Ale’ĉj’. — **ĉj**, **nj** - après les 1-6 premières lettres d’un prénom masculin (**nj** - féminin) lui donne un caractère diminutif et caressant | affectionate diminutive of masculine (**nj** - feminine) names | den ersten 1-6 Buchstaben eines männlichen (**nj** - weiblichen) Eigennamens beigefügt, verwandelt diesen in ein Kosewort | приставленное къ первымъ 1-6 буквамъ имени собственнаго мужескаго (**nj** - женскаго) пола, превращаетъ его въ ласкательное | dodane do pierwszych 1-6 liter imienia własnego męskiego (**nj** - żenńskiego) rodzaju zmienia je w pieszczotliwe [FE 38]. — [UL]. — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Ernecĵo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilhecĵo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38.12 = 1-a eld. 1894]. — [DL 1888]: *Petro kaj Mario estas jam sufiĉe maljunaj, tamen oni ankoraŭ vokas ilin Pecĵo kaj Manjo* [DL 10.12]. *Aŭgucĵo kaj Aŭgunjo estas bonaj infanoj* [DL 10.13].

● **Aleksandr’** - Ale’ĉj’ [UV ĉj’] — [UL].

● **Ernesto** - Ernecĵo (aŭ Erĉjo) [FE 38.12].

● **Johan’** John - Jo’ĉj’ Johnnie [UV-en ĉj] — **Johano** – Johanĉjo (aŭ Joĉjo) [FE 38.12].

● **Miĥael’** - Mi’ĉj’ [UV ĉj’] — [UL].

● **Nikolao** - Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo) [FE 38.12].

● **Vilhelmo** - Vilhelĉjo (aŭ Vilhecĵo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo) [FE 38.12].

— **Lingva Respondo 1906**: Por karesaj formoj oni povas uzi „ĉj (nj)“ kaj ankaŭ „et“ (Patreto, patrineto, paĉjo, panjo). La „ĉj“ kaj „nj“ estas uzataj nur en nomoj kaj en „patro“ kaj „patrino“; en aliaj okazoj oni karesas per „et“. [LR 15, let. al Th. Thorsteinsson (1906-03-08), O.V. p. 523].

— **Rim.**: En UL en ĉiuj kvin referenc-lingvoj „metitaj post la unuaj ‚2-5’ literoj de vira propra nomo“ kaj idente la ekzemploj Mi’ĉj’ kaj Ale’ĉj’.

ĉokolad’ - chocolat | chocolate | Chocolade {2012: Schokolade} | шоколадъ | czekolada.

col’ - pouce | inch | Zoll (Mass) {legu: Zoll (Maß) } | дюймъ | cal. {MEZ} — [AK] pouce (mesure). — Có-lo [FE 2].

ĉu - est-ce que | whether | ob | ли, развѣ | czy. — **ĉu** - est-ce que | whether | ob | ли, развѣ | czy [FE 18]. — [AK 1914] est-ce que, si (inter. ind.). — [UL]. — [Beaufront] ***ĉu -*** *est-ce que, si (dans l’interrogation indirecte).* — Ĉu [FE 2]. — Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas; ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman kapablon? ... [FE 17.10]. Ĉu vi diros al mi la veron? [FE 18.7]. „Ĉu mi venis tien ĉi,“ diris al ŝi la malĝentila kaj fiera knabino, „por doni al vi trinki?“ [FE 19.6]. Ĉu vi jam trovis vian horloĝon? [FE 20.7]. Ĉu vi estas surda aŭ muta? [FE 20.14]. Ĉu hodiaŭ estas varme aŭ malvarme? [FE 25.13]. Kvankam vi estas riĉa, mi dubas, ĉu vi estas feliĉa [FE 26.19]. ... en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon „n” tute egale{,} ĉu ia prepozicio starus aŭ ne [FE 28.3]. ... se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon [(...)] aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon [FE 29.8]. Ĉu li donis al vi jesan respondon aŭ nean? [FE 31.18]. Ĉu vi havas korktirilon, por malŝtopi la botelon?

[FE 34.2]. Ĉu vi amas vian patron? ... [FE 41.7]. — [DL 1888]: *Ĉu mi post tio ankoraŭ vivos, ĉu mi mortos, ĉu mi konservos la forton de mia korpo kaj animo, ĉu mi ĝin perdos, l' afero tute ne dependos de tio, kiel la sorto de ia vivanta lingvo tute ne dependas de l' sorto de tiu ĉi aŭ tiu persono [DL A 4]. Aliaj ekbrilis per senfinaj filozofadoj kaj skribis instruitajn artikulojn [post 1888: artikolo], tute ne pensinte kaj ne demandinte sin, ĉu ili parolas logike kaj afertuŝante [DL I 3]. Anstataŭ provi praktike ..., ĉu la lingvo, proponita de mi, taŭgas por internacia kompreniĝo, ĉu ĝi efektive al ĉiu donas la eblon esti komprenata de personoj alinaciaj, ili parolis pri la fiziologio kaj historio de l' lingvoj vivaj; anstataŭ provi per ilia propra orelo, ĉu mia lingvo estas bonsona aŭ ne, ili teorie parolis pri leĝoj de bonsoneco; anstataŭ analizi, ĉu mi bone kreis la vortaron kaj ĉu oni ne povus fari ĝin ankoraŭ pli komprenebla kaj pli praktika, ili diris, ke la vortaro devas esti farita el radikoj Sanskritaj aŭ el vortoj, prenitaj mikse el ĉiuj lingvoj de l' mondo [DL I 3]. Ĉu vi estas kontenta je mia donaco? [DL 7]. Ĉu oni povas diri: helpi la fraton (anstataŭ: al la frato) ... [DL 8]. Ĉu la kandelo estis estingita, aŭ ĝi estingiĝis mem? [DL 13]. Ĉu vi ludas violonon? - Ne, mi ludas kartojn, sed por instrumentoj mi ĉian [post 1888: ĉiam] cestis tro maldiligenta [DL 16]. Mi bezonas du frankojn; ĉu vi ne povas ilin doni al mi prunte? [DL 16]. Ĉu vi ne rekonas vian malnovan ombron? Jes, vi certe ne kredis, ke mi ian [post 1888 iam] ankoraŭ revenos* [DL 17.14]. *Mi scias, ke vi ricevis alian ombron; ĉu mi devas al ĝi aŭ al vi ion pagi?* [DL 17.16.5]. *„Ĉu vi scias, kiu loĝis en la domo kontraŭ ni?" demandis la ombro. „Ĝi estis la plej bela el ĉio, ĝi estis la poezio!* [DL 17.25.1]. *„Ĉu tie estis kiel en la freŝa arbaro? ĉu tie estis kiel en sankta preĝejo? ĉu la ĉambroj estis kiel stela ĉielo, kian oni staras sur altaj montoj?" [DL 17.32.2]. „Sed kion vi vidis? Ĉu tra la grandaj ĉambroj iris ĉiuj la dioj de l' malnova tempo? ĉu tie batalis la malnovaj faristoj? ĉu tie ludis ĝojaj infanoj kaj rakontis iliajn sonĝojn?" [DL 17.34]. Mi en la somero faros veturon, ĉu vi volas min akompani? [DL 17.40.5]. Mi deziras havi kolegon de l' vojo,—ĉu vi volas kunveturi estante mia ombro? [DL 17.40.6]. Ĉu vi ne vidas la personon, kiu min ĉian [ĉiam] akompanas? Aliaj homoj havas ombron ordinaran, sed mi ne amas aferojn ordinarajn. ... [DL 17.55.3]. ... sed egale grava demando estas, ĉu li estas sufiĉe instruita [DL 17.57]. „Kiel!" pensis la reĝidino, „ĉu mi efektive saniĝis? [DL 17.56.1]. ... ĉu io okazis al vi? [DL 17.72].*

— **Lingva Respondo [Pri la vorto "ĉu"]**: Vian opinion, ke la vorton "ĉu" ni devas, kiom eble, uzadi nur en senco demanda, mi trovas tute prava. Ni povas ĝin uzi ankaŭ en la senco de necerteco, aŭ de dubo, aŭ en aliaj similaj sencoj, kiam ni ne havas pli bonan vorton (kiel en via ekzemplo "ĉu pro timo, ĉu pro fiereco, li nenion respondis"), sed mi neniam konsilus uzi ĝin tute senbezone anstataŭ "jen", "aŭ" k.t.p. Prave vi diras, ke la frazoj "ŝi kutimas havi ĉe sia zono ĉu rozon, ĉu diamanton" kaj "diru tion ĉu al la kapitano, ĉu al la leŭtenanto" estas ne tre bonaj; en la unua okazo mi preferus "jen", en la dua "aŭ". [LR 122, Respondo 21, *La Revuo*, 1907, Junio].

— **Rim.: [Pri komo antaŭ „ĉu"]**: Antaŭ „ĉu" la F-to regule metas komon. Ĝi ja mankas en FE 28.3, sed troviĝas en FE eld. 1 de 1894: „... tute egale, ĉu ia prepozicio starus ...". De FE eld. 2 de 1898 ĝi mankas.

D

Dd - d | d as in "do" | d | д | d [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **do** ... [FE 1]. — **do** [OA 7] = nomo de la litero d, kvina litero de la Esperanta alfabeto.

— **Lingva Respondo 1893**: La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. [*Esperantisto*, 1893, p. 32].

da - de (après les mots marquant mesure, poids, nombre) | is used instead of de after words expressing weight or measure; e. g. funt'o da viand'o a pound of meat, glas'o da te'o a cup of tea | ersetzt den Genitiv (nach Mass {legu: Maß},

Gewicht u. drgl. {und dergleichen} bezeichnenden Wörtern); z. B. kilogram'o da viand'o ein Kilogramm Fleisch; glas'o da te'o ein Glass Thee {de 1901: ein Glas Tee} | (послѣ словъ, означающихъ мѣру, вѣсъ и т. д.) замѣняетъ родительный падежъ; напр. kilogram'o da viand'o килограмъ мяса; glas'o da te'o стаканъ чаю | zastępuje przypadek drugi (po słowach oznaczających miarę, wagę i. t. p.); np. kilogram'o da viand'o kilogram mięsa; glas'o da te'o szklanka herbaty. — **da** - de (après les mots marquant mesure, poids, nombre) | is used instead of de after words expressing weight or measure | ersetzt den Genitiv nach Mass {legu: Maß}, Gewicht u. drgl {und dergleichen} bezeichnenden Wörtern | замѣняетъ родительный падежъ послѣ словъ, означающихъ мѣру, вѣсъ и т. д | zastępuje przypadek drugi po słowach oznaczających miarę, wagę i. t. p [FE 14]. — [UL]. — [AK 1914] (forigu: ersetzt den Genitiv). — Da [FE 2]. — Mi havas centon da pomoj [FE 14.2]. Tiu ĉi urbo havas milionon da loĝantoj [FE 14.3]. Mi aĉetis dekduon (aŭ dek-duon) da kuleroj kaj du dekduojn da forkoj [FE 14.4]. Mil jaroj (aŭ milo da jaroj) faras miljaron [FE 14.5]. Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; tial du metroj kostas kvar kaj duonon frankojn (aŭ da frankoj) [FE 14.11]. … dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj [FE 17.8]. La reĝido … vidis, ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj … [FE 23.1]. … el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj [FE 30.2]. Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero [FE 31.21]. Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino; glaso da vino estas glaso plena je vino [FE 32.5]. Alportu al mi metron da nigra drapo (Metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo) [FE 32.6]. Mi aĉetis dekon da ovoj [FE 32.7]. Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo [FE 32.8]. Sur la bordo de la maro staris amaso da homoj [FE 32.9]. Sur la arbo sin trovis multe (aŭ multo) da birdoj [FE 32.11]. En la ĉambro sidis nur kelke da homoj [FE 32.13]. „Da" post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro [FE 32.14]. Mia skribilaro konsistas el inkujo, sablujo, kelke da plumoj, krajono kaj inksorbilo [FE 34.9]. Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, precipe aroj da bellanaj ŝafoj [FE 34.15]. Kiam mi ien veturas, mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo [FE 35.12]. La riĉulo havas multe da mono [FE 37.19]. Mi aĉetis por la infanoj tableton kaj kelke da seĝetoj [FE 38.1]. Antaŭ nia militistaro staris granda serio da pafilegoj [FE 38.11]. En la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis du pafojn [FE 40.1].

● **funt'o da viand'o** - a pound of meat [UV da].

● **glas'o da te'o** – [franca mankas] | a cup of tea | ein Glass Thee {de 1901: ein Glas Tee} | стаканъ чаю | szklanka herbaty [UV da].

● **kilogram'o da viand'o** - [franca mankas] | [angla mankas] | ein Kilogramm Fleisch | килограмъ мяса | kilogram mięsa [UV da].

— **Lingva Respondo 1890 [Nominativo post „da"]**: La formoj "multe da laboro" kaj "multa laboro" estas egale bonaj. Egale bonaj ankaŭ estas la esprimoj "mi konas tiom homojn" kaj "mi konas tiom da homoj", sed ne bone estus diri "mi konas tiom da homojn", ĉar en la lasta esprimo la formo "homoj" dependas ne de la vorto "konas", sed de la prepozicio "da", kiu ne postulas la akuzativon. [*La esperantisto*, 1890, p. 60].

— **Lingva Respondo 1891 [Nominativo post „da"]**: ... ni konsilas uzi post "po" (tiel same kiel post "**da**") la nominativon ("doni po 2 pecoj"). Alia kaŭzo por tiu ĉi konsilo estas ankaŭ la cirkonstanco, ke laŭ nia opinio "ĉie, kie oni dubas inter la nominativo kaj akuzativo, oni devas uzi la nominativon". [*La Esperantisto*, 1891, p. 7].

— **Lingva Respondo 1907 [Pri „da" – „de"]**: La esprimo "dum la frua parto *da* la jaro" ŝajnas al mi nebona; mi preferas *"de* la jaro", ĉar en la dirita frazo la vorto "parto" signifas ne mezuron, sed nur limigitan apartaĵon. Tiel ekzemple "monato" estas parto *da* tempo, ĉar ĝi esprimas simple mezuron, sed "Januaro" estas parto *de* jaro, ĉar ĝi esprimas ne mezuron, sed difinitan limigitan apartaĵon; "kvaronjaro" (= mezuro) estas parto *da* jaro, sed "printempo" (= speciale montrita parto) estas parto *de* jaro. Oni devas memori, ke "parto", "peco" k.t.p. havas la sencon de mezuro *ofte*, sed ne *ĉiam*. Dum la vorto "da" (kiu enhavas kaŝite

la sencon de “ia”) montras, ke ni parolas pri *kvanto* da ia aĵo, sed ne pri ĝia individueco (ekzemple peco da viando = peco da ia viando), la artikolo “la” montras, ke ni parolas pri objekto individue *difinita* (aŭ pri ĉiuj objektoj de la sama speco), de kiu ni prenas parton (ekzemple “peco de la viando kiun mi havas antaŭ mi”); tial ni povas diri, ke, kvankam *teorie* la kombinado de “da” kun “la” ne estas malpermesata, sed en la *praktiko* tia kombinado estas uzebla nur en tre maloftaj okazoj, tiel malofte, ke ni eĉ povas simple konsili, ke oni *neniam* uzu “da” antaŭ “la” (krom la okazoj, en kiuj la senco tion ĉi nepre kaj tute sendube postulas). [Respondo 16, *La Revuo*, 1907, Junio].

daktil’ - datte | date (fruit) | Dattel | финикъ | daktyl. {BOT} — [RE].

dali-o (*bot.*) [OA 2.1] {BOT} — [EV 1923] {antaŭe georgin/o [Bat 1891]}.

damask’ - damas | damask | Damast | камча | adamaszek. — [EG 2].

dam’o’j - jeu de dames | draughts | Damenspiel | шашки (игра) | warcaby. {LUD} — **Lingva Respondo 1901**: La nomoj de ŝako estas: ... *Dame* damo ... [LR 19. Let. al Th. Thorsteinsson (1901), O.V. p. 522]. Z per tio ripetas al nova esperantisto la kutimon de E-isto Marto 1892, p. 43: „Klarigo de la literoj, kiujn ni uzos en ŝako: ... D = damo ...“.

dano [OA 8] — [E-isto 1889, p. 24] *gramatiko de la lingvo Esperanto por Danoj*. [Beau] dan, danois (adj.); Dano, (un) Danois.

danc’ - danser | dance | tanzen | танцовать | tańczyć. — **danci** - danser | dance | tanzen | танцовать | tańczyć [FE 20]. — [UL]. — [BRO 6 ~i]. — Ŝi volas danci [FE 20].

● **danc’** - dance | der Tanz | [UV ad’]. — **danco** dance | der Tanz [FE 13 ad].

● **danc’ad’** - dancing | das Tanzen [UV ad’]. — **dancado** - dancing | das Tanzen [FE 13 ad].

dand’ - petit-maître {(ark.), 2012: dandy} | dandy | Stutzer {(ark.), 2012: Dandy} | франтъ | fircyk, elegant. — [RE].

danĝer’ - danger | danger | Gefahr | опасность | niebezpieczeństwo. — **danĝero** - danger | danger | Gefahr | опасность | niebezpieczeństwo [FE 7]. — [UL].

● **danĝere** — Resti kun leono estas danĝere [FE 7].

dank’ - remercier | thank | danken | благодарить | dziękować. — **danki** - remercier | thank | danken | благодарить | dziękować [FE 14]. — [UL]. — Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; due mi dankas vin por la prunto [FE 14]. Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia deziro [FE 31].

dat’ - date | date | Datum | число (мѣсяца) | data. — **dato** - date | date | Datum | число (мѣсяца) | data [FE 12]. — [MV 1889]. — Kiun daton ni havas hodiaŭ? [FE 12.17].

dativ’ - datif | dative | Dativ | дательный падежъ | celownik. {GRAM} — [RE].

datur’ - datura | datura | Stechapfel | дурманъ | bieluń, dziędzierzava. {BOT} — [AK] {en} thorn-apple, datura. — [RE].

daŭr’ - durer | endure, last | dauern | продолжаться | trwać. — **daŭri** - durer | endure, last | dauern | продолжаться | trwać [FE 13]. — [AK] durer, continuer | last (*intr.*). — [UL]. — [BRO 7 ~i] — unutaga (= kiu daŭras unu tagon) [FE 27.8]. Lia kolero longe daŭris [FE 31.1]. La pafado daŭris tre longe [FE 40.2].

● **daŭro** — Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn [FE 25.10]. En la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis du pafojn [FE 40.1].

● **daŭr’ig’** - continuer | continue | fortsetzen | продолжать | dalej ciągnąć. — “Mi faras al vi donacon,” daŭrigis la feino, “ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono.” [FE 15.7].

● **daŭrigo** - La feino (Daŭrigo) [FE 13] [FE 15] [FE 17] [FE 19] [FE 21].

— **Lingva Respondo 1911**: “Daŭri”: esti plue, ne esti finita; “ĉesi”: komenci ne ...i, aŭ komenci ne esti. El tiu signifo sekvas la reguloj de uzado de tiuj vortoj kaj de iliaj devenaĵoj “daŭrigi”, “ĉesigi” k.t.p. Ekzemple: oni povas diri: “la laboro daŭras” (la laboro estas plue, ne estas finita), sed oni ne povas diri: “mi daŭras labori” (mi estas plue labori! mi ne estas finita labori!); ankaŭ ne estas bone diri (kiel mi mem bedaŭrinde faris kelkfoje): “mi daŭrigas labori” (mi igas esti plue labori!); oni devas diri: “ mi daŭrigas mi*an* labor*on*” (mi igas mian

laboron esti plue) aŭ “mi laboras plue”. Oni povas diri: “mi ĉesas labori” (mi komencas ne labori) aŭ “la pluvo ĉesas” (la pluvo komencas ne esti), sed ne estas bone forlogiĝi per la analogio kun “komenci” kaj diri: “mi ĉesas mian laboron” (mi komencas ne ...i aŭ ne esti mian laboron!); estas preferinde diri: “mi ĉes*ig*as mian laboron” (mi igas mian laboron komenci ne esti). [LR 21, Respondo 49, *Oficiala Gazeto*, III, 1911, p. 294].

de - de | of, from | von; ersetzt auch den Genitiv | отъ; замѣняетъ также родительный падежъ | od; zastępuje też dopełniacz. — **de** - de | of, from | von; ersetzt auch den Genitiv | отъ; замѣняетъ также родительный падежъ | od; zastępuje też przypadek drugi [FE 7]. — [AK 1914] von, von ... an, seit; kennzeichnet auch den Genitiv. — [UL]. — De [FE 2].

1. de {genitivo} — {ekzemple: „Fundamento de Esperanto“ [A]. Ekzerco de legado [FE 2]. La dentoj de leono estas akraj [FE 7.2]. Jen kuŝas la ĉapelo de la patro [FE 8.2]. Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino; glaso da vino estas glaso plena je vino [FE 32.5]. Alportu al mi metron da nigra drapo (Metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo) [FE 32.6]. – tro multaj trafoj, ne listigitaj tie ĉi}.

● **aldonante** — Aldonante la literon „ĉ", ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ... [FE 30.5]. Aldonante la prefikson „nen", ni ricevas vortojn neajn: nenia, ... [FE 30.6]. Aldonante al la vortoj montraj la vorton „ĉi",

ni ricevas montron pli proksiman [FE 30.7]. Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „ajn", ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, ... [FE 30.9].

● **aldono** — ... neniu havas la rajton fari arbitre laŭ persona bontrovo ian ŝanĝon aŭ aldonon [A 3.1]. ... ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron oficialan, kiel «Aldonon al la Fundamento» [A 7.2].

● **eldoni** — ... la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn ... [A 3.3].

● **eldonita** — ... mi rekomendas la diversajn lernolibrojn ..., kiuj estas eldonitaj de niaj plej kompetentaj amikoj ... kaj el kiuj la plej gravaj estas eldonitaj tre bone kaj zorgeme, ... [A 5.3].

● **eldono** — Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (...) tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2]. ... trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, ... [A 4.6].

● **redoni** — Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; ... [FE 14.6]. Li donis al mi monon, sed mi ĝin tuj redonis al li [FE 42.4].

● **leĝodonanto** — ... ĉiu esperantisto havu la plenan certecon, ke leĝodonanto por li ĉiam estos ne ia persono, sed ia klare difinita verko [A 3.2].

donac' - faire cadeau, donner en présent | make a present | schenken | дарить | darować. — **donaci** - faire cadeau | make a present | schenken | дарить | darować [FE 15]. — [UL].

● **donaco** — "Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas fari al vi donacon" [FE 15.5]. "Mi faras al vi donacon," daŭrigis la feino, "ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono." [FE 15.7]. „Bone, ĉar vi estas tiel servema, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano." [FE 19.10]

dorlot' - gâter, dorloter | spoil | hätscheln | баловать | pieścić. — [AK 1914] spoil (*vb*.), pet (*child*) | verziehen, (ver)hätscheln. — [RE].

dorm' - dormir | sleep | schlafen | спать | spać. — **dormi** - dormir | sleep | schlafen | спать | spać [FE 20]. — [UL]. — Kiam mi venis al li, li dormis; sed mi lin vekis [FE 20.9].

● **dormeti** — Li sidas apud la tablo kaj dormetas [FE 38.5].

● **dormoĉambro** — Li eliris el la dormoĉambro kaj eniris en la manĝoĉambron [FE 31.19].

dorn' - épine | thorn | Dorn | шипъ | cierń. — [MV 1889].

dors' - dos | back | Rücken | спина | grzbiet {ANAT}. — [AK] {en} back (*body*). — [UL].

dot' - doter | endow | ausstatten | надѣлять (приданымъ) | wyposażyć. — [RE].

● **dot'o** - dot | dowry | Mitgift | приданое | posag. — **doto** - dot | dowry | Mitgift | приданое | posag [FE 23].

● **dote** - La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, forkondukis ŝin al la palaco de sia patro, la reĝo, kie li edziĝis je ŝi [FE 23.3].

doz' [OA 1] * dose | dose | Dosis | доза | doza. — [Beau] dose (quantité d'un ingrédient).

dragon' [OA 1] * dragon (milit.) | dragoon | Dragoner | драгунъ | dragon. {MIL} — [RE].

drak' - dragon | dragon, drake | Drache | драконъ | smok {MIT}. — [AK] {en} dragon. — [RE].

drakm-o [OA 2.1] {MON} — [RE] draĥm-. [Beau] drakm, drachme (monnaie grecque).

dram' [OA 1] * drame | drama | Drama | драма | dramat. {TEATR} — [Einst 1888, 32] *Sinjorino, ĉu Vi konas la malnovan dramon?.* [RE].

drap' - drap | woollen goods | Tuch (wollenes Gewebe) | сукно | sukno. — **drapo** - drap | woollen goods | Tuch (wollenes Gewebe) | сукно | sukno [FE 32]. — [AK] {en} woollen cloth. — [RE]. — Alportu al mi metron da nigra drapo (Metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo) [FE 32.6].

drapir' - draper | cover with cloth | drapiren {de 1901: drapieren} | драпировать | drapować. — [AK] {en} drape, hang (*trans*.). — [RE].

draŝ' - battre (le blé) | thrash | dreschen | молотить | młócić. — [AK] {en} thrash (*corn*). — [RE].

drast/a. [OA 9] Fortege, malmilde, rapide, radikale efikanta: *drasta medikamento*; *drasta ŝanĝo*; *drasta kresko*; *drasta esprimo*; *drasta kontrasto* (= kreanta fortan impreson). — [EG 1] [EG 2] drastisch, stark wirkend.

drat/o. [OA 8] Tre maldika, fleksebla kaj longa vergo el metalo aŭ alia materio, ordinare kun ronda sekco. — A. wire, F. fil (de métal), G. Draht, H. {es} alambre, I. {it} filo (di metallo); P. {pt} fio de metal, arame. — [Kabe]. — **Rim.**: Ne ĉe Z. En la Fundamento nomita *metalfadeno*.

dres' - dresser | dress, make straight | dressiren {de 1901: dressieren}, abrichten | дрессировать | tresować. — [AK 1914] dresser, dompter | train (*soldier*), tame (*animal, etc*.). — [RE] [Beau] dresser (un animal). — **Rim**.: La angla AK „train (*soldier*)" estas malĝusta. La rusa originalo дрессировать kaj la germana, franca kaj pola ĉiuj celas nur „dresi (beston)". Post-signon de la erara angla AK oni trovis ankoraŭ en PIV 2002 ĉe „**grenadisto**. Soldato speciale dresita {ĝuste: trejnita} ĵeti grenadojn." Ŝanĝita en PIV 2005. Kp. trejni [OA 8].

drink' - boire, ivrogner | drink, tipple | saufen, zechen | пить (спиртные напитки) | pić (wódkę i t. p.). — [AK] boire (avec excès) | drink to excess, tipple. — [RE].

● **drink'ej'** - cabaret, taverne | inn, tavern | Schenke | шинокъ | szynkownia.

driv/i [OA 9] **1** Flosi laŭ la puŝo de akvofluo aŭ vento (senstire, en alia direkto ol intencite, sen klara direkto): *la ŝipo drivis pro motordifekto*. **2** Deflankiĝi de la intencita direkto pro puŝo de vento aŭ akvofluo: *la kuglo drivis pro la forta vento, kaj tial ĝi ne trafis la celon*. — [EV 1923] [PV 1930].

● **driv/o** [OA 9] **1** Ago drivi. **2** Malrapida ŝanĝiĝado aŭ moviĝado en ia sistemo (sen klara celo aŭ direkto): *kontinenta drivo*; *lingva drivo*. — [EV 1923].

drog' - drogue | drug | Drogue {2012: Droge} | москатильный товаръ | towary aptekarskie. — [AK] {en} a drug. — [RE].

dromedar' [OA 1] dromadaire | dromedary | Dromedar | дромадеръ | dromader. {ZOO} — [EG 1].

dron' - se noyer | drown | ertrinken | утопать | tonąć. — **droni** - se noyer | drown | ertrinken | тонуть | tonąć [FE 37]. — [AK] {en} be drowning. — [RE]. — La kuraĝa maristo dronis en la maro [FE 37.16]. — **Rim**.: RE 215: утонуть *dron'*. утопать *dron'*. RE 203 тонуть (..) *dron'ig'*. [FE 1-a eld. 1894]: тонуть. [Beau] se noyer, couler à fond.

du - deux | two | zwei | два | dwa. — **du** - deux | two | zwei | два | dwa [FE 11]. — **du** - deux | two | zwei | два | dwa [UV obl]. — **du** - deux | two | zwei | два | dwa [FE 14 obl]. — **du** - deux | {angla mankas} | zwei | два | dwa [FE 14 op]. — [UL]. — Unu vidvino havis du filinojn [FE 11.1]. Du homoj povas pli multe fari ol unu [FE 12.1]. Mi havas nur unu buŝon, sed mi havas du orelojn [FE 12.2]. ... tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko ... [FE 13.3]. ... du dekduojn da forkoj [FE 14.4]. ... du metroj kostas kvar kaj duonon frankojn (aŭ da frankoj) [FE 14.11]. Tiuj ĉi du amikoj promenas ĉiam duope [FE 14.13]. — Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn [FE 25.10]. Sur la kameno inter du potoj staras fera kaldrono; ... [FE 25.14]. Mi veturis du tagojn kaj unu nokton [FE 29.6]. Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3]. En la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis du pafojn [FE 40.1]. Du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo [FE 40.11].

● **dua** — ... la jaro mil sepcent tridek dua [FE 12.19]. El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; la dua: al Lia Grafa Moŝto, Sinjoro P.; la tria: al Lia Moŝto, Sinjoro D. [FE 42.8].

● **due** — Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; due mi dankas vin por la prunto; trie ... [FE 14.6].

● **du'nask'it'** - jumeau | twin | Zwilling | близнецъ | bliźnię. — Kp. ĝemelo [OA 4].

● **du'obl**' — double | twofold, duplex | zweifach | двойной | podwójny [UV obl]. — **duobla** - double | twofold, duplex | zweifach | двойной | podwójny [FE 14 obl]. — [AK] zweifach, doppelt. — Por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, t. e. (= tio estas) dek frankojn [FE 14.7].

● **duono** — Tri estas duono de ses [FE 14.9]. — Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; tial du metroj kostas

kvar kaj duonon frankojn (aŭ da frankoj) [FE 14.11].

● **du'on'patr'** - beau-père | step-father | Stiefvater | отчимъ | ojczym. — **duonpatro** - beau-père | step-father | Stiefvater | отчимъ | ojczym [FE 33]. — [DL 1888] *Karolo estas mia nepropra filo (aŭ duonfilo), ĉar mi estas la dua edzo de lia patrino [DL 10.11].*

● **duonpatrino** — Lia duonpatrino estas mia bofratino [FE 33.20].

● **duope** — à deux | {angla mankas} | selbander, zwei zusammen | вдвоемъ | we dwoje [FE 14 op]. — Tiuj ĉi du amikoj promenas ĉiam duope [FE 14.13].

● **ducent** — Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo [FE 32.8].

● **dudek** — Dek kaj dek faras dudek [FE 12.7].

● **dudeka** — La dudeka (tago) de Februaro estas la kvindek-unua tago de la jaro [FE 12.14].

● **dudek du** — Kvar kaj dek ok faras dudek du [FE 12.8].

● **dudek dua** — Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua [FE 12.19].

● **dudek sepa** — Hodiaŭ estas la dudek sepa (tago) de Marto [FE 12.18].

● **dek du** — Kvin kaj sep faras dek du [FE 12.6]. Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj [FE 14.15].

● **dek-dua** — Januaro estas la unua monato de la jaro, Aprilo estas la kvara, Novembro estas la dek-unua, Decembro estas la dek-dua [FE 12.13].

● **dekduo**, **dek-duo** — Mi aĉetis dekduon (aŭ dek-duon) da kuleroj kaj du dekduojn da forkoj [FE 14.4].

dualism-o [OA 2.1] — [Beau] dualisme. [EG 2] Dualismus.

dub' - douter | doubt | zweifeln | сомнѣваться | wątpić. — **dubi** - douter | doubt | zweifeln | сомнѣваться | wątpić [FE 26]. — [RE]. — Kvankam vi estas riĉa, mi dubas, ĉu vi estas feliĉa [FE 26.19].

● **sendube** — Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara [A 6.1].

duel' [OA 1] * duel | duel | Duell | дуэль | pojedynek. — [RE].

duet' [OA 1] duo (mus.) | duet | Duett | дуэтъ | duet. {MUZ} — [EG 1].

duk' - duc | duke | Herzog | герцогъ | książe. — [RE].

dukat' [OA 1] * ducat | ducat | Dukaten {2012 ankaŭ: Dukat} | дукатъ | dukat. {MON} — [RE].

dum - pendant, tandis que | while | während | пока, между тѣмъ какъ | póki, podczas gdy. — **dum** - pendant, tandis que | while | während | пока, между тѣмъ какъ | póki [FE 17]. — [AK] {en} while, whilst. — [UL]. — La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi, kaj, dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj [FE 17.8]. Ne ripro**ĉ**u vian amikon, ĉar vi mem plimulte meritas ripro**ĉ**on; li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto [FE 22.7]. — [DL 1888] *Sed se mi volus la respondojn je ĉiuj demandoj eldoni kune, en unu libro, mi devus tro longe atendigi miajn korespondantojn, dum tiu libro estos preta kaj eldonita, - ... - per apartaj kajeroj, ... [DL A 2]. Dum en unu ĉambro la gastoj dancadis, en la dua ĉambro estis preparata la vespermanĝo; ... [DL 5.32]. Ĝoju, ĝoju ni, kolegoj, / Dum ni junaj estas! [DL 19].* — **Rim.**: Z kutime metis komon antaŭ „dum". Escepto estas FE 22.7: „unufoja mensoginto dum vi ...". En FE eld. 1-4 oni tie ĝuste trovas la komon: „unufoja mensoginto, dum vi ...".

● **dum'e** - cependant | meanwhile, during | unterdessen | между тѣмъ | tymczasem. — [AK] {en} meanwhile. — La ideoj, kiujn mi supre esprimis pri la Fundamento de Esperanto, prezentas dume nur mian privatan opinion [A 11.1].

dung' - louer, embaucher | hire | dingen | нанимать | najmować. — [AK 1914] embaucher, engager | hire, engage | mieten, dingen. — [RE]. — **Rim**.: 2012: dingen (ark.), prefere: anstellen, einstellen.

du'on'patr' - beau-père | step-father | Stiefvater | отчимъ | ojczym. — **duonpatro** - beau-père | step-father | Stiefvater | отчимъ | ojczym [FE 33].

● **duonpatrino** — Lia duonpatrino estas mia bofratino [FE 33.20].

duŝ-o [OA 2.2] douche | shower-bath | Dusche — [EG 2] Dusche, Sturzbad {Sturzbad (ark.)}.

E

Ee - é | a as in “make“ | e | э | e [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **e** ... [FE 1]. — **e** [OA 7] = nomo de la litero e, sesa litero de la Esperanta alfabeto. — **Rim**.: [Lingva Respondo 56 (1893): Pri la nomoj de la literoj]. La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

e - marque l’adverbe; ex. bon’e bien | ending of adverbs; e. g. bon’ good — bon’e well | Endung des Adverbs; z. B. bon’e gut | окончаніе нарѣчія; напр. bon’e хорошо | zakończenie przysłówka; np. bon’e dobrze. — **e** - marque l’adverbe | ending of adverbs | Endung des Adverbs | окончаніе нарѣчія | zakończenie przysłówka [FE 7].

— **Lingva Respondo 1891 [Adverbo kaj adjektivo]**: En la tempo, kiam estis verkata la “Dua Libro” {aperis en 1888}, la demando, ĉu oni devas diri “estas varme” aŭ “estas varma”, ne estis ankoraŭ absolute decidita kaj la uzado de unu formo estis egale bona, kiel la uzado de la dua. Nun tiu ĉi demando iom post iom per la uzado akceptis jam decidon pli difinitan.

La adjektivo difinas la substantivon aŭ la pronomon havantan sencon de substantivo (responde la demandon *kia*) kaj la adverbo difinas la verbon (responde la demandon *kiel*). Tial ni diras: “la vetero estas bona”, “li kantas bone”. Tamen en la okazoj, kie la difino apartenas precize nek al substantivo aŭ pronomo, nek al verbo, ni ofte ne povas decide diri, kian demandon (*kia* aŭ *kiel*) nia difino devas respondi kaj kian formon ni devas uzi. En ĉiu alia lingvo tiu ĉi duba demando estas decidata per la sankcio de l'uzado, - en nia lingvo ni konsilas uzadi en tiuj okazoj ĉiam la adverbon; ekzemple: “estas varme”, “estas vere”, “ĝi estas vera”. La vorton “ĝi” ni konsilas ĉiam uzi nur por anstataŭi objekton aŭ aferon (kiel “li” anstataŭas personon); sed en esprimoj senpersonaj kaj senobjektaj ni konsilas neniam uzi la vorton “ĝi” (ekzemple: “hodiaŭ estas varme” kaj ne “hodiaŭ ĝi estas varme”). [*La Esperantisto*, 1891, p. 7].

eben’ - égal (de même plan) | even, smooth | eben, glatt | ровный | równy. — [AK] {en} even, level. — [UL]

ebl’ - possible; ex. kompren’ comprendre - kompren’ebl’ compréhensible | able, possible | möglich | возможный | możliwy. — **ebla** - possible | able, possible | möglich | возможный | możliwy [FE 29].

● **fleksebla** — Ŝtalo estas fleksebla, sed fero ne estas fleksebla [FE 41.1].

● **manĝebla** — Ne ĉiu kreskaĵo estas manĝebla [FE 41.3].

● **nedisputebla** — Ĝis la tempo, kiam ia por ĉiuj aŭtoritata kaj nedisputebla institucio decidos alie, ... [A 3.4]. ... fari tion ĉi ... povas ne apartaj personoj, sed nur ia centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro [A 9.4].

● **nekomprenebla** — Via parolo estas tute nekomprenebla kaj viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble [FE 41.4].

● **nekredebla** — Li rakontis al mi historion tute nekredeblan [FE 41.6]. Li estas tre kredema: eĉ la plej nekredeblajn aferojn, kiujn rakontas al li la plej nekredindaj homoj, li tuj kredas [FE 41.14].

● **netuŝebla** — ... li esperas, ke ... ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto [A 2.3]. Havante la karakteron de fundamento, la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti netuŝeblaj [A 4.1]. La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj [A 4.4]. ... jes, ĝi estas eraro, sed ĝi devas resti netuŝebla, ĉar ĝi apartenas al la fundamenta dokumento [A 4.7]. ... memorigadu al si, kio en nia lingvo estas oficiala kaj netuŝebla ... [A 5.4].

● **netuŝebleco** — ... ĉar severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado ... [A 1.3]. ... ĉar, perdinte la severan netuŝeblecon, la verko perdus sian eksterordinare necesan karakteron de dogma fundamenteco ... [A 4.6].

● **rompebla** — Vitro estas rompebla kaj travidebla [FE 41.2].

● **sanigebla** — [FE 42.13].

● **ŝanĝebla** — la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo [A 1.1].

● **travidebla** — Vitro estas rompebla kaj travidebla [FE 41.2].

● **tuŝebla** — la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo [A 1.1].

● **ebl'e** - peut-être | perhaps, may-be | vielleicht | можетъ быть | może — [UV 1888 A]: ebl'e. — ... vortoj kaj reguloj rekomendataj private, kiuj eble ne al ĉiuj esperantistoj estas konataj aŭ eble ne de ĉiuj estas aprobataj [A 5.4]. — Sed estas bone uzadi la vorton „je" kiel eble pli malofte [FE 29.2]. Rakontu al mi vian malfeliĉon, ĉar eble mi povos helpi al vi [FE 41.5]. — [RE].

● **kompreneble** — Ĉu vi amas vian patron? Kia demando! kompreneble, ke mi lin amas [FE 41.7].

● **kredeble** — La tablo staras malrekte kaj kredeble baldaŭ renversiĝos [FE 33.11]. Mi kredeble ne povos veni al vi hodiaŭ, ĉar mi pensas, ke mi mem havos hodiaŭ gastojn [FE 41.8].

● **nelegeble** — Via parolo estas tute nekomprenebla kaj viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble [FE 41.4].

ebon' - ébène | ebony | Ebenholz | черное дерево | heban. — [MV].

ebri' [OA 1] * ivre | drunk | betrunken | пьяный | pijany. — [Beau]. [EG 1]. — **Rim.**: Kp. mal-sobr-a.

ebur-o [OA 2.2] ivoire | ivory | Elfenbein — [EG 2] Elfenbein.

ec' - marque la qualité (abstraitement); ex. bon' bon — bon'ec' bonté; vir' homme — vir'ec' virilité | denotes qualites; e. g. bon' good — bon'ec' goodness | Eigenschaft; z. B. bon' gut — bon'ec' Güte; vir'in' Weib — vir'in'ec' Weiblichkeit | качество или состояние; напр. bon' добрый — bon'ec' доброта; vir'in' женщина — vir'in'ec' женственность | przymiot jako oddzielne pojęcie; np. bon' dobry — bon'ec' dobroć; infan' dziecię — infan'ec' dzieciństwo. — **ec** - marque la qualité (abstraitement); ex. bona bon — boneco bonté; viro homme — vireco virilité | denotes qualities; e.g. bona good — boneco goodness; viro man — vireco manliness; virino woman — virineco womanliness | Eigenschaft; z.B. bona gut — boneco Güte; virino Weib — virineco Weiblichkeit | качество или состояние; напр. bona добрый — boneco доброта; virino женщина — virineco женственность | przymiot; np. bona dobry — boneco dobroć; infano dziecię — infaneco dzieciństwo [FE 11]. — Ec [FE 2]. Ec [FE 4].

● **ec'a** - qualitatif | qualitative | qualitativ | качественный | jakościowy.

● **alteco** — La alteco de tiu monto ne estas tre granda [FE 35].

eĉ - même (adv.) jusqu'à | even (adv.) | sogar | даже | nawet. — **eĉ** - même, jusqu'à | even | sogar | даже | nawet [FE 37]. — Eĉ [FE 2]. — [UL] — … li neniam permesis al si ... eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj [A 2.2]. ... kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem [A3.4]. La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj [A 4.4]. Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara [A 6.1]. ... nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante pliboniĝadi kaj perfektiĝadi ... [A 6.3]. ... tiamaniere ni havos la certecon, ke eĉ ĉe la plej granda perfektiĝado la unueco de Esperanto neniam estos rompata kaj neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron ... [A 8.3]. ... ne malhelpante tamen al la lingvo ne sole riĉiĝadi, sed eĉ konstante perfektiĝadi [A 9.1]. — La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo [FE 33.4]. Timulo timas eĉ sian propran ombron [FE 37.21]. Li estas tre kredema: eĉ la plej nekredeblajn aferojn, kiujn rakontas al li la plej nekredindaj homoj, li tuj kredas [FE 41.14]. Li estas tre purema, kaj eĉ unu polveron vi ne trovos sur lia vesto [FE 41.17].

Eden' [OA 1] * Eden | Eden | Eden | эдемъ, рай | eden, raj. {RELI} {NOM} — [Beau] Eden.

edif' - édifier | edify | erbauen (z. B. durch eine Predigt) | назидать | budować. — [AK] édifier (moralement). — [RE].

Edikt' [OA 3.2] {en} edict | {fr} édit | {de} Edikt, Erlass | {es} edicto | {pt} edicto {legu: edito} | {it} editto | {pl} edykt. {JUR} — [EG 1].

eduk' - élever (éducation) | educate | erziehen | воспитывать | wychowywać. — [UL].

edz' - mari, époux | married person, husband | Gemahl | супругъ | małżonek. — **edzo** - mari, époux | married person, husband | Gemahl | супругъ | małżonek [FE 18]. — [UL].

● **edz'iĝ'** - se marier | marry | heirathen {de 1901: heiraten} | жениться | żenić się. — La reĝido [...] forkondukis ŝin al la palaco de sia patro, la reĝo, kie li edziĝis je ŝi [FE 23.3].

● **edzino** — Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn; mi ankaŭ tre amas iliajn (infanojn) [FE 18.10]. La edzino de mia patro estas mia patrino kaj la avino de miaj infanoj [FE 33.15]. La patro de mia edzino estas mia bopatro, mi estas lia bofilo, kaj mia patro estas la bopatro de mia edzino [FE 36.6]. Ĉiuj parencoj de mia edzino estas miaj boparencoj, sekve ŝia frato estas mia bofrato, ŝia fratino estas mia bofratino; mia frato kaj fratino (gefratoj) estas la bogefratoj de mia edzino [FE 36.7]. La edzino de mia nevo kaj la nevino de mia edzino estas miaj bonevinoj [FE 36.8].

● **edz'ec'** - mariage | marriage, matrimony | Ehe | бракъ | małżeństwo.

● **geedzoj** — Mi gratulis telegrafe la junajn geedzojn [FE 36.4].

— **Lingva Respondo 1913 [Pri la deveno de la vorto "edzo"]:** Dank' al la afableco de S-ro D-ro Zamenhof, mi ricevis la solvon de tiu malgranda enigmo... La vere primitiva formo estas ne *edz*, sed *edzin*, de kiu devenas la formo *edzo*. Tiel same *fraŭlo* devenas de *fraŭlino, kuzo* de *kuzino*, kaj *feo*, kiun oni povus uzi, por montri fablan estulon, ekz. Oberono, kaj kiun oni povas devenigi de *feino*. La vorto *edzino* estis primitive sufikso, kiu poste fariĝis sendependa de la radikoj, al kiuj ĝi estis primitive aldonita. Jen kiamaniere la Majstro klarigis al mi la aferon: En la germana lingvo, reĝido heredonto de la krono estas nomata *Kronprinz*, kiu fariĝas en Esperanto *kronprinco*. La virino kunigita kun la kronprinco per leĝa ligilo estas nomata germane *Kronprinzessin*. Ĉi tiun lastan vorton D-ro Zamenhof transskribis Esperante *kronprincedzino*, kaj li tuj rimarkis, ke la finiĝo de tiu vorto, t. e. *edzino*, ricevis per si mem la sencon de virino kunigita kun viro per leĝa ligilo. Li do faris el ĉi tiu vorto: unue, ĝeneralan sufikson, esprimantan difinitan rilaton, kaj due, vorton memstaran kun tiu sama signifo. Poste el la vorto *edzino* li tute logike devenigis la vorton *edzo*. Laŭ artikolo de Emile Boirac. [*Oficiala Gazeto*, 1913, Decembro].

Efekt' [OA 3.2] {en} effect | {fr} effet (vive impression) | {de} Eindruk {pres-eraro, legu: Eindruck}, Effekt | {es} efecto (producido en el animo) | {pt} effeito (impressao moral) {legu: efeito (impressão moral)} | {it} effetto (impressione viva) | {pl} efekt. — [Beau] effet (impression sur le cœur, l'esprit). [EG 1].

efektiv' - effectif, réel | real, actual | wirklich | дѣйствительный | rzeczywisty. — [UL].

Efemer' [OA 3.2] {en} ephemeral | {fr} éphémère | {de} vergänglich, ephemer | {es} efimero | {pt} ephemero {legu: efêmero} | {it} effimero | {pl} efemeryczny. — [DL-Ald] *De la efemera laboro de tiaj amikoj la afero ne sole nenion gajnas, sed kontraŭe, ĝi nur perdas [7a].* [EG 2] ephemer.

efik' - opérer, agir | effect | wirken | дѣйствовать | działać, skutkonwać. — [AK] opérer, agir, être efficace | be effectual, work (*intr*.). — [RE].

eg' - marque augmentation {artikolo postulata: marque l'augmentation}, plus haut degré; ex. pord' porte - pord'eg' grande porte; pet' prier - pet'eg' supplier | denotes increase of degree; e. g, varm' warm - varm'eg' hot | bezeichnet eine Vergrösserung {legu: Vergrößerung} oder Steigerung; z. B. pord' Thür {de 1901: Tür} - pord'eg' Thor {de 1901: Tor}; varm' warm — varm'eg' heiss | означаетъ увеличеніе или усиленіе степени; напр. man' рука - man'eg' ручище; varm' теплый - varm'eg' горячій | oznacza zwiększenie lub wzmocnienie stopnia; np. man' ręka - man'eg' łapa; varm' ciepły - varm'eg' gorący. — **eg** - marque augmentation {artikolo postulata: marque l'augmentation}, plus haut degré; ex. pordo porte - pordego grande porte; peti prier - petegi supplier | denotes increase of degree; e.g. varma warm - varmega hot | bezeichnet eine Vergösserung oder Steigerung; z.B. pordo Thür — pordego Thor; varma warm - varmega heiss | означаетъ увеличеніе или усиленіе степени; напр. mano рука - manego ручище; varma теплый - varmega горячій | oznacza zwiększenie lub wzmocnienie stopnia; np. mano ręka -

manego łapa; varma ciepły - varmega gorący [FE 13].

● **har'eg'** - soie de cochon | bristle | Borste | щетина | szczecina [UV har'].

● **kort'eg'** - cour (d'un souverain) | court | Hof (Königlicher) | Дворъ (царскій) | dwór, pałac [UV kort']. — [AK 1914] Hof (eines Fürsten).

● **kusen'eg'** - lit de plumes | bolster | Pfühl | перина | pierzyna [UV kusen']. — [AK 1914] Pfühl, Plumeau.

● **man'eg'** — ручище | łapa [UV eg']. — **manego** – ручище | łapa [FE 13 eg'].

● **paf'il'eg'** - canon | cannon | Kanone | пушка | armata [UV paf']. — Antaŭ nia militistaro staris granda serio da pafilegoj [FE 38].

● **pet'eg'** - supplier [UV eg']. — **petegi** - supplier [FE 13 eg'].

● **ponard'eg'** - épieu, pique | spear, lance | Pike, Spiess | копье | pika [UV ponard'].

● **pord'eg'** - porte cochère | gate | Thor {de 1901: Tor} | ворота | brama [UV port']. — **pord'eg'** - grande porte | Thor {de 1901: Tor} [UV eg']. — **pordego** - grande porte | Thor {de 1901: Tor} [FE 13 eg']. — Kun bruo oni malfermis la pordegon, kaj la kaleŝo enveturis en la korton [FE 38.8].

● **pro'cent'eg'** - usure | usury | Wucher | лихоимство | lichwa [UV pro'cent'].

● **ring'eg'** - cerceau | hoop, circle | Reif (am Fasse) | обручъ | obręcz [UV ring'].

● **ung'eg'** - griffe, serre | claw, clutch | Kralle | коготь | pazur [UV ung'].

● **varm'eg'** – [franca mankas] | hot | heiss | горячій | gorący [UV eg']. — **varmega** – [franca mankas] | hot | heiss | горячій | gorący [FE 13 eg']. — La fera bastono, kiu kuŝis en la forno, estas nun brule varmega [FE 31.17]. En varmega tago mi amas promeni en arbaro [FE 34.11]. Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3].

● **varmege** — ... tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna [FE 13.1].

— **LR 1908 [Pri la sufikso *eg*]:** Tute prave vi diras, ke la sufikso *eg* ne povas servi por simpla anstataŭado de la vortoj "granda" aŭ "tre", sed ĝi devas servi por kreado de vortoj *novaj* kun senco *speciala*. Tia neĝusta uzado de la sufikso certe ne estas aprobinda, kaj, kiom oni povas, oni devas ĝin eviti. Tamen esti *tro* severaj en ĉi tiu rilato ni ankaŭ ne devas. En multaj okazoj, en kiuj ni povus bone uzi la vortojn "granda" aŭ "tre", ni povas ankaŭ sen peko kontraŭ la spirito de Esperanto uzi la sufikson *eg*, ĉar tre ofte la saman ideon unu persono povas prezenti al si kiel ideon simplan en granda mezuro, dum alia persono ĝin prezentas al si kiel ideon *specialan*. Ekzemple, la vorton "bonega" ni preskaŭ ĉiam povus anstataŭigi per "tre bona", kaj tamen en la samaj okazoj oni ankaŭ povas prezenti al si bonecon *eksterordinaran* kaj uzi por ĝi vorton *apartan* tiel same, kiel oni faras preskaŭ en ĉiuj lingvoj.

Laŭ mia opinio ni devas esti tre singardaj nur en tiaj okazoj, en kiuj ni povus ricevi aŭ senduban, por niaj oreloj malagrablan, *eraron* kontraŭ la lingvo, aŭ tute malĝustan sencon; sed en ĉiuj aliaj okazoj tro granda severeco kaj katenado estas superflua. En tiaj okazoj, kie kelka libereco alportas al ni nenian malutilon, kial ni devus senbezone nin malliberigi? [LR 11, Respondo 38, *La Revuo*, 1908, Majo].

egal' - égal, qui ne diffère pas | equal | gleich | одинаковый | jednakowy. — **egala** - égal | equal | gleich | одинаковый | jednakowy [FE 28]. — [UL].

● **egale** - Por ke ia regno estu forta kaj glora ..., estas necese, ke ĉiu regnano sciu, ke li neniam dependos de la kapricoj de tiu aŭ alia persono, sed devas obei ĉiam nur klarajn, tute difinitajn fundamentajn leĝojn de sia lando, kiuj estas egale devigaj por la regantoj kaj regatoj ... [A 3.1]. — ... en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon „n" tute egale ĉu ia prepozicio starus aŭ ne [FE 28.3].

egid' [OA 1] * égide | Agis | Aegide {legu: Ägide}, Schutz | эгида | egida. — [Beau] Egid {majuskle}, Egide (myth.).

egoism' [OA 1] * egoisme {legu égoïsme} | egoism | Egoismus, Eigenliebe | эгоизмъ | egoizm. — [Beau] égoïsme. [EG 1].

egoist' [OA 1] égoïste | egoist | Egoist | эгоистъ | egoista — [Beau] égoïste. [EG 1].

eĥ' - écho | echo | Echo | эхо | odgłos. — [RE].

ej' - marque le lieu spécialement affecté à...; ex. preĝ' prier - preĝ'ej' église; kuir' faire cuire - kuir'ej' cuisine | place where an

action occurs; e. g. kuir' cook - kuir'ej' kitchen | Ort für...; z. B. kuir' kochen - kuir'ej' Küche; preĝ' beten - preĝ'ej' Kirche | мѣсто для...; напр. kuir' варить - kuir'ej' кухня; preĝ' молиться - preĝ'ej' церковь | miejsce dla...; np. kuir' gotować - kuir'ej' kuchnia; preĝ' modlić się - preĝ'ej' kościoł. — **ej** - marque le lieu spécialement affecté à... ex. preĝi prier - preĝejo église; kuiri faire cuire - kuirejo cuisine | place of an action; e.g. kuiri cook - kuirejo kitchen | Ort für...; z.B. kuiri kochen - kuirejo Küche; preĝi beten - preĝejo Kirche | мѣсто для...; напр. kuiri варить - kuirejo кухня; preĝi молиться - preĝejo церковь | miejsce dla...; np. kuiri gotować - kuirejo kuchnia; preĝi modlić się - preĝejo kościół [FE 13].

● ***banejo*** *- Mi veturas en banejon, ĉar mia barbo ne volas kreski kiel ĝi devus, tio ĉi ankaŭ estas malsano, kaj barbon oni devas havi! [DL 17, plurloke].*

● **cigarejo** — Magazeno, en kiu oni vendas cigarojn, aŭ ĉambro, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarejo [FE 40.15].

● **drink'ej'** - cabaret, taverne | inn, tavern | Schenke | шинокъ | szynkownia [UV drink'].

● **gren'ej'** - grenier | granary, warehouse | Speicher | амбаръ | spichrz [UV gren'].

● **herb'ej'** - pré, prairie | meadow, green field | Wiese | лугъ | łąka.

● **kuir'ej'** - cuisine | kitchen | Küche | кухня | kuchnia [UV ej']. —**kuirejo** - cuisine | kitchen | Küche | кухня | kuchnia [FE 13 ej']. — Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj laboradi senĉese [FE 13.2]. La kuiristo sidas en la kuirejo [FE 40].

● **lern'ej'** - école | school | Schule | школа | szkoła, uczelnia [UV lern']. — La domo, en kiu oni lernas, estas lernejo, kaj la domo, en kiu oni preĝas, estas preĝejo [FE 40.12].

● **loĝejo** - Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, kiu estis en la loĝejo [FE 19.4].

● ***malsanulejo*** *—Nia fidela servanto mortis en la malsanulejo* [DL 11].

● **neces'ej'** - cabinet d'aisance | privy | Abtritt | отхожее мѣсто | ustęp [UV neces'].

● **ofic'ej'** - bureau | bureau | Bureau | бюро, канцелярія | biuro, kancelarya [UV ofic'].

● **pic/ej/o**. [OA 9] Restoracio aŭ simila ejo, kiu ĉefe vendas picojn.

● **preĝ'ej'** - église | [angla mankas] | Kirche | церковь | kościoł [UV ej']. — **preĝejo** - église | [angla mankas] | Kirche | церковь | kościół [FE 13 ej']. — ... la edziĝa soleno estos en la nova preĝejo, kaj la edziĝa festo estos en la domo de liaj estontaj bogepatroj [FE 39.3]. La domo, en kiu oni lernas, estas lernejo, kaj la domo, en kiu oni preĝas, estas preĝejo [FE 40.12].

● **sanejo** - [FE 42.12].

● **sankt'ej'** - temple | temple | Tempel | храмъ | świątynia [UV sankt'] {RELI}. — **Rim.**: Per la oficialigo de **templ'** [OA 1] * temple | temple | Tempel | храмъ | świątynia almenaŭ la franca kaj germana tradukoj fariĝis dubaj. Pli trafe en 2012: sanctuaire | heiliger Ort.

● **ŝvitbanejo** - La kuracisto konsilis al mi iri en ŝvitbanejon [FE 40].

ek' - indique une action qui commence ou qui est momentanée; ex. kant' chanter - ek'kant' commencer à chanter; kri' crier - ek'kri' s'écrier | denotes sudden or momentary action; e. g. kri' cry - ek'kri' cry out | bezeichnet eine anfangende oder momentane Handlung; z. B. kant' singen - ek'kant' einen Gesang anstimmen; kri' schreien - ek'kri' aufschreien | начало или мгновенность; напр. kant' пѣть - ek'kant' запѣвать; kri' кричать - ek'kri' вскрикнуть | oznacza początek lub chwilowńść; np. kant' śpiewać - ek'kant' zaśpiewać; kri' krzyczeć - ek'kri' krzyknąć. — **ek** - indique une action qui commence ou qui est momentanée; ex. kanti chanter - ekkanti commencer à chanter; krii crier - ekkrii s'écrier | denotes sudden or momentary action; e. g. krii cry - ekkrii cry out | bezeichnet eine anfangende oder momentane Handlung; z. B. kanti singen - ekkanti einen Gesang anstimmen; krii schreien - ekkrii aufschreien | начало или мгновенность; напр. kanti пѣть - ekkanti запѣть; krii кричать - ekkrii вскрикнуть | oznacza początek lub chwilowość; np. kanti śpiewać - ekkanti zaśpiewać; krii krzyczeć - ekkrii krzyknąć [FE 21]. — Ek [FE 2].

● [DL 1888] ***ekbrili*** *- Aliaj ekbrilis per senfinaj filozofadoj kaj skribis instruitajn artikulojn [post 1888: artikolojn], ... [DL I 3].*

● **ekbrilo** — Du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo. [FE 40].

● **ek'kant'** commencer à chanter | [angla mankas] | einen Gesang anstimmen | запѣвать | zaśpiewać [UV ek']. — **ekkanti** -

commencer à chanter | [angla mankas] | einen Gesang anstimmen | запѣть | zaśpiewać [FE 21 ek'].

● **ekkolerema** — Li estas tre ekkolerema kaj ekscitiĝas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo; ... [FE 41.13].

● **ek'kri'** - s'écrier | cry out | aufschreien | вскрикнуть | krzyknąć [UV ek']. — **ekkrii** - s'écrier | cry out | aufschreien | вскрикнуть | krzyknąć [FE 21 ek']. — "Ho, ĉielo!" ekkriis la patrino, "kion mi vidas? [FE 21.3].

● **ekparoli** — Kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi ion novan, sed baldaŭ ni vidis, ke ni trompiĝis [FE 40.7].

● **eksalti** — Mi eksaltis de surprizo [FE 40.3].

● **ektuŝi** - ... ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus la komenco de nia morto [A 1.5].

● **ektuŝo** — Tiun ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori kaj kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ... [A 1.5].

— **Lingva Respondo 1906 [Pri "sidiĝi" kaj "eksidi"]**: Vi estas prava: anstataŭ "sidiĝu" estus pli bone diri "sidigu vin" aŭ "eksidu" tamen ĉar la formo "sidiĝu" jam de tre longe estas uzata preskaŭ de ĉiuj Esperantistoj, tial ĝi fariĝis jam "esperantismo" kaj nomi ĝin eraro oni jam ne povas. Ne sole en naturaj lingvoj, sed ankaŭ en lingvo artefarita ĉio, kio estas uzata de la plimulto da bonaj verkistoj, devas esti rigardata kiel bona, se ĝi eĉ ne estas absolute logika; ĉar se ni postulos ĉiam nur logikon *absolutan*, tiam la libera uzado de lingvo artefarita fariĝos tute ne ebla, ĉar tiam malaperos ĉiu utileco de longa ekzerciĝado kaj en la deka jaro de uzado de la lingvo, kiel en la unua jaro, ĉiu devus konstante tro longe pripensadi kaj pesadi ĉiun sian vorton. Tamen la diferenco inter lingvo natura kaj lingvo artefarita konsistas en tio, ke, dum en la unua oni devas uzi *nur* tiujn formojn, kiujn uzas bonaj verkistoj, kaj uzado de formo pli logika estas *malpermesata*, - en lingvo artefarita ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan, kvankam neniu ĝis nun ĝin uzis, kaj li povas esti konvinkita, ke se lia formo estas efektive bona, ĝi baldaŭ trovos multajn imitantojn kaj iom post iom elpuŝos la malpli logikan, kvankam ĝis nun pli uzatan formon malnovan. [Respondo 3, *La Revuo*, 1906, Decembro].

Rim.: [Pri kelkaj misuzoj 1973]

La Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko, en akordo kun la Prezidanto de la Akademio, atentigas la redaktorojn de gazetoj, la aŭtorojn kaj ĝenerale ĉiujn uzantojn de Esperanto pri jenaj, ĉiam pli disvastiĝantaj eraroj:

a) Oni skribu "ekde" aŭ "eke de", sed ne "ek de" per du vortoj, ĉar "ek" estas tie uzata prefikse aŭ adverbe, sed ne kiel interjekcio.

b) – c) ... {aliaj temoj}

H. A. de Hoog. Junio 1973.

ekip-i [OA 2.1] — [Beau] équiper. [EG 2].

eklezi' [OA 1] * Eglise (société) | the Church | Kirche | церковь | kościoł. {RELI} — [Beau] église (société).

Eklips' [OA 3.1] {en} eclipse | {fr} éclipse | {de} Eklipse, Verfinsterung | {es} eclipse | {pt} eclipse | {it} eclisse | {pl} zacmienie. {ASTR} — [EG 2] (astr.) Finsternis. — Kp. EG 1: **ekliptiko**, Ekliptik.

eklog-o [OA 2.1] — [EG 1] Ekloge. — [Beau] eglog- {kun -g-}, églogue.

ekologi/o [OA 9] **1** Reciprokaj influoj inter vivantaj organismoj kaj ties natura medio. **2** Scienco pri ekologio *1*. — [EV 1923] bot. u. zool. Ökologie, Biologie, Lehre v. der Lebensweise (v. den Beziehungen der Lebewesen zur unbelebten und belebten Natur).

ekonomi' [OA 1] * économie | economy | Oekonomie {legu: Ökonomie} | економія | oszczędność. {EKON} — [RE].

ekran/o. [OA 8] Surfaco, kiu haltigas diversajn radiojn aŭ substancojn, ĉu por ŝirmi kontraŭ ilia efiko *(kamena ~o; iks-radia ~o el plumbo)*, ĉu por videbligi ilin (*kineja ~o, fluoreska ~o*). — A. screen, F. écran; G. Schutzschirm, Schutzwand, Filmwand, Leuchtschirm; H. {es} pantalla, lienzo; I. {it} schermo, parafuoco, ventola; P. {pt} anteparo, biombo, tela (para projecção) {legu: (para projeção)}. — [ER].

eks' - qui fut, ex- | ex-, late | ehemalig, verabschiedet, abgedankt | бывшій, отставной | były, dymisyonowany.

ekscelenc' - excellence | excellence | Excellenz {de 1901: Exzellenz} | Превосходительство | Ekscelencya. — [AK] {en} Excellency (*title*). — [RE].

eksces-o [OA 2.1] — [EG 1]. Ausschreitung, Exzess {inter 1901 kaj 1996: Exzeß}.

ekscit' - exciter, émouvoir | excite | erregen | возбуждать | wzbudzać. — **eksciti** - exciter, émouvoir | excite | erregen | возбуждать | wzbudzać [FE 41]. — [RE].

● **ekscitiĝi** — Li estas tre ekkolerema kaj ekscitiĝas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo [FE 41].

ekskluziv-e [OA 2.1] — [EG 1] ekskluzive {kun –z–}, exklusiv, ausschliesslich {legu: ausschließlich}. [Beau] eksklusiv {kun –s-}, exclusif. [EG 2] eksklusive {kun -s-}.

ekskomunik-i [OA 2.1] {RELI} — [EG 1]. exkommunizieren.

ekskrement' [OA 1] * excrément | excrement | Exkrement | экскрементъ | ekskrement. — [Beau] excrément. [EG 1].

ekskurs' - excursion | excursion | Ausflug | экскурсія | wycieczka. — [MV].

eksped' - expédier | expedité | expediren {de 1901: expedieren. 2002: (ark.)}, versenden | экспедировать | ekspedyować. — [AK 1914] dispatch, forward | befördern, versenden. — [RE].

eksperiment' [OA 1] * expérience | experiment | Experiment | экспериментъ, опытъ | doswiadczenie. — [Beau] expérience (sc.). [EG 1].

eksplod' - faire explosion | explode | explodiren {de 1901: explodieren} | взрывать, эксплодировать | wybuchać. — **eksplodi** - faire explosion | explode | explodiren {de 1901: explodieren} | взрывать | wybuchać [FE 41]. — [AK 1914] zerspringen, explodieren, ausbrechen. — [DL] [RE].

● **eksplodigi** — Unu fajrero estas sufiĉa, por eksplodigi pulvon [FE 41.18]. — [DL 1888]: *La plej malgranda fajrero estas sufiĉa por eksplodigi la pulvon [DL 12.3].*

ekspluat-i [OA 2.1] — [Beau] exploiter (faire valoir). [EG 1] exploitieren, ausbeuten, [aus-]nutzen.

eksport' [OA 1] exporter | export | exportieren | экспортировать, вывозить | eksportować, wywozić. — [Beau] exporter. [EG 1].

ekspozici' - exposition | exposition | Ausstellung | выставка | wystawa. — [AK] {en} exhibition. — [UL].

ekspres' [OA 1] * exprès (messager) | express, messenger | Express, Eilbote | экспрессъ | postaniec. — [EG 1] ekspres-a, express {adjektivo, pro tio minuskla}.

ekstaz' [OA 1] * extase | ecstasy | Ekstase | экстазъ | ekstaza. — [EG 1].

ekster - hors, en dehors de | outside, besides | ausser, ausserhalb {legu: außer, außerhalb} | внѣ | zewnątrz. — **ekster** - hors, en dehors de | outside, besides | ausser, ausserhalb {legu: außer, außerhalb} | внѣ | zewnątrz [FE 26]. — [UL] — La birdo flugas en la ĉambron (= ĝi estas ekster la ĉambro kaj flugas nun en ĝin) [FE 26]. Mi staras ekster la domo, kaj li estas interne. Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj) [FE 30]. Li loĝas ekster la urbo [FE 31].

● **ekstera** — Starante ekstere, li povis vidi nur la eksteran flankon de nia domo [FE 31].

● **ekstere** — Starante ekstere, li povis vidi nur la eksteran flankon de nia domo [FE 31].

● **ekstero** — La ekstero de tiu ĉi homo estas pli bona, ol lia interno [FE 31].

— **Lingva Respondo 1891 ["krom" kaj "ekster"]**: En la plena vortaro ni donis la vorton "krom" sed poste, vidante ke kelkaj amikoj per la vorto "ekster", kiu ekzistas en la malgranda fundamenta vortareto, kvankam sub iom alia senca nuanco, tute bone esprimas ankaŭ la sencon de "krom", ni komencis ankaŭ uzadi tiun ĉi vorton en la senco de "krom". [*La Esperantisto*, 1891, p. 7].

eksterm' - exterminer | exterminate | ausrotten, vertilgen | истреблять | wytępiać. — [RE].

ekstr' - extraordinaire, extra- | extraordinary, extra- | extra, ausserordentlich {legu: außerordentlich} | экстренный | nadzwyczajny. — [AK] {en} extra. — [RE]. — **Lingva Respondo 1907**: „Ekstr" povas esti ne sole adverba, sed ankaŭ adjektiva. [LR 23, let. al Cart (1907-02-24) O.V. p. 539].

ekstrakt' [OA 1] extrait | extract | Extrakt | экстрактъ | ekstrakt. — [RE].

ekstrem' - extrême | extreme | äusserst {legu: äußerst} | крайній | skrajny, ostateczny. — [RE].

ekvaci-o [OA 2.2] équation | equation | Gleichung (Math) {MAT} — [Beau] équation. [EG 1].

Ekvadoro [OA 8] {GEO}

ekvator' [OA 1] * équateur | equator | Aequator {legu: Äquator} | екваторъ {de 1918: екватор} | rownik. — [RE].

ekvilibr-o [OA 2.2] équilibre | equilibrium | Gleichgewicht. — [Beau] équilibre. [EG 1].

Ekzakt-a, [OA 4] {fr} exact (qc) | {en} exact (math.) | genau {ankaŭ: exakt} | {it} esatto (mat.) | {es} exacto (mat.) | {pt} exato | {ca} exacte | tute precize ĝusta, tute konforma al la diro. {MAT} — [EG 2] (math.) exakt, genau.

ekzamen' - éprouver, examiner | try, examine | prüfen | испытывать | egzaminować. — [AK] {en} examine, test. — [RE].

ekzekut' - exécuter | execute | hinrichten | казнить | tracić, wykonywać wyrok. — [AK] {en} execute, put to death. — [RE].

ekzem' [OA 1] * eczema {pres-eraro, legu: eczéma} | eczema | Ekzem, Hautausschlag | экзема | egzema. — [Beau] eczéma. [EG 1].

ekzempl' - exemple | example | Beispiel | примѣръ | przykład. — **ekzemplo** - exemple | example | Beispiel | примѣръ | przykład [FE 27]. — [UL] — ... oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. ... Ekzemploj: skribtablo aŭ skribotablo (= tablo, sur kiu oni skribas) ... [FE 27].

● **ekzemple** - par exemple | e. g. | z. B. | напримѣръ {de 1918: например} | naprzykład {2012: na przykład} [UV, enk. 2]. — La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra) ... [FE 27]. Ekzemple: por esprimi direkton, ni aldonas al la vorto la finon „n" [FE 28]. Ekzemple, ni povas diri "obei al la patro" kaj "obei la patron" (anstataŭ "obei je la patro") [FE 29]. ... ekzemple: ni povas diri "pardoni al la malamiko" kaj "pardoni la malamikon" [FE 29]. Aldonante al la vortoj montraj la vorton „ĉi", ni ricevas montron pli proksiman; ekzemple: tiu (pli malproksima), tiu ĉi (aŭ ĉi tiu) (pli proksima) [FE 30]. Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi-tiea, tieulo, tiamulo k. t. p. (= kaj tiel plu) [FE 30]. La sufikso « um » ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun «um» oni devas lerni, kiel simplajn vortojn. Ekzemple: plenumi, kolumo, manumo [FE 42]. — ... tiel ekzemple la vorto « frat'in'o », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enk. 2].

ekzempler' - exemplaire | exemplar | Exemplar | экземпляръ | egzemplarz. — [AK] {en} copy (*of a book, etc*.). — [RE]. [DL-Ald] ekzemplar- {kun –a-}: ... *mi petas ĉiun, kiu eldonos ion pri la lingvo internacia aŭ en tiu ĉi lingvo, sendi al mi unu ekzemplaron de sia verko.*

ekzerc' - exercer | exercise | üben | упражнять | ćwiczyć. — [AK] {en} practise, exercise (*vb*.). — [RE].

● **ekzerco** — Ekzerco de legado [FE 2] [FE 3] [FE 4]. — **Rim.**: *La titoloj „Ekzerco de legado" mankas en FE, 2-a eld. 1898 kaj estis aldonita por la reeldono en la Fundamento en 1905.*

● **ekzercaro** — Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: 1.) La 16-regula gramatiko; 2) la « Universala Vortaro »; 3) la « Ekzercaro » [A 2.1]. — EKZERCARO de la lingvo internacia « Esperanto » [FE titolo].

ekzil' - bannir, exiler | banish, exile | verbannen | ссылать (въ ссылку) | wyganiać. — [RE].

ekzist' - exister | exist | bestehen, da sein {2012 ankaŭ: existieren} | существовать | istnieć. — [RE].

el - de, d'entre, é-, ex- | from, out from | aus | изъ | z. — **el** - de, d'entre, é-, ex- | from, out from | aus | изъ | z [FE 10]. — [AK 1914] hors de, de, d'entre, é-, ex- | z (z dopełniaczem) [AK]. — [UL] — ... le „de" du superlatif {se traduit} par *el* (d'entre). Ex.: *... mi hav'as la plej bel'a'n patr'in'o'n el ĉiu'j* - j'ai la plus belle mère de toutes. | {mankas en la aliaj lingvoj} [FG 3.4]. — El [FE 2]. — ... kaj el kiuj la plej gravaj estas eldonitaj tre bone kaj zorgeme, sub mia persona kontrolo kaj kunhelpo [A 5.3]. ... estas bone ĉiam peni uzadi nur vortojn el la « Fundamento » [A 7.1]. — El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna [FE 10.18]. El ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa [FE 10.20]. La pli juna filino ... estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi [FE 11.3]. El ŝiaj multaj infanoj unuj estas bonaj kaj aliaj estas malbonaj [FE 12.5]. ... unu minuto konsistas

el sesdek sekundoj [FE 12.12]. Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj [FE 14.15]. ... “ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono.” [FE 15.7]. Kaj kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri grandaj diamantoj [FE 17.3].

● **eldoni** — ... la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn [A3.3].

● **eldonita** — [lernolibroj kaj vortaroj], ... kiuj estas eldonitaj de niaj plej kompetentaj amikoj [A 5.3].

● **eldono** — Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos ... tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2]. ... trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia ... [A4.6].

● **eliri** — “ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono.” [FE 15.7].

● **elĵetita** — ... tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, ... [A 8.3].

● **ellerni** — ... por ke li bone ellernu ... [A 5.4].

● **el’met’** - exposer | expose | ausstellen | выставлять | wystawiać [UV met’].

● **el’parol’** - prononcer | pronounce | aussprechen | произносить | wymówić [UV parol’]. — Kp. Prononc’ [OA 3.1].

● **el’pend’aĵ’** - enseigne | ensign | Aushängeschild | вывѣска | szyld [UV pend’].

● **el’pens’** - inventer | invent | erfinden | изобрѣтать | wymyśleć [UV pens’].

● **el’port’** - supporter | bear, support | ertragen | выносить | znosić [UV port’].

● **elpuŝi** — Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo [A 8.2].

● **elsalti** — Kaj kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri grandaj diamantoj [FE 17.3].

● **el’spez’** - dépenser | spend (expenses) | verausgaben | расходовать | wydawać [UV spez’].

elast’ - élastique | elastic, elastical | elastisch | эластичный | sprężysty, elastyczny. — [AK] {en} elastic. — [RE].

elefant’ - éléphant | elephant | Elephant | слонъ | słoń. {ZOO} — [RE].

elegant’ [OA 1] * élégant | elegant | elegant | изящный | elegancki. — [DL 1888]. *Lia nigra vesto estis el la plej kara ŝtofo, al tio ĉi li portis elegantajn botojn kaj ĉapelon ... [DL 17.23].* {Du pliaj trafoj en DL}.

elegi’ [OA 1] élégie | elegy | Elegie | элегія | elegja. — [RE].

elekt’ - choisir | choose | wählen | выбирать | wybierać. — **elekti** - choisir | choose | wählen | выбирать | wybierać [FE 12]. — [AK] choisir, élire. — [UL] — La sepan tagon de la semajno Dio elektis, ke ĝi estu pli sankta, ol la ses unuaj tagoj [FE 12].

elektr’ [OA 1] * électricité | electricity | Elektrizität | электричество | elektryczność. — [RE].

elektronik/o. [OA 8] Scienco pri la fenomenoj estigataj de liberaj elektronoj kaj tekniko uzanta tiajn fenomenojn. — A. electronics, F. l’électronique, G. Elektronik, H. {es} electrónica, I. {it} elettronica, P. {pt} eletrónica {en Brazilo: eletrônica}.

element’ [OA 1] * élément | element | Element | элементъ | element. — [RE].

elf-o [OA 2.1] {MIT} — [EG 1] **elf-o**, Elf.

eliksir’ [OA 1] * élixir | elixir | Elixier | элексиръ | eliksir. — [EG 1].

elips’ [OA 1] * ellipse (géom.) | ellipse | Ellipse | эллипсисъ | elipsa. {MAT} — [Beau] ellipse (math.). [EG 1].

Elizabeto — Petro, Anno kaj Elizabeto estas miaj gefratoj [FE 36, mankas en UV]. — **Elizabet’** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (virina antaŭnomo)

elizi’ [OA 1] élision | elision | Elision | выпущеніе (гласной) | usunięcie. — [EG 1] **elizi-i**, elidieren; **-o**, Elision.

elokvent’ - éloquent | eloquent | beredt | краснорѣчивый | krasomówny. — [RE].

em’ - qui a le penchant, l’habitude; ex. babil’ babiller - babil’em’ babillard {(ark.), en 2012: bavard} | inclined to; e. g. babil’ chatter - babil’em’ talkative | geneigt, gewohnt | склонный, имѣющій привычку; напр. babil’ болтать - babil’em’ болтливый | skłonny, przyzwyczajony; np. babil’ paplać - babil’em’ gaduła. — **em** - qui a le penchant, l’habitude; ex. babili babiller - babilema babillard {(ark.), en 2012: bavard} | inclined to; e.g. babili chatter - babilema talkative | geneigt, gewohnt; z.B. babili plaudern - babilema geschwätzig | склонный, имѣющій привычку; напр

[FE 19]. babili болтать - babilema болтливый | skłonny, przyzwyczajony; np. babili paplać - babilema gadula [FE 19]. — [AK 1914] –haft, geneigt (babilem- = schwatzhaft)

● **agres/em/a**. [OA 9] Ĉiam preta ataki, aŭ inklina kutime ataki, eĉ ne provokite.

● **babil'em'** - babillard {(ark.), en 2012: bavard} | talkative | {germana mankas} | болтливый | gaduła [UV em']. — **babilema** - babillard {(ark.), en 2012: bavard} | talkative | geschwätzig | болтливый | gadula [FE 19 em']. — [AK 1914] schwatzhaft. — Lia edzino estas tre laborema kaj ŝparema, sed ŝi estas ankaŭ tre babilema kaj kriema [FE 41].

● **kriema** - Lia edzino estas tre laborema kaj ŝparema, sed ŝi estas ankaŭ tre babilema kaj kriema [FE 41].

● **laborema** - Lia edzino estas tre laborema kaj ŝparema, sed ŝi estas ankaŭ tre babilema kaj kriema [FE 41].

● **pardonema** - tamen li estas tre pardonema, li ne portas longe la koleron kaj li tute ne estas venĝema [FE 41 venĝ'].

● **ŝparema** - Lia edzino estas tre laborema kaj ŝparema, sed ŝi estas ankaŭ tre babilema kaj kriema [FE 41].

● **venĝema** - tamen li estas tre pardonema, li ne portas longe la koleron kaj li tute ne estas venĝema [FE 41 venĝ'].

emajl' - email {legu: émail} | enamel | Email {ankaŭ: die Emaille} | эмаль | szmelc, amalia. — [RE].

emancip' [OA 1] émanciper | emancipate | emanzipieren | эманципировать | emancypować. — [EG 2].

embaras' - embarras | embarrassment, puzzle | Verlegenheit | затрудненіе | ambaras. — [AK] {en} embarrassment, perplexity. — Em-ba-rá-so [FE 3]. Embaraso [FE 4]. — [RE].

emblem' [OA 1] emblème | emblem | Emblem, Abzeichen | эмблема | emblemat. — [RE].

embri' - embryon | embryo | Keim | зародышъ | zaród, zarodek. — [RE].

embusk' - embuscade | ambush | Hinterhalt | засада | zasadzka. {MIL} — [RE].

emerit/o. [OA 8] 1. Oficisto, kiu post difinita tempo de servado forlasas honore la oficon kaj ricevadas pension. 2. Pli ĝenerale, persono, kiu retiriĝis de la aktiva vivo. — A. retired person, emeritus; F. un retraité; G. Beamter im Ruhestand, Ruhegehaltsempfänger, (Emeritus); H. {es} jubilado, (emérito); I. {it} pensionato; P. {pt} (funcionário) aposentado, reformado, jubilado. — [EG 2].

Emfaz' [OA 3.2] {en} emphasis | {fr} emphase | {de} Emphase | {es} enfasis | {pt} emphaze {legu: ênfase} | {it} enfasi | {pl} emfaza. — [EG 2].

Emili' - Emili' [UV nj'] {mankas en la angla}. — **Emili'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (virina antaŭnomo).

Eminenc' [OA 3.2] {en} Eminence (title) | {fr} Eminence (titre) | {de} Eminenz | {es} Eminencia | {pt} Eminencia {legu: Eminência} | {it} Eminenza | {pl} --- {traduko mankas}. — [EG 1] **eminenc-o**, Eminenz (Titel).

eminent' - éminent | eminent | vornehm, hervorragend | знатный, выдающійся | znakomity, wydatny. — [RE].

Emoci' [OA 3.2] {en} emotion | {fr} émotion | {de} Gemütsbewegung, seelische Erschütterung {2012 ankaŭ: Emotion} | {es} emocion {legu: emoción} | {pt} emoçao {legu: emoção} | {it} emozione | {pl} emocja. — [EG 1] **emoci-i**, (die Gemüter etc.) erschüttern, bewegen.

Empiri-o, [OA 4] {fr} expérience (considérée comme base de la philosophie ou de la science) | {en} empirics | {de} Empirie, methodische Erfahrung | {it} esperienza, empiria | {es} empirismo, experiencia (considerada como base de la filosofia ó {pres-eraro, legu: o} de la ciencia) | {pt} experiência | {ca} empirisme | scienca au filozofia kono akirita per sperto. — [EG 1].

emulsi' [OA 1] * émulsion | emulsion | Samenmilch {2012: ark.}, Emulsion | эмульсія {de 1918: эмульсия} | emulsja.

en - en, dans | in (when followed by the accusative — into) | in, ein- | въ | w. — **en** - en, dans | in | in, ein- | въ | w [FE 10]. — [UL]. — ... komitato, ..., havos la rajton fari en la fundamento ... ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, ... [A 1.2]. ... fari en nia Fundamento ... ŝanĝon! [A 1.4]. ... la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus la komenco de nia morto [A 1.5]. ... ĉiu regnano sciu, ke li … devas obei … fundamentajn leĝojn …, en kiuj neniu havas la rajton fari … ian ŝanĝon aŭ aldonon [A 3.1]. … ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas

en ĉio sin gvidi [A 3.3]. ... eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, … [A 3.3]. … ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj [A 3.4]. Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardataj kiel oficialaj [A 3.5]. … la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti netuŝeblaj [A 4.1]. … ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (precipe en la angla parto) tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2]. … mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe; … ŝanĝo, … kiu en verko fundamenta ne povas esti tolerata [A 4.3]. — En [FE 2].

— **Lingva Respondo 134 de 1905 [Pri „en“]**: El la frazoj, pri kiuj vi demandis min, mi pensas, ke la plej bona estas: „Oni parolas en Esperanto“; tiun ĉi modelon vi povas rekomendi al ĉiuj komercistoj [Let. al Michaux de 1905-05-09, L.Z. I, p. 150].

— **Lingva Respondo 1908 [Pri la akuzativo post „en“]**: Vd. je „tra“.

— **Rim.**: Kp. ĉe, sur.

enciklopedi-o [OA 2.1] — [RE]. [Beau] encyclopédie.

-end’ [1952] - kiu devas esti -ata pro materia au morala trudo; kiun oni estas devigata –i.

— **Rim.**: La decido pri Oficialigo estas publikigita en Scienca Revuo 1952/2-3, p. 46 (de 15-11-1952) kun jena teksto:

„OFICIALA INFORMO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO.

(N-ro 19 - Julio 1952).

Oficialigo de la sufikso -end.

Post pristudo kaj voĉdonado la Akademio decidis oficialigi la sufikson -end kun la difino:

„kiu devas esti -ata pro materia au morala trudo; kiun oni estas devigata -i“.

Ir. J.R.G. ISBRUCKER, Prezidanto.“

Erara pri la jaro de Oficialigo (malĝuste 1953 anstataŭ ĝuste 1952) estas la informo de Waringhien en siaj esperantologiaj eseoj „Lingvo kaj Vivo“ (1-a eld. Antverpeno: Régulo 1959, p. 222-224, 2-a eld. Rotterdam: UEA 1989) kaj en PAG, 4-a eld. 1980, § 350. En PAG legeblas: „**Enda**, oficialigita de la Akademio en 1953, havas la sencon: *kiu devas esti –ata pro materia aŭ morala trudo*; *kiun oni estas devigita -i*. ...“. Tiu misinformo poste estas plurloke ripetita. Ekzemple Vilborg skribas en sia Etimologia Vortaro (vol. 5, 2001, p. 156): „-end’ estas „oficialigita de la Akademio en 1953; ne ĉe Zamenhof. ...; antaŭe „kiu estas nepre ... -ota“, „kiu devas esti ... –ata“.

La jaron antaŭe oficialigitan elementon **-end** Waringhien pretervidis, kiam li en oktobro 1953 finis la manuskripton de la Suplemento al la Plena Vortaro (PVS - pro diversaj malfacilaĵoj en la presejo aperinta nur mallonge antaŭ la somera SAT-Kongreso 1954). En la Antaŭparolo de PVS p. 5 („II. Oficialeco kaj Fontindikoj“) Waringhien asertas, ke li „kun pedanta zorgo“ okaze de la preparo de PVS kontrolis la liston de la Fundamentaj kaj Oficialaj vortoj „laŭ la originalaj dokumentoj: *Fundamento de Esperanto*, la [tiujare] ses *Oficialaj Aldonoj* kaj la *Cirkuleroj* de la Lingva Komitato“ kaj donas longan liston de elementoj, kies indikoj pri oficialeco en PV 1934 estas ĝustigendaj. La elemento –end’ inter ili ne troviĝas, ĝi eĉ ne estas menciita. Senŝanĝe restas la difino el 1934: „Proponata neoficiala sed multe uzata sufikso, signifanta ...“.

Waringhien tiun pretervidon tamen ĝustigis en sia *Grand Dictionnaire* (la tieaj dankoj datitaj de 9-a de Marto 1955). Tie –end’ unuan fojon aperas kiel Oficiala elemento: „*** end**/ (suf.) ...“. La asterisko signifas „montras, ke la radiko aŭ kunmetaĵo sekvanta apartenas al la Fundamento aŭ al unu el la Oficialaj Aldonoj“.

Erara ankaŭ estas la aserto de PIV 2005: **-end**[7]***I.*** Laŭ tio –end’ estas oficialigita per OA 7 de 1958. Fakte en OA 7 –end’ tute ne estas menciita.

Bazo de ĉiuj postaj registriĝoj en vortaroj estas la artikolo en la Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana de Wüster (manuskripto 1918-1920, unua volumo aperita en 1923): **-end-** ... adjektivisches Suffix zur Bildung des Gerundivums. ... Suffix ~ ist stärker verbreitet erst seit etwa 1920 (adjektiva sufikso por formi la gerundivon. La sufikso ~ estas multe uzata nur post ĉ. 1920). De tie ĝin transprenis multaj aliaj vortaroj, ekzemple Christaller, Esperanto-Germana, 2-a eld. 1923, PV 1930 ktp.

endivi-o (*bot.*) [OA 2.1] {BOT} — [EG 1] Endivie.

energi’ — [mankas en UV]. — **energi’** [OA 1] * énergie | energy | Energie | энергія

| energja. — **energi'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. [DL-Ald].

● **energia** — Nia urbo havas bonajn policanojn, sed ne sufiĉe energian policestron [FE 37, mankas en UV]. — [DL-Ald] ... *malgraŭ la disĵeteco de l' laboro (se ĝi nur estos ĉie sufiĉe energia) post la plej mallonga tempo ni vidos, ke nia komuna celo estas alvenita ... [7].*

● **energie** — Tiun ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori kaj kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ... [A 1.5, mankas en UV]. — [DL-Ald] *Oni devas energie kolekti „promesojn", ...* [7.b]. {Plia trafo en DL-Ald}.

enigm' - énigme | puzzle | Räthsel {de 1901: Rätsel} | загадка | zagadka. — [RE].

enket' [OA 1] enquête | inquiry, inquest | Enquete, Umfrage | анкета | анкета | ankieta. — [EG 1].

entomolog' (2) [OA 7]

entomologi-o [OA 2.1] {ZOO} — [Beau] entomologie. [EG 1] Entomologie, Insekten-kunde.

entrepren' - entreprendre | undertake | unternehmen | предпринимать | przedsiębrać. — [RE].

entuziasm' - enthousiasme | enthusiasm | Begeisterung | воодушевленіе | zapał. — [RE].

enu' - s'ennuyer | annoy, weary | sich langweilen | скучать | nudzić się. — [AK] {en} be bored, weary. — [UL].

● **enu'o** - enu'o je la patr'uj'o, regret de la patrie | a longing for one's fatherland | Sehnsucht nach dem Vaterlande | тоска по родинѣ | tęsknota za ojczyzną [FG 14] [kp. Mi sopiras je mia perdita feliĉo (aŭ: mian perditan feliĉon) [FE 29.7].] — **Rim.**: La semantika malakordo inter FG 14 kaj la vortaro en la rusa UL fontas en kroma senco de rusa скучать *skuĉat'*, kiu kun la rusa prepozicio *po* plus lokativo aŭ dativo signifas „sopiri je". De la rusa UL la signifo „sopiro" transiris al la franca, pola kaj germana UL, dum FG 14 restis neadaptita (pli detale vd. EVE).

envi' - envier | envy | beneiden | завидовать | zazdrościć. — [UL].

epidemi' [OA 1] * épidemie | epidemic | Epidemie, Seuche | эпидемія | epidemja. — [RE].

epiderm' [OA 1] épiderme | epidermis | Oberhaut, Epidermis | эпидерма | naskórek. — [EG 2].

Epifani-o [OA 2.1] {RELI} — [EG 2].

epigraf' [OA 1] épigraphe | epigraph | Aufschrift | эпиграфъ | epigraf. — [EG 2].

epigram' [OA 1] épigramme | epigram | Epigramm | эпиграмма | epigramat. — [Beau].

epilepsi' [OA 1] épilepsie | epilepsy | Epilepsie, Fallsucht | эпилепсія | epilepsja. — [RE].

epilog' [OA 1] épilogue | epilogue | Epilog, Schlusswort | эпилогъ | epilog. — [Beau].

episkop' - évêque | bishop | Bischof | епископъ, архіерей | biskup. {RELI} — **episkopo** - évêque | bishop | Bischof | епископъ | biskup [FE 42]. — [RE A]. — El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; la dua: al Lia Grafa Moŝto, Sinjoro P.; la tria: al Lia Moŝto, Sinjoro D. [FE 42.8].

● **episkopa** — El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; ... [FE 42.8].

● **ĉef'episkop'** - archevêque | archbishop | Erzbischof | рхіепископъ | arcybiskup. {RELI} — [RE].

epitet' [OA 1] * épithète | epithet | Epitheton, Beiwort | эпитетъ | epitet. {GRAM} — [Beau].

epizod' [OA 1] épisode | episode | Episode | эпизодъ | epizod. — [Beau].

epok' - époque | epoch | Epoche | эпоха | epoka. — [RE].

epolet' - épaulette | epaulet, shoulder-strap | Achselband | эполетъ | naramiennik. {VEST} — [RE].

epope' [OA 1] épopée | epopee | Epopöe, Heldenlied | эпопея | epopeja. — [Beau]. [EG 1] Epopöe.

er' - marque l'unité; ex. sabl' sable - sabl'er' un grain de sable | one of many objects of the same kind; e. g. sabl' sand - sabl'er' grain of sand | ein einziges; z. B. sabl' Sand - sabl'er' Sandkörnchen | отдѣльная единица; напр. sabl' песокъ - sabl'er' песчинка | oddzielna jednostka; np. sabl' piasek - sabl'er' ziarnko piasku. — **er** - marque l'unité; ex. sablo sable - sablero un grain de sable | one of many objects of the same kind; e. g. sablo sand - sablero grain of sand | ein einziges; z. B. sablo Sand - sablero Sandkörnchen | отдѣльная единица; напр. sablo песокъ - sablero песчинка | oddzielna jednostka; np. sablo

piasek - sablero ziarnko piasku [FE 41]. — [AK 1914] ein einzelnes von ...

● **sabl'er'** - un grain de sable | grain of sand | Sandkörnchen | песчинка | ziarnko piasku [UV er']. — **sablero** - un grain de sable | grain of sand | Sandkörnchen | песчинка | ziarnko piasku [FE 41 er'].

● **fajrero** - Unu fajrero estas sufiĉa, por eksplodigi pulvon [FE 41.18].

— Lingva Respondo 1907: [Pri „ero"]: Efektive estus pli bone, se por la ideo de tempokalkulo ni uzus ian alian vorton anstataŭ "ero", kiu havas jam difinitan signifon en la Universala Vortaro. Sed ĉar la vorto "ero" en la senco de tempokalkulo estas vorto pure internacia, tial laŭ la №15 de nia fundamenta gramatiko ni havas plenan rajton ĝin uzi. Ĉar la "ero" de la Universala Vortaro kaj la "ero" science internacia havas tro malsamajn signifojn, tial ni ne bezonas timi, ke oni ilin iam reciproke konfuzos. Cetere, se la vorto "ero" laŭ la №15 de nia gramatiko estas plene *permesata*, ĝi kompreneble ne estas *deviga*, kaj ni havas plenan rajton uzi anstataŭ ĝi "tempokalkulo" aŭ ion similan, kion proponos niaj specialistoj. [LR 24, Respondo 24, *La Revuo*, 1907, Aŭgusto].

erar' - errer | err, mistake | irren | ошибаться, блуждать | błądzić, mylić się. — **erari** - errer | err, mistake | irren | ошибаться, блуждать | błądzić, mylić się [FE 10]. — [AK] faire erreur, se tromper. — [UL] — Ne, vi eraras, sinjoro: via pano estas malpli freŝa, ol mia [FE 10.17]. — **Rim.**: La franca *errer* signifas vagadi, erar-vagi, ĝuste la franca AK: faire erreur, se tromper.

● **erara** - Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara [A 6.1].

● **erare** - ... sed se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe; ... [A 4.3].

● **eraro** - Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (precipe en la angla parto) tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2]. La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj [A 4.4]. ... jes, ĝi estas eraro, sed ĝi devas resti netuŝebla, ĉar ĝi apartenas al la fundamenta dokumento, ... [A 4.7].— Mi ne farus la eraron, se li antaŭe dirus al mi la veron (aŭ se li estus dirinta al mi la veron) [FE 24.8].

● **erareco** - La erareco en la nacia traduko de tiu aŭ alia vorto ne prezentas grandan malfeliĉon, ĉar, komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto [A 4.5].

● **preseraro** — Mi permesis al mi nur korekti la preserarojn [A 4.3].

erik-o [OA 2.2] bruyère | heath | Heidekraut {BOT} — [EG 2].

erinac' - hérisson | hedgehog | Igel | ежъ | jeż. {ZOO} — [RE].

erizipel-o [OA 2.2] erysipèle | erysipelas | Rotlauf {MED} — [RE].

ermen' - hermine | ermine | Hermelin | горностай | gronostaj. {ZOO} — [RE].

ermit' - ermite, solitaire | hermit, solitary | Einsiedler | отшельникъ | pustelnik. — [RE].

Ernesto — El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna [FE 10, mankas en UV]. — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Erneĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilheĉjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38]. — **Ernest'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

Erotik' [OA 3.2] {en} erotic | {fr} érotique | {de} erotisch | {es} erotico | {pt} erotico {legu: erótico} | {it} erotico | {pl} erotyczny. — [Beau].

erp' - herser | harrow | eggen | боронить | bronować. — [AK] {en} harrow (*vb*.) — [RE].

Erudici' [OA 3.2] {en} erudition | {fr} érudition | {de} Gelehrsamkeit | {es} erudicion {legu: erudición} | {pt} --- {traduko mankas, estu: erudição} | {it} erudizione | {pl} erudycja.

Erupci' [OA 3.2] {en} eruption | {fr} éruption | {de} Eruption, Vulkanausbruch | {es} erupcion {legu: erupción} | {pt} erupçao {legu: erupção} | {it} eruzione | {pl} --- {traduko mankas}. — [EG 1].

eŝafod' - échafaud | scaffold | Schaffot | эшафотъ | rusztowanie. — [RE].

escept' - excepter | except | ausschliessen {legu: ausschließen}, ausnehmen | исключать | wykluczać. — [UL].

esenc' - être, essence | essence | Wesen | сущность | islota, treść. — [RE].

eskadr' - escadre | squadron | Geschwader | эскадра | eskadra {MIL}. — [MV].

eskap/i. [OA 8] Liberigi sin de tio, kio katenas; sukcese eviti per forkuro. — A. to escape; F. échapper, s'échapper; G. entspringen, entwischen, entlaufen, entschlüpfen; H. {es} escapar, escaparse; I. {it} sfuggire, P. {pt} escapar. — PV, ne uzita de Z.

eskort-o [OA 2.1] {MIL} — [EG 1] Eskorte, Bedeckung.

esper' - espérer | hope | hoffen | надѣяться | spodziewać się. — [UL]. — **Rim.**: En UL ru kaj UL pl: sper- (sen vort-komenca e-).

● **mal'esper'** - désespérer | despair | verzweifeln | отчаяваться | rozpaczać.

Esperanto — Esperant' {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (nomo de lingvo). {NOM} — FUNDAMENTA GRAMATIKO DE LA LINGVO ESPERANTO EN KVIN LINGVOJ [FG titolo]. — Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj plenan sendanĝerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj, ... [A 1.2]. ... sed ĝis tiu tempo la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa ... [A 1.3] Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto ... [A 2.1]. Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li, ... [A 2.2] ... li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto [A 2.3]. ... la aŭtoro de Esperanto ... [A 3.3]. ... fundamento por Esperanto ... [A 3.3]. ... la aŭtoro de Esperanto ... [A 3.4]. ... la libro «Fundamento de Esperanto» ... [A 3.5]. La « Fundamento de Esperanto » tute ne devas esti rigardata kiel la plej bona lernolibro kaj vortaro de Esperanto [A 5.1]. Kiu volas perfektiĝi en Esperanto ... [A 5.2]. [Pliaj samspecaj trafoj en A, ne registrita tie ĉi]. — Ekzercaro de la lingvo internacia ‚Esperanto' [FE titolo]. — En la lingvo „Esperanto" ni vidas la estontan lingvon de la tuta mondo [FE 22, mankas en UV]. — UNIVERSALA VORTARO DE LA LINGVO INTERNACIA ESPERANTO [UV titolo].

— **Rim**.: [Lingva Respondo 49 (1890): Deveno de la nomo "Esperanto"]. ... La nomo de nia lingvo ne estas elpensita, kaj jen estas ĝia historio:

Eldonante la unuan lernolibron de nia lingvo, mi prenis por mi la pseŭdonimon "Esperanto" la lingvo mem havis nenian propran nomon kaj estis nomata "la lingvo internacia proponita de Esperanto". Pro oportuneco oni komencis uzadi la esprimon "lingvo de Esperanto" (die Esperanto-Sprache); aliaj esprimoj, kiujn kelkaj provis uzadi (ekzemple "la lingvo internacia", "la internacia"), montris sin ne oportunaj kaj ne enfortikiĝis, ĉar ili estis ne bone elparoleblaj, ne memoreblaj por la publiko kaj prezentis nenion difinitan (ĉar sub "lingvo internacia" oni povas egale bone kompreni la Volapükon aŭ aliajn proponitajn projektojn). Baldaŭ montriĝis, ke nur la vorto "Esperanto" (sole aŭ kun aliaj vortoj) klare diferencigas nian lingvon de aliaj, kaj multaj amikoj komencis baldaŭ en siaj leteroj aŭ artikoloj uzadi simple la solan vorton "Esperanto", ekzemple "la afero Esperanto", "skribi en Esperanto" k.s. Tiel iom post iom ellaboriĝis unuvorta nomo de nia lingvo. Vidante, ke mia komenca pseŭdonimo transiris al la afero mem kaj ke ĝi estas tre oportuna, mi baldaŭ tute ĉesis uzadi mian pseŭdonimon, kaj ĝi restis nur kiel nomo por la afero mem. La nomo "Esperanto" estas per si mem tute senlogika; sed en sensignifa kondiĉa nomo kial ni bezonas logikon? - *La Esperantisto*, 1890, p. 60.

● **esperantisto** - Tiun ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori ... [A 1.5]. Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj ... [A 2.1]. ... li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto [A 2.3]. ... ĉiu esperantisto havu la plenan certecon, ke leĝodonanto por li ĉiam estos ne ia persono, sed ia klare difinita verko [A 3.2]. [Pliaj samspecaj trafoj en A, ne registritaj tie ĉi].

● **esperantistaro** - ... fari tion ĉi (post matura prijuĝado) povas ne apartaj personoj, sed nur ia centra institucio, kiu

havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro [A 9.4].

esplor' - explorer, rechercher | explore | forschen, untersuchen | изслѣдовать | badać. — [AK] explorer, rechercher, examiner | investigate, explore. — [RE].

esprim' - exprimer | express (vb.) | ausdrücken | выражать | wyrażać. — **esprimi** - exprimer | express | ausdrücken | выражать | wyrażać [FE 28]. — [UL] — Ekzemple: por esprimi direkton, ni aldonas al la vorto la finon „n" [FE 28]. ... sed nur ĉar ni volis esprimi direkton [FE 28].

est' - être (verbe) | be | sein | быть | być. — **esti** - être | be | sein | быть | być [FE 5]. — [UL]. — {Multaj trafoj en A ne registritaj tie ĉi}.

● **esti ~a** — La patro estas sana [FE 5.6]. La ĉielo estas blua [FE 6.3]. Leono estas forta [FE 7.1]. {Multaj pliaj trafoj ne registritaj tie ĉi}.

● **esti ~e** — Resti kun leono estas danĝere [FE 7.5]. "Estus tre bele," respondis la filino malĝentile, "ke mi iru al la fonto!" [FE 19.1]. Morti pro la patrujo estas agrable [FE 20.23]. Ĉu hodiaŭ estas varme aŭ malvarme? [FE 25.13]. Mi staras ekster la domo, kaj li estas interne [FE 26.12].

● **esti ~o** — Leono estas besto [FE 5.2]. — Rozo estas floro kaj kolombo estas birdo [FE 5.3]. — La patro estas tajloro [FE 5.7]. {Multaj pliaj trafoj ne registritaj tie ĉi}.

● **esti kun participo** — Vd. ĉe ant, int, ont, at, it, ot.

● **esti en** — La patro estas en la ĉambro [FE 8.12].

● **esti sur** — La libro estas sur la tablo, kaj la krajono kuŝas sur la fenestro [FE 6.5].

● **estinta** — ... ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj ... [A 1.1].

● **estonta** — ... ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj ... [A 1.1]. ... nia fundamento estas ... la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta [A 1.3]. ... neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj [A 8.3]. — En la lingvo "Esperanto" ni vidas la estontan lingvon de la tuta mondo [FE 22.10]. ... la edziĝa festo estos en la domo de liaj estontaj bogepatroj [FE 39.3].

● **t. e.** - = tio estas [FE 14.7].

— **Lingva Respondo 1911**: Participo-substantivo en Esperanto signifas ordinare *personon* (aŭ objekton, kiu plenumas ian funkcion); se ni deziras doni al la participo alian sencon, ni devas uzi sufikson (ekzemple *aĵ* aŭ *ec*). Tial, laŭ mia opinio, la vorto "estonto" povas signifi nur "estonta persono", sed ĝi ne povas signifi "estonta tempo" aŭ "estonta afero", kiujn mi rekomendus traduki per la vortoj "estonteco" kaj "estontaĵo". [LR 114 A, Respondo 46, *Oficiala Gazeto*, III, 1911, p. 291].

Establ-i, [OA 4] {fr} établir | {en} to establish | {de} errichten, einrichten, anlegen | {it} stabilire | {es} establecer | {pt} estabelecer | {ca} establir. — [EG 2].

estetik' [OA 1] * esthétique | aesthetic | ästhetisch | эстетическій | estetyczny. — [RE].

estim' - estimer | esteem | schätzen | уважать | poważać. — **estimi** - estimer | esteem | schätzen, achten | уважать | szanować [FE 26]. — **estim'** - estimer | [angla mankas] | schätzen | уважать | poważać [UV mal']. — **estimi** - estimer | esteem | schätzen | уважать | poważać [FE 10 mal']. — [AK 1914] achten, schätzen. — [UL] — Se vi scius, kiu li estas, vi lin pli estimus [FE 26].

● **mal'estim'** - mépriser | [angla mankas] | verachten | презирать | gardzić [UV mal'] — **malestimi** - mépriser | despise | verachten | презирать | gardzić [FE 10 mal']. — Ni forte malestimas tiun ĉi malnoblan homon [FE 33].

esting' - éteindre | extinguish | löschen | гасить | gasić. — [UL].

estono [OA 8].

estr' - chef; ex. ŝip' navire — ŝip'estr' capitaine | chief, boss; e.g. ŝip' ship — ŝip'estr' captain | Vorsteher | начальникъ; напр. ŝip' корабль — ŝip'estr' капитанъ | wódz, zwierzchnik. — **estro** - chef | chief | Vorsteher | начальникъ | zwierzchnik [FE 26]. — [RE A]. — [AK 1914] Vorsteher, z.B. ŝip- = Schiff, ŝipestr. = Kapitän. — Mi restas tie ĉi laŭ la ordono de mia estro [FE 26.15].

● **estr'ar'** - gouvernement | government | Obrigkeit | начальство | zwierzchność, władza.

● **policestro** - Nia urbo havas bonajn policanojn, sed ne sufiĉe energian policestron [FE 37.7].

● **provincestro** - Nia provincestro estas severa, sed justa [FE 37.6].

● **regimentestro** - Nia regimentestro estas por siaj soldatoj kiel bona patro [FE 37.12].

● **regnestro** - La regnestro de nia lando estas bona kaj saĝa reĝo [FE 37.4].

● **ŝipestro** - capitaine | captain | {germana mankas} | капитанъ | {pola mankas} [UV estr']. — **estro** - chef | chief | Vorsteher | начальникъ | zwierzchnik [FE 26]. — [RE A]. — [AK 1914] Kapitän. — La ŝipanoj devas obei la ŝipestron [FE 37.1].

estrad' [OA 1] estrade | estrade, platform | Estrade {ark., nun: Podium, Podest}, Rednerbühne | эстрада | estrada. — [Beau]. [EG 1].

et' - marque diminution, décroissance {artikolo postulata: marque la diminution}; ex. mur' mur - mur'et' petit-mur {legu: petit mur}; rid' rire - rid'et' sourire | denotes diminution of degree; e. g. rid' laugh - rid'et' smile | bezeichnet eine Verkleinerung oder Schwächung; z. B. mur' Wand - mur'et' Wändchen; rid' lachen - rid'et' lächeln | означаетъ уменьшеніе или ослабленіе степени; напр. mur' стѣна - mur'et' стѣнка; rid' смѣяться - rid'et' улыбаться | oznacza zmniejszenie, zdrobnienie lub osłabienie stopnia; np. mur' ściana - mur'et' ścianka; rid' śmiać się - rid'et' uśmiechać się. — **et** - marque diminution, décroissance {artikolo postulata: marque la diminution}; ex. muro mur - mureto petit mur; ridi rire - rideti sourire | denotes diminution of degree; e. g. ridi laugh - rideti smile | bezeichnet eine Verkleinerung oder Schwächung; z. B. muro Wand - mureto Wändchen; ridi lachen - rideti lächeln | означаетъ уменьшеніе или ослабленіе степени; напр. muro стѣна - mureto стѣнка; ridi смѣяться - rideti улыбаться | oznacza zmniejszenie lub osłabienie stopnia; np. muro ściana - mureto ścianka; ridi śmiać się - rideti uśmiechać się [FE 26].

● **arbeto** - Mi ne pendigis mian ĉapon sur tiu ĉi arbeto; sed la vento forblovis de mia kapo la ĉapon, kaj ĝi, flugante, pendiĝis sur la branĉoj de la arbeto [FE 39.12].

● **arb'et'aĵ'** - arbrisseau, buisson | shrub, bush | Strauch | кустъ | krzak.

● **bastoneto** - ... bastoneto, sur kiu oni tenas plumon por skribado, estas plumingo [FE 40.16].

● **benketo** — Mi sidas sur seĝo kaj tenas la piedojn sur benketo [FE 26.7].

● **boteleto** — En tiuj ĉi boteletoj sin trovas diversaj acidoj: vinagro, sulfuracido, azotacido kaj aliaj [FE 35.6].

● **dormeti** — Li sidas apud la tablo kaj dormetas [FE 38.5].

● **fal'et'** - broncher {uzata nur por ĉevaloj; ĝenerale: trébucher} | stumble | stolpern | спотыкаться | potknąć się.

● **glaseto** — Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo [FE 34.10].

● **heroeto** — He-ro-é-to [FE 3].

● **kapsik/et/o**. [OA 9] Malgranda ordinare tre akra kapsiko *2*. {BOT}

● **koketo** — Ko-ké-to [FE 2, eble ankaux al koket'].

● **lag'et'** - étang | pond | Teich | прудъ | staw.

● **majuskl/et/o**. [OA 9] Litero (en alfabeto posedanta majusklojn kaj minusklojn) majuskloforma sed malpli alta ol normala majusklo de la sama serio (proksimume samalta kiel la plej malaltaj minuskloj).

● **malsaneta** - [FE 42.12].

● **malvarmeto** - En somero ni trovas malvarmeton en densaj arbaroj [FE 38].

● **monteto** — En nia lando sin ne trovas montoj, sed nur montetoj [FE 38.2].

● **mord'et'** - ronger | gnaw | nagen | грызть | gryźć.

● **mur'et'** – petit-mur {legu: petit mur} | [angla mankas] | Wändchen | стѣнка | ścianka [UV et']. —**mureto** - petit mur | [angla mankas] | Wändchen | стѣнка | ścianka [FE 26 et'].

● **peceto** - Mi disŝiris la leteron kaj disĵetis ĝiajn pecetojn en ĉiujn angulojn de la ĉambro [FE 42.3].

● **rid'et'** - sourire | smile | lächeln | улыбаться | uśmiechać się [UV et']. — **rideti** - sourire | smile | lächeln | улыбаться | uśmiechać się [FE 26 et'].

● **rideto** — Sur lia vizaĝo mi vidis ĝojan rideton [FE 38.7].

● **seĝeto** - Mi aĉetis por la infanoj tableton kaj kelke da seĝetoj [FE 38].

● **skatoleto** - ... skatoleto aŭ alia objekto, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarujo [FE 40].

● **streketo** — Vortoj, kiuj formas kune unu ideon, estas skribataj kune, sed

dividataj unu de la alia per streketo, tiel ekzemple la vorto « frat'in'o », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enkonduko 2].

● **tableto** - Mi aĉetis por la infanoj tableton kaj kelke da seĝetoj [FE 38].

● **telertuketo** — Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo [FE 34.10].

● **tubeto** — ... tubeto, en kiun oni metas cigaron, kiam oni ĝin fumas, estas cigaringo [FE 40.15].

● **varmeta** — Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3].

● **vojeto** — Mallarĝa vojeto kondukas tra tiu ĉi kampo al nia domo [FE 38.6].

etaĝ' - étage | stage, story (of a house) | Stockwerk, Etage | этажъ | piętro. — [AK] {en} story (*of a house*). — [UL].

etap/o. [OA 8] Haltoloko, kie oni ripozas aŭ tranoktas, kaj ankaŭ distanco inter du tiaj haltolokoj. — A. stage, halting-place, stopover; F. étape; G. Rastort, Etappe; H. {es} etapa; I. {it} tappa; P. {pt} estádio, etapa.

etat' - état | condition | Etat | штатъ | etat. — [AK] état, liste | statement (*finance etc.*) — [RE].

etend' - étendre | extend | dehnen, strecken, ausbreiten | простирать | rospościerać. — [RE].

eter' - éther | ether | Aether {legu: Äther} | эфиръ | eter. — [DL 1888] *... apenaŭ la steloj ekellumis el la klara etero, li eksentis novan vivon [DL 17.2.5].*

● **traetera** — Tra-e-té-ra [FE 3].

etern' - éternel | eternal | ewig | вѣчный | wieczny. — [UL].

etik' [OA 1] étique {pres-eraro, legu: éthique} | ethics | ethisch | этическій | etyczny. — [RE].

etiked/o. [OA 9] Peco de papero aŭ alia materialo kun aŭ por surskribo, alfiksita aŭ alfiksebla sur aŭ al io, por montri enhavon, specon, adreson ktp. — [PV 1930] etikedo = etiketo 3, Karteto, fiksita sur sur objekto, por montri la enhavon, prezon, destinon, adreson ktp. — **Rim.**: Antaŭe etiket-o [OA 3.2], ekz. en [EV 1923] 2. (surpapereto) Etikett, (Aufschrift-) Zettel, (surskribaĵo) Aufschrift.

Etiket' [OA 3.2] {en} etiquette | {fr} étiquette (cérémonie) | Etikette, Zeremoniell | {es} etiqueta (ceremonia) | {pt} etiqueta, cerimonia {legu: cerimônia} | {it} etichetta, cerimoniale | {pl} etykieta. — [RE]. — **Rim.**: Kp. etiked/o [OA 9].

etimolog' (2) [OA 7]

etimologi-o [OA 2.1] — [RE].

etiolog' (1) [OA 7]

etiologi' [OA 1] * étiologie | etiology | Aetiologie {legu: Ätiologie} | этіологія | etjologja. — [Beau]. [EG 1].

etiopo [OA 8] — [EG 1]. Aethiopier {legu: Äthiopier}.

etn/o. [OA 9] Gento. Historie estiĝinta homgrupo, kies vivmanieron karakterizas komunaj trajtoj kulturaj, civilizaciaj aŭ religiaj, kaj kiu konscias pri tiu komuneco. (Komunaj lingvo, lando aŭ socipolitika strukturo estas ofta, sed ne nepra trajto de etno. Kontraste al *gento*, *etno* ne insistas pri deveno de komunaj prauloj, fikciaj aŭ realaj.) — [PIV 1970].

etnograf' (2) [OA 7]

etnografi-o [OA 2.1] — [Beau] [EG 1].

etnologi/o. [OA 9] Scienco pri la homaj etnoj kaj iliaj diferencoj (uzanta faktojn kolektitajn per etnografio); socia kaj kultura antropologio. — [EG 1] Ethnologie.

etos/o. [OA 9] Reganta humoro aŭ spirita atmosfero kreata de ĉeestantaj homoj, ĉirkaŭaĵo, cirkonstancoj aŭ artaĵo: *la etoso en la oficejo estas streĉa*; *la spektaklo/muziko kreis agrablan etoson*. — [GD 1955] atmosphère (f), climat (f), ambiance. [PIV 1970].

eŭfemism/o. [OA 9] Evitvorto, evitesprimo. Vorto aŭ esprimo uzata por mildeco anstataŭ diraĵo, kiu povas esti rigardata kiel tro kruda, tro malagrabla, tro sankta aŭ simile: *"kuŝi" estas eŭfemismo por "seksumi"*; *"etna purigado" estas eŭfemismo por "popolmurdo"*; *la vorto "necesejo" estas eŭfemismo*. — [EG 1] Euphemismus.

eŭkalipt/o. [OA 9] Ĉiamverda rapidkreska arbo indiĝena en Aŭstralio, kun tre alta trunko kaj kun folioj enhavantaj oleon fortodoran kaj seninfektigan, kreskigata por medikamenta kaj papera industrioj. (*Eucalyptus*.) — [EV 1923] [PV 1930].

Eŭkaristi-o [OA 2.1] {RELI} — [Beau]. [EG 1] Eucharistie.

eŭnuk-o [OA 2.1] — [RE]. [EG 1] Eunuch, Verschnittener {ark.}. [EG 2] Eunuch.

eŭr/o. [OA 9] Monunuo de Eŭropa Unio: *centono de eŭro estas cendo*; *ĝi kostas dek eŭrojn kaj kvindek cendojn*. — [PIV 2002]. {la mono ekzistas nur de 1999; antaŭe ankaŭ eŭro-o}

Eŭropo — Eŭ-ró-po [FE 3, mankas en UV]. — **Eŭrop'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (nomo de kontinento). — [DL 1888]: *Hispanujo estas parto de Eŭropo [DL 15.11].*

Evangeli' [OA 1] * Evangile | Gospel | Evangelium | евангелие | ewangielja. {RELI} — [Beau]. [EG 1].

event/o. [OA 8] Difinita, sufiĉe grava okazaĵo. — A. event; F. événement (marquant) {de 1990: évènement}; G. Ereignis, Vorkommen, Vorkommnis, Begebenheit, Geschehen, Geschehnis; H. {es} evento, (acontecimiento imprevisto); I. {it} avvenimento, evento; P. {pt} evento, (acontecimento importante).

eventual' [OA 1] éventuel | eventual | eventuell | эвентуальный | ewentualny. — [EG 1] etwaig, eventuell.

evident' [OA 1] * évident | evident | augenscheinlich {pli moderna: evident} | очевидный | oczywisty. — [Beau]. [EG 1] evident, augenscheinlich, offenbar.

evit' - éviter | avoid | meiden, ausweichen | избѣгать | unikać. — [RE].

Evoluci' [OA 3.2] {en} evolution | {fr} évolution | {de} Evolution, Entwicklung | {es} evolucion {legu: evolución} | {pt} evoluçao {legu: evolução} | {it} evoluzione | {pl} --- {traduko mankas}. — [Beau] évolution. [EG 1] Entwicklung, Evolution. **~i**, sich entwickeln. — **Rim.**: Kp. evolu-i [OA 2].

evolu-i [OA 2.1] — **Rim.**: Kp. evoluci' [OA 3].

ezofag' [OA 1] œsophage | oesophagus | Speiseröhre, Schlund | пищепроводъ | gardziel. {ANAT} — [EG 1].

ezok' - brochet | pike (fish) | Hecht | щука | szczupak. {ZOO} — [RE].

F

Ff - f | f as in "fly" | f | ф | f [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **f** ... [FE 1]. — **f** [OA 7] = nomo de la litero f, sepa litero de la Esperanta alfabeto. — Lingva Respondo 56 (1893) [Pri la nomoj de la literoj]. La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

fab' - fève | bean | Bohne | бобъ | bób, fasola. — [RE].

fabel' - conte | tale, story | Mährchen {de 1901: Märchen} | сказка | bajka. — [RE]. [DL] mir-rakont-o.

fabl' - fable | fable | Fabel | басня | baśń. — [RE].

fabrik' - fabrique {eksmoda, en 2012: usine} | fabric | Fabrik | фабрика | fabryka. — [AK] {en} make, manufacture — [DL] *Li estas direktoro en fabriko de tabako* [DL 7.15]. [RE]. — **Rim**.: Malsame ol rusa, germana, franca kaj pola, kiuj ĉiuj tradukas per substantivoj, nur la angla AK tradukas per verboj. Ĝusta angla traduko: *factory* (same jam Albault, 1963, p. 319). AV notas je 2012-07-05: „La Angla traduko "fabric" en UV estas malĝusta. En la Akademiaj Korektoj de la Universala Vortaro aperis la Angla traduko "make, manufacture". Bedaŭrinde ankaŭ tiu traduko estas malĝusta. En la Baza Radikaro Oficiala la Akademio nuligis tiun miskorekton, sed ne donis novan pli bonan Anglan tradukon de FABRIK/. Tial aperas nun en la Akademia Vortaro nenia Angla traduko de FABRIK/. Ĝusta traduko tamen povas esti „factory"." La klarigo de AV („nuligis") referencas al piednoto 2 de BRO: „Fabriko estas ejo; la angla "Akademia Korekto" (F-to, 9-a eld., p. 253) estas erara."

fac/o. [OA 8] Ordinare, ebena parto de surfaco de objekto, limita de pli-malpli difinita figuro; *~o de glitvalvo, de martelo, de amboso, de osto*. — A. face (of an object); F. face (d'un objet); G. Seite, Fläche; H. {es} faz, frente; I. {it} faccia, P. {pt} face (mat.). — [EV 1923] {ne ĉe Z.}.

facet' - facette | facet | Facette | грань | grań. — [RE].

facil' - facile | easy | leicht | легкій | łatwy, lekki. — **facila** - facile | easy | leicht | легкій | łatwy, lekki [FE 18]. — [UL] — Fací-la [FE 2]. Facila [FE 4].

● **facile** — ... komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto [A 4.5]. — Oni ne forgesas facile sian unuan amon [FE 18.19]. Al homo, pekinta senintence, Dio facile pardonas [FE 22.4]. En malbona vetero oni povas facile malvarmumi [FE 42.12].

● **facilanima** — ... ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj [A 1.1].

● **facilanime** — ... ni devas tion ĉi fari ne facilanime, sed nur en okazoj de efektiva neceseco [A 9.3].

faden' - fil | thread | Faden (zum Nähen etc.) | нить | nić. — [AK] {en} thread (*a*). — [UL].

● **metal'faden'** - fil de métal | thread, wire | Draht | проволока | drut. — [AK] {en} wire.

fag' - hêtre | beech-tree | Buche | букъ | buk. {BOT} — [RE].

Fagot-o, [OA 4] {fr} basson | {en} bassoon, fagotto | {de} Fagott, Basspfeife | {it} fagotto | {es} fagot | {pt} fagote | {ca} fagot. {MUZ} — [ER].

fajenc' - faïence | delft ware | Fayence | фаянсъ | fajans. — [AK 1914] earthenware, crockery | Fayence, Halbporzellan. — [RE].

fajf' - siffler | whistle | pfeifen | свистать | świstać. — **fajfi** - siffler | whistle | pfeifen | свистать | świstać [FE 34]. — [AK] {en} whistle (*vb*.). — [UL]. — ... per fajfilo ni fajfas [FE 34.8].

● **fajfilo** - ... per fajfilo ni fajfas [FE 34.8].

fajl' - limer | file | feilen | пилить | piłować. — [AK] {en} file (*vb*.). — [RE].

fajr' - feu | fire | Feuer | огонь | ogień. — **fajro** - feu | fire | Feuer | огонь | ogień [FE 41]. — [UL].

● **fajrero** - Unu fajrero estas sufiĉa, por eksplodigi pulvon [FE 41.18].

fak' - compartiment, branche | drawer, department | Fach | разгородка, отдѣленіе | przegródka. — [AK] compartiment, branche, spécialité | department, compartment. — [MV].

fakir-o [OA 2.1] — [Beau] [EG 1].

faksimil' [OA 1] fac-simile {legu: fac-similé} | facsimile | Faksimile | факсимиле | faksymile. — [EG 1].

fakt' [OA 1] * fait | fact | Tatsache | фактъ | fakt. — [1888] [RE].

faktor-o [OA 2.1] — [RE]. [EG 1] Faktor.

faktur' - facture | bill of lading | Factur, Frachtbrief | накладная | faktura. — [AK 1914] invoice | Rechnung, Faktura {2012: Faktura (ark.)}. — [RE].

fakultat' [OA 1] * faculté | faculty (of a University) | Fakultät | факультетъ | fakultet. — [RE].

fal' - tomber | fall | fallen | падать | padać. — **fali** - tomber | fall | fallen | падать | padać [FE 22]. — [UL]. — Fá-li [FE 2]. — Promenante sur la strato, mi falis [FE 22.2]. ... unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis [FE 39.11].

● **fal'et'** - broncher | stumble | stolpern | спотыкаться | potknąć się.

● **falinta** — La falinta homo ne povis sin levi [FE 22.6].

● **disfali** — Por ke lingvo internacia ... havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos ... [A 1.1].

● **elfali** — ... dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj [FE 17.8].

● **enfali** — Sablero enfalis en mian okulon [FE 41.16].

falang-o [OA 2.2] (*mil., anat.*) phalange | phalanx | Phalanx, Fingerglied {MIL} {ANAT} — [EG 1] Phalanx.

falbal' - falbala | furbelow | Falbel | фалбала | falbana. {VEST} — [AK] {en} flounce, furbelow. — [RE].

falĉ' - faucher | mow, cut grass | mähen | косить | kosić. — [RE].

● **falĉ'il'** - faux | scythe | Sense | коса (для травы) | kosa.

fald' - plier | fold | falten | складывать (въ складки) | fałdować. — [AK] {en} fold, pleat (*vb*.). — [UL].

falk' - faucon | falcon | Falke | соколъ | sokół. {ZOO} — [RE].

fals' - falsifier | falsify | fälschen | фальшивить, поддѣлывать | fałszować. — [RE].

fam' - bruit | fame, rumour | Gerücht | молва | pogłoska. — [AK] bruit, renommée | rumour, report, fame. — [RE].

famili' - famille | family | Familie | семейство | rodzina. — [UL].

familiar-a [OA 2.1] — [EG 1] familiär. [EG 2].

fanatik-a [OA 2.1] — [RE].

fand' - fondre | melt, cast | giessen {legu: gießen}, schmelzen | топить, растоплять | roztapiać. — [AK] {en} melt, smelt (*vb.*). — [RE].

fanfar-o [OA 2.1] {MUZ} — [EG 1] Fanfare, Tusch. [EG 2].

fanfaron' - se vanter, faire le glorieur | boast, brag | prahlen | хвастать | przechwalać się.

fantazi' [OA 1] * fantaisie | fancy, fantasy | Phantasie {de 1996 ankaŭ: Fantasie} | фантазія {de 1918: фантазия} | fantazja. — [DL 1888] Sed mi esperas, ke jam post la dua aŭ la tria kajero la leganto vidos, ke mi ne fantazias [DL A 5] {Du pliaj trafoj en DL}. [DL-Ald] Mi ripete turnas la okulojn de l' amikoj sur tiun ĉi punkton, ŝajne fantazian, sed efektive tre gravan [7b]. [RE].

fantom' - spectre, fantôme | vision, ghost | Gespenst | привидѣніе | widmo, upiór. — [AK] {en} phantom, spectre. — [RE].

far' - faire | do | thun, machen | дѣлать | robić, czynić. — **fari** - faire | do | thun, machen | дѣлать | robić [FE 12]. — [AK] {en} do, make. — [UL]. — Du homoj povas pli multe fari ol unu [FE 12.1].

● **fari** {adicio} — Kvin kaj sep faras dek du [FE 12.6]. Dek kaj dek faras dudek [FE 12.7]. Kvar kaj dek ok faras dudek du [FE 12.8]. Tridek kaj kvardek kvin faras sepdek kvin [FE 12.9]. Sesdek minutoj faras unu horon, kaj unu minuto konsistas el sesdek sekundoj [FE 12.12]. Mil jaroj (aŭ milo da jaroj) faras miljaron [FE 14.5].

● **fari botojn** — La botisto faras botojn kaj ŝuojn [FE 37.13].

● **fari ĉion / kion / tion** — ... ni devas tion ĉi fari ne facilanime, sed nur en okazoj de efektiva neceseco [A 9.3]; ... fari tion ĉi (...) povas ne apartaj personoj, sed nur ia centra institucio, ... [A 9.4]. Li faris ĉion per la dek fingroj de siaj manoj [FE 12.4]. ... li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola kaj pro kio ŝi ploras [FE 21.7]. Ho, Dio! kion vi faras! [FE 26.22]. Li tuj faris, kion mi volis, ... [FE 31.14]. Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, kion fari [FE 38.10].

● **fari donacon** — „Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas fari al vi donacon“ [FE 15.5]. „Mi faras al vi donacon,“ daŭrigis la feino, „ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono.“ [FE 15.7]. ... mi faras al vi donacon, ... [FE 19.10].

● **fari eraron** — Mi ne farus la eraron, se li antaŭe dirus al mi la veron (aŭ se li estus dirinta al mi la veron) [FE 24.8].

● **fari kontrakton** — Ni faris la kontrakton ne skribe, sed parole [FE 31.9].

● **fari objektojn** — La lignisto vendas lignon, kaj la lignaĵisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn [FE 37.14].

● **fari plezuron** — Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito faris al li plezuron [FE 20.6].

● **fari ŝanĝojn** — ... aŭtoritata komitato, ..., havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, ... [A 1.2] Neniu persono ... devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon! [A 1.4]. ... neniu havas la rajton fari arbitre laŭ persona bontrovo ian ŝanĝon aŭ aldonon [A 3.1]. ... la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, ... [A 4.6]. ... neniu havas la rajton fari ian ŝanĝon [A 4.7].

● **fari serion** — ... el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj [FE 30.2].

● **fari vortojn** — ... el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ... [FE 30.10].

● **farita** — Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35.13].

● **far'iĝ'** - devenir (se faire) | become | werden | дѣлаться | stawać się. — ... la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, kiuj laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de longe fariĝis fundamento por Esperanto, ... [A 3.3]. ... la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, ... [A 8.2]. — ... ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si; ... [FE 23.4]. La juna vidvino fariĝis denove fianĉino [FE 33.22].

● **fariĝadi** — ... tiu perfektiĝado fariĝados ne per ... rompado ..., sed per vojo natura, ... [A 6.4].

— **OI 5 de Julio 1986 [Pri „de“, „fare de“, „far“]**: Esprimo de la aganto en komplementa funkcio *

1. Post ita/ata/ota-vorto, la aganto estas indikita per DE. Ekz-e, ŝi estas amata de ĉiuj (6-a Regulo de la Fundamenta Gramatiko).

2. Post o-vortoj DE povas indiki la aganton, se neniu alia koncernato estas ebla. Ekz-e, la kanto de la birdoj, la projekto de la inĝenieroj (Fundamento), la parolado de la oratoro, k.s.

3. Por indiki la aganton post o-vortoj en aliaj kazoj, la plej ĝenerale akceptita formo estas FARE DE. Ekz-e, la akcepto de la kongresanoj fare de la urbestro; la traduko de Hamleto fare de Zamenhof.

La Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko
Michel DUC GONINAZ
La Prezidanto de la Akademio
D-ro André ALBAULT

*) Julio 1986, C. 152, Aldono A; vd. La Letero de l'Akademio, n-ro 1, Oktobro 1987.

Oni cetere notu jenon:

La voĉdonota teksto (C. 151, Aldono B) entenis jenan kvaran artikolon:

4. La uzo de FAR en la sama funkcio estas ankaŭ akceptebla. Ekz-e, la akcepto de la kongresanoj far la urbestro.

Sed dum la tri unuaj artikoloj estis akceptitaj de granda plimulto, la kvara ricevis nur unu voĉon super la tiama absoluta plimulto: neniu povas do pretendi, ke la Akademio rifuzis la prepozicion FAR, des pli ke la artikolo 3 aludis aliajn formojn ol FARE DE.

Tamen la pozitive voĉdoninta Prezidanto decidis apliki la regulon de la 2/3 al tiu demando, kiel al lingva novaĵo (art. 23 de la Statuto); efektive li volis per tio eviti senfinajn diskutojn, ĉar pluraj forte deklaris sian oponon al oficialigo de FAR, pro tio ke estas tute nekutime retroderivi kaj krei prepozicion el "verba radiko" aŭ el kiu ajn alia radiko; aliaj dume kaj ne malpli forte subtenis la ideon, ke por tiu evidenta kaj escepta bezono la lingvo sukcesis krei al si oportunan kaj taŭgan rimedon el si mem, t.e. sen elekstera deprunto.

Aliparte la Direktoro de la Gramatika Sekcio kontestis, ke temas pri lingva novaĵo.

farb/o. [OA 8] Materio, ordinare likva, uzata por ŝmiri surfacon en la intenco ĝin ŝirmi aŭ ĝin kolorigi: *~o el minio; blanke~ita kradaĵo*. — A. paint; F. {aldonu: peinture,} matière colorante, colorant; G. Farbe, Farbstoff, Färbemittel; H. {es} materia colorante, colorante; I. {it} materia colorante, colorante; P. {pt} tinta (para pintar). — [Kabe] Substanco koloranta, uzata en la pentrarto, tekniko k. t. p.: *karmino*. {antaŭe kolor/il/o [EG 2]}.

farĉ/o. [OA 9] Hakita (kaj spicita) viando, legomaĵo aŭ fruktaĵo, kiun oni enmetas en la internon de kuirota manĝaĵo. — [PV 1930]. [Kabe 1910]: **Farĉo.** Hakita kaj spicita viando, kiun oni metas en la internon de legomo, fiŝo k. t. p. **Farĉi.** Plenigi per farĉo: *farĉita brasiko*.

● **farĉ/i**. [OA 9] Plenigi la internon de manĝaĵo per farĉo: *farĉi anseron per prunoj kaj pomoj*; *farĉi tomatojn*; *bovo farĉita per anasoj kaj kokinoj*; *farĉitaj terpomoj*. — [ER 39] начинять {verba radiko, ne substantiva kiel en OA 9, laŭvorte „plenigi ion“}. [Fab I, 49] Tri tutaj rostitaj bovoj, farĉitaj per anasoj kaj kokinoj, estis elmetitaj meze de la bazaro, kaj ĉiu havis la rajton detranĉi al si pecon.

faring’ - pharynx | throat | Schlund | глотка | gardziel. {ANAT} — [AK] {en} pharynx. — [RE].

farm’ - affermer | farm | pachten | арендовать | dzierżawić. — [AK] prendre à ferme | take on lease. — [RE A].

funt' - livre | pound | Pfund | фунтъ | funt. {MEZ} — **funto** - livre | pound | Pfund | фунтъ | funt [FE 31]. — [AK] livre (*mesure de pesanteur*). — [RE]. — Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero [FE 31.21].

● **funt'o da viand'o** - a pound of meat [UV da]

furaĝ' - fourrage | forage | Fourrage, Futter | фуражъ | furaź. — [AK 1914] Futter, Verpflegung. — [RE].

furi' [OA 1] * furie (myth.) | Fury | Furie | фурія | furja. {MIT} — [RE].

furioz' - furieux | furious, raging | toll, wüthend {de 1901: wütend} | бѣшенный {de 1918: бешеный} | wściekły. — [RE].

Furor' [OA 3.2] {en} vogue | {fr} fureur, vogue | {de} Furore, rasender Beifall | {es} furore | {pt} furor {ne uzata en Brazilo en tiu senco. Preferinde: moda, voga, sucesso} | {it} furore, voga, gran successo | {pl} --- {traduko mankas}. — [EG 1].

furunk' - furoncle | furuncle | Furunkel | чирей | czyriak {MED}. — [AK 1914] Hautgeschwür, Blutgeschwür. — [RE].

furz/i. [OA 9] Lasi eliri intestajn gasojn el la anuso, kutime kun malagrabla odoro, ofte kun bruo: *la ebriulo senhonte furzis*. — [PV 1930].

fuŝ' - bousiller | bungle, spoil trade | pfuschen | кропать, плохо работать | partaczyć. — [AK] gâcher, saboter, bâcler | bungle, blunder, botch. — [RE].

fusten' - futaine | fustian | Barchent | бумазея | barchan. {ZOO} — [RE].

fut' - pied (mesure) | foot | Fuss (Mass) {legu: Fuß (Maß)} | футъ | stopa. {MEZ} — [AK] {en} foot (*measure*). — [RE].

G, Ĝ

Gg - g dur (gant) | g as in "gun" | g | г | g [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **go** ... [FE 1]. — **go** [OA 7] = nomo de la litero g, oka litero de la Esperanta alfabeto. — **Lingva Respondo 56 (1893)**: La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

Ĝĝ - dj (adjudant) | j as in "join" | dsch | дж | dż [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **ĝo** ... [FE 1]. — **ĝo** [OA 7] = nomo de la litero ĝ, naŭa litero de la Esperanta alfabeto. — **Lingva Respondo 56 (1893) [Pri la nomoj de la literoj]**: Vd. ĉe „Gg".

gad' - merluche | stock-fish | Stockfisch | треска | sztokfisz. {ZOO} — [AK] {en} hake, stockfish. — [RE].

gaj' - gai | gay, glad | lustig, fröhlich | веселый | wesoły. — **gaja** - gai | gay, glad |

lustig | веселый | wesoły [FE 20]. — [UL]. — Ni estu gajaj, ni uzu bone la vivon, ĉar la vivo ne estas longa [FE 20.21]. La Parizanoj estas gajaj homoj [FE 37.5].

gajl' - noix de galle | oak-apple | Gallapfel | чернильный орѣхъ | galas, dębianka. {BOT} — [RE] {kp. [1888] gal/pom/o}.

gajn' - gagner | gain | gewinnen | выигрывать | wygrywać. — [UL].

gal' - bile | gall | Galle | желчь | żółć. {ANAT} — [AK] bile, fiel. — [RE]. — Gá-lo [FE 2].

galaksi/o. [OA 9] Stelamaso (konsistanta tipe el inter milionoj kaj centoj da miliardoj da steloj) plej ofte aspektanta kiel spirala aŭ elipsa nebula astro: *nian galaksion oni nomas "la Lakta Vojo" aŭ simple "la Galaksio"*. {ASTR} — [PIV 1970].

galantin-o [OA 2.1] {KUIR} — [Beau] galantine (charcuterie).

galant-o [OA 2.2] perce-neige | snowdrop | Schneeglöckchen {BOT} — [EG 1].

galanteri' - nippes | millinery | Galanterie-Waare {de 1901: Galanterie-ware} | галантерейный товаръ | towar galanteryjny. — [AK] accessoires de toilette, nouveautés, colifichets | haberdashery, trimmings. — [RE].

galer' [OA 1] * galère | galley | Galeere {2012: Galere} | галера | galera. {MAR} — [EG 2].

galeri' - galerie | gallery | Gallerie {2012: Galerie} | галлерея | galerya. — [RE].

galon' - galon | galloon | Galone | галунъ | galon. — [AK 1914] galloon (*gold or silver lace*) | Gold-, Silberborte, usw. — [RE].

galop' [OA 1] * galop | gallop | Galopp | галопъ | galop. — [RE].

galoŝ' - galoche | rubber-shoe | Galosche | калоша | kalosz. {VEST} — [AK] {en} galosh. — [RE].

gam' - gamme | gammut | Gamme | гамма | gama. {MUZ} — [AK 1914] musical scale, gamut | Tonleiter. — [RE].

gamaŝ' - guêtre | gaiter | Gamasche | штиблетъ | kamasz. {VEST} — [RE].

gangli' [OA 1] ganglion | ganglion | Ganglion, Nervenknoten | ганглій, узелъ (нервный) | węzeł nerwowy. — [Beau] ganglion (méd.).

gangren' [OA 1] gangrène | gangrene | Brand (med.) | гангрена | gangrena. {MED} — [RE A]

gant' - gant | glove | Handschuh | перчатка | rękawiczka. {VEST} — [UL].

garaĝ/o. [OA 8] Konstruaĵo, kie oni tenas, prizorgas aŭ riparas aŭtojn. — A. garage, F. garage, G. Garage; H. {es} cochera, garaje; I. {it} garage, P. {pt} garagem. — [EV 1923] {ne ĉe Z.; antaŭe aŭtomobil/ej/o, aŭtomobil/a remiz/o}.

garanti' - garantir | warrant | bürgen | ручаться | ręczyć. — [AK] garantir, donner des garanties, se porter garant | guarantee (*vb*.). — [RE].

● **garanti'aĵ'** - gage | pawn, pledge | Pfand | залогъ | zastaw.

● **garanti'ul'** - otage | hostage | Geissel {2012: Geisel} | заложникъ | zakładnik.

garb' - gerbe | sheaf, shock | Garbe | снопъ | snop. — [RE].

gard' - garder (prendre soin) | guard | hüten | стеречь, беречь | strzedz. — **gardi** - garder | guard | hüten | стеречь, беречь | strzedz [FE 18]. — [AK] {en} guard, watch over. — [UL]. — La « Fundamento de Esperanto » devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta kontrolilo, kiu gardos lin de deflankiĝado de la vojo de unueco [A 5.5]. Mi montris en principo, kiamaniere la severa netuŝebleco de la « Fundamento » gardos ĉiam la unuecon de nia lingvo, ... [A 9.1]. — Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem; sed ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas [FE 18.14].

● **singarda** — Sed en la praktiko ni (...) devas kompreneble esti tre singardaj kun ĉia « perfektigado » de la lingvo [A 9.2].

ĝarden' - jardin | garden | Garten | садъ | ogród. — **ĝardeno** - jardin | garden | Garten | садъ | ogród [FE 16]. — [UL]. — Ĝar-dé-no [FE 2]. Ĝardeno [FE 4].— Kie estas la knaboj? Ili estas en la ĝardeno [FE 16.8]. Kie estas la knabinoj? Ili ankaŭ estas en la ĝardeno [FE 16.9]. Kie vi estas? Mi estas en la ĝardeno [FE 26.1]. Kien vi iras? Mi iras en la ĝardenon [FE 26.2]. ... „la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon", kaj la vortoj „ĝardenon", „tablon" staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en" kaj „sur" tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri, ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko

flugis al la ĝardeno, al la tablo (ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado) [FE 28.3].

gardeni' [OA 1] gardenia {legu: gardénia} | gardenia | Gardenia | gardenia {evidente tro ofte presita} | гарденія | gardenja. {BOT} — [Beau] gardénia.

gargar' - rincer | rinse | spülen | полоскать | płókać. — [AK] rincer, gargariser | gargle, rinse. — [RE]. — **Lingva Respondo 1907**: „Gargari" = lavi per skuado de la fluidaĵo; sekve oni povas gargari ne sole la gorĝon, sed ankaŭ glason, k.t.p. [LR 27, let. al Cart (1907-02-24) O.V. p. 539].

Garn' [OA 3.1] {en} to garnish | {fr} garnir | {de} garnieren | {es} guarnecer | {pt} garnacer {estu: guarnecer} | {it} guarnire | {pl} garnirowac {legu: garnirować}. — [EG 2].

garnitur-o [OA 2.1] — [Beau] garniture.

garnizon' [OA 1] * garnison | garrison | Garnison | гарнизонъ | garnizon. {MIL} — [EG 2].

garol-o [OA 2.2] geai | jay | Eichelhäher {ZOO} — [EG 2]. [ER] garul/o {kun –ul}.

gas' - gaz | gas | Gas | газъ | gaz. {KEM} — [RE].

gast' - hôte | guest | Gast | гость | gość. — **gasto** - hôte | guest | Gast | гость | gość [FE 18]. — [AK] hôte, convive. — [UL]. — Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn; post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo [FE 18.15]. Mi kredeble ne povos veni al vi hodiaŭ, ĉar mi pensas, ke mi mem havos hodiaŭ gastojn [FE 41.8].

gaz' [OA 1] gaze | gauze | Gaze | газъ (матерія) | gaza. — [Beau] gaze.

gazel' - gazelle | gazel | Gazelle | газель | gazela. {ZOO} — [MV].

gazet' - gazette | gazette, news-paper | Zeitung | газета | gazeta. — [DL 1888] ... *legi gazetojn [DL 17.6.1].* {Dekdu pliaj trafoj en DL}. [RE].

ge' - les deux sexes réunis; ex. patr' père - ge'patr'o'j les parents (père et mère) | of both sexes; e. g. patr' father - ge'patr'o'j parents | beiderlei Geschlechtes; z. B. patr' Vater - ge'patr'o'j Eltern; mastr' Wirth - ge'mastr'o'j Wirth und Wirthin {de 1901: Wirt und Wirtin} | обоего пола, напр. patr' отецъ - ge'patr'o'j родители; mastr' хозяинъ - ge'mastr'o'j хозяинъ съ хозяйкой | obojej płci, np. patr' ojciec - ge'patr'o'j rodzice; mastr' gospodarz - ge'mastr'o'j gospodarstwo (gospodarz i gospodyni). — **ge** - les deux sexes réunis; ex. patro père - gepatroj les parents (père et mère) | of both sexes; e. g. patro father - gepatroj parents | beiderlei Geschlechtes; z. B. patro Vater - gepatroj Eltern; mastro Wirth - gemastroj Wirth und Wirthin {de 1901: Wirt und Wirtin} | обоего пола, напр. patro отецъ - gepatroj родители; mastro хозяинъ - gemastroj хозяинъ съ хозяйкой | obojej płci, np. patro ojciec - gepatroj rodzice; mastro gospodarz - gemastroj gospodarstwo (gospodarz i gospodyni) [FE 36].

● **gedoktoroj** — La doktoredzino A. vizitis hodiaŭ la gedoktorojn P. [FE 36.10].

● **geedzoj** — Mi gratulis telegrafe la junajn geedzojn [FE 36.4].

● **gefianĉoj** — La gefianĉoj staris apud la altaro [FE 36.5].

● **gefratoj** — Petro, Anno kaj Elizabeto estas miaj gefratoj [FE 36.2].

● **ge'mastr'o'j** — Wirth und Wirthin {de 1901: Wirt und Wirtin} | хозяинъ съ хозяйкой | gospodarstwo (gospodarz i gospodyni) [UV ge'] — **gemastroj** - Wirth und Wirthin {de 1901: Wirt und Wirtin} | хозяинъ съ хозяйкой | gospodarstwo (gospodarz i gospodyni) [FE 36].

● **ge'patr'o'j** - les parents (père et mère) | parents | Eltern | родители | rodzice [UV ge']. — **gepatroj** - les parents (père et mère) | parents | Eltern | родители | rodzice [FE 36]. — Patro kaj patrino kune estas nomataj gepatroj [FE 36.1]. Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Erneĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilheĉjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38.12]. Ŝi edziniĝis kun sia kuzo, kvankam ŝiaj gepatroj volis ŝin edzinigi kun alia persono [FE 39.7].

● **gesinjoroj** — Gesinjoroj N. hodiaŭ vespere venos al ni [FE 36.3].

— **Lingva Respondo 1902**: ... Kvankam la klubo Aŭroro {ĵus fondita en Sofio} havas ankaŭ virinojn, ĝi tamen devas sin nome ne geesperantista, sed simple esperantista [1902, PVZ VI, 69].

— **Lingva Respondo 1907:** La prefikso *ge* rilatas ne sole al *du* personoj, sed ĝi

povas rilati ankaŭ al *multaj* personoj; ĝi signifas simple “de ambaŭ seksoj”. Mi persone ĝis nun uzadis tiun ĉi prefikson ĉiam nur por esprimi ian *ambaŭseksan familian tutaĵon el personoj starantaj en la sama linio de parenceco*; tial mi diradis ekzemple “gepatroj”, “gemastroj”, “gefratoj”, “genepoj”, “gekuzoj”, “getajloroj” (en la senco de “tajloro kaj lia edzino”); sed ni neniam esprimis ekzemple per “getajloroj” la tutan familion de tajloro, ĉar la gefiloj de tajloro ne staras en la sama linio de parenceco kun la tajloro, kaj mi ankaŭ evitadis diri “gesinjoroj” pri personoj, kiuj ne apartenas al unu familio (mi nomadis ilin “sinjoroj kaj sinjorinoj”). Tamen mi konfesas, ke mi havis nenian kaŭzon, por uzadi la prefikson *ge* sole en la dirita maniero. Ĉar en la fundamenta (universala) vortaro de nia lingvo *ge* signifas simple “de ambaŭ seksoj”, kaj ĉar la uzado de la prefikso en tiu ĉi senco neniam donas malkompreniĝon, tial ni povas tre bone uzi tiun ĉi prefikson en *ĉiuj* okazoj, kiam ni parolas pri ambaŭ seksoj. Sekve se al personaro, kiu konsistas el ambaŭ seksoj, iu sin turnas kun la vorto “gesinjoroj”, li faras nenian eraron, kaj eble mi mem ankaŭ de nun iafoje uzados la prefikson en tiu ĉi senco. [LR 6A, *La Revuo*, 1907, Februaro]

gelaten’ - gélatine | jelly | Gallerte | студень, желе | galareta. — [RE].

ĝem’ - gémir | groan | stöhnen | стонать | stękać. — [UL] [RE A].

Ĝemel-o, [OA 4] {fr} jumeau | {en} a twin | {de} Zwilling | {it} gemello | {es} gemelo | {pt} gémeo {en Brazilo: gêmeo} | {ca} bessó. — [EV 1923] {antaŭe du/nask/it/o [UV]}.

gem-o (*min.*) [OA 2.1] — [EG 2].

ĝen’ - gêner, serrer | constrain, embarass | geniren {de 1901: genieren} | стѣснять | żenować. — [AK] {en} inconvenience {(*vb.*)}, bother {(*vb.*)}, disturb. — [RE]. — **Rim**.: La anglaj AK ne estas tre klaraj, ĉar „inconvenience“ kaj „bother“ povas esti kaj verboj kaj substantivoj. Celitaj estas verboj. Germanaj AK mankas. „geniren“ (laŭ la nova ortografio de 1901 „genieren“) estas arkaa kaj uzata nur plu en la esprimo „sich generieren“ (sin ĝeni). Bazaj tradukoj estas behindern, belästigen, stören, beengen; peinlich sein, lästig sein (Krause 1999).

gen/o. [OA 9] Kromosomero, kiu regas biologian heredadon. — [PIV 1970].

Gencian-o, [OA 4] {fr} gentiane | {en} gentian | {de} Enzian | {it} genziana | {es} genceana | {pt} genciana | {ca} genciana. {BOT} — [EG 2].

ĝendarm-o [OA 2.1] — [Beau] gendarme.

genealog’ (2) [OA 7] — [EV 1923].

genealogi-o [OA 2.1] — [RE]. [Beau] généalogie.

generaci’ - génération | generation | Geschlecht, Generation | поколѣніе | pokolenie. — [RE].

ĝeneral’ [OA 1] * général (adj) | general | allgemein | генералъ | ogolny, powszechny. — [Beau] général (qui concerne ou embrasse un ensemble de personnes ou de choses).

general’ - [UV moŝt’] {MIL} — **general’** [OA 1] * général (milit.) | a general | General | генералъ | gienerał. — **general/o** (1) [OA 8]. — [UL]. [DL 1888]: *Aŭdu, infanoj! se vi estos prezentitaj al la generalo, salutu lin ĝentile [DL 5]*.

● **general’a moŝt’o** - vi’a general’a moŝt’o - monsieur le général [UV moŝt’]

geni’ [OA 1] * génie (talent) | genius | Genie | геній | gienjusz. — [DL] *La bona genio de l' homaro vekiĝis: ...* [DL A 1]. *... la verko de unu homo ne povas esti senerara, se tiu homo eĉ estus la plej genia kaj multe pli instruita ol mi* [DL I.4.2]. [RE].

Genist-o, [OA 4] {fr} genêt | {en} broom, genista | {de} Ginster | {it} ginestra | {es} genista, retama | {pt} giesta | {ca} ginesta. {BOT} — [EV 1923] {ne ĉe Z.}. — **Rim.**: En la portugala ankaŭ: „genista“; la portugala vorto “giesta” rilatas i.a. al la specio *Genista tinctoria*, t.e. “tinktura genisto”, laŭ PIV 2005.

genitiv’ - génitif | genitive | Genitiv | родительный падежъ | dopełniacz. {GRAM} — [RE].

genot’ - genet, genette | genet | Genettkatze {2012: Ginsterkatze, Genette} | енотъ | junat. {ZOO} — [AK] {fr} genette {genet estas hispandevena malgranda ĉevalo kaj malĝusta traduko de genot‘}.— [RE].

genr/o [OA 9] **1** Gramatika kategorio (precipe ĉe substantivoj kaj pronomoj, sed ankaŭ ĉe aliaj vortspecoj), kiu almenaŭ historie iel rilatas al la sekso de estaĵoj aŭ al distingo inter uloj kaj aĵoj: *vira genro*; *ina*

genro; *neŭtra genro*. **2** Subgrupo de zoologia aŭ botanika familio. {GRAM} {ZOO} {BOT} — [PV 1930].

gent' - race | race, kind, genus | Geschlecht, Stamm | племя | plemię. — [RE]. — Gén-to [FE 2]. Gento [FE 4]. — **Lingva Respondo 1910**: Mia memuaro * parolas ne pri nacioj, sed nur pri *gentoj,* t.e. ne pri grupoj politikaj, sed nur pri grupoj etnologiaj. Vi ĉie tradukas „gento" per „nation", kaj mi timas, ke tio eble kaŭzos malkompreniĝon, ĉar la vorto „nation" estas ne sufiĉe klara kaj oni ofte uzas ĝin en la senco „ĉiuj loĝantoj de ia regno", kio estas tute kontraŭ miaj argumentoj pri la vera sento de „genteco"... Ĉu vi ne povus traduki la vorton „gento" iel alie? (ekzemple „peuple", „tribe" {la franca vorto estus „tribu"} aŭ io simila?). Se vi trovas, ke alia traduko estus ne bona aŭ ne konforma al la spirito kaj bona stilo de la franca lingvo, tiam estus necese almenaŭ tuj en la komenco doni *klarigon,* ke en la originalo estas ĉiam uzita la vorto „gento", kaj la vorto „nation" en la traduko devas esti komprenata *ne* en senco politika, sed *nur* en senco *etnologia* (= pli malpli la franca „race", sed nur en pli malgranda mezuro). [LR 28, let. al Sebert (1910-12-05)]. — **Rim.**: Kp. etn/o [OA 9].

ĝentil' - gentil, poli | gentle | höflich | вѣжливый | grzeczny. — **ĝentila** - gentil, poli | polite, gentle | höflich | вѣжливый | grzeczny [FE 15]. — [AK 1914] polite, courteous | höflich, artig. — [UL]. — "Vi tute ne estas ĝentila," diris la feino sen kolero [FE 19.9]. — **Rim.**: La franca *gentil* en 2012 plej kutime signifas *afabla*.

● **ĝentile** - Vi devas nur iri al la fonto ĉerpi akvon; kaj kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile [FE 17.11]. Hieraŭ mi renkontis vian filon, kaj li ĝentile salutis min [FE 20.3].

● **ĝentileco** - ... ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino [FE 15.6].

● **malĝentila** - "Ĉu mi venis tien ĉi," diris al ŝi la malĝentila kaj fiera knabino, "por doni al vi trinki? [FE 19.6].

● **malĝentile** - "Estus tre bele," respondis la filino malĝentile, "ke mi iru al la fonto!" [FE 19.1].

● **malĝentilulino** - "Jes, patrino", respondis al ŝi la malĝentilulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon [FE 21.2].

● **neĝentila** - Knabo, vi estas neĝentila [FE 16.15]. Sinjoro, vi estas neĝentila [FE 16.16]. Sinjoroj, vi estas neĝentilaj. [FE 16.17].

genu' - genou | knee | Knie | колѣно | kolano. {ANAT} — [UL].

geodezi-o [OA 2.1] — [Beau] géodésie.

geograf' (1) [OA 7] — [Kabe]. — [OA 8]: RIM.I. En la 7a O.A., inter la komunaj vortoj el la listo de la Fundamentaj radikoj, oni korektu la evidentan preseraron geograf/o al geografi/o.

geografio — Ge-o-gra-fí-o [FE 3, mankas en UV]. — [RE]. — **geografi'** [OA 1] * géographie | geography | Geographie | географія | gieografja. — **geograf'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [OA 8]: RIM.I. En la 7a O.A., inter la komunaj vortoj el la listo de la Fundamentaj radikoj, oni korektu la evidentan preseraron geograf/o al geografi/o.

Geolog' [OA 3.2] {en} geologist | {fr} géologue | {de} Geolog {legu: Geologe} | {es} geologo | {pt} geologo {legu: geólogo} | {it} geologo | {pl} --- {traduko mankas}. — [Kabe].

geologi' [OA 1] géologie | geology | Geologie | геологія | gieologja. — [RE].

geometr' (1) [OA 7] — [Kabe].

geometri' [OA 1] * géométrie | geometry | Geometrie | геометрія | gieometrja. — [1888] [RE].

Georgo — Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua [FE 12, mankas en UV]. — **Georg'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo). — [DL 1888] *Georgo Vaŝingtono ...* [DL 3.6].

gerani' [OA 1] géranium | geranium | Geranium | герань | gieranja. {BOT} — [RE].

ĝerm' - germe | bud, sprig | Keim | ростокъ | kiełek. — [AK] {en} germ. — [MV].

Germano - Allemand | German | Deutscher | Нѣмецъ {de 1918: немец (minuskle)} | Niemiec [FE 34, mankas en UV]. — **german'** [OA 7] (nomo de ano de popolo). — [UL-de]. — Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj

[FE 37.9]. La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo [FE 40.19].

● **germana** - Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron [FE 34.14].

● **Germanujo** - La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo [FE 40.19].

gerundi' [OA 1] gérondif (gram.) | gerund | Gerundium | герундій | gerundium. {GRAM} — [RE].

gest' - geste | gesture | Geberde | жестъ, тѣлодвиженіе | giest, ruch ciała. — [RE].

ĝi - cela, il, elle | it | es, dieses | оно, это | ono, to. — **ĝi** - cela, il, elle | it | es, dieses | оно, это | ono, to [FE 12]. — [UL]. — La sepan tagon de la semajno Dio elektis, ke ĝi estu pli sankta, ol la ses unuaj tagoj [FE 12]. La tranĉilo tranĉas bone, ĉar ĝi estas akra [FE 16]. La infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi. Vi devas nur iri al la fonto ĉerpi akvon; kaj kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile." [FE 17]. Ĉu vi jam trovis vian horloĝon? — Mi ĝin ankoraŭ ne serĉis; kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin jam ne trovos [FE 20]. Trovinte pomon, mi ĝin manĝis [FE 22]. La surtuto estas aĉetita de mi, sekve ĝi apartenas al mi [FE 25]. Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi [FE 25]. Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn [FE 25]. La birdo flugas en la ĉambro (= ĝi estas en la ĉambro kaj flugas en ĝi) [FE 26]. La birdo flugas en la ĉambron (= ĝi estas ekster la ĉambro kaj flugas nun en ĝin) [FE 26]. El sub la kanapo la muso kuris sub la liton, kaj nun ĝi kuras sub la lito [FE 26]. [Oni] povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa [FE 27]. ... t. e. montri, ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo [FE 28]. El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon [FE 29]. La birdo ne forflugis: ĝi nur deflugis de la arbo, alflugis al la domo kaj surflugis sur la tegmenton [FE 31]. La fenestro longe estis nefermita; mi ĝin fermis, sed mia frato tuj ĝin denove malfermis [FE 33]. La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon [FE 34]. Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklaraĵon [FE 35]. Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3]. ... la vento forblovis de mia kapo la ĉapon, kaj ĝi, flugante, pendiĝis sur la branĉoj de la arbeto [FE 39.12]. ... tubeto, en kiun oni metas cigaron, kiam oni ĝin fumas, estas cigaringo [FE 40.15]. Li donis al mi monon, sed mi ĝin tuj redonis al li [FE 42].

● **ĝia** — Por ke lingvo internacia ... havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, ... [A 1.1]. — La infano serĉis sian pupon; mi montris al la infano, kie kuŝas ĝia pupo [FE 18.18]. Ĝia uzado {tiu de la artikolo} estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj [FE 27.2]. ... oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo [FE 27.5]. Mi disŝiris la leteron kaj disĵetis ĝiajn pecetojn en ĉiujn angulojn de la ĉambro [FE 42.3].

— Lingva Respondo 1891 [Sen-persona „ĝi"]: ... se la difinata „ĝi" havas la sencon de substantivo, ĝi kompreneble devas esti uzata kun adjektivo; ekzemple: „lia parolo estas mallonga, sed ĝi estas tre konvinka". Cetere la vorton „ĝi" ni konsilas ĉiam uzi nur en tiu ĉi lasta senco, t.e. nur por anstataŭi objekton aŭ aferon (kiel „li" anstataŭas personon); sed en esprimoj senpersonaj kaj senobjektaj ni konsilas neniam uzi la vorton „ĝi" (ekzemple: „hodiaŭ estas varme" kaj ne „hodiaŭ ĝi estas varme") [LR 82 A. *La Esperantisto*, 1891, p. 7].

— **Lingva Respondo ĉ. 1902**: ... Ekzemple: hodiaŭ estas malvarme; morti pro la patrujo estas glore; estas necese ke ... [LR 82 B. Pk al C. Aymonier 1902 ?].

— **Lingva Respondo 1892 [„ĝi" por bestoj]**: La pronomoj "li" kaj "ŝi" estas uzataj nur por personoj; por aferoj, objektoj kaj ankaŭ por bestoj ni uzas la pronomon "ĝi", ĉar en tiaj okazoj la sekso ne ekzistas. Se ni tamen, parolante pri objektoj aŭ bestoj, volas esprimi difinitan sekson (viran

aŭ virinan), tiam ni povas uzi “li” kaj “ŝi”. [*Esperantisto*, 1892, p. 79].

— **Lingva Respondo 1908 [„ĝi“ por bestoj]**: Kiam oni parolas pri bestoj, mi konsilas ĉiam uzi *nur* la senseksan pronomon “ĝi”, - ne sole kiam (en la plimulto da okazoj) la sekso de la priparolata besto estas por ni indiferenta, sed eĉ en tiaj okazoj, kiam ni parolas precize pri la sekso de la besto. En la tre maloftaj okazoj, kiam la precizeco povas nepre *postuli*, ke ni montru la sekson de la besto per la uzata *pronomo*, la teorio ne malpermesas al ni uzi la vorton “li” aŭ “ŝi” sed en ĉiuj *ordinaraj* okazoj mi konsilus uzi la pronomojn “li” kaj “ŝi” nur por homoj. [Respondo 35, *La Revuo*, 1908, Majo].

— **Lingva Respondo 1893 [„li“ anstataŭ „ĝi”]**: Vi skribis, ke, parolante pri infano, vi uzas “li” anstataŭ “ĝi”, ĉar vi ne aprobas “la anglan kutimon starigi infanojn sur unu ŝtupon kun bestoj kaj objektoj”. Kontraŭ la uzado de “li” en tiaj okazoj oni nenion povus havi; sed la *kaŭzo*, kial ni (kaj ankaŭ la lingvo angla) uzas en tiaj okazoj “ĝi”, estas ne tia, kiel vi pensas. Nek la lingvo angla, nek Esperanto havis ian intencon malaltigi la indon de infanoj (ambaŭ lingvoj estas ja tiel ĝentilaj, ke ili diras “vi” ne sole al infanoj, sed eĉ al bestoj kaj objektoj). La kaŭzo estas tute natura sekvo de la konstruo de la ambaŭ diritaj lingvoj. En ĉiu lingvo ĉiu vorto havas (tute ne logike) difinitan sekson, kaj tial, uzante por ĝi pronomon, ni prenas tiun, kiu respondas al la gramatika sekso de la vorto (tial la franco diras pri infano “il”, la germano diras “es”); sed en la lingvoj angla kaj Esperanto la vortoj havas nur sekson *naturan*, kaj tial, parolante pri infanoj, bestoj kaj objektoj, kies naturan sekson ni ne scias, ni *vole-ne-vole* (sen ia ofenda intenco) uzas pronomon mezan inter “li” kaj “ŝi” - la vorton “ĝi”. Tiel same ni parolas ankaŭ pri “persono”. Cetere, parolante pri infano, pri kiu ni *scias*, ke ĝi *ne* estas knabino (aŭ almenaŭ *ne* scias, ke ĝi estas *knabino*), ni povas uzi la vorton “li”. [*Esperantisto*, 1893, p. 16].

— **Lingva Respondo 1907 [Pri pronomo por “homo”]**: Kiam ni parolas pri homo, ne montrante la sekson, tiam estus regule uzi la pronomon “ĝi” (kiel ni faras ekzemple kun la vorto “infano”), kaj se vi tiel agos, vi estos gramatike tute prava. Sed ĉar la vorto “ĝi” (uzata speciale por “bestoj” aŭ “senvivaĵoj”) enhavas en si ion malaltigan (kaj ankaŭ kontraŭkutiman) kaj por la ideo de “homo” ĝi estus iom malagrabla, tial mi konsilus al vi fari tiel, kiel oni faras en la aliaj lingvoj, kaj uzi por “homo” la pronomon “li”. Nomi tion ĉi kontraŭgramatika ni ne povas; ĉar, se ni ĉiam farus diferencon inter “homo” kaj “homino”, tiam ni devus por la unua uzi “li” kaj por la dua “ŝi” sed ĉar ni silente interkonsentis, ke ĉiun fojon, kiam ni parolas ne speciale pri sekso *virina*, ni povas uzi la viran formon por *ambaŭ* seksoj (ekzemple “homo” = homo aŭ homino, “riĉulo” = riĉulo aŭ riĉulino k.t.p.), per tio mem ni ankaŭ interkonsentis, ke la pronomon “li” ni povas uzi por homo en ĉiu okazo, kiam lia sekso estas por ni indiferenta. Se ni volus esti pedante gramatikaj, tiam ni devus uzi la vorton “ĝi” ne sole por “homo”, sed ankaŭ por ĉiu alia analogia vorto; ekzemple ni devus diri: “riĉulo pensas, ke ĉio devas servi al *ĝi”* (ĉar ni parolas ja ne sole pri riĉaj viroj, sed ankaŭ pri riĉaj virinoj). [Respondo 23, *La Revuo*, 1907, Aŭgusto].

— **Lingva Respondo 1907 [Pri “ĝi” anstataŭ “tio”]**: La vorton “ĝi” ni uzas, kiam ni parolas nek pri viro, nek pri virino, sed pri io, kio ne havas sekson aŭ kies sekso estas por ni nekonata aŭ indiferenta; sekve ni preskaŭ ĉiam povas tute bone uzi tiun ĉi vorton ankaŭ anstataŭ “tio”, kies senco estas preskaŭ tia sama. Tial anstataŭ “tio (= la “io” kiun mi nun vidas antaŭ mi) estas vi, Ivan Karpoviĉ”, mi povas tute bone diri “ĝi estas vi, Ivan Karpoviĉ”. [Respondo 17, *La Revuo*, 1907, Junio].

ĝib’ - bosse | hump | Buckel, Höcker | горбъ | garb. — [RE].

giĉet/o [OA 9] **1** Fenestreto en pordo aŭ vando destinita por interparoli aŭ transdoni ion. **2** Apartigita spaco, en kiu oni priservas klientojn (en poŝtoficejo, biletvendejo k.s.), ordinare kun ia barilo (fenestreto, vendotablo k.s.) inter la giĉetisto kaj la kliento. — [PV 1930].

gigant’ [OA 1] * géant | giant | Riese | гигантъ | olbrzym. — [EG 2].

gilotin’ [OA 1] guillotine | guillotine | Guillotine | гильотина | gilotyna. — [RE].

gimnastik’ [OA 1] gymnastique | gymnastics | Gymnastik | гимнастика | gimnastyka. — [Beau] gymnastique.

gimnazi-o [OA 2.2] lycée, collège | grammarschool | Gymnasium — [Beau] gymnase (collège). [EG 2] Gymnasium.

ĝin-o (*trinkaĵo*) [OA 2.1] {KUIR} — [Beau] gin (liqueur spirit.). [EG 2] Gin.

gips' - plâtre | gypsum | Gips | гипсъ | gips. — [RE]. — Gíp-so [FE 2].

ĝir/i. [OA 8] Transpagi iun sumon el sia konto en la konton de iu alia. — A. to transfer (funds), F. virer; G. übertragen, (girieren); H. {es} girar; I. {it} girare, stornare; P. {pt} transferir (com.). — [EG 2] girieren.

ĝiraf' - giraffe | girafe | Giraffe | жираффъ {de 1918: жираф, жирафа} | żyrafa. {ZOO} — [AK] {en} giraffe. — [RE].

girland' [OA 1] * guirlande | garland | Girlande | гирлянда | girlanda. — [RE].

ĝis - jusqu'à, jusqu'à ce que | up to, until | bis | до | do, aż. — **ĝis** - jusqu'à | up to, until | bis | до | do, aż [FE 18]. — [UL]. — Ĝis [FE 2]. — ... sed ĝis tiu tempo la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa, ĉar severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta [A 1.3]. Ĝis la tempo, kiam ia por ĉiuj aŭtoritata kaj nedisputebla institucio decidos alie, ... [A3.4]. ... ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidos pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ... [12]. — Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn; post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo [FE 18.15].

● **ĝisnuna** — ... sed ĝis tiu tempo la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa, ĉar severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta [A 1.3]. ... ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera [A 6.4].

gitar' - guitare | guitar | Guitarre | гитара | gitara. {MUZ}. — [DL 1888] *Mi lernas pentri kaj ludi gitaron* [DL 5.18]. [RE].

glaci' - glace | ice | Eis | ледъ | lód. — **glacio** - glace | ice | Eis | ледъ | lód [FE 35]. — [AK] {en} ice (*natural*). [UL]. — En la printempo la glacio kaj la neĝo fluidiĝas [FE 39].

● **glaci'aĵ'** - glaces | ice | Gefrornes {2012 laŭ la difino en FE 35: Eis, Speiseeis} | мороженное | lody. — Glaciaĵo estas dolĉa glaciigita frandaĵo [FE 35].

● **glaciigita** - Glaciaĵo estas dolĉa glaciigita frandaĵo [FE 35].

glad' - repasser (du linge) | smoothe | plätten | гладить (бѣлье) | prasować. — [AK] {en} to iron. — [RE].

gladiator-o [OA 2.1] {MIL} — [RE]. [Beau] gladiateur.

glan' - gland | acorn | Eichel | желудь | żołądź. — [RE].

gland' - glande, glandule | gland, glandule | Drüse | железа | gruczoł. {ANAT} — [RE].

glas' - verre (à boire) | glass, vase | Glas (Gefäss) {legu: Glas (Gefäß)} | стаканъ | szklanka. — **glaso** - verre (à boire) | glass | Glas (Gefäss) {legu: Glas (Gefäß)} | стаканъ | szklanka [FE 32]. — [AK] {en} a glass, tumbler. — [UL]. — Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino; glaso da vino estas glaso plena je vino [FE 32.5]. Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo [FE 34.10].

● **glaseto** - Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino [FE 34.10]

glat' - uni, lisse | slippery | glatt | гладкій | gładki. — [AK] {en} smooth, glossy (*not rough*). — [UL].

glav' - glaive, épée | sword | Schwert | мечъ | miecz. {MIL} — [UL].

glazur-o [OA 2.2] vernis (de poterie) | glaze | Glasur — [RE].

glicerin' [OA 1] glycérine | glycerine | Glyzerin | глицеринъ | gliceryna. [Beau] glycérine.

gliciriz' [OA 1] réglisse | liquorice | Lakritze | лакрица | lukrecja. — [EG 2]. [EG 1]: glizerizo.

glikoz' [OA 1] glucose | glucose | Glykose, Traubenzucker | глюкоза | glukoza. — [Beau] glucose. — [OA 8] II.A.5. Pro evoluo en naciaj lingvoj kaj en Esperanto estas oficialigitaj la teknikaj vortoj difterio kaj glukozo {EV 1923}, kiel paralelaj formoj al difterito kaj glikozo {Beau}, jam oficialaj sed praktike elirintaj el uzado.

glim' - mica | glimmer | Glimmer | слюда | łyszczak. — [AK] {en} mica. — [RE].

glis/i [OA 9] (pri aviadilo) Flugi (malsupren) sen uzo de motora forto: *la aviadilo malrapide glisis al la tero*. — [PIV 1970].

● **glis/il/o**. [OA 9] Senmotora aviadilo, kies flugado dependas de aerfortoj kaj aerfluoj. — [PIV 1970].

glit' - glisser | glide | gleiten, glitschen | скользить | ślizgać się. — **gliti** - glisser | skate | gleiten, glitschen | скользить, кататься | ślizgać się [FE 34]. — [AK] {en} glide, skate, slide. — [UL]. — Hodiaŭ estas bela frosta vetero, tial mi prenos miajn glitilojn kaj iros gliti [FE 34.7].

● **glit'il'** - patin | skate | Schlittschuh | коньки | łyżwa. Hodiaŭ estas bela frosta vetero, tial mi prenos miajn glitilojn kaj iros gliti [FE 34.7].

● **glit'vetur'il'** - traîneau {de 1990: traineau} | sled | Schlitten | сани | sanie. — [AK] {en} sledge. — En somero ni veturas per diversaj veturiloj, kaj en vintro ni veturas per glitveturilo [FE 34.6].

glob' - boule, globe | globe | Kugel | шаръ | kula, gałka. — [RE].

glor' - glorifier | glory | rühmen, preisen | славить | wysławiać. — [AK] {en} glorify. — [UL].

glu' - coller | glue | leimen | клеить | kleić. — [RE].

glukoz/o. [OA 8] Tipa glucido, kun dolĉa gusto, trovebla en kelkaj fruktoj (ekz. vinbero); $C_6H_{12}O_6$; plej ofta en la sukeroj, ĝi estas komponanto de tre multaj hidrolizeblaj glucidoj. — A. glucose, F. glucose, G. Glukose, H. {es} glucosa, I. {it} glucosio, P. {pt} glicose. — [EV 1923]. — [OA 8] II.A.5. Pro evoluo en naciaj lingvoj kaj en Esperanto estas oficialigitaj la teknikaj vortoj difterio kaj glukozo, kiel paralelaj formoj al difterito kaj glikozo, jam oficialaj sed praktike elirintaj el uzado.

glut' - avaler, engloutir | swallow (vb.) | schlingen, schlucken | глотать | połykać. — [AK 1914] verschlingen, verschlucken; einnehmen (Medizin). — [UL].

gnom-o [OA 2.1] {MIT} — [Beau] gnome (myth.). — **Rim.**: Kp. **kobold'** - farfadet | gnome | Kobold | домовой (духъ) | poczwara, dyabełek. {MIT} — [AK] lutin, farfadet | kobold, krasnoludek.

gobi' - goujon | gudgeon | Gründling | пискарь | kiełb. {ZOO} — [RE].

ĝoj' - se réjouir | joy | sich freuen | радоваться | cieszyć się. — **ĝoji** - se réjouir | rejoice | sich freuen | радоваться | cieszyć się [FE 10]. — [AK] {en} rejoice, be glad. — [UL].

● **ĝoja** — Ĝojan feston! (mi deziras al vi) [FE 10.10]. Kia ĝoja festo! (estas hodiaŭ) [FE 10.11]. Sur lia vizaĝo mi vidis ĝojan rideton [FE 38.7].

golf' - baie | bay | Bucht, Meerbusen | бухта, заливъ | zatoka. {GEO} — [AK 1914] golfe, baie | gulf | Golf, Meerbusen. — [RE].

gondol' [OA 1] gondole | gondola | Gondel | гондола | gondola. {MAR} — [RE].

gorĝ' - gorge, gosier | throat | Kehle, Gurgel, Hals | горло | gardło. {ANAT} — [UL].

goril-o [OA 2.1] {ZOO} — [EG 2].

gotik-a [OA 2.1] {ARKI} — [EG 2] (archit.) gotisch.

graci' - délié | slender | schlank | стройный | wysmukły, hoży. — [AK 1914] gracieux, délié, élancé | graziös, zierlich. — [RE].

grad' - degré | degree | Grad, Stufe | градусъ, степень | stopień. — [RE].

graf' - comte | earl, count | Graf | графъ | hrabia. — **grafo** - comte | earl, count | Graf | графъ | hrabia [FE 42]. — [RE].

● **grafa** — El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; la dua: al Lia Grafa Moŝto, Sinjoro P.; la tria: al Lia Moŝto, Sinjoro D. [FE 42.8]

grafik/o. [OA 9] Arto aŭ tekniko prezenti ion per desegnaj linioj: *ŝi studis grafikon en la artlernejo*; *komputila grafiko estas nun populara*. — [PV 1930] grafiko 1 Arto reprezenti objektojn per desegnaj linioj.

● **grafik/aĵ/o** [OA 9] **1** Bildo grafika: *grafikaĵoj ilustris la poemaron*. **2** Desegnaĵo prezentanta fenomenojn aŭ abstraktajn rilatojn per kurboj, surfacoj k.s., ofte kun nombraj indikoj: *la grafikaĵo prezentis la dividon de la membraro laŭ profesioj*. — [EG 2] graphische Schrift, Zeichen.

● **grafik/ist/o**. [OA 9] Grafika artisto; profesiulo pri grafiko.

grafit-o [OA 2.1] — [Beau] graphite, mine de plomb. [EG 2] Graphit.

grafolog' (1) [OA 7]

grafologi' [OA 1] * graphologie | graphology | Graphologie | графологія | grafologja. — [EG 2] Graphologie.

grajn' - grain, pépin | a grain | Korn, Körnchen | зерно | ziarno. — [RE].

gram' [OA 1] * gramme | gram | Gramm | граммъ | gram. {MEZ} — [DL 1888] *Hieraŭ falis granda hajlo; ĉiu hajlero pezis pli ol kvindek gramojn [DL 12.2].* [Beau] gramme.

gramatik' - grammaire | grammar | Grammatik | грамматика | gramatyka. {GRAM} — **gramatiko** - grammaire | grammar | Grammatik | грамматика | gramatyka [FE 27]. — [DL] [RE]. — FUNDAMENTA GRAMATIKO DE LA LINGVO ESPERANTO EN KVIN LINGVOJ [FG titolo]. — Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: 1.) La 16-regula gramatiko; 2) la « Universala Vortaro »; 3) la « Ekzercaro » [A 2.1]. — [DL 1888] *La venontajn apartajn pecojn mi donas, ke la lernantoj povu ripeti praktike la regulojn de l' gramatiko internacia ... [DL III.1].* {Multaj trafoj en DL-Ald}.

● **gramatika** — ... oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo [FE 27.5]. Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi-tiea, tieulo, tiamulo k. t. p. (= kaj tiel plu) [FE 30.10]. — [DL-Ald] *... tiel ankaŭ se naskiĝus ia demando stilistika aŭ eĉ gramatika, ne decidita klare en mia unua broŝuro, ĉiu povas ĝin decidi laŭ sia juĝo.*

GRAMOFONO [OA 6.2] *(Akustiko) Aparato kiu, per disko, reproduktas sonojn* | {en} gramophone | {fr} gramophone | {de} Sprechmaschine {en 2012 pli kutima: Grammophon} | {es} gramofono | {it} gramofono | {pl} gramofon. — [EV 1923] {ne ĉe Z.}.

granat' - grenade | pomegranate | Granatapfel | гранатное яблоко | granatowe jabłko. {BOT} — [RE]. — **Rim.**: Kp. grenad'.

grand' - grand | great, tall | gross {legu: groß} | большой, великій | wielki, duży. — **granda** - grand | great, tall | gross {legu: groß} | большой, великій | wielki, duży [FE 17]. — [UL]. — Grán-da [FE 2]. — La erareco en la nacia traduko de tiu aŭ alia vorto ne prezentas grandan malfeliĉon, ... [A 4.5]. ... sed senkompare pli grandan danĝeron prezentus la ŝanĝado de la traduko de ia vorto [A 4.6]. Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron oficialan, kiel «Aldonon al la Fundamento» [A 7.2]. ... eĉ ĉe la plej granda perfektiĝado la unueco de Esperanto neniam estos rompata ... [A 8.3]. — ... tiu ĉi malfeliĉa infano devis ... alporti domen plenan grandan kruĉon [FE 13.3]. ... por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino [FE 15.6]. ... elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri grandaj diamantoj [FE 17.3]. ... por vidi, kiel granda estos la malboneco de tiu ĉi knabino [FE 19.5]. ... tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, ... [FE 23.3]. La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj [FE 30.2]. Kia granda brulo! kio brulas? [FE 31.15]. Mia frato ne estas granda, sed li ne estas ankaŭ malgranda: li estas de meza kresko [FE 33.1]. Nia lando venkos, ĉar nia militistaro estas granda kaj brava [FE 34.12]. Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, precipe aroj da bellanaj ŝafoj [FE 34.15]. Tiu ĉi granda altaĵo ne estas natura monto [FE 35.10]. La alteco de tiu monto ne estas tre granda [FE 35.11]. La riĉeco de tiu ĉi homo estas granda, sed lia malsaĝeco estas ankoraŭ pli granda [FE 35.15]. Mi vivas kun li en granda amikeco [FE 35.19]. Antaŭ nia militistaro staris granda serio da pafilegoj [FE 38.11]. ... en la poŝo de mia surtuto mi portas paperujon; pli grandan paperujon mi portas sub la brako [FE 40.18].

● **grandega** — „Kion mi vidas!“ diris ŝia patrino kun grandega miro [FE 17.4]. Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, kion fari [FE 38.10].

● **grand'anim'** - magnanime | magnanimous | grossmüthig {de 1901: großmütig} | великодушный | wspaniałomyślny.

● **malgranda** — Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon! [A 1.4]. ... li neniam permesis al si (almenaŭ konscie) eĉ la plej malgrandan

pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj [A 2.2]. Mia frato ne estas granda, sed li ne estas ankaŭ malgranda: li estas de meza kresko [FE 33.1]. Li estas tre ekkolerema kaj ekscitiĝas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo; ... [FE 41.13].

● **pligrandigi** — ... ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidos pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ĉio bona, kio ne troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel rekomendata [12].

grandioz' [OA 1] * grandiose, sublime | grand | grossartig {legu: großartig} | грандіозный | wspaniały. — [EG 2].

granit' - granit | granite | Granit | гранитъ | granit. {GEOL} — [RE].

gras' - graisse | fat | Fett | жиръ | tłuszcz. — [UL].

grat' - gratter | scratch | kratzen, ritzen | царапать | drapać.

gratul' - féliciter | congratulate | gratuliren {de 1901: gratulieren} | поздравлять | winszować. — **gratuli** - féliciter | congratulate | gratuliren {de 1901: gratulieren} | поздравлять | winszować [FE 36]. — [UL]. — Mi gratulis telegrafe la junajn geedzojn [FE 36.4].

grav' - grave | important | wichtig | важный | ważny. — **grava** - grave, important | important | wichtig | важный | ważny [FE 22]. — [AK] {fr} grave, important. — [UL]. ... severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta [A 1.3]. Tiun ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori ... [A 1.5]. ... mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn, ... el kiuj la plej gravaj estas eldonitaj ..., sub mia persona kontrolo kaj kunhelpo [A 5.3]. — Mono havata estas pli grava ol havita [FE 22.12]. Tiu ĉi grava tago restos por mi ĉiam memorinda [FE 41.11]. Ni ĉiuj kunvenis, por priparoli tre gravan aferon; sed ni ne povis atingi ian rezultaton, kaj ni disiris [FE 42.1].

graved' - enceinte, grosse | pregnant | schwanger | беременная | ciężarna. — [RE]. — **Rim.**: **1.** La franca *grosse* estas uzata nur pri bestoj. La koresponda vorto en la germana estas *trächtig*, kiu tamen mankas en UV. **2.** Kp. [DL 1888] *Ŝi estas en la kvara monato de naskonteco [DL 10.6].*

gravur' - graver | grave, engrave | graviren {de 1901: gravieren} | гравировать | rytować. — [RE].

GREGO [OA 6.2] *(zoologio) kolekto da brutoj, birdoj aŭ (fig.) da homoj* | {en} flock | {fr} troupeau | {de} Herde | {es} grey, rebano, manada | {it} gregge | {pl} stado. {ZOO} — [EV 1923] {antaŭe brut/ar/o}.

greko [OA 8] — [1888]. [E-isto 1893, p. 94] Grekujo. [Beau] Greko {majuskle}, Grec (subs.).

gren' - blé | grain | Korn, Getreide | хлѣбъ, жито | zboże. — [RE].

● **gren'ej'** - grenier | granary, warehouse | Speicher | амбаръ | spichrz. — [RE]. — [AK] {en} granary.

grenad' - grenade | grenade | Granate | граната | granata. {MIL} — [AK] {fr} grenade, obus. — [RE]. — **Rim.**: Kp. granat' (frukto).

gri' - gruau | groats | Grütze | крупа | kasza, krupa. {KUIR} — [AK] {en} hulled grain (*t.e. senŝeligita greno ia*); coarse oatmeal (*t.e. aveno duone muelita*). — [RE].

grifel' - burin, style | pin, pencil, style | Griffel | грифель | gryfel. — [AK 1914] slate-pencil | Griffel, Stichel. — [RE].

gril' - grillon | cricket (insect) | Grille | сверчокъ | świerk. {ZOO} — [RE].

grimac' - grimace | grimace | Grimasse | гримасса, ужимка | grymas. — [RE].

Grimp' [OA 3.1] {en} to climb | {fr} grimper, gravir | {de} klettern | {es} trepar | {pt} trepar | {it} arrampicarsi | {pl} wdrapac sie {legu: wdrapać się}. — [Kabe].

grinc' - grincer | grate, bruise | knirschen | скрежетать | zgrzytać. — [AK] {en} gnash, grind (*of teeth, etc.*). — [RE].

grip-o [OA 2.1] {MED} — [Beau] grippe.

griz' - gris | grey | grau | сѣрый, сѣдой | szary, siwy. — **griza** - gris | grey | grau | сѣрый, сѣдой | szary, siwy [FE 31]. — [UL]. — Liaj lipharoj estas pli grizaj, ol liaj vangharoj [FE 31.25].

grog-o [OA 2.1] {KUIR} — [EG 2].

gros' - groseille à maquereau | gooseberry | Stachelbeere | крыжовникъ | agrest. {BOT}

groŝ' - gros | groat | Groschen | грошъ | grosz. {MON} — [AK] {fr} gros (*monnaie*), groschen | {en} groschen (*coin*). — [RE].

grot' - grotte | grot | Grotte | гротъ | grota. — [AK] {en} grotto. — [RE].

grotesk-a [OA 2.1] — [Beau] grotesque.

gru' - grue (oiseau) | crane (bird) | Kranich | журавль | źóraw. {ZOO} — [RE].

grumbl-i [OA 2.2] grommeler | to grumble | nörgeln — [EG 2].

Grund-o, [OA 4] {fr} terrain (au point de vue de sa nature, de sa composition) | {en} ground, earth (soil) | {de} Boden (in Bezug auf seine Beschaffenheit) | {it} (composizione del) terreno | {es} terreno, suelo | {pt} terreno, chão | {ca} terreny. — [Kabe].

grup' - groupe | group | Gruppe | группа | grupa. — [DL 1888] *... kio estas neebla por unu persono, estas ludilo por grupo da personoj [DL II.3].* [RE].

Gruz' [OA 3.1] {en} gravel, grit | {fr} gravier, grouine {grouine estas regiona vorto, ne trovebla en kutimaj vortaroj} | {de} Gries {regiona vorto, ne trovebla en kutimaj vortaroj}, Kies | {es} arena gruesa, cascajo | {pt} areia grossa, cascalho | {it} arena grossa, ghiaia, {evidente troa komo} | {pl} gruz. — [EG 2].

ĝu' - jouir, prendre | enjoy, have the use of | geniessen {legu: genießen}, sich erquicken {ark.} | наслаждаться | uźywać, doznawać, cieszyć się. — [AK] jouir de, prendre plaisir à | enjoy. — [RE].

● **ĝuado** — Ĝu-á-do [FE 2].

guberni-o [OA 2.2] gouvernement (*province*) | government (*district*) | Gouvernement — [1888] [RE].

gudr' - goudron | tar | Theer {de 1901: Teer} | деготь {de 1918: дёготь} | dziegieć. — [RE].

guf' - grand-duc | owl | Uhu | филинъ | puchacz. {ZOO} — [RE].

gujav/o. [OA 9] Frukto de gujavujo, tre aroma, ronda aŭ longforma, ruĝe aŭ flave verda, pomo-granda, uzata por konfitaĵo ktp. — [PIV 1970].

● **gujav/uj/o**, **gujav/arb/o**. Arbo el tropika Ameriko, kreskigata pro sia frukto gujavo. (*Psidium guajava*.) — [PIV 1970].

gulden' [OA 1] florin | florin | Gulden | гульденъ | gulden. — [EG 2]. {Kp. floren' [OA 2]}

gum' - gomme | gum, mucilage | Gummi | гумми, камедь | guma. — [AK] {en} gum (*product*). — [RE].

gurd' - orgue de Barbarie | german organ | Leierkasten | шарманка | katarynka. {MUZ} — [AK] {en} street organ, hurdy-gurdy. — [RE].

gust' - goût | taste | Geschmack | вкусъ | smak, gust. — **gusto** - goût | taste | Geschmack | вкусъ | smak, gust [FE 35]. — [UL]. — Gús-to [FE 2].

● **gust'um'** – goûter {de 1990: gouter}, essayer | taste | kosten, schmecken | отвѣдывать | kosztować, próbować — [AK] {en} taste (*trans*.).

● **bongusta** — Mi manĝis bongustan ovaĵon [FE 35.9].

ĝust' - juste, correct | straight, just | recht, richtig | какъ разъ, вѣрно | właściwy. — [AK] juste, exact, correct | right, exact, correct. — [RE]. — Ĝús-ta [FE 2].

gut' - dégoutter | drop | tropfen, triefen | капать | kapać. — [UL].

● **gut'o** - goutte | drop | Tropfen | капля | kropla.

gutaperk-o [OA 2.1] — [EG 2].

guvern' - gouverner | govern, rule | lenken, erziehen | наставлять | kierować, wychowywać. — [AK] gouverner, élever, éduquer un enfant | teach privately (*act as tutor*). — [RE].

gvardi' - garde | guard | Garde | гвардія | gwardya. {MIL} — [AK] {en} guard (*subst*.) (*milit*.) — [RE]. — Gvar-dí-o [FE 2].

Gvatemalo [OA 8] {GEO} — [EV 1923].

gvid' - guider | guide | leiten, anleiten | руководствовать | być przewodnikiem. — [AK 1914] führen, leiten. — [RE].

Gvineo [OA 8] {GEO} — [FK 1903]: *Li veturas sur italaj ŝipoj en Malgrand-Azion, Anglujon, Portugalujon, al la bordo de Gvineo* [FK 88]. {Tri pliaj trafoj}. *Sed senkompare la plej rimarkindaj loĝejoj estas tiuj, kiujn konstruas la {termitoj} „Termes fatalis", speco, vivanta en Gvineo kaj aliaj partoj de la Afrikaj bordoj de maro ...* [FK 210]. [EV 1923]. {E-isto 1892: Gvin/uj/o}.

H, Ĥ

Hh - h légèrement aspiré | h as in "half" | h | (r, x) | h [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **ho** ... [FE 1]. — **ho** [OA 7] = nomo

de la litero h, deka litero de la Esperanta alfabeto. —

— Rim. 1: [Lingva Respondo 56 (1893): Pri la nomoj de la literoj]. La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

— Rim. 2: [Lingva Respondo (1889)]: La uzado de *ch* k.t.p. anstataŭ *ĉ* k.t.p. estas enkondukita nur por la presejoj, kiuj ne havas ankoraŭ literojn kun signetoj, sed en *skribado* mi konsilas al vi ĉiam uzi pli bone *ĉ* anstataŭ *ch*, ĉar la uzado de *unu* litero por unu sono estas multe pli logika ol la uzado de *du* literoj. Vi diras, ke la signetoj superliteraj estas maloportunaj en la skribado; sed la alfabeto pure latina havas ja ankaŭ kelkajn literojn kun signetoj superliniaj (i, j, t), kaj la plej granda parto de la lingvoj kiuj uzas la alfabeton latinan havas ankoraŭ amason da aliaj literoj kun signetoj superliniaj kaj subliniaj. Certe ia akademio aŭ kongreso penos iam elpensi pli oportunajn skribajn formojn por kelkaj literoj (ĉar ne sole la literoj kun signetoj sed ankaŭ multaj aliaj literoj havas formon tre maloportunan); sed tio ĉi estas jam tute alia demando, kiu *la lingvon mem* tute ne tuŝas: ĝi estas ne demando de lingvo, sed nur demando de oportuneco de la skribado. *La Esperantisto*, 1889, p. 15

— Rim. 3: [Lingva Respondo (1890)]: Multaj plendas, ke la skribado per *ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ* kaj *ŭ* estas por ili neoportuna kaj malhelpas ilin ankaŭ en la presado de verketoj en iliaj lokoj, kie la presejoj ne havas la literojn kun signetoj. Ni ripetas tial tion, kio estis jam dirita en la “Aldono al la Dua Libro”: anstataŭ la signeto superlitera oni povas kuraĝe uzadi la literon *h* kaj anstataŭ *ŭ* — simplan *u*. *La Esperantisto*, 1890, p. 32.

— Rim. 4: [Lingva Respondo (1890)]: Sinjoro F.-V. Lorenc konsilas, ke la presejoj, kiuj ne havas la signetojn superliterajn, uzu anstataŭ ili kaj anstataŭ *h* — apostrofon returnitan post la litero; ekzemple “ac,eti” anstataŭ “aĉeti” aŭ “acheti”. De nia flanko ni devas nur peti, ke se oni volos uzi tiun ĉi konsilon, oni ne forgesu klarigi en la komenco de la presata verko la signifon de tiu ĉi returnita apostrofo. *La Esperantisto*, 1890, p. 54-55.

— Rim. 5: [Lingva Respondo (1891)]: Vane vi timas, ke ni volas enkonduki novan ortografion (*h* anstataŭ signeto superlitera). La fina leĝo por nia ortografio estos: “por unu sono unu litero” kaj kiam ni nur povos, ni ĉiam uzados *ĉ* anstataŭ *ch* (povas nur esti, ke iom poste, por pli oportunigi la skribadon, ni donos al tiu ĉi litero pli simplan formon). La skribado de unu sono per du literoj estas tute ne logika kaj neniam povus esti aprobata; sed ni ĝin uzas nur kiel necesan unuatempan rimedon por doni al ĉiuj presejoj kaj al la telegrafo la eblon labori jam nun en nia lingvo. Sed kiam iom post iom la plej granda parto de la presejoj kaj telegrafejoj proviziĝos je nia alfabeto, tiam la uzado de superflua *h* estos absolute ĉesigita. Ne la *ĉ* estas transira ŝtupo al *ch*, sed en la *ch* ni proponis transiran ŝtupon al *ĉ*, kiam ni vidis, ke la absoluta enkonduko de *ĉ* estas ankoraŭ teĥnike ne oportuna. Tute vere vi diras, ke la presejoj kaj telegrafoj devas sin konformigi al la lingvo, kiun ili uzas, kaj ne la lingvo al ili; sed nia lingvo estas ankoraŭ juna kaj nepotenca kaj devas sin fleksi, se ĝi ne volas perei. Ne estas ankoraŭ tempo diri fiere al ĉiuj presistoj: “Se vi ne volas vin konformigi al ni, ni vin ne bezonas!” La unuatempa permeso presi per *h* estas necesa rimedo por ne fari ofte la presadon de ia verko tute ne ebla aŭ tro multekosta; sed kiu nur havas la eblon presi per signetoj superliteraj, tiu ĉiam devas ĝin fari. *La Esperantisto*, 1891, p. 15.

— Rim. 6: [Lingva Respondo (1908)]: La fundamentaj reguloj de nia lingvo permesas presi *h* anstataŭ supersigno; sed kio estas permesata por presado, tio ankaŭ estas permesata por skribado. Tiel same, kiel neniu povas protesti, se vi skribos ekzemple per artifikaj gotaj literoj anstataŭ per literoj ordinaraj, aŭ per literoj presaj anstataŭ skribaj, tiel same ankaŭ neniu povas protesti, se vi skribos per *h* anstataŭ supersignoj. Sed la demando estas, ĉu viaj *korespondantoj* estos kontentaj, se, skribante al ili, vi uzos la pli artifikan manieron kun *h* anstataŭ la pli simpla kun supersignoj. Tio ĉi sekve estas ne demando de permeso aŭ malpermeso, sed simple demando de *gusto*. Sed, se vi deziras anstataŭigi la supersignon en *ĉ* kaj *ŝ*, vi nepre devas anstataŭigi ĝin ankaŭ en *ĵ, ĥ* kaj *ĝ*, ĉar ĉiu el la ambaŭ skribmanieroj

aparte estas permesita en nia lingvo, sed uzado de ia skribmaniero *miksita* estus jam arbitraĵo kaj kondukus al ĥaoso. - Se vi volas skribi per *h* anstataŭ supersignoj, vi povas tion fari, ne bezonante demandi ies permeson; sed se vi volas uzi skribmanieron *miksitan*, aŭ — tiom pli — se vi volas uzi *sisteme* la tute novajn literojn *y* kaj *w*, anstataŭ *j* kaj *ŭ* (mi ne parolas pri *speciala*j teknikaj okazoj, kiam tio eble estas necesa) vi devas — se vi deziras esti lojala Esperantisto kaj ne enkonduki anarĥion en nian aferon — akiri por tio la permeson de la Lingva Komitato. Formulu klare vian deziron kaj prezentu ĝin al la voĉdonado de la Lingva Komitato, kaj se via propono estos akceptita per plimulto da voĉoj, ĝi fariĝos permeso oficiala. Sed memoru, ke pro la bono de nia afero la Lingva Komitato devas esti tre singarda kaj akcepti nur tion, kion ĝi trovas tute *sendanĝera*, efektive *grava* kaj sendube *utila*; tial se la Komitato malakceptos vian proponon, submetu vin discipline al ĝia decido kaj ne agu simile al tiuj personoj, kiuj, ne ricevinte aprobon de la Komitato, krias, ke la Komitato nenion taŭgas, ke ĝi ne estas aŭtoritata, ke ĝi nenion faras, k.t.p. - Principe la Lingva Komitato havas la rajton permesi en la lingvo ĉion, kion ĝi trovos necesa; mi neniam prezentos ian malhelpon, kaj ĉiun mature pripensitan kaj orde voĉdonitan decidon de la Komitato mi akceptos sendispute. Sed mi opinias, ke la vera celo de la Lingva Komitato tute ne konsistas en ia facilanima eksperimentado *sen grava neceseco*; ju malpli ni okupos niajn kapojn per diversaj “plibonigoj” kaj ju pli ni simple propagandos kaj riĉigos la lingvon, des pli bone estos. [Respondo 45, *La Revuo*, 1908, Aŭgusto].

Ĥĥ - h fortement aspiré | strongly aspirated h, „ch“ in „loch“ (scotch) | ch | x | ch [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **ĥo** ... [FE 1]. — **ĥo** [OA 7] = nomo de la litero **ĥ**, dekunua litero de la Esperanta alfabeto.

— **Lingva Respondo 1893 [Pri la nomoj de la literoj]**: La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. [LR 56 A, *Esperantisto*, 1893, p. 32].

— **Lingva Respondo 1902 [Pri ĥ]**: Pri la litero ĥ Vi {t.e. Theofilo Cart} estas tute prava. Se mi kreus la lingvon nun, havante jam tiom da sperto praktika, mi certe forĵetus tiun ĉi literon; sed nun mi persone jam havas nenian rajton fari ian ŝanĝon en la lingvo, - ŝanĝojn povas fari nur ia estonta Akademio. Tial doni al Vi oficiale la permeson skribi „kemio“ k.t.p. mi ne povas, ĉar per tio ĉi mi montrus, ke mi rigardas min kiel mastron de la lingvo; sed private mi povas diri al vi {tiel minuskle}, ke mi vian ideon aprobas kaj mi neniam protestos, se vi uzos en la vortaro ambaŭ formojn (kun k kaj kun ĥ). [LR 56 B, 1902, PVZ VI, 54 – Cart konsultis Z preparante sian vortaron Francan-Esperantan].

ha! - ah! | ah, alas | a! ach! | a! ахъ! | a! ach!. — [UL] [RE]. — [AK 1914] ha! ach! — Ha, kiel bele! [FE 26.23].

hajl’ - grêle | hail | Hagel | градъ | grad. {METE} — [UL]. [DL 1888] *Hieraŭ falis granda hajlo; ĉiu hajlero pezis pli ol kvindek gramojn [DL 12.2].*

hak’ - hacher, abattre | hew, chop | hauen, hacken | рубить | rąbać. – haki - hacher, abattre | hew, chop | hauen, hacken | рубить | rąbać [FE 34]. — [AK] couper, tailler à la hache. — [RE]. — Há-ki [FE 2]. — Per hakilo ni hakas, per segilo ni segas, per fosilo ni fosas, per kudrilo ni kudras, per tondilo ni tondas, per sonorilo ni sonoras, per fajfilo ni fajfas [FE 34.8].

● **hak’il’** - hache | hatchet, axe | Beil, Axt | топоръ | siekiera. — Per hakilo ni hakas ... [FE 34.8].

hal’ - halle | hall | Halle | зала (базарная) | halla. — [AK] {en} hall (*market, etc.*). — [MV].

haladz’ - exhalaison mauvaise | exhalation | Dunst | ураъ | swąd, czad. — [AK] {en} fume, exhalation. — [UL].

halebard-o [OA 2.1] {MIL} — [RE] [Beau] hallebarde.

halt’ - s’arrêter | come to a stop | anhalten, Halt machen, stocken | останавливиться | stawać, zatrzymywać się. — [UL].

hamak’ [OA 1] hamac | hammock | Hängematte | гамакъ | hamak. — [EG 2].

hamstr’ - hamster | hamster | Hamster | хомякъ | chomik. {ZOO} — [RE].

hangar/o. [OA 8] Granda ŝirmejo esence formita el metalĉarpenta tegmento subtenata de metalaj fostoj kaj uzata por enteni fojnon, kulturmaŝinojn, aviadilojn, aerostatojn, k.s. — A. hangar, storage

building; F. hangar; G. Schuppen, Halle, Hangar; H. {es} cobertizo, hangar; I. {it} tettoi, hangar, capannone, (avio)rimessa; P. {pt} hangar. — [PVS] {ne ĉe Z.}.

ĥaos' - chaos | chaos | Chaos | хаосъ {de 1918: хаос} | zamęt, chaos. — [RE]. [EV 1923]: kaos/o.

har' - cheveu | hair | Haar | волосъ | włos. – **haro** - cheveu | hair | Haar | волосъ | włos [FE 31]. — [AK] cheveu, poil. — [UL]. — Há-ro [FE 2]. Haro estas tre maldika [FE 33]. Ŝi kombas al si la harojn per arĝenta kombilo [FE 34].

● **har'ar'** - perruque | periwig | Perücke | парикъ | peruka. — [AK 1914] chevelure | Behaarung

● **har'eg'** - soie de cochon | bristle | Borste | щетина | szczecina.

● **har'lig'** - tresse de cheveux | weft of hair | Zopf | коса (волосъ) | warkocz, kosa. — [AK] {en} plait, tress of hair.

● **kol'har'o'j** - crinière | mane | Mähne | грива | grzywa [UV kol'].

● **lipharo** [FE 4] — Lip-há-ro [FE 3]. Liaj lipharoj estas pli grizaj, ol liaj vangharoj [FE 31].

● **okul'har'** - cils | eye-lash | Wimper | рѣсница | rzęsa [UV okul'].

● **vangharo** - Liaj lipharoj estas pli grizaj, ol liaj vangharoj [FE 31].

hard' - endurcir | harden | abhärten | закалять | hartować. — [MV].

harem-o [OA 2.1] — [RE]. [Beau] harem.

haring' - hareng | herring | Häring | селедка | śledź. {ZOO} — [UL].

harmoni' [OA 1] * harmonie | harmony | Harmonie | гармонія | harmonja. — [RE].

harmonik-o [OA 2.1] — [RE]. [Beau] harmonika.

harmonium-o [OA 2.1] — [EG 2].

harp' - harpe | harp | Harfe | арфа | arfa. {MUZ} — [RE A].

harpi-o [OA 2.1] {MIT} — [Beau] Harpi {majuskle}, Harpie (Myth.).

harpun' [OA 1] harpon | harpoon | Harpune | гарпунъ | harpun. {MAR} — [Beau] harpon (pêche).

haŭt' - peau | skin | Haut | кожа | skóra. {ANAT} — [AK] {en} skin (*subst.*). — [UL].

hav' - avoir | have | haben | имѣть {de 1918: иметь} | mieć. — **havi** - avoir | have | haben | имѣть {de 1918: иметь} | mieć [FE 10]. — [UL]. — Por ke lingvo internacia ... havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos ... [A 1.1]. ... aŭtoritata komitato, ..., havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, ... [A 1.2]. Neniu persono ... devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon! [A 1.4]. ... neniu havas la rajton ... [A 3.1]. ... ĉiu esperantisto havu la plenan certecon, ke ... [A 3.2]. ... la uzanto ne havus la certecon, ke ... [A 4.6]. ... neniu havas la rajton ... [A 4.7]. ... nia lingvo havos la plenan eblon ... pliboniĝadi kaj perfektiĝadi [A 6.3]. ... tiamaniere ni havos la certecon, ke ... [A 8.3]. ... ia centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro [A 9.4]. — Mi havas pli freŝan panon, ol vi [FE 10.16]. Unu vidvino havis du filinojn [FE 11.1]. Mi havas nur unu buŝon, sed mi havas du orelojn [FE 12.2]. Li havas dek unu infanojn [FE 12.11]. Kiun daton ni havas hodiaŭ? [FE 12.17]. ... kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna [FE 13.1]. Mi havas cent pomojn [FE 14.1]. Mi havas centon da pomoj [FE 14.2]. Tiu ĉi urbo havas milionon da loĝantoj [FE 14.3]. Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; ... [FE 14.16]. Kiam oni estas riĉa (aŭ riĉaj), oni havas multajn amikojn [FE 16.21]. Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas; ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman kapablon? [FE 17.10]. Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn; post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo [FE 18.15]. Mi jam havas mian ĉapelon; nun serĉu vi vian [FE 18.16]. ... tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, ... [FE 23.3]. Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo [FE 32.8]. „Da" post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro [FE 32.14]. Mi havas bovon kaj bovinon [FE 33.21]. Ĉu vi havas korktirilon, por malŝtopi la botelon? [FE 34.2]. Nia urbo havas bonajn policanojn, sed ne sufiĉe energian policestron [FE 37.7]. Ni havas diversajn servantojn: kuiriston, ĉambristinon, infanistinon kaj veturigiston [FE 37.18]. La riĉulo havas multe da mono [FE 37.19]. La diamanto havas belan brilon [FE 40.10]. Mi kredeble ne povos veni al vi hodiaŭ, ĉar mi pensas, ke mi mem havos hodiaŭ gastojn [FE 41.8]. La sufikso «um» ne havas difinitan signifon, ... [FE 42.9].

● **havante** — Havante la karakteron de fundamento, la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti netuŝeblaj [A 4.1].

● **havata** — Mono havata estas pli grava ol havita [FE 22.12].

● **havita** — Mono havata estas pli grava ol havita [FE 22.12].

● **enhavi** — Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklaraĵon [FE 35.4].

haven' - port, hâvre | port, harbour | Hafen | гавань | przystań, port. — [RE].

hazard-o [OA 2.1]. — [RE A] [Beau] hasard.

he [OA 1] * he! | eh! | he! holla! heda! | hej! — [RE].

hebreo - juif | Jew | Jude | еврей | żyd [FE 36, mankas en UV]. — [1888] [RE]. — La hebreoj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas de Izraelo [FE 36.13]. — **hebre'** [OA 1] juif, hebreu | Hebrew | Hebräer | еврей | żyd. – **hebre'** [OA 7] (1-a Oficiala Aldono; nomo de ano de popolo).

heder' - lierre | ivy | Epheu {2012: Efeu} | плющъ | bluszcz. {BOT} — [RE].

heĝ/o. [OA 8] Barilo el interplektitaj arbedoj. — A. hedge; F. haie, haie vive; G. Hecke, (Hag); H. {es} seto, cerco; I. {it} siepe, chiudenda; P. {pt} cerca viva. — [EV 1923] {ne ĉe Z.}.

Hegemoni-o, [OA 4] {fr} hégémonie | {en} hegemony | {de} Vorherrschaft {2012 ankaŭ: Hegemonie} | {it} egemonia | {es} hegemonía | {pt} hegemonia | {ca} hegemonia. — [EV 1923].

hejm' - maison, patrie | home | daheim, Heimat | дома | dom, ojczyzna. — [AK] le chez soi, le foyer domestique. — [RE].

hejt' - chauffer, faire du feu | heat (vb.) | heizen | топить (печку) | palić (w piecu). — **hejti** - chauffer, faire du feu | heat (vb.) | heizen | топить (печку) | palić (w piecu) [FE 16]. — [UL]. — En la vintro oni hejtas la fornojn [FE 16.20].

● **hejto** — Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3].

hekatomb' [OA 1] * hecatombe | hecatomb | Hekatombe | гекатомба | hekatomba. {RELI} — [EG 2].

heksametr-o [OA 2.1] {MEZ} — [Beau] hexamètre.

hektar' [OA 1] * hectare | hectare | Hektar | гектаръ | hektar. {MEZ} — [Beau] hectare.

hektogram-o [OA 2.1] {MEZ} — [Beau] hectogramme.

hektolitr-o [OA 2.1] {MEZ} — [Beau] hectolitre.

hektometr-o [OA 2.1] {MEZ} — [Beau] hectomètre.

hel' - clair (qui n'est pas obscur) | clear, glaring | hell, grell | яркій | jasny, jaskrawy. — **hela** - clair (qui n'est pas obscur) | clear, glaring | hell, grell | яркій | jasny, jaskrawy [FE 10]. — [AK] {en} light, clear. — [RE]. — En la tago ni vidas la helan sunon, kaj en la nokto ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn [FE 10.13].

● **nehela** — Ne-hé-la [FE 2].

Helic-o (meĥ.) [OA 4] {fr} {(meĥ.) mankas en Kajero II}, hélice (méc.) | {en} screw, propeller | {de} Propeller, Schiffsschraube | {it} elica | {es} hélice | {pt} hélice | {ca} hélix {legu: hèlix). {MEK} — [EG 2] (geometr.) Schnecke, Schneckenlinie.

helik-o [OA 2.2] escargot | snail | Weinbergschnecke {ZOO} — [EG 2].

helikopter/o. [OA 8] Flugmaŝino ekipita per granda vertikalaksa helico kaj kapabla sin levi kaj mallevi vertikale, sin movi en la aero aŭ tie ŝvebi. — A. helicopter, F. hélicoptère, G. Hubschrauber, H. {es} helicóptero, I. {it} elicottero, P. {pt} helicóptero. — [EV 1923] {ne ĉe Z.}.

heliotrop-o [OA 2.1] {BOT} — [Beau] héliotrope.

help' - aider | help | helfen | помогать | pomagać. — **helpi** - aider | help | helfen | помогать | pomagać [FE 30]. — [UL]. — Rakontu al mi vian malfeliĉon, ĉar eble mi povos helpi al vi [FE 41.5].

● **helpo** - ... ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj) [FE 30.10]. Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron [FE 34.14]. — Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enk. 1].

● **kunhelpo** — ... eldonitaj tre bone kaj zorgeme, sub mia persona kontrolo kaj kunhelpo [A 5.3].

● **kun helpo de** - à l'aide de | by means of | mit Hülfe {plus genitivo} {de 1901: mit Hilfe} [UV, enk. 1].

● **mal'help'** - déranger, empêcher | hinder | stören, hindern | мѣшать, препятствовать | przeszkadzać. — Oni tiel malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron [FE 33.14]. Forigu vian fraton, ĉar li malhelpas al ni [FE 39.6].

● **malhelpante** — ... la severa netuŝebleco de la « Fundamento » gardos ĉiam la unuecon de nia lingvo, ne malhelpante tamen al la lingvo ... perfektiĝadi [A 9.1].

— **Rim.**: En [DL 1888] krome: *helpa* [DL 17.56.2]. *helpanto* [DL 14.16]. *helpemo* [DL A.12].

ĥemi' - chimie | chemistry | Chemie | химія | chemia. — **ĥemio** - chimie | chemistry | Chemie | химія | chemia [FE 32]. — Ĥe-mí-o [FE 2]. Ĥemio [FE 4]. — [OA 8] II.A.1. La ses formoj: alkemio, arkaismo, arkitekturo, kemio, mekaniko kaj monarko estas oficialigitaj kiel paralelaj al la Oficiala alĥemio kaj al la Fundamentaj arĥaismo, arĥitekturo, ĥemio, meĥaniko kaj monarĥo.

Henriet' - Henrietta [UV nj' angla]. — **Henriet'** {deklarita Fundamenta de} [OA 7] (virina antaŭnomo)

● **Henri'nj'**, **He'nj'** - Hetty [UV nj' angla]

hepat' - foie | liver | Leber | печень | wątroba. {ANAT} — [RE].

herb' - herbe | grass | Gras | трава | trawa. — **herbo** - herbe | grass | Gras | трава | trawa [FE 34]. — [UL].

● **herb'ej'** - pré, prairie | meadow, green field | Wiese | лугъ | łąka.

● **herboriĉa** - Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj ... [FE 34.15]

hered' - hériter | inherit | erben | наслѣдовать {de 1918: наследовать} | dziedziczyć. {JUR} — [UL].

herez' - hérésie | heresy | Ketzerei | ересь | kacerstwo, herezja. {RELI} — [RE].

hermafrodit-o [OA 2.1] {ZOO} — [RE]. [Beau] (un) hermaphrodite.

herni' - hernie | hernia | Bruch (Heilk{unde}) | грыжа | ruptura, przepuklina. {MED} — [AK] {en} hernia, rupture (*med.*). — [RE].

hero' - héros | hero, champion | Held | герой | bohater. — **heroo** - héros | hero, champion | Held | герой | bohater [FE 35]. — [AK] {en} hero. — [1888] [RE]. — He-ró-o [FE 3].

● **heroeco** — Lia heroeco tre plaĉis al mi [FE 35.17].

● **heroeto** — He-ro-é-to [FE 3].

● **heroino** — He-ro-í-no [FE 3]. Heroino [FE 4].

● **heroi** — He-ró-i [FE 3]

herold' [OA 1] * heraut | herald | Herold | герольдъ | herold. — [RE].

hetman-o [OA 2.1]. {HIST}{MIL} — [RE A].

Hezit' [OA 3.1] {en} to hesitate | {fr} hésiter | {de} zaudern | {es} hesitar | {pt} hesitar | {it} esitare | {pl} wahac sie {legu: wahać się}. — [EV 1923] {antaŭe ŝancel/iĝ/i}.

hiacint' [OA 1] jacinthe | hyacinth | Hyazinthe | гіацинтъ | hiacynt. {BOT} — [RE].

hidrarg' - vif-argent {2012: ark.}, mercure | quicksilver | Quecksilber | ртуть | rtęć. {KEM} — [RE].

hidr-o [OA 2.1] {MIT} — [RE]. [Beau] hydre.

hidrofobi' [OA 1] hydrophobie | hydrophobia | Wasserscheu | водобоязнь, гидрофобія | wodowstręt. — [EG 2].

hidrogen' - hydrogène | hydrogen | Wasserstoff | водородъ | wodór. {KEM} — [RE].

hidrostatik-o [OA 2.1] {FIZ} — [RE] [Beau] (l') hydrostatique.

hidroterapi-o [OA 2.1] {MED} — [Beau] hydrothérapie.

hien' [OA 1] * hyène | hyena | Hyäne | гіена | hiena. {ZOO} — [RE].

Hierarĥi', hierarki' [OA 3.2] {en} hierarchy | {fr} hiérarchie | {de} Hierarchie | {es} jerarquia | {pt} hierarchia {legu: hierarquia} | {it} gerarchia | {pl} hierarchja. — [RE] –rĥ-.

hieraŭ - hier | yesterday | gestern | вчера | wczoraj. — **hieraŭ** - hier | yesterday | gestern | вчера | wczoraj [FE 20]. — [UL]. [DL]. — Hieraŭ mi renkontis vian filon, kaj li ĝentile salutis min [FE 20.3]. Hieraŭ estis vendredo, kaj postmorgaŭ estos lundo [FE 20.5]. Hieraŭ li diris al mi la veron [FE 24.2].

● **hieraŭa** — Lia hieraŭa parolo estis tre bela, sed la tro multa parolado lacigas lin [FE 40.6].

hieroglif-o [OA 2.1] — [Beau] hiéroglyphe.

higien' [OA 1] * hygiene | hygiene | Hygiene | гигіена | hygjena. — [RE].

higrometr-o [OA 2.1] {METEO} — [Beau] hygromètre.

ĥimer' - chimère | chimera | Chimäre | химера | chimera.

himn' [OA 1] * hymne | hymn | Hymne | гимнъ | hymn. {MUZ} — [RE].

hipertrofi-o [OA 2.1] {BIO} — [EG 2] (biol.) Hypertrophie.

Hipnot-o, [OA 4] {fr} sommeil hypnotique | {en} hypnotic sleep | {de} Zwangsschlaf {2012 pli kutima: Hypnose} | {it} sonno ipnotico | {es} hipnosis, sueño hipnótico | {pt} sono hipnótico {preferinda: hipnose, estado hipnótico, ĉar "sono hipnótico" estas "hipnota dormo"} | {ca} estat hipnótic {legu: estat hipnòtic}. — [Beau] hypnose.

hipodrom-o [OA 2.1] — [Beau] hippodrome.

hipokrit' - faire l'hypocrite | feign, play the hypocrite | heucheln | лицемѣрить | być obłudnikiem. — [AK] feindre, farie l'hypocrite. — [RE].

hipopotam' [OA 1] hippopotame | hippopotamus | Nilpferd | гиппопотамъ | hipopotam. {ZOO} — [EG 2].

hipotek' [OA 1] * hypothèque | mortgage | Hypothek | ипотека | hipoteka. {JUR} — [EG 2].

hipotez' [OA 1] * hypothèse | hypothesis | Hypothese | гипотеза | hipoteza. — [RE].

Hirt' [OA 3.1] {en} bristly, rough | {fr} hérissé | {de} struppig | {es} erizado | {pt} hirto | {it} irto | {pl} szorstki. — [EG 2].

hirud' - sangsue | leech | Blutegel | піявка | pijawka. {ZOO} — [RE].

hirund' - hirondelle | swallow (bird) | Schwalbe | ласточка | jaskółka. {ZOO} — **hirundo** - hirondelle | swallow | Schwalbe | ласточка | jaskółka [FE 26]. — [RE]. — Hi-rún-do [FE 2]. — La hirundo flugis trans la riveron, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj [FE 26.14].

hiskiam' - jusquiame | henbane | Bilsenkraut | бѣлена | szaleń. {BOT} — [RE].

hisop-o [OA 2.1] {BOT} — [Beau] hysope.

Hispano - Espagnol | Spaniard | Spanier | Испанецъ | Hiszpan [FE 34, mankas en UV]. — **hispan'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (nomo de ano de popolo). — [DL].

● **hispana** — Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron [FE 34.14].

● **Hispanujo** — Mi vojaĝas en Hispanujo [FE 26.5]. Mi vojaĝas en Hispanujon [FE 26.6]. — [DL 1888] *Hispanujo estas parto de Eŭropo* [DL 15.11].

histeri' [OA 1] hystérie | hysterics | Hysterie | истерія | histerja. — [EG 2]. Antaŭe [RE] [Beau] **histerik**, hystérie.

histori' - histoire | history, story | Geschichte | исторія | historya. — **historio** - histoire | history, story | Geschichte | исторія | historja [FE 10]. — [DL]. — Rakontu al mia juna amiko belan historion [FE 10.6]. Mi rakontos al vi historion [FE 18.6]. Li rakontis al mi historion tute nekredeblan [FE 41.6]. — [DL 1888] *Anstataŭ provi praktike ... ili parolis pri la fiziologio kaj historio de l' lingvoj vivaj ...* [DL I.] *La historio de la civilizado estas tre interesa* [DL 7.17]. *Mirinda estas la historio de lia familio: ...* [DL 13.9]. *Ne tiel la perdo de l' ombro mem lin ĉagrenis, kiel tio, ke en la malvarmaj landoj estas rakontata unu ĉiukonata historio pri homo sen ombro* [DL 17.7]. *Sed kiu konas iom la historion de la lingvoj, tiu komprenos, ke tiu timo estas tute senfonda ...* [DL-Ald.].

histrik' - porc-épic, hérisson | porcupine | Stachelschwein | дикобразъ | jeż cudzoziemski. {ZOO} — [AK] porc-épic. — [RE].

ho! - oh! | oh! | oh! och! | o! охъ! | o! och!. — **ho** - oh! | oh! | o! och! | o! охъ! | o! och! [FE 21]. — [AK 1914] {en} oh! | {de} o! ach! oh! — [UL] **ho!** - oh! | oh! | o! och! | o! охъ! | o! och!. — [RE A]: ho ve!. — La « Fundamento de Esperanto » tute ne devas esti rigardata kiel la plej bona lernolibro kaj vortaro de Esperanto [A 5.1]. Ho, ne! [A 5.2]. Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos... [A 6.2] Ho, ne! [A 6.3]. — „Ho, ĉielo!" ekkriis la patrino, „kion mi vidas?" [FE 21.3]. „Ho ve, sinjoro, mia patrino forpelis min el la domo" [FE 21.8]. Ho, Dio! kion vi faras! [FE 26.22]. — **Rim**.: **1.** La neceso de angla AK ne estas klara. De UL la formo ĉiam estis **ho!**. **2.** Kp. *Ho, kiel mi estas laca!* [DL 6.10].

hoboj' [OA 1] hautbois | oboe | Hoboe {2012: Oboe} | гобой | oboj. — [EG 2].

hodiaŭ - aujourd'hui | to-day | heute | сегодня | dziś. — **hodiaŭ** - aujourd'hui | to-day | heute | сегодня | dziś [FE 10]. — [UL]

[DL]. — Ho-dí-aŭ [FE 3]. Hodiaŭ [FE 4]. — Kia ĝoja festo! (estas hodiaŭ) [FE 10.11]. Kiun daton ni havas hodiaŭ? [FE 12.17] — Hodiaŭ estas la dudek sepa (tago) de Marto [FE 12.18]. Venu al mi hodiaŭ vespere [FE 18.5]. Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn; post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo [FE 18.15]. Hodiaŭ estas sabato, kaj morgaŭ estos dimanĉo [FE 20.4]. Ĉu hodiaŭ estas varme aŭ malvarme? [FE 25.13]. Mi restos hodiaŭ dome [FE 28.5]. Li estas hodiaŭ en kolera humoro [FE 31.2]. Hodiaŭ estas bela frosta vetero, tial mi prenos miajn glitilojn kaj iros gliti [FE 34.7]. Gesinjoroj N. hodiaŭ vespere venos al ni [FE 36.3]. La doktoredzino A. vizitis hodiaŭ la gedoktorojn P. [FE 36.10]. Mi kredeble ne povos veni al vi hodiaŭ, ĉar mi pensas, ke mi mem havos hodiaŭ gastojn [FE 41.8]. — [DL 1888]: Dekkvin trafoj.

● **hodiaŭa** — Por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, t. e. (= tio estas) dek frankojn [FE 14.7].

hok' - croc, crochet | hook | Haken, Angel | крюкъ | hak. — [RE].

● **fiŝ'hok'** - hameçon | fishing-hook | Fischangel | уда, удочка | wędka.

● **pord'hok'** - gond (d'une porte) | hinge (of a door) | Thürangel {de 1901: Türangel} | дверной крюкъ | zawiasa.

ĥoler' - choléra | cholera | Cholera | холера | cholera {MED}. — Ĥo-lé-ro [FE 2]. — **Rim.**: En 1906 Z proponis al la LK tute elĵeti la literon „ĥ" kaj anstataŭigi „ĥoler'" per „holero" [LZ I 315].

hom' - homme (l'espèce) | man | Mensch | человѣкъ | człowiek. — **hom'** - homme | man | Mensch | человѣкъ | człowiek [UV –a]. — **hom'o** - homme - **hom'o'j** - hommes [UV –j]. — **homo** - homme | man | Mensch | человѣкъ | człowiek [FE 6]. — [AK] {en} man (*the species*). — [UL]. — Infano ne estas matura homo [FE 6.1]. Mi ne amas obstinajn homojn [FE 10.7]. Du homoj povas pli multe fari ol unu [FE 12.1]. Ni estas homoj [FE 16.5]. Mi amas min mem, vi amas vin mem, li amas sin mem, kaj ĉiu homo amas sin mem [FE 18.12]. Al homo, pekinta senintence, Dio facile pardonas [FE 22.4]. La falinta homo ne povis sin levi [FE 22.6]. Homo, kiun oni devas juĝi, estas juĝoto [FE 22.16]. Honesta homo agas honeste [FE 25.11]. La ekstero de tiu ĉi homo estas pli bona, ol lia interno [FE 31.13]. Sur la bordo de la maro staris amaso da homoj [FE 32.9]. Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj [FE 32.12]. En la ĉambro sidis nur kelke da homoj. [FE 32.13]. Ni forte malestimas tiun ĉi malnoblan homon [FE 33.8]. La riĉeco de tiu ĉi homo estas granda, sed lia malsaĝeco estas ankoraŭ pli granda [FE 35.15]. La Parizanoj estas gajaj homoj [FE 37.5]. Li estas homo ne kredinda [FE 41.9]. Li estas tre kredema: eĉ la plej nekredeblajn aferojn, kiujn rakontas al li la plej nekredindaj homoj, li tuj kredas. [FE 41.14]. Malfeliĉo ofte kunigas la homojn, kaj feliĉo ofte disigas ilin [FE 42.2].

● **hom'a** - humain | human | menschlich | человѣческій | ludzki [UV –a].

homeopat' (1) [OA 7] — [Kabe].

homeopati' [OA 1] homéopathie | homeopathy | Homöopathie | гомеопатія {de 1918: гомеопатия} | homeopatja {de 1936: homeopatia}. {MED} — [RE].

homonim' [OA 1] * homonyme | homonym | Homonym | омонимъ | homonim. — [EG 2] homonima.

honest' - honnête | honest | ehrlich | честный | uczciwy. — **honesta** - honnête | honest | ehrlich | честный | uczciwy [FE 11]. — [UL]. — "Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas fari al vi donacon" [FE 15.5]. Karaj infanoj, estu ĉiam honestaj! [FE 20.17]. Honesta homo agas honeste [FE 25.11].

● **honeste** — Honesta homo agas honeste [FE 25.11].

● **honesteco** — La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi [FE 11.3].

honor' - honorer | honor | ehren | чтить | czcić. — [AK] {en} honour (*vb*.).

● **honor'o** - honneur | honour | ehren {mankas AK, legu: Ehre} | честь | cześć, zaszczyt. — [1888]. [RE].

HONORARIO [OA 6.1] *Neperioda pago por servo, plej ofte de persono, kiu praktikas liberalan profesion, ekz. advokato, kuracisto* | {en} honorarium | {fr} honoraires | {de} Vergütung, Entgelt (für eine einzelne Leistung in einem geistigen Berufe) {2012: Honorar} | {es} honorarios | {it} onorario (sost.) | {pl} honorarjum. — [EG 2].

hont' - avoir honte | shame | sich schämen | стыдиться | wstydzić się. — **honti** - avoir honte | be ashamed | sich schämen | стыдиться | wstydzić się [FE 39]. — [AK] {en} be ashamed. — [UL].

● **honto** — Li paliĝis de timo kaj poste li ruĝiĝis de honto [FE 39.2].

hor' - heure | hour | Stunde | часъ {post 1918: час} | godzina. — **horo** - heure | hour | Stunde | часъ {post 1918: час} | godzina [FE 12]. — [UL] [DL]. — Hó-ro [FE 2]. — Sesdek minutoj faras unu horon, kaj unu minuto konsistas el sesdek sekundoj [FE 12.12]. Kiam li estis ĉe mi, li staris tutan horon apud la fenestro [FE 26.16]. Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3]. — [DL 1888] Dektri trafoj.

● **pachoro** — Pac-hó-ro [FE 2]. {RELI} — **Rim.**: **1.** Ne tute klara vorto, ŝajne nenie tradukita. Probabla signifo: (arkaa) paŭza, ofte vespera horo, dum kiu oni ne laboras, sed preĝas kaj meditas. Do paŭsaĵo (kalkeo) de la germana *Friedensstunde*, kp. en prediko de Albert Schweitzer (1898-1948): „Nur der ist stark für den kommenden Tag, der am Abend die *Friedensstunde* im Gebet erlebt." („Nur tiu estas forta por la venonta tago, kiu vespere spertas la *pachoron* dum preĝado."). **2.** Kp. „packapo".

● **seshora** — Ses-hó-ra [FE 2]. Seshora [FE 4].

ĥor' - chœur | chorus, choir | Chor | хоръ | chór. {MUZ} — Ĥó-ro [FE 2]. — **Rim.**: En Novembro 1906 Z proponis al la LK i.a. tute elĵeti la literon „ĥ" kaj anstataŭigi „ĥor'" per „koruso" [LZ I 315].

horde' - orge | barley | Gerste | ячмень | jęczmień. {BOT} — [RE].

horizont' [OA 1] * horizon | horizon | Horizont | горизонт | horyzont. — [RE].

horizontal' - horizontal | horizontal | wagerecht | горизонтальный | poziomy. — [RE].

horloĝ' - horloge, montre | clock | Uhr | часы | zegar. — **horloĝo** - horloge, montre | clock | Uhr | часы | zegar [FE 20]. — [UL] [DL]. — Ĉu vi jam trovis vian horloĝon? [FE 20.7]. Mi ĝin ankoraŭ ne serĉis; kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin jam ne trovos [FE 20.8].

hormon/o [OA 9] **1** Substanco produktata de organo (ofte de glando), portata de la sango al aliaj organoj aŭ ĉeloj por influi ties funkciadon. — [PIV 1970]. **2** Substanco en vegetaĵo, funkcianta analoge al hormono *1* (plej ofte influanta la kreskadon de la vegetaĵo). — [PIV 1970].

horoskop-o [OA 2.1] — [Beau] horoscope. [EG 2] Horoskop.

hortensi-o [OA 2.2] hortensia | hydrangea | Hortensia {BOT} — [Beau] hortensia. [EG 2] Hortensia.

hortulan' - ortolan | ortolan | Gartenammer {2012 ankaŭ: Ortolan} | овсянка | poświerka. {ZOO} — [AK] {en} ortolan (*bird*). — [RE].

hospital' [OA 1] hôpital | hospital | Hospital | больница | szpital. {MED} — [RE].

hosti' - hostie | host | Weihbrod {2012: Hostie} | просвора | hostya {de 1936: hostia}. {RELI} — [AK] {en} host (*consecrated wafer*) — [RE].

hotel' - hôtel | hotel | Herberge, Gasthaus {2012: Hotel} | гостинница | hotel, zajazd. — [UL].

huf' - sabot, corne | hoof | Huf | копыто | kopyto. — [AK] sabot (*d'animal*) — [RE]. [Beau] sabot (enveloppe cornée qui entoure le pied des ruminants, etc.) {*corne* estas korno}.

● **bathufo** — Bat-hú-fo [FE 2].

human' [OA 1] humain | humane | human | гуманный | humanitarny. — [RE]. [Beau] **human**, qui a de l'humanité, humain (qui montre de la sympathie pour les hommes).

humer-o (*anat.*) [OA 2.1] {ANAT} — [Beau] humérus. [EG 2] Oberarm, Humerus.

humid/a. [OA 8] Entenanta ian kvanton da likvo aŭ vaporo. — A. damp, humid; F. humide, G. feucht, H. {es} húmedo, (húmido), I. {it} umido, P. {pt} úmido. — [PVS] {ne ĉe Z; antaŭe mal'sek'et'a, ekz. Chris 1923}.

humil' - humble | humble | demüthig {de 1901: demütig} | покорный | pokorny. — [UL].

Hum-o, [OA 4] {fr} humus, terre végétale | {en} humus, vegetable mould | {de} Gartenerde {2012 ankaŭ: Humus} | {it} *humus*, terra vegetale | {es} *humus*, tierra vegetal | {pt} *humus* {legu: húmus (sen kursivo), ankaŭ estas uzata la formo "humo"} | {ca} *humus*. — [EG 2] Humus.

humor' - humeur (caractère) | humor | Laune | расположеніе духа | humor. —

humoro - humeur | humor | Laune | расположеніе духа | humor [FE 31]. — [AK] {en} temper, humour. — [RE]. — Li estas hodiaŭ en kolera humoro [FE 31.2].

hund' - chien | dog | Hund | песъ {de 1918: пёс}, собака | pies. {ZOO} — **hundo** - chien | dog | Hund | песъ {de 1918: пёс}, собака | pies [FE 12]. — [UL]. — Li promenas kun tri hundoj [FE 12.3]. Mia hundo, vi estas tre fidela [FE 16.18]. Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, kion fari [FE 38.10].

hungaro [OA 8] — [EG 2] Ungar.

Hura' [OA 3.2] {en} hurrah | {fr} hourra | {de} hurrah {legu: hurra} | {es} hurra | {pt} hurra | {it} urra | {pl} --- {traduko mankas}. — [DL]. [RE 213]: Ура! *hura!*. — **Rim.**: Preseraro (troa apostrofo); la baza formo ne estas *hura-o* (substantivo), sed de DL tra RE ĉiam *hura!* (interjekcio), kiel cetere montras ankaŭ la tradukoj (se temus pri substantivo, la germana devus havi majusklon). — [DL 1888] *Hura! vivu la reĝo!* [DL 6.12].

husar' - houssard | hussar | Husar | гусаръ | huzar. {MIL} — [RE]. — **Rim.**: Kp. arkaan huzar' (kun –z-) en Blov 1888, 9 kaj 16.

huz' - grand esturgeon | huso, sturgeon | Hausen | бѣлуга | wyz. {ZOO} — [RE].

I

Ii - i | i as in "marine" | i | и | i [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **i** ... [FE 1]. — **i** [OA 7] = nomo de la litero **i**, dekdua litero de la Esperanta alfabeto.

— **Lingva Respondo 1893**: La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. [*Esperantisto*, 1893, p. 32].

i - marque l'infinitif; ex. laŭd'i louer | termination of the infinitive in verbs; e. g. laŭd'i to praise | bezeichnet den Infinitiv; z. B. laŭd'i loben | означаетъ неопредѣленное наклоненіе; напр. laŭd'i хвалить | oznacza tryb bezokoliczny słowa; np. laŭd'i chwalić. — **i** - marque l'infinitif | termination of the infinitive in verbs | bezeichnet den Infinitiv | означаетъ неопредѣленное наклоненіе | oznacza tryb bezokoliczny słowa [FE 7]. — **i** - L'*infinitif*, {est caractérisé} par *i*: *far'i* — faire. | The infinitive mood ends in *i*, e. g. *fari*, „to do". | Der Infinitiv {endet} — auf *i*; z.B. *far'i*, machen. | Неопредѣленное наклоненіе — *i* (*far|i* дѣлать). | Tryb bezokoliczny — *i* (*far/i* czynić). [FG 6e]. — [UL].

— **Lingva Respondo 1907 [Pri la infinitivo]**: Kiel ni diras "mi vidis lin sana" (= "ke li estas sana") - tiel laŭ mia opinio ni povas ankaŭ diri "mi vidis lin kuri" (= "ke li kuras"), "mi aŭdis lin paroli" (= "ke li parolas"); sed la esprimojn "li faris ĉion sen ridi" aŭ "li restis du tagojn sen manĝi" mi *ne* konsilus al vi uzi. Prepozicion antaŭ verbo mi konsilus uzi nur en okazo de *neceseco*, se alie ni *povas* bone esprimi nian penson. Sed anstataŭ "sen ridi" aŭ "sen manĝi" ni povas ja tre bone diri "sen rido", "sen manĝo" aŭ "neniom ridante", "neniom manĝante". [LR 113 B, Respondo 20, *La Revuo*, 1907, Junio].

— **Lingva Respondo 1908 [Pri infinitivo post verbo]**: Mi ne tute klare komprenis la esencon de via demando. Ŝajnas al mi, ke vi ne demandas pri io, sed vi simple esprimas vian opinion, ke en Esperanto oni uzas la infinitivon nur aŭ en formo de rekta komplemento (ekzemple "mi amas danci"), aŭ en formo de nerekta komplemento kun la prepozicioj "por", "antaŭ (ol)", "anstataŭ", kaj ke en ĉiuj okazoj, kiam oni bezonas uzi la infinitivon kun iu alia prepozicio, oni devas uzi anstataŭ ĝi *participon* aŭ *substantivon kun prepozicio* (ekzemple: "li foriris, ne preminte lian manon" aŭ "sen premado de lia mano" anstataŭ "sen premi lian manon"). Via opinio ŝajnas al mi ĝusta. [LR 113 A, Respondo 30, *La Revuo*, 1908, Februaro].

ia - quelconque, quelque | of any kind | irgend welcher | какой-нибудь | jakiś. — **ia** - quelconque | of any kind | irgend welcher | какой-нибудь | jakiś [FE 28]. — **ia** - quelconque, quelque | of any kind | irgend welcher | какой-нибудь | jakiś [FE 30]. — [AK] {en} of some kind, any. — Por ke lingvo internacia ... havu plenan certecon,

ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj ... [A 1.1]. — ... en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon „n" tute egale ĉu ia prepozicio starus aŭ ne [FE 28.3]. El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon [FE 29.8]. Ia, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu. La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni ... [FE 30.1-2].

ial - pour une raison quelconque | for any cause | irgend warum | почему-нибудь | dla jakiejś przyczyny. — **ial** - pour une raison quelconque | for any cause | irgend warum | почему-нибудь | dla jakiejś przyczyny [FE 30]. — [AK] {en} for some cause. — Ia, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu. La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni ... [FE 30.1-2].

iam - jamais, un jour | at any time, ever | irgend wann, einst | когда-нибудь | kiedyś. — **iam** - jamais, un jour | at any time, ever | irgend wann | когда-нибудь | kiedyś [FE 28]. — **iam** - jamais, un jour | at any time, ever | irgend wann, einst | когда-нибудь | kiedyś [FE 30]. — [AK] {en} at some time, ever. — Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron oficialan, kiel «Aldonon al la Fundamento» [A 7.2]. ... neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj [A 8.3].— I-am [FE 2]. — Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj [FE 28.2]. Ia, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu. La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni ... [FE 30.1-2].

— **Rim.**: UL kaj DL *ian* (kun –n); iam (kun –m) de post DL Ald 1888: „La sola ŝanĝo, kiun mi {Zamenhof} trovas necesa fari mem, estas: anstataŭ „ian," „ĉian," „kian," „nenian," „tian" - devas esti: „iam," „ĉiam," „kiam," „neniam," „tiam" (por malegaligi la vortojn „ian" etc. kaj „ia,n" etc)."

ibis' - ibis | ibis | Ibis | ибисъ | łukodziób. {ZOO} — [RE].

id' - enfant, descendant; ex. bov' bœuf - bov'id' veau; Izrael' Israël - Izrael'id' Israëlite | descendant, young one; e. g. bov' ox - bov'id' calf | Kind, Nachkomme; z. B. bov' Ochs - bov'id' Kalb; Izrael' Israel - Izrael'id' Israelit | дитя, потомокъ; напр. bov' быкъ - bov'id' теленокъ; Izrael' Израиль - Izrael'id' израильтянинъ | dziecię, potomek; np. bov' byk — bov'id' cielę; Iszrael' Izrael - Izrael'id' Izraelita. — **id** - enfant, descendant; ex. bovo bœuf - bovido veau; Izraelo Israël - Izraelido Israëlite | descendant, young one; e. g. bovo ox - bovido calf | Kind, Nachkomme; z. B. bovo Ochs - bovido Kalb; Izraelo Israel - Izraelido Israelit | дитя, потомокъ; напр. bovo быкъ - bovido теленокъ; Izraelo Израиль - Izraelido Израильтянинъ | dziecię, potomek; np. bovo byk - bovido cielę; Izraelo Izrael - Izraelido Izraelita [FE 36]. — [UL].

● **birdido** — ... birdido [estas] nematura birdo [FE 36.14].

● **bov'id'** - veau | calf | Kalb | теленокъ | cielę [UV id']. — **bovido** - veau | calf | Kalb | теленокъ | cielę [FE 36 id']. — ... bovido [estas] nematura bovo [FE 36.14].

● **ĉevalido** — Ĉevalido estas nematura ĉevalo [FE 36.14].

● **Izrael'id'** - Israëlite | [angla mankas] | Israelit | израильтянинъ | Izraelita [UV id']. — **Izraelido** - Israëlite | [angla mankas] | Israelit | Израильтянинъ | Izraelita [FE 36 id']. — La hebreoj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas de Izraelo [FE 36.13].

● **kokido** — ... kokido [estas] nematura koko [FE 36.14].

● **malsanulido** — malsanulido [FE 42.13].

● **reĝido** — La reĝido, kiu vidis, ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj, petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas [FE 23.1]. La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, forkondukis ŝin al la palaco de sia patro, la reĝo, kie li edziĝis je ŝi [FE 23.3]. La filoj, nepoj kaj pranepoj de reĝo estas reĝidoj [FE 36.12].

ide' – [A, mankas en UV] La ideoj, kiujn mi supre esprimis pri la Fundamento de Esperanto, prezentas dume nur mian privatan opinion [A 13.1]. — Vortoj, kiuj formas kune unu ideon, estas skribataj kune, sed dividataj unu de la alia per streketo, tiel ekzemple la vorto « frat'in'o », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enk. 2]. — **ide'** [OA 1] * idée | idea |

Idee | идея | ideja. — **ide'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [1887]. [DL-Ald]: *De tiu ĉi tago la estonteco de l' lingvo internacia ne estas jam pli multe en miaj manoj, ol en la manoj de ĉia alia amiko de la sankta ideo*.

ideal' [OA 1] * idéal | ideal | Ideal | идеалъ | ideał. — [DL-Ald 5.2]: *... la komitato trovis, ke mia lingvo estas sufiĉe proksima al la idealo, kiun ĝi ellaboris teorie*.

Idealism' [OA 3.2] {en} idealism | {fr} idéalisme | {de} Idealismus | {es} idealismo | {pt} idealismo | {it} idealismo | {pl} idealizm.

ident' [OA 1] * identique | identical | identisch | тождественный | identyczny.

Ideografi' [OA 3.2] {en} ideografy {evidente pres-eraro: estu ideograph au ideography} | {fr} idéographie | {de} Ideographie, Begriffsschrift | {es} ideografia | {pt} ideographia {legu: ideografia} | {it} ideografia | {pl} --- {traduko mankas}.

ideologi/o. [OA 9] Idearo. Sistemigita aro da ideoj kaj idealoj de grupo politika, religia, socia k.s., tra kiuj la grupanoj rigardas la realon. — [PIV 1970].

idili' - idylle | idyl | Idylle | идиллія | sielanka.

idiom-o [OA 2.1] — [Beau] idiome.

idiot' [OA 1] * idiot | idiot | Idiot | идіотскій | idjotyczny.

Idiotism' [OA 3.2] {en} idiom (lingual peculiarity) | {fr} idiotisme | {de} Idiotismus {en 2012 malofta; pli kutima: Redewendung, idiomatische Wendung} | {es} idiotismo | {pt} idiotismo | {it} idiotismo | {pl} idjotyzm. — **Lingva Respondo 1905 [Pri idiotismoj en Esperanto]**: Mi esperas, ke iom post iom ĉiuj idiotismoj malaperos kaj cedos sian lokon al esprimoj tute logikaj kaj internaciaj. Tamen laŭ mia opinio ni devas fari tian anstataŭigadon nur en tia okazo, se ni povas tion ĉi fari tute *oportune*; sed en okazo, se ni por ia idiotismo *ne* trovos pli bonan esprimon pure logikan, tio ĉi ne devas nin ĉagreni; kaj la idiotismo povas tute oportune resti kiel "esperantismo", se ĝi nur estos komune *akceptata*. [*Lingvo Internacia*, 1905, p. 545].

idol' - idole | idol | Abgott | идолъ | bożek, bałwan. {RELI} — [AK 1914] Abgott, Götze. {2012: Idol}

ie - quelque part | anywhere | irgend wo | гдѣ-нибудь | gdzieś. — **ie** - quelque part | any where | irgend wo | гдѣ-нибудь | gdzieś [FE 30]. — [AK] {en} somewhere. — Ia, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu. La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni ... [FE 30.1-2].

iel - d'une manière quelconque | anyhow | irgend wie | какъ-нибудь | jakoś. — **iel** - d'une manière quelconque | anyhow | irgend wie | какъ-нибудь | jakoś [FE 30]. — [AK] {en} somehow. — I-el [FE 2]. Iel [FE 4]. — Ia, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu. La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni ... [FE 30.1-2].

ies - de quelqu'un | anyone's | irgend jemandes | чей-нибудь | czyjś. — **ies** - de quelqu'un | anyone's | irgend jemandes | чей-нибудь | czyjś [FE 30]. — [AK] {en} someone's. — Ia, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu. La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni ... [FE 30.1-2].

ig' - faire...; ex. pur' pur, propre - pur'ig' nettoyer; mort' mourir - mort'ig' tuer (faire mourir) | to cause to be; e. g. pur' pure - pur'ig' purify | zu etwas machen, lassen; z. B. pur' rein - pur'ig' reinigen; brul' brennen (selbst) - brul'ig' brennen (etwas) | дѣлать чѣмъ-нибудь, заставить дѣлать; напр. pur' чистый - pur'ig' чистить; brul' горѣть - brul'ig' жечь | robić czemś; np. pur' czysty - pur'ig' czyścić; brul' palić się - brul'ig' palić. — **ig** - faire...; ex. pura pur, propre - purigi nettoyer; morti mourir - mortigi tuer (faire mourir) | cause to be; e. g. pura pure - purigi purify; sidi sit - sidigi seat | zu etwas machen, lassen; z. B. pura rein - purigi reinigen; bruli brennen (selbst) - bruligi brennen (etwas) | дѣлать чѣмъ нибудь, заставить дѣлать; напр. pura чистый - purigi чистить; bruli горѣть - bruligi жечь | robić czemś; np. pura czysty - purigi czyścić; bruli palić się - bruligi palić [FE 13]. — [AK 1914] brul- = brennen (intr.); brul-ig- = brennen (tr.) — [UL].

● **brul'ig'** - brennen (etwas) | жечь | palić [UV ig']. — **bruligi** - brennen (etwas) | жечь | palić [FE 13 ig']. — [AK 1914] brul- = brennen (intr.); brul-ig- = brennen (tr.). — Post infekta malsano oni ofte bruligas la vestojn de la malsanulo [FE 39.6].

● **cert'ig'** - assurer | assure | versichern | увѣрять | zapewniać [UV cert'].

● **daŭrigi** — "Mi faras al vi donacon," daŭrigis la feino, "ke ..." [FE 15.7].

● **daŭrigo** - La feino (Daŭrigo) [FE 13] [FE 15] [FE 17] [FE 19] [FE 21].

● **deviga** — … [fundamentaj leĝoj], kiuj estas egale devigaj por la regantoj kaj regatoj … [A 3.1]. … ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj [A 3.4]. … nur verkoj privataj, kiujn la esperantistoj ... povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga [A 3.6]. ... ĉio bona, kio ne troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel rekomendata [12].

● **dev'ig'** - nécessiter | necessitate, compel | nöthigen {de 1901: nötigen}, zwingen | принуждать | pzymuszać [UV dev']. — [AK] obliger, contraindre. — **devigi** - Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj laboradi senĉese [FE 13.2].

● **dis'ig'** - séparer, désunir | separate, disunite | trennen | разобщать | rozłączać [UV dis']. — Malfeliĉo ofte kunigas la homojn, kaj feliĉo ofte disigas ilin [FE 42.2].

● **edzinigi** — Ŝi edziniĝis kun sia kuzo, kvankam ŝiaj gepatroj volis ŝin edzinigi kun alia persono [FE 39.7].

● **eksplodigi** — Unu fajrero estas sufiĉa, por eksplodigi pulvon [FE 41.18]. — [DL 1888]: *La plej malgranda fajrero estas sufiĉa por eksplodigi la pulvon* [DL 12.3].

● **en'ter'ig'** - ensevelir | bury | begraben | хоронить | pochować, pogrzebać.

● **forigi** — ... ia aŭtoritata centra institucio ... ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon novan, ... [A 8.1]. — Forigu vian fraton, ĉar li malhelpas al ni [FE 39.6].

● **glaciigita** — Glaciaĵo estas dolĉa glaciigita frandaĵo [FE 35.14].

● **jes'ig'** - confirmer | confirm | bestätigen | подтверждать | potwierdzać [UV jes]. — **Rim.**: Kp. **konfirm'** [UV].

● **kunigi** — Malfeliĉo ofte kunigas la homojn, kaj feliĉo ofte disigas ilin [FE 42.2].

● **lacigi** - ... la tro multa parolado lacigas lin [FE 40.6].

● **lim'ig'** - restreindre | limit | beschränken | ограничивать | ograniczać. — [AK] {en} limit (*vb*.).

● **malbonigi** — Oni tiel malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron [FE 33.14].

● **mal'virg'ig'** - déshonorer, violer | dishonour, violate, deflower | schänden (eine Jungfrau) {2012: entjungfern} | изнасиловать | zgwałcić, bezecnić [UV virg']. — [AK] лишать невинности, растлить.

● **malsaniga** — [FE 42.13].

● **memorigadi** — ... memorigadu al si, kio en nia lingvo estas oficiala kaj netuŝebla ... [A 5.4].

● **mort'ig'** - tuer (faire mourir) [UV ig'] ; morti mourir — mortigi tuer (faire mourir) — **mortigi** - Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu; ... [FE 39.11].

● **mortigita** - ... li ... estis mortigita de neniu; ... [FE 39.11].

● **nuligado** — ... ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera [A 6.4].

● **oficialigo** — ... pligrandigi ... la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ... [A 10.4].

● **pendigi** - Mi ne pendigis mian ĉapon sur tiu ĉi arbeto; sed la vento forblovis de mia kapo la ĉapon, kaj ĝi, flugante, pendiĝis sur la branĉoj de la arbeto [FE 39.12].

● **pere'ig'** - ruiner, tuer | murder | umbringen | губить | gubić [UV pere']. — [AK] {en} cause to perish, wreck.

● **perfektigado** — Sed en la praktiko ni (...) devas kompreneble esti tre singardaj kun ĉia « perfektigado » de la lingvo [A 9.2].

● **plibonigi** — … se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus ŝanĝo, … [A 4.3].

● **pligrandigi** — ... ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidos pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ... [A 10.4].

— **Lingva Respondo 1907 [Pri "ioj", "tioj", "kioj" k.t.p.]**: Teorie la ĵus diritaj formoj tute bone povas havi multenombron tiel same, kiel ili havas akuzativon; sed en la *praktiko* mi ne konsilas al vi uzi la diritajn vortojn en multenombro, ĉar laŭ mia opinio ilia *senco* tion ĉi ne permesas. "Tio" prezentas ja ne ian difinitan objekton, sed ian *bildon* (aŭ abstraktan ideon), kaj bildo restas ĉiam ununombra sendepende de tio, ĉu ĝi konsistas el unu objekto aŭ el multaj. Tamen se aperas ia tre malofta okazo, kiam la logiko postulas, ke ni uzu la diritajn vortojn en multenombro, tiam la *gramatiko* de nia lingvo tion ĉi ne malpermesas. Ekzemple: "Lia potenco konsistas el diversaj *ioj*, el kiuj ĉiu aparte per si mem estas ne grava, sed ĉiuj kune donas al li grandan forton". Respondo 18, *La Revuo*, 1907, Junio.

iom - un peu, quelque peu de | any quantity | ein wenig | сколько-нибудь | ilekolwiek. — **iom** - quelque peu | any quantity | ein wenig, irgend wie viel | сколько-нибудь | ilekolwiek [FE 30]. — [AK] {en} a little, some quantity. — [UL]. — Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo [A 8.2]. — Ia, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu [FE 30.1]. — Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron [FE 34.14]. Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3].

ipsilon/o. [OA 9] La litero Y, y. {GRAM} — [EV 1923] {enkondukita de Wüster, antaŭe i-greka}. [PIV 1970].

ir' - aller | go | gehen | идти | iść. — **iri** - aller | go | gehen | идти | iść [FE 9]. — **ir'** идти | iść [UV ad']. — **iri** - идти | iść [FE 13 ad']. — **ir'** aller [UV dis']. — **iri** - aller [FE 28 dis']. — [UL]. — Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo [FE 9.9]. ... tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko ... [FE 13.3]. „Estus tre bele," respondis la filino malĝentile, „ke mi iru al la fonto!" [FE 19.1]. „Mi volas ke vi tien iru," diris la patrino, „kaj iru tuj!" [FE 19.2]. La filino iris, sed ĉiam murmurante [FE 19.3]. Iru for! [FE 20.15]. ... tra la fenestro, kiu sin trovas apud la pordo, la vaporo iras sur la korton [FE 25.14]. Kien vi iras? - Mi iras en la ĝardenon [FE 26.2]. Nu, iru pli rapide! [FE 26.26]. Jam estas tempo iri domen [FE 28.6]. Ni disiĝis kaj iris en diversajn flankojn: mi iris dekstren, kaj li iris maldekstren [FE 28.7]. Hodiaŭ estas bela frosta vetero, tial mi prenos miajn glitilojn kaj iros gliti [FE 34.7]. La kuracisto konsilis al mi iri en ŝvitbanejon [FE 40.14].

● **ir'ad'** — ходить, хаживать | chodzić [UV ad']. — **iradi** - ходить, хаживать | chodzić [FE 13 ad'].

● **ir'il'** — échasse | stilt, scatch | Stelze | ходули | szczudło.

● **dis'ir'** — se séparer, aller chacun de son côté [UV dis']. — **disiri** - se séparer, aller chacun de son côté [FE 28 dis']. — Ni ĉiuj kunvenis, por priparoli tre gravan aferon; sed ni ne povis atingi ian rezultaton, kaj ni disiris [FE 42.1].

● **eliri** — "Mi faras al vi donacon," daŭrigis la feino, "ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono." [FE 15.7]. Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas; ... [FE 17.10]. Vi devas nur iri al la fonto ĉerpi akvon; kaj kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile." [FE 17.11]. Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn; post la vespermanĝo niaj fratoj

eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo [FE 18.15]. ... ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris el la arbaro kaj petis de ŝi trinki ... [FE 19.5]. ... mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano.“ [FE 19.10]. La reĝido, kiu vidis, ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj, petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas [FE 23.1]. ... el la kaldrono, en kiu sin trovas bolanta akvo, eliras vaporo ... [FE 25.14]. Li eliris el la dormoĉambro kaj eniris en la manĝoĉambron [FE 31.19].

● **eniri** — Li eliris el la dormoĉambro kaj eniris en la manĝoĉambron [FE 31.19].

● **foriri** — Mi foriras, sed atendu min, ĉar mi baldaŭ revenos [FE 42.5].

● **trairi** — Li estas tiel dika, ke li ne povas trairi tra nia mallarĝa pordo [FE 33.2].

● **traire** — Tra-í-re [FE 3] [FE 4].

Irako [OA 8] {GEO} — [PIV 1970] {ne ĉe Z}.

Irano [OA 8] {GEO} — [EV 1923] {ne ĉe Z}.

irid-o [OA 2.2] (*bot.*) iris | yellow flag | Schwertlilie {BOT} — [EG 2] Schwertlilie.

iris’ [OA 1] iris (anat.) | iris | Iris | радужная оболочка | tęczówka. {ANAT} — [EG 2].

Irlando [OA 8] {GEO} — [MV]. [EG 2] Irland.

ironi’ [OA 1] * ironie | irony | Ironie | иронія | ironja. — [RE].

is - marque le passé; ex. far’ faire — mi far’is je faisais, j’ai fait etc. | ending of past tense in verbs; e. g. am’is loved | bezeichnet die vergangene Zeit | означаетъ прошедшее время | oznaczca czas przeszły. — **is** - marque le passé | ending of past tense in verbs | bezeichnet die vergangene Zeit | означаетъ прошедшее время | oznaczca czas przeszły [FE 6]. — **is** - [FG]. — [UL].

Islando [OA 8] {GEO} — [MV]. [Beau] Islande. [EG 2] Island.

-ISM’ [1919] (teorio, sistemo, doktrino, skolo, partio, celado, kaj analogiaj sencoj). — **Rim.**: **1.** La teksto de la decido estas: „La sufikso ISM’ (teorio, sistemo, doktrino, skolo, partio, celado, kaj analogiaj sencoj) estas oficiale akceptita. Necese estas rimarkigi, ke tio tute ne signifas, kiel ŝajnas opinii du aŭ tri aprobantoj, ke, forprenante la finaĵon *ism’*, oni ĉiam ricevas esperantan radikon aŭ rajtas krei ĝin kun speciala signifo. Tio ĉi ne estas pli vera por la vortoj atavismo, feminismo, optimismo, pesimismo, silogismo, solecismo, sofismo, turismo, k. t. p., ol tio estus – forprenante la finaĵojn *ist’*, *in’*, *il’*, *ul’*, *an’*, k. t. p., – por la vortoj feministo, optimisto, sofisto, turisto, balzamino, doktrino, vazelino, bacilo, asimili, okulo, formulo, banano, turbano, sultano, k. t. p. En ĉiuj tiuj ĉi vortoj la silaboj *ism’*, *ist’*, *in’*, k. t. p. estas konsiderotaj ne kiel esperantaj sufiksoj, sed kiel finaĵoj, ĉu internaciaj ĉu de l’ devena lingvo, kiujn, lau Zamenhofa modelo, oni ne volas kripligi.““ (cit. laŭ OLEO p. 10 kaj aldona informo de Andreas Kück). **2.** Pri vortoj je -ism’ kaj -ist’ vd. la Ĝeneralan Parton.

● **burokrat/ism/o** [OA 9] **1** Sistemo de (kvazaŭa) regado fare de la burokrataro; administra sistemo, en kiu la burokratoj *1* havas tro da povo aŭ influo. **2** (malŝate) La procedo-troigaj tendencoj de burokrato *2*; sistema flegado aŭ apogado de tiaj tendencoj.

● **skolt/ism/o**. [OA 9] La idearo de la skolta movado; tiu movado mem.

Israel/o. [OA 9] Ŝtato en okcidenta Azio, ĉe Mediteraneo, sude de Libano, fondita en 1948. Internacia landokodaĵo: IL. [OA 9] Noto: Kromnomo por Jakob estis *Izrael(o)*, laŭ kiu oni nomas la antikvan popolon *Izrael(o)* aŭ la antikvajn hebreojn *Izraelidoj*, ekzemple en la Esperanta Biblio. {GEO} — [PIV 1970] Israel/o = Izraelio. — **Rim.**: [FE 36.13] Kp. La hebreoj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas de Izraelo.

ist’ - marque la profession; ex. bot’ botte - bot’ist’ bottier; mar’ mer - mar’ist’ marin | person occupied with; e. g. mar’ sea - mar’ist’ sailor | sich mit etwas beschäftigend; z. B. bot’ Stiefel - bot’ist’ Schuster; mar’ Meer - mar’ist’ Seeman {legu: Seemann} | занимающійся; напр. bot’ сапогъ - bot’ist’ сапожникъ; mar’ море - mar’ist’ морякъ | zajmujący się; np. bot’ but - bot’ist’ szewc; mar’ morze - mar’ist’ marynarz. — **ist** - marque la profession; ex. boto botte - botisto bottier; maro mer - maristo marin | person occupied with; e. g. boto boot - botisto boot-maker; maro sea - maristo sailor | sich mit etwas beschäftigend; z. B. boto Stiefel - botisto Schuster; maro Meer - maristo Seeman {legu: Seemann} | занимающійся; напр. boto сапогъ - botisto сапожникъ; maro

море - maristo морякъ | zajmujący się; np. boto but - botisto szewc; maro morze - maristo marynarz [FE 31]. — [AK 1914] bezeichnet den Träger des Berufs, der regelmässigen {legu: regelmäßigen} Beschäftigung mit etwas.

1. **–ist':**

● **artisto** - ... la ekspozicio estas omaĝo al la ĵus mortinta artisto [OA 9 omaĝ/o].

● **beletr/ist/o**. [OA 9] Beletra verkisto aŭ specialisto.

● **bot'ist'** - bottier | [angla mankas] | Schuster | сапожникъ | szewc [UV ist']. — **botisto** – bottier | boot-maker | Schuster | сапожникъ | szewc [FE 31 ist'].

● **diplomatiisto** — Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem [FE 32.3].

● **enscenigisto** [OA 9 reĝisor/o].

● **esperantisto** — ...li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto [A 2.3]. ... ia centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro [A 9.4]. ... ĉiu bona esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la fundamenton de nia lingvo [A 10.2]. ... la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita [A 11.2].

● **fizikisto** — Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem [FE 32.3].

● **fotografisto** — La fotografisto fotografis min, kaj mi sendis mian fotografaĵon al mia patro [FE 32, mankas en UV].

● **grafik/ist/o**. [OA 9] Grafika artisto; profesiulo pri grafiko.

● **ĥemiisto** — Kiu okupas sin je meĥaniko, estas meĥanikisto, kaj kiu okupas sin je ĥemio, estas ĥemiisto [FE 32.2].

● **juristo** — Ju-ris-to [FE 2, mankas en UV]. Juristo [FE 4]. — **jurist'** [OA 1] * juriste | jurist | Jurist | юристъ | prawnik.

● **komercisto** — Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero [FE 31].

● **kondukisto** - Profesia kondukisto de aŭtomobilo, kamiono k.s. [OA 8 ŝofor/o].

● **kuiristo** - Ni havas diversajn servantojn: kuiriston, ĉambristinon, infanistinon kaj veturigiston [FE 37.18]. La kuiristo sidas en la kuirejo [FE 40].

● **kuracisto** - ... edzino de kuracisto estas kuracistedzino [FE 36]. Venigu la kuraciston, ĉar mi estas malsana [FE 39.9]. La kuracisto konsilis al mi iri en ŝvitbanejon [FE 40.14].

● **lavisto** — Li ne estas lavisto, li estas lavistinedzo [FE 36.11].

● **lignisto** — La lignisto vendas lignon, kaj la lignaĵisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn [FE 37].

● **lignaĵisto** — La lignisto vendas lignon, kaj la lignaĵisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn [FE 37].

● **mar'ist'** - marin | sailor | Seeman {legu: Seemann} | морякъ | marynarz [UV ist']. — **maristo** - marin | sailor | Seeman {legu: Seemann} | морякъ | marynarz [FE 31 ist']. — La kuraĝa maristo dronis en la maro [FE 37.16].

● **marista** — internacia marista signalkodo [OA 9 kod/o].

● **meĥanikisto** — Kiu okupas sin je meĥaniko, estas meĥanikisto, kaj kiu okupas sin je ĥemio, estas ĥemiisto [FE 32.2].

● **mensogisto** - Li estas mensogisto kaj malnoblulo [FE 37].

● **ofic'ist'** - fonctionnaire | officer | Beamter | чиновникъ | urzędnik [UV ofic']. — Oficisto, ... [OA 6.1 KONDUKTORO]. — Tuto de la oficejoj kaj oficistoj de iu ministra fako, ... [OA 8 ministeri/o].

● **pasament'ist'** - passementiér | lace-maker | Posamentirer {de 1901: Posamentierer} | позументщикъ | szmuklerz.

● **pentristo** - la specifa stilo de pentristo (la stilo karakterizas ĝuste tiun pentriston) [OA 9 specif/a].

● **rajdisto** — Rajdisto en ĉevalaj vetkuroj. [OA 9 ĵoke/o].

● **skribisto** - Verkisto verkas librojn, kaj skribisto simple transskribas paperojn [FE 37.17].

● **specialisto** — Specialisto pri kirurgio [OA 8 kirurg/o].

● **ŝtelisto** — Ŝteliston neniu lasas en sian domon [FE 37.15].

● **verkisto** - Verkisto verkas librojn, kaj skribisto simple transskribas paperojn [FE 37.17].

● **veturigisto** - Ni havas diversajn servantojn: kuiriston, ĉambristinon, infanistinon kaj veturigiston [FE 37.18].

● **kuracistedzino** - ... edzino de kuracisto estas kuracistedzino [FE 36].

2. –ist'ar':

● **esperantistaro** — ... fari tion ĉi (post matura prijuĝado) povas ne apartaj personoj, sed nur ia centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro [A 9.4].

● **militistaro** — Nia lando venkos, ĉar nia militistaro estas granda kaj brava [FE 34.12]. Antaŭ nia militistaro staris granda serio da pafilegoj [FE 38.11]. La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj [FE 39.14].

● **registaro** - Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon ..., tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, ... [A 1.2]. — Permeso, donita de registaro aŭ grava organizaĵo al unu el ties anoj, plenumi difinitan socian agadon (...) [OA 8 licenc/o 1.].

3. –ist'in':

● **akuŝ'ist'in'** - sage-femme | midwife | Hebamme | акушерка | akuszerka [UV akuŝ'].

● **ĉambristino** - Ni havas diversajn servantojn: kuiriston, ĉambristinon, infanistinon kaj veturigiston [FE 37.18].

● **infanistino** - Ni havas diversajn servantojn: kuiriston, ĉambristinon, infanistinon kaj veturigiston [FE 37.18].

● **kuracistino** - Virino, kiu kuracas, estas kuracistino ... [FE 36].

● **lavistinedzo** — Li ne estas lavisto, li estas lavistinedzo [FE 36.11].

istm' [OA 1] isthme | isthmus | Isthmus | перешеекъ | istm, międzymorze. {GEO} — [EG 2]. — {Kp. je ter'kol'}.

it' - marque le participe passé passif; ex. far' faire - far'it' fait (qu'on a fait), ayant été fait | ending of past part. pass. in verbs; e. g. am'it' having been loved | bezeichnet das Particip. perfecti passivi | означаетъ причастіе прошедшаго времени страдательнаго залога | oznacza imiesłów bierny czasu przeszłego. — **it** - marque le participe passé passif | ending of past part. pass. in verbs | bezeichnet das Participium perfecti passivi | означаетъ причастіе прошедшаго времени страдат. залога | oznacza imiesłów bierny czasu przeszłego [FE 12]. — **it** - Le *participe passé passif*, {est caractérisé} par *it*: *far'it'a* - ayant été fait, qu'on a fait | The past participle passive ends in *it*, e. g. *far'it'a*, „that which has been done"; *far'it'e*, „having been done" | Partizipium perfekti passivi — *it*; z.B. *far'it'a*, gemacht | Страдат. залога прошедш. времени - *it* (*far*|*it*|*a* сдѣланный) | Imiesłów bierny czasu przeszłego - *it* (*far/it/a* uczyniony) [FG 6ĥ]. — [UL].

● **aĉetita** — La surtuto estas aĉetita de mi, sekve ĝi apartenas al mi [FE 25.5]. Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero [FE 31.21].

● **atendite** — Li venis al mi tute ne atendite [FE 22.15].

● **adresita** — El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; ... [FE 42.8].

● **akceptita** — Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj ... [A 1.2]. Leĝan sankcion ili {= la ideoj} ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita [A 13.2].

● **am'it'** having been loved [UV it'].

● **arestito** — La soldatoj kondukis la arestitojn tra la stratoj [FE 22.14].

● **dezirita** — ... fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, ... [A 1.2].

● **difinita** — ... la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo [A 1.1]. ... obei ĉiam nur klarajn, tute difinitajn fundamentajn leĝojn de sia lando ... [A 3.1]. ... ia klare difinita verko [A 3.2]. La sufikso «um» ne havas difinitan signifon, ... [FE 42.9].

● **dirita** — Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon ... [A 8.1]. — El la dirita regulo sekvas, ke ... [FE 29.8]. Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, ... [FE 30.10].

● **eldonita** — ... mi rekomendas la diversajn lernolibrojn ..., kiuj estas eldonitaj de niaj plej kompetentaj amikoj ... kaj el kiuj la plej gravaj estas eldonitaj tre bone kaj zorgeme, ... [A 5.3].

● **elektita** — ... aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj ... [A 1.2].

● **elĵetita** — ... tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj [A 8.3].

● **far'it'** - fait (qu'on a fait), ayant été fait [UV it']. — **farita** - Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35.13]. — **far'it'a** - ayant été fait, qu'on a fait | „that which has been done" | gemacht | сдѣланный | uczyniony [FG 6ĥ].

● **far'it'e** - „having been done" [FG 6ĥ].

● **glaciigita** — Glaciaĵo estas dolĉa glaciigita frandaĵo [FE 35.14].

● **havita** — Mono havata estas pli grava ol havita [FE 22.12].

● **kaptita** — Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota [FE 22.13].

● **kaŝita** — Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi [FE 25.9].

● **kovrita** — La tuta supraĵo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj kreskaĵoj [FE 35.18].

● **kunmetita** — Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; ... [FE 27.5]. ... la vorto « frat'in'o », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enkonduko 2].

● **lavita** — Vi estas lavita. Vi estis lavita. Vi estos lavita. Vi estus lavita. Estu lavita. Esti lavita [FE 25.2].

● **montrita** — La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ... [FE 30.2].

● **mortigita** — Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu ... [FE 39.11].

● **naskita** — Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua [FE 12.19]. Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita [FE 33.7].

● **nefermita** — La fenestro longe estis nefermita; mi ĝin fermis, sed mia frato tuj ĝin denove malfermis [FE 33.9].

● **nekorektite** — ... ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj ... tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2].

● **nomita** — Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardataj kiel oficialaj [A 3.5].

● **pagita** — Estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos pagit Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enkonduko 1]. a al vi baldaŭ [FE 25.8].

● **perdita** — Mi sopiras je mia perdita feliĉo (aŭ: mian perditan feliĉon) [FE 29.7].

● **prezentita** — Leĝan sankcion ili {= la ideoj} ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita [A 13.2].

● **priparolita** — ... pro kaŭzoj jam multajn fojojn priparolitaj [A 9.2].

● **publikigita** — Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardataj kiel oficialaj [A 3.5].

● **represita** — ... la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti netuŝeblaj [A 4.1].

● **skribita** — ... viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble [FE 41.4]. Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enkonduko 1].

● **tradukita** — ... se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe [A 4.3].

● **vestita** — ... ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris el la arbaro [FE 19.5].

— Rim.: Pri pasivaj participoj vd. LR 109-111.

— **Lingva Respondo 1907 [amatas - amitas – amotas]**: Vd. ĉe –at'.

italo [OA 8] — [DL 1888]: *Mi estas via kunlandano, ĉar mi ankaŭ estas italujano* [DL 9.13]. [EG 2] Italiener.

iu - quelqu'un | any one | jemand | кто-нибудь | ktoś. — **iu** - quelqu'un | any one | jemand | кто-нибудь | ktoś [FE 30]. — [AK] {en} someone. — [UL]. — Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon! [A 1.4]. — Ia, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu [FE 30.1].

iz-o [OA 2.2] épervier | sparrow-hawk | Sperber {ZOO}

izol' - isoler | isolate | isoliren {de 1901: isolieren} | уединять | odosabniać. — [RE].

Izrael' - Israël | [angla mankas] | Israel | Израиль | Izrael [UV id']. — **Izraelo** - Israël | [angla mankas] | Israel | Израиль | Izrael [FE 36 id']. La hebreoj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas de Izraelo [FE 36]. — **Izrael'** {deklarita Fundamenta de} [OA 7] (vira nomo).

● **Izrael'id'** - Israëlite | [angla mankas] | Israelit | израильтянинъ | Izraelita. [UV id']. – **Izraelido** - Israëlite | [angla mankas] | Israelit | Израильтянинъ | Izraelita [FE 36 id']. — La hebreoj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas de Izraelo [FE 36].

J, Ĵ

Jj - y (yeux) | y as in "yoke" | j | й | j [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **jo** ... [FE 1]. — **jo** [OA 7] = nomo de la litero **j**, dektria litero de la Esperanta alfabeto. — **Lingva Respondo 56 (1893)**: La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

Ĵĵ - j | z as in "azure" | sh, j | ж | ż [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **ĵo** ... [FE 1]. — **ĵo** [OA 7] = nomo de la litero **ĵ**, dekkvara litero de la Esperanta alfabeto. — **Lingva Respondo 56 (1893)**: Vd. ĉe „Jj".

j - marque le pluriel; ex. hom'o homme — hom'o'j hommes | sign of the plural; e. g. patr'o father - patr'o'j fathers | bezeichnet den Plural | означаетъ множественное число | oznacza liczbę mnogą. — **j** - marque le pluriel | sign of the plural | bezeichnet die Mehrzahl | означаетъ множественное число | oznacza liczbę mnogą [FE 7]. — **j** – [FG 2.2].

ja - en effet, de fait, donc, n'est-ce pas | indeed | ja, doch | вѣдь | wszakże. [AK 1914]: emphatic particle. — [UL]. — [DL 1888] *La mastro de l' alilandulo diris, ke li ne scias, kiu loĝas en la kontraŭa domo, ke oni tie ne vidas ja eĉ unu personon, ...* [DL 17.2.13]. *En la partero estis nur magazeno, kaj estis ja neeble, ke la homoj ĉian {post 1888 ĉiam} trakurus tra tie* [DL 17.3.9]. *„Kio tio ĉi estas?", diris li, kian {post 1888 kiam} li eliris en la lumon de l' suno, „mi ja ne havas ombron! ...* [DL 17.6.2]. *„Io ordinara tio ĉi efektive ne estas!" diris la ombro, sed vi ja mem ankaŭ ne apartenas al la homoj ordinaraj ...* [DL 17.16.1]. *... sed nun venis al mi ia deziregо vidi vin ankoraŭ unu fojon antaŭ via morto, ĉar morti ian {post 1888 iam} vi ja devas* [DL 17.16.3]. *Ankaŭ tiujn ĉi landojn mi volis vidi ankoraŭ unu fojon, ĉar oni ja ĉian {ĉiam} amas sian patrujon* [DL 17.16.4]. *„Ha, ĝi estas efektive vi!" diris la instruitulo. „Ĝi ja estas multege mirinda! Nenian {Neniam} mi kredus, ke al iu lia malnova ombro povus reveni estante homo!* [DL 17.17]. *„Kiel vi povas tiel paroli!" diris la instruitulo, „de ia ŝuldo tie ĉi ne povas ja tute esti parolo. ..."* [DL 17.19.1]. *„Unu vorto - unu ombro!" diris la ombro, ĉar tiel li ja devis paroli* [DL 17.22]. *Estu prudenta kaj prenu mian proponon, ni ja veturos kiel kolegoj* [DL 17.47.6].

jaguar' [OA 1] jaguar | jaguar | Jaguar | ягуаръ | jaguar. {ZOO} — [Beau].

jak' - veste | jacket | Jacke | куртка | kurtka, kaftanik. {VEST} — [RE].

Ĵaket' [OA 3.2] {en} jacket | {fr} jaquette | {de} Jackett | {es} sayo | {pt} jaqueto | {it} giacchetto | {pl} --- {traduko mankas}. {VEST}

ĵaluz' - jaloux | jealous | eifersüchtig | ревнивый | zazdrosny. — Ĵa-lú-za [FE 2].

jam - déjà | already | schon | уже | już. — **jam** - déjà | already | schon | уже | już [FE 6]. — [UL]. — Jam [FE 2]. — Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: ... [A 2.1]. ... la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, kiuj laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de longe fariĝis fundamento por Esperanto, ... [A 3.3]. ... ĉar se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus ŝanĝo, kiu povus kaŭzi disputojn kaj kiu en verko fundamenta ne povas esti tolerata [A 4.3]. Riĉigadi la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun ... [A 7.1]. Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron

oficialan, kiel «Aldonon al la Fundamento» [A 7.2]. Sed en la praktiko ni (pro kaŭzoj jam multajn fojojn priparolitaj) devas kompreneble esti tre singardaj kun ĉia « perfektigado » de la lingvo [A 9.2]. — La infano jam ne ploras [FE 6.2]. La blanka papero jam ne kuŝas sur la tablo [FE 10.3]. Mi jam havas mian ĉapelon; nun serĉu vi vian [FE 18.16]. Ĉu vi jam trovis vian horloĝon? — Mi ĝin ankoraŭ ne serĉis; kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin jam ne trovos [FE 20.7-8]. La tempo pasinta jam neniam revenos; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas [FE 22.8]. Kiam vi vidis nin en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron (aŭ li estis dirinta al mi la veron) [FE 24.4]. Kiam vi venos al mi, li jam antaŭe diros al mi la veron (aŭ li estos dirinta al mi la veron; aŭ antaŭ ol vi venos al mi, li diros al mi la veron) [FE 24.6]. Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita [FE 25.6]. Se li jam venis, petu lin al mi [FE 26.21]. Jam estas tempo iri domen [FE 28.6]. La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj [FE 30.2]. Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3]. Tio ĉi estis jam ne simpla pluvo, sed pluvego [FE 38.9].

— **Lingva Respondo 1907 [„jam ne ...“ – „ne ... plu“]**: „... La esprimon ‚ne jam’ (kiu signifas ion tute alian ol ‚jam ne’) mi [= Z.] tute ne konsilas uzi, ĉar ĝi povus kaŭzi malkompreniĝon; anstataŭ ĝi mi konsilas uzi ‚ankoraŭ ne’. ...“ [Respondo 26, *La Revuo*, oktobro 1907]. Detale vd. ĉe „plu“.

Januar’ - Janvier | January | Januar | Январь | Styczeń. — **Januaro** - Janvier | January | Januar | Январь | Styczeń [FE 12]. — [letero 1887-03]. [DL]. [RE]. — Januaro estas la unua monato de la jaro, ... [FE 12.13].

japan/o [OA 9] **1** Ano de la ĉefgento de Japanujo. **2** (vastasence) Japanujano. — [EG 2] Japaner.

● **Japan/uj/o**. Lando en orienta Azio, insuloĉeno inter Pacifiko kaj la Japana Maro. Internacia landokodaĵo: JP. {GEO} — [EG 2] Japan.

jar’ - année | year | Jahr | годъ | rok. — **jaro** - année | year | Jahr | годъ | rok [FE 12]. — [UL]. — Januaro estas la unua monato de la jaro, Aprilo estas la kvara, Novembro estas la dek-unua, Decembro estas la dek-dua [FE 12.13]. La dudeka (tago) de Februaro estas la kvindek-unua tago de la jaro [FE 12.14]. Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua [FE 12.19]. Mil jaroj (aŭ milo da jaroj) faras miljaron [FE 14.5]. Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro [FE 14.12]. Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn [FE 25.10].

● **miljaro** — Mil jaroj (aŭ milo da jaroj) faras miljaron [FE 14.5].

● **super’jar’** - année bissextile | intercalary year | Schaltjahr | високосный годъ | rok przestępny [UV super].

ĵargon’ [OA 1] jargon | jargon | Jargon | жаргонъ | żargon.

jasmen’ - jasmin | jasmine | Jasmin | жасминъ | jaźmin {BOT}. — [RE].

ĵaŭd’ - jeudi | Thursday | Donnerstag | четвергъ | czwartek.

ĵaz/o. [OA 9] Muzikspeco kreita en la 1920aj jaroj en suda Usono, karakterizata ĉefe de improvizado kaj de sinkopa ritmo. {MUZ} — [PIV 1970].

je - se traduit par différentes prépositions; sa signification est toujours aisément suggérée par le sens de la phrase | can be rendered by various English prepositions | kann durch verschiedene Präpositionen übersetzt werden | можетъ быть переведено различными предлогами | może być przetłomaczone za pomocą różnych przyimków. — **je** - se traduit par différentes prépositions | can be rendered by various prepositions | kann durch verschiedene Präpositionen übersetzt werden | можетъ быть переведено различным предлогами | może być przetłomaczone za pomocą różnych przyimków [FE 23]. — **je** – [FG 14] {vd. en la Ĝenerala Parto}. — [UL]. — Je la lasta fojo mi vidas lin ĉe vi (aŭ: la lastan fojon) [FE 29.5].

● **edziĝi je** — La reĝido ... forkondukis ŝin al la palaco de sia patro, la reĝo, kie li edziĝis je ŝi [FE 23.3].

● **enu’o je la patr’uj’o** — regret de la patrie | a longing for one’s fatherland |

Sehnsucht nach dem Vaterlande | тоска по родинѣ | tęsknota za ojczyzną [FG 14].

● **ĝoj'i je tio** - s'en réjouir | to rejoice over it | sich darüber freuen | радоваться этому | cieszyć się z tego [FG 14].

● **mal/san/a je la okul/o/j** — chory na oczy [FG 14 {pl}].

● **obei je** — Ekzemple, ni povas diri "obei al la patro" kaj "obei la patron" (anstataŭ "obei je la patro") [FE 29.9].

● **okupi sin je** — Kiu okupas sin je meĥaniko, estas meĥanikisto, kaj kiu okupas sin je ĥemio, estas ĥemiisto [FE 32.2].

● **plena je** — ... glaso da vino estas glaso plena je vino [FE 32.5].

● **rid'i je** — ridi je tio - en rire | to laugh at it | darüber lachen | смѣяться надъ этимъ | [pola mankas] [FG 14]. — Mi ridas je lia naiveco (aŭ mi ridas pro lia naiveco, aŭ: mi ridas lian naivecon) [FE 29.4].

● **sopiri je** — Mi sopiras je mia perdita feliĉo (aŭ: mian perditan feliĉon) [FE 29.7].

jen - voilà, voici | behold, lo | da! siehe! | вотъ | otóź. — **jen** - voici, voilà | behold, lo | da, siehe | вотъ | otóż [FE 6]. — [UL]. — Jen estas pomo [FE 6.7]. Jen estas la pomo, kiun mi trovis [FE 6.8]. Jen kuŝas la ĉapelo de la patro [FE 8.2]. Jen estas la kajero de la juna fraŭlino [FE 10.4].

● **jena** — Mi finas do per la jenaj vortoj [A 10.1].

● **jen - jen** - tantôt — tantôt | sometimes — sometimes | bald — bald | то— то | to — to.

jes - oui | yes | ja | да | tak. — **jes** - oui | yes | ja | да | tak [FE 21]. — [UL]. — Jes [FE 2] — Al ĉiu, kiu montros al mi ian nebonan esprimon en la Fundamenta libro, mi respondos trankvile: jes, ĝi estas eraro, sed ĝi devas resti netuŝebla, ... [A 4.7]. — "Jes, patrino", respondis al ŝi la malĝentilulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon [FE 21.2]. — [DL 1888] *Ĉu oni povas diri: helpi la fraton (anstataŭ: al la frato), ...? Jes; ĉar se la senco ne montras klare, ...* [DL 8]. *Ĉu vi ne rekonas vian malnovan ombron? Jes, vi certe ne kredis, ke mi ian ankoraŭ revenos* [DL 17.14]. *... nun la ombro devus esti tiel saĝa kaj eniri, ... kaj poste, reveninte, rakonti al mi, kion ĝi tie vidis. Jes, jes, mia ombro, vi devus peni esti utila al mi!" diris li ŝerce* [DL 17.5]. *Kaj li balancis la kapon al la ombro, kaj la ombro rebalancis ĝian kapon. „Jes, jes, iru, sed baldaŭ revenu!"* [DL 17.5]. *„Kun kiu mi havas la honoron paroli?" demandis la instruitulo.* [14] *„Jes, mi tiel ankaŭ pensis", diris la eleganta homo, „ke vi min ne rekonos!* [DL 17.15].

● **jesa** — Ĉu li donis al vi jesan respondon aŭ nean? [FE 31.18].

● **jes'ig'** - confirmer | confirm | bestätigen | подтверждать | potwierdzać. — **Rim.**: Kp. **konfirm'** [UV].

Jesu' [OA 3.2] {en} Jesus | {fr} Jésus | {de} Jesus | {es} Jesus | {pt} Jesus | {it} Gesu | {pl} --- {traduko mankas}. {RELI} — [Beau]. — **Rim.**: Antaŭparolo de Z al la 5-a eld. de FK, Junio 1907: „... ne estas mirinde, ke en {FK} troviĝas kelkaj vortoj ..., kiuj ne en ĉiuj lokoj sonas absolute egale (ekzemple: Jesuo kaj Jezo ...)." La formo „Jesuo" tamen ne troveblas en FK.

ĵet' - jeter | throw | werfen | бросать | rzucać. — **ĵeti** - jeter | throw | werfen | бросать | rzucać [FE 14]. — Ĵé-ti [FE 2]. — Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn [FE 14.14].

● **disĵeti** — Mi disŝiris la leteron kaj disĵetis ĝiajn pecetojn en ĉiujn angulojn de la ĉambro [FE 42.3].

● **elĵetante** — "Jes, patrino", respondis al ŝi la malĝentilulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon [FE 21.2].

● **elĵetita** — Sed, prezentante parton de la fundamento, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj ... [A 8.3].

jezuit' [OA 1] * jesuite | Jesuit | Jesuit | езуитъ | jezuita. {RELI} — [RE]. — **Rim.**: [EV 1923]: *jesuit/o*.

jod' [OA 1] iode | iodine | Jod | іодъ | jod. {KEM} — [RE].

Johano — La mano de Johano estas pura [FE 8.7, mankas en la ĝusta alfabeta pozicio en UV]. — Mi konas Johanon [FE 8.8]. — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Ernеĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilhеĉjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38.12]. — **Johan'** - John [UV ĉj' {en}]. — **Johan'** {deklarita Fundamenta de} [OA 7] (vira antaŭnomo).

● **Joĉjo** [FE 38.12] — **Jo'ĉj'** - Johnnie [UV ĉj' {en}].

● **Johanĉjo** [FE 38.12].

ĵoke/o. [OA 9] Rajdisto en ĉevalaj vetkuroj. — [EG 2] Jockei.

ĵongl' - bouffonner | juggle | gaukeln | фокусничать | kuglować. — [AK] jongler.

Jork' - **Nov-Jork** - New York [UV an'] — **Nov-Jorko** - New York [FE 37 an' angla].

● **Nov-Jork'an'** - New Yorker [UV an' angla] — **Nov-Jorkano** - New Yorker [FE 37 an' angla].

Jozefo — Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato [FE 22.3, mankas en UV]. — **Jozef'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

ju - **des** — plus - plus | the - the | je - desto | чѣмъ - тѣмъ | im - tem. — **ju ... des** - the ... the [UV des]. — [UL]. — Ju [FE 2]. — [DL]: *Mi ... volas, ke oni min helpu forigi la erarojn, ..., kaj ju la kritikoj de mia lingvo estas pli severaj, des pli danke mi ilin alprenas, ...* [DL I.4.1]. [DL-Ald]: *Tiel ju pli energie vastiĝos kaj riĉiĝos la literaturo de la lingvo internacia, des pli baldaŭ ni havos unuforman pli malpli plenan vortaron* [DL-Ald 20.7].

jubile' [OA 1] * jubilé | jubilee | Jubiläum | юбилей | jubileusz. — [RE].

Jud' [OA 3.2] {en} jew | {fr} juif | {de} Jude | {es} judio | {pt} judeu | {it} giudeo, ebreo | {pl} zyd. — [1888]. [EG 1]: **judo**, Jude, **Judujo**, Judäa k.t.p.

ĵud/o. [OA 9] Luktosporto dupersona, origine el Japanujo, en kiu oni provas faligi la kontraŭulon per specialaj ĵetoj, kruroblokadoj k.s. {SPORT} — [PIV 1970].

Judaism' [OA 3.2] {en} judaism | {fr} judaïsme | {de} Judentum | {es} judaismo | {pt} judaismo {legu: judaísmo} | {it} giudaismo | {pl} judaizm. {RELI} {antaŭe jud'ism'o}.

jug' - joug | yoke | Joch | иго | jarzmo. — [RE].

juĝ' - juger | judge | richten, urtheilen {de 1901: urteilen} | судить | sądzić. — **juĝi** - juger | judge | richten, urtheilen {de 1901: urteilen} | судить | sądzić [FE 22]. — [UL]. — [AK] {en} judge (*vb*.). — Homo, kiun oni devas juĝi, estas juĝoto [FE 22.16].

● **juĝoto** — Homo, kiun oni devas juĝi, estas juĝoto [FE 22.16].

● **prijuĝado** — ... fari tion ĉi (post matura prijuĝado) povas ne apartaj personoj, sed nur ia centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro [A 9.4].

jugland' - noix | walnut | Wallnuss | грецкій орѣхъ | orzech włoski. {BOT} — [AK] noix (*du noyer*). — [RE].

juk' - démanger | itch | jucken | зудѣть {de 1918: зудеть} | swędzić. — [RE].

Juli' - Juillet {en 2012: juillet} | July | Juli | Іюль | Lipiec. — [DL]. [RE]. — Varsovio, Julio 1905. [A 11.4].

jun' - jeune | young | jung | молодой | młody. — **juna** - jeune | young | jung | молодой | młody [FE 10]. — **juna** - jung [FE 37 ul'] — [UL]. — Jen estas la kajero de la juna fraŭlino [FE 10.4]. Rakontu al mia juna amiko belan historion [FE 10.6]. El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna [FE 10.18]. La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi [FE 11.3]. Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna [FE 13.1]. ... ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino [FE 15.6]. La juna vidvino fariĝis denove fianĉino [FE 33.22]. Mi gratulis telegrafe la junajn geedzojn [FE 36.4].

● **junulo** — junulo - Jüngling [FE 37 ul']. — La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj [FE 39.14].

● **maljuna** — La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon; ... [FE 11.2]. Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna [FE 13.1].

● **maljunulo** — Tiu ĉi maljunulo tute malsaĝiĝis kaj infaniĝis [FE 39.4].

jung' - atteler | couple, harness (vb.) | spannen (z. B. Pferde) | запрягать | zaprzęgać. — [RE].

Juni' - Juin | June | Juni | Іюнь | Czerwiec. — [DL]. [RE].

juniper' - genevrier, genièvre | juniper | Wachholder | можжевельникъ | jałowiec {BOT}. — [RE].

junk' [OA 1] jonc | rush (bot.) | Binse | ситникъ | sitowie. {BOT} — [EG 2].

jup' - jupe, jupon | petticoat | Frauenrock, Unterrock | юбка | spódnica {VEST}. — [RE].

ĵur' - jurer | swear | schwören | клясться, божится | przysięgać.

jur' – [mankas en UV] — **Jur'** [OA 3.2] {en} jurisprudence, science of law, law | {fr} science du droit, droit | {de} Jurisprudenz, Jura | {es} jurisprudencia, derecho (ciencia) | {pt} direito (sciencia) {legu: direito (ciência)} | {it} giurisprudenza | {pl} --- {traduko mankas}. — **jur/o** (3) {deklarita Fundamenta per} [OA 8]. — [Kabe].

● **juristo** — Ju-ris-to [FE 2, mankas en UV]. Juristo [FE 4]. — **jurist'** [OA 1] * juriste | jurist | Jurist | юристъ | prawnik. — [EG 2]. — **Rim.**: Post oficialigo de jur' per OA 3 analizata jur'ist'o.

ĵurnalo — Ĵur-nálo [FE 2, mankas en UV]. — **ĵurnal'** [OA 1] * journal | journal | Journal | журналъ | dziennik. — **ĵurnal/o** (1) {deklarita fundamenta per} [OA 8]. — [DL-Ald]: *... tiuj personoj aŭ rondetoj, kiuj havas la eblon, devas komenci eldonadi gazetojn kaj ĵurnalojn en la lingvo internacia* [DL-Ald]. [RE].

ĵus - justement, à l'instant | just, exactly | soeben | только что | właśnie, tylko co. — [AK 1914] just (*adv. of time*) | soeben, gerade, just. — [RE]. — Ĵus [FE 2].

just' - juste | just, righteous | gerecht | справедливый | sprawiedliwy. — **justa** - juste | just, righteous | gerecht | справедливый | sprawiedliwy [FE 37]. — [UL]. — Jús-ta [FE 2]. — Nia provincestro estas severa, sed justa [FE 37.6]. — [DL 1888]: *Li estas severa juĝanto, li juĝas severe, sed juste* [DL 6.2].

juvel' - bijou | jewel | Edelstein | драгоцѣнный камень | kamień drogi. — [MV]. [Beau] **juvel**, bijou, joyau.

K

Kk - k | k as in "key" | k | к | k [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **ko** ... [FE 1]. — **ko** [OA 7] = nomo de la litero **k**, dekkvina litero de la Esperanta alfabeto. — **Rim**.: [Lingva Respondo 56 (1893): Pri la nomoj de la literoj]. La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

k. t. p. - ... ĉio alia, kion mi verkis aŭ verkos, konsilas, korektas, aprobas k. t. p., estas nur verkoj privataj, kiujn la esperantistoj - ... - povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga [A 3.6]. — ... ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi-tiea, tieulo, tiamulo k. t. p. (= kaj tiel plu) [FE 30.10]. ... remalsano, remalsaniĝo, malsanulino, sanigista, sanigilista, sanilista, malsanulista k. t. p. [FE 42.13]. — **Rim**.: [Lingva Respondo 1893]. La signifo de la mallongigoj estas: t. e. = tio estas; k. c. = kaj ceteraj; k. t. p. = kaj tiel plu; e. = ekzemple; s-ro = sinjoro; d-ro = doktoro; frl. aŭ f-ino = fraŭlino; s-rino = sinjorino; n-ro = numero. – LR 66B, *Esperantisto* 1893, p. 96 = PVZ III, 110. — Kp. t. e.

kabal' [OA 1] * cabale | cabala | Kabbalah {2012: Kabbala} | кабала | kabała. {RELI}

KABINETO [OA 5.1] 1-e *Ĉambro destinita al intelekta laboro* | {en} cabinet | {fr} cabinet (de travail) | {de} Arbeitszimmer | {es} gabinete (de estudios) | {it} gabinetto (studio) | {pl} gabinet. 2-e *Speciala ĉambro, kie oni ekspozicias sciencajn au artajn kolektojn* | {en} cabinet | {fr} cabinet (de collections) | {de} Sammlungszimmer {pli preciza: Kuriositätenkabinett, Kabinett} | gabinete (colección de objetos curiosos) | {it} gabinetto (stanza d'esposizione) | {pl} gabinet. 3-e *Ministraro* | {en} cabinet | {fr} cabinet (ensemble des ministres) | {de} Regierung {pli preciza: Kabinett} | {es} gabinete (ministerio) | {it} gabinetto (consiglio dei ministri) | {pl} gabinet.

kabl' [OA 1] cable | cable, rope | Kabel | кабель | kabel.

kabriolet-o (*veturilo*) [OA 2.1]

kaĉ' - gâchis | pap | Brei | каша | kasza {KUIR}. — [AK] bouillie.

kadavr' [OA 1] * cadavre | corpse | Leiche | трупъ | trup.

kadenc' [OA 1] cadence | cadence | Kadenz, Tonfall | кадансъ | kadencja (muz.). {MUZ}

kadet' [OA 1] cadet (milit.) | cadet | Kadett | кадетъ | kadet. {MIL}

kadr' - cadre | frame | Rahmen | рама | rama. — [AK] {en} frame (*a*).

kaduk' - caduc, périssable | falling, perishable | hinfällig | дряхлый | wątły, zgrzybiały. — [AK] {en} decrepit, decayed (*of things*).

kaf' - café | coffee | Kaffee | кофе | kawa {KUIR}. — **kafo** - café | coffee | Kaffee | кофе | kawa [FE 26]. — Anstataŭ kafo li donis al mi teon kun sukero, sed sen kremo [FE 26.11].

kaĝ' - cage | cage | Käfig | клѣтка | klatka.

kahel' - carreau | earthen pane | Kachel | кафля | kafel, kafla. — [AK] {en} earthen (*etc.*) tile, flagstone (*building*)

kaj - et | and | und | и | i, a. — **kaj** - et | and | und | и | i [FE 5]. — ... bone kaj regule progresadi ... [A 1.1]. {multaj pliaj trafoj en A ne notitaj tie ĉi}. — Patro kaj frato [FE 5.1]. {Tro da pliaj trafoj, tial ne listigitaj tie ĉi}. ... ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi-tiea, tieulo, tiamulo k. t. p. (= kaj tiel plu) [FE 30.10]. — **Lingva Respondo 1891 [Pri la deveno de „kaj"]**: La vorto "kaj" ... ne estas arbitre elpensita (ĝi estas vorto greka = la latina "et"). [*La Esperantisto*, 1891, p. 49].

kaj' [OA 1] quai | quay, wharf | Kai | набережная | brzeg rzeki, bulwar. {MAR} — [RE A]

kajer' - cahier | paper covered book, copy book | Heft | тетрадь | kajet. — **kajero** - cahier | copy book | Heft | тетрадь | kajet [FE 10]. — [AK] cahier, fascicule | unbound book, part (*of same*). — Jen estas la kajero de la juna fraŭlino [FE 10.4].

kajut' - cajute | cabin | Kajüte | каюта | kajuta. — [AK] {fr} cahute, cabine.

kaka' [OA 1] cacao | cocoa | Kakao | какао | kakao. {KUIR}

kakt/o. [OA 8] Planto kun karnecaj tigoj kaj branĉoj, kiuj surhavas skvamojn aŭ pikilojn anstataŭ folioj. — A. cactus, F. cactus, G. Kaktus, H. {es} cacto, cactus, I. {it} cacto, cactus, P. {pt} cacto. {BOT}

kal' - cor (aux pieds) | corn (on the foot) | Hühnerauge | мозоль | nagniotek, odcisk {MED}.

kalci/o. [OA 9] Ĥemia elemento, grizblanka metalo, kiu interalie estas parto de ostoj kaj dentoj. Simbolo Ca, atomnumero 20, atommaso 40,08. {KEM} — [EG 2] Calcium {en 2012 ankaŭ: Kalzium}.

kaldron' - chaudron | kettle | Kessel | котелъ | kocioł. — **kaldrono** - chaudron | kettle | Kessel | котелъ | kocioł [FE 25]. — Sur la kameno inter du potoj staras fera kaldrono; el la kaldrono, en kiu sin trovas bolanta akvo, eliras vaporo; ... [FE 25.14].

kalejdoskop-o [OA 2.1] — [Beau] kaléidoscope. [EG 2] Kaleidoskop.

kalendar' [OA 1] * calendrier | calendar | Kalender | календарь | kalendarz.

kalendul-o [OA 2.2] (*bot.*) souci | marigold | Ringelblume {BOT}

kaleŝ' - carosse calèche | carriage | Wagen | коляска | powóz. — **kaleŝo** - carosse, calèche | carriage | Wagen | коляска | powóz [FE 38]. — Kun bruo oni malfermis la pordegon, kaj la kaleŝo enveturis en la korton [FE 38.8].

kalfatr' - calfater | calk | kalfatern | конопатить | zalepiać, konopaczyć. {MAR}

kalibr-o [OA 2.1] — [Beau] calibre.

kalif-o [OA 2.1]

kalik' - coupe, calice | bowl | Kelch | чаша | kielich. {BOT} — [AK] {en} chalice, cup. — [RE]. [Beau]: *Kalik*, au contraire {de pokal', vd. tie}, a une signification générale. Ainsi nous pouvons dire *la kaliko de la floroj* [Beau pokal].

kalikot' - calicot | calico | Calico {de 1901: Kaliko} | коленкоръ | perkal. {TEKS}

Kali-o, [OA 4] {fr} potassium | {en} potassium | Kalium | {it} potassio | {es} potasio | {pt} potássio | {ca} potassi. {KEM}

kalk' - chaux | lime | Kalk | известь | wapno.

kalkan' - talon (du pied) | heel | Ferse | пятка | pięta {ANAT}.

kalkanum' [OA 1] * talon (chauss.) | heel (of a shoe) | каблукъ | Absatz | obcas. — **Rim.**: Interpretebla kiel la Fundamenta radiko *kalkan'* kun la sufikso *-um'*.

kalkul' - compter | calculate | rechnen | считать | rachować, liczyć. — [AK] calculer, compter.

kalomel-o (*farm.*) [OA 2.1] {FARM}

kalson' - caleçons | drawers | Unterhosen | подштанники | gacie, kalesony {VEST}.

kalumni' - calomnier | calumniate | verläumden {2012: verleumden} | клеветать | obgadywać, potwarzać.

Kalv-a, [OA 4] {fr} chauve | {en} bald, calvous | {de} kahl(köpfig) | {it} calvo | {es} calvo | {pt} calvo | {ca} calb, xoll, pelat.

Kalvin' — [FE 37, mankas en UV]. — **Kalvin'** [OA 7] (vira nomo). {Mallerta difino;

la franca familia nomo *Calvin* nek estas vira nek virina, sed neŭtra pri la sekso.}

● **Kalvinano** - Luteranoj kaj Kalvinanoj estas kristanoj [FE 37, mankas en UV].

kamarad' [OA 1] * camarade | comrade, fellow | Kamerad | товарищъ | towarzysz.

kambi' - lettre de change | exchange | Wechsel (Kaufm[ann]) | вексель | weksel. — [AK 1914] bill of exchange.

kamel' - chameau | camel | Kameel {de 1901: Kamel} | верблюдъ | wielbłąd. {ZOO}

kameli' [OA 1] camelia | camelia | Kamelie | камелія | kamelja. {BOT}

kamen' - cheminée | fire-place | Kamin | каминъ | kominek. — **kameno** - cheminée | fire-place | Kamin | каминъ | kominek [FE 25]. — Sur la kameno inter du potoj staras fera kaldrono ... [FE 25.14]

● **kamen'tub'** - cheminée | chimney | Schornstein | дымовая труба | komin.

kame-o [OA 2.1]

kamer' - chambre | chamber | Kammer | камера | komora, komórka. — [AK] chambre noire | room (*dark*), camera.

kamfor' - camphre | camphire, camphor | Kampher | камфора | kamfora. {KEM} — [AK] {en} camphor.

kamion/o. [OA 8] Granda aŭtomobila veturilo por pezaj ŝarĝoj. — A. lorry, truck; F. camion; G. Lastkraftwagen, Lastauto, Laster; H. {es} camión; I. {it} camion, P. {pt} camião, caminhão.

kamizol' - camisole | waistcoat | Brustwamms {de 1901: Wams; 2012: Wams (ark.)} | фуфайка | kaftanik. {VEST}

kamlot' - camelot | camlet | Camelot | камлотъ | kamlot. — [AK] camelot (*étoffe*) | camlet (*cloth*).

kamomil' - camomille | camomile | Kamille | ромашка | rumianek. {BOT}

kamp' - champ, campagne | field | Feld | поле | pole. — **kampo** - champ, campagne | field | Feld | поле | pole [FE 33]. — Li staras supre sur la monto kaj rigardas malsupren sur la kampon [FE 33]. Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, precipe aroj da bellanaj ŝafoj [FE 34]. Mallarĝa vojeto kondukas tra tiu ĉi kampo al nia domo [FE 38.6].

kampanj/o [OA 9] **1** Serio da militaj manovroj kun difinita celo en iu regiono: *la Ruslanda kampanjo de la Granda Armeo en la jaro 1812a*. — [PIV 1970]. **2** Intensa publika agado por akiri subtenon de homoj por afero: *la mediprotektantoj faris kampanjon por reutiligo de rubaĵoj*; *elekta kampanjo*. — [PIV 1970].

● **kampanj/i**. Fari kampanjon: *ili kampanjis por la maldekstra partio*; *li kampanjas kontraŭ la nova leĝo*.

kan' - roseau, canne | cane | Rohr | трость | trzcina. {BOT} — [AK 1914] cane (*reed*) | Schilf, Rohr.

kanab' - chanvre | hemp | Hanf | конопля | pieńka, konopie. {BOT}

kanaben-o [OA 2.2] linotte | linnet | Hänfling

Kanado [OA 8] {GEO} — **Lingva Respondo 1911 [Pri la nomoj de landoj]**: „Kanado", vd. ĉe Brazilo.

kanajl' - canaille | mob, canaille | Canaille {de 1901 pli kutima: Kanaille} | каналья | łajdak. — [AK] {en} scoundrel, rascal.

kanal' [OA 1] * canal | channel | Kanal | каналъ | kanał.

kanap' - canapé | sofa, lounge | Kanapee {(ark.); en 2012 pli kutima: Sofa} | диванъ | kanapa. — **kanapo** - canapé | sofa, lounge | Kanapee {(ark.); en 2012 pli kutima: Sofa} | диванъ | kanapa [FE 26]. — El sub la kanapo la muso kuris sub la liton, kaj nun ĝi kuras sub la lito [FE 26].

kanari' - canari, serin | canary | Kanarienvogel | канарейка | kanarek. {ZOO}

kancelari' - chancellerie | chancery | Kanzlei | канцелярія | kancelarya.

kancelier' - chancelier | chancellor | Kanzler | канцлеръ | kanclerz.

kancer/o. [OA 9] Grava malsano karakterizata de malnormala kaj danĝera multobliĝo de ĉeloj: *pulmokancero*; *mamokancero*. {MED} — [PV 1930].

kand' - candi (sucre) | sugar-candy | Candelzucker {2012: Kandiszucker} | леденецъ | cukier lodowaty. {KUIR}

kandel' - chandelle | candle | Licht, Kerze | свѣча | świeca. — **kandelo** - chandelle | candle | Licht, Kerze | свѣча | świeca [FE 20]. – **kandelo** - chandelle | candle | Kerze | свѣча | świeca [FE 40 ing']- — [UL].

● **kandelingo** - chandelier | candle-stick | Leuchter | подсвѣчникъ | lichtarz [FE 40].

Kandelabr' [OA 3.1] {en} candelabrum | {fr} candélabre | {de} Kandelaber | {es} candelabre | {pt} candelabre {legu: candelabro} | {it} candelabre | {pl} kandelabr.

kandidat' [OA 1] * candidat | candidate | Kandidat | кандидатъ | kandydat.

kanguru/o. [OA 9] Aŭstralia mamulo, kiu havas tre mallongajn antaŭajn krurojn, tre longajn kaj fortajn malantaŭajn krurojn, per kiuj ĝi sin movas salte, kaj tre muskolan apogan voston, kaj kies ino havas ventran haŭtpoŝon, en kiu restas la idoj dum la unua tempo post la naskiĝo. (*Macropodinae* aŭ pli vastasence *Macropodidae*.) {ZOO} — [PV 1930].

kanibal' [OA 1] cannibale | cannibal | Kannibale | людоѣдъ | ludoźerca {preseraro, legu: ludożerca}.

kankr' - écrevisse | crab | Krebs | ракъ | rak. {ZOO}

kanon' [OA 1] canon (artil., relig.) | cannon, canon | Kanon, Kanone | пушка, канонъ | armata, kanon. {MIL} {RELI} — Kp. **paf'il'eg'** [UV].

kanonik' [OA 1] chanoine | prebendary | Kanonikus | каноникъ | kanonik. {RELI}

kant' - chanter | sing | singen | пѣть {de 1918: петь} | śpiewać. — **kanti** - chanter | sing | singen | пѣть {de 1918: петь} | śpiewać [FE 9]. — **kant'** - chanter | [angla mankas] | singen | пѣть {de 1918: петь} | śpiewać [UV ek']. — **kanti** - chanter | [angla mankas] | singen | пѣть {de 1918: петь} | śpiewać [FE 21 ek']. — Li kantas tre belan kanton [FE 40.8].

● **kanto** — La kanto de la birdoj estas agrabla [FE 9.2]. Li kantas tre belan kanton [FE 40.8].

● **kantado** — La kantado estas agrabla okupo [FE 40.9].

● **ek'kant'** commencer à chanter | {angla mankas} | einen Gesang anstimmen | запѣвать | zaśpiewać [UV ek']. — **ekkanti** - commencer à chanter | {angla mankas} | einen Gesang anstimmen | запѣть | zaśpiewać [FE 21 ek'].

kantarid' - cantharide | cantharide | spanische Fliege | шпанская муха | mucha hiszpańska. {ZOO}

kantat' [OA 1] cantate | cantata | Kantate | кантата | kantata. {MUZ}

kanton-o [OA 2.1] — [Beau] canton.

kantor' - chantre | chanter | Cantor {de 1901: Kantor} | канторъ | kantor, śpiewak kościelny. — [AK] {en} chanter, precentor. {RELI}

kanvas' - canevas | canvass, draught | Canevas {de 1901: Kanevas} | канва | kanwa. — [AK] {en} canvass (*material*).

kanzon/o. [OA 8] Versaĵo, plej ofte gaja, sprita aŭ moka, konsistanta el egalaj strofoj finiĝantaj per refreno kaj destinita esti kantata. — A. (chanson), (little) song; F. chanson; G. Lied, Gesang, Chanson; H. {es} canción; I. {it} canzone; P. {pt} canção, modinha. {MUZ}

kap' - tête | head | Kopf | голова | głowa. — **kapo** - tête | head | Kopf | голова | głowa [FE 39]. — Ká-po [FE 2]. — Mi ne pendigis mian ĉapon sur tiu ĉi arbeto; sed la vento forblovis de mia kapo la ĉapon, kaj ĝi, flugante, pendiĝis sur la branĉoj de la arbeto [FE 39.12].

● **packapo**. — Pac-ká-po [FE 2]. Packapo [FE 4].

kapabl' - capable, apte | capable | fähig | способный | zdolny. — **kapabla** - capable, apte | capable | fähig | способный | zdolny [FE 17].

● **kapablo** - Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas; ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman kapablon? [FE 17]. La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino ... [FE 23].

kapel' - chapelle | chapel | Kapelle | капелла | kapela. {RELI} {MUZ} — **Rim.**: La preciza senco ne estas evidenta, ĉar la sam-etimaj vortoj (el mezlatina *cappa*, diminutivo *cap(p)ella*) havas malsamajn signifojn en la referenc-lingvoj, i.a. ĉefe tiun de „preĝejeto“ [1] kaj „malgranda orkestro“ [2], nome: franca: 1,2; angla: 1, germana: 1,2, rusa: 2, pola: 2 (senco 1 = kaplica). **kapel'** originas en [RE 1889, 71], kie ĝi celas la muzikan sencon 2: капель-мейстеръ, *kapel'estr'* (капелла mankas, капельмейстеръ estas rekta transpreno el la germana *Kapellmeister* samsignifa). Por la preĝejeto, senco 1, en 1889 ne ekzistas aparta radiko: [RE 222] часовня, *preĝ'ej'et, sankt'ej'et*. – En [ER 1909] la arkitektura senco 1 fariĝis la ĉefa, apud kiu ankoraŭ ekzistas la muzika: часовня, капелла (хоръ музыкантовъ {de 1918: хор музыкантов, t.e. muzika ĥoro}); **-estro**, капельмейстеръ. – [Kabe 1910] konfirmas ambaŭ sencojn: **Kapelo** {1}. Malgranda preĝejo aŭ parto de preĝejo, posedanta altaron kaj prezentanta apartan tuton. **Kapelo** {2}. Orkestro. **Kapelestro.** Ĉefo, direktanta kapelon. – Laŭ [PIV 2005] la muzika senco estas evitinda: **kapel/o** **1**

Malgranda preĝejo: *tomba kapelo*^{Z} {= Fab l}; *sur la monto, silenta kapeleto*^{Z}. **2** Parto de preĝejo, enhavanta kroman altaron. **3** Ĉambro, en privata domo, destinita por Diservo: *kapelano* (pastro dungita por ofici en tia ĉambro). **4** (evi) Aro de la muzikistoj, ludantaj aŭ kantantaj en kapelo; preĝeja ĥoro: *kapelestro* (ĥorestro). ▯ ĥorejo, sanktejo. – Ĉe Z ŝajne nur la arkitektura senco, vd. krome Fab III: *En la kapelo pendis ŝia bildo, ĉirkaŭita de arĝentaj lampoj*. Same ĉe Kabe. La muzika senco en la moderna literaturo nur malofta, kutime en kunmetaĵoj kiel „ĵazkapelo“.

kapital’ [OA 1] * capital (fonds) | capital | Kapital | капиталъ | kapitał.

kapitan’ - capitaine | captain | Hauptmann | капитанъ | kapitan. {MIL}

kapitel’ - chapiteau | chapiter | Säulenknauf | капитель | słupogłów. {ARKI} — [AK] {en} capital (*of pillar*) | kapitel, głowica.

kapitulac’ - capituler | capitulate | capituliren {de 1901: kapitulieren} | капитулировать | kapitulować. {MIL} — [AK] капитулировать, сдаться.

kapon’ - chapon | capon | Kapaun | каплунъ | kapłón. {ZOO}

kapor’ - câpre | caper | Kaper | каперсъ | kaparki. {KUIR} — [AK] {en} caper (*berry*).

kaporal’ [OA 1] * caporal | corporal | Korporal | капралъ | kapral. {MIL}

kapot’ - capote | great coat with a cape | Capot | капотъ | kapota. {VEST} — [AK] greatcoat (*with cape*) | плащ с капюшоном. — **Rim**.: La germana *Capot* aŭ *Capote* en 2012 estas ne plu kutima. Ĝi signifis ian *Regenmantel mit Kapuze*.

kapr’ - bouc | goat | Bock | козелъ | kozioł. {ZOO} — [AK 1914] Ziege.

kapreol’ - chevreuil | roe, roe-buck | Reh | козуля | sarna. {ZOO}

kapric’ - caprice | caprice, whim | Caprice {en 2012 ne plu uzata}, Laune | капризъ | kaprys.

kapsik/o [OA 9] **1** Kreskaĵo, kiu produktas kapsikon *2*. (*Capsicum*.) **2** Verda, ruĝa aŭ flava longforma frukto de kapsiko *1*, kun multaj semoj pendantaj interne, uzata kiel legomo kaj kiel spico: *akra kapsiko*; *neakra kapsiko*; *el kapsiko oni faras paprikon*. — [PIV 1970].

● **kapsik/et/o**. [OA 9] Malgranda ordinare tre akra kapsiko *2*. {BOT}

kapsul’ - capsule | capsule | Kapsel | капсуля | kapsułka.

kapt’ - attraper | catch | fangen | ловить | chwytać. — **kapti** - attraper | catch | fangen | ловить | chwytać [FE 22]. — [AK] attraper, capturer, prendre saisir. — Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota [FE 22].

● **kapt’il’** - piège | trap, pit-fall | Schlinge, Falle | силокъ | sidło.

kapuĉ’ - capuce, capuchon | capuchin, cowl | Capuchon {(ark.) en 2012: Kapuze) | капишонъ | kaptur. {VEST} — [AK 1914] cowl, hood | Kapuze | капюшон.

kapucen’ - capucin | capuchin friar | Kapuziner | капуцинъ | kapcyn. {RELI}

kar’ - cher | dear | theuer | дорогой | drogi. — **kara** - cher | dear | theuer | дорогой | drogi [FE 20]. — Karaj infanoj, estu ĉiam honestaj! [FE 20].

karaben’ - carabine | carabine | Karabiner | карабинъ | karabin. {MIL}

karaf’ - carafe | caraffe, decanter | Caraffe {de 1901: Karaffe} | графинъ | karafka.

karakter’ - caractère | character | Charakter | характеръ | charakter. — **karaktero** - caractère | character | Charakter | характеръ | charakter [FE 11]. — Havante la karakteron de fundamento, la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti netuŝeblaj [A 4.1]. ... la verko perdus sian eksterordinare necesan karakteron de dogma fundamenteco, ... [A 4.6]. — La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon [FE 11.2].

karakteriz’ [OA 1] * caractériser | characterize | charakterisieren, kennzeichnen | характеризовать | charakteryzować.

karambol’ [OA 1] caramboler | to cannon at billiards | karambolieren | карамболировать | karambolować.

karamel-o [OA 2.1] {KUIR}

karas’ - carassin (poisson) | crucian | Karausche | карась | karaś. {ZOO} — [AK] {en} crucian (*fish*).

karat’ [OA 1] * carat | carat | Karat | каратъ | karat.

karavan’ [OA 1] caravane | caravan | Karawane | караванъ | karawana.

karb’ - charbon | coal | Kohle | уголь | węgiel.

Karbon-o, [OA 4] {fr} carbone | {en} carbon | {de} Kohlenstoff | {it} carbonio | {es} carbono | {pt} carbone {legu: carbono} | {ca} carbon {legu: carbó}.

karcer' [OA 1] cachot | dungeon | Karzer {2012: Gefängnis, Verlies, Kerker, Karzer (ark. en Germanio, ankoraŭ uzata en Aŭstrio) } | карцеръ | koza, areszt.

kard' - chardon | thistle | Distel | чертополохъ | oset. {BOT}

kardel' - chardonneret | thistle-finch | Stieglitz, Distelfink | щеголъ, щегленокъ | szczygieł. {ZOO}

kardinal-o (*ekl[ezio]*) [OA 2.1] {RELI} — [Beau] cardinal.

kares' - caresser | caress | liebkosen | ласкать | piescić.

Karier' [OA 3.1] {en} career | carrière (profession) | Karriere, Laufbahn | {es} carrera | carreira | carriera | {pl} karjera.

karikatur-i [OA 2.1] — [Beau] karikatur, caricature. karikaturi, caricaturer.

kariofil' - girofle (clou de) | clove | Nelke | гвоздика | goździk. {BOT}

Kariol' [OA 3.2] {en} cariole | {fr} carriole | {de} Karriole, Karren | {es} carriola | {pt} kariol, carruagem noruegueza {legu: carruagem norueguesa. Pli bone: aranha, charrete} | {it} carrozzino, carrozzella | {pl} --- {traduko mankas} | (durada simpla norvega veturilo).

karmin' - carmin | carmine | Carmin | карминъ | karmin.

karn' [OA 1] * chair | flesh | Fleisch (am Körper) | мясо (натѣлъ) {pres-eraro, legu: мясо (на тѣлѣ)} | ciało. — **Rim.**: Pli bona rusa traduko de *karn'* estas "плоть".)

karnaval' - carnaval | carnaval | Fasching | карнавалъ, масляница | karnawał. — [AK 1914] carnival | Karneval, Fasching.

karo' - carreau (cartes) | diamond | Carreau (in Karten) {de 1901: Karo (Karenspiel)} | бубны | karo. {LUD} — [AK] {en} diamonds (*cards*).

karob' - caroube | carob bean | Johannisbrod | сладкій рожокъ | chleb św. Jana. {BOT} — [AK] {en} carrob-bean, locust (*fruit*).

karoseri/o. [OA 9] Ekstera (supra) korpo de aŭto aŭ de simila veturilo, kontraste al eventuala ĉasio: *memportanta karoserio* (= karoserio sen ĉasio). — [PIV 1970].

karot' - carotte | carrot | Möhre, Mohrrübe | морковь | marchew. {BOT}

karp' - carpe (poisson) | carp (fish) | Karpfen | карпъ | karp. {ZOO}

karpen' - charme | yoke-elm | Hagebuche, Hornbaum | грабъ, грабина | grab. {BOT} — [AK] charme (*bot.*).

kart' - carte | card | Karte | карта | karta; mapa.

kartav' - grasseyer | speak thick | schnarren (beim Sprechen) | картавить | nieczysto wymawiać. — [AK] {en} trill the r strongly | szeplenić.

kartilag' - cartilage | cartilage | Knorpel | хрящъ | chrząstka. {ANAT}

kartoĉ' - cartouche | cartouch | Kartätsche | картечь | kartacz. — [AK] cartouche (*subst. fém.*) | cartridge (*for gun*).

kartograf' (2) [OA 7]

kartografi-o [OA 2.1] {GEO} — [EG 2] Kartographie.

karton' - carton | pap | Pappe | картонъ, папка | tektura. — [AK] {en} cardboard.

kartuŝ-o (*arĥ.*) [OA 2.1] {ARKI} — [EG 2] Kartusche, Zierrahmen, Ziertitel, Schönleiste, Papierschablone (*für Malerei*).

karusel' - carrousel | carousal | Carroussel {2012: Karussell} | каруселъ | karuzela. — [AK] roundabout.

kaŝ' - cacher | hide (vb.) | verbergen, verhehlen | прятать | chować. — **kaŝi** - cacher | hide (vb.) | verbergen | прятать | chować [FE 21]. — La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej proksima arbaro [FE 21.6]. Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi [FE 25.9].

kas' - caisse | chest, money-box | Kasse | касса | kassa. — [AK] caisse (*fonds*) | till, cash-box, chest (*money*).

kased/o. [OA 9] Speciala skatoleto, kiu enhavas kaj protektas sonbendon, filmon aŭ ion similan, kaj kiun oni povas, sen ĝin malfermi, meti en aparaton por uzi tiun enhavaĵon. — [PV 1930] kaseto {kun –t-}. Plata skatolo, ordinare ligna aŭ metala, por ŝarĝi per plako aŭ filmo k kiun oni ŝovas en kamerao. [PIV 1970] kaset/o. [PIV 2002] kased/o.

kaserol' - casserole | stewpan | Casserolle {de 1901: Kasserolle} | кострюля | rondel. — [AK] {en} stewpan, saucepan.

kask' - casque | helmet | Helm | шлемъ | hełm, szyszak. {VEST}

kasked/o. [OA 8] Ĉapo kun viziero, portata aŭ de uniformuloj, aŭ de civiluloj.

RIM.: la kaskedo estas pli plata, iafoje kap-ronda; la kepo estas pli alta, ordinare cilindra. — A. (peaked) cap, F. casquette, G. (Schirm-)Mütze, H. {es} gorra, (casquette), I. {it} berretto, P. {pt} boné. {VEST}

kast' [OA 1] * caste | caste | Kaste | каста | kasta.

kaŝtan' - châtaigne | chestnut | Kastanie | каштанъ | kasztan. {BOT}

Kastanjet-o, [OA 4] {fr} castagnettes | {en} castanet | spanische Tanzklapper {2012 prefere: Kastagnetten (pluralo, nur escepte en singularo) | {it} castagnette, nacchere | {es} castañetas, castañuelas | {pt} castanholas {singulare: castanhola. La pluralon oni uzas por la duopo uzata kiel muzikilo.} | {ca} castanyetes, castanyoles {legu: castanyetas, castanyolas}. — [Bat 1891].

kastel' - château | castle | Schloss, Kastell | замокъ | zamek. — [AK] zamek (obronny).

kastor' - castor | beaver | Biber | бобръ | bóbr. {ZOO}

kastr' - châtrer | cut, curtail | castriren {de 1901: kastrieren} | кастрировать | rzezać, wałaszyć. — [AK] {en} castrate.

kat' - chat | cat | Katze | котъ | kot. {ZOO}

katafalk' [OA 1] * catafalque | catafalque | Katafalk, Leichengerüst | катафалкъ | katafalk.

katakomb-o [OA 2.1]

katalepsi' [OA 1] catalepsie | catalepsy | Starrsucht {en 2012 pli kutima: Katalepsie} | каталепсія | katalepsja.

katalog' [OA 1] * catalogue | catalogue | Katalog | каталогъ | katalog.

kataplasm' - cataplasme | poultice | Kataplasma | припарка | kataplazm {MED}. — [AK 1914] Umschlag, Pflaster.

katapult/o [OA 9] **1** Malnova militmaŝino, kiu pafis ŝtonojn k.a. pere de longa strec̆ita brako aŭ pere de diversaj aliaj meĥanismoj. {MIL} — [EV 1923] Katapult (alte Wurfmaschine). [PIV 1970]. **2** Pafileto en la formo de Y, kun kaŭc̆uka ŝnuro (rubando), per kiu oni (precipe infanoj) pafas ŝtonetojn k.s. — [PIV 1970]. **3** Meĥanika aparato, por antaŭenĵeti aviadilon for de la ferdeko de ŝipo, aŭ glisilon for de la grundo. — [PIV 1970].

katar' - catarrhe | catarrh | Schnupfen, Katarrh | насморкъ, катаръ | katar {MED}.

katarakt' - cataracte (yeux) | cataract | Staar {de 1901: Star} (Augenkrankheit) | катаракта | katarakta {MED}. — [AK] {en} cataract (*eye*).

katastrof' [OA 1] * catastrophe | catastrophe | Katastrophe | катастрофа | katastrofa.

katedr' [OA 1] * chaire | chair of state | Katheder, Kanzel | каѳедра | katedra.

katedral-o [OA 2.1] {RELI}{ARKI} — [EG 2] Dom, Münster, Kathedrale.

kategori' [OA 1] * catégorie | category | Kategorie | категорія | kategorja.

Kateĥist', Katekist' [OA 3.2] {en} catechist | {fr} catéchiste | {de} Katechist | {es} catequista | {pt} catechista {legu: cataquista} | {it} catechista | {pl} katecheta. {RELI} — **Rim.**: Vd. kateĥiz' kaj la tiean LR 31 A.

Kateĥiz', katekiz' [OA 3.2] {en} to catechise | {fr} catéchiser | {de} katechizieren | {es} catequizar | {pt} --- {traduko mankas, estu: catequizar} | catechizzare | {pl} --- {traduko mankas}. — **Lingva Respondo 1908**: La vorton "kateĥizi", uzitan en la vortaro de O'Connor, mi trovas tute bona, ĉar ĝi estas internacia; el tiu vorto ni povas tute bone devenigi la vortojn "kateĥizo", "kateĥizisto", "kateĥizato" el tio ĉi tamen tute ne sekvas, ke la vortoj "kateĥismo" kaj "kateĥisto" estas malbonaj. "Kateĥismo" estas io alia ol "kateĥizo" sed se eĉ ni dirus, ke ambaŭ vortoj estas identaj kaj ni povas uzi "kateĥizo" anstataŭ "kateĥismo", ni eĉ en tiu okazo tute ne bezonus elĵeti el nia lingvo la tute internacian kaj bonan vorton "kateĥismo", sed ni povas tute sen ia maloportuneco lasi la vivon al ambaŭ vortoj kaj trankvile atendi, ke la komuna uzado iom post iom donos pli grandan forton al unu vorto kaj faros el la dua vorto ne plu uzatan arĥaismon. [LR 31A, Respondo 39, *La Revuo*, 1908, Majo].

katen' - chaîne {de 1990: chaine} | fetter | Fessel | оковы, кандалы | kajdany.

katolik' [OA 1] * catholique | catholic | Katholik | католикъ | katolik. {RELI}

katun' - toile de coton | cotton, calico | Kattun | ситецъ | kreton. — [AK] {fr} cotonnade.

kaŭci-o (*jur.*) [OA 2.1] {JUR}

kaŭc̆uk' [OA 1] caoutchouc | india rubber | Kautschuk | каучукъ | kauczuk.

kaŭr-i [OA 2.2] être accroupi | to squat | kauern

kaŭteriz' - cautériser | cauterise | ätzen {2012: kauterisieren} | прижигать | wypalać. {MED} — [AK] wypalać (*medyc.*)

kaŭz' - causer | cause | verursachen | причинять | powodować, sprawiać.

● **kaŭz'o** - cause | cause | Ursache | причина | przyczyna. — **kaŭzo** - cause | cause | Ursache | причина | przyczyna [FE 28]. — ... severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado ... [A 1.3]. Sed en la praktiko ni (pro kaŭzoj jam multajn fojojn priparolitaj) devas kompreneble esti tre singardaj kun ĉia « perfektigado » de la lingvo [A 9.2]. — Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj [FE 28.2].

kav' - fosse, creux | cave | Grube | яма | dół, loch. — [AK] {en} cavity, hollow.

kavaleri' [OA 1] cavalerie | cavalry | Kavallerie | конница | jazda. {MIL}

kavalir' - chevalier | cavalier, knight | Ritter | рыцарь | rycerz.

kavern' - caverne | cavern | Höhle | пещера | jaskinia, pieczara.

kaviar' - caviar | caviare | Kaviar | икра | kawior. {KUIR} — [AK] икра (рыб, амфибий).

kaz' - cas | case | Kasus | падежъ | przypadek. {GRAM} — [AK 1914] cas (*gram.*) | case (*gram.*) | Kasus, Fall | падеж (*ерамматич.*) | przypadek (*gramat.*). — **kaz-o** [OA 2.1]. — [Kabe 1910]: **Kazo**. Unu el la formoj de la deklinacio de la substantivoj, pronomoj aŭ adjektivoj: nominativo, akuzativo. *La latina lingvo posedis ses kazojn.* Komparu**: Okazo**.

kaze' - fromage à la pie | whey-cheese | Quark | творогъ | twaróg. {KUIR} — [AK] fromage blanc | curds.

kazemat-o [OA 2.1] {MIL}

kazern' [OA 1] caserne | barracks | Kaserne | казарма | koszary. {MIL}

kazin-o [OA 2.1] — [EG 2] Kasino.

ke - que | that (conj.) | dass, damit | что, чтобы | że, żeby. — **ke** - que | that (conj.) | dass | что | że [FE 8]. — [AK 1914] dass {en 1914 legu: daß, de 1996 dass}. — … li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel … fundamenton de Esperanto [A 2.3]. {Pliaj samspecaj ekzemploj en A, ne registritaj tie ĉi}. — Diru al la patro, ke mi estas diligenta [FE 8.3]. La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon; ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili [FE 11.2]. {Pliaj samspecaj ekzemploj en FE, ne registritaj tie ĉi}. — **Rim.**: La F-to regule metas komon antaŭ „ke". Escepto estas nur: „Mi volas ke vi tien iru" [FE 19.2]. En FE eld. 1-2 ankaŭ tie tamen estas kun komo: „Mi volas, ke ...".

● **por ke** — Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos … — estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: … [A 1.1]. — Kaj ŝi … ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune [FE 15.3].

kegl' - quille | keel | Kegel | кегель, кегля | kręgiel. — [AK] {en} skittle.

kejl/o. [OA 8] Ligna aŭ metala peco, ordinare konusa, uzata anstataŭ najlo, por perforte ŝtopi truon aŭ rigide kunfiksi du partopecojn. — A. peg; F. cheville (de bois); G. Pflock, Zapfen, Keil (Verbindungsteil zum Befestigen - Verkeilen - von Rädern, Riemenscheiben auf Wellen); H. {es} clavija; I. {it} cavicchio, caviglia, cuneo; P. {pt} cavilha.

kel' - cave (la) | cellar | Keller | погребъ | piwnica. {ARKI}

kelk' - quelque | some | mancher | нѣкоторый | niektóry. — **kelke** - quelque | some | mancher, einige | нѣкоторый, нѣсколько | niektóry, kilka [FE 23]. — [AK] {en} some, a few, certain. — La reĝido ... vidis, ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj ... [FE 23.1]. En la ĉambro sidis nur kelke da homoj [FE 32.13]. Mia skribilaro konsistas el inkujo, sablujo, kelke da plumoj, krajono kaj inksorbilo [FE 34.9]. Mi aĉetis por la infanoj tableton kaj kelke da seĝetoj [FE 38.1]. En la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis du pafojn [FE 40.1].

● **kelkaj** — ... nun mi diros pri tio ĉi nur kelkajn vortojn, por ke mia opinio ne ŝajnu tro paradoksa [A 6.6]. — Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj [FE 32.12].

kelner' - garçon | boy | Kellner | половой, кельнеръ | kelner. — [AK] garçon (*d'hôtel, de café*) | waiter.

kemi/o. [OA 8] Moderna formo de: ĥemio. — A. chemistry, F. chimie, G. Chemie, H. {es} quimica {legu: química}, I. {it} chimica, P. {pt} química. — [OA 8] II.A.1. La ses formoj: alkemio, arkaismo, arkitekturo, kemio, mekaniko kaj monarko estas oficialigitaj kiel paralelaj al la Oficiala alĥemio kaj al la Fundamentaj arĥaismo, arĥitekturo, ĥemio, meĥaniko kaj monarĥo.

ken' - bois résineux | resinous wood | Kienholz | лучина | łuczywo. {BOT} — [AK] смолистое дерево (также - лучина).

kep-o [OA 2.2] képi | cap (*milit.*) | Käppi {VEST}

ker' - cœur | heart | Herz | черви (въ картахъ) | czerwień. {LUD} — [AK] cœur (*cartes*) | hearts (*cards*).

kern' - noyau | kernel | Kern | ядро | jądro. — [AK] {en} kernel, pip | jądro, pestka.

kerub' - chérubin | cherub | Cherub | херувимъ | cherubin.

kest' - caisse, coffre | chest, box | Kiste, Kasten, Lade | ящикъ | skrzynia. — **kesto** - caisse, coffre | chest, box | Kiste, Kasten, Lade | ящикъ | skrzynia [FE 31]. — Kés-to [FE 2].

● **tir'kest'** - tiroir | drawer | Schublade | выдвижной ящикъ | szuflada. — En mia skribotablo sin trovas kvar tirkestoj [FE 31]. — [DL 1888] *En mia skribtablo estas kvar tirkestoj [DL 16.5].*

kia - quel | of what kind | was für ein, welcher | какой | jaki. — **kia** - quel | of what kind, what a | was für ein, welcher | какой | jaki [FE 10]. — Kia ĝoja festo! (estas hodiaŭ) [FE 10.11]. Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion „je" [FE 29.1]. Se ni aldonas al ili la literon „k", ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu [FE 30.3]. Kia granda brulo! kio brulas? [FE 31.15]. Ĉu vi amas vian patron? Kia demando! kompreneble, ke mi lin amas [FE 41.7].

● **kiamaniere** — Mi montris en principo, kiamaniere la severa netuŝebleco de la « Fundamento » gardos ĉiam la unuecon de nia lingvo, … [A 9.1].

● **kia ajn** — Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „ajn", ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn [FE 30.9].

— **Lingva Respondo 1891 [Pri kiu, tiu - kia, tia]**: La diferenco inter *kiu, tiu* k.c. kaj *kia, tia* k.c. estas sekvanta: la formoj kun *u* estas puraj pronomoj kaj la formoj kun *a* estas pronomaj adjektivoj signifantaj econ. *Kia = kian econ havanta* k.c. Al la vorto *kiu* vi povas respondi per substantivo, dum al la vorto *kia* vi devas respondi per adjektivo. Ekzemple: je la demando "*kiu domo*" vi respondas: *tiu domo, tiu ĉi domo, la domo de la patro* k.c.; sed je la demando *"kia domo*" vi respondas: *tia domo, tia domo kiel mia, alta domo, longa domo, bela domo* k.c. [*La Esperantisto*, 1891, p. 15].

kial - pourquoi | why, wherefore | warum | почему | dlaczego. — **kial** - pourquoi | because, wherefore | warum | почему | dlaczego [FE 17]. — Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto [FE 17.1]. Kial vi ne respondas al mi? [FE 20.13] Ĉu vi estas surda aŭ muta? [FE 20.14]. Se ni aldonas al ili la literon „k", ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu [FE 30.3].

● **kial ajn** — Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „ajn", ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn [FE 30.9].

kiam - quand, lorsque | when | wann | когда | kiedy. — **kiam** - quand, lorsque | when | wann | когда | kiedy [FE 14]. — [AK 1914] als, wann, wenn. — Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; due mi dankas vin por la prunto; trie mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon [FE 14.6]. En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki [FE 15.1]. Kiam la bona virino trankviligis sian soifon, ŝi diris al la knabino: ... [FE 15.4]. Kiam oni estas riĉa (aŭ riĉaj), oni havas multajn amikojn [FE 16.21]. Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto [FE 17.1]. Kaj kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri grandaj diamantoj [FE 17.3]. Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas ... [FE 17.10]. Vi devas nur

iri al la fonto ĉerpi akvon; kaj kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile.” [FE 17.11]. ... kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin jam ne trovos [FE 20.8]. Kiam mi venis al li, li dormis; sed mi lin vekis [FE 20.9]. Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato [FE 22.3]. Kiam vi vidis nin en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron (aŭ li estis dirinta al mi la veron) [FE 24.4]. Kiam vi venos al mi, li jam antaŭe diros al mi la veron (aŭ li estos dirinta al mi la veron; aŭ antaŭ ol vi venos al mi, li diros al mi la veron) [FE 24.6]. Kiam mi venos, diru al mi la veron [FE 24.9]. — Kiam mia patro venos, diru al mi antaŭe la veron (aŭ estu dirinta al mi la veron) [FE 24.10]. Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita [FE 25.6]. Kiam li estis ĉe mi, li staris tutan horon apud la fenestro [FE 26.16]. La artikolo „la” estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj [FE 27.1]. Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas [FE 29.10]. Se ni aldonas al ili la literon „k”, ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu [FE 30.3]. Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „ajn”, ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn [FE 30.9]. Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj [FE 32.12]. Kiam mi ien veturas, mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo [FE 35.12]. Kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi ion novan, sed baldaŭ ni vidis, ke ni trompiĝis [FE 40.7]. ... tubeto, en kiun oni metas cigaron, kiam oni ĝin fumas, estas cigaringo [FE 40.15].

— **Rim.**: UL kaj DL *kian* (kun –n); kiam (kun –m) de post DL Ald 1888: „La sola ŝanĝo, kiun mi {Zamenhof} trovas necesa fari mem, estas: anstataŭ „ian,“ „ĉian,“ „kian,“ „nenian,“ „tian“ — devas esti: „iam,“ „ĉiam,“ „kiam,“ „neniam,“ „tiam“ (por malegaligi la vortojn „ian“ etc. kaj „ia,n“ etc).“

kibuc/o. [OA 9] Speco de kooperativa vilaĝo Israela kun komuna havaĵo. — [PIV 1970].

kie - oŭ | where | wo | гдѣ | gdzie.— **kie** - oŭ | where | wo | гдѣ | gdzie [FE 6]. — Kie estas la libro kaj la krajono? [FE 6.4] La libro estas sur la tablo, kaj la krajono kuŝas sur la fenestro [FE 6.5]. Kie estas la knaboj? Ili estas en la ĝardeno [FE 16.8]. — Kie estas la knabinoj? Ili ankaŭ estas en la ĝardeno [FE 16.9]. — Kie estas la tranĉiloj? Ili kuŝas sur la tablo [FE 16.10]. La infano serĉis sian pupon; mi montris al la infano, kie kuŝas ĝia pupo [FE 18.18]. La reĝido … forkondukis ŝin al la palaco de sia patro, la reĝo, kie li edziĝis je ŝi [FE 23.3]. Kie vi estas? Mi estas en la ĝardeno [FE 26.1]. Se ni aldonas al ili la literon „k”, ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu [FE 30.3].

● **kien** — Kien vi iras? Mi iras en la ĝardenon [FE 26.2].

● **kie ajn** — Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „ajn”, ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn [FE 30.9].

● **de kie** — La reĝido, kiu vidis, ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj …, petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas [FE 23.1].

kiel - comment | how | wie | какъ | jak. — **kiel** - comment | how, as | wie | какъ | jak [FE 10]. — Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: … [A 2.1]. Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li, … [A 2.2]. … li esperas, ke … ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto [A 2.3]. … ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj; ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, … [A 3.4]. Nur la supre nomitaj tri verkoj … devas esti rigardataj kiel oficialaj [A 3.5]; … verkoj privataj, kiujn la esperantistoj … povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga [A 3.6]. La « Fundamento de Esperanto » tute ne devas esti rigardata kiel la plej bona lernolibro kaj vortaro de Esperanto [A 5.1]. Sed la « Fundamento de Esperanto » devas troviĝi en la manoj de ĉiu bona esperantisto kiel konstanta gvida dokumento … [A 5.4]. La «Fundamento de Esperanto» devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta kontrolilo, … [A 5.5]. … per konsiliĝado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo … [A 7.1]. … ia aŭtoritata

institucio enkondukos ilin en la vortaron oficialan, kiel «Aldonon al la Fundamento» [A 7.2]. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo [A 8.2]. … ĉio bona, kio ne troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel rekomendata [12]. — Mi estas tiel forta, kiel vi [FE 10.19]. … estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino [FE 15.6]. Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem; … [FE 18.14]. … estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino, por vidi, kiel granda estos la malboneco de tiu ĉi knabino [FE 19.5]. Ha, kiel bele! [FE 26.23]. Fi, kiel abomene! [FE 26.25]. Ĝia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj [FE 27.2]. Sed estas bone uzadi la vorton „je" kiel eble pli malofte [FE 29.2]. Se ni aldonas al ili la literon „k", ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu [FE 30.3]. Tiu ĉi malfreŝa pano estas malmola, kiel ŝtono [FE 33.5]. Nia regimentestro estas por siaj soldatoj kiel bona patro [FE 37.12]. … la (tre malmultajn) vortojn kun « um » oni devas lerni, kiel simplajn vortojn [FE 42.9].

● **kiel ajn** — Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „ajn", ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn [FE 30.9].

— **Lingva Respondo 1907 [Pri la kazo post „kiel"]**: La frazon "ĝi (la diskutado) trafas Ibsenon kiel teoriisto*"* mi trovas nebona; mi konsilas diri "kiel teoriisto*n*". La esprimo "kiel teoriisto*"* signifas, ke *ĝi* (la diskutado) estas teoriisto kaj, estante teoriisto, ĝi trafas Ibsenon. Nominativon apud akuzativo mi uzas ordinare nur tiam, kiam la nominativo devas havi la sencon de "ke... estas", "ke... estu" k.t.p. Ekzemple: "mi trovas tiun ĉi vinon bona*"* = mi trovas, *ke* tiu ĉi vino estas *bona;* "oni faris lin generalo" = oni faris, *ke* li *estu* generalo. Sed se, anstataŭ *supozigi* la mankantan ligantan vorton "ke", la frazo *havas* ligantan vorton alian (ekzemple "kiel"), tiam devas esti uzata tiu kazo, kiun postulas la senco de la ekzistanta liganta vorto. Se du komplementoj estas ligataj per la vorto "kiel", tiam mi ordinare akordigas kaze la sekvantan komplementon kun la komplemento antaŭiranta, ĉar alie la senco estus tute alia kaj la nominativa komplemento sence rilatus ne al la antaŭstaranta komplemento, sed al la *subjekto* de la frazo. "Mi elektis lin kiel prezidanto" signifas: "mi elektis lin, ĉar mi estas prezidanto", aŭ "mi elektis lin, kvazaŭ mi estus prezidanto" aŭ "mi elektis lin en tia maniero, en kia prezidanto elektas". "Mi elektis lin kiel prezidant*on*" signifas: "kiel oni elektas prezidanton", aŭ "por havi en li prezidanton". Sekve se vi volas esprimi, ke la elektota estu prezidanto, ni povas diri: aŭ "mi elektis lin *kiel* prezidant*on*", aŭ "mi elektis lin prezidanto" (= *ke* li estu prezidanto), sed ni ne povas diri "mi elektis lin *kiel* prezidanto", ĉar tiam la senco estus tute alia. [LR 78, Respondo 7, *La Revuo*, 1907, Februaro].

— **Rim.**: **1. [Pri komo antaŭ „kiel"]**: FE eld. 1 de 1894 havas: „Ĝia uzado estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj [FE 27.2]" kun komo antaŭ „kiel". De FE eld. 2 de 1898 ĝi mankas. Albault 1963 komentas, ke oni devas aldoni ĝin laŭ la 1-a eld. **2.** [Kabe 1910]: - **1.** Kiamaniere: *Kiel vi klarigas al la lernantoj la uzadon de « si »? Kiel vi agos, tiel oni reagos*. - **2.** En kia grado: *Kiel alta estas la monto?* **3.** Detalstudo: H. A. de Hoog: Du malsanoj en Esperanto: kia-ismo, tiom-kiom-ismo. Eric Carlén 1954 (represo de artikolserio, kiu aperis en la rubriko "Nia Lingvo" sur la paĝoj de Dia Regno, organo de Kristana Esperantista Ligo Internacia, en la jaroj 1949-1952). **E-libro eldonita de INKO 2001**. **4.** Kp. „kia", „kiom" kaj „ol".

kies - à qui? dont, duquel | whose | wessen | чей | czyj. — [mankas en lecionfina vortlisto en FE]. — Se ni aldonas al ili la literon „k", ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu [FE 30.3].

● **kies ajn** — Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „ajn", ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn [FE 30.9].

kil' - quille | keel, careen | Kiel (eines Schiffes) | киль | tram, stępka. {MAR} — [AK] quille (*de bateau*) | keel | tram, kil.

kilogram' – kilogram'o da viand'o - ein Kilogramm Fleisch | килограмъ мяса | kilogram mięsa [UV da]. {MEZ} — **kilogram'** [OA 1] * kilogramme | kilogram |

Kilogramm | килограммъ | kilogram. — **kilogram/o** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 8].

kilometro — Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo [FE 32.8, mankas en UV]. {MEZ} — **kilometr'** [OA 1] * kilomètre | kilometer | Kilometer | километръ | kilometr. — **kilometr'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [DL 1888] *Tiu ĉi rivero havas ducent naŭdek kvar kilometrojn da longo [DL 3.5].*

kimon/o. [OA 9] Japana tradicia vesto longa kun larĝaj manikoj, portata kun larĝa zono el ŝtofo. {VEST} — [EV 1923] Kl. Kimono (japan. Gewand). [PIV 1970] kimon/o 1 ... 2 Eŭropa negliĝo laŭ tiu modelo, sen kudraĵo ĉe la braktruo.

kin/o. [OA 8] Kinematografio, filmarto. — A. cinema, film (as an art form); F. ciné, cinéma; G. Filmkunst; H. {es} cine; I. {it} cinema; P. {pt} cinema, cine (arte).

Kinin-o [Z], [OA 4] {fr} quinine | {en} quinine | {de} Chinin | {it} chinino | {es} quinina | {pt} quinino {preferinde: quinina} | {ca} quinina. — [EG 2] Chinin.

kio - quoi | what | was | что | co. — [Mankas en lecion-fina vortlisto en FE] — … ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj; ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, … [A3.4]. {Pliaj samspecaj ekzemploj en A, ne registritaj tie ĉi}. — La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi, … [FE 17.8]. Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas; … [FE 17.10]. Se ni aldonas al ili la literon „k", ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu [FE 30.3]. Kia granda brulo! kio brulas? [FE 31.15]. Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enkonduko 1].

● **kion** — ĉio alia, kion mi verkis aŭ verkos, konsilas, korektas, aprobas k. t. p., estas nur verkoj privataj, … [A 3.6]. — Kion Dio kreis en la sesa tago? [FE 12.16]. … li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola … [FE 21.7]. La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, … [FE 23.3]. Mi volas, ke tio, kion mi diris, estu vera (aŭ mi volas esti dirinta la veron) [FE 24.12]. Ho, Dio! kion vi faras! [FE 26.22]. Mi neniel povas kompreni, kion vi parolas [FE 28.10]. Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia deziro [FE 31.14]. … mi de teruro ne sciis, kion fari [FE 38.10].

● **de kio** — De kio tio ĉi venas, mia filino?" [FE 17.6]

● **per kio** — … por ke ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi, … [A 3.3].

● **pro kio** — … li demandis ŝin, … pro kio ŝi ploras [FE 21.7].

● **kio ajn** — Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „ajn", ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn [FE 30.9].

— **Lingva Respondo 1907 [Pri "ioj", "tioj", "kioj" k.t.p.]**: Teorie la ĵus diritaj formoj tute bone povas havi multenombron tiel same, kiel ili havas akuzativon; sed en la *praktiko* mi ne konsilas al vi uzi la diritajn vortojn en multenombro, ĉar laŭ mia opinio ilia *senco* tion ĉi ne permesas. "Tio" prezentas ja ne ian difinitan objekton, sed ian *bildon* (aŭ abstraktan ideon), kaj bildo restas ĉiam ununombra sendepende de tio, ĉu ĝi konsistas el unu objekto aŭ el multaj. Tamen se aperas ia tre malofta okazo, kiam la logiko postulas, ke ni uzu la diritajn vortojn en multenombro, tiam la *gramatiko* de nia lingvo tion ĉi ne malpermesas. Ekzemple: "Lia potenco konsistas el diversaj *ioj*, el kiuj ĉiu aparte per si mem estas ne grava, sed ĉiuj kune donas al li grandan forton" [Respondo 18, *La Revuo*, 1907, Junio].

kiom - combien | how much | wie viel | сколько | ile. — [Mankas en lecion-fina vortlisto en FE] — Se ni aldonas al ili la literon „k", ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu [FE 30.3].

● **kioma** — Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi-tiea, tieulo, tiamulo k. t. p. (= kaj tiel plu) [FE 30.10].

● **kiom ajn** — Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „ajn", ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn [FE 30.9].

kiosk/o [OA 9] **1** Budeto por vendo de varoj (gazetoj, floroj, trinkaĵoj ktp.). —

[EV 1923] Kiosk 2. Zeitungshäuschen (bes. rund). [PIV 1970]. — **2** Ĝardena (Orient-stila) paviloneto nefermita ĉe unu aŭ pluraj flankoj. — [EV 1923] Kiosk 1. (türkisches Garten-) Häuschen. [PIV 1970].

kiras' - cuirasse | cuirass | Kürass | панцырь | kirys. — [AK] панцырь, кираса | kirys, pancerz.

Kirl' [OA 3.1] {en} to whirl | {fr} battre en tournant, touiller, faire tourbillonner | {de} quirlen | {es} voltear el molinille | {pt} agitar com o molinete {preferinde: remexer, bater (líquido)} | {it} agitar, frullare | {pl} mieszac {legu: mieszać}. — [EG 2] quirlen.

kirŝ-o (*trinkaĵo*) [OA 2.1] — [EG 2] Kirsch[wasser].

kirurg/o, (ĥirurg/o). [OA 8] Specialisto pri kirurgio. — A. surgeon, F. chirurgien, G. Chirurg, H. {es} cirujano, I. {it} chirurgo, P. {pt} cirurgião.

kirurgi/o, (ĥirurgi/o). [OA 8] Medicina teorio kaj arto kuraci malsanulojn per operacioj. — A. surgery, F. chirurgie, G. Chirurgie, H. {es} cirujía, I. {it} chirurgia, P. {pt} cirurgia.

kis' - baiser, embrasser | kiss | küssen | цѣловать {de 1918: целовать} | całować.

kitel' - souquenille | frock | Kittel | балахонъ | kieca. {VEST} — [AK] sarrau, blouse | smock, blouse | китель, балахон | kitel.

kiu - qui lequel, laquelle | who, which | wer, welcher | кто, который | kto, który.— **kiu** - qui lequel, laquelle | who, which | wer, welcher | кто, который | kto, który [FE 6]. — Kí-u [FE 3]. Kiu [FE 4]. — ... ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus la komenco de nia morto [A 1.5]. ... obei ĉiam nur klarajn, tute difinitajn fundamentajn leĝojn …, kiuj estas egale devigaj por la regantoj kaj regatoj kaj en kiuj neniu havas la rajton fari arbitre laŭ persona bontrovo ian ŝanĝon aŭ aldonon [A 3.1].

— **Lingva Respondo 1891 [Pri kiu, tiu - kia, tia]**: La diferenco inter *kiu, tiu* k.c. kaj *kia, tia* k.c. estas sekvanta: la formoj kun *u* estas puraj pronomoj kaj la formoj kun *a* estas pronomaj adjektivoj signifantaj econ. *Kia* = *kian econ havanta* k.c. Al la vorto *kiu* vi povas respondi per substantivo, dum al la vorto *kia* vi devas respondi per adjektivo. Ekzemple: je la demando "*kiu domo*" vi respondas: *tiu domo, tiu ĉi domo, la domo de la patro* k.c.; sed je la demando *"kia domo*" vi respondas: *tia domo, tia domo kiel mia, alta domo, longa domo, bela domo* k.c. [*La Esperantisto*, 1891, p. 15].

Klaĉ-i, [OA 4] {fr} faire des commérages, potiner, cancaner | {en} to gossip, tattle | {de} Klatschereien machen {en 2012 nekutima, preferinda: klatschen} | {it} far pettegolezzi | {es} chismear | {pt} bisbilhiotar {legu: bisbilhotar}, mexericar | {ca} comarejar, xerrar, fer-la petar. — Kp. ĉikan' [UV].

klaft' - toise (russe) | fathom (measure) | Faden, Klafter | сажень | sążeń. {MEZ}

Klak' [OA 3.2] {en} to clack | {fr} claquer | {de} klappen, klatschen | {es} chasquear | {pt} tagarellar {preferinde: estalar} | {it} schioccare | {pl} klekotac {legu: klekotać}. — [EG 1].

klap' - clapet | flap | Klappe | клапанъ | klapka, zasuwka, zastawka. — [AK] clapet, soupape.

klar' - clair (qui n'est pas trouble) | clear | klar | ясный | jasny. — **klara** - clair | clear | klar | ясный | jasny [FE 27]. — [AK] jasny, klarowny. — La suno rebrilas en la klara akvo de la rivero [FE 42].

● **klareco** - ... oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo [FE 27]. Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas [FE 29].

● **malklaraĵo** — Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklaraĵon [FE 35].

klarnet' - clarinette | clarinet | Clarinette {de 1901: Klarinette} | кларнетъ | klarnet. {MUZ} — [RE].

Klaro — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Ernesĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilhesĉjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38]. — **Klar'** {deklarita Fundamenta de} [OA 7] (virina antaŭnomo)

klas' - classe | class | Classe {de 1901: Klasse} | классъ | klassa.

Klasifik' [OA 3.2] {en} to classify | {fr} classifier, classer | {de} klassifizieren | {es} clasificar | {pt} classificar | classificare | {pl} --- {traduko mankas}.

klasik' [OA 1] classique | classic | klassisch | классическій | klasyczny.

klav' - touche | cliff | Klaviertaste | клавишъ | klawisz {MUS}. — [AK 1914] key (*of piano, etc.*) | Taste. — [RE].

kler' - bien élevé | educated | gebildet | образованный | wykształcony. — [AK] cultivé, instruit | well-educated, cultured | wykształcony, światły. — [RE].

klient' [OA 1] * client | client | Klient, Patient, Kunde | клиентъ | klijent. — [RE].

klimat' - climat | climate, clime | Klima | климатъ | klimat {METEO}. — [RE].

klin' - incliner, pencher | bend, incline | neigen | наклонять | chylić. — [RE].

kling-o [OA 2.2] lame | blade | Klinge. — [EG 2].

klinik-o [OA 2.1] — [Beau].

kliŝ' [OA 1] clicher | stereotype | klischieren | дѣлать клише | robić kliszę. — [EG 2].

klister' - clystère | clyster | Klystier {2012: Einlauf, Klistier} | клистиръ | enema, lewatywa {MED}. — [RE].

klitor/o. [OA 9] Malgranda sentema organo ĉe la antaŭo de la vulvo, grava en seksa plezuro ĉe virinoj. {ANAT} — [EV 1923] anat. Kitzler, Schamzünglein {ark.}, Klitoris. [PV 1930].

kloak' [OA 1] * cloaque | common sewer | Kloake | клоака | kloaka. — [EG 2].

klon/o. [OA 9] Organismo aŭ ĉelo, kiu estas gena kopio de alia organismo aŭ ĉelo. — [PIV 1970] klon/o 2 {klon/o 1 laŭ OA 9: kramfo}.

● **klon/i**. [OA 9] Estigi klonon (el organismo/ĉelo); estigi kiel klonon: *kloni beston*; *kloni ĉelon*.

klopod' - se donner de la peine | endeavour | sich Mühe geben | хлопотать | kłopotać się. — [AK 1914] se donner de la peine, faire des démarches. | sich anstrengen, sich bemühen | czynić zabiegi, starać się. — [RE]. — Kp. prov' [UL].

Klor-o, [OA 4] {fr} chlore | {en} chlorine | {de} Chlor | {it} cloro | {es} cloro | {pt} cloro | {ca} clor. — [EG 2] Chlor.

kloŝ' - cloche | bell | Kappe, Glocke (z. B. über einer Uhr) | колпакъ (напр. лампы и т.п.) | klosz. — [AK] cloche (*pour couvrir melon, pendule, etc.*) | bell-shaped cover (*clock-shade, etc.*). — [RE].

klub' - société | club | Club {2012: Klub} | клубъ | klub. — [AK] {en} club, association. — [RE].

Kluk-i, [OA 4] {fr} glousser | {en} to cluck | {de} glucken | {it} chiocciare | {es} cloquear | {pt} cacarejar | {ca} fer cloc-cloc, cloquejar, escatainar. — [EG 2].

kluz' - écluse | sluice | Schleuse | шлюзъ | śluza. — [AK] {en} sluice, lock. — [RE].

knab' - garçon | boy | Knabe | мальчикъ | chłopiec.— **knabo** - garçon | boy | Knabe | мальчикъ | chłopiec [FE 9]. — [AK] petit garçon. — [UL]. — La knabo forpelis la birdojn [FE 9]. Li estas knabo, kaj ŝi estas knabino. Kie estas la knaboj? Mi vokas la knabon, kaj li venas. Knabo, vi estas neĝentila. [FE 16].

● **knabino** - La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi [FE 11]. "Tre volonte, mia bona," diris la bela knabino. Kiam la bona virino trankviligis sian soifon, ŝi diris al la knabino ... ... ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino [FE 15]. Li estas knabo, kaj ŝi estas knabino. Kie estas la knabinoj? Mi vokas la knabinon, kaj ŝi venas. [FE 16]. Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto. "Pardonu al mi, patrino," diris la malfeliĉa knabino, "ke mi restis tiel longe" [FE 17]. ... tio ĉi estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino, por vidi, kiel granda estos la malboneco de tiu ĉi knabino. "Ĉu mi venis tien ĉi," diris al ŝi la malĝentila kaj fiera knabino, "por doni al vi trinki? [FE 19]. ... kaj la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro [FE 23]. Mia fratino estas tre bela knabino [FE 33]. Li amas tiun ĉi knabinon pro ŝia beleco kaj boneco [FE 35].

Knar-i [Z], [OA 4] {fr} grincer (plume, roue, porte) | {en} to creak (of a wheel, door, hinge, pen) | knarren | {it} stridere | {es} rechinar (puerta, rueda, pluma) | {pt} chiar (ferindo o ouvido) {ankaŭ: ranger} | {ca} grinyolar, cruixir. — [EG 1].

kned' - pétrir | knead | kneten | мѣсить | ugniatać, mięsić. — [RE].

ko [OA 7] = nomo de la litero k, dekkvina litero de la Esperanta alfabeto

koaks' - coke | coak, coke | Koaks {2012: Koks} | коксъ | koks. — [MV]. [Einst 1888] koks'. — Rim.: La germana „Koaks"

kutima nur en la unua duono de la 19a jc. Ĉ. 1900 jam arkaa por la nuna „Koks“.

kobalt' - cobalt | cobalt | Kobalt | кобальтъ | kobalt. {KEM}

kobold' - farfadet | gnome | Kobold | домовой (духъ) | poczwara, dyabełek. {MIT} — [AK] lutin, farfadet | kobold, krasnoludek. — **Rim.**: Kp. **gnom-o** [OA 2.1] {MIT}.

koĉenil' - cochenille | cochineal | Cochenille | кошениль | koszenila. {ZOO}

kod/o [OA 9] **1** Sistemo de signoj aŭ signaloj por prezenti mesaĝojn aŭ ordonojn: *internacia marista signalkodo*; *Morsa kodo*; *sepbita kodo*; *gena kodo*; *ĉifro estas sekreta kodo*. **2** Kodaĵo: *poŝta kodo*; *UEA-kodo*; *fonta kodo de programo* (= fonta teksto de programo). — [EG 2] kodo, Kodex. [ER 66]. [PV 1930] Kolekto da leĝoj: *civila, kriminala, komerca ~o.*

● **kod/i**. Esprimi ion en kodo *1*: *kodi mesaĝon*.

● **mal/kod/i**. [OA 9] Ekstrakti informon el koditaĵo: *malkodi sendaĵon*.

● **kod/aĵ/o**. [OA 9] Grupo da signoj, prezentanta koditan informon. — [OA 9] Noto: La Akademio lasas por posta konsidero la demandon, ĉu la juran sencon “sistema normodona dokumento pri iu branĉo de socia aŭ faka vivo” oni esprimu per la vorto *kodo* (kio konformus al la rekomendo de la aŭtoritataj vortaroj kaj al la uzado de plimulto, sed malkoheras kun la signosistema senco), aŭ per *kodekso* (uzata malpli ofte, sed pli kohere kun la ĉefsenco).

kodeks/o. [OA 9] Libro, precipe antikva manuskripto, el falditaj kaj binditaj folioj (kontraste al libro rulforma). — [OA 9] Noto: En multaj lingvoj per natura sencovastigo (*kodekso, entenanta la leĝaron de Justiniano — la Kodekso de Justiniano*) la vorto *kodekso* akiris la sencon “kohera normodona dokumento pri iu branĉo de socia aŭ faka vivo”: *civila kodekso*; *mara kodekso*; *honorkodekso*. Tia uzo estas atestita ankaŭ en Esperanto, tamen ĝi restas konsiderinde malpli ofta ol la homonima uzo de la samdevena vorto *kodo*. — [EG 1] [GE 1] [PV 1930] Kolekto de la farmaciaj formuloj, akceptita de la medicina Fakultato.

kodicil-o [OA 2.1] — [EG 2] Kodizill.

koeficient' [OA 1] * coéfficient | coefficient | Koeffizient | коефиціентъ | współczynnik.

krestomati-o [OA 2.1] — [FK 1903]. [EG 2] Chrestomatie. — **Rim.**: En parto de la 1-a eld. de la F-to 1905 estas kunbindita reklamo de la firmao Hachette por la Fundamenta Krestomatio 1903. Pro tio Wüster k.a. asertis, ke „krestomatio" estas Fundamenta. En aliaj ekzempleroj de F-to 1905 anstataŭ la reklamo por FK legeblas reklamoj por Tutmonda Jarlibro Esperantista, Internacia Scienca Revuo kaj du aliaj libroj sur la sama paĝo maldekstre de la titolpaĝo (tiel en la ekzemplero de la Universitato de Kalifornio, en Santa Cruz, siglo PM 8213 Z34). Ĉiuj vortoj uzitaj en tiuj reklam-paĝoj (krom krestomatio, ankaŭ kompanio, revuo k.a.), ne apartenas al la F-to laŭ stato de 1905. Por detala diskuto vd. la Ĝeneralan Parton.

kret' - craie | chalk | Kreide | мѣлъ | kreda. — [UL].

krev' - crever | crash | platzen | лопнуть | pęknąć. — [AK 1914] crever, éclater | burst (*intr.*) | platzen, bersten. — [RE].

kri' - crier | cry | schreien | кричать | krzyczeć. — **krii** - crier | cry | schreien | кричать | krzyczeć [FE 21]. — **krii** - crier | cry | schreien | кричать | krzyczeć [FE 21 ek']. — [AK] {en} cry out, cry. — [UL]. —

Apenaŭ ŝia patrino ŝin rimarkis, ŝi kriis al ŝi: “Nu, mia filino?” [FE 21.1]

● **ekkrii** — **ekkrii** - s’écrier | cry out | aufschreien | вскрикнуть | krzyknąć [FE 21 ek’]. — “Ho, ĉielo!” ekkriis la patrino, “kion mi vidas? [FE 21.3].

● **kriema** — Lia edzino estas tre laborema kaj ŝparema, sed ŝi estas ankaŭ tre babilema kaj kriema [FE 41.12].

kribr’ - cribler, tamiser | sieve | sieben, durchsieben | просѣивать | przecedzić, przesiać. — [AK] {en} sieve, sift. — [RE].

krim’ - crime | crime | Verbrechen | преступленіе | występek, przestępstwo. {JUR} — [RE].

kriminal’ - criminel | criminal | criminal | уголовный | karny, kryminalny. {JUR} — [AK] {en} criminal (*adj.*) | уголовный, криминальный. — [RE].

kring’ - craquelin | cracknel | Kringel | бубликъ | obwarzanek {KUIR}. — [AK] gimblette (*pâtisserie*) | ring-shaped cake. — [RE].

kripl’ - estropié | crippled | Krüppel | уродливый | kaleki. — [AK 1914] deformed, cripple (*adj.*) | verstümmelt, verkrüppelt. — [RE]. — **Rim.**: La germana AK estas ĝusta – la substantivo „Krüppel“ ne harmonias kun la adjektivoj en la aliaj referenc-lingvoj. Ĝuste ankaŭ estus „Krüppel-“ (kun ligostreketo). Ĝi tamen mankas jam en MV 1889.

kript-o (*arĥ.*) [OA 2.1] {ARKE} — [EG 2] Krypte.

krisp’ - fraise | ruff | Krause, Gekröse | брыжи, брыжейка, курчавость | kreza. {ANAT} {VEST} — [AK] fraise (*anat. et costume*) | mesentery, ruffle (*a*). — [RE].

Krist’ - Christ | Christ | Christus | Христосъ {de 1918: Христос} | Chrystus {RELI}. — **Kristo** - Christ | Christ | Christus | Христосъ {de 1918: Христос} | Chrystus [FE 37]. — [DL 1888]: *Kristo reviviĝis* [DL 15.4]. [RE].

● **krist’an** - chrétien | christian | Christ | христіанинъ | chrześci janin. {RELI} — Luteranoj kaj Kalvinanoj estas kristanoj [FE 37.8]. — [DL]: *En tiu ĉi lando loĝas tri milionoj kristanoj (aŭ: da kristanoj)* [DL 3.11]. *La nombro da kristanoj estas pli granda, ol la nombro da mahometanoj* [DL 9.11].

● **krist’nask’** - Noël | Christmas | Weihnachten | Рождество Христово | Boże Narodzenie. — **Rim.**: En MV 1889 majuskle skribita: *Krist’nask’* Weihnachten.

kristal’ - cristal | crystal | Krystall | кристаллъ | krysztal. — [RE].

kriteri-o [OA 2.1] — [EG 2] Kriterium.

kritik’ - critiquer | critick, criticise | kritisiren {de 1901: kritisieren} | критиковать | krytykować. — [AK] {en} criticise. — [DL] *... mi petis ilin alsendi al mi tiun numeron de l' gazeto, en kiu estos kritiko de mia afero* ... [DL A 11]. [RE].

kriz’ - crise | crisis | Krisis {2012: Krise} | кризисъ | kryzys. — [MV].

krizantem-o [OA 2.1] {BOT} — [EG 2] Chrysantemum.

kroĉ’ - accrocher | hook to, cling to | anhaken, anklammern | цѣплять | czepiać. — [AK] зацеплять. — [RE].

krokodil’ - crocodile | crocodile | Krokodill {de 1901: Krokodil} | крокодилъ | krokodyl. {ZOO} — [RE].

krom - hors, hormis, excepté | without, except | ausser {legu: außer} | кромѣ {de 1918: кроме} | oprócz. — **krom** - hors, hormis, excepté | besides, without, except | ausser {legu: außer} | кромѣ {de 1918: кроме} | oprócz [FE 11]. — [AK] hors, hormis, outre, à part, indépendamment de | not counting, besides, except. — [RE]. — La pli juna filino, ..., estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi [FE 11.3]. En la salono estis neniu krom li kaj lia fianĉino [FE 26.13]. ... ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra ... [FE 27.3].

— **Lingva Respondo 1891 [“krom” kaj “ekster”]**: En la plena vortaro {t.e. en RE 1889} ni donis la vorton “krom” sed poste, vidante ke kelkaj amikoj per la vorto “ekster”, kiu ekzistas en la malgranda fundamenta vortareto, kvankam sub iom alia senca nuanco, tute bone esprimas ankaŭ la sencon de “krom”, ni komencis ankaŭ uzadi tiun ĉi vorton en la senco de “krom”. [*La Esperantisto*, 1891, p. 7].

— Lingva Respondo 1908 [„krom“]: La prepozicio “krom” antaŭ iu vorto signifas, ke tiu vorto staras ekster la temo de nia parolado, ke ni rigardas ĝin kiel ion apartan; tial ĝi povas havi egale bone la sencon de escepto kaj la sencon de aldono, depende de la cirkonstancoj, en kiuj ĝi estas uzata. “Krom” *per si mem* esprimas nek escepton, nek aldonon, ĝi esprimas nur *apartigon;* sed ĉu tiu apartigo estas farata por ion forigi, aŭ

kontraŭe, por ĝin pli akcenti, tion montras la senco de la frazo mem. Ekzemple, kiam mi diras: “tie estis ĉiuj miaj fratoj krom Petro”, ĉiu komprenas, ke mi apartigas Petron, por montri, ke li *ne* estis inter la “ĉiuj” sed kiam mi diras: “krom Petro tie estis ankaŭ ĉiuj aliaj miaj fratoj”, oni facile komprenas, ke ĉi tie mi apartigis Petron nur tial, ke pri li ni jam parolis, aŭ pri li oni jam scias, ke li tie estis, aŭ ke li tie devis esti. Kompreneble, la vorto “krom” povas iufoje kaŭzi neprecizecon aŭ malkompreniĝon; sed en *tiaj* okazoj ni devas eviti la vorton “krom” kaj uzi anstataŭ ĝi la pli precizajn esprimojn “esceptinte” aŭ “ne sole, sed ankaŭ”. [Respondo 32, *La Revuo*, 1908, Majo].

kromosom/o. [OA 9] Fadeno el biologia hereda materialo, precipe genoj, troviĝanta en la ĉeloj de organismoj (ordinare en la ĉelkerno): *homoj havas 23 parojn da kromosomoj*. — [GD] chromosome (phl.). [PIV 1970].

kron’ - couronne | crown | Krone, Kranz | вѣнецъ, вѣнокъ | wieniec. — [AK] wieniec, korona. — [UL 25]: El Heine – „De l’ patro de l’ via la krono / Por mi ĝi ne estas havinda! / For, for lia sceptro kaj trono - / Vin mem mi deziras, aminda!“. Kontraste en UL-vortaroj „koron-“.

kronik’ - chronique | chronicle | Chronik | хроника | kronika. — [AK] хроника, летопись. — [RE].

kronologi-o [OA 2.1] — [EG 2] Chronologie.

kronometr-o [OA 2.1] — [EG 2] Chronometer.

krop’ - jabot, gosier | crop, craw | Kropf | зобъ | wole {MED}. — [AK] jabot, gésier. — [RE].

kroz’ - croiser | cruise | kreuzen (von Kriegsschiffen) | крейсировать | krzyżować. — [AK] {en} cruise (*of warships*) | krążyć (o okrętach). — [RE].

kruc’ - croix | cross | Kreuz | крестъ | krzyż. — [UL].

● **kruc’um’** - crucifier | crucify | kreuzigen | распинать на крестѣ | ukrzyżować.

kruĉ’ - cruche | jug | Krug | кувшинъ | dzban. — **kruĉo** - cruche | pitcher | Krug | кувшинъ | dzban [FE 13]. — [AK] {en} jug, pitcher, cruise. — [RE]. — Inter aliaj aferoj tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko kaj alporti domen plenan grandan kruĉon [FE 13]. Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune [FE 15].

● **te’kruĉ’** - théière | tea-pot | Theekanne {de 1901: Teekanne} | чайникъ | czajnik [UV te’].

krucifiks’ [OA 1] * crucifix | crucifix | Kruzifix | распятіе | krucyfiks. {RELI} — [LInt 1898, 157]: *La pastro faris la krucosignon super la baptita kaj tenis al la baptanoj krucifikson, por ke ili ĝin kisu.* [EG 2].

krud’ - cru, rudé | raw, crude, rough | roh, rauh | сырой, суровый | surowy. — [AK] surowy (produkt). — [RE].

kruel’ - cruel | cruel | grausam | жестокій | okrutny. — [RE].

krup’ - croup | croup | Croup {2012: Kruppe} | крупъ | krup. — [RE].

krur’ - cuisse, jambe | thigh, shank | Unterschenkel | голень | goleń. {ANAT} — [AK 1914] leg | Bein, Unterschenkel. — [MV].

krust’ - croute | crust | Kruste | струпъ | strup. — [AK 1914] Kruste, Rinde | корка, струп. — [RE].

krut’ - roide, escarpé | steep | steil | крутой | stromy. — **kruta** - roide, escarpé | steep | steil | крутой | stromy [FE 34]. — [RE]. — Sur kruta ŝtuparo li levis sin al la tegmento de la domo [FE 34].

ksilofon-o (*muz.*) [OA 2.1] {MUZ} — [EG 2] Xylophon.

ku/o. [OA 9] La litero Q, q. — [GD] q (lettre latine). [PIV 1970]

kub’ - cube | cube | Kubus | кубъ | sześcian. — [RE].

Kubo [OA 8] {GEO} — [E-isto 1/1893].

kubut’ - coude | elbow | Ellbogen | локоть | łokieć {ANAT}. — [RE].

kudr’ - coudre | sew | nähen | шить | szyć. — **kudri** - coudre | sew | nähen | шить | szyć [FE 34]. — [UL]. — ... per kudrilo ni kudras ... [FE 34].

● **kudrilo** - ... per kudrilo ni kudras ... [FE 34].

kuf’ - coiffe, huppe | cap, tuft | Haube, Kappe | чепецъ | czepek. {VEST} — [AK] coiffe, bonnet de femme | coif, cap, headdress {2012: headdress}. — [RE].

kugl’ - balle (de fusil) | bullet | Kugel (Schiess-) {legu: Schieß-} | пуля | kula. — [AK] kula (do strzelania). — [RE].

kuir' - faire cuire | cook | kochen | варить | gotować. — **kuiri** - faire cuire | cook | kochen | варить | gotować [FE 13] [FE 13 ej']. — [AK] {en} cook (*vb.*). — [UL].

● **kuirejo** - cuisine | kitchen | Küche | кухня | kuchnia [FE 13 ej]. — Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj laboradi senĉese [FE 13.2]. La kuiristo sidas en la kuirejo [FE 40].

● **kuiristo** - Ni havas diversajn servantojn: kuiriston, ĉambristinon, infanistinon kaj veturigiston [FE 37.18]. La kuiristo sidas en la kuirejo [FE 40].

kuk' - gâteau | cookey | Kuchen | пирогъ | pierożek {KUIR}. — **kuko** - gâteau | cake | Kuchen | пирогъ | pierożek [FE 35]. — [AK] {en} cake, cookey | ciastko. — [RE]. — Mi trinkis teon kun kuko kaj konfitaĵo [FE 35].

kukol' - coucou | cuckoo | Kuckuck | кукушка | kukułka. {ZOO} — [RE].

kukum' - concombre | cucumber | Gurke | огурецъ | ogórek. {BOT} — [RE].

kukurb' - citrouille, calebasse | gourd, pumpion | Kürbis | тыква | tykwa {BOT}. — [AK] potiron, citrouille | pumpkin, gourd | dynia. {BOT} — [RE].

kul' – cousin, moucheron | gnat | Mücke | комаръ | komar. {ZOO} — [AK] cousin, moustique. — [RE].

kuler' - cuillère | spoon | Löffel | ложка | łyżka. — **kulero** - cuillère | spoon | Löffel | ложка | łyżka [FE 14]. — [UL]. — Mi aĉetis dekduon (aŭ dek-duon) da kuleroj kaj du dekduojn da forkoj [FE 14]. Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo [FE 34.10].

kulis-o [OA 2.2] (*teatr.*) coulisse | slip, wing | Kulisse {TEATR} — [EG 2] Kulisse.

kulp' - coupable | fault, blame | schuldig | виноватый | winny. — **kulpa** - coupable | blameable | schuldig | виноватый | winny [FE 21]. — [AK] {en} guilty, at fault. — [UL]. — Ŝia fratino en ĉio estas kulpa; mi pagos al ŝi por tio ĉi!" [FE 21].

● **kulpo** - ... ni devas diri ĉiam "pardoni al la malamiko lian kulpon" [FE 29].

kult' [OA 1] culte | worship, cult | Kultus | культъ | kult. {RELI} — [Beau] culte. [EG 2] Kult[us].

kultur' [OA 1] * culture | culture | Kultur | культура | kultura. — [Beau] **kultura**, qui a de la culture, cultivé. ● kultureco, kulturigo, kulturigi, senkultura, senkulturejo. [EG 2] **kultur-o** Kultur; **~a** kulturell, kultiviert, Kultur-; **~eco**; **~igi**; **sen~a**; **sen~ejo**; **ter~o**.

kumin-o [OA 2.2] (*bot.*) cumin | cumin | Kümmel {BOT} — [EG 2] Kümmel.

kun - avec | with | mit | съ | z. — **kun** - avec | with | mit | съ | z [FE 7]. — [UL]. — ... per konsiliĝado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo [A 7.1]. ... en korespondado kun personoj nekonataj [A 7.1]. ... uzadi paralele kun la formo malnova [A 8.1]. ... estos presataj ... samtempe kun la formoj novaj [A 8.3]. Sed en la praktiko ni ... devas ... esti tre singardaj kun ĉia « perfektigado » de la lingvo [A 9.2]. ... al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita [A 11.2]. — Resti kun leono estas danĝere [FE 7.5]. Venu kune kun la patro [FE 8.5]. ... oni ne povis vivi kun ili [= patrino kaj filino] [FE 11.2]. Li promenas kun tri hundoj [FE 12.3]. „Kion mi vidas!" diris ŝia patrino kun grandega miro [FE 17.4]. ... niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo [FE 18.15]. ... li donis al mi teon kun sukero, sed sen kremo [FE 26.11]. — ... oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo [FE 27.5]. Sur la korto staras koko kun tri kokinoj [FE 33.16]. Mi vidis vian avinon kun ŝiaj kvar nepinoj kaj kun mia nevino [FE 33.19]. Mi trinkis teon kun kuko kaj konfitaĵo [FE 35.2]. Kiam mi ien veturas, mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo [FE 35.12]. Mi vivas kun li en granda amikeco [FE 35.19]. Kun bruo oni malfermis la pordegon, ... [FE 38.8]. Li fianĉiĝis kun fraŭlino Berto [FE 39.3]. Ŝi edziniĝis kun sia kuzo, kvankam ŝiaj gepatroj volis ŝin edzinigi kun alia persono [FE 39.7]. La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj [FE 39.14]. ... vortojn kun «um» oni devas lerni, kiel simplajn vortojn [FE 42.9]. — Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enk. 1]. — **Rim.**: [Beau]: **kun**, avec (marque uniquement l'accompagnement, jamais l'instrument de l'action, rendu par *per*).

● **kun'e** - ensemble, conjointement | together | zusammen | вмѣстѣ | razem, wraz. — **kune** - ensemble | together | zusammen | вмѣстѣ | razem, wraz [FE 8]. — La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj [A 4.4]. ...

al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita [A 11.2]. — Venu kune kun la patro [FE 8.5]. ... oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo [FE 27.5]. Patro kaj patrino kune estas nomataj gepatroj [FE 36.1]. La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj [FE 39.14]. — Vortoj, kiuj formas kune unu ideon, estas skribataj kune, sed dividataj unu de la alia per streketo, ... [UV, enk. 2].

● **kunhelpo** — ... sub mia persona kontrolo kaj kunhelpo [A 5.3].

● **kunigi** — Malfeliĉo ofte kunigas la homojn, kaj feliĉo ofte disigas ilin [FE 42.2].

● **kunligado** — Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj ... [FE 27.5].

● **kunmeti** - composer | compound | zusammensetzen | слагать | składać [FE 27]. — [Beau]: **kunmeti**, composer (former un tout, en assemblant ou en combinant divers éléments. Mais nullement faire une œuvre littéraire ou musicale : *verki*). Ex. : *La vortoj kunmetitaj*, les mots composé.

● **kunmetita** — Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj ... [FE 27.5]. — formé de | composed of | zusammengesetzt aus [UV, enk. 2]. ... la vorto « frat'in'o », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enk. 2].

● **kunteksta** — ... komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto [A 4.5].

● **kunveni** — Ni ĉiuj kunvenis, por priparoli tre gravan aferon; sed ni ne povis atingi ian rezultaton, kaj ni disiris [FE 42.1].

kunikl' - lapin | rabbit | Kaninchen | кроликъ {de 1918: кролик} | królik. {ZOO} — [RE].

kup' - ventouse | cupping-glass | Schröpfkopf | банка (медиц.) | bańka {MED}. — [AK] bańka (medyc.). — [RE].

kupe' [OA 1] compartiment (de wagon) | compartment | Coupé {(ark.)}, Abteil | отдѣленіе (въ вагонѣ), купэ | przedział (w wagonie). — [EG 2] Coupee.

kupol' - coupole, dôme | cupola, dome | Kuppel | куполъ | kopuła {ARKI}. — [RE].

kupon' [OA 1] coupon (fin.) | coupon | Coupon, Zinsschein | купонъ | kupon. {FIN} — [EG 2] Coupon, Zinsabschnitt.

kupr' - cuivre | copper | Kupfer | мѣдь | miedź. {KEM} — [UL].

● **flav'a kupr'o** - laiton | latten | Messing | латунь | mosiądz. {KEM} — [AK] {en} brass. — **Rim.**: Kp. **latun'** [OA 1] laiton | brass | Messing | латунь | mosiądz.

kur' - courir | run | laufen | бѣгать | biegać, lecieć. — **kuri** - courir | run | laufen | бѣгать | biegać, lecieć [FE 18]. — [AK] {en} run (*intr.*) | biegać. — [UL]. — Kaj ŝi tuj kuris bati ŝin [FE 21]. El sub la kanapo la muso kuris sub la liton, kaj nun ĝi kuras sub la lito [FE 26].

● **kurinte** – [la knabino] ... multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro [FE 23].

● **forkuri** — Mi volis lin bati, sed li forkuris de mi [FE 18]. La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej proksima arbaro [FE 21]. — **Rim.:** [Beau]: **forkuri**, s'enfuir (pour l'homme ot tous les animaux qui peuvent courir).

● **trakuri** — Du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo [FE 40].

kurac' - traiter (une maladie) | cure, heal | kuriren {de 1901: kurieren}, heilen | лѣчить | leczyć. {MED} — **kuraci** - traiter (une maladie) | cure, heal | kuriren {de 1901: kurieren}, heilen | лѣчить | leczyć [FE 36]. — [AK 1914] treat (*as an illness*), cure | (ärztlich) behandeln. — [UL]. — Virino, kiu kuracas, estas kuracistino; edzino de kuracisto estas kuracistedzino [FE 36].

● **kurac'il'** - médecine | medicine | Arznei | лѣкарство | lekarstwo {MED}. — [AK] {en} medicine, remedy.

● **kuracisto** - ... edzino de kuracisto estas kuracistedzino [FE 36.9]. Venigu la kuraciston, ĉar mi estas malsana [FE 39.9]. La kuracisto konsilis al mi iri en ŝvitbanejon [FE 40.14]. — [DL 1888]: *La vetero estis malbona, kaj mi malvarmumis; la kuracisto konsilis al mi iri en ŝvitbanejon* [DL 11.9].

● **kuracistino** - Virino, kiu kuracas, estas kuracistino; edzino de kuracisto estas kuracistedzino [FE 36.9].

● **kuracistedzino** - Virino, kiu kuracas, estas kuracistino; edzino de kuracisto estas kuracistedzino [FE 36.9].

kuraĝ' - courageux, hardi | courage | kühn, dreist | смѣлый | smialy. — **kuraĝa** - courageux | courageous, daring | kühn, dreist | смѣлый | śmiały [FE 7]. — [AK 1914] courageous | mutig, kühn. —

[UL]. — La kuraĝa maristo dronis en la maro [FE 37.16].

● **kuraĝe** — La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj [FE 39.14].

● **kuraĝi** — Kiu kuraĝas rajdi sur leono? [FE 7.6].

kurator' - curateur | curator | Curator {de 1901: Kurator} | попечитель | kurator, opiekun. — [AK] curateur, tuteur | trustee, curator. — [RE].

kurb' - courbe, tortueux | curve | krumm | кривой | krzywy. — **kurba** - courbe, tortueux | curved | krumm | кривой | krzywy [FE 33]. — [AK 1914] curved, bent | krumm, gebogen. — [RE]. — Rekta vojo estas pli mallonga, ol kurba [FE 33.10].

kurent/o. [OA 8] Fluo de elektro pasanta tra konduktilo: *kontinua ~o, alterna ~o*. — A. current (electric), F. courant (électrique), G. Strom (elektrischer), H. {es} corriente eléctrica) {2012: corriente (eléctrica)}, I. {it} corrente (elettrica), P. {pt} corrente (elétrica). — [PV].

kurier' - courrier | courier | Courier {de 1901: Kurier} | курьеръ, вѣстникъ {de 1918: курьер, вестник} | kuryer {de 1936: kurier}. — [AK] courrier, messager. — [RE 86] курьеръ *kurier'*. [RE 29] вѣстникъ *sci'ig'ant'; sci'aĵ'port'ist', kurjer'*. {tiel kun -j-}. — **Lingva Respondo 1901**: La nomoj de ŝako estas: ... *Läufer* kuriero ... [LR 19. Let. al Th. Thorsteinsson (1901), O.V. p. 522]. Z per tio ripetas al nova esperantisto la kutimon ekde E-isto Marto 1892, p. 43: „Klarigo de la literoj, kiujn ni uzos en ŝako: ... K = kuriero ...“. — **Rim.**: Erara analizo ĉe [Beau]: „**kurier**, courrier. (L'ensemble des lettres, etc., transportées ou reçues). **kurieristo** (celui qui porte le courrier). *per la revenonta ou revenanta kuriero*.“, probable pro la falsa amiko курьеръ ← courrier. La vorto kun franca fasado tamen havas rusan / polan semantikon. Pliajn ekzemplojn vd. en vol. I, ĉapitro „La franca tra rusa binoklo“. Kp. poŝt' [UV].

kurioz' [OA 1] * curieux, singulier | curious, singular | kurios, merkwürdig | курьезный | osobliwy. — [RE].

kurs' [OA 1] * cours | course | Kursus, Kurs | курсъ | kurs. — [RE].

kursiv' [OA 1] cursif, italique | cursive, italics | kurrent (Schrift) {2012: kursiv} | курсивъ {de 1918: курсив} | kursywa. — [RE].

kurten' - rideau | curtain | Vorhang | занавѣсъ | kurtyna, firanka. — [UL].

● **flank'kurten'** - courtine | courtain | Gardine | гардины | firanki. — [AK] {en} curtain (side).

● **rul'kurten'** - rouleau | window-shade | Rouleau {2012 ankaŭ: Rollladen} | шторы | roleta. — [AK] {en} window-blind {kun streketo}.

kurz/o [OA 9] **1** En borso (aŭ borsosimila negocado) konstatita referenca prezo de valorpaperoj, valutoj aŭ varoj: *kurzo de akcioj*; *kurzo de nafto*; *kurzo en la nigra merkato*. **2** Relativa valoro de du valutoj: *la hodiaŭa kurzo de eŭro estas 1,33 dolaroj*. {EKON} — [PV 1930].

kuŝ' - être couché | lie (down) | liegen | лежать | leżeć. — **kuŝi** - être couché | lie (down) | liegen | лежать | leżeć [FE 6]. — [UL]. — La libro estas sur la tablo, kaj la krajono kuŝas sur la fenestro [FE 6.5]. Sur la fenestro kuŝas krajono kaj plumo [FE 6.6]. Sur la tero kuŝas ŝtono [FE 6.9]. Jen kuŝas la ĉapelo de la patro [FE 8.2]. Blanka papero kuŝas sur la tablo [FE 10.2]. La blanka papero jam ne kuŝas sur la tablo [FE 10.3]. Kie estas la tranĉiloj? - Ili kuŝas sur la tablo [FE 16.10]. La infano serĉis sian pupon; mi montris al la infano, kie kuŝas ĝia pupo [FE 18.18]. La fera bastono, kiu kuŝis en la forno, estas nun brule varmega [FE 31.17]. Metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo [FE 32.6].

● **sub'kuŝ'** - succomber | succumb | unterliegen | подлегать, подлежать | podlegać.

kusen' - coussin | cushion | Kissen | подушка | poduszka. — [UL].

● **kusen'eg'** - lit de plumes | bolster | Pfühl | перина | pierzyna. — [AK 1914] édredon | bolster (*of bed*) | Pfühl, Plumeau.

kutim' - s'habituer | custom | sich gewöhnen | привыкать | przyzwyczajać się. — [AK 1914] avoir coutume, être habitué à | be accustomed | gewohnt sein, pflegen. — [UL]. — [OA 8] II.B.2. El la substantiva kutimo deriviĝas la verbo kutimi, kiu regule signifas havi kutimon; la signifo akiri kutimon jam de longe arkaikiĝis.

kuv' - baignoire, cuve | coop, tub | Wanne | ванна | wanna. — [AK 1914] cuve | tub, path | Wanne, Kübel. — [RE].

kuz' - cousin | cousin | Vetter, Cousin | двоюродный братъ | kuzyn. — **kuzo** -

cousin | cousin | Vetter, Cousin | двоюродный братъ | kuzyn [FE 20]. — [UL]. — Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito faris al li plezuron [FE 20.6]. Ŝi edziniĝis kun sia kuzo, kvankam ŝiaj gepatroj volis ŝin edzinigi kun alia persono [FE 39.7]. — [RE].

kvadrat' [OA 1] * carré | square | Quadrat | квадратъ | kwadrat. — [RE].

kvadratur-o [OA 2.1]. — [EG 2] Quadratur.

kvadril-o [OA 2.1]. {MUZ} — [Bat 1891]: Kaj kiel ili dancadis! ... Ĝi ne estis kvadrilo, ne menueto kaj eĉ ne simpla anglezo. [EG 2] Quadrille.

kvaker/o. [OA 9] Ano de la Societo de Amikoj, dogme liberala eklezio estiĝinta en Britujo en la 17a jarcento, en kies diservaj kunvenoj silenta meditado havas gravan rolon, kaj kiu estas konata ankaŭ pro sia socia helpo-agado kaj pacismo. {RELI} — [EG 1] Quäker.

kvalit' [OA 1] * qualité | quality | Qualität | качество | jakość, gatunek. — [Beau]. [EG 2].

kvankam - quoique | although | obgleich | хотя | chociaź. — **kvankam** - quoique | although | obgleich | хотя | chociaź [FE 26]. — [AK] chociaż, pomimo ze. — [UL]. — Kvankam vi estas riĉa, mi dubas, ĉu vi estas feliĉa [FE 26]. Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35]. Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj [FE 37.9]. Ŝi edziniĝis kun sia kuzo, kvankam ŝiaj gepatroj volis ŝin edzinigi kun alia persono [FE 39.7].

kvant' - quantité | quantity | Quantität | количество | ilość. — [RE].

kvar - quatre | four | vier | четыре | cztery. — **kvar** - quatre | four | vier | четыре | cztery [FE 12]. **— kvar** - quatre | four | vier | четыре | cztery [UV on']. — **kvar** quatre | four | vier | четыре | cztery [FE 14 on']. — **kvar** - 4 [FG 4.1]. — [UL]. — Kvar kaj dek ok faras dudek du [FE 12]. Ok estas kvar kvinonoj de dek [FE 14]. Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; tial du metroj kostas kvar kaj duonon frankojn (aŭ da frankoj) [FE 14]. Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj [FE 14]. ... mi finos la tutan libron en kvar tagoj [FE 14]. En mia skribotablo sin trovas kvar tirkestoj [FE 31]. Mi vidis vian avinon kun ŝiaj kvar nepinoj kaj kun mia nevino [FE 33].

● **kvardek** — Tridek kaj kvardek kvin faras sepdek kvin [FE 12].

● **kvar'a** - 4me | {angla mankas} | vierter | четвертый | czwarty [FG 4.3]. — **kvara** - Januaro estas la unua monato de la jaro, Aprilo estas la kvara, Novembro estas la dek-unua, Decembro estas la dek-dua [FE 12.13] {dek-dua: linio-salto en la originalo}.

● **kvar'on'** - le quart | a fourth, quarter | Viertel | четверть | czwarta część, ćwierć [UV on']. — **kvarono** - le quart | a fourth, quarter | Viertel | четверть | ćwierć [FE 14 on']. — **kvar'on'o** - un quart | a quarter | ein Viertel | четвертый | czwarty część [FG 4].

● **kvar'op'e** - four together [FG 4].

kvaranten' - quarantaine | quarantine | Quarantaine | карантинъ | kwarantanna. {MED} — [RE].

kvarc' - quartz | quartz | Quarz | кварцъ | kwarc. {KEM} — [RE].

kvart' - quarte | quart | Quart | кварта | kwarta. {MUZ} — [RE].

kvartal' - quartier | quarter | Quartal | кварталъ {de 1918: квартал} | kwartał. — [AK 1914] quarter (*of town*), ward | Stadtviertel | dzielnica (miasta). — [RE].

Kvast' [OA 3.1] {en} tassel | {fr} gland (ornement), pompon, houppe | {de} Quaste | {es} borla, hilacha | {pt} borla, pennacho {de 2009: penacho} | {it} nappina, fiocchetto | {pl} kvast. — [EG 2] Quaste.

kvazaŭ - comme si | as if | gleichsam, als ob | будто бы | jakoby. — [AK] как будто, будто-бы. — [RE].

Kverel-i [Z], [OA 4] {fr} se quereller | {en} to wrangle, quarrel | {de} sich zanken | {it} litigare | {es} denostarse, injuriarse, disputar encolerizados | {pt} questionar {preferinde: querelar, discutir} | {ca} barallar-se, esbatussar-se | kolere interdisputi. — [Eliro (MT) 1912]: *Se homoj kverelos, kaj unu batos la alian per ŝtono aŭ per pugno kaj tiu ne mortos, sed devos kuŝi en lito: ...* [El 21.18]. *Se viroj kverelos kaj frapos gravedan virinon, kaj ŝi abortos, ...* [El 21.22]. {Kvin pliaj trafoj en MT}. [PV] {antaŭe inter'disput'i}.

kverk' - chêne | oak | Eiche | дубъ | dąb. {BOT} — [RE].

kvestor-o [OA 2.1] — [EG 2] Quästor.

kviet' - mou, doux, quiet | quiet, calm | sanft | кроткій | łagodny. — [AK 1914] doux, tranquille, calme | sanft, ruhig | кроткий, спокойный | łagodny, spokojny. — [RE].

kvin - cinq | five | fünf | пять | pięć. — **kvin** - cinq | five | fünf | пять | pięć [FE 12]. — FUNDAMENTA GRAMATIKO DE LA LINGVO ESPERANTO EN KVIN LINGVOJ [FG titolo]. — **kvin** - 5 [FG 4.1]. — Kvin kaj sep faras dek du [FE 12.6]. Tridek kaj kvardek kvin faras sepdek kvin [FE 12.9]. Por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, t. e. (= tio estas) dek frankojn [FE 14.7]. ... se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj [FE 14.16].

● **kvinoble** — Kvinoble sep estas tridek kvin [FE 14.8].

● **kvinono** — Ok estas kvar kvinonoj de dek [FE 14.10]. Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro [FE 14.12].

● **kvinope** — Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn [FE 14.14].

● **kvindek-unua** — La dudeka (tago) de Februaro estas la kvindek-unua tago de la jaro [FE 14.14].

● **po kvin** - au taux de cinq (chacun) | five apiece | zu fünf | по пяти | po pięć [FG 4].

kvint' [OA 1] quinte (mus.) | quint | Quinte | квинта | kwinta. {MUZ} — [RE].

kvintesenc' [OA 1] * quintessence | quintessence | Quintessenz | квинтесенція | kwintesencja. — [EG 2].

kvit' - quitte | quit | quitt | квитъ, въ разсчетѣ | kwit. — [AK] quitte, libéré | be quit of | kwita. — [MV].

kvitanc' - quittancer | acquit | quittiren {de 1901: quittieren} | квитировать, росписаться въ полученіи | pokwitować. — [AK] donner quittance, acquitter | receipt (*vb*.), give a quittance | выдавать квитанцию, расписываться в получении. — [RE].

kvocient-o [OA 2.1] {MAT} — [EG 2] Quotient.

kvorum/o. [OA 9] Difinita minimuma nombro de partoprenantoj en kunveno, necesa por validigi ĝiajn decidojn. — [EV 1923] Quorum (in einer Körperschaft beschlußfähige Mindestzahl der Anwesenden. [PV 1930].

L

Ll - l | l as in “line“ | l | л | l [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **lo** ... [FE 1]. — **lo** [OA 7] = nomo de la litero **l**, deksesa litero de la Esperanta alfabeto. — **Lingva Respondo 56 (1893)**: La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

l', **la** - article défini (le, la, les | the | der, die, das (bestimmter Artikel) | членъ опредѣленный (по русски не переводится) | przedimek określny (nie tłomaczy się). — **la** - article défini (le, la, les) | the | bestimmter Artikel (der, die, das) | членъ опредѣленный (по русски не переводится) | przedimek określny (nie tłómaczy się) [FE 5]. — [FG 1]. — La artikolo „la” estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj [FE 27.1]. Ĝia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj [FE 27.2]. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa [FE 27.3]. Anstataŭ „la” oni povas ankaŭ diri „l'” (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo) [FE 27.4]. — [DL 1888]: *La vorto „la“ estas nomata „artikulo“ {de DL 1888: artikolo}; ĝi estas uzata tian, kian {de 1888: tiam, kiam} ni parolas pri objektoj konataj. Anstataŭ „la“ oni povas ankaŭ diri „l' “, se ĝi ne estos malbonsone* {tiel! Legu: *malbonsona*} [DL 1.7].

— **Lingva Respondo 1890 [Pri uzo aŭ neuzo de la artikolo]**: Ofte vi ripetas pri la maloportuneco de la artikolo *la*. Sed la artikolo estas ja vorto tute aparta kaj sur la konstruon de la frazoj ĝi havas nenian influon; tial, se vi volas, vi povas tute ĝin ne uzadi, almenaŭ ĝis la tempo kiam vi tute

bone scios ĝian signifon. [*La Esperantisto*, 1890, p. 32].

— **Lingva Respondo 1890 [Pri uzo aŭ neuzo de la artikolo]**: Tute vane vi faras al vi multe da klopodoj kun la uzado de la artikolo. Vi devas memori, ke en nia lingvo la uzado de la artikolo ne estas deviga; sekve la plej bona maniero de agado estas jena: uzu la artikolon tiam, kiam vi scias certe, ke ĝia uzado estas necesa kaj postulata de la logiko, sed en ĉiuj *dubaj* okazoj tute ĝin ne uzu. Pli bone estas ne uzi la artikolon en tia okazo, kiam ĝi estas necesa, ol uzi ĝin tiam, kiam la logiko kaj la kutimoj de ĉiuj popoloj ĝin malpermesas. Se vi ekzemple diros "venis tago, kiun mi tiel longe atendis", via frazo estos ne tute bonstila, sed ne rekte erara, kvankam oni devus tie ĉi diri "*la* tago" sed se vi diros "hodiaŭ estas *la* dimanĉo" anstataŭ "hodiaŭ estas dimanĉo", tiam vi faros rekte *eraron*, kiu estos malagrabla por la oreloj de ĉiu bona Esperantisto. [*La Revuo*, 1906, Decembro].

— **Lingva Respondo 1889 [Pri „l'" aŭ „la"]**: Se vi ne scias, kiam vi devas uzi la formon *la* kaj *l'*, uzu ĉiam pli bone la formon *la*. La formon *l'* mi uzas ordinare nur post prepozicioj, kiuj finiĝas per vokalo (ekzemple *de, tra* k.c.); en ĉiaj aliaj okazoj mi uzas ordinare la plenan formon *la*, ĉar alie la senco povus fariĝi ne klara, eĉ la sono ne agrabla. [*La Esperantisto*, 1889, p. 24].

— **Lingva Respondo 1893 [Pri „l'" aŭ „la"]**: La uzadon de *l'* (apostrofita *la*) ni ne forigis; sed ĉar tiu ĉi formo estas ne tre necesa escepto el regulo kaj estas kreita precipe por mallongeco en la *versoj*, tial ni en *prozo* uzas nun ordinare la formon konstantan (*la*) kaj konservas la formon apostrofitan speciale por versoj. Tiel ni agas ordinare en nia gazeto; tamen ni tute ne faras el tio ĉi regulon; ĉiu povas kuraĝe uzadi ankaŭ en prozo la formon apostrofitan. [*Esperantisto*, 1893, p. 127].

— **Lingva Respondo 1906 [Pri „l'" aŭ „la"]**: La esprimo "reunuigi l' homaron" estas efektive nebona, ĉar apostrofi la artikolon oni povas nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo. Sed la neobservado de tiu ĉi regulo, kiu estis donita *ne en la gramatiko*, sed nur en la "Ekzercaro" (№27), estas ne *eraro*, sed nur peko kontraŭ *boneco de la stilo*. Sekve en *prozo* tiu ĉi regulo devas esti observata, sed en *versoj*, kie pro "licentia poetica" oni ofte permesas al si deflankiĝojn de la ordinara stilo, la neobservado de la supre donita regulo (aŭ pli ĝuste *konsilo*) ne estas eraro. En versoj ni devas nomi "eraro" nur deflankiĝojn de la *gramatiko* (ekzemple la apostrofadon de adjektivo, uzadon de diversaj kontraŭ-gramatikaj formoj k.t.p., kio estas tre ofte renkontata ĉe la komencantaj esperantaj versistoj). [*La Revuo*, 1906, Decembro].

— Lingva Respondo 1907 [Pri „da" sen artikolo]: ... tial ni povas diri, ke, kvankam *teorie* la kombinado de "da" kun "la" ne estas malpermesata, sed en la *praktiko* tia kombinado estas uzebla nur en tre maloftaj okazoj, tiel malofte, ke ni eĉ povas simple konsili, ke oni *neniam* uzu "da" antaŭ "la" (krom la okazoj, en kiuj la senco tion ĉi nepre kaj tute sendube postulas). [Respondo 16, *La Revuo*, 1907, Junio {la kompletan LR vd. ĉe „da"].

— **Lingva Respondo 1911 [Pri "ambaŭ" sen artikolo]**: ... Kvankam mi [= Zamenhof] ofte uzis la formon "la ambaŭ", tamen mi opinias nun, ke pli logike estas uzi la vorton "ambaŭ" *sen* artikolo. [Respondo 54, *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, p. 221].

— **Rim.**: Pliajn detalojn vd. en la komentoj pri § 16 FG.

labirint' [OA 1] * labyrinthe | labyrinth | Labyrinth | лабиринтъ | labirynt. — [RE].

labor' - travailler | labor | arbeiten | работать | pracować. — **labori** - travailler | labor, work | arbeiten | работать | pracować [FE 13]. — [AK] work, labour. — [UL].

● **laboradi** — Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj laboradi senĉese [FE 13.2].

● **laboro** — ... ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj [A 1.1]. — ... kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, ... [FE 20.8]. Oni tiel malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron [FE 33.14].

● **laborema** — Lia edzino estas tre laborema kaj ŝparema, sed ŝi estas ankaŭ tre babilema kaj kriema [FE 41.12].

● **per'labor'** - gagner par son travail | gain | verdienen, erarbeiten | заработывать | zarabiać. — [AK] earn one's living.

● **pri'labor'** - labourer | elaborate, cultivate | bearbeiten | обработывать | obrabiać. — **Rim.**: **1.** [Beau] façonner, cultiver (faire de telle ou telle chose l'objet

d'un travail soigneux). **2.** *elaborate* estas erara.

laboratori/o. [OA 8] Laborejo, destinita por teknikaj aŭ sciencaj esploroj, operacioj, eksperimentoj. — A. laboratory, F. laboratoire, G. Laboratorium, H. {es} laboratorio, I. {it} laboratorio, P. {pt} laboratório. — [Boirac 1909]. [PV].

lac' - las, fatigué | weary | müde | усталый | zmęczony. — **laca** - las, fatigué | weary | müde | усталый | zmęczony [FE 40]. — [UL]. — Lá-ca [FE 2].

● **lacigi** — Lia hieraŭa parolo estis tre bela, sed la tro multa parolado lacigas lin [FE 40.6].

laĉ' - lacs | lace | Schnur | шнуръ | sznur. — [AK] {fr} lacet, cordon | lace (*boots, stays, etc*.) | sznurek. — [RE].

lacert' - lézard | lizard | Eidechse | ящерица | jaszczurka. {ZOO} — [RE].

lad' - tôle, fer-blanc | tinned iron | Blech | жесть | blacha. — [AK] tinned iron. — [RE]. — **Rim**.: La angla traduko de UV kaj la angla AK estas identaj (!?).

laf' - lava | lava | Lava | лава | lawa. {GEO} — [RE].

lag' - lac | lake | See (der) | озеро | jezioro. — **lago** - lac | lake | See (der) | озеро | jezioro [FE 35]. — [RE]. — La tuta supraĵo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj kreskaĵoj [FE 35.18].

● **lag'et'** - étang | pond | Teich | прудъ | staw.

lagun-o [OA 2.1] {GEO} — [EG 2] Lagune.

Laik' [OA 3.1] {en} layman | {fr} laïc | {de} Laie | {es} laico | {pt} leigo | {it} laico | {pl} laik. — [EG 2].

lak' - vernis | varnish | Lack, Firniss | лакъ | pokost. {KEM} — [AK] lakier. — [RE].

lake' - laquais | lackey | Lackei, Bedienter | лакей | lokaj. — [RE].

laks' - flux du ventre {legu: flux de ventre (ark.). 1963: relâchement (intestinal)} | looseness | Durchfall | поносъ | rozwolnienie. {MED} — [AK] diarrhée | diarrhoea, looseness (*of bowels*). — [RE]. — **Rim.**: UV 1893 havas ĝuste flux de ventre, anstataŭ „du".

lakt' - lait | milk | Milch | молоко | mleko. — **lakto** - lait | milk | Milch | молоко | mleko [FE 10]. — [AK] milk (*subst*.). — [RE]. — Lakto estas pli nutra, ol vino [FE 10.15].

● **lakt'um'** - laite | soft-roe, milt | Milch der Fische | молоки | mleczko (ryb). — [AK] spawn, milt. — **Lingva Respondo 1908**: Mi tute konsentas kun vi, ke "lakto" kaj "laktumo" havas inter si preskaŭ nenion komunan, kaj ni havus plenan rajton uzi por "laktumo" ian vorton tute memstaran. Sed ĉar en multaj lingvoj por ambaŭ diritaj vortoj estas uzata la sama radiko, kaj ĉar la vorto "laktumo" estas ne malpli oportuna, ol ĉia tute memstara vorto, kaj ĉar tiu vorto jam troviĝas en la "Fundamento de esperanto", tial ekzistas absolute nenia neceseco, ke ni forĵetu la oportunan vorton jam konatan kaj devigu la Esperantistojn lerni novan vorton. (LR 34, Respondo 37 b, *La Revuo*, 1908, Majo).

laktuk-o [OA 2.2] laitue | lettuce | Lattich {BOT} — [EG 2].

lam' - boiteux | lame | lahm | хромой | kulawy. — [UL].

● **lam'baston'** - béquille | crutch | Krücke | костыль | kula (do chodzenia).

lama-o (*pastro*) [OA 2.1] — [EG 2] Lama (Buddha-Priester).

Lamen-o [Z], [OA 4] {fr} lame(lle) | {en} lamina | {de} Lamelle, Plättchen | {it} lamina | {es} lámina (metálica) | {pt} làmina {legu: lâmina} | {ca} lámina {legu: làmina} | maldika kaj mallarĝa plato. — [Kabe].

Lament-i [Z], [OA 4] {fr} se lamenter | {en} to lament | {de} jammern, wehklagen {2012: wehklagen (ark.), ankaŭ lamentieren} | {it} lamentarsi | {es} lamentarse | {pt} lamentar-se | {ca} gemegar. — [Kabe].

lamp' - lampe | lamp | Lampe | лампа | lampa. — [UL].

lampir' - verluisant | glow-worm | Leuchtkäfer | свѣтлякъ | świetlik. {ZOO} — [RE].

lan' - laine | wool | Wolle | шерсть | wełna. — **lano** - laine | wool | Wolle | шерсть | wełna [FE 34]. — [RE].

● **bellana** — Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, precipe aroj da bellanaj ŝafoj [FE 34.15].

lanc' [OA 1] lance | lance | Lanze | копье | lanca. {MIL} — [RE].

lanĉ/i [OA 9] **1** Enuzigi (ŝipon, veturilon k.s.) je la unua fojo: *lanĉi ŝipon* (= enakvigi ĝin unuafoje post la konstruado); *lanĉi sateliton*. **2** Prezenti (varon, verkon, ideon k.s.) je la unua fojo al publika uzado: *lanĉi gazeton*; *lanĉi romanon*; *lanĉi kampanjon*; *lanĉi novan vorton*. — [EV 1923] (Seew.) vom Stapel lassen = alakvigi; vgl. ŝipglitejo,

klinebenaĵo. [GD 1955] lancer (un bateau, un mot, une mode, etc.).

land' - pays | land, country | Land | страна | kraj. — **lando** - pays | land, country | Land | страна | kraj [FE 32]. — [UL]. — ... ĉiu regnano ... devas obei ĉiam nur klarajn, tute difinitajn fundamentajn leĝojn de sia lando, ... [A 3.1]. — Multaj birdoj flugas en la aŭtuno en pli varmajn landojn [FE 32.10]. Malamiko venis en nian landon [FE 33.13]. Nia lando venkos, ĉar nia militistaro estas granda kaj brava [FE 34.12]. La regnestro de nia lando estas bona kaj saĝa reĝo [FE 37.4]. En nia lando sin ne trovas montoj, sed nur montetoj [FE 38.2]. — Lingva Respondo 1902: Via opinio pri la nomoj geografiaj estas tute ĝusta, kaj vian ideon pri la uzado de la aldono „lando" mi plene aprobas. Laŭ la reguloj de Esperanto oni povas tute bone diri Franclando, Anglolando, Kanadlando, Perulando k.t.p. [LR 18 A, let. al Fruictier (1902), O.V. p. 426].

lang' - langue (organe) | tongue | Zunge | языкъ (органъ) | język (narząd). {ANAT} — [AK] tongue (*organ of speech*). — [UL].

lantern' - lanterne | lantern | Laterne | фонарь | latarnia. — [UL].

lanug' - duvet, poils follets | down, fluff | Flaumfeder | пухъ | puch, puszek. — [AK] down, fluff (*of feathers*). — [RE].

lap/o. [OA 8] Specio de arktio kun alkroĉiĝemaj globaj kapituloj (*Arctium lappa*). — A. burdock; F. bardane, glouteron; G. Klette; H. {es} bardana, lampazo; I. {it} bardana, lappa; P. {pt} bardana, pegamassa. — [EG 1]. [ER].

lapis-o [OA 2.2] pierre infernale | lunar caustic | Höllenstein — [RE 1888]. [EG 2].

lard' - lard | lard | Speck | сало | sadło. {KUIR} — [AK] bacon. — [RE].

larĝ' - large | broad | breit | широкій | szeroki. — **larĝa** - large | broad | breit | широкій | szeroki [FE 33]. — [UL].

● **mallarĝa** — Li estas tiel dika, ke li ne povas trairi tra nia mallarĝa pordo [FE 33.2]. Mallarĝa vojeto kondukas tra tiu ĉi kampo al nia domo [FE 38.6].

● **laŭ'larĝ'** - à travers | across, in width | quer | поперекъ | poprzek. — [AK] der Breite nach, quer.

larik' [OA 1] meleze | larch tree | Lärchenbaum | лиственница | modrzew. {BOT} — [EG 2] Lärche.

laring' - larynx | larynx | Kehle | гортань | krtań. {ANAT} — [RE].

larm' - larme | tear (to shed a) | Thräne {de 1901: Träne} | слеза | łza. — [AK] tear (*subst.*) (*shed a*). — [UL].

larv' - larve | chrysalis | Larve | личинка | poczwarka, liszka. {ZOO} — [RE]. — **Lingva Respondo 1909**: La vorton „larvo" mi konsilas al vi traduki nur per „liĉinka" (larvo de insektoj). [LR 35, pk. al Bedekoviĉ (1909). El „Jugoslavia Esperantisto"]. — **Rim.**: Probable per „liĉinka" Z. celas la rusan личинка.

las' - laisser, abandonner | leave, let alone | lassen | пускать, оставлять | puszczać, zostawiać. — **lasi** - laisser, abandonner | leave, let alone | lassen | пускать, оставлять | puszczać, zostawiać [FE 37]. — [AK] laisser, abandonner. — [UL]. — ... se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe ... [A 4.3]. — Ŝteliston neniu lasas en sian domon [FE 37.15]. — **Rim.**: **1.** La franca AK ŝanĝas nenion (!?). **2.** [Beau] post korespondado kun Z klarigas: **las**, laisser. (1° Ne plus tenir, ne plus exercer d'action sur, no pas s'opposer à. Ex. : *Lasi la bridon sur la kolo de ĉevalo*, laisser la bride sur le cou à un cheval. *Lasu lin fali*, laissez-le tomber. 2° Faire rester qqn., qqch. dans un lieu, ne pas le prendre avec soi. Ex. : *Mi lasis la infanojn en la domo*, j'ai laissé les enfants à la maison. *Lasu vian mantelon tie ĉi*, laissez votre manteau ici. 3° Faire que reste après soi ceci ou cela. *Li lasis tre bonan reputacion*, il a laissé une très bonne réputation. 4° Faire rester qqn., qqch. dans l'état où il est. Ex. : *Iun lasi du horojn en bano*, laisser quelqu'un deux heures dans un bain. *Vi lasis min en la plej granda embaraso*, vous m'avez laissé dans le plus grand embarras. 5° Faire garder qqch., ne pas l'ôtor à qqn. Ex. : *La juĝantaro lasis la infanon al la patrino*, le tribunal a laissé l'enfant à la mère. *Lasu al li tiun ĉi gloron*, laissez-lui cette gloire. 6° Faire que qqn. entre en possession de qqch. soit en le remettant, soit en le transmettant. Ex. : *Vi lasos al mi monon por ke mi povu pagi*, vous me laisserez de l'argent pour que je puisse payer. *Li lasos nur ŝuldojn al ili*. Il ne leur laissera que des dettes).

laser/o. [OA 9] Aparato por produkti radion, konsistantan el elektromagnetaj

ondoj (ekz. lumo) kun tre mallarĝa spektro kaj sama fazo: *la radio de lasero povas esti tre mallarĝa kaj tre intensa*. {FIZ} — [Wells 1969] *phys* laser. — **Rim.**: Akronimo por angla ***L**ight **A**mplification by **S**timulated **E**mission of **R**adiation*; la angla nocio estas ekuzata fine de la 1950-aj jaroj.

last' - dernier | last, latest | letzt | послѣдній | ostatni. — **lasta** - dernier | last, latest | letzt | послѣдній | ostatni [FE 29]. — [UL]. — Je la lasta fojo mi vidas lin ĉe vi (aŭ: la lastan fojon) [FE 29.5].

Later-o, [OA 4] {fr} côté (géom.) | {en} side (geom.) | {de} Seite (Geom.) | {it} lato (geom.) | {es} lado (geom.) | {pt} lado | {ca} flanc, costat | rekta linio limanta geometrian figuron. {GEOM} — [EG 2] (geom.) Seite.

latitud/o. [OA 8] La angula distanco, norden aŭ suden, inter unu loko kaj la ekvatoro. — A. latitude, F. latitude, G. geographische Breite, H. {es} latitud, I. {it} latitudine, P. {pt} latitude {GEO} — [Verax].

Lat-o [Z], [OA 4] {fr} latte | {en} lath | {de} Latte | {it} assicella, panconcello | {es} lata, tabla delgada (empleada en la construcción) | {pt} ripa | {ca} llata | longa, mallarĝa kaj maldika peco el ligno, uzata en la {"la" mankas en Kajero I} konstruado. — [EG 2].

latun' [OA 1] laiton | brass | Messing | латунь | mosiądz. — [EG 2] Messing, Latun. — **Rim.**: En UV: **flav'a kupr'o** - laiton | latten | Messing | латунь | mosiądz. {KEM} — [AK] {en} brass.

latvo [OA 8] {GEO} — [1889]. [E-isto 1889, p. 16] *Lernolibro ... Eldono latva (Lettisch).*

laŭ - selon, d'après | according to | nach, gemäss | по, согласно | według. — **laŭ** - selon, d'après | according to | nach, gemäss | по, согласно | według [FE 11]. — [UL]. — La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi [FE 11.3]. Mi restas tie ĉi laŭ la ordono de mia estro [FE 26]. Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn [FE 25].

● **laŭ'larĝ'** - à travers | across, in width | quer | поперекъ | poprzek [UV larĝ']. — [AK 1914] **laŭ'larĝ'e** - der Breite nach, quer.

● **laŭ'long'** - le long | along | entlang, der Länge nach | вдоль | wdłuź. [UV long']

laŭb' - tonnelle, berceau | arbor, summerhouse | Laube | бесѣдка | altanka. — [AK] arbour, summerhouse. — [RE].

laŭd' - louer, vanter | praise | loben | хвалить | chwalić. — **laŭdi** - louer, vanter | praise | loben | хвалить | chwalić [FE 41]. — **laŭd'i** - louer | to praise | loben | хвалить | chwalić [UV i]. — [UL]. — Láŭ-di [FE 3]. Laŭdi [FE 4].

● **laŭd'** - louange [UV ind']

● **laŭd'ind'** - digne de louange [UV ind'] — Via ago estas tre laŭdinda [FE 41.10].

laŭr' - laurier | laurel | Lorbeer | лавръ | wawrzyn, laur. {BOT} — [AK] laurel (*tree*). — [RE].

laŭreat-o [OA 2.1]. — [EG 2].

laŭt' - haut (parler) | loud | laut, hörbar | громко | głośno. — [AK 1914] laut. — [UL].

lav' - laver | wash | waschen | мыть | myć. — **lavi** - laver | wasch {pres-eraro, legu: wash, kiel ĝuste en FE eld. 1} | waschen | мыть | myć [FE 15]. — [AK] myć, prać. — [UL]. — Lá-vi [FE 3] — Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon ... [FE 15.3]. Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro [FE 18.17].

● **lavita** — Vi estas lavita. Vi estis lavita. Vi estos lavita. Vi estus lavita. Estu lavita. Esti lavita [FE 25.2].

● **lavisto** — Li ne estas lavisto, li estas lavistinedzo [FE 36.11].

● **lavistinedzo** — Li ne estas lavisto, li estas lavistinedzo [FE 36.11].

lavang' – lavanche {(ark.)}, avalanche | avalanche | Lawine | лавина | lawina. — [AK] avalanche. — [RE]. **Rim.**: Grabowski: lavin-.

lavend' [OA 1] lavande | lavender | Lavendel | лаванда | lawenda. {BOT} — [EG 2].

lazur' [OA 1] * azur | azure | Lasur | лазурь | lazur. — [EG 2].

lecion' - leçon | lesson | Lektion | урокъ | lekcya. — **leciono** - leçon | lesson | Lektion | урокъ | lekcya [FE 20]. — [UL]. — Se la lernanto scius bone sian lecionon, la instruanto lin ne punus [FE 20.12].

led' - cuir, peau (des bêtes) | leather | Leder | кожа | skóra. — [AK] кожа (выделанная) | skóra (wyrobiona). — [RE].

leg' - lire | read | lesen | читать | czytać. — **legi** - lire | read | lesen | читать | czytać [FE 9]. — [UL]. — Lé-gi [FE 2]. Legi [FE 4].

— Mi legas libron [FE 9.10]. La patro ne legas libron, sed li skribas leteron [FE 9.11]. Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj [FE 14.16]. Mi legas [FE 16.1]. Nun mi legas, vi legas kaj li legas; ni ĉiuj legas [FE 20.1].

● **legado** — Ekzerco de legado [FE 2] [FE 3] [FE 4]. — **Rim.**: La titoloj „Ekzerco de legado“ mankas en FE, 2-a eld. 1898 kaj estis aldonita por la reeldono en la F-to en 1905.

● **leganto** — Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (precipe en la angla parto) tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2].

● **nelegeble** — Via parolo estas tute nekomprenebla kaj viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble [FE 41.4].

● **tralegi** — Lernolibron oni devas ne tralegi, sed tralerni [FE 31.22].

leĝ' - loi | law | Gesetz | законъ | prawo. {JUR} — [AK] prawo, ustawa. — *Lé-ĝo* [FE eld. 1-4, § 2 inter Pá-ĝo kaj Ĝis]. — [UL]. — Kiam ... tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon ... [A 1.2]. Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj li neniam permesis al si (almenaŭ konscie) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj [A 2.2]. … ĉiu regnano sciu, ke li … devas obei ĉiam nur klarajn, tute difinitajn fundamentajn leĝojn de sia lando, … [A 3.1].

● **leĝa** — …li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto [A 2.3]. Leĝan sankcion ili [= la ideoj] ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, … [A 13.2].

● **leĝodonanto** — … ĉiu esperantisto havu la plenan certecon, ke leĝodonanto por li ĉiam estos ne ia persono, sed ia klare difinita verko [A 3.2]. — [DL-Ald 1888]: *… la fina formo, kiun la kongreso donos al la lingvo, devas esti leĝdonanta por ĉiuj amikoj de l' "Lingvo internacia"* [DL-Ald 10.1].

legat-o [OA 2.1]. — [EG 2].

legend' - légende | legend | Sage | легенда | legenda. — [DL 1888] *La legendoj rakontas pri grandeguloj, kiuj volis batali kun la dioj* [DL 11.8]. *La popoldiroj (proverboj) esprimas la saĝon de l' popolo, kaj la popolrakontoj (legendoj) esprimas ĝian kredon* [DL 16.24]. — [RE].

legi' - légion | legion | Legion | легіонъ | legjon. {MIL} — [RE]. — **Lingva Respondo 1908**: La vorto „legiono“, kiun mi uzis en la „Rabistoj“, estas simpla *eraro*; devas esti „legio“. [LR 36, let. al Corret (1908-03-10), O.V. p. 558].

Legitim' [OA 3.2] {en} to legitimize, to establish the identity | {fr} légaliser | {de} legitimieren | {es} legalizar, legitimar | {pt} legitimar | {it} legittimare, legalizzare | {pl} legitymowac {legu: legitymować}. {JUR} — [EG 2].

legom' - légume | legume | Gemüse | овощь | jarzyna, warzywo. {KUIR} — [AK] {en} vegetable (*eatable*). — [RE].

lek' - lécher | lick | lecken | лизать | lizać. — [RE].

lekant' - paquerette | daisy | Gänseblume | маргаритка | złocień pospolity {BOT}. — [AK 1914] marguerite (*petite* ~) | marguerite | (weisse {legu: weiße}) Gänseblume. — [MV].

Lekci' [OA 3.2] {en} lecture | {fr} conférence, cours, leçon, lecture | {de} Lektion, Vorlesung | {es} leccion {legu: lección} | {pt} --- {traduko mankas, estu: preleção} | {it} lezione | {pl} prelekcja. — [E-isto 2/1891] [FK].

leksikon' - lexicon | lexicon | Lexicon | лексиконъ | słownik. — [AK] {fr} lexique. — [RE].

leks-o [OA 2.2] houx | holly | Stechpalme {BOT}

Lens-o, [OA 4] {fr} lentille (opt.) | {en} lens (optics) | {de} Linse (Glas) | {it} lente (ott.) | {es} lente | {pt} lente | {ca} lente, lens {ĝuste nur: lent. Kaj lente kaj lens estas eraraj}. {FIZ} — [Verax] [Kabe].

lent' - lentille | lentil | Linse | чечевица | soczewka. {KUIR} — [RE].

lentug' - lentille, rousseur | freckle | Sommersprosse | веснушка | pieg. {ANAT} — [AK] tache de rousseur. — [RE].

leon' - lion | lion | Löwe | левъ | lew. — **leono** - lion | lion | Löwe | левъ | lew [FE 5]. — [UL]. — Leono estas besto [FE 5]. Leono estas forta. La dentoj de leono estas akraj. Al leono ne donu la manon. Mi vidas leonon. Resti kun leono estas danĝere. Kiu

kuraĝas rajdi sur leono? Mi parolas pri leono [FE 7].

leontod' - dent de lion | dandelion | Hundeblume | одуванчикъ | kaczyniec {BOT}. — [AK 1914] Löwenzahn (*Pflanze*) | lwi ząb (roślina). — [RE].

leopard' - léopard | leopard | Leopard | леопардъ | lampart. {ZOO} — [RE].

lepor' - lièvre | hare | Hase | заяцъ | zając. {ZOO} — [RE].

lepr' - lèpre | leprosy | Aussatz | проказа | trąd. {MED} — [RE].

lern' - apprendre | learn | lernen | учиться | uczyć się. — **lerni** - apprendre | learn | lernen | учиться | uczyć się [FE 9]. — [UL]. — Bonaj infanoj lernas diligente [FE 9.6]. Aleksandro ne volas lerni, kaj tial mi batas Aleksandron [FE 9.7]. — La domo, en kiu oni lernas, estas lernejo, ... [FE 40.12]. La sufikso «um» ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun «um» oni devas lerni, kiel simplajn vortojn [FE 42.9].

— **Lingva Respondo 1907 [„instrui" – „lernigi"]**: Vd. ĉe „instrui".

● **lernanto** — Se la lernanto scius bone sian lecionon, la instruanto lin ne punus [FE 20.12].

● **lern'ej'** - école | school | Schule | школа | szkoła, uczelnia. — La domo, en kiu oni lernas, estas lernejo, kaj la domo, en kiu oni preĝas, estas preĝejo [FE 40.12]. — **Rim.**: Kp. skol' [OA 3.2].

● **ellerni —** ... por ke li bone ellernu kaj per ofta enrigardado konstante memorigadu al si, kio en nia lingvo estas oficiala kaj netuŝebla ... [A 5.4] — La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj [FE 30.2].

● **lernolibro** — La « Fundamento de Esperanto » tute ne devas esti rigardata kiel la plej bona lernolibro kaj vortaro de Esperanto [A 5.1]. Kiu volas perfektiĝi en Esperanto, al tiu mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn, ..., kiuj estas eldonitaj de niaj plej kompetentaj amikoj por ĉiu nacio aparte ... [A 5.3]. ... por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn oficialajn, kiuj devas troviĝi en ĉiuj lernoverkoj de Esperanto, ... [A 5.4]. ... tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, ... [A 8.3].]. — Lernolibron oni devas ne tralegi, sed tralerni [FE 31.22].

● **tralerni** — Lernolibron oni devas ne tralegi, sed tralerni [FE 31.22].

lert' - adroit, habile, agile | skilful | geschickt, gewandt, geläufig | ловкій | zręczny. — **lerta** - adroit, habile | skilful | geschickt, gewandt | ловкій | zręczny [FE 25]. — [AK 1914] geschickt, gewandt. — [UL].

● **lerte** — Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi [FE 25.9]. Mi saltas tre lerte [FE 40.4].

● **nelerta** — Li estas nelerta kaj naiva provincano [FE 37.10].

● **nelerte** — Mi permesis al mi nur korekti la preserarojn; sed se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe ... [A 4.3].

lesiv' - lessive | lie, buck | Lauge | щелокъ | ług. {KEM} — [AK] {en} lye, buck (*for bleaching*). — [RE].

letargi' [OA 1] lethargie | lethargy | Lethargie, Schlafsucht | летаргія | letarg. — [RE].

leter' - lettre, épître {de 1990: épitre} | letter | Brief | письмо | list. — **letero** - lettre, épître {de 1990: épitre} | letter | Brief | письмо | list [FE 9]. — [UL]. — La patro ne legas libron, sed li skribas leteron [FE 9.11]. Ne skribu al mi tiajn longajn leterojn [FE 18.4]. Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron [FE 34.14]. Via parolo estas tute nekomprenebla kaj viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble [FE 41.4]. Mi disŝiris la leteron kaj disĵetis ĝiajn pecetojn en ĉiujn angulojn de la ĉambro [FE 42.3]. El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; la dua: al Lia Grafa Moŝto, Sinjoro P.; la tria: al Lia Moŝto, Sinjoro D. [FE 42.8]

leŭkemi/o. [OA 9] Speco de sangokancero, karakterizata de tro rapida produktado de blankaj sangoĉeloj, kiuj ofte estas nematuraj aŭ misformitaj. {MED} — [GD 1955] leucémie (méd.). — **Rim.**: Kp. [Verax 1910] leŭkocit-o. [EV 1923] leŭkocit-o (anat.), weißes Blutkörperchen, Leukozyt; a. blanka sangoglobeto.

leŭtenant' - lieutenant | lieutenant | Lieutenant | поручикъ | porucznik, lejtnant. {MIL} — [AK] поручик, лейтенант. — [RE].

lev' - lever | lift, raise | aufheben | поднимать | podnosić. — **levi** - lever | lift, raise | aufheben | поднимать | podnosić [FE 22]. — [AK 1914] lever, ramasser | heben. — [UL]. — La falinta homo ne povis sin levi [FE 22.6]. Sur kruta ŝtuparo li levis sin al la tegmento de la domo [FE 34.13]. — [Beau] **lev**, lever (faire mouvoir de bas en haut), dresser (ce qui est couché, penché, etc.).

● **lev'il'** - levier | leaver, lever | Hebel | рычагъ | dźwignia. — Le-ví-lo [FE 3].

levkoj' - giroflée | stock-gillyflower | Levkoje | левкой | lewkonja. {BOT} — [AK] wall-flower, gilly flower. — [RE].

li - il, lui | he | er | онъ | on. — **li** - il, lui | he | er | онъ | on [FE 9]. — [FG] — [UL]. — En la salono estis neniu krom li kaj lia fianĉino [FE 26.13].

● **li'a** - son, sa | his | sein | ero | jego. — Li estas mia onklo, ĉar mia patro estas lia frato [FE 18.9]. Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn; mi ankaŭ tre amas iliajn (infanojn) [FE 18.10]. En la salono estis neniu krom li kaj lia fianĉino [FE 26.13]. Mi renkontis nek lin, nek lian fraton (aŭ mi ne renkontis lin, nek lian fraton) [FE 28.11]. Mi ridas je lia naiveco (aŭ mi ridas pro lia naiveco, aŭ: mi ridas lian naivecon) [FE 29.4]. ... pardoni al la malamiko lian kulpon [FE 29.11]. Lia kolero longe daŭris [FE 31.1]. Lia filo mortis kaj estas nun malviva [FE 31.5]. Li parolas, kaj lia parolo fluas dolĉe kaj agrable [FE 31.8]. La ekstero de tiu ĉi homo estas pli bona, ol lia interno [FE 31.13]. Liaj lipharoj estas pli grizaj, ol liaj vangharoj [FE 31.25]. Lia duonpatrino estas mia bofratino [FE 33.20]. La riĉeco de tiu ĉi homo estas granda, sed lia malsaĝeco estas ankoraŭ pli granda [FE 35.15]. Lia heroeco tre plaĉis al mi [FE 35.17]. La patro de mia edzino estas mia bopatro, mi estas lia bofilo, kaj mia patro estas la bopatro de mia edzino [FE 36.6]. Sur lia vizaĝo mi vidis ĝojan rideton [FE 38.7]. Li fianĉiĝis kun fraŭlino Berto ... kaj la edziĝa festo estos en la domo de liaj estontaj bogepatroj [FE 39.3]. Lia hieraŭa parolo estis tre bela, sed la tro multa parolado lacigas lin [FE 40.6]. Lia edzino estas tre laborema kaj ŝparema, ... [FE 41.12]. Li estas tre purema, kaj eĉ unu polveron vi ne trovos sur lia vesto [FE 41.17]. El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; la dua: al Lia Grafa Moŝto, Sinjoro P.; la tria: al Lia Moŝto, Sinjoro D. [FE 42.8]. Mi volonte plenumis lian deziron [FE 42.11].

lian' - liane, lième | liana | Liane | ліяна | ljana. {BOT} — [AK] {en} liana (*bot.*)| лиана. — [RE].

Libano [OA 8] {GEO} — **Rim.**: **1.** Tiel en la 1-a memstara eld. 1908 de la Psalmaro (antaŭe jam publikigita en La Revuo vol. 1, 1906-1907) laŭ la rusa Ливан, pola kaj franca „Liban" kaj germana „Libanon". En la Londona Biblio 1926 tamen ŝanĝita al *Lebanon'* laŭ la angla „Lebanon": *5. La voĉo de la Eternulo rompas cedrojn, La Eternulo rompas la cedrojn de Lebanon. 6. Li saltigas ilin kiel bovidon, Lebanonon kaj Sirjonon {t.e. la Monto Ĥermono} kiel bubalidon* [Ps. 29.5-6]. Celita estas la montaro, ne la samnoma ŝtato (kp. „Lebanono kaj Sirjono"). Dum multaj lingvoj distingas inter lando kaj montaro nur per aldono de „monto" aŭ „montaro" (Mont-Liban | Mount Lebanon | Libanongebirge | Ливанский хребет | Liban (góry) en Esperanto oni tial nun devas distingi per du vortoj „Libano" (lando) kaj „Lebanono" (monto-ĉeno). **2.** Plia trafo en La Rabistoj 1908, 17 (1-a akto, 2-a sceno), aperigite antaŭe en la Revuo vol. I (1906-1907) p. 390. Ankaŭ tie la montaro estas celita: „Poste tuj la Turkojn for el Azio, dum la fero estas ankoraŭ varmega, - haki cedron sur la Libano, konstrui ŝipojn ... (*Jetzt frisch mit den Türken aus Asien, weil's Eisen noch warm ist, und Cedern gehauen aus dem Libanon, und Schiffe gebaut ...*). **3.** [Rhodes 1908, 521]: **Lebanon**, Libano (en la librofina ĉapitro „Geographical Names").

libel' - demoiselle (ins.) | dragon fly | Libelle | стрекоза | konik polny. {ZOO} — [AK] libellule. — [RE].

liber' - libre | free | frei | свободный | wolny. — [UL].

liberal-a [OA 2.1]. — [EG 2].

Liberio [OA 8] {GEO} — [GD].

Libio [OA 8] {GEO} — [FK]: *Lib'uj'o*.

libr' - livre | book | Buch | книга | księga; książka. — **libro** - livre | book | Buch | книга | księga, książka [FE 6]. — [UL]. — Kie estas la libro kaj la krajono? — La libro estas sur la tablo, kaj la krajono kuŝas sur la fenestro [FE 6]. De la patro mi ricevis libron, kaj de la frato mi ricevis plumon. Mi legas libron. — La patro ne legas libron, sed li skribas leteron [FE 9]. Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legos en ĉiu tago

po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj [FE 14]. Lernolibron oni devas ne tralegi, sed tralerni [FE 31]. Verkisto verkas librojn, kaj skribisto simple transskribas paperojn [FE 37]. Li venigis al si el Berlino multajn librojn [FE 39].

● **libr'o'ten'ant'o** - teneur de livres | bookkeeper | Buchhalter | бухгалтеръ | buchalter. — [AK] {en} book-keeper.

● **kovr'il' (de libr'o)** - enveloppe | envelop | Umschlag, Hülle | обертка | okładka. [UV kovr'] — [AK 1914] **kovr|il| (de libro)** - a cover | Umschlag, Hülle, Decke, Deckel | обложка, обёртка. — **Rim**.: En angla kaj germana AK nur „kovr|il|", sen „(de libro)".

lice' [OA 1] lycee | high-school | Lyzeum | лицей | liceum. — [EG 2].

licenc/o. [OA 8] 1. Permeso, donita de registaro aŭ grava organizaĵo al unu el ties anoj, plenumi difinitan socian agadon (presi, instrui, prediki, vendi tian aŭ tian varon, konduki aŭton ...). 2. Escepta malobeo al gramatika aŭ poezia regulo. — A. license, permit; F. licence, permis; G. Erlaubnis, Erlaubnisschein, Lizenz; H. {es} licencia, permiso; I. {it} licenza, permesso, patente; P. {pt} licença. — [Verax 1910] **Licenco** *(Kom.) {fr}* licence*, permeso donita al fabrikisto fabriki patentitan objekton, kontraŭ interkonsentita procenta pago.* [PVS].

lien' - rate | spleen | Milz | селезенка | śledziona. {ANAT} — [RE].

lift-o [OA 2.2] ascenseur | lift | Lift — [EG 2] Fahrstuhl, Aufzug {2012 ankaŭ: Lift}.

lig' - lier | bind, tie | binden | связывать | wiązać. — **ligi** - lier | bind, tie | binden | связывать | wiązać [FE 27]. — [AK] wiązać, łączyć. — [UL].

● **kunligado** — Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; ... [FE 27.5].

lign' - bois | wood (the substance) | Holz | дрова | drzewo, drwa. — **ligno** - bois | wood (the substance) | Holz | дерево, дрова | drzewo, drwa [FE 31]. — [UL]. — Ligno estas bona brula materialo [FE 31.16]. La lignisto vendas lignon, kaj la lignaĵisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn [FE 37.14].

● **ligna** — La lignisto vendas lignon, kaj la lignaĵisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn [FE 37.14].

● **lignaĵisto** — La lignisto vendas lignon, kaj la lignaĵisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn [FE 37.14].

● **lignisto** — La lignisto vendas lignon, kaj la lignaĵisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn [FE 37.14].

liken' - dartre, lichen | tetter | Flechte | лишай | liszaj. {MED} {BOT} — [AK] dartre (*méd*.), lichen (*bot*.) | lichen (*bot*.). — [RE].

likv/o. [OA 8] Substanco, kiu diference de solidoj kaj gasoj alprenas la formon de la ĝin entenanta ujo, sed praktike konservas la saman volumenon ĉe kunpremado: *la tri statoj de la materio estas gaseco, likveco kaj solideco*. — A. a liquid, F. un liquide, G. Flüssigkeit, H. {es} un líquido, I. {it} un liquido, P. {pt} líquido. – [PV] ~a.

likvid' - liquider | liquidate | abrechnen, liquidiren | ликвидировать | likwidować. — [RE].

likvor' - liqueur | liquor | Liqueur {2012: Likör} | ликеръ | likier. {KUIR} — [AK] liqueur (*a cordial*). — [RE]. — Li-kvó-ro [FE 2].

lili' - lis | lily | Lilie | лилія | lilja. {BOT} — [RE].

lim' - limite, borne | limit | Grenze | граница | granica. — [AK] limite, confins, frontière. — [RE].

● **lim'ig'** - restreindre | limit | beschränken | ограничивать | ograniczać. — [AK] {en} limit (*vb*.).

limak' - limaçon, escargot | snail | Schnecke | улитка | ślimak. {ZOO} — [RE].

limf/o. [OA 9] Senkolora aŭ flaveta likvo, kiu cirkulas en la korpo, portas nutraĵojn, oksigenon kaj blankajn sangoĉelojn al la ĉeloj, kaj forportas forigendajn materialojn. — [EG 2] Lymphe.

limonad' - limonade | lemonade | Limonade | лимонадъ | lemoniada. {KUIR} — [RE].

lin' - lin | flax | Flachs | ленъ | len. — [RE].

lingv' - langue, langage | language | Sprache | языкъ (рѣчь) | język (mowa). — **lingvo** - langue, langage | language | Sprache | языкъ, рѣчь | język, mowa [FE 22]. — **lingvo** - langue | language | Sprache | языкъ | język [UV, enk. 1]. — [UL]. — FUNDAMENTA GRAMATIKO DE LA LINGVO ESPERANTO EN KVIN LINGVOJ [FG titolo]. — Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi ... [A 1.1]. ... la ekzistado de klare difinita,

neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo [A 1.1]. Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj ... [A 1.2]. ... tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj [A 1.2]. ... komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto [A 4.5]. ... kio en nia lingvo estas oficiala kaj netuŝebla ... [A 5.4]. Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla ... [A 6.1]. Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos... [A 6.2]. ... nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante pliboniĝadi kaj perfektiĝadi [A 6.3]. Riĉigadi la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun ... [A 7.1]. ... per konsiliĝado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo ... [A 7.1]. ... nia lingvo ... [A 8.1]. ... natura lingvo ... [A 8.2]. ... nia lingvo ... [A 9.1, du pliaj trafoj]. ... koni la fundamenton de nia lingvo [A 11.1, A 11.2]. — EKZERCARO de la lingvo internacia « Esperanto » [FE titolo]. — Língvo [FE 2] — En la lingvo „Esperanto“ ni vidas la estontan lingvon de la tuta mondo [FE 22.10]. Ĝia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj [FE 27.2]. ... ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra ... [FE 27.3]. Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron [FE 34.14]. — UNIVERSALA VORTARO DE LA LINGVO INTERNACIA ESPERANTO [UV, titolo]. Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enk. 1].

lini' - ligne | line, file | Linie, Zeile, Reihe | линія, строка | wiersz. — [AK 1914] line | Linie, Zeile | wiersz, linia. — [RE].

link' - lynx, loup-cervier | lynx | Luchs | рысь (животное) | ryś. {ZOO} — [RE].

lip' - lèvre | lip | Lippe | губа | warga. {ANAT} — **lipo** - lèvre | lip | Lippe | губа | warga [FE 31]. — [UL].

● **lip'har'o'j** - moustache | mustache | Schnurrbart | усы | wąsy. — Lip-há-ro [FE 3]. Lipharo [FE 4]. — Liaj lipharoj estas pli grizaj, ol liaj vangharoj [FE 31.25].

lirik' [OA 1] lyrique (poesie) | lyric (poetry) | lyrische Poesie | лирика | liryka. — [EG 2].

list' [OA 1] * liste | list | Liste | списокъ | lista. — [UL].

lit' - lit | bed | Bett | кровать | łóżko. — **lito** - lit | bed | Bett | кровать | łóżko [FE 26]. — [AK] {en} bed (*couch*). — [UL]. — El sub la kanapo la muso kuris sub la liton, kaj nun ĝi kuras sub la lito [FE 26.9].

litani' - litanies | litany | Litanei | литанія | litanja. — [AK] молебен. — [RE].

liter' - lettre (de l'alphabet) | letter | Buchstabe | буква | litera. — **litero** - lettre (de l'alphabet) | letter (of the alphabet) | Buchstabe | буква | litera [FE 30]. — [AK] {en} letter (*of alphabet*). — [UL]. — Nomoj de la literoj [FE 1]. Se ni aldonas al ili la literon „k", ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu [FE 30.3]. Se ni aldonas la literon „t", ni ricevas vortojn montrajn: tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu [FE 30.4]. Aldonante la literon „ĉ", ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu [FE 30.5].

literatur' – [A, mankas en UV]. ... la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektiĝado fariĝados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga rompado kaj ŝanĝado, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera [A 6.4]. ... sed tiuj ĉi vortoj devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj; oni devas ilin uzadi nur en la literaturo [A 7.1]. — **literatur'** [OA 1] * littérature | literature | Literatur | литература | literatura. — [DL-Ald]. [Beau]. — **literatur'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7].

litograf' [OA 1] (*) lithographier | to lithograph | lithographieren | литографировать | litografować. — [RE]. [EG 2] lithographieren. — [OA 8] II.B.5. Estas oficialigitaj jenaj vortoj: aristokratio, demokratio, fotografio, litografio kiel paruloj al la Fundamenta fotografi kaj al la Oficialaj: aristokrato, demokrato kaj litografi.

litografi/o. [OA 8] Tekniko kaj arto de litografisto. — A. lithography, F. lithographie (art), G. Lithographie, H. {es} litografia {legu: litografía}, I. {it} litografia, P. {pt} litografia. — [RE]. — [OA 8] II.B.5. Estas oficialigitaj jenaj vortoj: aristokratio, demokratio, fotografio, litografio kiel paruloj

al la Fundamenta fotografi kaj al la Oficialaj: aristokrato, demokrato kaj litografi.

litr-o [OA 2.1] {MEZ} — [Beau] litre. [EG 2] Liter.

liturgi' [OA 1] * liturgie | liturgy | Liturgie | литургія {de 1918: литургия} | liturgja. {RELI} — [Beau] liturgie.

liut' - luth | lute | Laute | лютня | lutnia {MUZ}. — [RE].

liver' - livrer, fournir | deliver, furnish | liefern | доставлять | dostawiać. — [AK] dostawiać, dostarczać. — [RE].

livre' - livrée | livery | Livrée | ливрея | liberya. {VEST} — [RE].

lo [OA 7] = nomo de la litero l, deksesa litero de la Esperanta alfabeto

Lob-o, [OA 4] {fr} lobe (anat., bot.) | {en} lobe | {de} Lappen | {it} lobo | {es} lóbulo | {pt} lóbulo {ankaŭ: lobo, en kiu la unua "o" estas vaste prononcata} | {ca} llobí. {ANAT}{BOT} — [Verax]. [PV 1930].

lod' - demi-once | half an ounce | Loth {de 1901: Lot} | лотъ | łut {MEZ}. — [RE].

log' - attirer, allécher | entice | locken, anlocken | манить | manić, tumanić. — [AK] wabić. — [RE].

● **de'log'** - séduire | seduce | verführen | обольщать | zwodzić; uwieźć.

loĝ' - habiter, loger | lodge | wohnen | жить, квартировать | mieszkać. — **loĝi** - habiter, loger | lodge | wohnen | жить, квартировать | mieszkać [FE 14]. — [AK] {en} dwell, lodge, live. — [UL]. — La pastro, kiu mortis antaŭ nelonge (aŭ antaŭ nelonga tempo), loĝis longe en nia urbo [FE 25.12]. Li loĝas ekster la urbo [FE 31.12]. Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj [FE 37.9]. La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo [FE 40.19].

● **loĝanto** — Tiu ĉi urbo havas milionon da loĝantoj [FE 14.3]. Ĉiuj loĝantoj de regno estas regnanoj [FE 37.2]. La loĝantoj de unu regno estas samregnanoj, la loĝantoj de unu urbo estas samurbanoj, la konfesantoj de unu religio estas samreligianoj [FE 37.11].

● **loĝejo** — Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, kiu estis en la loĝejo [FE 19.4].

logaritm-o [OA 2.1] — [RE].

loĝi' - loge | cabin, lodge | Loge | ложа | loża. — [AK] {en} lodge, box (*theatre*). — [RE].

logik' [OA 1] * logique | logic | Logik | логика | logika. — [DL 1888] *... ili parolas logike kaj afertuŝante [DL I.3.b].* [DL-Ald] *... la solaj kompetentaj nun devas esti talento, logiko, kaj la leĝoj kreitaj de la plej granda parto de la verkantoj kaj parolantoj.* {Plia trafo en DL-Ald}. [Beau] logique (subs.).

logogrif-o [OA 2.1] — [RE]. [Beau] logogriphe. [EG 2] Logogriph, Buchstabenrätsel.

lojal' [OA 1] loyal | loyal | loyal, bieder | лояльный | lojalny. — [EG 2] loyal, bieder.

lojt' - lotte | eel-pout, lote | Aalraupe | налимъ | mięlus. {ZOO} — [RE].

lok' - place, lieu | place | Ort | мѣсто | miejsce. — **loko** - place, lieu | place | Ort | мѣсто | miejsce [FE 13]. — [UL]. — ... tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko kaj alporti domen plenan grandan kruĉon [FE 13.3]. Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune [FE 15.3]. tie (= en tiu loko), tien (= al tiu loko) [FE 28.3]. ... tiel same ni ankaŭ diras: "la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon", kaj la vortoj „ĝardenon", „tablon" staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en" kaj „sur" tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri, ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo (ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado); ... [FE 28.3]. Mi saltadis la tutan tagon de loko al loko [FE 40.5].

lokomobil' [OA 1] locomobile | portable engine | Lokomobile {2012: Lokomobil} | локомобиль | lokomobila. — [Beau] locomobile (subs.). [EG 2] Lokomobile.

lokomotiv' - locomotive | locomotive | Lokomotive | локомотивъ | lokomotywa. {TEK} — [RE].

lol' - ivraie | lure, cockleweed | Lolch | плевелъ | kąkol. {BOT} — [AK] {en} tare (*plant*). — [RE].

London'o – London [FG 13 angla, mankas en UV]. — London'o'n – to London. — **London'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (urbnomo) — [UL angla].

long' - long | long | lang | долгій, длинный | długi. — **longa** - long | long |

lang | долгій, длинный | długi [FE 17]. — [UL]. — Lón-ga [FE 2]. — Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto ... [A 2.1]. — Ne skribu al mi tiajn longajn leterojn [FE 18.4]. Ni estu gajaj, ni uzu bone la vivon, ĉar la vivo ne estas longa [FE 20.21].

● **longe** ... la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, kiuj laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de longe fariĝis fundamento por Esperanto [A 3.3]. — “Pardonu al mi, patrino,” diris la malfeliĉa knabino, “ke mi restis tiel longe” [FE 17.2]. Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita [FE 25.6]. Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi [FE 25.9]. La pastro, kiu mortis antaŭ nelonge (aŭ antaŭ nelonga tempo), loĝis longe en nia urbo [FE 25.12]. Lia kolero longe daŭris [FE 31.1]. La fenestro longe estis nefermita; mi ĝin fermis, sed mia frato tuj ĝin denove malfermis [FE 33.9]. La pafado daŭris tre longe [FE 40.2]. ... li ne portas longe la koleron kaj li tute ne estas venĝema [FE 41.13].

● **longo** — Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo [FE 32.8].

● **laŭ’long’** - le long | along | entlang, der Länge nach | вдоль | wdłuź [UV].

● **mallonga** - Rekta vojo estas pli mallonga, ol kurba [FE 33.10].

● **nelonga** - La pastro, kiu mortis antaŭ nelonge (aŭ antaŭ nelonga tempo), loĝis longe en nia urbo [FE 25.12].

● **nelonge** - La pastro, kiu mortis antaŭ nelonge (aŭ antaŭ nelonga tempo), loĝis longe en nia urbo [FE 25.12].

longitud/o. [OA 8] La angula distanco, mezurata laŭ la ekvatoro, inter la meridiano de loko kaj la origina meridiano, nome la Grenviĉa meridiano por la teraj ~oj, kaj la meridiano de la printempa ekvinoksa punkto por la ĉielaj ~oj. — A. longitude, F. longitude, G. geographische Länge, H. {es} longitud, I. {it} longitudine, P. {pt} longitude. {GEO} — [Verax].

lonicer’ - chèvrefeuille | honey-suckle | Geissblatt {legu: Geißblatt} | жимолость | wiciokrzew. {BOT} — [RE].

Lord-o, [OA 4] {fr} lord | {en} Lord (British) | {de} Lord | {it} *lord* | {es} *lord* | {pt} *lord* {en 2012 legu: lorde, sen kursivo} | {ca} *lord*. — [Bat 1891].

lorn’ - lorgnette | perspective-glass | Fernglas | лорнетъ | lorneta. — [AK] lorgnette, longue-vue | зрительная труба. — [RE].

lot’ - tirer au sort | cast lots | loosen {2012: losen} | бросать жребій | losować. — [RE].

● **lot’um’** - lotir | allot | verloosen {2012: verlosen} | разыгривать | rozegrać.

loteri’ [OA 1] * loterie | lottery | Lotterie | лотерея | loterja. — [RE].

lotus/o. [OA 8] Nomo de pluraj vegetaloj, nome: 1/ la *greka* ~o, legumenaco uzata kiel furaĝo; 2/ la *nordafrika* ~o, arbo el kies nigra kaj malmola ligno oni fabrikis flutojn kaj kies fruktojn manĝis la Lotofagoj, specio el zizifoj (*Zizyphus lotus*); 3/ la *egipta* ~o, nimfeo ankaŭ nomata Nila lilio (*Nymphæa lotus*, *N.caerulea*); 4/ la *hinda* ~o, nimfeaco, sankta signo de la budhismo (*Nelumbium speciosum*). — A. lotus, F. lotus, G. Lotos, Lotosblume, H. {es} loto, I. {it} loto, P. {pt} loto, lotus {legu: lótus}, lódão. {BOT} — [Fab IV].

lozanĝ-o [OA 2.2] losange | lozenge (*heraldry*) | Raute — [EG 2] Raute (*in der Heraldik*).

lu’ - louer (location) | rent | miethen {de 1901: mieten} | брать въ наемъ | wynajmować. — [AK] louer, prendre en location | hire, take on rent | wynajmować (co od kogo). — [RE]. — Lú-i [FE 3].

● **lue** — Lú-e [FE 3].

— **Lingva Respondo 1907**: „Lui“ signifas nur *preni* lue; (doni lue = luigi). [LR 37, let. al Th. Cart (1907-02-24), O.V. p. 539].

lubrik/i. [OA 8] Meti substancon speciale glitigeman inter du frotiĝantajn surfacojn, por faciligi la glitadon. — A. to lubricate; F. lubrifier; G. schmieren, einölen; H. {es} lubricar, lubrificar; I. {it} lubrificare; P. {pt} lubrificar. — [PV 1930] {ne ĉe Z.}.

lucern-o [OA 2.2] lampe (*d’église*) | lamp (*in church*) | Ampel. — [EG 2] Ampel.

lud’ - jouer | play | spielen | играть | bawić się, grać. — [UL]. — [DL] *Mi lernas pentri kaj ludi gitaron* [DL 5.18]. *Ĉu vi ludas violonon?* [DL 16.18]. *Ne, mi ludas kartojn, sed por instrumentoj mi ĉian {de 1888: ĉiam} estis tro maldiligenta* [DL 16.19].

● **ludo** — Lú-do [FE 2]. — [Beau] **ludo**, jeu (1° Action de se livrer à un amusement.

Ex. : *La infanoj ŝatas la ludon*, les enfants aiment le jeu. — 2° Amusement soumis à des règles oŭ l'un perd, tandis que l'autre gagne. Ex. : *Li elspezas sian tutan monon en la ludo*, il dépense tout son argent au jeu. — 3° Ce qui sert, à ces amusements. Ex. : *Ludo de kegloj*, jeu do quilles. — 4° Façon dont on joue, Ex. : *Via ludo estas tre lerta*, votre jeu est très habile. — 5° Maniement des instruments de musique. Ex. : *La ludo de l'fortepiano, de l'violono, de l'gitaro*, etc., le jeu du piano, du violon, de la guitare, etc. — 6° Manière dont un acteur joue un rôle. Ex. : *Lia ludo estas tre nobla*, son jeu est très noble. Le verbe *ludi* a naturellement les acceptions correspondantes).

Ludoviko — Ludoviko, donu al mi panon [FE 8, mankas en UV]. — **Ludovik'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

luk/o. [OA 8] Aperturo, pli-malpli trairebla de homo, destinata al enlaso de lumo aŭ aero aŭ al simpla trairo, diversmaniere fermebla, kaj trovebla interalie:

1/ en domo: a) ĉe la tegmento: *tegmento~o, mansardo~o*; b) ĉe la plafono aŭ planko: *klapo~o*; c) en la kelo: *kelo~o* (Kp.: *ventotruo*);

2/ en ŝipo: a) sur la ferdeko: *ferdeko~o* (Kp. *ferdekpordo*); b) ĉe la ŝeloparieto: *ŝipo~o* (tre ofte ronda);

3/ sur ŝoseo aŭ trotuaro: *kloak~o* k.s. (Kp. *rigardilo, aperturo*). — [PV]. —

A. 1/a) dormer-window, b) trap-door, c) air-hole, ventilator; 2/a) hatchway, b) port-hole; 3/ man-hole;

F. 1/a) lucarne, b) trappe, c) soupirail; 2/a) écoutille, b) hublot; 3/ ouverture d' accès, trou d'homme;

G. 1/a) Dachluke, b) Falltür, Klapptür, c) Kellerloch; 2/a) Deckluke, b) Bullauge; 3/ Einsteigöffnung, Mannloch;

H. {es} 1/a) lumbrera, b) trampa, c) toma de luz; 2/a) escotilla, b) portilla, tragaluz; 3/ orificio de acceso, boca de entrada;

I. {it} 1/a) abbaino, finestrella (sul tetto), b) trappola, c) pozzo di luce; 2/a) boccaporto, b) obló, sportello; 3/ bocca d'accesso;

P. {pt} 1/a) trapeira, b) olho-de-boi {de 2009: olho de boi}, c) lumieiro, claraboia; 2/a) escotilha, b) vigia; 3/ boca de bueiro.

luks' - luxe | luxe | Luxus | роскошь | komfort, przepych. — [AK] {en} luxury | przepych. — [RE].

lukt-i [OA 2.2] lutter | to wrestle | ringen — [EG 2] (gymnast.) ringen.

lul' - bercer | lull asleep, rock | wiegen | качать, баюкать | kołysać. — [RE].

● **lul'il'** - berceau | cradle | Wiege | колыбель | kołyska.

lum' - luire, lumière | light | leuchten | свѣтить | świecić. — **lumi** - luire | light | leuchten | свѣтить | świecić [FE 33]. — [AK] {en} shine, give light. — [UL].

● **mal'lum'a** - sombre, obscur | dark | dunkel | темный | ciemny. — La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo [FE 33.4]. Du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo [FE 40.11].

● **lum'tur'** - phare | light-house | Leuchtthurm {de 1901: Leuchtturm} | маякъ | latarnia morska.

lumb' - lombes | loins, haunch | Lende | поясница | lędźwie. {ANAT} — [RE].

Lumbrik-o, [OA 4] {fr} lombric, ver de terre | {en} earthworm | {de} Regenwurm | {it} lombrico | {es} lombriz | {pt} lombriga {erara traduko. La portugala "lombriga" estas la esperanta "askarido". La ĝusta traduko de "lumbriko" estas "minhoca"} | {ca} cuc de terra.

lun' - lune | moon | Mond | луна | księżyć. — **luno** - lune | moon | Mond | луна | księżyć [FE 10]. {ASTR} — [UL]. — En la tago ni vidas la helan sunon, kaj en la nokto ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn [FE 10.13].

lunatik' - lunatique | lunatic | Mondsüchtiger | лунатикъ | lunatyk. {MED} — [AK 1914] mondsüchtig. — [RE].

lund' - lundi | Monday | Montag | понедѣльникъ | poniedziałek. — **lundo** - lundi | Monday | Montag | понедѣльникъ | poniedziałek [FE 20]. — [UL]. — Hieraŭ estis vendredo, kaj postmorgaŭ estos lundo [FE 20.5].

lup' - loup | wolf | Wolf | волкъ | wilk. {ZOO} — [RE].

lupol' - houblon | hops | Hopfen | хмѣль | chmiel. {BOT} — [RE].

lustr' - lustre | lustre, chandelier | Kronleuchter | люстра | pająk, świecznik. — [AK] {fr} lustre, suspension. — [RE].

lut' - souder | solder | kitten, löten | паять | lutować. {TEK} — [RE].

Lutero — [FE 37, mankas en UV]. — **Luter'** [OA 7] (vira nomo). {Mallerta difino; la germana familia nomo Luther estas nek vira, nek virina, sed neŭtra pri la sekso.}

● **Luterano** - Luteranoj kaj Kalvinanoj estas kristanoj [FE 37].

lutr' - loutre | common otter | Fischotter | выдра | wydra. {ZOO} — [RE].

M

Mm - m | m as in "make" | m | м | m [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **mo** ... [FE 1]. — **mo** [OA 7] = nomo de la litero **m**, deksepa litero de la Esperanta alfabeto. — Lingva Respondo 56 (1893) [Pri la nomoj de la literoj]: La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

mac' - azyme | unleavened bread | ungesäuertes Brot {2012 ankaŭ: Matze} | опрѣснокъ | praśny chleb. {KUIR} — [AK] przaśny chleb, maca. — [RE].

maĉ' - mâcher | chew | kauen | жевать | żuć.

madon' [OA 1] madone | Madonna | Madonna | Мадонна | Madonna. — [EG 2].

magazen' - magasin | store | Kaufladen {en 2012 pli kutima: Geschäft} | лавка, магазинъ | sklep, magazyn. — **magazeno** - magazin {legu: magasin, kiel ĝuste en FE eld. 1-3} | store | Kaufladen {en 2012 pli kutima: Geschäft} | лавка, магазинъ | sklep, magazyn [FE 40]. — [AK] {en} shop, store, warehouse. — [UL]. — Magazeno, en kiu oni vendas cigarojn, aŭ ĉambro, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarejo; ... [FE 40.15]. — **Rim.**: Kp. *Kun tiu papero mi ekiris per grandaj paŝoj al la komercisto; sed antaŭ la magazeno mi renkontis kaleŝon, en kiu sidis riĉe vestita sinjoro.* [DL 6.5].

magi' - magie | magic, black art | Magie | магія | magie. — [RE].

magnet' - aimant | magnet | Magnet | магнитъ | magnes. {GEOL} — [RE].

magnetism' [OA 1] magnetisme | magnetism | Magnetismus | магнетизмъ | magnetyzm. — [RE]. — **Rim.**: Povas esti interpretita kiel magnet-ism- post la oficialigo de –ism' en 1919.

magnetofon/o. [OA 9] Sonbendaparato. Aparato por magnete registri sonojn sur bendon, kaj reaŭdigi ilin. — [GD 1955] magnétophone.

mahagon' [OA 1] acajou | mahogany | Mahagoni | красное дерево | mahoń. — [EG 2].

maiz' - mais | maize | Mais | маисъ | kukurydza. {BOT} — [AK] маис, кукуруза. — [RE].

Maj' - Mai | May | Mai | Май | Maj. — [DL]. [RE]. — Má-jo [FE 2]. Majo [FE 4].

majest' - majestueux | majesty | erhaben | величественный | majestatyczny, wzniosły. — [AK] {en} majestic, dignified. — [1888]. [RE]. — Ma-jés-ta [FE 2]. Majesta [FE 4].

majolik-o [OA 2.1] — [EG 2] Majolika.

majonez/o. [OA 9] Densa malvarma saŭco el ovoflavo emulsie miksita kun oleo kaj ofte kun diversaj spicoj. {KUIR} — [GD 1955] mayonnaise (cuis.).

major-o (*batalionestro*) [OA 2.1] {MIL} — [RE]. [EG 2] Major.

majstr' - maître (dans sa partie) {de 1990: maitre} | foreman | Meister | мастеръ | majster. — [AK] master (of his art). — [RE].

● **sub'majstr'** - garçon de métier | journey-man | Handwerksgesell | подмастерье | podmajstrzy, czeladnik. — [AK] journeyman, foreman.

majuskl/o. [OA 9] Ĉeflitero, grandlitero. Tia litervarianto (en kelkaj alfabetaj skribosistemoj), kiu estas uzata precipe kiel komenclitero de frazoj kaj de propraj nomoj, ekz. A, B, C, Ĉ. (La malo estas minusklo.) — [GD 1955] une majuscule (= ĉef/litero).

● **majuskl/et/o**. [OA 9] Litero (en alfabeto posedanta majusklojn kaj minusklojn) majuskloforma sed malpli alta ol normala majusklo de la sama serio (proksimume samalta kiel la plej malaltaj minuskloj).

● **majuskl/a** [OA 9] **1** Skribita per majusklo(j); rilata al majusklo(j). **2** (en paleografio kaj tipografio, pri signaro) Tia, ke ĉiu signo (escepte de eventualaj kromsignoj) estas skribebla inter du paralelaj horizontaloj: *majuskla signaro*;

majusklaj ciferoj; *kodekso en la majuskla skribo de la kvina jarcento*.

makadam-o [OA 2.1] — [EG 2] Makadampflaster, Kieselschlag.

makaron' [OA 1] * macaron | macaroon | Makrone | макаронъ | makaronik. — [EG 2] Makrone.

makler' - faire le courtier | play the broker | Mäkler sein | посредничать | pośredniczyć. — [AK] faire le courtage | act as broker, deal. — [RE].

Maksim' [OA 3.1] {en} maxim | {fr} maxime | {de} Maxime, Grundsatz | {es} maximo | {pt} maxima {legu: máxima} | {it} massima | {pl} maksyma. — [EG 2].

Maksimum' [OA 3.2] {en} maximum | {fr} maximum | {de} Maximum, Höchstwert | {es} maximum | {pt} maximum {estu: máximo} | {it} maximum, massimo | {pl} --- {traduko mankas}. — [Beau].

makul' - tache | stain | Fleck | пятно | plama. — [UL]. — Ma-kú-lo [FE 2].

makzel' - mâchoire | jaw-bone, cheek-bone | Kinnlade | челюсть | szczęka. {ANAT} — [RE].

mal' - marque les contraires: ex. bon' bon - mal'bon' mauvais; estim' estimer - mal'estim' mépriser | denotes opposites; e. g. alt' high - mal'alt' low | bezeichnet einen geraden Gegensatz; z. B. bon' gut - mal'bon' schlecht; estim' schätzen - mal'estim' verachten | прямо противоположно; напр. bon' хорошій - mal'bon' дурной; estim' уважать - mal'estim' презирать | oznacza przeciwieństwo; np. bon' dobry - mal'bon' zły; estim' poważać - mal'estim' gardzić. — **mal** - marque les contraires; ex. bona bon - malbona mauvais; estimi estimer - malestimi mépriser | denotes opposites; e.g. bona good - malbona evil; estimi esteem - malestimi despise | bezeichnet einen geraden Gegensatz; z.B. bona gut - malbona schlecht; estimi schätzen - malestimi verachten | прямо противоположно; напр. bona хорошій - malbona дурной; estimi уважать - malestimi презирать | oznacza preciwieństwo; np. bona dobry - malbona zły; estimi poważać - malestimi gardzić [FE 10]. — [AK] (приставка) означает прямую противоположность. — [UL].

● **mal'afabl'** - grogneur | surly | mürrisch | угрюмый | mrukliwy [UV afabl']. — [AK] opryskliwy.

● **malagrabla** — La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon; ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili [FE 11.2].

● **malakra** — La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon kaj mi devis uzi mian poŝan tranĉilon [FE 34.1].

● **mal'alt'** - low [UV mal'].

● **malamo** — Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna [FE 13.1].

● **malaminda** — Sed pri ŝia fratino ni povas diri, ke ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si; ... [FE 23.4].

● **malamiko** — ... ni povas diri „pardoni al la malamiko" kaj „pardoni la malamikon", sed ni devas diri ĉiam „pardoni al la malamiko lian kulpon" [FE 29.11]. Malamiko venis en nian landon [FE 33.13]. La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj [FE 39.14].

● **mal'aper'** - disparaître {de 1990: disparaitre} | dissappear | verschwinden | исчезать | znikać [UV aper'].

● **malbeni** — Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita [FE 33.7].

● **mal'bon'** - mauvais | {angla mankas} | schlecht | дурной | zły. — **malbona** - mauvais | evil | schlecht | дурной | zły [FE 10 mal']. — ... ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem [A 3.4]. — El ŝiaj multaj infanoj unuj estas bonaj kaj aliaj estas malbonaj [FE 12.5]. Malbonaj infanoj amas turmenti bestojn [FE 33.6]. En malbona vetero oni povas facile malvarmumi [FE 42.12].

● **malboneco** — ...(tio ĉi estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino, por vidi, kiel granda estos la malboneco de tiu ĉi knabino) [FE 19.5].

● **malbonigi** — Oni tiel malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron [FE 33.14].

● **mal'dekstr'** - gauche | left | link | лѣвый | lewy [UV dekstr'] {adjektivo}.

● **maldekstre** — Ni disiĝis kaj iris en diversajn flankojn: mi iris dekstren, kaj li iris maldekstren [FE 28.7].

● **maldika** — Haro estas tre maldika [FE 33.3].

● **mal'esper'** - désespérer | despair | verzweifeln | отчаяваться | rozpaczać [UV esper'].

● **mal'estim'** - mépriser | {angla mankas} | verachten | презирать | gardzić [UV mal']. — **malestimi** - mépriser | despise | verachten | презирать | gardzić [FE 10 mal']. — Ni forte malestimas tiun ĉi malnoblan homon [FE 33.9].

● **malfeliĉa** — Inter aliaj aferoj tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko kaj alporti domen plenan grandan kruĉon [FE 13.3]. "Pardonu al mi, patrino," diris la malfeliĉa knabino, "ke mi restis tiel longe" [FE 17.2]. La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi, kaj, dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj [FE 17.8]. La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej proksima arbaro [FE 21.6]. ... kaj la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro [FE 23.4]. Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita [FE 33.7].

● **malfeliĉo** — La erareco en la nacia traduko de tiu aŭ alia vorto ne prezentas grandan malfeliĉon, ĉar, komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto [A 4.5]. Rakontu al mi vian malfeliĉon, ĉar eble mi povos helpi al vi [FE 41.5]. Malfeliĉo ofte kunigas la homojn, kaj feliĉo ofte disigas ilin [FE 42.2].

● **mal'ferm'** - ouvrir | open | öffnen | отворять | otwierać [UV ferm']. — La fenestro longe estis nefermita; mi ĝin fermis, sed mia frato tuj ĝin denove malfermis [FE 33.9]. Kun bruo oni malfermis la pordegon, kaj la kaleŝo enveturis en la korton [FE 38.8].

● **malforta** — La acideco de tiu ĉi vinagro estas tre malforta [FE 35.8].

● **malfreŝa** — Tiu ĉi malfreŝa pano estas malmola, kiel ŝtono [FE 33.5].

● **malfrue** — Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto [FE 17.1].

● **malĝentila** — „Ĉu mi venis tien ĉi," diris al ŝi la malĝentila kaj fiera knabino, „por doni al vi trinki? ..." [FE 19.6].

● **malĝentile** — "Estus tre bele," respondis la filino malĝentile, "ke mi iru al la fonto!" [FE 19.1]

● **malĝentilulino** — „Jes, patrino", respondis al ŝi la malĝentilulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon [FE 21.2].

● **malgranda** — Neniu persono kaj neniu socieo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon! [A 1.4]. ... li neniam permesis al si (almenaŭ konscie) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj [A 2.2]. — Mia frato ne estas granda, sed li ne estas ankaŭ malgranda: li estas de meza kresko [FE 33.1]. — Li estas tre ekkolerema kaj ekscitiĝas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo; ... [FE 41.13].

● **mal'help'** - déranger, empêcher | hinder | stören, hindern | мѣшать, препятствовать | przeszkadzać [UV help']. — Oni tiel malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron [FE 33.14]. Forigu vian fraton, ĉar li malhelpas al ni [FE 39.6].

● **malhelpante** — Mi montris en principo, kiamaniere la severa netuŝebleco de la « Fundamento » gardos ĉiam la unuecon de nia lingvo, ne malhelpante tamen al la lingvo ne sole riĉiĝadi, sed eĉ konstante perfektiĝadi [A 9.1].

● **maljuna** — La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon; ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili [FE 11.2]. Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna [FE 13.1].

● **maljunulo** — Tiu ĉi maljunulo tute malsaĝiĝis kaj infaniĝis [FE 39.4].

● **malklaraĵo** — Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklaraĵon [FE 35.4].

● **mal/kod/i**. [OA 9] Ekstrakti informon el koditaĵo: *malkodi sendaĵon*.

● **malkompreniĝo** — Tial, por meti finon al ĉiuj malkompreniĝoj kaj disputoj, …, la

aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, … [A 3.3].

● **mal/konekt/i** [OA 9 konekt'] Ĉesigi, rompi konekton: *malkonekti aparaton*.

● **mal'kovr'** - découvrir | detect, discover | entdecken | открывать | odkrywać [UV kovr']. — [AK] {en} uncover, lay bare.

● **mallarĝa** — Li estas tiel dika, ke li ne povas trairi tra nia mallarĝa pordo [FE 33.2]. — Mallarĝa vojeto kondukas tra tiu ĉi kampo al nia domo [FE 38.6].

● **mallonga** — Rekta vojo estas pli mallonga, ol kurba [FE 33.10].

● **mal'lum'a** - sombre, obscur | dark | dunkel | темный | ciemny [UV lum']. — La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo [FE 33.4]. Du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo [FE 40.11].

● **malmulta** — La sufikso « um » ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun « um » oni devas lerni, kiel simplajn vortojn [FE 42.9].

● **mal'net'** - brouillon | foul copy | Brouillon | начерно | na brudno [UV net']. — [AK] {en} rough draft | Konzept, Entwurf, Kladde.

● **malnoblulo** — Li estas mensogisto kaj malnoblulo [FE 37.22].

● **mal'nov'** — alt | stary [UV aĵ']. — **malnova** - old | alt | stary [FE 25 aĵ']. — ... ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova [A 8.1]. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo [A 8.2].

● **mal'nov'aĵ'** - altes Zeug | starzyzna [UV aĵ']. — **malnovaĵo** - old things | altes Zeug | starzyzna [FE 25 aĵ'].

● **malofte** — Sed estas bone uzadi la vorton „je" kiel eble pli malofte [FE 29.2].

● **malplej** — Mál-plej [FE 2]. — El ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa [FE 10.20].

● **malpli** — Ne, vi eraras, sinjoro: via pano estas malpli freŝa, ol mia [FE 10.17].

● **malpermesi** — Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas [FE 29.10].

● **malproksima** — Inter aliaj aferoj tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko kaj alporti domen plenan grandan kruĉon [FE 13.3]. … ekzemple: tiu (pli malproksima), tiu ĉi (aŭ ĉi tiu) (pli proksima); tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime) [FE 30.8].

● **malproksime** — ... ekzemple: tiu (pli malproksima), tiu ĉi (aŭ ĉi tiu) (pli proksima); tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime) [FE 30.8].

● **malpuriĝi** — En la kota vetero mia vesto forte malpuriĝis; tial mi prenis broson kaj purigis la veston [FE 39.1].

● **mal'rekt'** - oblique | oblique, sloping | schief | косой | krzywy [UV rekt']. — [AK] indirect, détourné | crooked, not straight | nicht gerade; indirekt.

● **malrekte** — La tablo staras malrekte kaj kredeble baldaŭ renversiĝos [FE 33.11].

● **malriĉa** — En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki [FE 15.1]. … (ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino) [FE 15.6]. … kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile." [FE 17.11].

● **malsaĝeco** — La riĉeco de tiu ĉi homo estas granda, sed lia malsaĝeco estas ankoraŭ pli granda [FE 35.15].

● **malsaĝiĝi** — Tiu ĉi maljunulo tute malsaĝiĝis kaj infaniĝis [FE 39.4].

● **malsaĝulo** — Malsaĝulon ĉiu batas [FE 37.20].

● **mal/ŝalt/i**. [OA 9] Ĉesigi funkciadon de aparato per tiucela regilo (ŝaltilo).

● **malsana** — Li estas morte malsana, li ne vivos pli, ol unu tagon [FE 31.7]. Venigu la kuraciston, ĉar mi estas malsana [FE 39.9]. malsana [FE 42.13].

● **malsane** - malsane [FE 42.13].

● **malsani** – malsani [FE 42.13].

● **malsano** — Post infekta malsano oni ofte bruligas la vestojn de la malsanulo [FE 39.5]. malsano [FE 42.13].

● **malsaniga** - malsaniga [FE 42.13].

● **malsaniĝi** - malsaniĝi [FE 42.13].

● **malsaneta** - malsaneta [FE 42.13].

● **malsanema** - malsanema [FE 42.13].

● **malsanulejo** - malsanulejo [FE 42.13].

● **malsanulisto** - malsanulisto [FE 42.13].

● **malsanero** - malsanero [FE 42.13].

● **malsaneraro** - malsaneraro [FE 42.13].

● **malsanemulo** - malsanemulo [FE 42.13].
● **malsanaro** - malsanaro [FE 42.13].
● **malsanulido** - malsanulido [FE 42.13].
● **malsanado** - malsanado [FE 42.13].
● **malsaneco** - malsaneco [FE 42.13].
● **malsanemeco** - malsanemeco [FE 42.13].
● **malsanulino** - malsanulino [FE 42.13].
● **malsanulista** - malsanulista [FE 42.13].
● **malsanulo** — Post infekta malsano oni ofte bruligas la vestojn de la malsanulo [FE 39.5]. malsanulo [FE 42.13].
● **mal'ŝat'** - négliger | neglect | gering schätzen, vernachlässigen | пренебрегать | zapoznawać [UV ŝat']. — [AK] dédaigner, faire peu de cas de | hold of no value, not care about | gering schätzen, vernachlässigen | - | mieć za nie (lekceważyć). — [Beau] dédaigner, faire peu de cas de.
● **mal'sobr'** - enivré | drunk | trunken, betrunken | пьяный | pijany [UV sobr']. — [AK] intémperant | auschweifend, unmässig {legu: unmäßig}. — **Rim**.: Kp. ebri'.
● **malŝtopi** — Ĉu vi havas korktirilon, por malŝtopi la botelon? [FE 34.2]
● **malsupre** — Li staras supre sur la monto kaj rigardas malsupren sur la kampon [FE 33.12].
● **mal'util'** - nuisible | noxious | schädlich | вредный | szkodliwy [UV util']. — [AK] harmful.
● **malvarma** — Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3].
● **malvarme** — Ĉu hodiaŭ estas varme aŭ malvarme? [FE 25.13].
● **malvarmeto** — En somero ni trovas malvarmeton en densaj arbaroj [FE 38.4].
● **mal'varm'um'** - se refroidir | catch cold | sich erkälten | простудиться | przeziębić się [UV varm']. — En malbona vetero oni povas facile malvarmumi [FE 42.12].
● **mal'virg'ig'** - déshonorer, violer | dishonour, violate, deflower | schänden (eine Jungfrau) {2012: entjungfern} | изнасиловать | zgwałcić, bezecnić [UV virg']. — [AK] лишать невинности, растлить.
● **malviva** — Lia filo mortis kaj estas nun malviva [FE 31.5].
● **remalsano** - remalsano [FE 42.13].
● **remalsaniĝo** - remalsaniĝo [FE 42.13].
malakit-o [OA 2.1] — [EG 2] Malachit.
malari-o [OA 2.1] {MED} — [EG 2] Malaria.
maleol' - ceville | ankle | Knöchel | лодыжка | kłykieć. {ANAT} — [RE].
malgraŭ - malgré, en dépit de | in spite of | ungeachtet, obgleich | не смотря на | pomimo. — [AK] ungeachtet, trotz. — [UL].
malic' - malicieux | malicious | tückisch | коварный | chytry. — [RE].
Malt' [OA 3.1] {en} malt | {fr} malt | {de} Malz | {es} malta | {pt} malte | {it} malto | {pl} stod. — [EG 2] Malz.
malv' [OA 1] mauve (bot.) | mallow | Malve | мальва | malwa. {BOT} — [EG 2].
mam' - mamelle | breast | Brust, Euter | грудь, вымя | pierś, sutka. {ANAT} — [AK] mamelle, pis, sein | breast, udder. — [RE]. — **Rim**.: Kp. brust'. La germana traduko estu „(weibliche) Brust", fake „Mamma".
mamut-o [OA 2.1] — [EG 2] Mammut.
man' - main | hand | Hand | рука | ręka. {ANAT} — **mano** - main | hand | Hand | рука | ręka [FE 7]. — **man'** - рука | ręka [UV eg']. — **mano** - рука | ręka [FE 13 eg']. — [AK] рука (кисть). — [UL]. — Sed la « Fundamento de Esperanto » devas troviĝi en la manoj de ĉiu bona esperantisto kiel konstanta gvida dokumento [A 5.4]. La «Fundamento de Esperanto» devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta kontrolilo, kiu gardos lin de deflankiĝado de la vojo de unueco [A 5.5]. — Al leono ne donu la manon [FE 7.3]. La mano de Johano estas pura [FE 8.7]. Li faris ĉion per la dek fingroj de siaj manoj [FE 12.4]. Mi metis la manon sur la tablon [FE 26.8].
● **man'eg'** — ручище | łapa [UV eg']. — **manego** – ручище | łapa [FE 13 eg'].
● **man'plat'** - paume | palm | Handfläche | ладонь | dłoń. — [AK] {en} palm (*hand*).
● **man'um'** - manchette | ruffle | Manschette | манжета | mankiet. — [AK] {en} cuff (*of sleeve*), wristhand. — Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35.13]. La sufikso «um» ne havas difinitan signifon, kaj tial la ... vortojn kun «um» oni devas lerni, kiel simplajn vortojn. Ekzemple: plenumi, kolumo, manumo [FE 42.10].

● **ĉirkaŭ'man'** - bracelet | bracelet | Armband | браслетъ | bransoletka [UV ĉirkaŭ]. — **Rim**.: Kp. braceleto [OA 2].

mana' - manne | manna | Manna | манна | manna {RELI}. — [RE].

mandaren-o (*viro*) [OA 2.1] — [Beau] mandarin. [EG 2] Mandarin.

mandarin/o. [OA 9] Frukto de mandarinujo, speco de oranĝeto, tre suka kaj dolĉa, kun bonodora, maldika, facile forigebla ŝelo. {BOT} — [GD 1955] mandarine (bot.).

● **mandarin/uj/o**, **mandarin/arb/o**. [OA 9] Arbeto, kies frukto estas mandarino. (*Citrus reticulata*.) {BOT}

mandat' [OA 1] mandat | mandate | Mandat, Auftrag | мандатъ | mandat. — [E-isto11/1890]. [Beau].

mandolin' [OA 1] mandoline | mandoline | Mandoline | мандолина | mandolina. {MUZ} — [EG 2].

manĝ' - manger | eat | essen | ѣсть | jeść. — **manĝi** - manger | eat | essen | ѣсть | jeść [FE 8]. — [UL]. — Mi manĝas per la buŝo kaj flaras per la nazo [FE 8.10]. Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj laboradi senĉese [FE 13.2]. La infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi [FE 16.13]. La infanoj ploras, ĉar ili volas manĝi [FE 16.14]. Trovinte pomon, mi ĝin manĝis [FE 22.5]. Mi manĝis bongustan ovaĵon [FE 35.9].

● **manĝebla** — Ne ĉiu kreskaĵo estas manĝebla [FE 41.3].

● **manĝilaro** — Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo [FE 34.10].

● **maten'manĝ'** - déjeuner | breakfast | frühstücken | завтракать | śniadać. — **matenmanĝi** - déjeuner | breakfast | frühstücken | завтракать | śniadać [FE 27]. — matenmanĝi [FE 27.11].

● **tag'manĝ'** – dîner {de 1990: diner} | dine | zu Mittag essen | обѣдать | obiadować. — tagmanĝi [FE 27.12].

● **vesper'manĝ'** - souper | sup | zu Abend essen | ужинать | jeść kolacyę, wieczerrzać. — Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn; post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo [FE 18.15]. vespermanĝi [FE 27.13].

● **manĝoĉambro** — Li eliris el la dormoĉambro kaj eniris en la manĝoĉambron [FE 31.19].

mang/o. [OA 9] Frukto de mangujo, maturstadie flava aŭ oranĝa, kun tre suka, dolĉa, aroma, flava karno kaj kun granda plata kerno. {BOT} — [GD 1955] mangue.

● **mang/uj/o**, **mang/arb/o**. [OA 9] Tropika fruktarbo indiĝena en suda Azio, kies frukto estas mango. (*Mangifera indica*.) {BOT} — [GD 1955] manguier (bot.).

mangan' - manganèse | manganese | Mangan | марганецъ | brunatnik. {KEM} — [AK] {pl} mangan. — [RE].

mani' [OA 1] * manie | mania | Manie, Sucht | манія | manja. {MED} — [EG 2].

manier' - manière, façon | manner | Manier, Weise, Art | способъ, образъ | sposób, maniera. — **maniero** - manière, façon | manner | Manier, Weise, Art | способъ, манера | sposób, manjera [FE 32]. — [AK] способ, образ, манера. — [RE]. — Teatramanto ofte vizitas la teatron kaj ricevas baldaŭ teatrajn manierojn [FE 32.1].

● **kiamaniere** — Mi montris en principo, kiamaniere la severa netuŝebleco de la «Fundamento» gardos ĉiam la unuecon de nia lingvo ... [A 9.1].

● **tiamaniere** — ... kaj tiamaniere ni havos la certecon, ke eĉ ĉe la plej granda perfektiĝado la unueco de Esperanto neniam estos rompata [A 8.3].

manifest' [OA 1] * manifeste (subst.) | manifesto | Manifest | манифестъ | manifest. — [RE] [PV 1930] {verbo}. [EG 2] [PIV] {substantivo}.

Manifestaci' [OA 3.2] {en} manifestation | {fr} manifestation (politique) | {de} Kundgebung, Manifestierung | {es} manifestacion {legu: manifestación} | {pt} manifestaçao {legu: manifestação} | {it} manifestazione | {pl} manifestacja. — [PV].

manik' - manche | sleeve | Aermel {legu: Ärmel} | рукавъ | rękaw {VEST}. — [RE].

maniok/o. [OA 9] Tropika arbusto aŭ arbeto origine el Sud-Ameriko, kun tuberaj ameloriĉaj radikoj, kiuj estas manĝeblaj post prilaboro: *dolĉa manioko*; *maldolĉa manioko*; *tapioko estas farita el manioko*. (*Manihot esculenta*.) {BOT} — [GD 1955] manioc (cuis.).

manipul-i [OA 2.1] — [EG 2] manipulieren, handhaben.

mank' - manquer | want | fehlen | недоставать | brakować. — [AK] {en} want, lack. — [RE].

manometr-o [OA 2.1] — [Beau] manomètre. [EG 2] Manometer.

manovr' - manœuvrer | work a ship, take measures | manövriren {de 1901: manövrieren} | маневрировать | manewrować. {MIL} {MAR} — [AK] {en} manœuvre (*milit. and nav*.). — [RE].

mansard-o [OA 2.1] — [EG 2] Mansarde, Dachstübchen.

mantel' - manteau | mantle | Mantel | плащъ | plaszcz {VEST}. — [RE].

manufaktur-o [OA 2.1] — [Beau] manufacture. [EG 2] Manufaktur.

manuskript' [OA 1] manuscrit | manuscript | Manuskript | рукопись | rękopis. — [RE].

map/o. [OA 8] Folio, sur kiu estas konvencie figurita jen pli-malpli granda parto de la tergloba surfaco, jen porcio de la astra ĉielo. — A. map; F. carte (géographique. céleste); G. Landkarte, Himmelskarte; H. {es} mapa; I. {it} carta, cartina (geografica), mappa; P. {pt} mapa (geog.). {GEO} — [PV] {ne ĉe Z.; antaŭe land-kart-o, kart-o}.

mar' - mer | sea | Meer | море | morze. {GEO} — **maro** - mer | sea | Meer | море | morze [FE 32]. — **mar'** - mer | sea | Meer | море | morze [UV ist']. — **maro** - mer | sea | Meer | море | morze [FE 31 ist']. — [UL]. — Sur la bordo de la maro staris amaso da homoj [FE 32.9]. La kuraĝa maristo dronis en la maro [FE 37.16].

● **mar'ist'** - marin | sailor | Seeman {legu: Seemann} | морякъ | marynarz [UV ist']. — **maristo** - marin | sailor | Seeman {legu: Seemann} | морякъ | marynarz [FE 31 ist']. — La kuraĝa maristo dronis en la maro [FE 37.16].

marasm-o [OA 2.1] — [EG 2].

marĉ' - marais | swamp, marsh | Sumpf | болото | błoto. {GEO} — [AK] bagno, błoto. — [RE].

marĉand' - marchander | bargain, trade | dingen, feilschen | торговаться | targować się. — [AK] {en} bargain (*vb*.). — [RE].

marcipan' - massepain | marchpane | Marzipan | марципанъ | marcepan {KUIR}. — [AK] {en} marzipan (*almon paste*). — [MV].

mard' - mardi | Tuesday | Dienstag | вторникъ | wterek. — [UL].

margarin' [OA 1] margarine | margarine | Margarine | маргаринъ | margaryna. {KUIR} — [EG 2].

marĝen' [OA 1] marge | margin | Rand (im Buch) | поле (книги) | margines. — [EG 2].

marin-i [OA 2.2] mariner | to marinade, pickle | marinieren {KUIR} — [EG 2].

Mario — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Ernečjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilhečjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38, mankas en la ĝusta alfabeta pozicio en UV]. — **Mari'** [UV nj'] {mankas en la angla}. — **Mari'** {deklarita Fundamenta de} [OA 7] (virina antaŭnomo).

● **Ma'nj'** [UV nj'] {mankas en la angla}.

● **Marinjo** — Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas ... [FE 17, mankas en UV].

marionet' [OA 1] * marionnette | puppet | Marionette | маріонетка | marjonetka. {LUD} — [EG 2].

mark' - marque | mark | Marke, Briefmarke | марка | marka. — [RE].

markiz' [OA 1] marquis | marquis | Marquis | маркизъ | markiz. — [RE].

markot' - marcotte | layer | Ableger | отпрыскъ | latorośl. — [AK] {en} markot (*hort*.) | отпрыск, отросток. — [RE].

marmelad' [OA 1] * marmelade | marmalade | Marmelade | мармеладъ | marmelada. {KUIR} — [EG 2].

marmor' - marbre | marble | Marmor | мраморъ | marmur. {GEOL} — [MV].

marmot' - marmotte | marmot | Murmelthier {de 1901: Murmeltier} | сурокъ | świszcz {ZOO}. — [RE].

maroken' - marroquin | marroquin | Saffian | сафьянъ | safian. — [AK] {en} marocco leather. — [RE].

Maroko [OA 8] {GEO} — [EdE]. [IntScRev] *La tero kaj geologia historio de Maroko* [IntScRev 3-a jaro 1906, p. 51].

marŝ' - marcher | march, walk | marschiren {de 1901: marschieren} | маршировать | marzerować. — [RE].

marŝal' - maréchal | marshal | Marschall | маршалъ | marszałek {MIL}. — [AK] maréchal (*milit*.) — [RE].

Mart' - Mars | March | März | Мартъ | Marzec. — **Marto** - Mars | March | März | Мартъ | Marzec [FE 12]. — [DL] [RE]. — Hodiaŭ estas la dudek sepa (tago) de Marto [FE 12.18].

martel' - marteau | hammer | Hammer | молотъ | młot. — [RE].

martir' [OA 1] * martyr | martyr | Märtyrer | мученикъ | męczennik. {RELI} — [EG 2].

mas' - masse | mass | Masse | масса | massa. — [RE].

maŝ' - nœud coulant, maille | mesh | Schlinge, Masche | петля | pętlica. — [RE].

masaĝ' [OA 1] massage | massage | Massage | массажъ | masaż. — [EG 2].

maŝin' - machine | machine | Maschine | машина | maszyna. — [DL] [RE].

● **te'maŝin'** - bouilloire | tea-kettle | Theemaschine {de 1901: Teemaschine} | самоваръ | samowar [UV te'].

masiv' - massif | massive | massiv | массивный | masywny. — [RE].

mask' - masque | mask | Maske | маска | maska. — [RE].

mason' - maçonner | build with stone | mauern | класть стѣны (каменная работа) | murować. — [MV]. — [BRO 7 ~i].

mast' - mât | mast | Mast, Mastbaum | мачта | maszt. — [RE].

mastik' - mastic | mastick | Mastik | мастика | mastyka. — [AK] {en} mastic, putty. — [RE].

mastr' - hôte, maître de maison {de 1990: maitre} | master | Wirth {de 1901: Wirt} | хозяинъ | gospodarz. — [AK] maître {de 1990: maitre} de maison, patron | master (*of house*)´, host. — [UL].

● **mastr'um'** - faire le ménage | keep house, husband | wirthschaften {de 1901: wirtschaften} | хозяйничать | gospodarzyć.

mat' - natte | mat | Matte | рогожа | rogoźka. — [RE]. — **Rim.**: Homonimo estas *mato* aŭ *mat!* en ŝako, vd.: **Lingva Respondo 1901**: La nomoj de ŝako estas: ... *Matt* mato (aŭ mat!) ... [LR 19. Let. al Th. Thorsteinsson (1901), O.V. p. 522]. Z per tio ripetas al nova esperantisto la kutimon de E-isto Jan. 1892, p. 16: „Problemo de ŝako ... Blanko komencas kaj donas mat per la dua iro". E-isto Feb. 1892, p. 27: Blanko komencas kaj donas maton per la 3ª iro.

matador-o [OA 2.1]. — [EG 2].

mate/o [OA 9] **1** Arbo maksimume dek metrojn alta, kies ledecaj folioj, sekigitaj aŭ rostitaj, estas uzataj por infuzaĵoj. (*Ilex paraguayensis*.) {BOT} **2** Sekigitaj aŭ rostitaj folioj de mateo *1*. **3** Infuzaĵo el mateo *2*. — [OA 9] Noto: La personan nomon *Mateo*, kaj la tutan problemon pri traktado de personaj nomoj, la Akademio prokrastis por posta konsidero. — [GD 1955] maté (boisson). ~arbo maté (bot.).

matematik' [OA 1] * mathematique | mathematics | Mathematik | математика | matematyka. {MAT} — [DL] [RE].

maten' - matin | morning | Morgen | утро | poranek. — **mateno** - matin | morning | Morgen | утро | poranek [FE 10]. — [UL]. — Bonan matenon! [FE 10.9].

● **maten'manĝ'** - déjeuner | breakfast | frühstücken | завтракать | śniadać [UV manĝ']. — **matenmanĝi** - déjeuner | breakfast | frühstücken | завтракать | śniadać [FE 27].

materi' [OA 1] * matière | matter (substance) | Materie | матерія {de 1918: материя} | materja {de 1936: materia}. — [Beau] matière (tout ce qui existe physiquement).

materialo - matière | material | Stoff | матеріялъ {de 1918: материал} | materjał {de 1936: materiał} [FE 31, mankas en UV]. — Ligno estas bona brula materialo [FE 31]. — **material'** [OA 1] * matériel, matériaux | material | Material | матеріалъ {de 1918: материал} | materjał. — **material/o** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 8]. — [DL] [RE 94].

matrac' - matelas | mattress | Matratze | тюфякъ | materac. — [RE].

matric/o [OA 9] **1** Gravurita peco aŭ muldilo, tenanta negativan reliefan formon, uzata por krei (per stampado aŭ fandado) gramofonajn diskojn, prestipojn, medalojn, monerojn, aŭtoplatojn aŭ aliajn objektojn kun reliefa surfaco. — [EG 2] Mater, Matrize (*Gießerei*) (vgl. utero). **2** Tabelo el samspecaj matematikaj objektoj (ekz. nombroj): *matrico el 200 horizontaloj kaj 300 vertikaloj*; *kvadrata matrico*; *adicio / multipliko de matricoj*. {MAT}

matur' - mûr | ripe | reif | зрѣлый | dojrzały. — **matura** - mûr | mature, ripe | reif | зрѣлый | dojrzały [FE 6]. — [AK] {en} mature, ripe. — [RE]. — ... kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron oficialan, ... [A 7.2]. ... fari tion ĉi (post matura prijuĝado) povas ne apartaj personoj, sed nur ia centra institucio, ... [A 9.4]. — Infano ne estas matura homo [FE 6.1].

● **nematura** — Ĉevalido estas nematura ĉevalo, kokido - nematura koko, bovido -

nematura bovo, birdido - nematura birdo [FE 36.14].

maŭzole-o [OA 2.1] — [EG 2] Mausoleum.

mazurk' [OA 1] mazurka | mazurka | Mazurka | мазурка | mazurek. {MUZ}

mebl' - meuble | furniture | Möbel | мебель | mebel. — [DL] [RE].

meĉ' - mèche | wick | Docht | фитиль | knot.

● **meĉ'aĵ'** - amadou | amadou, match | Feuerschwamm | трутъ | hubka. — [AK] {en} tinder, match | {pl} lont.

medal' - médaille | medal | Denkmünze {2012: Medaille, Gedenkmünze} | медаль | medal.

medalion' - médaillon | medallion | Medaillon | медаліонъ | medalion.

Medi' [OA 3.1] {en} sphere of life, circle, medium | milieu, ambiance | Umwelt, Umgebung, Kreis | {es} medio (en que se vive) | {pt} meio, medio {anstataŭ "medio" (ne uzata), oni uzas: meio ambiente} | {it} mezzo, ambiente | {pl} --- {traduko mankas}. — [EG 2] das Milieu (Lebens-, Wirkungskreis).

medicin' [OA 1] * médecine | medicine | Medizin | медицина | medycyna. {MED}

medikament-o [OA 2.1] {MED} — [EG 2] Medikament, Arzenei {2012: Arznei}.

medit' - réfléchir, méditer | reflect, meditate | nachdenken {2012 ankaŭ: meditieren} | размышлять | medytować, rozmyślać.

Mediterane/o. [OA 8] Granda maro, fermita inter Eŭropo, Afriko kaj Azio. — A. Mediterranean, F. Méditerranée, G. Mittelmeer, H. {es} Mediterráneo, I. {it} Mediterraneo. P. Mediterrâneo. {GEO}. — **Rim.**: Ĉe Kabe 1910 „Meza Maro" (en la artikolo pri „glacio": *la Meza Maro neniam glaciiĝas*).

medium-o [OA 2.1] — [EG 2] (das) Medium.

Medol-o, [OA 4] {fr} moëlle (anat., bot.) | {en} marrow, medulla (anat., bot.) | {de} Mark (das) (in Knochen und Pflanzen) | {it} midolla | {es} médula | {pt} médula {legu: medula}, tutano | {ca} moll, médula {legu: medul·la}. {ANAT} {BOT} — **Lingva Respondo 1903**: Mi pensas, ke la esprimoj „spina cerbo" kaj „ostocerbo" estas tute sufiĉaj kaj precizaj, kaj mi ne konsilus senbezone uzi novajn vortojn; tamen se iu uzos „medolo", mi ne protestos. [LR 38, pk. al Th. Cart (1903), O.V. p. 530].

meduz' [OA 1] meduse | medusa | Qualle, Meduse | медуза | meduza. {ZOO}

meĥanik' - mécanique | mechanics | Mechanik | механика | mechanika. — **meĥaniko** - mécanique | mechanics | Mechanik | механика | mechanika [FE 32]. — Kiu okupas sin je meĥaniko, estas meĥanikisto, kaj kiu okupas sin je ĥemio, estas ĥemiisto [FE 32.2]. — [OA 8] II.A.1. La ses formoj: alkemio, arkaismo, arkitekturo, kemio, mekaniko kaj monarko estas oficialigitaj kiel paralelaj al la Oficiala alĥemio kaj al la Fundamentaj arĥaismo, arĥitekturo, ĥemio, meĥaniko kaj monarĥo.

● **meĥanikisto** — Kiu okupas sin je meĥaniko, estas meĥanikisto, kaj kiu okupas sin je ĥemio, estas ĥemiisto [FE 32.2].

meĥanism/o, mekanism/o. [OA 8] Sistemo de organoj aŭ pecoj, kiuj kunefikas en maŝino aŭ aparato, aŭ en biologia proceso, por atingi difinitan rezulton. — A. mechanism; F. mécanisme; G. Mechanismus, Getriebe, Vorrichtung; H. {es} mecanismo; I. {it} congegno, meccanismo; P. {pt} mecanismo. — [OA 8] II.A.1. Estas oficialigitaj la du jenaj duformaj vortoj: mekanismo / meĥanismo kaj monarĥio / monarkio.

mejl' - mille (mesure itinéraire) | mile | Meile | миля | mila. {MEZ}

mekanik/o. [OA 8] Moderna formo de: meĥaniko. — A. mechanics, F. la mécanique, G. Mechanik, H. {es} mecánica, I. {it} meccanica, P. {pt} mecânica. — [OA 8] II.A.1. La ses formoj: alkemio, arkaismo, arkitekturo, kemio, mekaniko kaj monarko estas oficialigitaj kiel paralelaj al la Oficiala alĥemio kaj al la Fundamentaj arĥaismo, arĥitekturo, ĥemio, meĥaniko kaj monarĥo.

Meksiko [OA 8] {GEO} — [Rhodes 1908, 523]: **Mexiko** (city) Meksiko; (land) Meksiklando. — **Lingva Respondo 1911 [Pri la nomoj de landoj]**: „Meksiko", vd. ĉe Brazilo.

mel' - blaireau | badger | Dachs | барсукъ | borsuk. {ZOO}

Melankoli' [OA 3.1] {en} melancholy | {fr} mélancolie | {de} Melancholie, Trübsinn | {es} melancolia | {pt} melancolia | {it} malinconia | {pl} melancholja. — [EG 2] Melancholie, Schwermut, Trübsinn.

melas' [OA 1] melasse | molasses | Melasse | патока | melasa.

meleagr' - dindon | turkey | Truthahn | индюкъ | indyk {ZOO}.

melis-o [OA 2.2] mélisse | balm mint | Melisse {BOT} — [EG 2] Melisse.

melk' - traire | milk (vb.) | melken | доить | doić.

melodi' [OA 1] * melodie | melody | Melodie | мелодія {de 1918: мелодия} | melodja {de 1936: melodia}. {MUZ} — [1888]. [Beau].

melodram' [OA 1] melodrame | melodrama | Melodrama | мелодрама | melodramat. — [1889]. [Beau].

melon' - melon | melon | Melone | дыня | melon {BOT}. — [RE].

● **akv'o'melon'** - melon d'eau | water-melon | Wassermelone | арбузъ | arbuz.

melongen/o [OA 9] **1** Neligneca kreskaĵo kun dentaj folioj, violetaj floroj kaj grandaj malhele violaj longformaj fruktoj (ekzistas specoj aliformaj kaj alikoloraj). (*Solanum melongena*.) {BOT} **2** Frukto de melongeno *1*. — [GD 1955] aubergine (bot.).

mem - même (moi-, toi-, etc.) | self | selbst | самъ | sam. — **mem** - même (moi-, toi-, etc.) | self | selbst | самъ | sam [FE 18]. — [UL]. — Mem [FE 3]. — ... se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem [A 3.4]. — Mi amas min mem, vi amas vin mem, li amas sin mem, kaj ĉiu homo amas sin mem [FE 18.12]. Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem [FE 18.13]. Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem; sed ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas [FE 18.14]. "... Mia opinio estas: prenu mem akvon, se vi volas trinki." [FE 19.8]. Ne riproĉu vian amikon, ĉar vi mem plimulte meritas riproĉon; li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto [FE 22.7]. Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam nur la nominativon [FE 28.1]. Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem [FE 32.3]. Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem ... [FE 39.11]. Mi kredeble ne povos veni al vi hodiaŭ, ĉar mi pensas, ke mi mem havos hodiaŭ gastojn [FE 41.8].

● **mem'star'** - indépendant | self-subsistent | selbstständig | самостоятельный | samodzielny [UV mem'star'].

membr' - membre | member | Glied | членъ | członek. {ANAT} — [AK] {en} member, limb. — [RE]. [Beau] **membr**, membre (au propre et au figuré).

membran' - membrane | membrane | Häutchen, Membrane | перепонка | błona, błonka. {ANAT} — [RE].

memor' - se souvenir, se rappeler | memory | sich erinnern, im Gedächtniss behalten {2012: im Gedächtnis behalten} | помнить | pamiętać. — **memori** - se souvenir, se rappeler | remember | im Gedächtniss {2012: Gedächtnis} behalten, sich erinnern | помнить | pamiętać [FE 41]. — [AK] remember | sich erinnern, gedenken. — [UL]. — Tiun ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori ... [A 1.5].

● **memorigadi** — ... por ke li bone ellernu kaj per ofta enrigardado konstante memorigadu al si, kio en nia lingvo estas oficiala kaj netuŝebla ... [A 5.4].

● **memorinda** — Tiu ĉi grava tago restos por mi ĉiam memorinda [FE 41.11].

Menci' [OA 3.2] {en} to mention | {fr} mentionner | {de} erwähnen | {es} mencionar | {pt} --- {traduko mankas, estu: mencionar} | {it} menzionare | {pl} wzmiankowac {legu: wzmiankować}. — [Kabe]. {antaŭe cit'i, nom'i, ekz. ĉe Rhodes 1908 „mention"}.

mend' - mander, commettre | commit | bestellen | заказывать | stalować. — [AK] faire une commande, commander | bespeak, give an order. — [RE].

Mens' [OA 3.2] {en} intellect, mind | {fr} intelligence, entendement, esprit | {de} Verstand | {es} mente | {pt} mente | {it} mente | {pl} umyst. — [EG 2] Geist.

mensog' - mentir | tell a lie | lügen | врать | kłamać. — **mensogi** - mentir | tell a lie | lügen | лгать | kłamać [FE 22]. — [RE].

● **mensoganto** - ... li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto [FE 22.7].

● **mensoginto** - ... li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto [FE 22.7].

● **mensogisto** - Li estas mensogisto kaj malnoblulo [FE 37].

menstru/i. [OA 9] Ellasi sangon el la utero dum kelkaj tagoj proksimume unu fojon en ĉiu monato: *ŝi regule menstruas*.

● **menstru/o**. [OA 9] Menstrua sangelfluo, monataĵo: *kiam estis via lasta menstruo?*; *ŝiaj menstruoj estas neregulaj*; *menstruoj okazas de la seksmaturiĝo ĝis la definitiva menstruĉeso*. — [EG 2] menstruaci-o, Menstruation. [GD 1955] menstruation (phl.) {baza formo estas substantivo, ne verbo}.

ment' - menthe | mint | Münze (Botan.) | мята | mięta. {BOT} — [RE].

menton' - menton | chin | Kinn | подбородокъ | podbródek. {ANAT} — [RE].

mentor-o [OA 2.1] — [EG 2] Mentor.

menu' [OA 1] menu | menu | Menu, Speisekarte | меню | menu. — [Kabe].

meridian-o [OA 2.1] — [EG 2] Meridian.

merit' - mériter | merit | verdienen | заслуживать | zasługiwać. — **meriti** - mériter | merit | verdienen | заслуживать | zasługiwać [FE 22]. — [UL]. — Ne riproĉu vian amikon, ĉar vi mem plimulte meritas riproĉon [FE 22.7].

meriz' - merise | bird-cherry | Vogelkirsche | черешня | czereśnia. {BOT} — [AK] dzika wiśnia. — [RE].

Merkat-o, [OA 4] {fr} marché, sphère de vente, ensemble des transactions commerciales | {en} market | {de} Markt | {it} mercato, compra-vendita | {es} mercado, campo de venta, conjunto de transacciones comerciales | {pt} mercado | {ca} mercat, radi de venda | sfero de vendo, kampo de komerca agado pri aparta branĉo (neniam signifas placon au ejon). — [PV] {ne ĉe Z}.

merkred' - mercredi | Wednesday | Mittwoch | среда | środa. — [UL].

merl' - merle | blackbird | Amsel | черный дроздъ | kos. {ZOO} — [MV].

merlang-o [OA 2.2] (*zool.*) merlan | whiting | Weissling {legu: Weißling} {ZOO} — [EG 2] Weißling.

mes' - messe | mass | Messe, Gottesdienst | обѣдня, богослуженіе | msza. {RELI} — [RE].

mesaĝ/o [OA 9] **1** Parola aŭ skriba informo sendata al iu: *nuntempe homoj sendas mesaĝojn tra la Interreto*. **2** (figure) Esenca ideo, kiun celas transdoni teksto, rakonto, filmo, agado k.s.: *kio estas la mesaĝo de la Biblio por la nuntempa homo?*; *tiu filmo enhavas politikan mesaĝon*; *la malbona traduko fuŝis la mesaĝon de la aŭtoro*. — [GD 1955] message (p. f.).

● **mesaĝ/i**. Sendi per mesaĝo: *li mesaĝis la novaĵon al mi*; *ili ofte mesaĝas inter si*; *per poŝtelefono oni povas mesaĝi tre rapide*.

Mesi' - Messie | Messiah | Messias | Мессія | Messyasz {RELI}. — [RE].

mespil-o [OA 2.2] (*bot.*) nèfle | medlar | Mispel {BOT} — [EG 2] Mispel.

met' - mettre, placer, poser | put, place | hinthun {de 1901: hintun}; kann durch verschiedene Zeitwörter übersetzt werden | дѣть; можетъ быть переведено различными глаголами | podziać; może być oddane za pomocą rozmaitych czasowników. — **meti** - mettre | put, place | hinthun {de 1901: hintun} | дѣть; класть | podziać [FE 26]. — [AK] hintun, setzen, stellen, legen | поставить, положить, класть; может быть переведено различными глаголами | kłaść; może być oddane za pomocą rozmaitych czasowników. — [UL]. [DL]. — Tial, por meti finon al ĉiuj malkompreniĝoj kaj disputoj, ... la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, ... [A 3.3]. — Mi metis la manon sur la tablon [FE 26.8]. Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo [FE 34.10]. Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, kion fari [FE 38.10]. ... tubeto, en kiun oni metas cigaron, kiam oni ĝin fumas, estas cigaringo [FE 40.15].

— **Lingva Respondo 1888**: La vorton „met" ni uzas tian, kian {de 1888: tiam, kiam} ni volas esprimi ian faradon, sed la formo de l' farado estas por ni aŭ ne klara, aŭ sen signifo. "Meti ion ien" signifas: fari, ke io ie estu. "Meti" povus alie esti tradukata "estigi". "Meti" inter la verboj (farvortoj) estas tio sama, kio "je" inter la prepozicioj, aŭ "um" inter la sufiksoj [LR 39A] = [DL 16.25]. — [DL 1888]: *La ŝteliston oni metis en malliberejon (se ni dirus "oni lin sidigis", tio ĉi estus ne vere, ĉar neniu lin tie* sidigis*)* [DL 16.27].

● **el'met'** - exposer | expose | ausstellen | выставлять | wystawiać. — [AK] {en} display, expose.

● **kunmeti** - composer | compound | zusammensetzen | слагать | składać [FE 27]. — Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; ... [FE 27.5]. — ... la vorto « frat'in'o », prezentante unu

ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enk. 2].

metafizik' [OA 1] métaphysique | metaphysics | Metaphysik | метафизика | metafizyka. — [RE]. [Beau] (la) métaphysique. [EG 2] Metaphysik.

metafor' [OA 1] métaphore | metaphor | Metapher | метафора | metafora. — [RE]. [Beau] métaphore.

metal' – [UV faden'] — **metal'** [OA 1] métal | metal | Metall | металлъ | metal. — **metal/o** (1) [OA 8]. — [RE].

● **metal'faden'** - fil de métal | thread, wire | Draht | проволока | drut. — [AK] wire.

metalurgi/o. [OA 8] Industrio, celanta elfosadon de minaĵoj kaj ekstraktadon, fabrikadon kaj prilaboradon de metaloj. — A. metallurgy, F. métallurgie, G. Metallurgie, Hüttenwesen, H. {es} metalurgia, I. {it} metallurgia, P. {pt} metalurgia. — [RE]. [EG 2] Metallurgie.

metamorfoz' [OA 1] * metamorphose | metamorphosis | Metamorphose, Verwandlung | метаморфоза | metamorfoza. — [EG 2] Metamorphose.

metempsikoz-o [OA 2.1] {MED} — [EG 2] Metempsychosis.

meteor-o [OA 2.1] {ASTR} — [RE]. [Beau] météore. [EG 2] Meteor.

meteorolog' (2) [OA 7] {METEO}

meteorologi-o [OA 2.1] {METEO} — [Beau] metereologi {kun vort-meza -re-anstataŭ -or-}, météorologie. [EG 2] Meteorologie.

meti' - métier | handicraft | Handwerk | ремесло | rzemiosło. — [MV]. — Me-tí-o [FE 3]. Metio [FE 4]. — [Beau] **meti**, métier (pas la machine).

metod' [OA 1] * méthode | method | Methode | методъ | metoda. — [DL]: *Per kia vojo mi venis al la kreo de mia lingvo kaj laŭ kiaj metodoj mi laboris, - mi ankoraŭ parolos.* [DL I.2]. [DL-Ald.]: *Oni devas eldoni pli vastajn lernolibrojn, laŭ bonaj metodoj, kun multaj ekzemploj kaj pecoj por traduki* ... [DL-Ald 29]. [Beau] méthode.

metrik-o (*versf.*) [OA 2.1] — [EG 2] Metrik.

metro - [FE 14, mankas en UV] {MEZ}. — Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; tial du metroj kostas kvar kaj duonon frankojn (aŭ da frankoj) [FE 14.11]. Alportu al mi metron da nigra drapo (Metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo) [FE 32.6]. — **metr'** [OA 1] * mètre | meter | Meter | метр | metr. — **metr'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [Beau].

metronom-o [OA 2.1] — [EG 2] Metronom.

metropol-o [OA 2.1] — [EG 2] Metropole.

mev' - mouette | sea-gull | Möwe | чайка | czajka. {ZOO} — [AK] {pl} mewa. — [RE].

mez' - milieu | middle | Mitte | средина | środek. — **mezo** - milieu | middle | Mitte | средина | środek [FE 33]. — [UL].

● **meza** — Mia frato ne estas granda, sed li ne estas ankaŭ malgranda: li estas de meza kresko [FE 33.1].

● **tag'mez'** - midi | mid-day | Mittag | полдень | poludnie.

● **mez'o'nombr'** - nombre moyen | average | durchschnittlich | среднимъ числомъ | przecięciowo. — [AK] Durchschnittzahl.

● **meznokto** — Mez-nók-to [FE 3].

mezur' - mesurer | measure | messen | мѣрить | mierzyć. — **mezuri** - mesurer | measure | messen | мѣрить | mierzyć [FE 32]. — [UL].

● **mezuro** — Me-zú-ro [FE 3]. — „Da" post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro [FE 32.14].

● **al'mezur'** - essayer, ajuster | adapt | anpassen | примѣривать | przymierzać. — [AK] {en} try on, fit on, adjust.

mi - je, moi | I | ich | я | ja. — **mi** - je, moi | I | ich | я | ja [FE 6]. — **mi** - je, moi | I | ich | я | ja. [FG 5.1]. — [UL]. — Min [FE 2]. — ... ĉio alia, kion mi verkis aŭ verkos, konsilas, korektas, aprobas k. t. p., estas nur verkoj privataj ... [A 3.6]. Mi permesis al mi nur korekti la preserarojn ... [A 4.3]. ... mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe; ĉar se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus ŝanĝo ... [A 4.3]. {Pliaj trafoj, ekzemple en A 4.6, A 4.7, A 6.1 ktp.}. — Jen estas la pomo, kiun mi trovis [FE 6.8]. Mi vidas leonon [FE 7.4]. Mi parolas pri leono [FE 7.7]. Diru al la patro, ke mi estas diligenta [FE 8.3]. Mi amas la patron [FE 8.4]. Mi konas Johanon [FE 8.8]. Ludoviko, donu al mi panon [FE 8.9]. Mi manĝas per la buŝo kaj flaras per la nazo [FE 8.10]. {Pliaj trafoj de nominativa uzo, ekzemple en FE 9.7-10, 10.7-8, 10.16, 10.19, 12.02, 14.1-2 ktp.}. La patro donis al mi dolĉan pomon [FE 10.5]. Ĝojan feston! (mi deziras al vi) [FE 10.10].

● **mi'n** - moi, me (accus.) | me (obj.) | mich | меня (винит.) | mnie (przyp. czwarty) [FG 5.3]. — **min** - Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn [FE 14.14].

● **mi'a** - mon, ma | my, mine | mein | мой | mój. — **mi'a** - mon | my, mine | mein | мой | mój [FG 5.3]. — **mia** - mon | my | mein | мой | mój [FE 10]. — [UL]. — ... sub mia persona kontrolo kaj kunhelpo [A 5.3]. ... nun mi diros pri tio ĉi nur kelkajn vortojn, por ke mia opinio ne ŝajnu tro paradoksa [A 6.6]. La ideoj, kiujn mi supre esprimis pri la Fundamento de Esperanto, prezentas dume nur mian privatan opinion [13.1]. — Rakontu al mia juna amiko belan historion [FE 10.6]. Ne, vi eraras, sinjoro: via pano estas malpli freŝa, ol mia [FE 10.17]. El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna [FE 10.18]. Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj [FE 14.15]. “Tre volonte, mia bona,”; diris la bela knabino [FE 15.2]. Mia hundo, vi estas tre fidela [FE 16.18]. De kio tio ĉi venas, mia filino?” [FE 17.6]. ... „mi devas tien sendi mian filinon” ... [FE 17.9]. Li estas mia onklo, ĉar mia patro estas lia frato [FE 18.9]. [Pliaj trafoj, ekzemple en FE 18.10, ktp.].

miasm' [OA 1] miasme | miasma | Miasma | міазмы | mjazmat. — [EG 2].

miaŭ' [OA 1] * miauler | mew | miauen | мяукать | miauczeć. — [RE 102].

miel' - miel | honey | Honig | медъ | miód. {KUIR} — [RE].

mien' - mine, air | mien, air | Miene | мина (выраженіе лица) | mina. — [AK] mina (wyraz twarzy). — [RE].

migdal' - amande | almond | Mandel | миндаль | migdal. {BOT} — [RE].

migr' - voyager, courir le monde | migrate | wandern | странствовать | wędrować. — [RE].

Miĥael' - [UV ĉj'] {mankas en la angla}. — **Miĥael'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

● **Mi'ĉj'** - [UV ĉj'] {mankas en la angla}.

mikrob-o [OA 2.1] — [Beau] microbe. [EG 2].

mikrofon-o [OA 2.1] — [EG 2].

mikrometr-o [OA 2.1] {MEZ} — [EG 2].

mikroskop-o [OA 2.1] — [RE]. [Beau] microscope.

miks' - mêler | mix | mischen | смѣшивать | mieszać. — [AK] mêler, mélanger. — [UL]. [Beau] **miks**, mêler, mélanger, mixtionner.

mil' {legu: mil (sen apostrofo)} - mille (nombre) | thousand | tausend | тысяча | tysiąc. — **mil** - 1000 [FG 4.1]. — **mil** - mille (nombre) | thousand | tausend | тысяча | tysiąc [FE 12]. — Varsovio, Julio 1905 [A 11.4]. — Mil okcent naŭdek tri [FE 12.10]. Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua [FE 12.19]. Mil jaroj (aŭ milo da jaroj) faras miljaron [FE 14.5]. — **Rim.**: En FG 4.1 kaj FE 12 *mil* ĝuste sen apostrofo, paralele al la aliaj nombroj kaj konforme al la germana traduko per minuskla „tausend“, en UV erare kun apostrofo.

● **milo** — Mil jaroj (aŭ milo da jaroj) faras miljaron [FE 14.5].

● **miljaro** — Mil jaroj (aŭ milo da jaroj) faras miljaron [FE 14.5].

● **1905** — Varsovio, Julio 1905 [A 11.4]. — [UV 1894] *1894* [UV-titolo]. [FK 1903]: *Varsovio, en Aprilo 1903* [FK 4.3]. — **Rim.**: Malsame kiel en slavaj lingvoj, indikoj de jaroj en Esperanto estas faritaj per kardinalaj, *ne* ordinalaj numeroj. Pro tio simple „1894“, „1903“, „1905“ k.t.p. kaj ne „(jaro) 1894-a“, „1903-a“, „1905-a“ k.t.p. La regulo en 1905 jam delonge apartenis al la „silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj“ (A 2.1), kiu tamen ne trovis klaran esprimon en la Fundamento en mallarĝa senco. Ĉi tiu ne volis ŝanĝi la lingvon, sed nur fari el silenta interkonsento, eksplicitan kaj skriban interkonsenton (A 3.3). Kvankam tiu skriba konfirmo ne klare okazis pri la indikoj de jaroj per kardinalaj numeroj, ĝi tamen validas kiel „kutimjura“ interkonsento. Por pli detala diskuto vd. la Ĝeneralan Parton.

mild-a [OA 2.2] amène, doux | gentle, mild | mild — [EG 2] **mild**, ~e.

mili' - mil, millet | millet | Hirse | просо | proso. {BOT} — [RE].

miliard' [OA 1] * milliard | thousand millions | Milliarde | милліардъ | miljard. — [EG 2].

miligram-o [OA 2.1] {MEZ} — [Beau] milligramme.

milimetr-o [OA 2.1] {MEZ} — [Beau] millimètre.

miliono — Tiu ĉi urbo havas milionon da loĝantoj [FE 14.3, mankas en UV]. — **milion-o** [OA 2.1] — **milion'** (2) {deklarita Fundamenta per} [OA 7].

milit' - guerroyer | fight | Krieg führen | воевать | wojować. — **militi** - guerroyer | fight | Krieg führen | воевать | wojować [FE 34]. — [AK] {en} make war.

● **militistaro** — Nia lando venkos, ĉar nia militistaro estas granda kaj brava [FE 34.12]. Antaŭ nia militistaro staris granda serio da pafilegoj [FE 38.11]. La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj [FE 39.14].

● **al'milit'** - conquérir | conquer | erobern | завоевывать | zawojować.

milv-o [OA 2.2] (*zool.*) milan | kite | Weih {ZOO} — [EG 2].

mimik' [OA 1] * mimique | mimicry | Mimik | мимика | mimika. — [EG 2].

mimoz-o [OA 2.1] {BOT} — [EG 2].

min' - mine, minière | mine | Mine | мина (пороховая) | mina. — [AK] mine, fosse | mina (podkop). — [RE].

minac' - menacer | menace, threat | drohen | грозить | grozić. — [AK] {en} menace, threaten. — [RE].

minaret' [OA 1] minaret | minaret | Minaret | минаретъ | minaret. {ARKI} {RELI} — [EG 2].

mineral' [OA 1] * minéral | mineral | Mineral | минералъ | minerał. — [RE].

mineralog' (2) [OA 7] — [GD].

mineralogi-o [OA 2.1] — [RE].

miniatur' [OA 1] * miniature | miniature | Miniatur | миньятюра | minjatura. — [Beau].

Minimum' [OA 3.2] {en} minimum | {fr} minimum | {de} Minimum, Mindeswert {pres-eraro, legu: Mindestwert} | {es} minimum | {pt} minimum {estu: mínimo} | {it} minimum, minimo | {pl} --- {traduko mankas}. — [Beau].

ministeri/o. [OA 8] Tuto de la oficejoj kaj oficistoj de iu ministra fako, kaj domego, kie ili troviĝas. — A. ministry (pol.), F. ministère, G. Ministerium, H. {es} ministerio, I. {it} ministero, P. {pt} ministério. — [PV] {ne ĉe Z; antaŭe ministr'ej'o}.

ministr' [OA 1] * ministre | minister (of state) | Minister | министръ | minister. — [DL]: *La politiko de nia ministro montras, ke li estas bona diplomatiisto* [DL 7.16]. [RE].

minus. [OA 8] Konjunkcio kaj adverbo, indikanta resp. subtrahon aŭ negativan nombron. — A. minus; F. moins (math.); G. weniger, minus; H. {es} menos; I. {it} meno; P. {pt} menos. {MAT} — [EG 2] minuso.

minuskl/o. [OA 9] Malĉeflitero, etlitero. Tia litervarianto (en kelkaj alfabetaj skribosistemoj), kiu estas uzata en ĉiuj ordinaraj okazoj (en kiuj oni ne uzas majusklon), ekz. a, b, c, ĉ. (La malo estas majusklo.) — [GD 1955] une minuscule.

● **minuskl/a** **1** Skribita per minusklo(j); rilata al minusklo(j). **2** (en paleografio kaj tipografio, pri signaro) Tia, ke ne ĉiu signobildo estas skribebla inter du paralelaj horizontaloj: *minuskla signaro*; *minusklaj ciferoj*; *minuskla skribo Karolida*.

minut' - minute | minute | Minute | минута | minuta. {MEZ} — **minuto** - minute | minute | Minute | минута | minuta [FE 12]. — [DL]. [RE]. — Sesdek minutoj faras unu horon, kaj unu minuto konsistas el sesdek sekundoj [FE 12.12]. En la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis du pafojn [FE 40.1].

miogal' - rat musqué | musk-rat | Bisamspitzmaus | выхухоль | piźmoszczur {ZOO}. — [AK] Bisamratte. — [RE].

miop' - myope | short-sight | kurzsichtig | близорукій | krótkowzroczny. — [AK] {en} short-sighted {kun streketo}. — [RE].

miozot' - myosotis | forget-me-not | Vergissmeinnicht | незабудка | niezapominajka {BOT}. — [RE].

mir' - s'étonner, admirer | wonder | sich wundern | удивляться | dziwić się. — **miri** - s'étonner, admirer | wonder | sich wundern | удивляться | dziwić się [FE 17]. — [AK] s'étonner. — [UL]. — Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro ... tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2].

● **miro** — „Kion mi vidas!" diris ŝia patrino kun grandega miro [FE 17.4].

mirabel-o [OA 2.1] {BOT} — [EG 2].

miraĝ/o [OA 9] **1** Optika fenomeno kaŭzanta tian iluzion, ke malproksimaj objektoj ŝajnas proksimaj pro devojigo de lumo trairanta varman aertavolon: *la ŝajna lago en la dezerto estis miraĝo*. **2** (figure) Alloga iluzio. — [GD 1955] mirage.

mirakl' [OA 1] * miracle | miracle | Mirakel {2012: Mirakel (ark.)}, Wunder(werk) | чудо | cud. — [Beau].

mirh' - mirrhe | myrrh | Myrrhe | миppa | myrra. — [RE].

miriad' [OA 1] * myriade | myriad | Myriade | мирiада | mirjada. — [RE].

miriametr-o [OA 2.1] — [EG 2] Myriameter.

mirt' - myrte | myrtle | Myrthe | мирта | myrta. — [RE].

mirtel' - airelle, myrtille | bilberry | Heidelbeere | черника | czarna jagoda {BOT}. — [RE].

mis- [1929] Erar', malĝust', malbon'. — **Rim.**: AV komentas: „Laŭ neoficiala parto de Aktoj de la Akademio 1963-1967 (paĝo 8) la elemento MIS/ (prefikso) apartenas al 4OA. Sed en 4OA tamen ne menciiĝas MIS/. Efektive MIS/ estis aldonita al UV aparte en la sama jaro, en kiu aperis 4OA, la jaro 1929. La rezultoj de la apartaj voĉdonoj pri 4OA kaj pri MIS/ eĉ estis anoncitaj en la sama cirkulero: "Akademio kaj Lingva Komitato – Rezultato de la diversaj balotoj – Majo 1929". La prefikso MIS/ do ja estas oficiala, sed ĝi ne apartenas al 4OA."

misi' - mission | mission | Mission | миссія | misya. — [RE].

mister' - mystère | mystery | Mysterium | таинство | misterya. — [AK] тайна | tajemnica, misterjum. — [RE].

● **mister'a** - mystérieux | mysterious | geheimnissvoll {2012: geheimnisvoll} | таинственный | tajemniczy.

mistifik/i. [OA 8] Ŝerctrompi iun, trouzante lian kredemon. — A. to hoax, to fool; F. mystifier, berner; G. mystifizieren, foppen, zum besten halten; H. {es} ambaucar {pres-eraro, legu: embaucar}, engañar, mofar, (mixtificar, mistificar); I. {it} corbellare, turlupinare; P. {pt} mistificar, burlar, ludibriar. — [RE]. [PV] mistif/i.

mistik-a [OA 2.1] — [EG 2].

mit' [OA 1] mythe | myth | Mythe {2012 pli kutima: Mythos} | миѳъ {de 1918: миф} | mit. — [RE].

mitolog' (1) [OA 7]

mitologi' [OA 1] * mythologie | mythology | Mythologie | миѳологія {de 1918: мифология} | mitologja. — [Beau].

mitr' [OA 1] mitre | mitre | Mitra | митра | mitra. — [EG 2].

mitul-o [OA 2.2] moule (*zool.*) | mussel | Miesmuschel {ZOO} — [Beau]. [EG 2].

mizer' - misère | distress, misery | Noth | нужда | nędza. — [UL].

mo [OA 7] = nomo de la litero m, deksepa litero de la Esperanta alfabeto

mobiliz' [OA 1] mobiliser | mobilise | mobilisieren | мобилизировать | mobilizować. — [Beau]. [EG 2].

mod' - mode | mode | Mode, Modus (gramm.) | мода, наклоненіе | moda, tryb. {GRAM} — [AK] {en} fashion, mood (gram). — [1888]. [RE].

model' - modèle, spécimen | model | Muster | образецъ | model. — [AK] Modell, Muster. — [RE].

modem/o. [OA 9] Aparato, kiu transformas ciferecan signalon (ekz. de komputilo) en analogan aŭ inverse, por transsendo per telefona reto, radio, elektra reto aŭ simile: *konekti komputilon al la Interreto per modemo*. {KOMP} — [PIVS 1987]. — **Rim.**: Akronimo de angla ***mo**dulator-**dem**odulator*; la angla nocio estas uzata de 1958.

moder' - modéré | moderate | mässig {legu: mäßig} | умѣренный | umiarkowany. — [UL].

modern' [OA 1] moderne | modern | modern | современный | współczesny. — [Beau].

modest' - modeste | modest | bescheiden | скромный | skromny. — [UL].

Modif' [OA 3.2] {en} to modify | {fr} modifier | {de} modifizieren | {es} modificar | {pt} modificar | {it} modificare | {pl} modyfikowac {legu: modyfikować}. — [EG 2] modifizieren.

modul' [OA 1] moduler | modulate | modulieren | модулировать | modulować. — [Beau].

mok' - se moquer | mock | spotten | насмѣхаться | szydzić. — [AK] {en} mock, ridicule. — [RE].

mol' - mou | soft | weich | мягкій | miękki. — **mola** - mou | soft | weich | мягкій | miękki [FE 33]. — **mol'** - mou | мягкій [UV aĵ'] — **mola** - mou | мягкій [FE 25 aĵ']. — [UL].

● **mole** — Mó-le [FE 3].

● **mol'aĵ'** - partie molle d'une chose | мякишъ [UV aĵ']. — **molaĵo** - partie molle d'une chose | мякишъ [FE 25 aĵ'].

● **malmola** — Tiu ĉi malfreŝa pano estas malmola, kiel ŝtono [FE 33.5].

● **mol'anas'** - canard à duvet | eider-duck | Eiderente | rara | miękopiór [= UV anas'].

molekul' [OA 1] molecule | molecule | Molekul | молекула | molekuła. — [EG 2].

molusk' [OA 1] mollusque | mollusc | Molluske | моллюскъ | mięczak. — [EG 2].

moment' - moment | moment | Augenblick | мгновеніе | chwila, moment. — [RE].

mon' - argent (monnaie) | money | Geld | деньги | pieniądze. — **mono** - argent (monnaie) | money | Geld | деньги | pieniądze [FE 14]. — [UL]. — Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; due mi dankas vin por la prunto; trie mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon [FE 14.6]. Mono havata estas pli grava ol havita [FE 22.12]. La riĉulo havas multe da mono [FE 37.19]. Li donis al mi monon, sed mi ĝin tuj redonis al li [FE 42.4].

● **monero** — Centimo, pfenigo kaj kopeko estas moneroj [FE 41.15].

● **monujo** — En la poŝo de mia pantalono mi portas monujon, kaj en la poŝo de mia surtuto mi portas paperujon [FE 40.18]

monaĥ' - moine | monk, friar | Mönch | монахъ | zakonnik. {RELI} — [RE]. [1888] monk'.

monarĥ' - monarque | monarch | Monarch | монархъ | monarcha. — [RE]. — [OA 8] II.A.1. La ses formoj: alkemio, arkaismo, arkitekturo, kemio, mekaniko kaj monarko estas oficialigitaj kiel paralelaj al la Oficiala alĥemio kaj al la Fundamentaj arĥaismo, arĥitekturo, ĥemio, meĥaniko kaj monarĥo.

monark/o. [OA 8] Moderna formo de: monarĥo. — A. monarch, F. monarque, G. Monarch, H. {es} monarca, I. {it} monarca, P. {pt} monarca. — [PV]. — [OA 8] II.A.1. La ses formoj: alkemio, arkaismo, arkitekturo, kemio, mekaniko kaj monarko estas oficialigitaj kiel paralelaj al la Oficiala alĥemio kaj al la Fundamentaj arĥaismo, arĥitekturo, ĥemio, meĥaniko kaj monarĥo. — **Rim.**: AV komentas: „Laŭ Ockey en "Akademia Vortaro-Radikaro" iaspeca decido pri la elementoj ARKITEKTUR/ kaj MONARK/ estis farita en la jaro 1922. Ambaŭ elementoj estis aldonitaj en 8OA. Ankoraŭ ne estas eltrovite, kio efektive okazis rilate al tiuj elementoj en 1922. Supozeble temas pri decido pri uzado de K anstataŭ Ĥ post R, kaj ne pri efektiva aldono al UV de ARKITEKTUR/ kaj MONARK/. Ĉi tie [= en AV] do ARKITEKTUR/ kaj MONARK/ aperas kun indiko pri 8OA."

monarki/o, (monarĥi/o). [OA 8] Reĝimo de regno regata de monarĥo (monarko) kaj tia regno: *absoluta, konstitucia, demokratia ~o*. — A. monarchy, F. monarchie, G. Monarchie, H. {es} monarquía, I. {it} monarchia, P. {pt} monarquía {legu: mornarquia}. — [PV]. — [OA 8] II.A.1. Estas oficialigitaj la du jenaj duformaj vortoj: mekanismo / meĥanismo kaj monarĥio / monarkio.

monat' - mois | month | Monat | мѣсяцъ | miesiąc. {MEZ} — **monato** - mois | month | Monat | мѣсяцъ | miesiąc [FE 12]. — [UL]. — Januaro estas la unua monato de la jaro, Aprilo estas la kvara, Novembro estas la dek-unua, Decembro estas la dek-dua [FE 12.13]. Li fianĉiĝis kun fraŭlino Berto; post tri monatoj estos la edziĝo; la edziĝa soleno estos en la nova preĝejo, kaj la edziĝa festo estos en la domo de liaj estontaj bogepatroj [FE 39.3].

mond' - monde, univers | world | Welt | міръ, свѣтъ | świat. — **mondo** - monde | world | Welt | міръ | świat [FE 22]. — [AK] monde. — [UL]. — Venu, ni atendas vin, Savonto de la mondo [FE 22.9]. En la lingvo „Esperanto" ni vidas la estontan lingvon de la tuta mondo [FE 22.10].

● **tutmonda** (= de la tuta mondo) [FE 27.6].

moned' - choucas | jack-daw, chough | Dohle | галка | kawka. {ZOO} — [RE].

monogram-o [OA 2.1] — [RE].

monolog' [OA 1] * monologue | monologue | Monolog | монологъ | monolog. — [RE].

monomani-o [OA 2.1] {MED} — [EG 2] (med.) Monomanie.

monopol' [OA 1] monopole | monopoly | Monopol | монополія | monopol. — [RE].

monoteism-o [OA 2.1] {RELI} — [EG 2] Monotheismus.

MONOTONA [OA 6.1] 1-e: *Unutona;* 2-e: *Enuiga kaŭzo de manko de diverseco* | {en} monotonous | {fr} monotone | {de} eintönig | {es} monotono | {it} monotono | {pl} monotonny. — [Mart]. [Verax].

monstr' - monstre | monster | Ungeheuer | чудовище | potwór, monstrum. — [RE].

mont' - montagne | mountain | Berg | гора | góra. {GEO} — **monto** - montagne | mountain | Berg | гора | góra [FE 33]. — [UL]. — Li staras supre sur la monto kaj rigardas malsupren sur la kampon [FE 33]. Tiu ĉi granda altaĵo ne estas natura monto [FE 35]. La alteco de tiu monto ne estas tre granda [FE 35]. En nia lando sin ne trovas montoj, sed nur montetoj [FE 38].

montr' - montrer | show | zeigen | показывать | pokazywać. — **montri** - montrer | show | zeigen | показывать | pokazywać [FE 18]. — [AK] show (*vb*.). — [UL]. — Al ĉiu, kiu montros al mi ian nebonan esprimon en la Fundamenta libro, mi respondos trankvile: jes, ĝi estas eraro, ... [A 4.7]. Mi montris en principo, kiamaniere la severa netuŝebleco de la « Fundamento » gardos ĉiam la unuecon de nia lingvo, ... [A 9.1]. — Montru al ili vian novan veston [FE 18.11]. La infano serĉis sian pupon; mi montris al la infano, kie kuŝas ĝia pupo [FE 18.18]. ... la vortoj „ĝardenon", „tablon" staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en" kaj „sur" tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri, ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo (ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado); en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon „n" tute egale ĉu ia prepozicio starus aŭ ne [FE 28.3]. Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion „je" [FE 29.1]. Se ni aldonas la literon „t", ni ricevas vortojn montrajn: tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu [FE 30.4]. Aldonante al la vortoj montraj la vorton „ĉi", ni ricevas montron pli proksiman [FE 30.7]. „Da" post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro [FE 32.14].

● **montrita** — La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ... [FE 30.2].

● **montriĝi** — aŭtoritata komitato, ..., havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj [A 1.2].

● **montro** — Aldonante al la vortoj montraj la vorton „ĉi", ni ricevas montron pli proksiman [FE 30.7].

monument' - monument | monument | Denkmal | памятникъ | pomnik. — [RE].

mops' - mopse | pug-dog | Mops | мопсъ | mops. {ZOO} — [AK] {fr} doguin, carlin, roquet. — [RE]. [Beau] doguin.

mor' - mœurs | habit | Sitte | нравъ, обычай | zwyczaj, obyczaj. — [AK] {en} custom, usage. — [RE].

moral' [OA 1] * moral | moral | moralisch | нравственный | moralny. — [DL-Ald].

morbil' - rougeole | measles | Masern | корь | odra {MED}. — [RE].

mord' - mordre | bite | beissen | кусать | kąsać. — [UL].

● **mord'et'** - ronger | gnaw | nagen | грызть | gryźć.

morfin' [OA 1] morphine | morphia | Morphium | морфій | morfina. {FARM} — [Beau].

morgaŭ - demain | to-morrow | morgen | завтра | jutro. — **morgaŭ** - demain | to-morrow | morgen | завтра | jutro [FE 20]. — [UL]. — ... trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, kaj li perdus sian konfidon kaj apogon [A 4.6]. — Hodiaŭ estas sabato, kaj morgaŭ estos dimanĉo [FE 20.4]. Morgaŭ mi veturos Parizon (aŭ en Parizon) [FE 28.4].

● **postmorgaŭ** — Hieraŭ estis vendredo, kaj postmorgaŭ estos lundo [FE 20.5].

mort' - mourir | die | sterben | умирать | umierać. — **morti** - mourir | die | sterben | умирать | umierać [FE 20]. — **mort'** mourir [UV ig]. — **morti** - mourir [FE 13 ig]. — [UL] {identa al UV, krom angla „to die"}. — Morti pro la patrujo estas agrable [FE 20.23]. ... kaj la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro [FE 23.4]. La pastro, kiu mortis antaŭ nelonge (aŭ antaŭ nelonga tempo), loĝis longe en nia urbo [FE 25.12]. Lia filo mortis kaj estas nun malviva [FE 31.5]. Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu; ... [FE 39.11].

● **morta** — La korpo estas morta, la animo estas senmorta [FE 31.6].

● **morte** — Li estas morte malsana, li ne vivos pli, ol unu tagon [FE 31.7].

● **morto** — ... ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus la komenco de nia morto [A 1.5]. — Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu; ... [FE 39.11].

● **mort'ig'** - tuer (faire mourir) [UV ig]. — **mortigi** - tuer (faire mourir) [FE 13 ig]. — Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu; ... [FE 39.11].

● **mortiĝi** — ... unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn

de veturanta vagonaro kaj mortiĝis [FE 39.11]. — [DL 1888]: *Mirinda estas la historio de lia familio: la avo mortis je ia nekomprenebla malsano, ...; la avino mortigis sin mem en atako de malprudento; la patro elfalis el fenestro de tria etaĝo kaj mortiĝis; la patrino estis mortigita de ŝia propra servantino* [DL 13.9].

● **senmorta** — La korpo estas morta, la animo estas senmorta [FE 31.6]. — [DL 1888]: *La religio diras, ke la animo estas nemortema, kvankam la korpo estas mortema* [DL 11].

morter' - mortier | mortar | Mörtel | замазка | zaprawa (wapienna). — [MV].

moru-o [OA 2.2] morue, cabillaud | codfish | Kabeljau {ZOO} — [RE].

morus' – mûre {de 1990: mure} | mulberry | Maulbeere | тутовая ягода | morwa. {BOT} — [RE].

mosk' [OA 1] musc | musk | Moschus | мускусъ | piżmo. — [EG 2].

moske' [OA 1] * mosquée | mosque | Moschee | мечеть | meczet. — [EG 2].

moskit/o. [OA 8] Komuna nomo por pikantaj dipteraj insektoj, precipe el la familio de kuledoj. — A. mosquito; F. moustique; G. Moskito, Stechmücke, Schnake; H. {es} mosquito; I. {it} zanzara; P. {pt} mosquito, pernilongo. {ZOO} — [EG 2].

most' – moût {de 1990: mout} | must | Most | виноградный морсъ | moszcz. {KUIR} — [MV].

moŝt' - titre commun; ex. vi'a reĝ'a moŝt'o votre majesté, vi'a general'a moŝt'o monsieur le général, vi'a episkop'a moŝt'o etc. | universal title; e. g. vi'a reĝ'a moŝt'o your majesty; vi'a moŝt'o your honor | allgemeiner Titel; z. B. vi'a reĝ'a moŝt'o Eure Majestät, vi'a general'a moŝt'o etc. | общій титулъ; напр. vi'a reĝ'a moŝt'o Ваше Величество; vi'a general'a moŝt'o и т.п. | Mość. — **moŝto** - titre commun | universal title | allgemeiner Titel | общій титулъ | Mość [FE 42]. — [UL]. — El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; la dua: al Lia Grafa Moŝto, Sinjoro P.; la tria: al Lia Moŝto, Sinjoro D. [FE 42.8]. — [DL 1888]*: La leteron mi adresis: al lia moŝto sinjoro N.en N.N. Via barona moŝto, helpu min en mia mizero!* [DL 16]. — Kp. Eminenc' [OA 3.2].

● **episkop'a moŝt'o** - [UV moŝt']

● **general'a moŝt'o** - vi'a general'a moŝt'o - monsieur le général [UV moŝt']

● **Grafa Moŝto** — El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; la dua: al Lia Grafa Moŝto, Sinjoro P.; la tria: al Lia Moŝto, Sinjoro D. [FE 42.8].

● **reĝ'a moŝt'o** - vi'a reĝ'a moŝt'o - votre majesté | your majesty | Eure Majestät | Ваше Величество [UV moŝt']

motiv' [OA 1] motif, raison | motive | Motiv, Grund | мотивъ {de 1918: мотив} | motyw. — [Cart 1903]. [EG 2].

motor' [OA 1] * moteur | motor | Motor | двигатель | motor. — [EG 2].

mov' - mouvoir | move | bewegen | двигать | ruszać. — **movi** - mouvoir | move | bewegen | двигать | ruszać [FE 22]. — [UL]. — ... vaporŝipo (= ŝipo, kiu sin movas per vaporo) [FE 27.6].

● **senmove** — Fluanta akvo estas pli pura, ol akvo staranta senmove [FE 22.1].

mozaik-o [OA 2.1] — [RE]. [Beau] mosaïque.

muel' - moudre | mill | mahlen | молоть | mleć. — [AK] {en} grind, mill. — [EG 2].

muf' - manchon | muff | Muff | муфта | mufka. {VEST} — [RE].

muĝ' - mugir | rush | brausen, zischen | шипѣть {de 1918: шипеть} | burzyć się, wrzeć. — [AK] roar (*wind, etc.*) | brausen, brüllen | huczeć, ryczeć. — [RE]. [Beau] **muĝ**, mugir (le vent, la tempête, les flots).

muk' - pituite, glaire | slime | Schleim | слизь | śluz. — [AK] {en} mucus. — [RE].

mul' - mulet | mule | Maulesel | мулъ | muł {ZOO}. — [1888]. [UV].

muld/i [OA 9] **1** Fari objekton enpremante aŭ fluigante molan substancon en ujon, kiu havas la deziratan formon: *muldi medalon*; *muldi plastajn telerojn*; (figure) *muldi pensmanieron*. — [PV 1930]. **2** Reprodukti la formon de io per mola substanco, kiun oni poste malmoligas kiel ujon (por ebligi muldi *1*): *muldi per gipso vizaĝon*; *muldi reliefon*. — [EV 1923] ~o {substantivo}. **muld-i 1.** (ein)formen (durch e. Form negativ reproduzieren); [**2.** = verŝfari;] vgl. modeli.

mult' - beaucoup, nombreux | much, many | viel | много | wiele. — **multe** - beaucoup, nombreux | much, many | viel | много | wiele [FE 12]. — [UL]. — Du homoj povas pli multe fari ol unu [FE 12]. ... la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte

neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro [FE 23]. Sur la arbo sin trovis multe (aŭ multo) da birdoj [FE 32]. La riĉulo havas multe da mono [FE 37].

● **multa** — El ŝiaj multaj infanoj unuj estas bonaj kaj aliaj estas malbonaj [FE 12]. Kiam oni estas riĉa (aŭ riĉaj), oni havas multajn amikojn [FE 16]. Multaj birdoj flugas en la aŭtuno en pli varmajn landojn [FE 32]. Li venigis al si el Berlino multajn librojn [FE 39]. Lia hieraŭa parolo estis tre bela, sed la tro multa parolado lacigas lin [FE 40.6].

● **multo** - Sur la arbo sin trovis multe (aŭ multo) da birdoj [FE 32]. Kiam mi ien veturas, mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo [FE 35].

● **multego** - La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi, kaj, dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj [FE 17].

● **malmulta** — La sufikso «um» ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun «um» oni devas lerni, kiel simplajn vortojn [FE 42].

● **multekosta** - “Mi faras al vi donacon,” daŭrigis la feino, “ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono.” [FE 15.7].

● **plimulte** - Ne riproĉu vian amikon, ĉar vi mem plimulte meritas riproĉon; li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto [FE 22].

— **Lingva Respondo 1890 [Pri “multe da” kaj “multa”]**: La formoj “multe da laboro” kaj “multa laboro” estas egale bonaj. Egale bonaj ankaŭ estas la esprimoj “mi konas tiom homojn” kaj “mi konas tiom da homoj”, sed ne bone estus diri “mi konas tiom da homojn”, ĉar en la lasta esprimo la formo “homoj” dependas ne de la vorto “konas”, sed de la prepozicio “da”, kiu ne postulas la akuzativon. [*La Esperantisto*, 1890, p. 60].

— Lingva Respondo 1893 [Pri “multe da” kaj “multa”]: Estas diferenco inter “multaj homoj” kaj “multe da homoj”: “multaj homoj” = diversaj homoj (ĉiu aparte); “multe da homoj” = granda nombro da homoj (kune). [*Esperantisto*, 1893, p. 96].

multiplik/i. [OA 8] Fari ~on, t.e. el du nombroj A kaj B, nomataj ~ato kaj ~anto, ricevi trian P nomatan produto; la produto P de la du entjeroj A kaj B estas la adicio de B nombroj, ĉiuj egalaj al A. — A. to multiply, F. multiplier (math.), G. multiplizieren, H. {es} multiplicar (mat.), I. {it} moltiplicare (mat.), P. {pt} multiplicar (mat.). {MAT} — [EG 2] multiplizieren.

mumi’ [OA 1] momie | mummy | Mumie | мумія | mumja. — [RE]. [Beau] **mum**, momie {*mum* sen -i-, ĉu eble preseraro?}.

munici’ [OA 1] munition | ammunition | Munition | аммуниція | amunicja. {MIL} — [EG 2].

Munt-i, [OA 4] {fr} monter (mécan., joaill.) | {en} to mount, fit up (machinery, apparatus), set (jewellery) | {de} aufstellen (eine Maschine), montieren, fassen (einen Edelstein) | {it} montare, mettere in opera | {es} montar (mec. joy.) | {pt} montar | {ca} muntar | fiksi la diversajn pecojn de aparato au maŝino, enfiksi juvelŝtonon. {TEK} — [EG 2] montieren.

mur’ - mur | wall | Wand | стѣна | ściana. — [UL]. — **Rim.**: Kp. **vand/o**. [OA 9]. La germana distingas inter *Mauer* (ekstera) kaj *Wand* (interna).

Murd-i, [OA 4] {fr} assassiner | {en} to murder, kill unlawfully | {de} morden | {it} assassinare, ammazzare | {es} asesinar, matar | {pt} assassinar, matar | {ca} assassinar, matar | krime mortigi homon laŭ antaŭa intenco. {JUR} — [PV].

murmur’ - murmurer, grommeler | murmur | murren, brummen | ворчать | mruczeć. — **murmuri** - murmurer, grommeler | murmur | murren, brummen | ворчать | mruczeć [FE 19]. — [AK] murmeln, brummen | бормотать. — [UL].

● **murmurante** - La filino iris, sed ĉiam murmurante [FE 19.3].

mus’ - souris | mouse | Maus | мышь | mysź. {ZOO} — **muso** - souris | mouse | Maus | мышь | mysź [FE 26]. — [RE]. — El sub la kanapo la muso kuris sub la liton, kaj nun ĝi kuras sub la lito [FE 26.9].

muŝ’ - mouche | fly (a) | Fliege | муха | mucha. {ZOO} — [UL].

musk’ - mousse (la) | moss | Moos | мохъ | mech. {BOT} — [RE].

muskat’ - muscade | nutmeg | Muskatnuss | мушкатный орѣхъ | orzech muszkatałowy. {BOT} — [RE].

muskol’ - muscle | muscle | Muskel | мускулъ | mięsień, muskuł. {ANAT} — [RE].

muslin’ - mousseline | muslin | Nesseltuch | кисея | muślin. — [AK] Musselin, Nesseltuch. — [RE].

mustard' - moutarde | mustard | Senf | горчица | musztarda {KUIR}. — [RE].

mustel' - martre | marten | Marder | куница | kuna. {ZOO} — [AK] martre, belette | weasel, marten. — [RE].

mut' - muet | dumb | stumm | нѣмой | niemy. — **muta** - muet | dumb | stumm | нѣмой | niemy [FE 20]. — [RE]. — Ĉu vi estas surda aŭ muta? [FE 20.14].

muz' [OA 1] muse | muse | Muse | муза | muza. — [RE].

muze' [OA 1] musée | museum | Museum | музеомузей | muzeum. — [Beau].

muzel/o. [OA 8] Elstara parto de la kapo de tiuj bestoj, ĉe kiuj la nazo kaj buŝo elpintiĝas el la vizaĝo: *~o de hundo, de kato, de ezoko*. — A. muzzle, snout (of animals, fish); F. museau, mufle, groin, boutoir; G. Schnauze, Maul; H. {es} hocico, morro, jeta; I. {it} muso, ceffo; P. {pt} focinho. {ANAT} — [PVS] {ne ĉe Z}.

muzik' – [UV not'] — **muzik'** [OA 1] * musique | music | Musik | музыка | muzyka. — **muzik/o** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 8]. — [RE] Музыка.

● **not'o (muzik'a)** - note (de musique) | note (mus.) | Note (Mus.) | нота | nuta [UV not'].

N

Nn - n | n as in "now" | n | н | n [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **no** ... [FE 1]. — **no** [OA 7] = nomo de la litero **n**, dekoka litero de la Esperanta alfabeto. — Lingva Respondo 56 (1893) [Pri la nomoj de la literoj]: La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

n - marque l'accusatif ou complément direct et le lieu oŭ l'on va | ending of the objective, also marks direction | bezeichnet den Accusativ {de 1901: Akkusativ}, auch die Richtung | означаетъ винительный падежъ, также направленіе | oznacza biernik, również kierunek. — **n** - marque l'accusatif ou complément direct | ending of the objective | bezeichnet den Accusativ {de 1901: Akkusativ} | означаетъ винительный падежъ | oznacza przypadek czwarty [FE 6]. — **n** - marque l'accusatif et le lieu ou oŭ l'on va | ending of the objective, also marks direction towards | bezeichnet den Accusativ {de 1901: Akkusativ}, auch die Richtung | означаетъ винит. падежъ, а также направленіе | oznacza przypadek czwarty, również kierunek [FE 13]. — **n** - La langue n'a que deux cas: le nominatif et l'accusatif. Ce dernier se forme du nominatif par l'addition d'un n. | There are two cases: the nominative and the objective (accusative). The root with the added o is the nominative, the objective adds an n after the o. | Es gibt nur zwei Fälle: Nominativ und Akkusativ; der letztere entsteht aus dem Nominativ, indem die Endung n hinzugefügt wird. | Падежей есть только два: именительный и винительный; послѣдний получается изъ именительнаго прибавленіемъ окончанія n. | Przypadków jest dwa: mianownik (nominativus) i biernik (accusativus); ten ostatni powstaje z mianownika przez dodanie zakończenia n [FG 2.3]. — [UL].

— **Lingva Respondo 1890 [Pri la akuzativo]**: Tuŝante la akuzativon mi povas al vi doni la jenan konsilon: uzu ĝin ĉiam nur en tiuj okazoj, kie vi vidas ke ĝi estas efektive necesa; en ĉiuj aliaj okazoj, kie vi ne scias, ĉu oni devas uzi la akuzativon aŭ la nominativon — uzu ĉiam la *nominativon*. La akuzativo estas enkondukita nur el neceso, ĉar sen ĝi la senco ofte estus ne klara; sed ĝia uzado en okazo de nebezono pli multe malbeligas la lingvon ol la neuzado en okazo de bezono. [*La Esperantisto*, 1890, p. 27].

— Lingva Respondo 1892 [Pri la akuzativo]: La akuzativo en nia lingvo neniam dependas de la antaŭiranta prepozicio (ĉar la prepozicioj per si mem neniam postulas ĉe ni la akuzativon), sed nur de la *senco*. La akuzativon ni uzas nur en tri okazoj:

a) por montri la suferanton de la faro (t.e. post verboj havantaj sencon aktivan), ekzemple "mi batas *lin"*, "mi diras la *vorton"*;

b) por montri direkton (t.e. movadon *al* ia loko, en diferenco de movado *sur* ia loko), se la prepozicio mem tion ĉi ne montras; ekzemple, ni diras "mi venas al la celo" (ne "al la celon"), ĉar "al" mem jam montras

direkton, sed ni devas diferencigi inter “mi amas iri en la *urbo*” kaj “mi amas iri en la *urbon”* (aŭ simple “iri la *urbon*”) laŭ tio, ĉu mi amas iri sur la stratoj de la urbo aŭ ĉu mi amas iri el ekstere en la urbon (“iri al la urbo” signifas nur aliri, sed ne eniri);

c) en ĉiuj okazoj, kiam ni ne scias, kian prepozicion uzi, ni povas uzi la akuzativon anstataŭ la prepozicio “je” ekzemple en la esprimo “mi kontentiĝas tion ĉi” la akuzativo ne dependas de la verbo “kontentiĝas” sed anstataŭas nur la forlasitan prepozicion “je” (= mi kontentiĝas je tio ĉi). [*Esperantisto*, 1892, p. 62].

— Lingva Respondo 1906 [Pri la akuzativo]: En la ekzemploj, kiujn vi citis, la diferenco inter akuzativo kaj nominativo ne estas granda, kaj ofte ambaŭ formoj estas egale bonaj. Sed ĝenerale mi tenas min je la sekvanta principo: mi vidis lin *grandan* = mi vidis lin, kiu estis granda (aŭ kiam li estis granda); mi vidis lin *granda* = mi vidis, ke li estas granda. Kian manon mi tenis sur la tablo? la manon *kuŝantan* (la duan manon, kiu ne kuŝis, mi eble tenis en la poŝo); kiel (aŭ en kia maniero) mi tenis mian manon? mi tenis ĝin kuŝanta sur la tablo. [*Lingvo Internacia*, 1906, p. 121].

— **Lingva Respondo 1908 [Pri la akuzativo post verboj de movo]**: Se la vorton “meti” (aŭ “ĵeti”, “fali” k.t.p.) sekvas substantivo aŭ pronomo kun la prepozicioj “antaŭ”, “post”, “inter” k.c., estus ordinare pli ĝuste uzi la substantivon aŭ pronomon en akuzativo, ĉar ni tie ordinare havas la sencon de direkto; ekzemple, “metu la korbon antaŭ la pordon”. Tamen ofte oni povas en tiaj okazoj uzi sen eraro ankaŭ la nominativon, se la senco de direkto koncernas ne la substantivon aŭ la pronomon, pri kiu ni parolas, sed ian alian vorton, kiun ni subkomprenas; ekzemple, oni povas tute bone diri “oni metis antaŭ *mi* manĝilaron”, komprenante sub tio: “oni metis antaŭ mi *sur la tablon* manĝilaron”. En tiaj okazoj oni povas egale bone uzi la nominativon aŭ la akuzativon, kaj ŝajnas al mi, ke decidi, ke oni en tiuj okazoj uzu ekskluzive nur la nominativon aŭ nur la akuzativon, ni ne bezonas. Se iam la libereco en tiu ĉi rilato fariĝos por ni tro ĝenanta, kaj la vivo mem ne decidos iom post iom tiun ĉi demandon, tiam ni proponos al la Lingva Komitato, ke ĝi donu al ni por tiu ĉi demando ian ekskluzivigan decidon.

Post “sidiĝi” ni povas egale bone uzi la akuzativon kaj la nominativon, depende de tio, ĉu ni volas esprimi *movon* aŭ komencon de nova *stato*. Tamen, ĉar la nominativo estas ĉiam pli simpla kaj pli facila, ol la akuzativo, tial ŝajnas al mi, ke estus bone, se ni alkutimiĝus en ĉiuj okazoj *dubaj* preferi la *nominativon*. [Respondo 41 a, *La Revuo*, 1908, Majo].

— **Lingva Respondo 1908 [Pri “al” anstataŭ akuzativo]**: Vd. ĉe „al“.

naci’ - nation | nation | Nation | нація, народъ | naród, nacya. — **nacio** - nation | nation | Nation | нація, народъ | naród, nacja [FE 27]. — [UL]

● **internacia** — EKZERCARO de la lingvo internacia « Esperanto » [FE titolo]. — In-ter-na-cí-a [FE 3, mankas en UV]. Internacia [FE 4]. — Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo. Ekzemploj: [...]; internacia (= kiu estas inter diversaj nacioj) [FE 27.5]. — UNIVERSALA VORTARO DE LA LINGVO INTERNACIA ESPERANTO [UV titolo]. Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enkonduko 1].

nadl/o. [OA 8] Pintforma metala vergeto elfarita por diversaj uzoj, sed ne por kudri. — A. needle, F. aiguille, G. Nadel, H. {es} aguja, I. {it} ago, P. {pt} agulha (téc.). {TEK} — [Verax] — **Rim.**: Ne ĉe Z. Antaŭe montri/il/o.

naft’ [OA 1] * naphte | naphtha | Naphta {2012: Erdöl, Naphta (ark.)} | нефть | nafta. — [LInt 5/1898] [EG 2].

naftalin-o [OA 2.1] — [EG 2].

naĝ’ - nager | swim | schwimmen | плавать | pływać. — **naĝi** - nager | swim | schwimmen | плавать | pływać [FE 35]. — [UL]

● **naĝanta** — La tuta supraĵo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj kreskaĵoj [FE 35.18].

naiva - naïf | naïve | naiv | наивный | naiwny [FE 17, mankas en UV]. — Li estas nelerta kaj naiva provincano [FE 37.10]. — **naiv’** [OA 1] * naïf | artless | naiv | наивный | naiwny. — **naiv’** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [LInt 2/1896] [Beau] naïf.

● **naive** — La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi [FE 17.8, mankas en UV].

● **naiveco** - Mi ridas je lia naiveco (aŭ mi ridas pro lia naiveco, aŭ: mi ridas lian naivecon) [FE 29.4, mankas en UV].

najbar' - voisin | neighbour | Nachbar | сосѣдъ | sąsiad. — **najbaro** - voisin | neighbour | Nachbar | сосѣдъ | sąsiad [FE 32]. — [UL] — Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj [FE 32.12].

najl' - clou | nail | Nagel | гвоздь | gwóźdź. — [RE]

najtingal' - rossignol | nightingale | Nachtigall | соловей | słowik. {ZOO} — [RE]

nan/o [OA 9] **1** Homo, kiu estas multe malpli alta ol normale (por la aĝo). **2** Besto aŭ vegetaĵo, kiu estas multe malpli granda ol normale. — [GD 1955] nain.

● **nan/a** **1** Rilata al nano. **2** Tre malalta/malgranda. — [EV 1923] = pigmea (bes. zool., bot.).

nanken' - nankin | nankeen, nankin | Nanking | нанка | nankin. — [RE]

nap' - chou-navet | cabbage | Kohlrübe | брюква | brukiew. {BOT} — [AK] navet | cabbage-turnip {kun streketo}. — [RE]

narcis' - narcisse | daffodil | Narcisse {2012: Narzisse} | нарцисъ | narcyz. {BOT} — [RE]

Narkot-i (trans.) [OA 4] {fr} {(trans.) mankas en Kajero II}, narcotiser | {en} to narcotize | {de} narkotisieren | {it} narcotizzare | {es} narcotizar | {pt} nacotisar {legu: narcotizar} | {ca} narcotitzar. — [EG 2] narkotisieren, betäuben. — **Rim.**: Kp. narkotik‘ [OA 1].

narkotik' [OA 1] * narcotique | narcotic | narkotisch | наркотическій | narkotyczny. — [E-isto 12/1894] [Beau] narkotik, narcotique (subs.). — **Rim.**: **1.** Kp. [EG 2] narkot/aĵ/o, narkotisches, betäubendes Mittel. [Verax] narkot/o. **2.** Kp. Narkot-i [OA 4].

nask' - enfanter, faire naître {de 1990: naitre} | bear, produce | gebären | рождать | rodzić. — **naski** - enfanter, faire naître {de 1990: naitre} | bear, produce | gebären | рождать | rodzić [FE 12]. — [UL] — Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos... [A 6.2].

● **nask'iĝ'** – naître {de 1990: naitre}, provenir | be born | entstehen | возникать | rodzić się. — [AK] geboren werden, entstehen | рождаться (возникать).

● **naskita** — Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua [FE 12.19]. Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita [FE 33.7].

● **du'nask'it'** - jumeau | twin | Zwilling | близнецъ | bliźnię. — Kp. ĝemelo [OA 4].

● **krist'nask'** - Noël | Christmas | Weihnachten | Рождество Христово | Boże Narodzenie [UV Krist'].

Nas-o [Z], [OA 4] {fr} nasse | {en} hoop-net | {de} Fischreuse | {it} nassa | {es} nasa (para pescar) | {pt} nassa (armadilha para peixes) | {ca} bertrol, nansa | konusforma korbo el salikaj vergetoj por kapti fiŝojn. — [EG 2] Reuse.

Natri-o, [OA 4] {fr} sodium | {en} natrium, sodium | Natrium | {it} sodio | {es} sodio | {pt} sódio | {ca} sodi. — [EG 2] Natrium.

natur' - nature | nature | Natur | природа | natura. — **naturo** - nature | nature | Natur | природа | przyroda [FE 35]. — [RE].

● **natura** — ... ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera [A 6.4]. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo [A 8.2]. — Tiu ĉi granda altaĵo ne estas natura monto [FE 35.10]. Mia onklo ne mortis per natura morto ... [FE 39.11].

Naturalism' [OA 3.2] {en} naturalism | {fr} naturalisme | {de} Naturalismus | {es} naturalismo | naturalismo | {it} naturalismo | {pl} naturalizm. — [Beau] naturalisme (philos.). — **Rim.**: Kp. [EG 1] naturalisto.

naŭ - neuf (9) | nine | neun | девять | dziewięć. — **naŭ** - 9 [FG 4.1]. — **naŭ** - neuf (9) | nine | neun | девять | dziewięć [FE 12]. — [UL] — Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; ... [FE 14.11]. La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ... [FE 30.2].

● **naŭdek** — Mil okcent naŭdek tri [FE 12.10].

naŭz' – dégoûter {de 1990: dégouter} | nauseate | Uebelkeit {legu: Übelkeit} erregen | тошнить | mdlić. — [RE].

nav' [OA 1] nef (arch.) | nave | Schiff {2012 ankaŭ: Kirchenschiff} | среднее пространство въ церкви | nawa. {ARKI} — [EG 2]

Navigaci' [OA 3.2] {en} navigation | {fr} navigation | {de} Schiffahrt {de 1996:

Schifffahrt}, Navigation | {es} navegacion {legu: navegación} | {pt} navigaçao {legu: navegação} | {it} navigazione | {pl} nawigacja. {MAR} — [EG 2] Navigation.

naz' - nez | nose | Nase | носъ | nos. — **nazo** - nez | nose | Nase | носъ | nos [FE 8]. — Ná-zo [FE 3]. — [UL] — Mi manĝas per la buŝo kaj flaras per la nazo [FE 8.10]. La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo [FE 33.4].

● **naz'um'** - pince-nez | pince-nez | Pince-nez, Nasenklemmer | пенсне | binokle.

ne - non, ne, ne... pas | no, not | nicht, nein | не, нѣтъ | nie. — **ne** - non, ne, ne ... pas | no, not | nicht, nein | не, нѣтъ | nie [FE 6]. — [UL] — Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, … [A 1.1]. … leĝodonanto por li ĉiam estos ne ia persono, sed ia klare difinita verko [A 3.2]. … li petas, ke la okuloj de ĉiuj esperantistoj estu ĉiam turnataj ne al li, sed al tiu ĉi libro [A 3.3]. … ĉio alia, … estas nur verkoj privataj, kiujn la esperantistoj — … — povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga [A 3.6]. … la legantoj ne miru … [A 4.2]. [Pliaj samspecaj ekzemploj en A, ne registritaj tie ĉi]. Ho, ne! [A 5.2] [A 6.3] … tiu perfektiĝado fariĝados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga rompado kaj ŝanĝado, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera [A 6.4]. … ne malhelpante tamen al la lingvo ne sole riĉiĝadi, sed eĉ konstante perfektiĝadi [A 9.1]. — Infano ne estas matura homo [FE 6.1]. La infano jam ne ploras [FE 6.2]. Al leono ne donu la manon [FE 7.3]. Aleksandro ne volas lerni, kaj tial mi batas Aleksandron [FE 9.7]. [Pliaj samspecaj ekzemploj en FE, ne registritaj tie ĉi]. La patro ne legas libron, sed li skribas leteron [FE 9.11]. — Ne, vi eraras, sinjoro: … [FE 10.17].

● **nei** — Né-i [FE 3].

● **neulo** — Ne-ú-lo [FE 3]. Neulo [FE 4].

● **nebona** - Al ĉiu, kiu montros al mi ian nebonan esprimon en la Fundamenta libro, mi respondos … [A 4.7].

● **nehela** — Ne-hé-la [FE 2].

● **ne/organik/a**. [OA 9] Rilata al ĉiuj substancoj aliaj ol la karbonkombinaĵoj: *neorganika ĥemio*. — [EV 1923] * (kemio), anorganisch(e Chemie).

● **nedisputebla** — por ĉiuj aŭtoritata kaj nedisputebla institucio [A 3.5]. … ia centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro [A 9.4].

● **neĝentila** — Knabo, vi estas neĝentila [FE 16.15]. — Sinjoro, vi estas neĝentila [FE 16.16]. — Sinjoroj, vi estas neĝentilaj [FE 16.17].

● **nekonata** — … en korespondado kun personoj nekonataj … [A 7.1].

● **nekorektite** — ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro … tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2].

● **nelerte** — … se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe [A 4.3].

● **nelonge** — La pastro, kiu mortis antaŭ nelonge (aŭ antaŭ nelonga tempo), loĝis longe en nia urbo [FE 25.12].

● **neoportuna** — Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon … [A 8.1].

● **netuŝebla** — li esperas, ke … ĉiuj … esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto [A 2.3]. Havante la karakteron de fundamento, la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti netuŝeblaj [A 4.1]. La fundamento devas resti severe netuŝebla … [A 4.4]. [Pliaj samspecaj ekzemploj en A, ne registritaj tie ĉi].

● **netuŝebleco** — … severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado … [A 1.3]. … perdinte la severan netuŝeblecon … [A 4.6]. [Pliaj samspecaj ekzemploj en A, ne registritaj tie ĉi].

● **ankoraŭ ne** — Ĉu vi jam trovis vian horloĝon? [FE 20.7] — Mi ĝin ankoraŭ ne serĉis; kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin jam ne trovos [FE 20.8].

● **ĉu ne** — ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman kapablon? [FE 17.10]

● **jam ne** — La infano jam ne ploras [FE 6.2]. La blanka papero jam ne kuŝas sur la tablo [FE 10.3]. Ĉu vi jam trovis vian horloĝon? [FE 20.7] — Mi ĝin ankoraŭ ne serĉis; kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin jam ne trovos [FE 20.8].

● **ne … sed** — La patro ne legas libron, sed li skribas leteron [FE 9.11].

● **ne sole …, sed eĉ** — … ne sole riĉiĝadi, sed eĉ konstante perfektiĝadi [A 9.1].

tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa [FE 27.3].

nebul' - brouillard | fog | Nebel | туманъ | mgła. {METEO} — [UL].

neces' - nécessaire | necessary | nöthig, nothwendig {de 1901: nötig, notwendig} | необходимій | niezbędny. — **necesa** - nécessaire | necessary | nothwendig {de 1901: notwendig} | необходимый | niezbędny [FE 27]. — [AK] potrzebny. — [UL]. — ... estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo [A 1.1]. ... havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj [A 1.2]. ... ĉar, perdinte la severan netuŝeblecon, la verko perdus sian eksterordinare necesan karakteron de dogma fundamenteco, ... [A 4.6]. — ... ĉar ĝi {la artikolo} estas oportuna sed ne necesa [FE 27.3].

● **necese** - Por ke ia regno estu forta kaj glora kaj povu sane disvolviĝadi, estas necese, ke ĉiu regnano sciu, ke li neniam dependos de la kapricoj de tiu aŭ alia persono, ... [A 3.1]. Tiel same por ke nia afero bone progresadu, estas necese, ke ĉiu esperantisto havu la plenan certecon, ke leĝodonanto por li ĉiam estos ne ia persono, sed ia klare difinita verko [A 3.2].

● **neceseco** - ... ni devas tion ĉi fari ne facilanime, sed nur en okazoj de efektiva neceseco [A 9.3];

● **neces'ej'** - cabinet d'aisance | privy | Abtritt | отхожее мѣсто | ustęp. — [AK] {en} water-closet {kun streketo}. — **Rim**.: La angla AK ne harmonias kun la germana traduko. Kp. tualet' [UV].

● **neces'uj'** - nécessaire | sewing-desk | Necessär {2012: Necessaire, ankaŭ: Nessessär, Kulturbeutel} | несессеръ | neseserka. — [AK] {en} workbox-sewingcase. — [RE] {mankas je несессеръ} — [Beaufront] nécessaire (coffret, étui). — **Rim**.: La angla AK ne harmonias kun la franca, germana kaj rusa. Ĝusta traduko probable: *manicure case*.

Nederlando [OA 8] {GEO} — [almenaŭ ekde 1909]. **Rim.**: Kp. Holand/uj/o E-isto 8/1893.

neĝ' - neige | snow | Schnee | снѣгъ {de 1918: снег} | śnieg. {METEO} — **neĝo** - neige | snow | Schnee | снѣгъ {de 1918: снег} | śnieg [FE 10]. — La papero estas tre blanka, sed la neĝo estas pli blanka [FE 10.14]. En la printempo la glacio kaj la neĝo fluidiĝas [FE 39.8]. — [UL].

negativ-a [OA 2.1] — [EG 2] (math.) negativ.

neglekt/i. [OA 8] Lasi ne farita, ne atentata, ne zorgita. — A. to neglect; F. négliger; G. vernachlässigen, unterlassen, versäumen; H. {es} descuidar; I. {it} trascurare, tralasciare, negligere; P. {pt} negligenciar, desleixar, descuidar, descurar. — PV, ne ĉe Z; antaŭe mal/zorg/i, mal/atent/i; LInt 10-11/1896: negliĝi.

negliĝ' - négligé | negligee | Negligé | неглиже | negliż. {VEST} — [AK] négligé (*vêt*.) | négligé, loose-gown. — [RE].

negoc' - affaire | business | Geschäft | дѣло, занятіе | interes, zajęcie. — [AK] affaires, trafic. — [RE].

negr' [OA 1] * nègre | negro | Neger | негръ | negr. — [DL 1888] *La homoj ricevas koloron malluman, kaj en la plej varmegaj landoj la brula suno faras el ili negrojn [DL 17.1.2].* [Beau] nègre (subs.).

nek - nek - ni - ni | neither - nor | weder - noch | ни - ни | ani - ani. — **nek - nek** - ni - ni | neither - nor | weder - noch | ни - ни | ani - ani [FE 28]. — Mi renkontis nek lin, nek lian fraton (aŭ mi ne renkontis lin, nek lian fraton) [FE 28.11]. — [UL].

Nekrolog' [OA 3.1] {en} necrology, an obituary notice | {fr} nécrologie | {de} Nekrologie {2012: Nekrolog}, Nachruf | {es} necrologia | {pt} necrologia {legu: necrológio} | {it} necrologia | {pl} --- {traduko mankas}. — [Beau] nekrolog, nécrologue. nekrologi, nécrologie. — **Rim.**: [GE 1]: nekrologi-. [EG 2] nekrolog-o, Nekrolog (*Lebensabriß eines kürzlich Verstorbenen*)

nektar' [OA 1] * nectar | nectar | Nektar | нектаръ | nektar. — [LInt 6-7/1896] [Beau] nectar.

nen - Aldonante la prefikson „nen”, ni ricevas vortojn neajn: nenia, nenial, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniu [FE 30.6, mankas en UV]. — **Rim.**: Kvankam la liter-trio „nen“ estas nomita „prefikso“, ĝi ***ne*** estas memstara kaj pluformebla vortelemento de Esperanto: **1.** En FE 30.1-6 la korelativoj (tabel-vortoj) estas klarigitaj jene: „la, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu [FE 30.1]. [... FE 30.2]. Se ni aldonas al ili la literon „k”, ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: kia, kial, kiam, ... [FE 30.3]. Se ni aldonas la literon „t”, ni ricevas vortojn montrajn: tia, tial, tiam, ... [FE 30.4]. Aldonante la literon „ĉ”, ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ĉial, ĉiam, ... [FE 30.5]. Aldonante la prefikson „nen”, ni ricevas vortojn neajn: nenia, nenial, neniam, ... [FE 30.6].“ El la kunteksta komparo evidentiĝas, ke la nocio „prefikso“ en FE 30.6 celas nur „la tri literojn“, „la literaron“, la „liter-trion“, „la antaŭmetaĵon“, sed ne prefikson en la senco de gramatika parto de vorto. **2.** Tiun interpreton subtenas la klarigoj en LR 105 de 1907 pri „neniigi“ (la radiko estas neni- [-a, -u]), vd. la tekston ĉe „nenio“. **3.** Ĝin ankaŭ subtenas la ĝenerala neuzo de memstara „nen-“, vd. jam Albault, Scienca Revuo 11-a jaro, n. 42, 1959, p. 73 en pn. 4.

nenia - aucun | no kind of | kein | никакой | żaden. — [AK] not any kind of, no | keinerlei. — [UL] — Aldonante la prefikson „nen”, ni ricevas vortojn neajn: nenia, nenial, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniu [FE 30]. — **Lingva Respondo 1908 [Pri “neniu” kaj “nenia”]**: Vd. ĉe „neniu“.

nenial - Aldonante la prefikson „nen”, ni ricevas vortojn neajn: nenia, nenial, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniu [FE 30, mankas en UV]. — **nenial** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] = el nenia kauzo, motivo. — [PR].

neniam - ne... jamais | never | niemals | никогда | nigdy. — **neniam** - ne... jamais | never | niemals | никогда | nigdy [FE 22]. — [DL-Ald] [RE] — Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos ... estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo [A 1.1]. [A 1.1]. Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj li neniam permesis al si (almenaŭ konscie) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj [A 2.2]. ... estas necese, ke ĉiu regnano sciu, ke li neniam dependos de la kapricoj de tiu aŭ alia persono, ... [A 3.1]. Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos... [A 6.2]. Sed, prezentante parton de la fundamento, tiuj ĉi aŭĥaismoj neniam estos elĵetitaj, ... [A 8.3]. ... tiamaniere ni havos la certecon, ke eĉ ĉe la plej granda perfektiĝado la unueco de Esperanto neniam estos rompata kaj neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj [A 8.3]. ... ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidos pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj [A 10.4]. — La tempo pasinta jam neniam revenos; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas [FE 22.8]. Aldonante la prefikson „nen”, ni ricevas vortojn neajn: nenia, nenial, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniu [FE 30.6]. Kiam mi ien veturas, mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo [FE 35.12].

— **Rim.**: UL kaj DL *nenian* (kun –n); neniam (kun –m) de post DL Ald 1888: „La sola ŝanĝo, kiun mi {Zamenhof} trovas necesa fari mem, estas: anstataŭ „ian,“ „ĉian,“ „kian,“ „nenian,“ „tian“ — devas esti: „iam,“ „ĉiam,“ „kiam,“ „neniam,“ „tiam“ (por malegaligi la vortojn „ian“ etc. kaj „ia,n“ etc).“

nenie - nulle part | nowhere | nirgends | нигдѣ | nigdzie. — [UL] — Aldonante la prefikson „nen”, ni ricevas vortojn neajn: nenia, nenial, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniu [FE 30.6]. — {Mankas en la lecion-fina vort-listo de FE 30}.

neniel - nullement, en aucune façon | nohow | keineswegs, auf keine Weise | никакъ | w żaden sposób. — **neniel** - nullement, en aucune façon | nohow | keineswegs, auf keine Weise | никакъ | w żaden sposób [FE 28]. — [AK] {en} in no way, not anyhow, not at all. — Ne-ní-el [FE 3]. Neniel [FE 4]. — Mi neniel povas kompreni, kion vi parolas [FE 28.10]. Aldonante la prefikson „nen”, ni ricevas vortojn neajn: nenia, nenial, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniu [FE 30.6].

nenies - de personne, à personne | no one's | keinem gehörig | ничей | niczyj. — [AK] keines, niemandes. — [UL] — Aldonante la prefikson „nen", ni ricevas vortojn neajn: nenia, nenial, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniu [FE 30.6]. — {Mankas en la lecion-fina vort-listo de FE 30}.

nenio - rien | nothing | nichts | ничто | nic. — [UL]. — Ne-ní-o [FE 3]. — Aldonante la prefikson „nen", ni ricevas vortojn neajn: nenia, nenial, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniu [FE 30.6]. La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo [FE 33.4]. — {Mankas en la lecion-fina vort-listo de FE 33}.

— **Lingva Respondo 1907 [Pri "neniigi"]**: Ĉiuj vortoj de la "interrilata tabelo" konsistas el du partoj: a) radiko, b) karakteriza finiĝo (ekzemple ki-al, ki-o, neni-u, neni-a k.t.p.). Ĉar pro diversaj kaŭzoj, pri kiuj mi ne povas nun paroli detale, la karakterizaj finiĝoj de la diritaj vortoj ne povis esti fiksitaj kiel finiĝoj *sendependaj* kaj *ĝeneralaj* (ekzemple mi estis devigita preni la finiĝojn *e* kaj *u*, kiuj kiel sendependaj finiĝoj havis jam alian sencon), tial mi devis alkroĉi ilin *nedisigeble* al la radiko. Tiamaniere ilia uzado *sendependa* (ekzemple en formoj "ali-u", "ali-es","kelk-om", k.t.p., kiuj per gramatika instinkto estis uzataj de kelkaj Esperantistoj) estas kontraŭregula. Sed en tiuj du kolonoj, kiuj finiĝas per *a* kaj *o*, la finiĝoj estas ne kondiĉe interrilataj, sed pure *adjektivaj* kaj pure *substantivaj*, kvankam ili, pro unuformeco, estas presataj en la vortaro kune kun la radiko (oni povus tamen tre bone presi ilin ankaŭ sen la finiĝo). Tial la forĵetado de la pure substantiva *o* kaj ĝia anstataŭigado per diversaj aliaj finiĝoj kaj sufiksoj ŝajnas al mi tre bone permesebla. Kompreneble, se tio ĉi donus ion *novan*, kontraŭan al la ĝisnunaj kutimoj, ni devus tion ĉi eviti, ĉar absoluta kaj laŭlitera reguleco tion ĉi ne permesus; sed, ĉar la vortoj "neniigi" kaj "neniiĝi" estas jam de longa tempo tre bone konataj kaj uzataj de ĉiuj Esperantistoj, tial mi opinias, ke malpermesi la uzadon de tiu ĉi formo estus tute senbezone. [LR 105, Respondo 14, *La Revuo*, 1907, Aprilo].

neniom - Aldonante la prefikson „nen", ni ricevas vortojn neajn: nenia, nenial, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniu [FE 30, mankas en UV]. — [RE] — **neniom** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] = nulkvante.

neniu - personne | nobody | Niemand | никто | nikt. — **neniu** - personne | nobody | Niemand | никто | nikt [FE 22]. — [AK] kein, niemand | nikt, żaden. — [UL] — Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon! [A 1.4]. ... fundamentajn leĝojn ... en kiuj neniu havas la rajton fari arbitre laŭ persona bontrovo ian ŝanĝon aŭ aldonon [A 3.1]. ... ĝi apartenas al la fundamenta dokumento, en kiu neniu havas la rajton fari ian ŝanĝon [A 4.7]. ... neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj [A 8.3]. — La tempo pasinta jam neniam revenos; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas [FE 22.8]. ... la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro [FE 23.4]. En la salono estis neniu krom li kaj lia fianĉino [FE 26.13]. Mi konas neniun en tiu ĉi urbo [FE 28.9]. Aldonante la prefikson „nen", ni ricevas vortojn neajn: nenia, nenial, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniu [FE 30.6]. Ŝteliston neniu lasas en sian domon [FE 37.15]. ... li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu; ... [FE 39.11].

— **Lingva Respondo 1908 [Pri "neniu" kaj "nenia"]**: La vorto "neni*u*" (tiel same, kiel ankaŭ la vortoj "iu","kiu", "tiu", "ĉiu") havas sencon pure *pronoman*, dum la vorto "neni*a*" (kiel ankaŭ la vortoj "ia", "kia","tia", "ĉia") havas sencon *adjektivan* kaj esprimas *specon, karakteron*. La vortoj "iu, kiu, tiu, ĉiu, neniu" povas esti uzataj aŭ *kun* substantivo, aŭ *sen* substantivo (en tiu ĉi lasta okazo oni subkomprenas ĉe ili la vorton "homo"). La formoj kun *u* enhavas en si ĉiam la ideon de nomo aŭ pronomo, dum la formoj kun *a* enhavas en si la ideon de adjektivo. La diferencon inter la diritaj serioj da vortoj vi komprenos plej bone el la sekvantaj ekzemploj: Ki*u* venis? Venis Petr*o;* venis botist*o*; venis li. — En ki*u* urbo vi loĝas? Mi loĝas en Pariz*o*; mi loĝas en *tiu ĉi* urbo. En ki*a* urbo vi loĝas? Mi loĝas en bel*a* urbo; en grand*a* urbo. — Ĉu vi vidis la ĉambristin*on* aŭ la kuiristin*on?* Mi vidis nen*iu*n servistinon. Ĉu vi vidis jun*an* servistinon aŭ maljun*an*? Mi vidis neni*an*

servistinon. Inter la vortoj “tiu-tia” kaj “ĉiu-ĉia” la diferenco estas pli granda kaj pli klara, ol inter la vortoj “kiu-kia”, “iu-ia”, “neniu-nenia” tial oni neniam povas diri “tia” aŭ “ĉia” anstataŭ “tiu” aŭ “ĉiu”, sed ofte oni povas sen eraro diri “ia, kia, nenia” anstataŭ “iu, kiu, neniu” (kvankam estas bone ĉiam eviti kiom eble la intermiksadon de tiuj ĉi vortoj). [Respondo 29, *La Revuo*, 1908, Februaro].

neologism-o [OA 2.1] — [Beau]: néologisme.

nep’ - petit-fils | grandson | Enkel | внукъ | wnuk. — **nepo** - petit-fils | grandson | Enkel | внукъ | wnuk [FE 33]. — [UL] — La filoj, nepoj kaj pranepoj de reĝo estas reĝidoj [FE 36.12].

● **nepino** — Mi vidis vian avinon kun ŝiaj kvar nepinoj kaj kun mia nevino [FE 33.19].

● **pranepo** — La filoj, nepoj kaj pranepoj de reĝo estas reĝidoj [FE 36.12].

nepotism-o [OA 2.1] — [Beau]: népotisme.

nepr’ - tout à fait | throughout | durchaus | непремѣнно | koniecznie. — [AK] immanquablement, sans faute, tout-à-fait | without fail. — [UL] — ... ĉar nur pri tiaj vortoj ni povas esti certaj, ke nia adresato ilin nepre trovos en sia vortaro [A 7.1].

nerv’ [OA 1] * nerf | nerve | Nerv | нервъ | nerw. — [RE].

nervoz/a. [OA 8] Havanta facile ekscitеblan maltrankviliĝeman psikon. — A. nervous, fidgety, excitable, highly-strung; F. nerveux, (excitable); G. nervös, erregt, erregbar; H. {es} nervioso (de nervios irritables); I. {it} nervoso; P. {pt} nervoso, irritável, exaltado. — [PV]. — **Rim.**: Ne ĉe Z.; antaŭe nerv/a; [Marta]: ... ŝi marŝadis en la ĉambreto ... kun manoj nerve interplektitaj ... Per rapida, nerva movo ŝi enŝovis la monpaperetojn en la poŝon de la eluzita vesto.

nest’ - nid | nest | Nest, Lager | гнѣздо, притонъ | gniazdo. — [AK] Nest. — [RE].

net’ - net | net | in’s Reine | начисто | na czysto. — [AK] (*au*) net, cahier de net | clean (*as a copy*), neat | Reinschrift. — [RE].

● **mal’net’** - brouillon | foul copy | Brouillon | начерно | na brudno. — [AK] rough draft | Konzept, Entwurf, Kladde.

neŭtr-a (*gram., fiziol.*) [OA 2.1] {GRAM} — [EG 2].

neŭtral-a [OA 2.1] — [Beaufront, Manuel complet 1892] [EG 2].

nev’ - neveu | nephew | Neffe | племянникъ | siostrzeniec, bratanek. — **nevo** - neveu | nephew | Neffe | племянникъ | siostrzeniec, bratanek [FE 33]. — [UL] — La edzino de mia nevo kaj la nevino de mia edzino estas miaj bonevinoj [FE 36.8].

● **nevino** — Mi vidis vian avinon kun ŝiaj kvar nepinoj kaj kun mia nevino [FE 33.19]. La edzino de mia nevo kaj la nevino de mia edzino estas miaj bonevinoj [FE 36.8].

● **bonevino** — La edzino de mia nevo kaj la nevino de mia edzino estas miaj bonevinoj [FE 36.8].

ni - nous | we | wir | мы | my. — **ni** - nous | we | wir | мы | my [FE 9]. — [UL]

● **ni’a** - notre | our | unser | нашъ | nasz. — Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj ... [A 1.2]. ... severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta [A 1.3]. {pliaj trafoj en A}. — Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn; post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo [FE 18.15]. La pastro, kiu mortis antaŭ nelonge (...), loĝis longe en nia urbo [FE 25.12]. Starante ekstere, li povis vidi nur la eksteran flankon de nia domo [FE 31.11]. Li estas tiel dika, ke li ne povas trairi tra nia mallarĝa pordo [FE 33.2]. La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo [FE 33.4]. Malamiko venis en nian landon [FE 33.13]. Nia lando venkos, ĉar nia militistaro estas granda kaj brava [FE 34.12]. La regnestro de nia lando estas bona kaj saĝa reĝo [FE 37.4]. Nia provincestro estas severa, sed justa [FE 37.6]. Nia urbo havas bonajn policanojn, sed ne sufiĉe energian policestron [FE 37.7]. Nia regimentestro estas por siaj soldatoj kiel bona patro [FE 37.12]. En nia lando sin ne trovas montoj, sed nur montetoj [FE 38.2]. Mallarĝa vojeto kondukas tra tiu ĉi kampo al nia domo [FE 38.6]. Antaŭ nia militistaro staris granda serio da pafilegoj [FE 38.11]. La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj [FE 39.14].

niĉ’ - niche | niche | Nische | ниша | nisza. — [MV].

nigr' - noir | black | schwarz | черный | czarny. — **nigra** - noir | black | schwarz | черный | czarny [FE 32]. — [UL] — Alportu al mi metron da nigra drapo ... [FE 32.6].

nihilism-o [OA 2.1] — [EG 2] (phil.) Nihilismus.

nihilist-o [OA 2.1] — [Kabe]

Nikaragvo [OA 8] {GEO} — [GD]

nikel' [OA 1] nickel | nickel | Nickel | никель | nikiel. {KEM} — [EG 2].

Nikodemo — Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato [FE 22, mankas en UV]. — **Nikodem'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo). — **Rim.**: Pri la origino de Nikodem' vd. la Ĝeneralan Parton, ĉapitro „Religia lingvaĵo en la Ekzercaro".

Nikolao — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Erneĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilheĉjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38, mankas en UV]. — **Nikola'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

nikotin-o [OA 2.1] — [Beau] nicotine.

nilon/o. [OA 8] Nitrogenhava sinteza kombinaĵo, analoga al la plastoj, el kiu oni faras i.a. specon de artefarita silko. — A. nylon, F. nylon, G. Nylon, H. {es} nilón, "nylon", I. {it} nailon, "nylon", P. {pt} "nylon" {ankaŭ: náilon}. — [GD].

nim-bo [OA 2.1] {pres-eraro: legu nimb-o} — [EG 2] Nimbus — **Rim.**: Kp. aŭreolo.

nimf' * nymphe | nymph | Nymphe | нимфа | nimfa. — [RE].

nivel' - niveau | water-level, plumb | Niveau | уровень | poziom. — [AK] {en} level (sea, etc.). — [RE].

niz-o [OA 2.2] epervier | sparrow-hawk | Sperber {BIO} — [EG 2]. Sperber.

nj' - après les 1-5 premières lettres d'un prénom féminin lui donne un caractère diminutif et caressant; ex. Mari' - Ma'nj'; Emili' - Emi'nj' - | diminutive of female names; e. g. Henrieť Henrietta - Henri'nj', He'nj' Hetty | den ersten 1-5 Buchstaben eines weiblichen Eigennamens beigefügt, verwandelt diesen in ein Liebkosungswort; z. B. Mari' - Ma'nj'; Emili' - Emi'nj' - | приставленное къ первымъ 1-5 буквамъ имени собств. женскаго пола, превращаетъ его въ ласкательное; напр. Mari' - Ma'nj'; Emili' - Emi'nj' - | dodane do pierwszych 1-5 liter imienia własnego rodzaju żeńskiego zmienia takowe w pieszczotliwe; np. Mari' - Ma'nj'; Emili' - Emi'nj'. — ĉj, **nj** - après les 1-6 premières lettres d'un prénom masculin (nj - féminin) lui donne un caractère diminutif et caressant | affectionate diminutive of masculine (nj - feminine) names | den ersten 1-6 Buchstaben eines männlichen (nj - weiblichen) Eigennamens beigefügt, verwandelt diesen in ein Kosewort | приставленное къ первымъ 1-6 буквамъ имени собственнаго мужескаго (nj - женскаго) пола, превращаетъ его въ ласкательное | dodane do pierwszych 1-6 liter imienia własnego męskiego (nj - żeńskiego) rodzaju zmienia je w pieszczotliwe [FE 38]. — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Erneĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilheĉjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38.12].

● **Emili'** - Emi'nj' [UV nj].

● **Henriet'** Henrietta - Henri'nj', He'nj' Hetty [UV {en} nj].

● **Klaro** – Klanjo [FE 38.12].

● **Mari'** - Ma'nj' [UV nj]. — Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas … [FE 17.10]. [FE 38.12].

● **Sofio** – Sonjo, Sofinjo [FE 38.12].

— Vd. [**LR 15**, let. al Th. Thorsteinsson (1906-03-08), O.V. p. 523].

no [OA 7] = nomo de la litero n, dekoka litero de la Esperanta alfabeto

nobel' - noble (subst.), gentilhomme | nobleman | Adeliger, Edelmann | дворянинъ | szlachcic. — [RE].

nobl' - noble (adj) | noble | edel | благородный | szlachetny. — **nobla** - noble | noble | edel | благородный | szlachetny [FE 33]. — [AK] edel, vornehm (*Gesinnung*). — [UL].

● **malnobla** — Ni forte malestimas tiun ĉi malnoblan homon [FE 33.8].

● **malnoblulo** — Li estas mensogisto kaj malnoblulo [FE 37.22].

nod' [OA 1] noeud | knot | Knoten | узелъ | węzeł. — [EG 2] Knoten.

nokt' - nuit | night | Nacht | ночь | noc. — **nokto** - nuit | night | Nacht | ночь | noc [FE 10]. — [UL] — En la tago ni vidas la

helan sunon, kaj en la nokto ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn [FE 10.13]. Mi veturis du tagojn kaj unu nokton [FE 29.6]. La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo [FE 33.4].

● **meznokto** — Mez-nók-to [FE 3].

noktu-o [OA 2.2] chevèche | screech-owl | Kauz {ZOO} — [EG 2]. Kauz.

nom' - nom | name | Name | имя | imię. — [UL] — Nó-mo [FE 3]. — Nomoj de la literoj [FE 1]. Diru al mi vian nomon [FE 18.3]. Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem [FE 32.3].

● **nom'i** - nommer, appeler | name, nominate | nennen | называть | nazywać. — **nomi** - nommer, appeler | name, nominate | nennen | называть | nazywać [FE 17]. — Tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino [FE 17.7]. Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem [FE 32.3]. Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35.13]. Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Ernecĵo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilhecĵo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38.12].

● **nomata** — Patro kaj patrino kune estas nomataj gepatroj [FE 36.1].

● **nomita** — Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro «Fundamento de Esperanto», devas esti rigardataj kiel oficialaj [A 3.5].

● **nom'e** - c'est-à-dire, savoir | namely, viz | nämlich | именно | mianowicie.

nombr' - nombre | number | Zahl | число | liczba, ilość. — [UL].

● **unu'nombr'** - singulier | singular | Einzahl, Singular | единсвенное число | liczba pojedyńcza [UV nombr']. {GRAM}

nomad-o [OA 2.1] — [EG 2]. Nomade.

Nominal' [OA 3.1] {en} nominal | {fr} nominal (financ.) | {de} nominell | {es} nominal | {pt} nominal | {it} nominale | {pl} --- {traduko mankas}. {EKON} — [Beau] nominal. nominala valoro, valeur nominale.

nominativ' - nominatif | nominative | Nominativ | именительный падежъ | mianownik. {GRAM} — **nominativo** - nominatif | nominative | Nominativ | именительный падежъ | pierwszy przypadek [FE 28]. — [RE]. — Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam nur la nominativon [FE 28.1].

nord' - nord | north | Norden | сѣверъ | północ. {GEO} — [DL] [RE].

normal' [OA 1] * normal | normal | normal | нормальный | normalny. — [Beau] normal (qui suit sa voie régulière).

norm-o [OA 2.1] — [EG 2]. Norm, Richtschnur.

norvego [OA 8] — [E-isto 1893, p. 94] Norvegujo. [MV].

nostalgi' [OA 1] nostalgie | nostalgia | Heimweh | ностальгія | nostalgja. — [EG 2]. Heimweh.

not' - noter | note | notiren {de 1901: notieren} | записывать, отмѣчать | notować. — [AK] {en} make a note of, note. — [RE].

● **not'o** (muzik'a) - note (de musique) | note (mus.) | Note (Mus.) | нота | nuta. {MUZ} — [AK] нота (музык.).

notari' - notaire | notary | Notar | нотаріусъ | notaryusz, rejent. {JUR} — [RE]

nov' - nouveau | new | neu | новый | nowy. — **nova** - nouveau | new | neu | новый | nowy [FE 18]. — [UL] — Riĉigadi la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun ... [A 7.1]. Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron oficialan, kiel «Aldonon al la Fundamento» [A 7.2]. ... ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova [A 8.1]. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, ... [A 8.2]. Sed, prezentante parton de la fundamento, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, ... [A 8.3]. ... ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidos pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ĉio bona, kio ne troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel rekomendata [12]. — Montru al ili vian novan veston [FE 18.11].

... la edziĝa soleno estos en la nova preĝejo, ... [FE 39.3]. Kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi ion novan, sed baldaŭ ni vidis, ke ni trompiĝis [FE 40.7].

● **Nov-Jork** - New York [UV an'] — **Nov-Jorko** - New York [FE 37 an' angla]. — **Nov-Jork'** {deklarita Fundamenta de} [OA 7] (urbnomo). — [E-isto 1893, p. 92] Nov-Jorka kuracisto.

● **Nov-Jork'an'** - New Yorker [UV an' angla] — **Nov-Jorkano** - New Yorker [FE 37 an' angla].

● **denove** — La fenestro longe estis nefermita; mi ĝin fermis, sed mia frato tuj ĝin denove malfermis [FE 33.9]. La juna vidvino fariĝis denove fianĉino [FE 33.22].

● **mal'nov'** — alt | stary [UV aĵ']. — **malnova** - old | alt | stary [FE 25 aĵ']. — ... ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova [A 8.1]. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, ... [A 8.2].

● **mal'nov'aĵ'** - altes Zeug | starzyzna [UV aĵ']. — **malnovaĵo** - old things | altes Zeug | starzyzna [FE 25 aĵ'].

novel' [OA 1] nouvelle (lit.) | short story | Novelle | повѣсть | nowela. — [Cart 1903] [EG 2].

Novembr' - Novembre | November | November | Ноябрь | Listopad. — **Novembro** - Novembre | November | November | Ноябрь | Listopad [FE 12]. — [DL] [RE] — Januaro estas la unua monato de la jaro, Aprilo estas la kvara, Novembro estas la dek-unua, Decembro estas la dek-dua [FE 12.13]. — [DL 1888]: — *La dek du monatoj de l' kristana jaro estas: Januaro, Februaro, Marto, Aprilo, Majo, Junio, Julio, Aŭgusto, Septembro, Oktobro, Novembro, Decembro [DL 16.1].*

novic' - novice | novice | Noviz | послушникъ | nowicyusz. — [RE].

Nov-Jork - New York [UV an' angla] {tiel, sen apostrofo ĉe Nov-Jork} — **Nov-Jorko** - New York [FE 37 an' angla]. — **Nov-Jork'** {deklarita Fundamenta de} [OA 7] (urbnomo).

● **Nov-Jork'an'** - New Yorker [UV an' angla] — **Nov-Jorkano** - New Yorker [FE 37 an' angla].

nu! - eh bien! | well! | nu! nun! | ну! | no!. — **nu** - eh bien! | well! | nu! | nun {legu: nu! nun!} | ну! | no! [FE 21] — [RE]. — Apenaŭ ŝia patrino ŝin rimarkis, ŝi kriis al ŝi: "Nu, mia filino?" [FE 21.1]. Nu, iru pli rapide! [FE 26.26].

nuanc' - nuance | nuance | Schattirung {de 1901: Schattierung}, Abstufung | оттѣнокъ | odcień. — [AK] {en} nuance, shade, hue. — [RE].

nub' - nuage, nuée | cloud | Wolke | облако | obłok, chmura. — [UL] — Nú-bo [FE 2].

nud' - nu | naked | nackt | нагой | nagi. — [AK] {en} nude, naked, bare. — [UL]

nuk' - nuque | neck | Genick | затылокъ | kark. {ANAT} — [AK] nape (*of neck*) | Nacken, Genick. — [RE].

nuks' - noix | nut | Nuss | орѣхъ {de 1918: opex} | orzech. {BOT} — [AK] noix (*en général*). — [UL].

nul' - zéro | null | Null | нуль | nul, zero. — [AK] {en} zero, nought. — [RE]. — [OA 8] II.B.3. Apud la Fundamenta substantivo nulo estas oficialigita la numeralo nul. — **Rim.**: **1.** UV eld. 1-4, angla: „nullo". **2.** Vd. la rimarkon ĉe „nul.".

nul. [OA 8] La nombrosigno 0 (radiko de la Fundamenta: nul/o). — A. zero, nought, nil; F. zéro; G. Null; H. {es} cero; I. {it} zero; P. {pt} zero. — [OA 8] II.B.3. Apud la Fundamenta substantivo nulo estas oficialigita la numeralo nul. — **Rim.**: Simile kiel ĉe Aŭgust' (monato) kaj Aŭgust' (vira antaŭnomo) ankaŭ pri nul' [UV] (radiko bezonas finaĵon) kaj nul [OA 8] (senfinaĵa numeralo) oni povas dubi, ĉu temas pri unu aŭ du elementoj. Ĉefa argumento por du elementoj estas, ke la Akademio ne rajtas ŝanĝi la statuson de Fundamenta elemento, nur interpreti dubajn okazojn kaj aldoni novajn elementojn. Se oni interpretas la numeralon kiel aldonitan novan elementon temas pri du apartaj elementoj (la Fundamenta elemento, kiu bezonas finaĵon, kaj la aldonita elemento kiu ne bezonas finaĵon). La kontraŭa opinio asertas, ke OA 8 nur difinis novan manieron uzi la Fundamentan elementon nul' kiel klarigite en la „Baza Radikaro Oficiala" (BRO: „sen finaĵo en kalkuloj, nombrado..."), sed ne ŝanĝis ĝian principan statuson kiel finaĵbezona radiko. Tiun aliron elektis AV, kiu registras nur nul' (NUL/). La konvinka povo de tiu argumento dependas pri la formala statuso de BRO, pri kiu vd. la ĝeneralan parton.

numer' - numéro | number (of a magazine, etc.) | Nummer | номеръ | numer. — [DL] *Dissendante mian unuan*

verkon al la redakcioj de l' gazetoj, mi petis ilin alsendi al mi tiun numeron de l' gazeto, en kiu estos kritiko de mia afero [DL A 11.1] {du pliaj samspecaj trafoj en DL}. [RE].

numismatik-o [OA 2.1] — [EG 2]. — **Rim.**: E-isto 8/1894: numismat/a {sen –ik}.

nun - maintenant | now | jetzt | теперь | teraz, obecnie. — **nun** - maintenant | now | jetzt | теперь | teraz [FE 9]. — [UL] — … la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, … [A 3.3]. … nun mi diros pri tio ĉi nur kelkajn vortojn, por ke mia opinio ne ŝajnu tro paradoksa [A 6.6]. Riĉigadi la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun … [A 7.1]. — Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo [FE 9.9]. Mi jam havas mian ĉapelon; nun serĉu vi vian [FE 18.16]. … li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto [FE 22.7]. Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi [FE 25.9]. La birdo flugas en la ĉambron (= ĝi estas ekster la ĉambro kaj flugas nun en ĝin) [FE 26.4]. El sub la kanapo la muso kuris sub la liton, kaj nun ĝi kuras sub la lito [FE 26.9]. Lia filo mortis kaj estas nun malviva [FE 31.5]. La fera bastono, kiu kuŝis en la forno, estas nun brule varmega [FE 31.17].

● **de nun** — Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi [FE 25.7].

nunci' [OA 1] * nonce | nuncio | Nuntius (päbst. {legu: päpst[licher]} Gesandter) | нунцій {de 1918: нунций} | nuncjusz. {RELI} — [Beau] nonce.

nur - seulement, ne... que | only (adv.) | nur | только | tylko. — **nur** - seulement, ne... que | only (adv.) | nur | только | tylko [FE 12]. — [UL] — Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron oficialan, kiel «Aldonon al la Fundamento» [A 7.2]. {ĉ. dekduo de pliaj trafoj en [A] laŭ la uzo en FE}. — Mi havas nur unu buŝon, sed mi havas du orelojn [FE 12.2]. Vi devas nur iri al la fonto ĉerpi akvon; kaj kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile." [FE 17.11]. Ne riproĉu vian amikon, ĉar vi mem plimulte meritas riproĉon; li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto [FE 22.7]. Anstataŭ „la" oni povas ankaŭ diri „l'" (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo) [FE 27.4]. ... kaj la vortoj „ĝardenon", „tablon" staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en" kaj „sur" tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton ... [FE 28.3]. ... ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado ... [FE 28.3]. Starante ekstere, li povis vidi nur la eksteran flankon de nia domo [FE 31.11]. — La birdo ne forflugis: ĝi nur deflugis de la arbo, alflugis al la domo kaj surflugis sur la tegmenton [FE 31.20]. En la ĉambro sidis nur kelke da homoj [FE 32.13]. Via vino estas nur ia abomena acidaĵo [FE 35.7]. En nia lando sin ne trovas montoj, sed nur montetoj [FE 38.2]. Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3]. — **Rim.**: [UL]: ĉiuj lingvoj identaj krom la franca, kiu havas: „seulement" („ne ... que" mankas). — [DL]: *... ĝi ankaŭ suferis de la suno. [2] (1) Nur je l' vespero, kian {de 1889: kiam} la suno estis subirinta, ili reviviĝis.* — [Beau]: seulement, ne ... que.

nutr' - nourrir | nourish | nähren | питать, кормить | karmić. — **nutri** - nourrir | nourish | nähren | питать | karmić, pożywiać [FE 10]. — [AK] {en} nourish, feed (*trans*.). — [UL].

● **nutra** — Lakto estas pli nutra, ol vino [FE 10.15].

O

Oo - ô | o as in "not" | o | o | o [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **o** ... [FE 1]. — **o** [OA 7] = nomo de la litero **o**, deknaŭa litero de la Esperanta alfabeto. — **Lingva Respondo** 56 (1893): La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

o - marque le substantif | ending of nouns (substantive) | bezeichnet das

Substantiv | означаетъ существительное | oznacza rzeczownik. — **o** – Le substantif finit toujours par o. | Substantives are formed by adding o to the root. | Das Hauptwort bekommt immer die Endung o. | Существительное всегда оканчивается на o. | Rzeczownik kończy się zawsze na o. [FG 2.1]. — **o** - marque le substantif | ending of nouns (substantive) | bezeichnet das Substantiv | означаетъ существительное | oznacza rzeczownik [FE 5]. — {Tro multaj trafoj, pro tio ne listigitaj tie ĉi}. — **Lingva Respondo 1905**: La finiĝo „o“ signifas nur simple *substantivon*, nenion pli; sekve en vortoj devenantaj de adjektivo ĝi povas nur signifi *ideon*, *esencon*, sed ĝi ne povas prezenti la komplikitan sencon de „homo kiu estas ...a“, tiel same, kiel ĝi ne povas prezenti la komplikitan sencon de ia alia sufikso. Ni povas diri, „li batalas por la *bono* kaj *belo*“, ĉar tie ĉi ni parolas nur simple pri la *ideo* de la adjektivoj „bona“, „bela“; sed „bon*ulo*“, „bel*ulo*“ (tiel same kiel ekzemple „bon*aĵo*“, „bon*eco*“ k.t.p.) prezentas ion *pli* ol simple substantivigitan adjektivon, kaj tiun sencon ni devas esprimi per ia difinita sufikso. [LR 5 A, let. al Couturat de 1905-09-17, LZ I 187].

oaz' [OA 1] * oasis | oasis | Oase | оазисъ | oaza. — [EG 2]. — **Rim.**: [Beau 3]: **oazis'**. [Beau 4] **oaz**, oasis.

obe' - obéir | obey | gehorchen | повиноваться | być posłusznym. — **obei** - obéir | obey | gehorchen | повиноваться | być posłusznym [FE 29]. — [UL] — … ĉiu regnano … devas obei ĉiam nur klarajn, tute difinitajn fundamentajn leĝojn de sia lando, … [A 3.1]. — Ekzemple, ni povas diri “obei al la patro” kaj “obei la patron” (anstataŭ “obei je la patro”) [FE 29.9]. La ŝipanoj devas obei la ŝipestron [FE 37.1].

objekt' - objet | object | Gegenstand | предметъ | przedmiot. — **objekto** - objet | object | Gegenstand | предметъ | przedmiot [FE 27]. — [UL]. — La artikolo „la” estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj [FE 27]. Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35.13]. La lignisto vendas lignon, kaj la lignaĵisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn [FE 37]. ... skatoleto aŭ alia objekto, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarujo [FE 40].

objektiv-a [OA 2.1] — [EG 2].

obl' - marque l'adjectif numéral multiplicatif; ex. du deux - du'obl' double | ...fold; e. g. du two - du'obl' twofold, duplex | bezeichnet das Vervielfachungszahlwort; z. B. du zwei - du'obl' zweifach | означаетъ числительное множительное; напр. du два - du'obl' двойной | oznacza liczebnik wieloraki; np. du dwa - du'obl' podwójny. — **obl** - Aux adjectifs numéraux cardinaux on ajoute: ...; *obl*, pour les numéraux *multiplicatifs* ... Ex.: *tri'obl'a* - triple | Multiplicatives (as „threefold”, „fourfold”, etc.) add *obl*, e. g. *tri'obl'a*, „threefold”. | Vervielfältigungszahlwörter {entstehen] durch Einschiebung des Suffixes *obl*; z.B.: *tri'obl'a*, dreifach | вставка *obl*, для дробныхъ. Примѣры: *tri*|*obl*|*a* тройной | przyrostek *obl*, dla ułamkowych. Przykłady: *tri/obl/a* potrójny [FG 4.4]. — **obl** - marque l'adjectif numéral multiplicatif; ex. du deux - duobla double | ...fold; e. g. du two - duobla twofold, duplex | bezeichnet das Vervielfachungszahlwort; z. B. du zwei - duobla zweifach | означаетъ числительное множительное; напр. du два - duobla двойной | oznacza liczebnik wieloraki; np. du dwa - duobla podwójny [FE 14]. — [AK] bezeichnet das Vervielfältigungswort; z. B. du zwei — du/obl/ zweifach, doppelt. — [UL]. — Por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, t. e. (= tio estas) dek frankojn [FE 14.7]. Kvinoble sep estas tridek kvin [FE 14.8].

● **du'obl'** - double | twofold, duplex | zweifach {zweifach, doppelt [AK]} | двойной | podwójny [UV obl']. — **duobla** - double | twofold, duplex | zweifach | двойной | podwójny [FE 14].

● **tri'obl'a** - triple | threefold | dreifach | тройной | potrójny [FG 4.4].

oblat' - pain à cacheter | wafer | Oblate | облатка | opłatek. {RELI} — [AK] {en} wafer, seal. — [MV].

obligaci-o (*fin.*) [OA 2.1] {FIN} — [RE]

oblikv' [OA 1] oblique | oblique | schräg | косой | skośny. — [Beau] {antaŭe mal/rekt/a}.

obol-o [OA 2.1] — [LInt 5/1896] [EG 2].

observ' - observer | observe | beobachten, beaufsichtigen | наблюдать | obserwować. — [RE].

Observatori' [OA 3.2] {en} observatory | {fr} observatoire | {de} Observatorium, Sternwarte | {es} observatorio | {pt}

observatorio {legu: observatório} | {it} osservatorio | {pl} obserwatorjum {de 1936: obserwatorium}. {ASTR} — [RE].

obstakl/o. [OA 8] Tio, kio malhelpas aŭ malfruigas la iradon (propre aŭ figure). — A. obstacle, hindrance; F. obstacle, empêchement; G. Hindernis, Erschwerung; H. {es} obstáculo; I. {it} ostacolo; P. {pt} obstàculo {legu: obstáculo}, empecilho, embaraço. — [PV] {ne ĉe Z; antaŭe mal/help/aĵ/o, kontraŭ/aĵ/o}.

obstin' - entêté, obstiné | obstinate | eigensinnig | упрямый | uparty. — **obstina** - entêté, obstiné | obstinate | eigensinnig | упрямый | uparty [FE 10]. — [UL] — Mi ne amas obstinajn homojn [FE 10.7].

obstrukc' - obstruction | obstruction | Verstopfung {2012 fake ankaŭ: Obstruktion} | запоръ | obstrukcya, zatwardzenie. {MED} — [AK] запор, засорение. — [RE].

Obtuz' [OA 3.2] {en} obtuse, dull, muffled | {fr} obtus (forme), sourd (son) | {de} stumpf, dumpf | {es} obtuso, sordo | {pt} --- {traduko mankas, estu: obtuso} | {it} ottuso, sordo | {pl} gluchy. — [Marta]: *Lasu min, - diris Marta per voĉo obtuza sed forta ...* {antaŭe mal/klar/a, mal/sonor/a}.

ocean' [OA 1] * océan | ocean | Ozean | океанъ | ocean. {GEO} — [RE].

od' [OA 1] * ode | ode | Ode | ода | oda. — [RE].

odor' - sentir, avoir une odeur | odour | riechen, duften | пахнуть | pachnąć. — [AK] sentir, avoir ou répandre une odeur | give out odour, smell. — [UL]: пахнуть | пахнуть | pachnąć | sentir, avoir une odeur | riechen, duften | to exhale: fragrance, to smell (well). — **Rim**.: Kp. flar'.

ofend' - offenser | offend | beleidigen | обижать | obrażać, krzywdzić. — [AK] obrażać. — [UL].

ofer' - sacrifier | offer | opfern | жертвовать | ofiarować. {RELI} — [AK] {en} sacrifice, offer. — [UL].

ofert/i. [OA 8] Proponi (varon aŭ servon) al kliento: *la leĝo pri ~o kaj mendo*. — A. to offer, to tender (for sale or supply); F. offrir (commerce); G. anbieten, feilbieten, offerieren; H. {es} ofrecer (oferta), ofertar; I. {it} offrire; P. {pt} oferecer (com.) — [Backman 1921] [PV] {ne ĉe Z; antaŭe propon-}.

ofic' - office, emploi | office | Amt | должность | urząd. — [AK] {en} office, duty, function. — [RE].

● **ofic'ist'** - fonctionnaire | officer | Beamter | чиновникъ | urzędnik. — [AK] {en} official, functionary.

● **ofic'ej'** - bureau | bureau | Bureau {(ark.), en 2012: Büro} | бюро, канцелярія | biuro, kancelarya. — [AK] {en} bureau, office.

oficial' – [A, mankas en UV]. — **oficial'** [OA 1] officiel | official | offiziell | официальный | oficjalny. — **oficial/a** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 8]. — [Beau]. — Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardataj kiel oficialaj [A 3.5]. ... por ke li bone ellernu kaj per ofta enrigardado konstante memorigadu al si, kio en nia lingvo estas oficiala kaj netuŝebla ... [A 5.4]. ... por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn oficialajn ... [A 5.4]. ... ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron oficialan, kiel «Aldonon al la Fundamento» [A 7.2].

● **oficiale** - Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj ... [A 1.2].

● **oficialigo** - ... ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidos pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj ... [A 10.4].

oficir' - officier | officer | Offizier | офицеръ | oficer. {MIL} — [AK] {en} officer (*mil. and nav., etc*.). — [RE] — O-fi-cí-ro [FE 2]. — **Rim.**: [Blov 1888]: oficer-.

oft' - souvent | often | oft | часто | często. — **ofte** - souvent | often | oft | часто | często [FE 29]. — [UL] — Teatramanto ofte vizitas la teatron kaj ricevas baldaŭ teatrajn manierojn [FE 32.1]. Post infekta malsano oni ofte bruligas la vestojn de la malsanulo [FE 39.5]. Li estas tre ekkoler-ema kaj ekscitiĝas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo; ... [FE 41.13]. Malfeliĉo ofte kunigas la homojn, kaj feliĉo ofte disigas ilin [FE 42.2].

● **ofta** — Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj li neniam permesis al si (almenaŭ konscie) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj [A 2.2]. ... li bone ellernu kaj per ofta enrigardado konstante memorigadu al si, kio en nia lingvo estas oficiala kaj netuŝebla ... [A 5.4].

● **malofte** — Sed estas bone uzadi la vorton „je” kiel eble pli malofte [FE 29.2].

ogiv' [OA 1] ogive | ogive | Spitzbogen | крестовый сводъ | łuk strzałkowaty. {ARKI} — [EG 2].

ok - huit | eight | acht | восемь | ośm. — **ok** – 8 [FG 4.1]. — **ok** - huit | eight | acht | восемь | ośm [FE 12]. — [UL] — Kvar kaj dek ok faras dudek du [FE 12.8]. Ok estas kvar kvinonoj de dek [FE 14.10].

● **okcent** — Mil okcent naŭdek tri [FE 12.10].

● **bit/ok/o**. [OA 9 bit'] Grupo de ok bitoj traktata kiel tutaĵo (kiel unuo en komputado k.s.). {KOMP}

okaz' - avoir lieu, arriver | happen | vorfallen | случаться | zdarzać się. — **okazi** - avoir lieu, arriver | happen | vorfallen | случаться | zdarzać się [FE 17]. — [UL] — La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi, ... [FE 17.8]. — [Kabe 1910]: Vere esti, vere fariĝi, sen-depende de nia volo: *La katastrofo okazis antaŭ cent jaroj.*

● **okaz'o** - occasion | occasion | Ereigniss {de 1901: Ereignis}, Gelegenheit | случай | wypadek, zdarzenie. — [AK] Fall, Ereignis, Gelegenheit. — a) ni devas tion ĉi fari ne facilanime, sed nur en okazoj de efektiva neceseco [A 9.3]. Leĝan sankcion ili [= la ideoj] ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, ... [A 11.2]. ... en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon „n” tute egale ĉu ia prepozicio starus aŭ ne [FE 28.3].

● **okaz'a** - accidentel | accidental | zufällig | случайный | przypadkowy.

okcident' - ouest | west | West, Westen | западъ | zachód. {GEO} — [RE].

Oksid-o, [OA 4] {fr} oxyde | {en} oxide | {de} Oxyd {2012: Oxid} | {it} ossido | {es} oxido | {pt} óxido | {ca} óxid {legu: òxid}. {KEM} — [EG 2].

oksigen' - oxygène | oxygen | Sauerstoff | кислородъ | tlen. {KEM} — [RE].

oksikok' - canneberge | moss-berry | Moosbeere | клюква | żurawina. {BOT} — [AK] {en} cranberry. — [RE].

oktav-o [OA 2.1] — [RE].

Oktobr' - Octobre | October | Oktober | Октябрь | Październik. — [DL]. [RE].

okul' - œil | eye | Auge | глазъ | oko. {ANAT} — **okulo** - œil | eye | Auge | глазъ | oko [FE 9]. — [UL] — Ni vidas per la okuloj kaj aŭdas per la oreloj [FE 9]. Sablero enfalis en mian okulon [FE 41]. — [DL 1888]: *Ni vidas per la okuloj [DL 2.7].*

● **okul'har'** - cils | eye-lash | Wimper | рѣсница | rzęsa. {ANAT}

● **okul'vitr'** - lunettes | spectacles | Brille | очки | okulary.

okult-a [OA 2.1] — [EG 2] (phil.) okkult.

okup' - occuper | occupy | einnehmen, beschäftigen | занимать | zajmować. — **okupi** - occuper | occupy | einnehmen, beschäftigen | занимать | zajmować [FE 32]. — [UL] — Kiu okupas sin je meĥaniko, estas meĥanikisto, kaj kiu okupas sin je ĥemio, estas ĥemiisto [FE 32.2].

● **okupo** — La kantado estas agrabla okupo [FE 40.9].

— **Lingva Respondo 1911 [„Okupita“ aŭ „okupata“?]**: Kiam pro ia laboro mi ne estas libera, mi diras ordinare “mi estas okup*i*ta”. Kelkaj personoj trovas, ke tio estas neĝusta; ke ĉar mi parolas pri laboro, kiu daŭras nun, mi devas diri “okup*a*ta”. Kelkfoje ŝajnis al mi, ke tiuj personoj estas pravaj, kaj tiam mi provis uzi “mi estas okup*a*ta” mi tamen tuj forĵetis tiun formon, kontraŭ kiu protestis mia lingva sento. Ĉu ni devas uzi en tiu esprimo la pasivon nuntempan aŭ pasintan, pri tio la lingvoj franca kaj angla ne povas doni al ni respondon, ĉar ili ne havas apartajn formojn por tiuj ambaŭ pasivoj; sed la lingvoj slavaj kaj germana uzas en la dirita okazo la pasivon *pasintan*, sekve ĉi tio estas jam sufiĉe grava motivo, por ke ankaŭ en Esperanto ni tiel agu. Sed eble la formo estas kontraŭlogika? Ne. Se iu ion okup*a*s (en la senco “prenas en posedon”), tiam en tiu momento la io estas okup*a*ta de la iu; ekzemple kiam la malamikoj okup*a*s nian urbon, ĝi estas en tiu momento okup*a*ta de ili; se mi estis tute libera, sed en la nuna momento oni donas al mi ian laboron, kiu min ekokupas, mi povas diri, ke mi estas nun okup*a*ta de tiu laboro, t.e. ĝi forprenas en sian posedon mian tempon; sed se mi parolas pri laboroj, kiuj estis donitaj al mi jam *antaŭe*, t.e. se mi parolas ne pri la *ago* de ekokupo mem, sed pri la *stato*, en kiu mi troviĝas, tiam mi devas diri “mi estas okup*i*ta”. Estas vero, ke, transformante la pasivan formon de la citita frazo en aktivan, ni ofte uzas la formon *nuntempan* (“laboroj min tre okup*a*s”), sed tion ni faras por tio, ke la formo “okup*i*s” ne pensigu, ke mia

okupiteco jam pasis. En la *pasiva* formo ni ne bezonas timi tiun malkompreniĝon, ĉar “mi estas okupita” montras, ke io min okupis kaj la okupiteco ankoraŭ *daŭras*. La senco de “okupi” havas du nuancojn: *preni* en posedon kaj *teni* en posedo; per la formo “mi estas okup*i*ta” ni esprimas samtempe *ambaŭ* nuancojn, dum la formo “mi estas okup*a*ta” esprimus nur la *unuan* nuancon. Cetere pri la vorto “okupi” mi devas ripeti tion, kion mi diris pri multaj aliaj lingvaj demandoj; ĉiufoje, kiam la logiko ne donas al ni respondon tute klaran kaj senduban, kiu ne ofendus nian lingvan senton, ni devas peni konformigi nin al la ekzistantaj *kutimoj;* kaj la kutimo de la popoloj, kiel mi supre montris, postulas, ke ni diru “mi estas okup*i*ta”. [Respondo 48, *Oficiala Gazeto*, III, 1911, p. 293].

okzal’ - oseille | sorrel | Ampfer | щавель | szczaw. {BOT} — [AK] sorrel (*plant*) | Sauerampfer. — [RE].

ol - que (dans une comparaison) | than | als | чѣмъ {чем (при сравнит, степени) [AK]} | niź. — **ol** - que (dans une comparaison) | than | als | чѣмъ | niź [FE 10]. — **ol** - Le „que” du comparatif se traduit par ol ... Ex.: pli blank’a ol neĝ’o - plus blanc que neige. | The word „than” is rendered by ol, e. g. pli blanka ol neĝo, „whiter than snow”. | Das Wort „als“ heißt ol. Z. B.: pli blank’a ol neĝ’o, weißer als Schnee. | слово „чѣмъ“ переводится ol. (Прим.: pli blank|a ol neĝ|o бѣлѣе снѣга) | wyraz „niż“ tłomaczy się przez ol. Przykład: Pli blank/a ol neĝ/o bielszy od śniegu [FG 3.4]. — [AK] чем (при сравнит, степени). — [UL] — Ol [FE 3]. — ... trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, kaj li perdus sian konfidon kaj apogon [A 4.6]. — Lakto estas pli nutra, ol vino [FE 10.15]. Mi havas pli freŝan panon, ol vi [FE 10.16]. Ne, vi eraras, sinjoro: via pano estas malpli freŝa, ol mia [FE 10.17]. Du homoj povas pli multe fari ol unu [FE 12.1]. La sepan tagon de la semajno Dio elektis, ke ĝi estu pli sankta, ol la ses unuaj tagoj [FE 12.15]. Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem [FE 18.13]. Fluanta akvo estas pli pura, ol akvo staranta senmove [FE 22.1]. Mono havata estas pli grava ol havita [FE 22.12]. Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota [FE 22.13]. La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, ... [FE 23.3]. Kiam vi venos al mi, li jam antaŭe diros al mi la veron (aŭ li estos dirinta al mi la veron; aŭ antaŭ ol vi venos al mi, li diros al mi la veron) [FE 24.6]. Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn [FE 25.10]. Li estas morte malsana, li ne vivos pli, ol unu tagon [FE 31.7]. La ekstero de tiu ĉi homo estas pli bona, ol lia interno [FE 31.13]. Liaj lipharoj estas pli grizaj, ol liaj vangharoj [FE 31.25]. Rekta vojo estas pli mallonga, ol kurba [FE 33.10]. Urbanoj estas ordinare pli ruzaj, ol vilaĝanoj [FE 37.3].

ole’ - huile | oil | Oel {legu: Öl} | масло (деревянное) | olej. — [AK] масло (жидкое - раст., животн. и минеральное). — [UL].

● **fiŝ’ole’** - huile de poisson | fish-oil | Thran {de 1901: Tran} | рыбій жиръ | tran [UV fiŝ’].

Oleandr-o, [OA 4] {fr} laurier-rose | {en} oleander | {de} Oleander, Rosenlorbeer | {it} oleandro | {es} adelfa | {pt} eloendro {en Brazilo pli konata kiel “espirradeira”} | {ca} llorer rosa. {BOT} — [EG 2].

oligarĥ’, oligark’ (3) [OA 7] — [Millidge].

Oligarĥi’, oligarki’ [OA 3.2] {en} oligarchy | {fr} oligarchie | {de} Oligarchie | {es} oligarquia | {pt} oligarchia {legu: oligarquia} | {it} oligarchia | {pl} --- {traduko mankas}. — [Beau].

oliv’ - olive | olive | Olive | маслина | oliwa. {BOT} — [RE].

omaĝ/o. [OA 9] Esprimo aŭ manifestaĵo de honora respekto al iu: *la ekspozicio estas omaĝo al la ĵus mortinta artisto*. — [PV 1930].

● **omaĝ/i**. [OA 9] Esprimi honoran respekton: *omaĝi al Zamenhof*. — [PV 1930].

omar’ - homard | lobster | Hummer | морской ракъ | homar. {ZOO} — [MV].

ombr’ - ombre | shadow | Schatten | тѣнь | cień. — **ombro** - ombre | shadow | Schatten | тѣнь | cień [FE 37]. — [UL] — Timulo timas eĉ sian propran ombron [FE 37.21]. — **Rim.**: Multaj trafoj en DL 17, „La Ombro“, traduko el Andersen.

ombrel’ - parapluie, ombrelle | umbrella | Schirm | зонтикъ | parasol. — [UL].

omnibus' [OA 1] omnibus | omnibus | Omnibus | омнибусъ | omnibus. — [EG 2]. — Kp. aŭtobuso [OA 8].

on' - marque les nombres fractionnaires; ex. kvar quatre - kvar'on' le quart | marks fractions; e. g. kvar four - kvar'on' a fourth, quarter | Bruchzahlwort; z. B. kvar vier - kvar'on' Viertel | означаетъ числительное дробное; напр. kvar четыре - kvar'on' четверть | oznacza liczebnik ułamkowy; np. kvar cztery - kvar'on' czwarta część, ćwierć. — **on** - marque les nombres fractionnaires; ex. kvar quatre - kvarono le quart | marks fractions; e.g. kvar four - kvarono a fourth, quarter | Bruchzahlwort; z.B. kvar vier - kvarono Viertel | означаетъ числительное дробное; напр. kvar четыре - kvarono четверть | liczebnik ułamkowy; np. kvar cztery - kvarono ćwierć [FE 14].

● **duono** — Tri estas duono de ses [FE 14.9]. Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; tial du metroj kostas kvar kaj duonon frankojn (aŭ da frankoj) [FE 14.11].

● **kvar'on'** - le quart | a fourth, quarter | Viertel | четверть | czwarta część, ćwierć. — **kvarono** - le quart | a fourth, quarter | Viertel | четверть | ćwierć [FE 14 on'].

● **kvinono** — Ok estas kvar kvinonoj de dek [FE 14.10]. Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro [FE 14.12].

● **sesono** — Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro [FE 14.12].

ond' - onde, vague | wave | Welle | волна | fala. — [UL].

oni - on | one, people, they | man | безличное мѣстоименіе множ. числа | zaimek nieosobisty liczby mnogiej. — **oni** - on | one, people, they | man | безличное мѣстоименіе множественнаго числа | zaimek nieosobisty liczby mnogiej [FE 11]. — [AK] zaimek nieosobisty. — [UL] — ... oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto [A 4.5]. Riĉigadi la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun [A 7.1]. ... oni devas ilin uzadi nur en la literaturo; ... [A 7.1]. — ... ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili [FE 11.2]. La pli juna filino, ..., estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi [FE 11.3]. Ci skribas (anstataŭ „ci" oni uzas ordinare „vi") [FE 16.2]. Oni diras, ke la vero ĉiam venkas [FE 16.19]. En la vintro oni hejtas la fornojn [FE 16.20]. Kiam oni estas riĉa (aŭ riĉaj), oni havas multajn amikojn [FE 16.21]. Oni ne forgesas facile sian unuan amon [FE 18.19]. Homo, kiun oni devas juĝi, estas juĝoto [FE 22.16]. La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, ... [FE 23.3]. Anstataŭ „la" oni povas ankaŭ diri „l'" ... [FE 27.4]. Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, ... [FE 27.5]. skribtablo aŭ skribotablo (= tablo, sur kiu oni skribas) [FE 27.6]. Lernolibron oni devas ne tralegi, sed tralerni [FE 31.22]. Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem [FE 32.3]. Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino; ... [FE 32.5]. Oni tiel malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron [FE 33.14]. Oni metis antaŭ mi manĝilaron, ... [FE 34.10]. Kun bruo oni malfermis la pordegon, ... [FE 38.8]. Post infekta malsano oni ofte bruligas la vestojn de la malsanulo [FE 39.5]. La domo, en kiu oni lernas, estas lernejo, kaj la domo, en kiu oni preĝas, estas preĝejo [FE 40.12]. Magazeno, en kiu oni vendas cigarojn, aŭ ĉambro, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarejo; skatoleto aŭ alia objekto, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarujo; tubeto, en kiun oni metas cigaron, kiam oni ĝin fumas, estas cigaringo [FE 40.15]. Skatolo, en kiu oni tenas plumojn, estas plumujo, kaj bastoneto, sur kiu oni tenas plumon por skribado, estas plumingo [FE 40.16]. ... la (tre malmultajn) vortojn kun «um» oni devas lerni, kiel simplajn vortojn [FE 42.9]. En malbona vetero oni povas facile malvarmumi [FE 42.12]. — Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enkonduko 1]. ... la vorto « frat'in'o », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enkonduko 2].

— **Lingva Respondo 1907 [Pri "onin" kaj "onia"]**: Akuzativo kaj pronomo poseda de la vorto "oni" estas per si mem formoj tute regulaj, kaj ĉiu havas plenan rajton ilin uzi, ĉar nenie en la "Fundamento"estas dirite, ke "oni" prezentas escepton el ĉiuj aliaj analogiaj pronomoj. Nur en la *praktiko*

oni ĝis nun ne uzadis la formojn “onin”kaj “onia”, ĉar preskaŭ en ĉiuj plej gravaj lingvoj la vorto “oni” ne ŝanĝiĝas kaj la akuzativigo kaj adjektivigo de tiu ĉi vorto sonus tre strange en la oreloj de la plimulto de la Esperantistoj. Sed en Esperanto la “nekutimeco” ne prezentas gravan kaŭzon por neuzado; tial, kvankam mi persone ĉiam evitas la diritajn formojn, tamen, se iu ilin uzus, mi neniel povus vidi en tio ĉi ian pekon kontraŭ la reguloj aŭ kontraŭ la komuna spirito de nia lingvo. [LR 106. Respondo 22, *La Revuo*, 1907, Aŭgusto].

oniks-o [OA 2.1] — [Beau].

onkl’ - oncle | uncle | Onkel | дядя | wuj, stryj. — **onklo** - oncle | uncle | Onkel | дядя | wuj, stryj [FE 9]. — [UL] — Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo [FE 9.9]. Li estas mia onklo, ĉar mia patro estas lia frato [FE 18.9]. Mia onklo ne mortis per natura morto, ... [FE 39.11].

● **onklino** — Mia onklino estas bona virino [FE 33.18].

onobrik-o [OA 2.2] esparsette, sainfoin | esparcet | Esparsette — [EG 2].

ont’ - marque le participe futur d’un verbe actif | ending of fut. part. act. in verbs | bezeichnet das Participium fut. act. | означаетъ причастіе будущаго времени дѣйствительнаго залога | oznacza imiesłów czynny czasu przyszłego. — **ont** - marque le participe futur d’un verbe actif | ending of fut. part. act. in verbs | bezeichnet das Participium fut. act. | означаетъ причастіе будущаго времени дѣйствит. залога | oznacza imiesłów czynny czasu przyszłego [FE 22]. — **ont** - Le *participe futur actif*, {est caractérisé} par *ont*: *far'ont'a* - devant faire, qui fera. | The future participle active ends in *ont*, e. g. *far'ont'a*, „he who will do”; *far'ont'e*, „about to do”. | Partizipium futuri aktivi - *ont*; *far'ont'a*, der machen wird. | Дѣйствит. залога будущ. времени - *ont* (*far|ont|a* который сдѣлаетъ). | Imiesłów czynny czasu przyszłego - *ont* (*far/ont/a* który uczyni). [FG 6ĝ].

● **estonta** — Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj [A 1.1]. ... severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta [A 1.3]. ... neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj [A 8.3]. — En la lingvo „Esperanto“ ni vidas la estontan lingvon de la tuta mondo [FE 22.10]. ... la edziĝa festo estos en la domo de liaj estontaj bogepatroj [FE 39.3].

● **far'ont'a** - devant faire, qui fera | he who will do | der machen wird | который сдѣлаетъ | który uczyni [FG 6ĝ].

● **far'ont'e** - about to do [FG 6ĝ].

● **Savonto** — Venu, ni atendas vin, Savonto de la mondo [FE 22.9].

● **venonta** — La tempo pasinta jam neniam revenos; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas [FE 22.8].

● **volonte** — “Tre volonte, mia bona,”; diris la bela knabino [FE 15.2]. Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi [FE 25.4]. Mi volonte plenumis lian deziron [FE 42.11].

— **Lingva Respondo 1908**: La esprimo “mi estas feliĉa akceptonte vin” estas bona, kvankam mi preferus diri pli simple “mi estas feliĉa, ke mi vin akceptos”. La frazo “mi inklinas ne faronte tion” ne ŝajnas al mi bona; mi dirus: “mi estas inklina ne fari tion”. [Respondo 40, *La Revuo*, 1908, Majo].

— **Lingva Respondo 1911**: Participo-substantivo en Esperanto signifas ordinare *personon* (aŭ objekton, kiu plenumas ian funkcion); se ni deziras doni al la participo alian sencon, ni devas uzi sufikson (ekzemple *aĵ* aŭ *ec*). Tial, laŭ mia opinio, la vorto “estonto” povas signifi nur “estonta persono”, sed ĝi ne povas signifi “estonta tempo” aŭ “estonta afero”, kiujn mi rekomendus traduki per la vortoj “estonteco” kaj “estontaĵo”. [LR 114 A, Respondo 46, *Oficiala Gazeto*, III, 1911, p. 291].

— **Lingva Respondo 1911 [La senco de la participa sufikso]**: Vd. je –ant’.

op’ - marque l’adjectif numéral collectif; ex. du deux - du’op’ à deux | marks collective numerals; e. g. tri three - tri’op’ three together | Sammelzahlwort; z. B. du zwei - du’op’ selbander, zwei zusammen | означаетъ числительное собирательное; напр. du два - du’op’ вдвоемъ | oznacza liczebnik zbiorowy; np. du dwa - du’op’ we dwoje. — **op** - marque ládjectif numéral collectif; ex. du deux - duope à deux | marks collective numerals; e.g. tri three - triope

three together | Sammelzahlwort; z.B. du zwei - duope selbander, zwei zusammen | означаетъ числительное собирательное; напр. du два - duope вдвоемъ | oznacza liczebnik zbiorowy; np. du dwa - duope we dwoje [FE 14]. — Aux adjectifs numéraux cardinaux on ajoute: … *op*, pour les numéraux *collectifs* | Ordinals are formed by adding the adjectival *a* to the cardinals … . Collective numerals add *op*, as *kvar'op'e*, „four together". | Ordnungszahlwörter entstehen, indem sie die Endung des Adjektivs annehmen; … . Sammelzahlwörter — durch *op*; z.B. *du'op'e*, selbander. | числительныя существительныя и нарѣчныя. (**Примѣры**: *…*; *du*|*op*|*e* вдвоемъ; … | Dla utworzenia liczebników porządkowych dodaje się końcówka przymiotnika, dla wielorakich … — *op*, dla podziałowych … . **Przykłady**: … *du/op/e* we dwoje; … [FG 4].

● **du'op'** - à deux | [angla mankas] | selbander, zwei zusammen | вдвоемъ | we dwoje [UV op']. — **duope** - à deux | [angla mankas] | selbander, zwei zusammen | вдвоемъ | we dwoje [FE 14 op']. — **du'op'e** — à deux | [angla mankas] | selbander | вдвоемъ | we dwoje [FG 4]. — Tiuj ĉi du amikoj promenas ĉiam duope [FE 14.13].

● **tri'op'** - three together [UV op']. — **triope** - three together [FE 14 op'].

● **kvar'op'e** - four together [FG 4].

● **kvinope** — Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn [FE 14.14].

opal' - opale | opal | Opal | опалъ | opal. {GEOL} — [RE].

oper' [OA 1] * opera | opera | Oper | опера | opera. {TEATR} — [RE].

operaci' [OA 1] * operation (chir.) | operation | Operation | операція | operacja. {MED} — [RE].

opi' [OA 1] * opium | opium | Opium | опій | opjum. — [RE].

opini' - penser, croire | mean | meinen | имѣть мнѣніе | sądzić, opiniować. — [AK] be of opinion, think | иметь мнение, полагать. — [RE].

● **opinio** - opinion | opinion | Meinung | мнѣніе | opinja [FE 19]. — Mia opinio estas: prenu mem akvon, se vi volas trinki [FE 19].

opon/i. [OA 8] Esprimi opinion kontraŭan al la opinio de iu alia kaj peni, ke tiu ne povu efektivigi la sian. — A. to oppose; F. s'opposer à, aller contre, contrecarrer; G. entgegenstellen, entgegen {pres-eraro, legu: entgegnen}, opponieren; H. {es} oponer; I. {it} opporsi; P. {pt} opor-se. — [E-isto 9/1893] [PV] {antaŭe opozici/o}.

oportun' - commode, ce qui est à propos | opportune, suitable | bequem | удобный | wygodny. — **oportuna** - commode, qui est à propos | opportune, suitable | bequem | удобный | wygodny [FE 15]. — [AK] bequem, gelegen. — [UL] — La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (...), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa [FE 27.3].

● **oportune** — Kaj ŝi tuj ... alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune [FE 15.3].

● **neoportuna** — Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ... ĝi povos proponi formon novan, ... [A 8.1].

opozici-o [OA 2.1] — [EG 2].

optativ-o (*gr.*) [OA 2.1] {GRAM} — [LInt 4/1898] [EG 2].

optik' [OA 1] optique | optics | Optik | оптика | optyka. — [RE].

optimism-o [OA 2.1] — [LInt 8/1896] [Beau].

optimist' [OA 1] optimiste | optimist | Optimist | оптимистъ | optymista. — [Beau].

or' - or (métal) | gold | Gold | золото | złoto. — **oro** - or (métal) | gold | Gold | золото | złoto [FE 25]. — [UL] — Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi [FE 25.9].

orakol' - oracle | oracle | Orakel | оракулъ | wyrocznia. — [RE]. — **Rim.**: Z proponis en sia „Cirkulera Letero al la ... LK – Pri Neologismoj" de 1906-11-22, ke „oraklo" estu paralele uzebla apud „orakolo" [LZ I 317].

oranĝ' - orange | orange | Apfelsine | апельсинъ | pomarańcza. {BOT} — [RE A].

orartor' [OA 1] * orateur | orator | Redner | ораторъ | mowca. — [RE].

Orbit-o, [OA 4] {fr} orbite (anat., astr.) | {en} orbit (anat., astr.) | {de} Augenhöhle, Planetenbahn | {it} orbita (anat., astr.) | {es} órbita (anat., astr.) | {pt} órbita | {ca} órbita {legu: òrbita}. {ANAT}{ASTR} — [LInt 9/1898] [Verax] {ne ĉe Z}.

ord' - ordre (arrangement) | order, arrange | Ordnung | порядокъ | porządek. — [UL].

orden' - ordre | order | Orden | орденъ | order. — [AK] ordre (*honorifique*) | order (*of knighthood, etc.*). — [RE].

ordinar' - ordinaire | ordinary | gewöhnlich | обыкновенный | zwyczajny. — **ordinara** - ordinaire | ordinary | gewöhnlich | обыкновенный | zwyczajny [FE 13]. — [UL].

● **ordinare** — Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, … [FE 13.1]. Ci skribas (anstataŭ „ci" oni uzas ordinare „vi") [FE 16.2]. … oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo [FE 27.5]. Urbanoj estas ordinare pli ruzaj, ol vilaĝanoj [FE 37.3].

● **eksterordinare** — … la verko perdus sian eksterordinare necesan karakteron de dogma fundamenteco [A 4.6].

ordon' - ordonner | order, command | befehlen | приказывать | rozkazywać. — **ordoni** - ordonner | order, command | befehlen | приказывать | rozkazywać [FE 20]. — [UL] — Ordonu al li, ke li ne babilu [FE 20.19].

● **ordono** — Mi restas tie ĉi laŭ la ordono de mia estro [FE 26.15].

orel' - oreille | ear | Ohr | ухо | ucho. {ANAT} — **orelo** - oreille | ear | Ohr | ухо | ucho [FE 9]. — [UL] — Ni vidas per la okuloj kaj aŭdas per la oreloj [FE 9.5]. Mi havas nur unu buŝon, sed mi havas du orelojn [FE 12.2].

orf' - orphelin | orphan | Waise | сирота | sierota. — [AK] orphelin (*subst.*). — [RE].

organ' [OA 1] * organe | organ | Organ | органъ | organ. — [RE].

organik/a. [OA 9] Rilata al la karbonkombinaĵoj: *organika ĥemio*. **—** [EG 2] (chem.) organisch.

● **ne/organik/a**. [OA 9] Rilata al ĉiuj substancoj aliaj ol la karbonkombinaĵoj: *neorganika ĥemio*. — [EV 1923] * (kemio), anorganisch(e Chemie).

organism' [OA 1] * organisme | organism | Organismus | организмъ | organizm. — [Beau].

organiz' [OA 1] * organiser | organize | organisieren | организовать | organizować.— [E-isto 1/1893] [EG 2]. {kp. organizaci/o E-isto 7/1892}.

orgasm/o. [OA 9] Pinto de seksa ekscitiĝo, karakterizata de fortaj sentoj de plezuro, de serio da muskolaj spasmoj, kaj ĉe viroj ordinare de spermeĵeto. — [EG 1], forstrekita en [EG 2].

orgen' - orgue | organ | Orgel | органъ | organ. {MUZ} — [AK] organ (*mus.*) | organy. {MUZ} — [RE].

orgi-o [OA 2.1] — [EG 2] Orgie.

orient' - est | east | Osten | востокъ | wschód. — [AK] east, orient. — [RE].

origin' [OA 1] origine | origin | Ursprung | происхожденіе | pochodzenie. — [EG 2]. {Verax: origen/o}.

original' [OA 1] * original | original | Original | оригиналъ | oryginał. — [RE]. — **Rim.**: BRO, grupo 8, substantivoj, piednoto 5: „Originalo (laŭ Zamenhof kaj laŭ la Unua Of.Ald., konforma al lingvoj angla, franca, germana, rusa, pola) = a) Primitiva manuskripto aŭ verko, kontraste kun kopioj, tradukoj... ; b) Homo ne imitanta aliajn, stranga. - Derivaĵo: originala, ekz-oj: a) "tio estas nur kopio de la originala pentraĵo" b) "ŝi estis en ĉio originala infano, silenta kaj pensanta". RIM.: ne konfuzu originala kun origina."

oriol-o [OA 2.2] loriot | golden thrush | Pirol {ZOO} — [EG 2] Pirol.

orkestr' [OA 1] orchestre | orchestra | Orchester | оркестръ | orkiestra. {MUZ} — [RE].

orkide-o [OA 2.1] {BOT} — [EG 2] Orchidee.

ornam' - orner | ornament | putzen | наряждать | zdobić. — [AK] ornament (vb.), adorn | schmücken, (ver)zieren, (an)putzen | украшать. — [RE].

ornitolog' (3) [OA 7] — [GD] {antaŭe ornitologi/ist/o}.

Ornitologi' [OA 3.2] {en} ornithology | {fr} ornithologie | {de} Ornithologie | {es} ornitologia | {pt} ornithologia {legu: ornitologia} | {it} ornitologia | {pl} --- {traduko mankas}. {ZOO} — [EG 2].

pov' - pouvoir | be able, can | können | мочь | módz. — **povi** - pouvoir | be able, can | können | мочь | módz [FE 11]. — [UL]. — Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi … [A 1.1]. Por ke ia regno estu forta kaj glora kaj povu sane disvolviĝadi, … [A 3.1]. … estas nur verkoj privataj, kiujn la esperantistoj - … - povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga [A 3.6]. … ŝanĝo, kiu povus kaŭzi disputojn kaj kiu en verko fundamenta ne povas esti tolerata [A 4.3]. … por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn oficialajn, …, de la vortoj kaj reguloj rekomendataj private, … [A 5.4]. Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos... [A 6.2]. Riĉigadi la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun … [A 7.1]. … ĉar nur pri tiaj vortoj ni povas esti certaj, ke nia adresato ilin nepre trovos en sia vortaro [A 7.1]. … aŭtoritata centra institucio … povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova [A 8.1]. … fari tion ĉi (…) povas ne apartaj personoj, sed nur ia centra institucio, … [A 9.4]. — … ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon; ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili [FE 11.2]. La pli juna filino, …, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi [FE 11.3]. Du homoj povas pli multe fari ol unu [FE 12.1]. … ĉiam subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune [FE 15.3]. La

falinta homo ne povis sin levi [FE 22.6]. … tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, … [FE 23.3]. Sed pri ŝia fratino ni povas diri, ke ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si; … [FE 23.4]. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (…), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, … [FE 27.3]. Anstataŭ „la" oni povas ankaŭ diri „l'" (…) [FE 27.4]. … se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo [FE 27.5]. Mi neniel povas kompreni, kion vi parolas [FE 28.10]. Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion „je" [FE 29.1]. Anstataŭ la vorto „je" ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio [FE 29.3]. … se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon [FE 29.8]. Ekzemple, ni povas diri "obei al la patro" kaj "obei la patron" (anstataŭ "obei je la patro") [FE 29.9]. … ni povas diri "pardoni al la malamiko" kaj "pardoni la malamikon", sed ni devas diri ĉiam "pardoni al la malamiko lian kulpon" [FE 29.11]. La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj [FE 30.2]. Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, … [FE 30.10]. Starante ekstere, li povis vidi nur la eksteran flankon de nia domo [FE 31.11]. Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem [FE 32.3]. Li estas tiel dika, ke li ne povas trairi tra nia mallarĝa pordo [FE 33.2]. La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo [FE 33.4]. La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon kaj mi devis uzi mian poŝan tranĉilon [FE 34.1]. Rakontu al mi vian malfeliĉon, ĉar eble mi povos helpi al vi [FE 41.5]. Mi kredeble ne povos veni al vi hodiaŭ, ĉar mi pensas, ke mi mem havos hodiaŭ gastojn [FE 41.8]. … ni ne povis atingi ian rezultaton, kaj ni disiris [FE 42.1]. En malbona vetero oni povas facile malvarmumi [FE 42.12]. — Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enk. 1]. — **Lingva Respondo 1910**: „Scipovi" kaj „povoscii" havas la saman signifon; mi konsilas uzi ĉiam „povoscii" (= tia sciado, kia donas la *povon* ion fari). [LR 41 A, let. al Podlipsky (1910-05-19). El „Praha Bulteno"]. — **Rim**.: Kp. kapabl', rajt', sukces'.

poz' [OA 1] * poser (phot.) | pose | posieren | позировать | pozować. — [1889]. [EG 2].

pozici' [OA 1] * position | position | Lage {2012 ankaŭ: Position} | позиція {de 1918: позиция} | pozycja. [1888]. [Verax].

pozitiv' [OA 1] * positif | positive | positiv, bestimmt | позитивный | pozytywny. — [RE].

pra' - primitiv, bis- | primordial, great- | ur- | пра- | pra-. — **pra** - bis-, arrière- | great-, primordial | ur- | пра- | pra- [FE 36]. — [AK] {en} great-, fore-, (*rel. to ancestors and descendants*).

● **pranepo** — La filoj, nepoj kaj pranepoj de reĝo estas reĝidoj [FE 36.12].

praktik' - pratique | practic | Praxis | практика | praktyka. — [AK] {en} practice (*of a profession*). — [DL] [RE].

pram' - prame | prame | Prahm | паромъ | prom. {MAR} — [AK] bac | ferry-boat, praam. — [RE].

prav' - qui a raison, qui est dans le vrai | right (to be in the right) | Recht habend | правый (напр. я правъ) | mający słuszność. — [UL]. [Beau] **prav**, qui a raison, Ex. : *Vi estas prava*, vous avez raison.

precip' - principalement, surtout | particularly | besonder {legu: besonders}, vorzüglich | преимущественно | szczególnie, przedewszystkiem. — **precipe** - principalement, surtout | particularly | besonders, vorzüglich | преимущественно | szczególnie [FE 34]. — [AK] преимущественно, особенно. — [MV]. — Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (precipe en la angla parto) tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2]. — Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, precipe aroj da bellanaj ŝafoj [FE 34.15].

preciz' - précis, juste | precise | genau, eben | точный | dokładny, ścisły. — [RE].

predik' - prêcher | preach | predigen | проповѣдывать | kazać (mieć kazanie). {RELI} — [RE].

predikat' - attribut | attribute | Prädikat | сказуемое | orzeczenie. {GRAM} — [AK] predicate *(gram.)* | orzeczenie (gram.). — [RE].

prefekt' [OA 1] * préfet | prefect | Präfekt, Vorsteher | префектъ | prefekt. — [RE].

prefer' - préférer | prefer | vorziehen | предпочитать | przekładać. — [AK] przekładać, woleć. — [RE].

prefikso - préfixe | prefix | Präfix | приставка | przybranka [FE 30, mankas en UV]. {GRAM} — [DL]. — Aldonante la prefikson „nen", ni ricevas vortojn neajn: nenia, nenial, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniu [FE 30]. — **prefiks'** [OA 1] préfixe | prefix | Präfix | префиксъ | przedrostek. — **prefiks'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [DL]: *... la lernantoj povu ... kompreni bone la signifon kaj la uzon de l' sufiksoj kaj prefiksoj* [DL III].

preĝ' - prier (Dieu) | pray | beten | молиться | modlić się. {RELI} — **preĝ'** - prier | [angla mankas] | beten | молиться | modlić się [UV ej']. — **preĝi** - prier (Dieu) | pray | beten | молиться | modlić się [FE 37]. — **preĝi** - prier | [angla mankas] | beten | молиться | modlić się [FE 13 ej']. — Preĝu al la Sankta Virgulino [FE 37.23].

● **preĝ'ej'** - église | [angla mankas] | Kirche | церковь | kościoł [UV ej']. — **preĝejo** - église | [angla mankas] | Kirche | церковь | kościół [FE 13 ej']. — ... la edziĝa soleno estos en la nova preĝejo, kaj la edziĝa festo estos en la domo de liaj estontaj bogepatroj [FE 39.3]. La domo, en kiu oni lernas, estas lernejo, kaj la domo, en kiu oni preĝas, estas preĝejo [FE 40.12].

prelat' [OA 1] * prelat | prélate | Prälat | прелатъ | prałat. {RELI}

preleg/i. [OA 8] Fari kiel kompetentulo instruan aŭ klerigan paroladon pri sufiĉe grava temo. — A. to lecture; F. faire une conférence; G. einen Vortrag ({eine} Vorlesung) halten; H. {es} tener una conferencia (lección, discurso) {2012: dar una conferencia}; I. {it} fare una conferenza; P. {pt} fazer preleção.

prelud' [OA 1] prélude | prelude | Präludium, Vorspiel | прелюдія | preludjum.

prem' - presser, comprimer | press | drücken, pressen | давить | cisnąć, uciskać.

premi' - prime | premium, prize | Prämie | премія | premia. — [AK] prix (*récompense*), prime | prize, reward *(subst.)*. — [RE].

premis-o [OA 2.1] {FILO}

pren' - prendre | take | nehmen | брать | brać. — **preni** - prendre | take | nehmen | брать | brać [FE 15]. — ... ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, ... [FE 15.6]. Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, kiu estis en la loĝejo [FE 19.4]. ... tio ĉi estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino, [FE 19.5]. Mia opinio estas: prenu mem akvon, se vi volas trinki." [FE 19.8]. Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo [FE 27.5]. Hodiaŭ estas bela frosta vetero, tial mi prenos miajn glitilojn kaj iros gliti [FE 34.7]. Kiam mi ien veturas, mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo [FE 35.12]. En la kota vetero mia vesto forte malpuriĝis; tial mi prenis broson kaj purigis la veston [FE 39.1]. — [Beau] **pren**, prendre (pas attraper, qui est *kapti*; voler, qui est *ŝteli* ; ni usurper, qui est *uzurpi*).

● **pren'o** - levée | trick | Stich (Kartensp.) | взятка (въ картахъ) | lewa, wziątka. {LUD} — [Beau] **preno**, prise, préhension (action de prendre) et levée (aux cartes).

● **pren'il'** - tenailles | tongs | Zange | щипцы | szczypce.

● **ĉirkaŭ'pren'** - embrasser | embrace | umarmen | обнимать | obejmować, ściskać [UV ĉirkaŭ].

● **part'o'pren'** - participer | participate | Theil nehmen {de 1996: teilnehmen} | участвовать | przyjmować udział [UV part'].

prepar' - préparer | prepare | bereiten, zubereiten | готовить | przygotowywać.

prepozici' - préposition | preposition | Vorwort, Präposition | предлогъ | przyimek. {GRAM} — **prepozicio** - préposition | preposition | Vorwort | предлогъ | przyimek [FE 27]. — [DL] [RE]. — Anstataŭ „la" oni povas ankaŭ diri „l'" (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo) [FE 27]. Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam nur la nominativon. Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj. ... tiel same ni ankaŭ diras: "la

birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon”, kaj la vortoj „ĝardenon”, „tablon” staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en” kaj „sur” tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton ... en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon „n” tute egale ĉu ia prepozicio starus aŭ ne. [FE 28]. Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion „je”. Anstataŭ la vorto „je” ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio. [FE 29].

prerogativ-o [OA 2.1] — [Beau] prérogative.

pres’ - imprimer | print (vb.) | drucken, prägen | печатать | drukować.

● **presata** — ... tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj ... [A 8.3].

● **represita** — Havante la karakteron de fundamento, la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti netuŝeblaj [A 4.1].

● **preseraro** — Mi permesis al mi nur korekti la preserarojn [A 4.3].

preskaŭ - presque | almost | fast, beinahe | почти | prawie.

preskrib/i. [OA 8] (pp leĝoj aŭ kuracistoj) Formale kaj aŭtoritate ordoni. — A. to prescribe F. prescrire, G. vorschreiben, verschreiben, H. {es} prescribir, I. {it} prescrivere, P. {pt} prescrever.

prestiĝ/o. [OA 9] Bona reputacio: *la Kongreso levos la prestiĝon de nia afero en la okuloj de la mondo*; *la kompanio perdis sian prestiĝon pro la trompo*. — [Christaller 1923] Prestige. [PV 1930].

● **prestiĝ/a**. Havanta prestiĝon; donanta prestiĝon al la posedanto, ricevinto, faranto k.s.: *prestiĝa universitato*; *prestiĝa verko*; *prestiĝa aŭto*; *prestiĝa premio*; *prestiĝa ago*.

pret’ - prêt, disposé | ready | fertig | готовый | gotowy. — [AK] fertig, bereit.

pretekst’ - prétexte | pretext | Vorwand | предлогъ, отговорка | pretekst, wymówka. — [RE].

pretend’ - prétendre | pretend | Anspruch machen | претендовать | pretendować, rościć prawa do czego. — [AK] lay claim to | beanspruchen. — [RE].

preter - outre | beside, along | vorbei | мимо | mimo. — [AK] beyond, past, by | vorbei | mimo, obok. — [RE]. — [Beau] **preter**, outre (la valeur exacte de ce mot est donnée par l'expression *passer outre*, qui signifie aller plus loin. Nous l'avons encore dans *outrepasser*).

preterit-o (*gr.*) [OA 2.1] {GRAM} — [EG 2] Präteritum.

prez’ - prix | price | Preis | цѣна | cena. — [AK] prix (*coût*) {de 1990: *cout*}.

prezent’ - présenter | present (vb.) | vorstellen | представлять | przedstawiać. — [AK] present *(vb.)*, introduce *(a person).*

● **prezentante** — ... tiel ekzemple la vorto « frat’in’o », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enk. 2].

● **re’prezent’** - représenter | represent | vertreten | быть представителемъ | reprezentować.

prezid’ - présider | preside | den Vorsitz haben, präsidiren {de 1901: präsidieren} | предсѣдательствовать | prezydować. — [RE].

pri - sur, touchant, de | concerning, about | von, über | o, объ | o. — **pri** - sur, touchant, de | concerning, about | von, über | o, объ | o [FE 7]. — [AK] von, über, betreffs.

● **pri’labor’** - labourer | elaborate, cultivate | bearbeiten | обработывать | obrabiać [UV labor’].

primitiv-a [OA 2.1] — [Beau] primitif.

primol’ - primevère | primrose | Schlüsselblume | баранчикъ (растеніе) | pierwiosnek {BOT}. — [AK] первоцвет, баранчик. — [RE].

princ’ - prince, souverain | prince | Fürst, Prinz | принцъ, князь | książe. — **princo** - prince | prince | Fürst, Prinz | принцъ, князь | książe [FE 19]. — Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris el la arbaro kaj petis de ŝi trinki (tio ĉi estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino, por vidi, kiel granda estos la malboneco de tiu ĉi knabino) [FE 19.5].

princip’ [A, mankas en UV]. — Tiun ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori kaj kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus la komenco de nia morto [A 1.5]. Mi montris en principo, kiamaniere la severa netuŝebleco de la « Fundamento » gardos ĉiam la unuecon de nia lingvo, ... [A 9.1]. — **princip’** [OA 1] * principe | principle | Prinzip, Grundsatz | принципъ |

zasada. — **princip'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7].

printemp' - printemps | spring time | Frühling | весна | wiosna. — **printempo** - printemps | spring time | Frühling | весна | wiosna [FE 39]. — [AK] springtime. — Printém-po [FE 2] — En la printempo la glacio kaj la neĝo fluidiĝas [FE 39.8]. — [DL 1888] *La printempa suno fluidigis la neĝon kaj la glacion [DL 13.2].*

prior-o (*ekl.*) [OA 2.1] {EKL}

prism' [OA 1] prisme | prism | Prisma | призма | pryzmat.

privat' - privé, particulier | private | privat | частный | prywatny. — [DL-Ald] [RE].

privilegi' - privilège | privilege | Vorrecht | привиллегія | przywilej. — [DL-Ald] [RE].

pro - à cause de, pour | for the sake of | um — willen, wegen | ради | dla. — **pro** - à cause de, pour | for the sake of | wegen | ради | dla [FE 21]. — [AK] ради, из-за | z powodu, dla.

Probabl' [OA 3.2] {en} probable | {fr} probable | {de} mutmasslich {legu: mutmaßlich}, wahrscheinlich | {es} probable | {pt} provavel {legu: provável} | {it} probabile | {pl} prawdopodobwy. **—** [EG 2] wahrscheinlich.

problem' [OA 1] * problème | problem | Problem, Aufgabe | задача, вопросъ | zadanie, zagadnienie.

Proced' [OA 3.1] {en} to proceed | {fr} procéder | {de} verfahren | {es} proceder | {pt} proceder | {it} procedere | {pl} --- {traduko mankas}.

procedur-o [OA 2.1]

pro'cent' - intérêt, pour cent | per cent | Procent {de 1901: Prozent} | процентъ | procent, odsetka.

● **pro'cent'eg'** - usure | usury | Wucher | лихоимство | lichwa.

proces' - procès | lawsuit, process | Process {de 1901: Prozess} | процесъ | proces, sprawa. — [AK] процесс. — [DL-Ald] [RE]. — Pro-cé-so [FE 2].

procesi' [OA 1] * procession | procession | Prozession | процессія | procesja. — [RE].

produkt' - produite | produce | erzeugen | производить | produkować. — [RE].

Profan' [OA 3.2] {en} profane | {fr} profane | {de} Profan {legu: profan} | {es} profano | {pt} profano | {it} profano | {pl} --- {traduko mankas}.

profesi' - profession | profession | Profession {ark.}, Gewerbe | профессія, занятіе | profesya. — [AK] Beruf, Gewerbe. — [RE].

profesor' [OA 1] * professeur | professor | Professor | профессоръ | profesor. — [DL]. [RE].

profet' - prophète | prophet | Prophet | пророкъ | prorok. {RELI} — [DL] [RE].

profil' [OA 1] profil | profile | Profil | профиль | profil.

profit' - profiter | profit, gain | gewinnen, Nutzen ziehen | имѣть барышъ | mieć kozyść. — [AK] иметь барыш, воспользоваться | mieć korzyść, zyskać. — [RE].

profund' - profond | deep | tief | глубокій | głęboki.

prognoz' [OA 1] pronostic | prognosis | Prognose | прогнозъ | prognoza.

program' [OA 1] * programme | programme | Programm | программа | program. — [RE].

progres' - avancer | advance, progress | fortschreiten | прогрессировать | postępować. — [AK] robić postępy. — [DL-Ald] [RE].

projekci' [OA 1] * projection | projection | Projektion | проекція | projekcja.

projekto - projet | project | Entwurf | проектъ | projekt [FE 25, mankas en UV]. — Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn [FE 25]. — **projekt-o** [OA 2.2] project {legu: projet} | project | Entwurf, Plan. — **projekt'** (2) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [RE].

proklam' - proclamer | proclaim | proklamiren {de 1901: proklamieren} | прокламировать | proklamować. — [AK] оглашать, провозглашать, обнародовать. — [RE].

prokrast' - remettre, retarder | delay, retard | aufschieben, verzögern | отстрочивать | prolongować. — [AK] delay, defer | отсрочивать, откладывать | odkładać, zwłóczyć. — [RE].

proksim' - proche, près de | near | nahe | близкій | blizki. — **proksima** - proche, près de | near | nahe | близкій | blizki [FE 13]. — La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej proksima arbaro [FE 21.6]. Aldonante al la vortoj montraj la vorton „ĉi", ni ricevas montron pli proksiman

[FE 30.7]; ekzemple: tiu (pli malproksima), tiu ĉi (aŭ ĉi tiu) (pli proksima); tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime) [FE 30.8].

● **proksime** - ... ekzemple: tiu (pli malproksima), tiu ĉi (aŭ ĉi tiu) (pli proksima); tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime) [FE 30.8].

● **malproksima** - Inter aliaj aferoj tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko kaj alporti domen plenan grandan kruĉon [FE 13.3]. ... ekzemple: tiu (pli malproksima), tiu ĉi (aŭ ĉi tiu) (pli proksima); tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime) [FE 30.8].

● **malproksime** - ... ekzemple: tiu (pli malproksima), tiu ĉi (aŭ ĉi tiu) (pli proksima); tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime) [FE 30.8].

prolet/o. [OA 8] Moderna formo de: proletario. — A. proletarian, F. prolétaire, G. Proletarier, (Prolet), H. {es} proletario, I. {it} proletario, P. {pt} proletário. — [OA 8] II.A.3. Estas oficialigitaj la novaj formoj buĝeto kaj proleto apud la jam oficialaj budĝeto kaj proletario.

Proletari' [OA 3.2] {en} proletarian | {fr} prolétaire | {de} Proletarier | {es} proletario | {pt} proletario {legu: proletário} | {it} proletario | {pl} proletarjusz. — [RE]. [Kabe] — [OA 8] II.A.3. Estas oficialigitaj la novaj formoj buĝeto kaj proleto apud la jam oficialaj budĝeto kaj proletario.

prolog' [OA 1] * prologue | prologue | Prolog | прологъ | prolog.

promen' - se promener | walk, promenade | spazieren | прогуливаться | spacerować. — **promeni** - se promener | walk, promenade | spazieren | прогуливаться | spacerować [FE 12]. — [AK] to walk, promenade. — Li promenas kun tri hundoj [FE 12.3]. Tiuj ĉi du amikoj promenas ĉiam duope [FE 14.13]. En varmega tago mi amas promeni en arbaro [FE 34.11].

● **promenante** — Promenante sur la strato, mi falis [FE 22.2]. ... unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis [FE 39.11].

promes' - promettre | promise | versprechen | обѣщать | obiecywać.

promontor' - promontoire, cap | promontory, cape | Vorgebirge | мысъ | przedgórze. {GEO} — [AK] przylądek. — [RE].

pronom' - pronom | pronoun | Fürwort | мѣстоименіе | zaimek. {GRAM} — **pronomo** - pronom | pronoun | Fürwort | мѣстоименіе | zaimek [FE 30]. — [RE]. — La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj [FE 30.2].

Prononc' [OA 3.1] {en} to pronounce | {fr} prononcer | {de} aussprechen | {es} pronunciar | pronunciar | {it} pronunziare | {pl} --- {traduko mankas}. — Kp. el'parol' [UV parol'].

propagand' [OA 1] propagande | propaganda | Propaganda | пропаганда | propaganda. — [RE].

propon' - proposer, offrir | propose, suggest | vorschlagen | предлагать | proponować. — [UL]. [Kabe] **Proponi.** Prezenti ideon, projekton plenumotan, objekton akceptotan*: proponi al iu rekompencon por la servo; proponi reformojn.* **Propono.** Vortoj, objekto de tiu, kiu proponas.

proporci' [OA 1] proportion | proportion | Proportion | пропорція | proporcja. — [Beau].

propozici-o [OA 2.2] (*gram.*) proposition | sentence | Satz (gefüge) {GRAM} — [EG 1].

propr' - propre (à soi) | own (one's own) | eigen | собственный | własny. — **propra** - propre (à soi) | own (one's own) | eigen | собственный | własny [FE 23]. — [UL]. — … ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si; … [FE 23.4]. … rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra … [FE 27.3]. Timulo timas eĉ sian propran ombron [FE 37.21].

prospekt' [OA 1] prospectus | prospectus | Prospekt | проспектъ (объявленіе) | prospekt. — [RE].

prosper' - réussir | prosper | gelingen | удаваться | udać się. — [AK] to succeed in | glücken, gedeihen | udać się, powodzić się. — [RE].

prostat/o. [OA 9] Glando de viro kaj de multaj vir-mamuloj, troviĝanta ĉe la veziko, kaj produktanta parton de la sperma likvo. {ANAT} — [Vérax 1910] prostate. [PV 1930].

prostitu-i (*trans.*) [OA 2.1] — [EG 2] prostitu-i. [EG 1] prostit-i.

protagonist-o [OA 2.1] — [Beau] protagoniste.

protein/o. [OA 9] Substanco, kiu estas (apud sukeroj kaj grasoj) ĉefkonsistaĵo de ĉiuj vivaĵoj, kaj grava parto de la manĝaĵoj de homoj kaj bestoj, konsistanta precipe el karbono, oksigeno, azoto, hidrogeno kaj sulfuro: *ovoblankaĵo enhavas proteinojn kaj akvon*. {KEM} — [GD 1955] protéine (ch.).

protekt' [OA 1] * protéger | protect, patronise | beschützen | покровительствовать | protegować, bronić. — [Beau]. [DL] proteg'.

protektorat-o [OA 2.1] — [LInt 6-7/1896]. [EG 1] Protektorat.

protest' [OA 1] * protester | protest | protestieren | протестовать | protestować. — [RE].

protokol' [OA 1] protocole | minutes of proceedings | Protokoll | протоколъ | protokoł. — [RE].

prototip-o [OA 2.1] — [EG 1] Prototyp, Urbild.

prov' - essayer | attempt, trial | versuchen, probiren {de 1901: probieren} | пробовать | próbować. — [AK] essayer, éprouver | attempt, try to | испытывать, пробовать. — [UL]. [DL]: *Anstataŭ provi praktike (...), ĉu la lingvo, proponita de mi, taŭgas por internacia kompreniĝo ...* [DL I.3]. ... *anstataŭ provi per ilia propra orelo, ĉu mia lingvo estas bonsona aŭ ne* ... [DL I.3]. ... *ĉiuj necesaj ŝanĝoj, antaŭe analizitaj kaj provitaj, estos publikigitaj* ... [DL I.4]. ... *la plej granda parto de tiuj konsiloj estas ne praktika kaj kaŭzita de ne sufiĉa pripensado kaj provado de l' afero* [DL I.4]. *Kelkaj provis montri al mi, ke mia projekto de l' voĉdono estas* matematike *ne ebla* [DL II.3.1]. ... *egale grava demando estas, ĉu li estas sufiĉe instruita. Mi provos lin ekzameni* [DL 16.57]. ... *pripensinte kaj provinte antaŭe ĉiujn juĝojn kaj proponojn* ... [DL-Ald 1]. *Al ĉiuj ŝanĝoj, kiujn la internacia kongreso de instruituloj post fonda provado trovos necesaj* ... [DL-Ald 9]. — Kp. klopod' [RE].

proverb' - proverbe | proverb | Sprichwort | пословица | przysłowie. — [DL]: *La popoldiroj (proverboj) esprimas la saĝon de l' popolo, kaj la popolrakontoj (legendoj) esprimas ĝian kredon* [DL 16.24]. [RE].

Providenc' [OA 1] * Providence | Providence | Vorsehung | Провидѣніе | Opatrzność. — [Kabe].

provinc' - province | province | Provinz | область, провинція | prowincya. — **provinco** - province | province | Provinz | область, провинція | prowincya [FE 37]. — [RE].

● **provincano** — Li estas nelerta kaj naiva provincano [FE 37.10].

● **provincestro** — Nia provincestro estas severa, sed justa [FE 37.6].

proviz' - pourvoir, garnir de | provide | versehen, versorgen | запасать | robić zapasy. — [RE].

provizor' [OA 1] * provisoire | provisional | provisorisch | временный | prowizoryczny, czasowy. — [RE].

Provok-i [Z], [OA 4] {fr} défier, provoquer | {en} to provoke, defy, challenge | herausfordern, provozieren | {it} sfidare, provocare | {es} provocar, desafiar | {pt} provocar | {ca} provocar, desaffiar {legu: desafiar}.

proz' [OA 1] * prose | prose | Prosa | проза | proza. — [RE].

prozelit-o [OA 2.1] — [Beau] prosélyte.

prozodi' [OA 1] prosodie | prosody | Prosodie | просодія | prozodja. — **prozodi-o** [OA 2.1] {jam oficialigita per OA 1}

prudent' - prudent, raisonnable | prudent | verständig | благоразумный | rozsądny. — [AK] raisonnable, sensé | reasonable.

prujn' - gelée blanche, frimas | rime, hoar frost | Reif (gefror. Thau) {de 1901: gefror[ener] Tau} | иней | szron. {METEO} — Prúj-no [FE 2]. — [RE].

prun' - prune | plum | Pflaume | слива | śliwka. {BOT} — [RE].

prunel' - prunell {legu: prunelle} | sloe | Dornschlehe | терновникъ | tarnośliwa. {BOT} — [AK] prunelle (*bot.*) | Schlehenpflaume. — [RE].

prunt' - en prêt | lent, borrowed | leihen, borgen | взаймы | pożyczać. — **prunti** - prêter | lend, borrow | leihen, borgen | взаймы давать или брать | pożyczać [FE 14]. — [AK] en prêt, prêter, emprunter | borrow, loan. — [UL] — Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; due mi dankas vin por la prunto; trie mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon [FE 14.6].

● **prunto** — ... mi dankas vin por la prunto ... [FE 14.6].

— **Rim.**: взаймы | взаймы | pożyczać | en prêt | leihen, borgen | to borrow, to lend {tiel kun -d} [UL]. — взаймы *prunt'e* [RE 16]. — *prunt'* leihen, borgen [MV 56]. — BRO 5 prunto {substantivo; kun piednoto 2}: Prunto, speco de neformala kontrakto (ktp., vd. P.I.V. [1970]); ĝi estas dudirekta kontrakto (por la donanto, por la prenanto) same kiel kredito kaj aliaj kontraktoj; de ĝi deriviĝas: prunte = per prunto (per tia kontrakto) kaj prunti = manifestiĝi per prunto, do la verbo restas same neŭtralsignifa kaj povas esti precizigita per esprimoj kiel deprunti, alprunti, aŭ pruntepreni/pruntedoni ... (vd. Fundamento, 9-a eld., p. 334). [Aktoj II 42].

pruv' - prouver | prove, demonstrate | beweisen | доказывать | dowodzić.

psalm' [OA 1] * psaume | psalm | Psalm | псаломъ | psalm.

pseŭdonim-o [OA 2.1] — [Beau] pseudonyme.

psikologi-o [OA 2.1] — [Beau] psychologie.

psikolog-o [OA 2.1].

pub/o. [OA 9] La malsupra parto de la ventro, ĉe plenkreskuloj normale kovrita de haroj, kovranta la antaŭan parton de la koksosto. {ANAT} — [Vérax 1910] pubis. [PV 1930].

● **pub/ost/o**. [OA 9] Antaŭa parto de la koksosto. {ANAT} — [Vérax 1910] *pubis*, *os pubis*, la malsupra kaj antaŭa parto de la koksosto. [PV 1930].

publik' - public | public | Publikum | публика | publika.

● **publik'a** - public | public, common | öffentlich | публичный | publiczny. — [RE A]: publik'a vend' {= aŭkcio}

pudel' - barbet | spaniel | Pudel | пудель | pudel {ZOO}. — [RE].

puding' [OA 1] pouding | pudding | Pudding | пуддингъ | budyń. {KUIR}

pudr' - poudre | powder | Puder | пудра | puder. — [AK] poudre (*pour la toilette*) | powder *(cosmetic)*. — [RE].

Puf' [OA 3.1] {en} stuffing, puff | {fr} bouffant, bourrelet | {de} Puff, Bausch | {es} fofo, abofollade | {pt} fofô {legu: fofo} | {it} sboffo, rigonfiamento | {pl} --- {traduko mankas}.

pugn' - poing | fist | Faust | кулакъ | kułak. {ANAT} — [AK] kułak, pięść. — [RE].

pul' - puce | flea | Floh | блоха | pchła. {ZOO} — [RE].

pulĉinel' [OA 1] polichinelle | punchinello | Hanswurst | полишинель | poliszynel {TEATR}.

pulm' - poumon | lung | Lunge | легкое | płuco. {ANAT} — [RE].

pulp/o [OA 9] **1** Fruktokarno. Mola, karneca parto de frukto aŭ legomo. **2** Kunteniĝema maso de mola vegetaĵa materio: *pulpo de sukerbetoj*; *ligna pulpo* (el kiu oni faras paperon). **3** Mola aŭ duonmola parto de kelkaj organoj: *denta pulpo* (= interna parto de dento); *liena pulpo*. — [PV 1930] {dif. 1 kaj 3}.

puls' [OA 1] * pouls | pulse | Puls | пульсъ | puls. — [RE].

pulv' - poudre à tirer | gunpowder | Pulver (Schiess-) | порохъ | proch. — **pulvo** - poudre à tirer | gunpowder | Pulver (Schiess-) {legu: (Pulver, Schießpulver} | порохъ | proch [FE 41]. — [AK] proch (strzelniczy). — Unu fajrero estas sufiĉa, por eksplodigi pulvon [FE 41.18].

pulvor' - poudre | powder | Pulver (zu Arznei u. drgl. {und dergleichen}) | порошокъ | proszek. {MED} — [AK] poudre (*matière pulvérisée*) | powder *(med. or chem.)*.

pumik' - pierre-ponce | pumice-stone | Bimstein {pres-eraro, legu: Bimsstein} | пемза | pumeks. — [RE].

pump' - pomper | pump | pumpen | выкачивать насосомъ | pompować. — [AK] pump *(vb.)*. — [RE].

pun' - punir | punish | strafen | наказывать | karać. {JUR} — **puni** - punir | punish | strafen | наказывать | karać [FE 20]. — Se la lernanto scius bone sian lecionon, la instruanto lin ne punus [FE 20.12].

punc' - ponceau | crimson red | ponceau | пунцовый | ponsowy. {KEM} — [RE].

punĉ' - punch | punch | Punsch | пуншъ | poncz. {KUIR} — [AK] punch *(drink)*. — [RE].

pund/o. [OA 9] Monunuo de Britujo k.a. landoj: *ĝi kostas dek pundojn kaj kvindek pencojn*. {MON} — [GD 1955] livre sterling (mon.).

punkt' - point | point | Punkt | точка, пунктъ | punkt, kropka. — [AK] full stop, dot, point. — [DL] [RE].

● **punkt'o'kom'** - point et virgule | semicolon | Semikolon | точка съ запятою | średnik. {GRAM}

● **du'punkt'** – deux points | colon | Kolon {2012 pli kutima: Doppelpunkt} | двоеточіе | dwukropek. {GRAM}

punt' - dentelle | lace | Spitzen | кружево | koronka. — [AK] lace *(point, etc.).* — [RE].

pup' - poupée | doll | Puppe | кукла | lalka. — **pupo** - poupée | doll | Puppe | кукла | lalka [FE 18]. — La infano serĉis sian pupon; mi montris al la infano, kie kuŝas ĝia pupo [FE 18.18].

pupil' - pupille (de l'œil) | pupil | Pupille | зрачекъ | żrenica. {ANAT} — [AK] pupil *(eye).* — [RE].

pupitr' [OA 1] pupitre | reading-desk | Pult | пюпитръ | pulpit.

pur' - pur, propre | pure | rein | чистый | czysty. — **pur'** - pur, propre | pure | rein | чистый | czysty [UV ig']. — **pura** - pur, propre | clean, pure | rein | чистый | czysty [FE 8]. — **pura** - pur, propre | pure | rein | чистый | czysty [FE 13 ig']. — [AK] clean, pure. — La mano de Johano estas pura [FE 8.7]. ... ŝi ... ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto ... [FE 15.3]. Fluanta akvo estas pli pura, ol akvo staranta senmove [FE 22.1]. ... oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo [FE 27.5].

● **purema** — Li estas tre purema, kaj eĉ unu polveron vi ne trovos sur lia vesto [FE 41.17].

● **pur'ig'** - nettoyer | purify | reinigen | чистить | czyścić [UV ig']. —**purigi** - nettoyer | purify | reinigen | чистить | czyścić [FE 13 ig']. — ... mi prenis broson kaj purigis la veston [FE 39.1].

● **malpuriĝi** - En la kota vetero mia vesto forte malpuriĝis; tial mi prenis broson kaj purigis la veston [FE 39.1].

purgatori-o [OA 2.2] purgatoire | purgatory | Fegefeuer {RELI}

puritan-o [OA 2.1] {RELI} — [Beau] puriten {kun -e-} puritain.

purpur' - pourpre | purple | Purpur | пурпуръ | purpura. — [RE A]. — **Rim.**: Z proponis en sia „Cirkulera Letero al la ... LK – Pri Neologismoj" de 1906-11-22, ke „purpo" estu paralele uzebla apud „purpuro" [LZ I 317].

pus' - pus | pus, matter | Eiter | гной | gnój, ropa, materya. {MED} — [AK] ropa, materya. — [RE].

puŝ' - pousser (impulsion) | push | stossen | толкать | pchać.

pustul' [OA 1] * pustule | pustule | Pustel | пустула | krosta.

put' - puits | well (subst.) | Brunnen | колодезь {de 1918: колодец} | studnia. — [RE].

putor' - putois, furet | pole-cat, ferret | Iltiss {2012: Iltis} | хорекъ | tchórz. {ZOO} — [AK] pole-cat, skunk. — [RE].

putr' - pourrir | rotten | faulen | гнить | gnić. — [AK] pourrir (*intr.*) | rot, putrify.

R

Rr - r | r as in "rare" | r | p | r [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **ro** ... [FE 1]. — **ro** [OA 7] = nomo de la litero **r**, dudekunua litero de la Esperanta alfabeto. — Lingva Respondo 56 (1893): La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

rab' - piller | rob | rauben, plündern | грабить | rabować, grabić. — [RE].

rabarb' [OA 1] rhubarbe | rhubarb | Rhabarber | ревень | rabarbar. {BOT} — [RE].

rabat' - rabais, concession | rebate, discount | Rabatt | уступка, скидка | rabat, ustępstwo. — [RE].

raben' - rabbin | Jewish rabbi | Rabbiner | раввинъ | rabin. {RELI} — [RE].

rabi' [OA 1] rage (méd.) | rabid, rabies | Tollwut | бѣшенство | wścieklizna.

rabot' - raboter | plane | hobeln | стругать | strugać, heblować. — [AK] plane *(vb.).* — [RE].

raci' [OA 1] * rationnel | rational | rational, vernünftig | ціональный | racjonalny.

racionalism-o [OA 2.1] — [Beau] rationalisme. [EG 2] racional-ism-o.

racionalist-o [OA 2.1] — [Beau] rationaliste. [EG 2] racional-ist-o.

rad' - roue | wheel | Rad | колесо | koło (od woza i t. p.). — **rado** - roue | wheel | Rad | колесо | koło (od woza i t. p.) [FE 39].

— [UL] — ... li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis [FE 39.11].

radar/o. [OA 9] Aparato, kiu ebligas ekkoni karakterizaĵojn de la pozicio kaj rapido de objektoj per reflektiĝo de elektromagnetaj ondoj. — [GD 1955] radar.

radi' - rayon (de lumière, de roue) | beam, ray | Strahl | лучъ | promień. — [AK] луч, спица (колеса). — [UL].

radiator/o. [OA 8] Aparato — ordinare tubaro entenanta akvon, oleon, vaporon aŭ varman aeron — aŭ maŝinorgano, kiu disradias varmon ĉirkaŭ si, ĉu por hejti lokon, ĉu por malvarmigi maŝinparton aŭ sistemon (kiel ekz-e: eksplod-motoron); ankaŭ elektra hejtilo. — A. radiator, F. radiateur, G. Heizkörper, Kühler, H. {es} radiador, I. {it} radiatore, P. {pt} radiador. — [PVS].

radik' - racine | root | Wurzel | корень | korzeń. — **radiko** - racine | root | Wurzel | корень | korzeń [FE 27]. — [UL] — Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo [FE 27.5].

radikal' [OA 1] * radical | radical | radikal | радикальный | radikalny. — [LInt 2/1896] [Beau].

radiograf/i. [OA 9] Fotografi (ekz. organon) per iks-radioj: *radiografi pulmojn*. — [GD 1955] radiografi/o radiographie.

rafan' - raifort | radish | Rettig | рѣдька | rzodkiew. {BOT}{KUIR} — [RE].

rafin' - raffiner | refine | raffiniren {de 1901: raffinieren} | рафинировать, изощрять | rafinować. — [AK] рафинировать, химически очищать, изощрять. — [Einstein 1888] [RE].

rajd' - aller à cheval | ride | reiten | ѣздить верхомъ | jeździć konno. — **rajdi** - aller à cheval | ride | reiten | ѣздить верхомъ | jeździć konno [FE 7]. — [RE]. — Kiu kuraĝas rajdi sur leono? [FE 7.6].

raj-o [OA 2.2] (*zool.*) raie | ray (*fish*) | Roche (n) {ZOO}

rajt' - droit (le) | right, authority | Recht, Befugniss {de 1901: Befugnis} | право | prawo, racya, słuszność. {JUR} — [AK] prawo (mieć prawo). — [RE]. — ... tiam aŭtoritata komitato, ..., havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn ... [A 1.2]. Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon! [A 1.4]. ... tute difinitajn fundamentajn leĝojn de sia lando, kiuj estas egale devigaj por la regantoj kaj regatoj kaj en kiuj neniu havas la rajton fari arbitre laŭ persona bontrovo ian ŝanĝon aŭ aldonon [A 3.1]. ... ĉar ĝi apartenas al la fundamenta dokumento, en kiu neniu havas la rajton fari ian ŝanĝon [A 4.7].

● **rajt'ig'** - donner plein pouvoir | empower | bevollmächtigen | уполномочивать | upoważnić, umocować, dać plenipotencyę.

raked/o. [OA 9] Plata pilkobatilo, konsistanta el kadro kun reto de interplektitaj streĉitaj ŝnuroj, kaj kun longa tenilo, uzata en teniso kaj similaj sportoj. — [GD 1955] raquette (sp.).

raket' [OA 1] * fusée | rocket | Rakete | ракета | rakieta. — [Beau].

rakont' - raconter | tell, relate | erzählen | разсказывать | opowiadać. — **rakonti** - raconter | tell, relate | erzählen | разсказывать | opowiadać [FE 10]. — [UL] — Rakontu al mia juna amiko belan historion [FE 10.6].]. La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi, kaj, dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj [FE 17.8]. Mi rakontos al vi historion [FE 18.6]. Ŝi rakontis al li sian tutan aventuron [FE 23.2]. Rakontu al mi vian malfeliĉon, ĉar eble mi povos helpi al vi [FE 41.5]. Li rakontis al mi historion tute nekredeblan [FE 41.6]. Li estas tre kredema: eĉ la plej nekredeblajn aferojn, kiujn rakontas al li la plej nekredindaj homoj, li tuj kredas [FE 41.14].

ramp' - ramper | crawl | kriechen | ползать | pełzać. — [UL].

● **ramp'aĵ'** - reptile | reptile | Reptil | пресмыкающееся | gad.

ran' - grenouille | frog | Frosch | лягушка | żaba. {ZOO} — **rano** - grenouille | frog | Frosch | лягушка | żaba [FE 19]. — [RE]. — „Bone, ĉar vi estas tiel servema, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano.“ [FE 19.10] “Jes, patrino”, respondis al ŝi la malĝentilulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon [FE 21.2].

ranc' - rance | rancid | ranzig | прогорклый | jełki, przygorzki. — [MV].

rand' - bord, extrémité | edge | Rand | край | brzeg. — [AK] edge, border, hem *(s.)* | край (граница). — [UL].

rang' - rang, rangée, dignité | rank, dignity | Rang | рангъ | ranga. — [AK] ранг, степень, чин. — [RE].

ranunkol' - renoncule | ranunculus | Ranunkel | лютикъ | jaśkier. {BOT}

rap' - rave | turnip | Rübe | рѣпа | rzepa. {BOT}{KUIR} — [AK] weisse Rübe {legu: weiße Rübe}. — [RE].

rapid' - rapide, vite | quick, rapid | schnell | быстрый | prędki, bystry. — **rapida** - rapide, vite | quick, rapid | schnell | быстрый | prędki [FE 26]. — [UL].

● **rapide** — Nu, iru pli rapide! [FE 26.26].

rapir' - fleuret | foil | Rappier | рапира | rapir. {MIL} — [AK] rapière, fleuret | rapier, foil. — [RE].

raport' - rapporter | report | berichten, melden | доносить, докладывать | meldować. — [AK] zdawać sprawę, meldować. — [RE].

ras' [OA 1] * race | breed | Rasse | paca | rasa.

rasp' - râper | rasp | raspeln | терпужить | raszplować.

rast' - râteler | rake | harken | грести, скребать | grabić. — [AK] râteler, ratisser | rake *(vb.)* | сгребать граблями | grabić (np. siano). — [RE].

rat' - rat | rat | Ratte | крыса | szczur {ZOO}. — [RE].

raŭk' - rauque, enroué | hoarse | heiser | хриплый | ochrypły. — [RE].

raŭp' - chenille | caterpillar | Raupe | гусеница | gąsienica {ZOO}. — [RE].

rav' - ravir, enchanter | ravish | entzücken | восхищать | zachwycić. — [AK] enrapture, delight. — [RE].

raz' - raser, faire la barbe | shave | rasiren {de 1901: rasieren} | брить | golić. — [UL].

re' - de nouveau, de retour; re-, ré- | again, back | wieder, zurück | снова, назадъ | znowu, napowrót. — **re** - de nouveau, de retour | again, back | wieder, zurück | снова, назадъ | znowu, napowrót [FE 14]. — [RE].

● **ree** — Ré-e [FE 3].

● **remalsano** - remalsano [FE 42.13].

● **remalsaniĝo** - remalsaniĝo [FE 42.13].

● **re'prezent'** - représenter | represent | vertreten | быть представителемъ | reprezentować [UV prezent'].

● **re'sum'** - résumer | resume | resumiren {de 1901: resümieren} | подводить итогъ | sumować.

— **Lingva Respondo 1906 [Pri *re*]**: Ĉi tiu prefikso montras *revenon al la loko aŭ al la stato, de kiu oni iris*. Sekve:

1. Se A donis ion al B, kaj la donita objekto estas denove ĉe A, ni diras, ke B *redonis* ĝin, A *reprenis* ĝin, la objekto *revenis* al A. Spegulo *reĵetas* la radiojn, kiuj falas sur ĝin. La pilko *resaltis* de la tero.

En ĉi tiuj okazoj *re* montras revenon al la punkto de deiro.

2. Se mi faris ion, kaj mi ĝin faras ankoraŭ unu fojon, mi ankaŭ revenas (en mia ago) al la punkto, de kiu mi iris. Sekve ni diras *refari* (fari denove tion, kion oni jam faris), *rekanti* (ripeti kanton), *rejuniĝi* (fariĝi denove juna), *resaniĝi* (fariĝi denove sana) k.t.p.

En ĉi tiuj lastaj okazoj *re* montras la ripeton.

(Ĉi tiu klarigo estas donita kaj redaktita de D-ro Zamenhof mem.) [LR 7, L. de Beaufront, *Grammaire et exercices de la langue internationale Esperanto*, Paris 1906, p. 109. Tradukis W. Bailey].[1]

Reakci' [OA 3.2] {en} reaction | {fr} réaction | {de} Reaktion | {es} reaccion {legu reacción} | {pt} reacçao {legu: reacção; de 2009: reação} | {it} reazione | {pl} reakcja.

real' [OA 1] * réel | real | real, wirklich | реальный | realny.

Realism' [OA 3.2] {en} realism | {fr} réalisme | {de} Realismus | {es} realismo | {pt} realismo | {it} realismo | {pl} --- {traduko mankas}. — **Rim.**: Eble interpretebla kiel real-ism-o.

rebus' [OA 1] rebus | rebus | Rebus {2012 ankaŭ: Bilderrätsel} | ребусъ | rebus.

Recenz' [OA 3.1] {en} to criticize, to write a review of | {fr} faire la critique, rendre compte d'une oeuvre | {de} rezensieren,

[1] La preciza teksto de LR 7 iom varias en la diversaj eldonoj de la „Lingvaj Respondoj". La 6-a eld. 1962 citas ĝin laŭ la esperant-lingvaj „Ekzercoj de Aplikado" de Louis de Beaufront, Paris 1903. La supra teksto estas laŭ elfranc-igo de W. Bailey de la franc-lingva eldono Paris 1906.

besprechen, referieren | {es} criticar | {pt} recensear {preferinde: resenhar, fazer crítica lierária} | {it} recensire, criticare (un' opera) {en la itala ordinare ne estas interspaco post tia apostrofo} | {pl} oceniac {legu: oceniać}.

recept' [OA 1] * ordonnance (med.) | recipe, prescription | Rezept | рецептъ | recepta. — [RE].

reciprok' - mutuel, réciproque | mutual, reciprocal | gegenseitig | взаимный | wzajemny. — [RE].

recitativ-o [OA 2.1] {MUZ}

redakci' - rédaction | digesting, compiling | Redaktion | редакція {de 1918: редакция} | redakcya {de 1936: redakcja}. — [AK] rédaction (*ensemble des rédacteurs, service*) | editorial department. — [DL]. [RE]. — [DL 1888]: *Dissendante mian unuan verkon al la redakcioj de l' gazetoj, mi petis ilin alsendi al mi tiun numeron de l' gazeto, en kiu estos kritiko de mia afero* [DL A 11]. Kp. redakt' [OA 1], redaktor.

redakt' [OA 1] rédiger | edit, draw up | redigieren | редактировать | redagować. — [Beau]. — Kp. redakci', redaktor'.

redaktor' - rédacteur | compiler, editor | Redakteur | редакторъ {de 1918: редактор} | redaktor. — [DL]: *Tiel ĉiujare en la mondo estas eldonataj miloj kaj dekmiloj da tiaj "neeblaj" libroj, kaj tamen neniu el la redaktoroj estas mirindaĵisto* [DL II.3]. — Kp. redakci', redakt'.

— Lingva Respondo 52 A de 1911 [Pri la vortoj kun pseŭdosufiksoj]: Kelkaj samideanoj forte malaprobas la uzadon de vortoj kun pseŭdosufiksoj *cio, toro* k.t.p. (ekzemple: "civilizacio", "redaktoro" k.t.p.); ili diras, ke de tiaj vortoj ni devas preni nur la radikan formon (ekzemple: "civiliz", "redakt") kaj ĉiujn devenajn formojn uzi nur kun sufikso aŭ finiĝo pure *Esperanta* (ekzemple: "civilizo", "redaktejo", "redaktisto" anstataŭ "civilazacio", "redakcio", "redaktoro"). Kompreneble, se tia vorto, kiel ekzemple "redaktejo", estus tute identa kun la vorto "redakcio" kaj povus ĝin perfekte anstataŭi, certe neniu el ni plendus, se la vorto "redakcio" baldaŭ malaperus el nia lingvo; sed se iu diras, ke la formoj pseŭdosufiksaj estas *kontraŭ-Esperantaj*, aŭ ke ili prezentas malaprobindan enkondukon de *novaj vortoj*, mi opinias, ke li eraras. Tiaj formoj, kiel ekzemple "redakcio", "civilizacio" estas nek kontraŭ-Esperantaj, nek novaj, ĉar laŭ la № 15 de nia gramatiko ili plene apartenas al nia lingvo jam de la unua momento de ĝia naskiĝo. Ni povas *esperi*, ke pli aŭ malpli frue la pseŭdosufiksaj vortoj "fremdaj" fariĝos arĥaismoj kaj cedos sian lokon al vortoj "pure esperantaj" ni povas eĉ *konsili* tion; sed *postuli* tion ni ne povas, ĉar la diritaj vortoj ne sole havas en nia lingvo (laŭ la № 15) plenan rajton de ekzistado, sed ankoraŭ dum longa tempo multaj el tiuj pseŭdosufiksaj vortoj estos pli oportunaj, pli naturaj kaj pli kompreneblaj, ol la ilin anstataŭontaj vortoj "pure Esperantaj". Ne venis ankoraŭ la tempo, ke ni estu tro pedantaj. Estas vero, ke sekve de nia toleremeco ni por kelkaj vortoj havos dum kelka tempo formojn *duoblajn* (ekzemple: "evolucio" kaj "evoluo"); sed ŝajnas al mi, ke estas multe pli bone havi en la unua tempo ian "embarason de riĉeco", ol malutili al si per ia ne sufiĉe matura dekreto, elĵetante el la lingvo vortojn, kies elĵetindeco ne estas ankoraŭ por ni tute certa. [Respondo 55, *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, p. 222].

Redukt-i, [OA 4] {fr} réduire (math., chim.) | {en} to reduce (math., chem.) | {de} reduzieren, zurückführen, vereinfachen (math.) | {it} ridurre (mat., chim.) | {es} reducir (mat., quím.) | {pt} reduzir | {ca} reduir. {MAT} {KEM}

ref' [OA 1] ris (marine) | reef (in a sail) | Reff | рифъ (у паруса) | ref. {MAR} — [EG 1].

Referenc' [OA 3.2] {en} reference | {fr} référence | {de} Referenz, Auskunft, Zeugniss {legu: Zeugnis} | {es} referencia | {pt} referencia {legu: referência} | {it} referenza – attestati {pres-eraro, legu: attestato [kun antaŭa komo anstataŭ streko]} | {pl} --- {traduko mankas}.

reflekt/i. [OA 8] (pp surfaco de korpo) Fari, ke trafanta lumradio, sonondo k.a. ne penetru en iun surfacon, sed ŝanĝu sian direkton al direkto simetria rilate al la ortanto ĉe la trafpunkto. — A. to reflect (phys.); F. réfléchir (lumière), renvoyer (son); G. zurückstrahlen, zurückwerfen, reflektieren; H. {es} reflejar, reflectar; I. {it} riflettere, P. {pt} reflectir {de 2009: refletir}.

reformaci' [OA 1] * (la) Réformation | reformation | Reformation | реформація | reformacja. {RELI}

refut' [OA 1] refuter | refute | widerlegen | опровергнуть, отразить возраженіе | zbić (zarzuty).

reg' - gouverner, régir | rule, reign | regiren {de 1901: regieren} | править | rządzić. — [AK] rule, govern | rządzić, panować. — [UL].

● **reg'at'** - sujet | subject | Unterthan {de 1901: Untertan} | подданный | poddany. — ... ĉiu regnano sciu, ke li neniam dependos de la kapricoj de tiu aŭ alia persono, sed devas obei ĉiam nur klarajn, tute difinitajn fundamentajn leĝojn de sia lando, kiuj estas egale devigaj por la regantoj kaj regatoj ... [A 3.1].

● **registaro** - Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon ..., tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, ... [A 1.2]

reĝ' - roi | king | König | король, царь | król. — **reĝo** - roi | king | König | король, царь | król [FE 21]. — [UL] — La filo de la reĝo, kiu revenis de ĉaso, ŝin renkontis; kaj, vidante, ke ŝi estas tiel bela, li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola kaj pro kio ŝi ploras [FE 21.7]. La filoj, nepoj kaj pranepoj de reĝo estas reĝidoj [FE 36.12]. La regnestro de nia lando estas bona kaj saĝa reĝo [FE 37.4]. Mi diris al la reĝo: via reĝa moŝto, pardonu min! [FE 42.7]. — **Lingva Respondo 1901**: La nomoj de ŝako estas: ... *König* reĝo ... [LR 19. Let. al Th. Thorsteinsson (1901), O.V. p. 522]. Z per tio ripetas al nova esperantisto la kutimon de E-isto Marto 1892, p. 43: „Klarigo de la literoj, kiujn ni uzos en ŝako: ... R = reĝo ...".

● **reĝa** — Mi diris al la reĝo: via reĝa moŝto, pardonu min! [FE 42.7]

● **reĝi** — Ré-ĝi [FE 2]

● **reĝido** — La reĝido, kiu vidis, ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj, petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas [FE 23.1]. La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, forkondukis ŝin al la palaco de sia patro, la reĝo, kie li edziĝis je ŝi [FE 23.3]. La filoj, nepoj kaj pranepoj de reĝo estas reĝidoj [FE 36.12].

regal' - régaler, traiter | entertain, regale | bewirthen {de 1901: bewirten} | угощать | ugościć. — [AK] częstować, ugościć. — [RE].

● **scio** — Scí-o [FE 2]. Scio [FE 4].

● **sci'ig'** - avertir, annoncer | announce, give notice | benachrichtigen | увѣдомлять | uwiadomić. — Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi [FE 25.7].

● **sci'iĝ'** - apprendre | perceive | erfahren | узнавать | dowiedzieć się.

scienc' - science | science | Wissenschaft | наука | nauka, wiedza. — **scienco** - science | science | Wissenschaft | наука | nauka [FE 32]. — [RE]. — Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem [FE 32.3].

● **komput/o/scienc/o**. [OA 9 komput'] Scienco pri komputado, precipe pri la aŭtomata komputado per komputiloj. {KOMP}

sciur' - écureuil | squirrel | Eichhorn | бѣлка | wiewiórka {ZOO}. — [RE].

se - si | if | wenn | если | jeżeli. — **se** - si | if | wenn | если | jeżeli [FE 14]. — [AK] si (*conditionnel*). — [UL].

1. se kun –is, –as aŭ –os — ... aŭtoritata komitato, ..., havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo ... ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj [A 1.2]. ... verkoj privataj, kiujn la esperantistoj - se ili trovas tion ĉi utila ... - povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga [A 3.6]. Mi permesis al mi nur korekti la preserarojn; sed se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe; ĉar se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus ŝanĝo, kiu povus kaŭzi disputojn kaj kiu en verko fundamenta ne povas esti tolerata [A 4.3]. Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova [A 8.1]. Leĝan sankcion ili {= la ideoj} ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, ... [A 13.2]. — Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj [FE 14.16]. Mia opinio estas: prenu mem akvon, se vi volas trinki." [FE 19.8]. Se li jam venis, petu lin al mi [FE 26.21]. Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, ... [FE 27.5]. Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj [FE 28.2]. El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon [FE 29.8]. Se ni aldonas al ili la literon „k", ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: kia, ... [FE 30.3]. Se ni aldonas la literon „t", ni ricevas vortojn montrajn: tia, ... [FE 30.4].

2. se kun –us — ... ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem [A3.4]. Mi permesis al mi nur korekti la preserarojn; sed se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe; ĉar se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus ŝanĝo, kiu povus kaŭzi disputojn kaj kiu en verko fundamenta ne povas esti tolerata [A 4.3]. Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto

estas sendube erara [A 6.1]. — Se mi estus sana, mi estus feliĉa [FE 20.10]. Se li scius, ke mi estas tie ĉi, li tuj venus al mi [FE 20.11]. Se la lernanto scius bone sian lecionon, la instruanto lin ne punus [FE 20.12]. Se mi petus lin, li dirus al mi la veron [FE 24.7]. Mi ne farus la eraron, se li antaŭe dirus al mi la veron (aŭ se li estus dirinta al mi la veron) [FE 24.8]. Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi [FE 25.9]. Se vi scius, kiu li estas, vi lin pli estimus [FE 26.20].

seb' - suif | tallow | Schmalz, Talg | сало | smalec, łój. {KUIR} — [AK] tallow, suet. — [RE].

sed - mais | but | aber, sondern | но | lecz. — **sed** - mais | but | aber, sondern | но, а | lecz [FE 9]. — [UL] [RE A]. — [A] {multaj trafoj, ne registritaj tie ĉi}. — La patro ne legas libron, sed li skribas leteron [FE 9.11]. La papero estas tre blanka, sed la neĝo estas pli blanka [FE 10.14]. Mi havas nur unu buŝon, sed mi havas du orelojn [FE 12.2]. Por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, ... [FE 14.7]. Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn [FE 14.14]. Li amas min, sed mi lin ne amas [FE 18.1]. Mi volis lin bati, sed li forkuris de mi [FE 18.2]. Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem; sed ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas [FE 18.14]. La filino iris, sed ĉiam murmurante [FE 19.3]. ... kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin jam ne trovos [FE 20.8]. Kiam mi venis al li, li dormis; sed mi lin vekis [FE 20.9]. Sed pri ŝia fratino ni povas diri, ke ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si; ... [FE 23.4]. Laŭ la projekto ... tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn [FE 25.10]. Anstataŭ kafo li donis al mi teon kun sukero, sed sen kremo [FE 26.11]. ... ĉar ĝi {la artikolo} estas oportuna sed ne necesa [FE 27.3]. Anstataŭ „la" oni povas ankaŭ diri „l'" (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo) [FE 27.4]. ... oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, ... [FE 27.5]. ... la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj [FE 28.2]. ... la vortoj „ĝardenon", „tablon" staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en" kaj „sur" tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton ... [FE 28.3]. [FE]: {pliaj trafoj, ne registritaj tie ĉi}.

seg' - scier | saw | sägen | пилить | piłować. — **segi** - scier | saw | sägen | пилить | piłować [FE 34]. — [AK] saw *(vb.)*. — [RE]. — Per hakilo ni hakas, per segilo ni segas, per fosilo ni fosas, per kudrilo ni kudras, per tondilo ni tondas, per sonorilo ni sonoras, per fajfilo ni fajfas [FE 34].

seĝ' - chaise | seat | Stuhl | стулъ | krzesło. — [AK] siège, chaise | chair. — [UL].

segment-o [OA 2.1] — [EG 2].

sek' - sec | dry | trocken | сухой | suchy. — **sek'** - dry [UV aĵ']. — [UL].

● **sek'aĵ'** - dry goods [FE 25 aĵ'].

sekal' - seigle | rye | Roggen | рожь | żyto {BOT}. — [RE].

sekc' - disséquer | dissect | seciren {de 1901: sezieren} | вскрывать (трупъ) | rozkrawać, rozczłonkować. — [RE].

sekci' [OA 1] * section | section | Sektion | секція | sekcja. — [Beau] section (partie d'un groupe, d'une société, etc.).

sekreci' [OA 1] * secrétion {pres-eraro, legu: sécrétion} | secretion | Absonderung | выдѣленіе | sekrecja. — [Kabe].

sekret' - secret | secret | Geheimniss {de 1901: Geheimnis} | тайна | tajemnica. — [AK] тайна, секрет. — [DL] [RE].

sekretari' - secrétaire | secretary | Sekretär | секретарь | sekretarz. — [RE].

seks' - sexe | sex | Geschlecht (männlich oder weiblich) | полъ (мужской или женскій) | płeć. — [RE].

sekt-o [OA 2.1] {RELI} — [RE] [Beau] secte.

sektor-o [OA 2.1] — [EG 2].

sekund' - seconde | second | Sekunde | секунда | sekunda {MEZ}. — **sekundo** - seconde | second | Sekunde | секунда | sekunda [FE 12]. — [AK] second *(a)*. — [RE]. — Sesdek minutoj faras unu horon, kaj unu minuto konsistas el sesdek sekundoj [FE 12.12].

sekundant' [OA 1] * témoin, second | second (in a duel) | Sekundant | секундантъ | sekundant. — [Beau] second témoin (duel).

Sekur-a, [OA 4] {fr} qui est en sûreté {de 1990: sureté}, à l'abri du péril, qui ne court

aucun risque | {en} safe, secure | {de} sicher, ausser Gefahr {legu: außer Gefahr} | {it} sicuro, sano e salvo | {es} seguro, sin riesgo, libre de peligro | {pt} seguro, em segurança | {ca} sense risc, assegurat | estanta en sendanĝera situacio. — [EV 1923] [PV] {ne ĉe Z.}.

sekv' - suivre | follow | folgen | слѣдовать | nastąpić. — **sekvi** - suivre | follow | folgen | слѣдовать | nastąpić [FE 25]. — [AK] nastąpić, iść za kim, wynikać. — [RE]. — El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon ... aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon [FE 29.8].

● **sekvanta** — Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: ... [A 2.1].

● **sekve** — La surtuto estas aĉetita de mi, sekve ĝi apartenas al mi [FE 25.5]. Ekzemple: por esprimi direkton, ni aldonas al la vorto la finon „n"; sekve: tie (= en tiu loko), tien (= al tiu loko) [FE 28.3]. Ĉiuj parencoj de mia edzino estas miaj boparencoj, sekve ŝia frato estas mia bofrato, ŝia fratino estas mia bofratino; mia frato kaj fratino (gefratoj) estas la bogefratoj de mia edzino [FE 36.7].

sel' - selle | saddle | Sattel | сѣдло | siodło. — [RE].

● **sel'i** - seller | saddle | satteln | сѣдлать | osiodłać.

ŝel' - écorce, coque | shell | Schale, Rinde | скорлупа, кора | skorupa. — [UL].

● **sen'ŝel'ig'** - écorcer, peler | shell, peel | schälen, abschälen | облуплять | obłupiać, obierać.

selakt' - petit-lait | whey | Molken {en 2012 pli kutima: Molke} | сыворотка | serwatka. — [RE].

ŝelk' - bretelle | breeches-bearer | Hosenträger | подтяжки | szelki {VEST}. — [RE].

sem' - semer | sow | säen | сѣять | siać. — [UL].

● **sem'o** - semence | seed | Samen | сѣмя | nasienie. {BOT}

semafor-o [OA 2.1] — [EG 2].

semajn' - semaine | week | Woche | недѣля | tydzień. {MEZ} — **semajno** - semaine | week | Woche | недѣля | tydzień [FE 12]. — [UL]. — La sepan tagon de la semajno Dio elektis, ke ĝi estu pli sankta, ol la ses unuaj tagoj [FE 12.15].

seminari' [OA 1] * seminaire {pres-eraro, legu: séminaire} | seminary | Seminar (Anstalt) | семинарія | seminarjum. — [RE].

sen - sans | without | ohne | безъ | bez. — **sen** - sans | without | ohne | безъ | bez [FE 13]. — [UL]. — Sen [FE 2]. — "Vi tute ne estas ĝentila," diris la feino sen kolero [FE 19.9]. Anstataŭ kafo li donis al mi teon kun sukero, sed sen kremo [FE 26.11]. Anstataŭ la vorto „je" ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio [FE 29.3].

● **senĉesa** — Sen-ĉé-sa [FE 2].

● **senĉese** — Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj laboradi senĉese [FE 13.2].

● **sendanĝera** — ... la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektiĝado fariĝados ne per ... ŝanĝado, ... aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera [A 6.4].

● **sendanĝereco** — .... {kiam} tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj plenan sendanĝerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj [A 1.2].

● **sendiferenca** — Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „ajn", ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, ... [FE 30.9].

● **sendube** — Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara [A 6.1].

● **senintence** — Al homo, pekinta senintence, Dio facile pardonas [FE 22.4].

● **senkompare** — ... sed senkompare pli grandan danĝeron prezentus la ŝanĝado de la traduko de ia vorto [A 4.6].

● **senkonfuza** — ... la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektiĝado fariĝados ne per ... ŝanĝado, ... aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera [A 6.4].

● **senmorta** — La korpo estas morta, la animo estas senmorta [FE 31.6].

● **senmove** — Fluanta akvo estas pli pura, ol akvo staranta senmove [FE 22.1].

● **senpage** — Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero [FE 31.21].

● **senŝanĝa** — ... sed ĝis tiu tempo la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa [A 1.3].

● **senŝanĝe** — ... mi ĝin {la vorton} lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe [A 4.3].

● **sensencaĵo** — Vi parolas sensencaĵon, mia amiko [FE 35.1].

● **sen'ŝel'ig'** - écorcer, peler | shell, peel | schälen, abschälen | облуплять | obłupiać, obierać [UV ŝel'].

● **sentaŭgigado** — ... la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektiĝado fariĝados ne per ... ŝanĝado, ... aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera [A 6.4].

senat' [OA 1] * sénat | senate | Senat | сенатъ | senat. — [DL] [RE].

senc' - sens, acception | sense | Sinn | смыслъ | znaczenie, sens. — **senco** - sens, acception | sense | Sinn | смыслъ | sens, znaczenie [FE 29]. — [AK] sens, acception, signification | sense, meaning. — [UL]. — Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion „je" [FE 29.1]. Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas ... [FE 29.10].

● **sensencaĵo** — Vi parolas sensencaĵon, mia amiko [FE 35.1].

send' - envoyer | send | senden, schicken | посылать | posyłać. — **sendi** - envoyer | send | senden, schicken | посылать | posyłać [FE 17]. — [UL]. — „Se estas tiel," diris la patrino, „mi devas tien sendi mian filinon ..." [FE 17.9]. Petu ŝin, ke ŝi sendu al mi kandelon [FE 20.20]. La fotografisto fotografis min, kaj mi sendis mian fotografaĵon al mia patro [FE 32.4].

ŝenopraz/o. [OA 9] Spicherbo parenca al cepo kaj ajlo, kun blankaj floroj kaj longaj tubformaj folioj uzataj pro sia aromo en salato kaj aliaj manĝaĵoj. (*Allium schoenoprasum*.) {BOT} — [EG 1].

sens/o. [OA 8] Ĉiu el la specialaj korpaj kapabloj de homo aŭ de animalo, per kiuj tiu ricevas sciigojn pri iaj elementoj, fizikaj aŭ kemiaj, de la ekstera medio aŭ de la interna medio: *vidado, aŭdado, flarado, gustumado kaj tuŝado estas la kvin klasikaj ~oj; muskola ~o, ekvilibro~o*. — A. sense (the five senses), F. sens (les cinq sens), G. Sinn (die fünf Sinne), H. {es} sentido (los cinco sentidos), I. {it} senso (i cinque sensi), P. {pt} sentido (os cinco sentidos).

sensaci-o [OA 2.1] — [DL] [Beau] sensation (effet marqué d'attention, de surprise, etc.). [EG 2] Sensation.

sent' - ressentir, éprouver (une impression) | feel, perceive | fühlen | чувствовать | czuć. — **senti** - ressentir, éprouver | feel, perceive | fühlen | чувствовать | czuć [FE 33]. — [AK] fühlen, empfinden. — [UL]. — Sén-ti [FE 3]. — Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj [FE 32.12]. Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita [FE 33.7].

● **sento** — Sén-to [FE 2].

sentenc' - sentence | sentence | Sentenz | изреченіе | sentencya, orzeczenie. — [AK] sentence, judgment. — [RE].

sentimental-a [OA 2.1] — [Beau] sentimental. [EG 2] sentimental.

sep - sept | seven | sieben | семь | siedm. — **sep** – 7 [FG 4.1]. — **sep** - sept | seven | sieben | семь | siedm [FE 12]. — [UL]. — Kvin kaj sep faras dek du [FE 12.6]. — Tridek kaj kvardek kvin faras sepdek kvin [FE 12.9].

● **sepa** — La sepan tagon de la semajno Dio elektis, ke ĝi estu pli sankta, ol la ses unuaj tagoj [FE 12.15]. Hodiaŭ estas la dudek sepa (tago) de Marto [FE 12.18].

● **sepcent** — Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua [FE 12.19].

sepi' - seiche (poisson) | cuttle-fish | Tintenwurm | каракатица | sepa, pław morski {ZOO}. — [AK] Tintenfisch | sepja, pław morski. — [RE].

Septembr' - Septembre {2012: septembre} | September | September | Сентябрь | Wrzesień. — [DL]. [RE]. [Beau] **septembr**, septembre {ambaŭ minuskle}.

septet-o [OA 2.2] septuor | septet | Septett {MUZ} — [EG 2] Septett.

seraf-o (*anĝelo*) [OA 2.1] {RELI} — [Beau] séraphin. [EG 2] Seraph.

serajl-o [OA 2.1]. — [EG 2] Serail. — [Kabe 1910]: **1.** Palaco de la turka sultano. - **2.** Parto de turka palaco, kie loĝas la virinoj [Kabe].

serĉ' - chercher | search | suchen | искать | szukać. — **serĉi** - chercher | search | suchen | искать | szukać [FE 18]. — [UL]. — Mi jam havas mian ĉapelon; nun serĉu vi vian [FE 18.16]. La infano serĉis sian pupon; mi montris al la infano, kie kuŝas ĝia pupo [FE 18.18]. Mi ĝin ankoraŭ ne serĉis; kiam mi finos mian laboron, mi

serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin jam ne trovos [FE 20.8]. — ... tiel ekzemple la vorto « frat'in'o », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enkonduko 2].

● **serĉata** — Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi [FE 25.9].

ŝerc' - plaisanter | joke | scherzen | шутить | żartować. — [UL].

seren-a [OA 2.2] serein | serene | ungetrübt, heiter. — [EG 2] heiter, ungetrübt.

serenad-o [OA 2.1] {MUZ} — [EG 2] Serenade.

serĝent' - sergent | sergeant | Sergeant | сержантъ | sierżant {MIL}. — [RE].

seri' - série | series | Reihe | рядъ, серія | serya. — **serio** - série | series | Reihe | рядъ, серія | serya [FE 30]. — [UL]. — La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj [FE 30.2]. Antaŭ nia militistaro staris granda serio da pafilegoj [FE 38.11]. — **Rim.**: [1888] vico.

serioz' - sérieux | serious | ernst | серіозный | waźny, poważny, na seryo. — [AK] poważny, na serjo. — [RE].

serpent' - serpent | serpent | Schlange | змѣя | wąź {ZOO}. — **serpento** - serpent | serpent | Schlange | змѣя | wąź [FE 19]. — [UL]. — „Bone, ĉar vi estas tiel servema, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano." [FE 19.10]. „Jes, patrino", respondis al ŝi la malĝentilulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon [FE 21.2].

serur' - serrure | lock (subst.) | Schloss (zum Schliessen {legu: Schließen}) | замокъ | zamek (od drzwi). — [AK] lock *(fastening)*. — [UL].

serv' - servir (quelqu'un) | serve | dienen | служить | służyć. — **servi** - servir | serve | dienen | служить | służyć [FE 19]. — [UL].

● **servanto** — Ni havas diversajn servantojn: kuiriston, ĉambristinon, infanistinon kaj veturigiston [FE 37.18].

● **servema** — „Bone, ĉar vi estas tiel servema, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano." [FE 19.10]

● **reservi** — Re-sér-vi [FE 3]. Reservi [FE 4].

servic' - service | set of dishes, plates, etc. | Service | сервизъ | serwis. — [AK] service (*de table*). — [RE].

servut' - corvée | soccage | Frohne | барщина | pańszczyzna. {JUR} — [AK] corvée, servage | bondage | барщина (крепостное право). — [RE] [EV 1923] servut-i {verbo}.

ses - six | six | sechs | шесть | sześć. — **ses** – 6 [FG 4.1]. — **ses** - six | six | sechs | шесть | sześć [FE 12]. — [UL]. — La sepan tagon de la semajno Dio elektis, ke ĝi estu pli sankta, ol la ses unuaj tagoj [FE 12.15]. Tri estas duono de ses [FE 14.9].

● **sesa** — Kion Dio kreis en la sesa tago? [FE 12.16]

● **sesdek** — Sesdek minutoj faras unu horon, kaj unu minuto konsistas el sesdek sekundoj [FE 12.12]. Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro [FE 14.12]. Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj [FE 14.16].

● **seshora** — Ses-hó-ra [FE 2]. Seshora [FE 4].

sesi/o [OA 9] **1** Periodo de kunsidoj de parlamento, asembleo, juĝa instanco, komisiono k.s.: *ordinara sesio*; *eksterordinara sesio*; *la aŭtuna sesio de la parlamento*; *la ekzamena sesio daŭros de la 11a ĝis la 25a de Junio*. **2** Serio de universitataj prelegoj.

sever' - sévère | severe | streng | строгій | surowy, ostry, srogi. — **severa** - sévère | severe | streng | строгій | surowy, srogi, ostry [FE 37]. — [AK] severe, strict. — [UL]. — Nia provincestro estas severa, sed justa [FE 37.6].

sevrug-o [OA 2.2] (*zool.*) esturgeon | sturgeon | Sternhausen {ZOO} — [RE] [EG 2] Scherg.

sezon' - saison | season | Jahrzeit {legu: Jahreszeit}, Zeit | сезонъ | sezon. — [RE].

sfer' [OA 1] * sphère | sphere | Sphäre | сфера | sfera. — [DL] [RE].

sfinks-o [OA 2.1] {MIT} — [Beau] sphinx. [EG 2] Sphinx.

sfinkter-o [OA 2.2] sphincter | sphincter | Schliessmuskel {legu: Schließmuskel} {ANAT} — [Beau] sphincter. [EG 2] Schließmuskel, Sphincter {en 2012: Sphinkter}.

si - soi, se | one's self | sich | себя | siebie. — **si** - soi, se | one's self | sich |

себя | siebie [FE 10]. — **si** - soi | self | sich | себя | siebie [FG 5.1]. — [UL].

● **sin ami** — Mi amas min mem, vi amas vin mem, li amas sin mem, kaj ĉiu homo amas sin mem [FE 18.12]. Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem [FE 18.13].

● **sin gardi** — Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem; sed ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas [FE 18.14].

● **sin gvidi** — ... por ke ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi, la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, ... [A 3.3].

● **sin ĵeti** — Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn [FE 14.14].

● **sin kaŝi** — La malfeliĉa infano ... kaŝis sin en la plej proksima arbaro [FE 21.6].

● **sin lavi** — Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro [FE 18.17].

● **sin levi** — La falinta homo ne povis sin levi [FE 22.6]. Sur kruta ŝtuparo li levis sin al la tegmento de la domo [FE 34.13].

● **sin mortigi** — ... li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu; unu tagon, ..., li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis [FE 39.11].

● **sin movi** — vaporŝipo (= ŝipo, kiu sin movas per vaporo) [FE 27.10].

● **sin okupi** — Kiu okupas sin je meĥaniko, estas meĥanikisto, kaj kiu okupas sin je ĥemio, estas ĥemiisto [FE 32.2].

● **sin paŝti** — Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, ... [FE 34.15].

● **sin senti** — Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj [FE 32.12]. Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita [FE 33.7].

● **sin trovi** — Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos ... tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono ... [A 4.2]. ... el la kaldrono, en kiu sin trovas bolanta akvo, eliras vaporo; tra la fenestro, kiu sin trovas apud la pordo, la vaporo iras sur la korton [FE 25.14]. Super la tero sin trovas aero [FE 26.10]. ... trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj [FE 26.14]. ... la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno ... [FE 28.3]. En mia skribotablo sin trovas kvar tirkestoj [FE 31.24]. Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino; ... [FE 32.5]. Sur la arbo sin trovis multe (aŭ multo) da birdoj [FE 32.11]. En tiuj ĉi boteletoj sin trovas diversaj acidoj: ... [FE 35.6]. En nia lando sin ne trovas montoj, sed nur montetoj [FE 38.2].

● **al si** — ... li neniam permesis al si (...) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj [A 2.2]. Sed la « Fundamento de Esperanto » devas troviĝi en la manoj de ĉiu bona esperantisto ..., por ke li ... konstante memorigadu al si, kio en nia lingvo estas oficiala kaj netuŝebla, ... [A 5.4]. — ... ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj [FE 30.2]. Ŝi kombas al si la harojn per arĝenta kombilo [FE 34.5]. Li venigis al si el Berlino multajn librojn [FE 39.10].

● **de si** — ... ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si; ... [FE 23.4].

● **en si** — Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklaraĵon [FE 35.4].

● **per si** — Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam nur la nominativon [FE 28.1].

● **post si** — ... se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (...) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon [FE 29.8].

● **pri si** — ... ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas [FE 18.14].

● **sur sin** — ... estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino, ... [FE 19.5].

● **si'a** - son, sa | one's | sein | свой | swój. — **sia** - son, sa | one's | sein | свой | swój [FE 10]. — ... ĉiu regnano sciu, ke li ... devas obei ĉiam nur klarajn, ... leĝojn de sia lando, ... [A 3.1]. La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj [A 4.4]. ... la verko perdus sian eksterordinare necesan karakteron de dogma fundamenteco, ... [A 4.6]. ... la uzanto ... perdus sian konfidon kaj apogon [A 4.6]. ... estas bone ĉiam peni uzadi nur vortojn el la «Fundamento» ĉar nur pri tiaj vortoj ni povas esti certaj, ke nia adresato ilin nepre trovos en sia vortaro [A 7.1]. ... neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon ... [A 8.3]. ... la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita [A 13.2]. — El

ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa [FE 10.20]. La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ... [FE 11.2]. La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis ... [FE 11.3]. Li faris ĉion per la dek fingroj de siaj manoj [FE 12.4]. ... tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, ... [FE 13.1]. Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon ... [FE 15.3]. Tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino [FE 17.7]. ... post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo [FE 18.15]. La infano serĉis sian pupon; mi montris al la infano, kie kuŝas ĝia pupo [FE 18.18]. Oni ne forgesas facile sian unuan amon [FE 18.19]. Se la lernanto scius bone sian lecionon, la instruanto lin ne punus [FE 20.12]. Ŝi rakontis al li sian tutan aventuron [FE 23.2]. ... {li} forkondukis ŝin al la palaco de sia patro, la reĝo, kie li edziĝis je ŝi [FE 23.3]. ... rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra ... [FE 27.3]. Nia regimentestro estas por siaj soldatoj kiel bona patro [FE 37.12]. Timulo timas eĉ sian propran ombron [FE 37.21]. Ŝteliston neniu lasas en sian domon Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, kion fari Ŝi edziniĝis kun sia kuzo, kvankam ŝiaj gepatroj volis ŝin edzinigi kun alia persono [FE 39.7]. [FE 38.10]. [FE 37.15].

● **singarda** — Sed en la praktiko ni (...) devas kompreneble esti tre singardaj kun ĉia « perfektigado » de la lingvo [A 9.2].

— **Lingva Respondo 1908 [Pri „sia-tempe“]:** Diri “iam” anstataŭ “siatempe” ni en la plimulto da okazoj ne povas, ĉar la senco de ambaŭ vortoj estas malsama. “Iam” esprimas tempon nedifinitan, dum “siatempe” esprimas tempon kvankam ne klare nomitan, tamen pli-malpli difinitan. “Mi volis siatempe proponi regulon” = “mi volis proponi en tiu tempo, kiam, laŭ mia opinio, la cirkonstancoj tion postulis”. Se anstataŭ “siatempe” vi diros “*ĝia*tempe”, vi ne faros eraron; sed ŝajnas al mi, ke en la plimulto da okazoj “*sia*tempe” estas pli bona ol *“ĝia*tempe”. Tiamaniere uzas la vorton ne sole tiuj lingvoj, kiuj por “sia” kaj “ĝia” uzas la saman vorton, sed ankaŭ tiuj lingvoj (ekzemple la slavaj), kiuj severe faras diferencon inter “sia” kaj “ĝia”. Laŭ mia opinio oni povas klarigi ĝin al si per tio, ke “sia” montras pli grandan intimecon inter la faro kaj la tempo, ol kiom montrus la vorto “ĝia”. Gvidi nin per teoriaj postuloj gramatikaj en tiu ĉi okazo ni ne povas, ĉar al kio ni povus rilatigi la vorton “ĝia”? Ŝajnas al mi, ke en la esprimo “faro ĝiatempa” la tempo apartenas (t.e. estas konvena, konforma k.t.p.) al io *alia*, dum en “faro *sia*tempa” la tempo apartenas al la faro mem. Kompreneble, mia klarigo ne prezentas ion absolute konvinkan; sed mi volis nur montri al vi, ke ne ekzistas ia grava kaŭzo, por ke ni la ĝis nun komune uzatan “siatempe” anstataŭigu per “ĝiatempe”. [LR 98, Respondo 43 *La Revuo*, 1908, Aŭgusto].

ŝi - elle | she | sie (Einzahl) | она | ona. — **ŝi** - {mankas en FE 11}. — **ŝi** - elle | she | sie | она | ona. [FG 5.1]. — **ŝi** - elle | she | sie | она | ona. [FG 6ĉ]. — [UL]. — Ŝi [FE 3]. — … tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna [FE 13.1]. Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj laboradi senĉese [FE 13.2]. En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki [FE 15.1]. Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon … [FE 15.3]. Kiam la bona virino trankviligis sian soifon, ŝi diris al la knabino … [FE 15.4]. Li estas knabo, kaj ŝi estas knabino [FE 16.3]. Mi vokas la knabinon, kaj ŝi venas [FE 16.12]. Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto [FE 17.1]. Kaj kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri grandaj diamantoj [FE 17.3]. Tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino [FE 17.7]. La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi, kaj, dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj [FE 17.8]. Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas; … [FE 17.10]. … ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas [FE 18.14]. Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro [FE 18.17]. Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, kiu estis en la loĝejo [FE 19.4]. Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis unu sinjorinon, ..., kiu ... petis de ŝi trinki ... [FE 19.5]. Petu ŝin, ke ŝi sendu al mi kandelon [FE 20.20]. Ŝi volas danci [FE 20.22]. Apenaŭ ŝia patrino ŝin rimarkis, ŝi kriis al ŝi: “Nu, mia filino?” [FE 21.1].

● **al ŝi** — … venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki [FE 15.1]. … kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile." [FE 17.11]. … diris al ŝi la malĝentila ... knabino, ... [FE 19.6]. Apenaŭ ŝia patrino ŝin rimarkis, ŝi kriis al ŝi: "Nu, mia filino?" [FE 21.1].

● **de ŝi** — ... ŝi vidis unu sinjorinon, ..., kiu ... petis de ŝi trinki ... [FE 19.5].

● **pri ŝi** — Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem; sed ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas [FE 18.14].

● **ŝin** — ... ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon; … [FE 11.2]. Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo … [FE 13.2]. Petu ŝin, ke ŝi sendu al mi kandelon [FE 20.20]. Apenaŭ ŝia patrino ŝin rimarkis, ŝi kriis al ŝi: "Nu, mia filino?" [FE 21.1].

● **ŝi'a** - son, sa | her | ihr | ея | jej. — El ŝiaj multaj infanoj unuj estas bonaj kaj aliaj estas malbonaj [FE 12.5]. Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto [FE 17.1]. Kaj kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri grandaj diamantoj [FE 17.3]. „Kion mi vidas!" diris ŝia patrino kun grandega miro [FE 17.4]. „Ŝajnas al mi, ke el ŝia buŝo elsaltas perloj kaj diamantoj! [FE 17.5]. Tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino [FE 17.7]. La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi, kaj, dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj [FE 17.8]. Apenaŭ ŝia patrino ŝin rimarkis, ŝi kriis al ŝi: "Nu, mia filino?" [FE 21.1].

sibl' - siffler, frémir | hiss, whizz | zischen | шипѣть (о произношеніи) | sykać. — [AK] siffler (*vent, etc.*), bruire | шипеть.

sid' - être assis, siéger | sit | sitzen | сидѣть {de 1918: сидеть} | siedzieć. — **sidi** - être assis | sit | sitzen | сидѣть {de 1918: сидеть} | siedzieć [FE 20]. — **sidi** - sit [FE 13 ig]. — **sidi** - être assis | sit | sitzen | сидѣть {de 1918: сидеть} | siedzieć [FE 23 iĝ]. — Vi skribas, kaj la infanoj skribas; ili ĉiuj sidas silente kaj skribas [FE 20.2]. Mi sidas sur seĝo kaj tenas la piedojn sur benketo [FE 26.7]. En la ĉambro sidis nur kelke da homoj [FE 32.13]. Li sidas apud la tablo kaj dormetas [FE 38.5]. La kuiristo sidas en la kuirejo [FE 40.13]. En la kandelingo sidis brulanta kandelo [FE 40.17].

● **sidigi** — seat [FE 13 ig]. — Sidigu vin (aŭ sidiĝu), sinjoro! [FE 39.13].

● **sid'iĝ'** - s'asseoir | [angla mankas] | sich setzen | сѣсть | usiąść [UV iĝ']. — **sidiĝi** - s'asseoir | become seated | sich setzen | сѣсть | usiąść [FE 23 iĝ]. — Sidigu vin (aŭ sidiĝu), sinjoro! [FE 39.13].

— **Lingva Respondo 1906 [Pri „sidiĝi" kaj „eksidi"]**: Vd. je ek'.

— **Lingva Respondo 1908 [Pri la akuzativo post „sidiĝi"]**: Post "sidiĝi" ni povas egale bone uzi la akuzativon kaj la nominativon, depende de tio, ĉu ni volas esprimi *movon* aŭ komencon de nova *stato*. Tamen, ĉar la nominativo estas ĉiam pli simpla kaj pli facila, ol la akuzativo, tial ŝajnas al mi, ke estus bone, se ni alkutimiĝus en ĉiuj okazoj *dubaj* preferi la *nominativon*. [Respondo 41 a, *La Revuo*, 1908, Majo].

● **kun'sid'** - séance, session | session | Sitzung | засѣданіе | posiedzenie, sesya.

sieĝ' - assiéger | besiege | belagern | осаждать | oblegać {MIL}.

sifilis-o [OA 2.1] {MED} — [Beau] syphilis (médec.). [EG 2] Syphilis, Lustseuche {ark.}.

sifon-o [OA 2.1] — [Beau] siphon. [EG 2] Siphon.

sigel' - sceller | seal (vb.) | siegeln | класть печать | pieczętować. — [UL].

● **sigelo** — Si-gé-lo [FE 3]. Sigelo [FE 4].

● **sigel'vaks'** - cire à cacheter | sealing-wax | Siegellack | сургучъ | lak.

sign' - signe, marque | sign, token | Zeichen | знакъ | znak. — [UL].

● **post'sign'** - trace, vestige | trace, vestige, footstep | Spur | слѣдъ | ślad. — **Rim.**: Sinonimo nun **spur/o.** [OA 8].

● **signi** — Síg-ni [FE 2]. Signi [FE 4].

● **sign'o de poŝt'o** - timbre-poste | postage-stamp | Briefmarke | марка | marka [UV poŝt'].

signal' - signal | signal | Signal | сигналъ | sygnał. — [RE].

signif' - signifier | signify, mean | bezeichnen, bedeuten | означать | oznaczać. — **signifi** - signifier | signify, mean | bezeichnen, bedeuten | означать | oznaczać [FE 32]. — [AK] oznaczać, mieć znaczenie. — [UL]. — Alportu al mi metron da nigra drapo (Metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo) [FE 32.6].

● **signifo** — „Da” post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro [FE 32.14]. La sufikso «um» ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun «um» oni devas lerni, kiel simplajn vortojn [FE 42.9].

silab' - syllabe | syllable | Sylbe | слогъ | sylaba, zgłoska {GRAM}. — [RE].

● **silab'i** - épeler | to spell | buchstabiren | читать по слогамъ | sylabizować.

ŝild' - bouclier | shield | Schild | щитъ | puklerz, tarcza. — [RE].

silent' - se taire | silent | schweigen | молчать | milczeć. — **silenti** - se taire | be silent | schweigen | молчать | milczeć [FE 20]. — [AK] be silent. — [UL].

● **silente** — Vi skribas, kaj la infanoj skribas; ili ĉiuj sidas silente kaj skribas [FE 20.2].

silici/o. [OA 9] Ĥemia elemento, nemetalo bruna (en stato nekristala) aŭ nigre griza (en stato kristala). Simbolo Si, atomnumero 14, atommaso 28,09. {KEM} — [EG 2] Silicium.

silik' - silex, caillou | flint | Kieselstein | кремень | krzemień. — [RE].

ŝiling' [OA 1] shilling | shilling | Schilling | шиллингъ | szyling. {MON} — [RE].

silk' - soie | silk | Seide | шелкъ | jedwab {VEST}. — [RE].

Ŝiller'o – Schiller [FG 16 franca (nur tie la traduko), angla, germana kaj pola, mankas en UV, mankas en FG 16 rusa]. — **Ŝiller'** [OA 7] (vira nomo) {mallerta difino, germanaj familiaj nomoj ne havas sekson, sed estas neŭtraj}. — [UL]. — **Lingva Respondo 1904 [Pri la ortografio de propraj nomoj]**: Propran nomon oni povas nun skribi tiel, kiel ĝi estas skribata en la gepatra lingvo de ĝia posedanto, ĉar en la nuna tempo la fonetika skribado de multaj nomoj kaŭzus tro grandan kriplaĵon de tiuj nomoj kaj diversajn malkomprenaĵojn. Sed tio ĉi estas nur rimedo provizora; ni devas celadi al tio, ke pli aŭ malpli frue en la lingvo internacia ĉiuj nomoj estu skribataj laŭ la fonetiko internacia de tiu ĉi lingvo, por ke ĉiuj nacioj povu legi ĝuste tiujn nomojn. [*Esperantistische Mitteilungen*, 1904, Junio (citita en *Lingvo Internacia*, 1904, p. 216)].

silogism-o [OA 2.1] — [RE] [Beau] syllogisme. [EG 2] Syllogismus.

siluet-o [OA 2.1] — [EG 2] Silhouette, Schattenriß.

silur' - glanis | shad-fish | Wels | сомъ | sum {ZOO}. — [AK] silure (*zool.*) — [RE] [Beau] silure, glanis (poisson).

silvi' - fauvette | hedge-sparrow, linget | Grasmücke | малиновка | piegźa, gajówka {ZOO}. — [AK] warbler *(bird).* — [RE].

ŝim' - se moisir | mould | schimmeln | плѣснѣть | pleśnieć. — [RE].

simbol' [OA 1] * symbole | symbol | Symbol, Sinnbild | символъ | symbol. — [RE].

simetri' [OA 1] * symétrie | symmetry | Symmetrie | симметрія | symetrja. — [RE].

simfoni' symphonie | symphony | Sinfonie | симфонія | symfonja. — [RE].

simi' - singe | monkey | Affe | обезьяна | małpa {ZOO}. — [RE].

simil' - semblable | like, similar | ähnlich | похожій | podobny. — **simila** - semblable | like, similar | ähnlich | похожій | podobny [FE 11]. — [UL]. — La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon; ... [FE 11.2]. Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna [FE 13.1]. Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35.13].

simpati' [OA 1] * sympatie {preseraro, legu: sympathie} | sympathy | Sympathie | симпатія | sympatja. — [RE].

simpl' - simple | simple | einfach | простой | prosty, zwyczajny. — **simpla** - simple | simple | einfach | простой | prosty, zwyczajny [FE 27]. — [UL]. — Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; ... [FE 27.5]. Tio ĉi estis jam ne simpla pluvo, sed pluvego [FE 38.9]. La sufikso «um» ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun «um» oni devas lerni, kiel simplajn vortojn [FE 42.9].

● **simple** — Verkisto verkas librojn, kaj skribisto simple transskribas paperojn [FE 37.17].

simptom-o [OA 2.1] — [RE] [Beau] symptôme. [EG 2] Symptom.

sin/o. [OA 8] Homa brusto, rigardata kiel formanta kun la brakoj aŭ femuroj ian varman ŝirmejon. — A. bosom, breast, lap; F. sein, giron; G. Busen, Brust, Schoss

{legu: Schoß}; H. {es} seno, regazo; I. {it} seno, petto; P. {pt} seio, regaço. {ANAT} — [Eliro (Biblio)] [EV 1923] [PV].

sinagog-o [OA 2.1] {RELI} — [RE] [Beau] synagogue. [EG 2] Synagoge.

sinap-o [OA 2.2] (*bot.*) moutarde | mustardplant | Senf (pflanze) {BOT} — [Beau] moutarde (sénevé). [EG 2] Senf(pflanze) (*vgl.* mustardo)

sincer' - sincère | sincere | aufrichtig | чистосердечный | szczery. — [AK] искренний. — [RE].

ŝind' - bardeau, échandole | shingle | Schindel | гонтъ | gont. — [MV].

sindikat-o [OA 2.2] syndicat | sindicate | Genossenschaft — [Beau] syndicat. [EG 2] Syndikat.

sinedri-o [OA 2.2] sanhedrin {legu: sanhédrin} | sanhedrim | Synedrium {2012 ankaŭ Synhedrion}. {RELI} — [RE] [Beau] sanhédrin. [EG 2] Synedrium, Sanhedrin.

singular/o. [OA 8] Gramatika nombro, montranta, ke oni parolas pri ununura persono aŭ afero. — A. the singular, F. le singulier (gram.), G. Einzahl, Singular, H. {es} el singular, I. {it} il singolare, P. {pt} singular. {GRAM} — Kp. unu'nombr' [UV nombr'], pluralo [OA 4].

singult' - avoir le hoquet | hiccough | schlucksen | икота | czkawka. — [RE].

sinjor' - monsieur | Sir, Mr | Herr | господинъ | pan. — **sinjoro** - monsieur | Sir, Mr | Herr | господинъ | pan [FE 10]. — [UL]. — Mi deziras al vi bonan tagon, sinjoro! [FE 10.8]. Ne, vi eraras, sinjoro: via pano estas malpli freŝa, ol mia [FE 10.17]. Sinjoro, vi estas neĝentila [FE 16.16]. Sinjoroj, vi estas neĝentilaj [FE 16.17]. Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn; mi ankaŭ tre amas iliajn (infanojn) [FE 18.10]. — „Ho ve, sinjoro, mia patrino forpelis min el la domo" [FE 21.8]. Flanken, sinjoro! [FE 28.8]. Sidigu vin (aŭ sidiĝu), sinjoro! [FE 39.13]. El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; la dua: al Lia Grafa Moŝto, Sinjoro P.; la tria: al Lia Moŝto, Sinjoro D. [FE 42.8].

● **sinjorino** — Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris el la arbaro kaj petis de ŝi trinki ... [FE 19.5]. Certe, mi alportis arĝentan vazon speciale por tio, por doni trinki al tiu ĉi sinjorino! [FE 19.7].

● **gesinjoroj** — Gesinjoroj N. hodiaŭ vespere venos al ni [FE 36.3].

ŝink' - jambon | bacon | Schinken | ветчина | wędlina {KUIR}. — [RE] — **Rim.**: jide: *ŝinke.*

sinkop' [OA 1] syncope | syncope | Synkope | синкопа | synkopa. — [Beau] syncope. [EG 2] Synkope.

sinod' [OA 1] synode | synod | Synode | синодъ | synod. {RELI} — [RE].

sinonim' [OA 1] synonyme | synonym | Synonym | синонимъ | synonim. — [DL-Ald]: *... la vortoj egale feliĉe kreitaj sed malegale sonantaj - kelkan tempon batalos inter si kiel sinonimoj ...* [DL-Ald 20.6].

sinoptik-a [OA 2.1] — [Beau] synoptique. [EG 2].

sintaks' [OA 1] * syntaxe | syntax | Syntax | синтаксисъ | składnia. — [RE].

sintez-o [OA 2.1] — [Beau] synthèse. [EG 2].

ŝip' - navire | ship | Schiff | корабль | okręt. {MAR} — **ŝipo** - navire | ship | Schiff | корабль | okręt [FE 27]. — **ŝip** {sen apostrofo} - bateau | a boat | Schiff | корабль | okręt [FG 11]. — [UL].

● **vapor'ŝip'o** - bateau à vapeur | steamboat | Dampfschiff | пароходъ | parostatek [FG 11]. {MAR} — **vaporŝipo** - vaporŝipo (= ŝipo, kiu sin movas per vaporo) [FE 27.10].

● **ŝipano** - La ŝipanoj devas obei la ŝipestron [FE 37.1]. — [DL 1888]: *Se la ŝipestro ordonas, la ŝipanoj devas obei* [DL 12].

● **ŝipestro** - La ŝipanoj devas obei la ŝipestron [FE 37.1].

● **direkt'il'o** (de ŝip'o) - gouvernail | helm | Steuerruder | руль | ster [UV direkt'].

ŝir' - déchirer | tear, rend | reissen {legu: reißen} | рвать | rwać. — **ŝiri** - déchirer | tear, rend | reissen {legu: reißen} | рвать | rwać [FE 42]. — **ŝir'** – {franca mankas} | tear | reissen {legu: reißen} | рвать | rwać [UV dis']. — **ŝiri** - {franca mankas} | tear | reissen {legu: reißen} | рвать | rwać [FE 28 dis']. — [AK] déchirer, arracher. — [UL].

● **dis'ŝir'** – {franca mankas} | tear to pieces | zerreissen {legu: zerreißen} | разрывать | rozrywać [UV dis'] — **disŝiri** - {franca mankas} | tear to pieces | zerreissen {legu: zerreißen} | разрывать | rozrywać [FE 28 dis'] — Dis-ŝí-ri [FE 3]. Disŝiri [FE 4]. — Mi disŝiris la leteron kaj disĵetis ĝiajn pecetojn en ĉiujn angulojn de la ĉambro [FE 42.3].

siren' [OA 1] * sirène (myth.) | siren | Sirene | сирена | syrena. {MIT} — [RE].

siring' - lilas | lilac | Flieder | сирень | bez {BOT}. — [AK] {fr} lilas, seringa. — [RE].

Sirio [OA 8] {GEO}

ŝirm' - couvrir, protéger | protekt | beschirmen | заслонять | zasłaniać. — [RE].

sirop' - sirop | syrup | Syrop | сиропъ | ulepek, syróp {KUIR}. — [AK] Sirup. — [RE].

sistemo — Sis-té-mo [FE 3, mankas en UV]. — **sistem'** [OA 1] * système | system | System | система | system. — [DL] [RE].

sitel' - seau | bucket | Eimer | ведро | wiadro, ceber. — [AK] bucket, pail. — [RE].

situ/o. [OA 8] Loko rigardata konsidere al la kondiĉoj, kiujn ĝi prezentis aŭ prezentas por la starigo de homloĝejoj (naturo de la grundo, ebloj de vivtenado, defendorimedoj, ktp). — A. site, situation, position; F. site, situation (géo.), position, assiette (d'une ville); G. Lage, Situation; H. {es} sitio, situación, posición, asiento; I. {it} sito, situazione, posizione; P. {pt} situação, localização. — [PV].

situaci' - situation, position | situation | Lage | положеніе | sytuacya, położenie. — [AK] situation, position. — [RE].

skabi' - gale, déchet | scab, wastings | Krätze | чесотка | świerzbiaczka {MED}. — [AK] gale | mange, scab | świerzba. — [RE]. [Beau] gale.

skadr' - escadron | squadron | Eskadron | эскадронъ | szwadron {MIL}. — [AK] Schwadron. — [RE].

skal' - échelle | scale | Massstab {legu: Maßstab} | масштабъ | miara (podziałka na mapie). — [AK] échelle (*mesure, série*) | scale *(measure)*.

skalp-i [OA 2.1] — [EG 2].

skan/i. [OA 9] Plene kaj laŭorde ekzameni, punkton post punkto, parton de spaco aŭ surfaco: *skani la ĉirkaŭon per radaro*; *skani libron kaj fotografaĵojn per skanilo por prilabori ilin per komputilo*.

● **skan/il/o**. [OA 9] Aparato por skani, precipe por ciferecigi optikajn bildojn.

skandal-o [OA 2.1] — [Beau] scandale.

skapol' - omoplate | omoplate, shoulderplate | Schulterbein | лопатка | łopatka {ANAT}. — [AK] shoulder-blade | Schulterblatt. — [RE].

skarab' - scarabée | beetle | Käfer | жукъ | chrząszcz {ZOO}. — [Einst 1888, 14]: *skarabaro*. [RE].

skarlat' - écarlate | scarlet | Scharlach | скарлатина | szkarlatyna, płonica {MED}.

skarlatin' [OA 1] scarlatine | scarlet fever | Scharlachfieber | скарлатина | szkarlatyna. {MED} — [Beau] scarlatine.

skarp' - écharpe | scarf | Schärpe | шарфъ | szarfa {VEST}. — [RE].

skatol' - boîte {de 1990: boite} | small box, case | Büchse, Schachtel | коробка | pudełko. — **skatolo** – boîte {de 1990: boite} | small box, case | Büchse, Schachtel | коробка | pudełko [FE 40]. — [RE]. — ... skatoleto aŭ alia objekto, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarujo ... [FE 40.15]. Skatolo, en kiu oni tenas plumojn, estas plumujo, ... [FE 40.16].

skeĉ/o. [OA 9] Mallonga sceno, kutime komika aŭ satira, prezentata de unu aŭ pluraj aktoroj, kaj kompleta en si mem.

skelet' [OA 1] * squelette | skeleton | Skelett | скелетъ | szkielet. {ANAT} — [RE].

Skem-o, [OA 4] {fr} schéma | {en} scheme | Schema | {it} schema | {es} esquema | {pt} esquema | {ca} esquema.

skeptik' [OA 1] * sceptique | sceptic | skeptisch | скептическій | sceptyczny. — [DL-Ald] [Beau] sceptique (adj.).

skerc' [OA 1] scherzo | scherzo | Scherzo | скерцо | scherzo. — [Beau] scherzo.

skerm' - escrimer | fight, fence | fechten | фехтовать | fechtować się {MIL}. — [AK] faire de l'escrime, se battre (*à l'arme blanche*) | fence *(vb.)*. — [RE].

ski/o. [OA 8] Ĉiu peco el paro da lignaj, plastaj aŭ metalaj tabuloj, longaj ĉ. du metrojn, larĝaj 7 ĝis 9 centimetrojn, kun suprenkurbita antaŭa ekstremaĵo, kiun oni alfiksas al ĉiu ŝuo kaj per kiu oni glitas sur la neĝo. — A. ski, F. ski, G. Ski, Schi, H. {es} esquí, I. {it} sci, P. {pt} esqui.

skism' [OA 1] schisme | schism | Schisma | схизма, расколъ | schyzma.

skiz' - esquisser | sketch | skizziren | очертать, очеркъ | szkicować. — [AK] entwerfen, skizzieren | делать очерк, эскиз, набросок.

sklav' - esclave | slave | Knecht | рабъ | niewolnik. {JUR} — [AK] Sklave.

Skol' [OA 3.2] {en} school (of thought) {evidente tro ofte presita krampo}, opinion, art, etc.) | {fr} école (ensemble des

disciples) | {de} Schule | {es} escuela | {pt} --- {traduko mankas, estu escola} | {it} scuola | {pl} szkola {legu: szkoła}. — **Rim.**: Kp. lernejo [UV] [FE 40.12].

skolastik-o [OA 2.1] {FILO} — [Beau] scolastique. [EG 2] Scholastik.

skolop' - bécasse | snipe, wood-cock | Schnepfe | куликъ, бекасъ | bekas {ZOO}. — [AK] woodcock.

skolt/o [OA 9] **1** Soldato, ŝipo, aviadilo k.s. elsendita por kolekti informojn pri la pozicio aŭ forto de la malamiko, pri la irota vojo (de armeo), k.s. **2** Ano de la skolta movado, internacia junulara movado fondita en Anglujo en 1907.

● **skolt/ism/o**. [OA 9] La idearo de la skolta movado; tiu movado mem.

skorbut' - scorbut | scurvy | Scorbut {de 1901: Skorbut} | цынга | szkorbut {MED}.

skorpi' - scorpion | scorpion | Scorpion {2012: Skorpion} | скорпіонъ | niedźwiadek {ZOO}.

skorzoner-o [OA 2.2] scorsonère | black salsify | Schwarzwurzel {BOT}

skrap' - râcler, ratisser | shave, scrape | schaben | скоблить | skrobać.

skrib' - écrire | write | schreiben | писать | pisać. — **skribi** - écrire | write | schreiben | писать | pisać [FE 9]. — La patro ne legas libron, sed li skribas leteron [FE 9.11]. Ci skribas (anstataŭ „ci" oni uzas ordinare „vi") [FE 16.2]. Ne skribu al mi tiajn longajn leterojn [FE 18.4]. Vi skribas, kaj la infanoj skribas; ili ĉiuj sidas silente kaj skribas [FE 20.2]. Ekzemploj: skribtablo aŭ skribotablo (= tablo, sur kiu oni skribas) ... [FE 27.6].

● **skribata** — Vortoj, kiuj formas kune unu ideon, estas skribataj kune, sed dividataj unu de la alia per streketo, ... [UV, enk. 2].

● **skribita** — Via parolo estas tute nekomprenebla kaj viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble [FE 41.4]. — Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enk. 1].

● **skribe** — Ni faris la kontrakton ne skribe, sed parole [FE 31.9].

● **skribado** — ... bastoneto, sur kiu oni tenas plumon por skribado, estas plumingo [FE 40.16].

● **skribilaro** — Mia skribilaro konsistas el inkujo, sablujo, kelke da plumoj, krajono kaj inksorbilo [FE 34.9].

● **sur** {kun akuzativo} — Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn [FE 14.14]. ... estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino ... [FE 15.6]. ... estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino ... [FE 19.5]. ... tra la fenestro, kiu sin trovas apud la pordo, la vaporo iras sur la korton [FE 25.14]. Mi metis la manon sur la tablon [FE 26.8]. ... ni ankaŭ diras: „la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon", kaj la vortoj „ĝardenon", „tablon" staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en" kaj „sur" tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton ... [FE 28.3]. La birdo ... surflugis sur la tegmenton [FE 31.20]. Li staras supre sur la monto kaj rigardas malsupren sur la kampon [FE 33.12]. Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, ... [FE 38.10]. — **Lingva Respondo 1908** [Pri la akuzativo post „sur"]: Vd. je „tra". Kp. samteme „sub".

● **surflugi** — La birdo ne forflugis: ĝi nur deflugis de la arbo, alflugis al la domo kaj surflugis sur la tegmenton [FE 31.20].

● **surtuto** — vd. tie, difinita kiel surtut-o, ne kiel sur-tut-o.

surd' - sourd | deaf | taub | глухой | głuchy. — **surda** - sourd | deaf | taub | глухой | głuchy [FE 20]. — [UL]. — Ĉu vi estas surda aŭ muta? [FE 20.14].

surfac/o. [OA 8] Lokaro de la punktoj limantaj porcion de spaco aŭ solidon en la spaco. — A. surface, F. surface, G. Oberfläche, H. {es} superficie, I. {it} superficie, P. {pt} superfície. — [Kabe]. — Kp. supr'aĵ' [UV].

surpriz' - surprendre | surprise | überraschen | дѣлать сюрпризъ | niespodzianka, siurpriza. — **surprizi** - surprendre | surprise | überraschen | дѣлать сюрпризъ | robić niespodzianki [FE 40]. — [RE].

● **surprizo** — Mi eksaltis de surprizo [FE 40.3].

surtut' - redingote | over-coat | Rock | сюртукъ | surdut. — **surtuto** - redingote | over-coat | Rock | сюртукъ | surdut [FE 40]. {VEST} — [AK] redingote, jaquette, etc. | overcoat | Überrock. — [UL]. — La surtuto estas aĉetita de mi, sekve ĝi apartenas al mi [FE 25.5]. En la poŝo de mia pantalono mi portas monujon, kaj en la poŝo de mia surtuto mi portas paperujon ... [FE 40.18]. — **Rim.**: **1.** Komprenita kiel unu radiko, ne kunmetaĵo el sur kaj tut'. **2.** La vorto devus aperi en la vortlisto fine de FE 25, sed estas registrita nur en FE 40, 3-a linio. **3.** Kp. tut'.

suspekt' - suspecter, soupçonner | suspect | verdächtigen | подозрѣвать | podejrzewać. — **suspekti** - suspecter, soupçonner | suspect | verdächtigen | подозрѣвать | podejrzewać [FE 35]. — [AK] Verdacht hegen, argwöhnen. — [RE]. — Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklaraĵon [FE 35].

SUSURI [OA 6.1] *Eligi sonon malfortan kaj iom sekan, kiel de atlaso, silko, ĉifita papero, k. s.* | {en} to rustle | {fr} susurrer | {de} rascheln, rauschen (Seide, Papier) | {es} susurrar | {it} sussurrare | {pl} wydawać zgrzyt, chrześcić. — [ER].

ŝut' - verser, répandre (pas pour les liquides) | discharge (corn, etc.) | schütten | сыпать | sypać. — [UL].

sutan' [OA 1] soutane | cassock | Sutane (Priesterkleid) | сутана | sutanna. {VEST} {RELI} — [EG 2].

svarm' [OA 1] grouiller, fourmiller | swarm | wimmeln | роиться, копошиться | roić się. — [EG 2].

svat' - rechercher en mariage, s'entremettre | intermeddle | freien, werben | сватать | swatać. — [AK] act as matchmaker. — [RE].

Ŝveb' [OA 3.2] {en} to hover | {fr} planer | {de} schweben | {es} cernerse, spaziare | {pt} --- {traduko mankas, estu: pairar, adejar} | {it} librarsi su le {eble pres-eraro, estu: sulle} ali, stare sospeso nell' aria {legu: nell'aria} | {pl} bujac {legu: bujać}. — [Verax].

svedo [OA 8] — [1889]. [E-isto 1889, p. 16, 23] Al ... amikoj en Svedujo. [Beau].

ŝvel' - enfler | swell | schwellen | пухнуть | puchnąć. — [UL].

sven' - s'évanouir | faint, vanish | in Ohnmacht fallen | падать въ обморокъ | omdleć. — [AK] faint, swoon. — [RE].

sving' - brandiller | swing, toss | schwingen | махать | machać. — [AK] brandir, agiter | swing *(trans.)*. — [RE].

ŝvit' - suer | perspire | schwitzen | потѣть | pocić się. – **ŝviti** - suer | perspire | schwitzen | потѣть | pocić się [FE 40]. — [AK] suer, transpirer. — [UL].

● **ŝvitbanejo** - La kuracisto konsilis al mi iri en ŝvitbanejon [FE 40.14].

T

Tt - t | t as in "tea" | t | т | t [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **to** ... [FE 1]. — **to** [OA 7] = nomo de la litero **t**, dudekvara litero de la Esperanta alfabeto. — **Lingva Respondo 56 (1893)**: La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

t. e. — Por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, t. e. (= tio estas) dek frankojn [FE 14, mankas en UV]. ... oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se

la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo [FE 27.5]. ... sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri ... [FE 28]. El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon [FE 29]. — **Rim**.: [Lingva Respondo 1893]. La signifo de la mallongigoj estas: t. e. = tio estas; k. c. = kaj ceteraj; k. t. p. = kaj tiel plu; e. = ekzemple; s-ro = sinjoro; d-ro = doktoro; frl. aŭ f-ino = fraŭlino; s-rino = sinjorino; n-ro = numero. – LR 66B, *Esperantisto* 1893, p. 96 = PVZ III, 110. — Kp. k. t. p.

tabak' - tabac | tobacco | Tabak | табакъ | tytóń. {BOT}

taban' - taon | gad-fly | Bremse (Fliege) | слѣпень | giez. {ZOO}

tabel' - table, liste | table, index | Tabelle | таблица | tabelka.

tabl' - table | table | Tisch | столъ | stół. — **tablo** - table | table | Tisch | столъ | stół [FE 6]. — [AK] table (*meuble*). — La libro estas sur la tablo, kaj la krajono kuŝas sur la fenestro [FE 6.5]. Blanka papero kuŝas sur la tablo [FE 10.2]. La blanka papero jam ne kuŝas sur la tablo [FE 10.3]. Kie estas la tranĉiloj? — Ili kuŝas sur la tablo [FE 16.10]. Mi metis la manon sur la tablon [FE 26.8]. … tiel same ni ankaŭ diras: "la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon", kaj la vortoj „ĝardenon", „tablon" staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en" kaj „sur" tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri, ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo (ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado) … [FE 28.3]. La tablo staras malrekte kaj kredeble baldaŭ renversiĝos [FE 33.11]. Sur la tablo staris diversaj sukeraĵoj [FE 35.5]. La lignisto vendas lignon, kaj la lignaĵisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn [FE 37.14]. Li sidas apud la tablo kaj dormetas [FE 38.5].

● **tableto** — Mi aĉetis por la infanoj tableton kaj kelke da seĝetoj [FE 38.1].

● **tabl/o/tenis/o**. [OA 9 tenis'] Tenisosimila ludo sur speciala tablo, en kiu oni uzas lignajn batilojn kaj tre malpezan plastan pilketon. {SPORT}

● **skribtablo** aŭ **skribotablo** (= tablo, sur kiu oni skribas) [FE 27.6]. — En mia skribotablo sin trovas kvar tirkestoj [FE 31.24].

tabul' - planche | tablet | Tafel, Brett | доска | deska, tablica. — [AK] board, plank, tablet.

taburet-o [OA 2.1]

taĉment' - détachement | detachment | Abtheilung {de 1901: Abteilung}, Detachement | отрядъ | oddział. {MIL} — [AK] détachement (*milit*.) | detachment *(troops)* | oddział (wojska).

taft' - taffetas | taffety | Taffet {(ark.) 2012: Taft} | тафта | kitajka. {TEKST} — [AK] taffeta *(material).*

tag' - jour | day | Tag | день | dzień. — **tago** - jour | day | Tag | день | dzień [FE 10]. — Mi deziras al vi bonan tagon, sinjoro! [FE 10.8]. En la tago ni vidas la helan sunon, kaj en la nokto ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn [FE 10.13]. La dudeka (tago) de Februaro estas la kvindek-unua tago de la jaro [FE 12.14]. La sepan tagon de la semajno Dio elektis, ke ĝi estu pli sankta, ol la ses unuaj tagoj [FE 12.15]. — Kion Dio kreis en la sesa tago? [FE 12.16]. Hodiaŭ estas la dudek sepa (tago) de Marto [FE 12.18]. … tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko kaj alporti domen plenan grandan kruĉon [FE 13.3]. Por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, t. e. (= tio estas) dek frankojn [FE 14.7]. Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro [FE 14.12]. Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj [FE 14.16]. En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki [FE 15.1]. Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito faris al li plezuron [FE 20.6]. Mi veturis du tagojn kaj unu nokton [FE 29.6]. Li estas morte malsana, li ne vivos pli, ol unu tagon [FE 31.7]. Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita [FE 33.7]. En varmega tago mi amas promeni en arbaro [FE 34.11]. … unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis [FE 39.11]. Mi saltadis la tutan tagon de loko al loko [FE 40.5]. Tiu ĉi grava

tago restos por mi ĉiam memorinda [FE 41.11].

● **tag'manĝ'** – dîner {de 1990: diner} | dine | zu Mittag essen | обѣдать | obiadować [UV manĝ']. — **tagmanĝi** [FE 27.12].

● **unutaga** - (= kiu daŭras unu tagon) [FE 27.8].

● **unuataga** - (= kiu estas en la unua tago) [FE 27.9].

tajl/i. [OA 8] Doni difinitan formon al materialo, tute aparte al ŝtofo, tranĉante el ĝi pecojn aŭ eretojn: *~i ŝtonon, gemon, ŝtofon*. — A. to cut, cut to shape; to form; F. tailler; G. zuschneiden, zustutzen, anspitzen, abschleifen, behauen; H. {es} cortar, tallar; I. {it} tagliare; P. {pt} talhar, recortar.

tajlor' - tailleur | tailor | Schneider | портной | krawiec. — **tajloro** - tailleur | tailor | Schneider | портной | krawiec [FE 5]. La patro estas tajloro [FE 5].

tajp/i. [OA 8] Skribi per maŝino. — A. to type, to typewrite; F. taper (à la machine), dactylographier; G. tippen, maschineschreiben; H. {es} mecanografiar, escribir con máquina; I. {it} dattilografare, scrivere a macchina, battere a macchina; P. {pt} dactilografar {de 2009: datilografar}.

taks' - taxer | tax, appraise | abschätzen, taxiren {de 1901: taxieren} | оцѣнивать | taksować.

taksi/o. [OA 9] Aŭto, kiu kune kun ŝoforo estas luebla por veturado, normale provizita per aparato, kiu montras la ŝuldatan veturpagon en ĉiu momento.

taksus' [OA 1] if | yew-tree | Eibe | тисъ | cis (drzewo). {BOT}

takt' [OA 1] * mesure (mus.), tact | tact | Takt (mus.), Taktgefühl | тактотактъ | takt.

taktik' [OA 1] tactique | tactics | Taktik | тактика | taktyka.

talent' - talent | talent | Talent | талантъ | talent.

taler' [OA 1] * thaler | thaler | Taler | таллеръ | talar. {MON}

tali' - taille | tally | Taille | станъ | talia, figura. {ANAT} — [AK] figure, waist, stature | стан, талия.

talisman-o [OA 2.1] — [EG 2] Talisman.

talk-o [OA 2.1] **—** [EG 2] (mineral.) Talk.

talmud-o [OA 2.1] {RELI} — [EG 2] Talmud.

talp' - taupe | mole (animal) | Maulwurf | кротъ | kret. {ZOO}

tambur' - tambour | drum | Trommel | барабанъ | bęben. {MUZ}

● **tambur'i** - battre le tambour | drum | trommeln | барабанить | bębnić. {MUZ}

tamburin-o [OA 2.1] {MUZ} — [EG 2] Tamburin.

tamen - pourtant, néanmoins | however, nevertheless | doch, jedoch | однако | jednak. — **tamen** - pourtant, néanmoins | however, nevertheless | doch, jedoch | однако | jednak [FE 34]. — … la severa netuŝebleco de la « Fundamento » gardos ĉiam la unuecon de nia lingvo, ne malhelpante tamen al la lingvo … konstante perfektiĝadi [A 9.1]. — Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron [FE 34.14]. Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu; … [FE 39.11]. Li estas tre ekkolerema kaj ekscitiĝas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo; tamen li estas tre pardonema, li ne portas longe la koleron kaj li tute ne estas venĝema [FE 41.13].

tamtam-o [OA 2.1]

tan' - tanner | tan | gärben | дубить | garbować, wyprawiać (skóry).

tandem-o [OA 2.1]

tangent-o (*trig.)* [OA 2.1] {MAT}

tanin' [OA 1] * tanin | tannin | Gerbstoff, Tanin | таннинъ | tanina.

tank/o. [OA 9] Kirasita batalveturilo, kiu moviĝas sur ĉenbendoj (raŭpoj). {MIL}

tapet' - tapisserie, tenture | tapestry | Tapete | обои | obicia, tapety. — [AK] tapisserie, tenture, papier peint | wall-paper, paper-hangings.

tapiok' [OA 1] tapioca | tapioca | Tapioka | тапіока | tapioka. {KUIR}

tapir/o. [OA 9] Porkosimila mamulo el la ordo de neparhufuloj, kun dikaj kruroj, mallonga vosto kaj mallonga movebla rostro, vivanta en suda Azio kaj Sud-Ameriko. (*Tapirus*.) {ZOO}

tapiŝ' - tapis | carpet | Teppich | коверъ | dywan. — Ta-pí-ŝo [FE 3]

tarantel-o [OA 2.1] {MUZ}

tarantul-o (*zool.*) [OA 2.1] {ZOO}

tarif' [OA 1] tarif | tariff | Tarif | тарифъ | taryfa.

tarok-o (*kartl.*) [OA 2.1] {LUD}

tas' - tasse | cup | Tasse | чашка | filiżanka.

task' [OA 1] tâche | task | Aufgabe | таѕкозадача, обязанность obowiązek | źadanie {evidente pres-eraro, estu: zadanie [kun antaua komo]}.

tatu' [OA 1] tatouer | tatoo | tätowieren | татуировать | tatuować.

taŭg' - être bon pour..., convenir pour... | be fit for | taugen | годиться | być zdatnym.

tavol' - couche, rangée | couch, bed, row | Schicht, Scheibe | слой | warstwa. — [AK] layer, stratum.

te' - thé | tea | Thee | чай | herbata. — **teo** - thé | tea | Thee | чай | herbata [FE 26]. Anstataŭ kafo li donis al mi teon kun sukero, sed sen kremo [FE 26]. Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero [FE 31]. Mi trinkis teon kun kuko kaj konfitaĵo [FE 35].

● **te'kruĉ'** - théière | tea-pot | Theekanne {de 1901: Teekanne} | чайникъ | czajnik.

● **te'maŝin'** - bouilloire | tea-kettle | Theemaschine {de 1901: Teemaschine} | самоваръ | samowar. — **Rim.**: Kp. samovar-o [OA 2.1].

teatro - theâtre | theatre | Theater | театръ | teatr [FE 32, mankas en UV]. — **teatr'o** – [franca mankas] | theatre | Theater | театръ | teatr [FG 15.2]. — [UL C7.2]. — [DL 5.33] [DL 7.13] [DL 16.32]. — Teatramanto ofte vizitas la teatron kaj ricevas baldaŭ teatrajn manierojn [FE 32.1]. — **teatr'** [OA 1] * théâtre | theatre | Theater | театръ | teatr. — **teatr'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7].

● **teatr'a** [franca mankas] | theatrical (not *teatrical'a*) | theatralisch | но театральный | lecz teatralny [FG 15.2]. — [UL C7.2]. — **teatra** - Teatramanto ofte vizitas la teatron kaj ricevas baldaŭ teatrajn manierojn [FE 32.1].

● **teatramanto** - Teatramanto ofte vizitas la teatron kaj ricevas baldaŭ teatrajn manierojn [FE 32.1].

ted' - provoquer la satiété, ennuyer | tedious | Ueberdruss {legu: Überdruss} erregen | надоѣдать | dokuczać. — [AK] provoquer la satiété, importuner, obséder | bore, weary, annoy | lästig sein, Überdruss erregen | naprzykrzać.

teg' - mettre par-dessus, couvrir | overlay, cover | beziehen, überziehen | наволакивать | powłóczyć. — [AK] cover *(wholly) (vb.)* | натягивать (сверху), обтягивать.

● **teg'o** - taie | pillowcase, bedtick | Ueberzug {legu: Überzug} | наволочка | powłoczka.

tegment' - toit | roof | Dach | крыша | dach. — **tegmento** - toit | roof | Dach | крыша | dach [FE 31]. — La birdo ne forflugis: ĝi nur deflugis de la arbo, alflugis al la domo kaj surflugis sur la tegmenton [FE 31.20]. Sur kruta ŝtuparo li levis sin al la tegmento de la domo [FE 34.13].

● **sub'tegment'** - galetas | garret | Boden, Dachstube | чердакъ | poddasze.

Tegol' [OA 3.1] {en} tile | tuile | (Dach)ziegel | {es} teja | {pt} telha | {it} tegolo, tegola | {pl} dachowka. **—** [EG 2] Ziegel (Dach~).

Teĥnik', teknik' [OA 3.2] {en} technical | {fr} technique | {de} technisch | {es} tecnico | {pt} technico {legu: técnico} | {it} tecnico | {pl} techniczny.

teism-o [OA 2.1] {RELI}

teist-o [OA 2.1] {RELI}

teks' - tisser | weave | weben | ткать | tkać.

tekst' – [A, mankas en UV]. — **tekst'** [OA 1] * texte | text | Text | текстъ | tekst. — **tekst/o** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 8].

● **kunteksta** - ... komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto [A 4.5].

telefon' [OA 1] telephone | telephone | Telephon {de 1996 ankaŭ: Telefon} | телефонъ | telefon.

telegraf' — Mi gratulis telegrafe la junajn geedzojn [FE 36.4, mankas en UV]. — **telegraf'** [OA 1] * télégraphe | telegraph | Telegraph | телеграфъ | telegraf. — **telegraf'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [DL 1888]: *Li korespondas telegrafe kun ĉiuj agentoj [DL 7]*.

telegram' [OA 1] * telegramme | telegram | Telegramm | телеграмма | telegram.

telepati/o. [OA 9] Komunikiĝo inter mensoj per aliaj rimedoj ol la ordinaraj sensoj: *la ekzisto de telepatio ne estas science pruvita*. **—** [EG 2] Telepathie.

teler' - assiette | plate | Teller | тарелка | talerz. — **telero** - assiette | plate | Teller | тарелка | talerz [FE 31]. — [AK] тарелка. — Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko,

glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo [FE 34.10].

● **teleroforma** — Li portas rozokoloran superveston kaj teleroforman ĉapelon [FE 31.23].

● **telertuketo** — Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo [FE 34.10].

teleskop-o [OA 2.1]

televid/i. [OA 8] Vidi per televizio. — A. to watch television, F. voir à la télévision, G. das Fernsehen schauen {ankaŭ: fernsehen}, H. {es} mirar a la television, I. {it} vedere alla televisione, P. {pt} assistir televisão {legu: assistir à televisão}.

tem' - thème | thema | Thema | тема, задача | temat, zadanie. — [AK] thème, sujet, donnée, matière à traiter | theme, topic | тема | temat.

temp' - temps (durée) | time | Zeit | время | czas. — **tempo** - temps (durée) | time | Zeit | время | czas [FE 13]. — Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita …, tiam aŭtoritata komitato, …, havos la rajton fari … ŝanĝojn, … [A 1.2]; sed ĝis tiu tempo la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa, … [A 1.3]. Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo … tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto … [A 2.1]. Ĝis la tempo, kiam ia … institucio decidos alie, ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj … [A 3.5]. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, … [A 8.2]. … tiuj ĉi aŭ̂aismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, kaj tiamaniere ni havos la certecon, ke … neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj [A 8.3]. … ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidos pligrandigi (…) la ĝisnunan fundamenton … [12]. — … tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna [FE 13.1]. La tempo pasinta jam neniam revenos; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas [FE 22.8]. La pastro, kiu mortis antaŭ nelonge (aŭ antaŭ nelonga tempo), loĝis longe en nia urbo [FE 25.12]. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (…), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, … [FE 27.3]. Jam estas tempo iri domen [FE 28.6].

● **samtempe** — … tiuj ĉi aŭ̂aismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, … [A 8.3].

temperament' [OA 1] * tempérament | temperament | Temperament, Gemütsart | темпераментъ | temperament.

temperatur' [OA 1] * temperature | temperature | Temperatur | температура | temperatura.

tempest/o. [OA 8] Ventabunda vetero, pli forta ol ŝtormo, sed malpli forta ol uragano. — A. tempest; F. tempête; G. Sturm, stürmisches Wetter, Unwetter, Ungewitter {legu: Gewitter}; H. {es} tempestad; I. {it} tempesta; P. {pt} tempestade. {METEO}

tempi' - tempe | temple (of forehead) | Schläfe | височъ | skroń. {ANAT}

templ' [OA 1] * temple | temple | Tempel | храмъ | świątynia. — **Rim.**: En UV: **sankt'ej'** - temple | temple | Tempel | храмъ | świątynia [UV sankt'].

ten' - tenir | hold, grasp | halten | держать | trzymać. — **teni** - tenir | hold, grasp | halten | держать | trzymać [FE 15]. — Té-ni [FE 2].

● **ten'il'** - manche, anse | touch, hold, handle | Stiel, Griftf | рукоятка | rączka.

● **de'ten'** - retenir | keep off, detain | enthalten, abhalten | удерживать | zatrzymywać.

● **sub'ten'** - étayer, appuyer | prop, stay | stützen, unterhalten | поддерживать | podtrzymywać.

● **libr'o'ten'ant'o** - teneur de livres | bookkeeper | Buchhalter | бухгалтеръ | buchalter [UV libr'].

tend' - tente, pavillon | tent, pavilion | Zelt | палатка | namiot. — [AK] tent.

tenden' - tendon | tendon | Sehne | тетива, сухожилие | ścięgno, żyła. {ANAT} — [AK] ścięgno, cięciwa.

tendenc' [OA 1] * tendance | tendency | Tendenz | тенденція | tendencja.

tener/a. [OA 8] Montranta varman delikatecon de la koro. — A. tender; F. tendre, caressant; G. liebevoll, herzlich, liebkosend, zärtlich; H. {es} tierno, cariñoso; I. {it} tenero. affettuoso, amorevole; P. terno, carinhoso, amoroso, afável.

teni' [OA 1] tenia | tape-worm | Bandwurm | ленточная глиста | tasiemiec.

tenis/o. [OA 9] Sporto, en kiu du ludantoj (aŭ du paroj da ludantoj) per rakedoj alterne batas kaj rebatas pilketon trans reton streĉitan inter la ludantoj. — [EG 2] laŭntenis-o, Lawntennis.

● **tabl/o/tenis/o**. [OA 9] Tenisosimila ludo sur speciala tablo, en kiu oni uzas lignajn batilojn kaj tre malpezan plastan pilketon.

tenor' [OA 1] * tenor | tenor | Tenor | теноръ | tenor. {MUS}

tent' - tenter | tempt, try | prüfen, versuchen | искушать | kusić. — [AK] tempt | in Versuchung führen.

Teodoro — La rozo apartenas al Teodoro [FE 5, mankas en UV]. — **Teodor'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

teokrat' (2) [OA 7]

teokratri-o [OA 2.1] **—** [EG 2] Theokratie.

teolog' [OA 1] * theologien | theologian | Theolog | богословъ | teolog.

teologi' [OA 1] * theologie | theology | Theologie | богословіе | teologja.

teorem-o [OA 2.1] — [EG 2] Theorem.

teorio — Te-o-rí-o [FE 3, mankas en UV]. — **teori'** [OA 1] * théorie | theory | Theorie | теорія | teorja. — **teori'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7].

ter' - terre | earth | Erde | земля | ziemia. {GEO} — **tero** - terre | earth | Erde | земля | ziemia [FE 6] — **tero** - terre | earth | Erde | земля | ziemia [FE 31]. — Sur la tero kuŝas ŝtono [FE 6.9]. Super la tero sin trovas aero [FE 26.10]. — Rim.: „tero" estas troa en la lekcionfina vortlisto de FE 31.

● **en'ter'ig'** - ensevelir | bury | begraben | хоронить | pochować, pogrzebać.

● **ter'kol'** - isthme | isthmus | Landenge | перешеекъ | międzymorze, przesmyk.

● **ter'pom'** - pomme de terre | potato | Kartoffel | картофель | kartofel [UV ter'].

● **ter'pom'** - pomme de terre | potatoe | Kartoffel | картофель | kartofel [UV pom'].

terapi' [OA 1] * therapeutique | therapeutics | Therapie | терапія | terapja.

teras' - terrasse | terrace | Terasse | терасса | taras. — [AK] терраса.

tercet' [OA 1] trio | trio | Terzett | терцетъ | tercet. {MUS}

terebint' - térébenthine | turpentine | Terpentin | терпентинъ | terpentyna. {KEM}

teren/o. [OA 8] Terspaco, rigardata el la vidpunkto de ĝia utiligado por difinita homa aktiveco. — A. ground, piece of land, terrain; F. terrain; G. Boden. Grundstück, Gelände; H. {es} terreno, solar; I. {it} terreno; P. terreno.

teritori-o [OA 2.1] — [EG 2] Territorium.

termin' - terme | term | Termin | терминъ | termin. — [AK] term, technical name | Terminus, Fachausdruck.

termit' [OA 1] * termite | termite | Termit | термитъ | termit.

termometr' [OA 1] thermometre | thermometer | Thermometer | термометръ | termometr. {METEO}

tern' - éternuer | sneeze | niessen {de 1901: niesen} | чихать | kichać. — [AK] niesen.

terur' - terreur, effroi | terror | Schrecken | ужасъ | przerażenie. — **teruro** - terreur, effroi | terror | Schrecken | ужасъ | przerażenie [FE 13]. — [AK] terror, horror, fright. — Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, kion fari [FE 38].

● **terura** - ... tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna [FE 13].

test/o. [OA 9] Ekzameno, mezurado aŭ enketo por kontroli ion (ekz. nivelon de lernantoj, kvaliton de produkto, korpan sanstaton).

testament' - testament | testament | Testament | завѣщаніе | testament. {JUR} — [AK] will, testament.

testik' - testicule | testicle | Ei (anatom.) | яичко (анатом.) | jajko. {ANAT} — [AK] Hode | jądro.

testud' - tortue | tortoise | Schildkröte | черепаха | żółw. {ZOO}

tetan' - tetanos | tetanus | Starrkrampf {2012 ankaŭ: Tetanus} | столбнякъ | tężec. {MED}

tetr' - tétras, coq de bruyère | grouse | Birkhahn | тетеревъ | cietrzew. {ZOO} — [AK] Birkhuhn.

tetra' - gélinotte de bois | hazel-hen | Haselhuhn | рябчикъ | jarząbek. {ZOO} — [AK] Waldhuhn.

tez' - thèse | thesis | Satz, Thesis {2012: These} | положеніе, тезисъ | teza. — [AK] thesis, proposition.

tia - tel | such | solcher | такой | taki. — **tia** - tel | such | solcher | такой | taki

[FE 27]. — ... fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj [A 1.2]. ... estas bone ĉiam peni uzadi nur vortojn el la «Fundamento» ĉar nur pri tiaj vortoj ni povas esti certaj, ke nia adresato ilin nepre trovos en sia vortaro [A 7.1]. Leĝan sankcion ili [= la ideoj] ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, ... [A 11.2]. — Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas; ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman kapablon? [FE 17.10] Ne skribu al mi tiajn longajn leterojn [FE 18.4]. La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, ... [FE 23.3]. Ĝia uzado [= tiu de la artikolo] estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj [FE 27.2]. ... en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon „n” tute egale ĉu ia prepozicio starus aŭ ne [FE 28.3]. Se ni aldonas la literon „t”, ni ricevas vortojn montrajn: tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu [FE 30.4].

● **tiamaniere** — ... tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, ..., kaj tiamaniere ni havos la certecon, ke eĉ ĉe la plej granda perfektiĝado la unueco de Esperanto neniam estos rompata ... [A 8.3].

— **Lingva Respondo 1891 [Pri tia - tiela]**: La diferenco inter la senco de *tia* kaj *tiela* estas tiel malgranda, ke la okazoj por *tiela* estas tre maloftaj. Ekzemple: se brulas granda domo kaj la brulo estas stranga, jen hela, jen subite estingiĝanta por momento, jen saltanta k.c. — ni povus diri (kvankam ne necese): ĉu vi vidis *tiun* brulon (= la brulon de tiu ĉi domo)? *tian* brulon (= tiel grandan k.c.) mi ofte vidas, sed neniam mi vidis brulon *tielan* (= tiamanieran). [*La Esperantisto*, 1891, p. 21]

tial - c’est pourquoi | therefore | darum, deshalb | потому | dla tego. — **tial** - c’est pourquoi | therefore | darum, deshalb | потому | dla tego [FE 9]. — Tial, por meti finon al ĉiuj malkompreniĝoj kaj disputoj, kaj por ke ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi, la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, ... [A 3.3]. Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (...) tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la «Universala Vortaro» [A 4.2]. — Aleksandro ne volas lerni, kaj tial mi batas Aleksandron [FE 9.7]. Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, ... [FE 13.1]. Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; tial du metroj kostas kvar kaj duonon frankojn (aŭ da frankoj) [FE 14.11]. Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj [FE 14.16]. Se ni aldonas la literon „t”, ni ricevas vortojn montrajn: tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu [FE 30.4]. Hodiaŭ estas bela frosta vetero, tial mi prenos miajn glitilojn kaj iros gliti [FE 34.7]. En la kota vetero mia vesto forte malpuriĝis; tial mi prenis broson kaj purigis la veston [FE 39.1]. La sufikso «um» ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun «um» oni devas lerni, kiel simplajn vortojn [FE 42.9].

tiam - alors | then | dann | тогда | wtedy. — **tiam** - alors | then | dann | тогда | wtedy [FE 27]. — Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj ..., tiam aŭtoritata komitato, ..., havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, ... [A 1.2]. — Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato [FE 22.3]. La artikolo „la” estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj [FE 27.1]. Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion „je” [FE 29.1]. Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas [FE 29.10]. Se ni aldonas la literon „t”, ni ricevas vortojn montrajn: tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu [FE 30.4].

● **tiama** - Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi-tiea, tieulo, tiamulo k. t. p. ... [FE 30.10].

● **tiamulo** - Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi-tiea, tieulo, tiamulo k. t. p. ... [FE 30.10].

— **Rim.**: UL kaj DL *tian* (kun –n); tiam (kun –m) de post DL Ald 1888: „La sola

ŝanĝo, kiun mi {Zamenhof} trovas necesa fari mem, estas: anstataŭ „ian,“ „ĉian,“ „kian,“ „nenian,“ „tian“ — devas esti: „iam,“ „ĉiam,“ „kiam,“ „neniam,“ „tiam“ (por malegaligi la vortojn „ian“ etc. kaj „ia,n“ etc).“

tiar-o [OA 2.1] {VEST} — [EG 2] Tiara.

tibi' - os de la jambe, tibia | shin bone | Schienbein | голень | goleń. {ANAT} — [AK] большая берцовая кость.

tie - là-bas, là, y | there | dort | тамъ | tam. — **tie** - là-bas, là, y | there | dort | тамъ | tam [FE 28]. — **tie** - [franca mankas] | tie there - tie ĉi here | tie dort - tie ĉi hier | tie тамъ - tie ĉi здѣсь | tie tam - tie ĉi tu [FE 13 ĉi]. — **tie** – [franca mankas] | [angla mankas] | da | тамъ | tam (w tamtem miejscu) [FG 13]. — Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj [FE 28.2]. ... por esprimi direkton, ni aldonas al la vorto la finon „n"; sekve: tie (= en tiu loko), tien (= al tiu loko) [FE 28.3]. ... sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri, ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo [FE 28.3]. Se ni aldonas la literon „t", ni ricevas vortojn montrajn: tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu [FE 30.4]. Aldonante al la vortoj montraj la vorton „ĉi", ni ricevas montron pli proksiman; ekzemple: ... tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime) [FE 30.8].

● **tie'n** – [franca mankas] | [angla mankas] | dahin | туда | tam (do tamtego miejsca) [FG 13]. — **tien** - „Se estas tiel," diris la patrino, „mi devas tien sendi mian filinon [FE 17.9]. "Mi volas ke vi tien iru," diris la patrino, "kaj iru tuj!" [FE 19.2]. ... por esprimi direkton, ni aldonas al la vorto la finon „n"; sekve: tie (= en tiu loko), tien (= al tiu loko) [FE 28.3].

● **tie ĉi** - [franca mankas] | tie there - tie ĉi here | tie dort - tie ĉi hier | tie тамъ - tie ĉi здѣсь | tie tam - tie ĉi tu [FE 13 ĉi]. — Se li scius, ke mi estas tie ĉi, li tuj venus al mi [FE 20.11]. La filo de la reĝo, kiu revenis de ĉaso, ŝin renkontis; kaj, vidante, ke ŝi estas tiel bela, li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola ... [FE 21.7]. Mi restas tie ĉi laŭ la ordono de mia estro [FE 26.15]. For de tie ĉi! [FE 26.24]. ... tiel same ni ankaŭ diras: "la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon", kaj la vortoj „ĝardenon", „tablon" staras tie ĉi en akuzativo [28.3]. Aldonante al la vortoj montraj la vorton „ĉi", ni ricevas montron pli proksiman; ekzemple: ... tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime) [FE 30.8].

● **tien ĉi** – "Ĉu mi venis tien ĉi," diris al ŝi la malĝentila kaj fiera knabino, "por doni al vi trinki? [FE 19.6]

● **ĉi tie** - Aldonante al la vortoj montraj la vorton „ĉi", ni ricevas montron pli proksiman; ekzemple: ... tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime) [FE 30.8].

● **tiea** - Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: ... tiea, ĉi-tiea, tieulo, ... k. t. p. ... [FE 30.10].

● **ĉi-tiea** – Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: ... tiea, ĉi-tiea, tieulo, ... k. t. p. ... [FE 30.10].

● **tieulo** - Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: ... tiea, ĉi-tiea, tieulo, ... k. t. p. ... [FE 30.10].

tiel - ainsi, de cette manière | thus, so | so | такъ | tak. — **tiel** - ainsi, de cette manière | thus, so | so | такъ | tak [FE 10]. — Mi estas tiel forta, kiel vi [FE 10]. La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon; ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili [FE 11]. „Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas fari al vi donacon" [FE 15]. ... ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto [FE 17]. "Pardonu al mi, patrino," diris la malfeliĉa knabino, "ke mi restis tiel longe" [FE 17]. "Se estas tiel," diris la patrino, "mi devas tien sendi mian filinon [FE 17]. Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem; sed ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas [FE 18]. "Bone, ĉar vi estas tiel servema, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano." [FE 19]. ... vidante, ke ŝi estas tiel bela, li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola kaj pro kio ŝi ploras [FE 21]. Sed pri ŝia fratino ni povas diri, ke ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si ... [FE 23]. Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus

tiel lerte kaŝita de vi [FE 25]. ... tiel same ni ankaŭ diras: “la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon” ... [FE 28]. Se ni aldonas la literon „t”, ni ricevas vortojn montrajn: tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu [FE 30.3]. ... ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉitiea, tieulo, tiamulo k. t. p. (= kaj tiel plu) [FE 30.10]. Li estas tiel dika, ke li ne povas trairi tra nia mallarĝa pordo [FE 33]. La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo [FE 33]. Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita [FE 33]. Oni tiel malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron [FE 33.14]. La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon ... [FE 34].

— **Lingva Respondo 1891 [Pri tia - tiela]**: La diferenco inter la senco de *tia* kaj *tiela* estas tiel malgranda, ke la okazoj por *tiela* estas tre maloftaj. Ekzemple: se brulas granda domo kaj la brulo estas stranga, jen hela, jen subite estingiĝanta por momento, jen saltanta k.c. — ni povus diri (kvankam ne necese): ĉu vi vidis *tiun* brulon (= la brulon de tiu ĉi domo)? *tian* brulon (= tiel grandan k.c.) mi ofte vidas, sed neniam mi vidis brulon *tielan* (= tiamanieran). [*La Esperantisto*, 1891, p. 21].

— Lingva Respondo 1907 [Pri la vorto “tiela”]: Via opinio, ke mi ĝis nun neniam aprobis la vorton “tiela”, estas erara. Al la vortoj “tiela” kaj “tiele”, kiuj estas kreitaj tute regule laŭ la leĝoj de nia lingvo, mi ne sole ne rifuzis mian aprobon, sed mi eĉ *mem* jam *de longa tempo* uzas ilin de tempo al tempo. Mi ne povas nur laŭdi, kiam oni *trouzas* tiujn vortojn, kaj kiam oni uzas ilin tute *senbezone* anstataŭ la pli simplaj vortoj “tia”kaj “tiel”, aŭ ankoraŭ pli, kiam oni volas uzadi ilin *ĉiam*anstataŭ la vortoj fundamentaj; sed en ĉiuj okazoj, kiam oni volas uzi la sencon de la vortoj “tia” kaj “tiel” en formo *pli akcentita*, mi trovas la vortojn “tiela” kaj “tiele” tre bonaj, ne sole permesindaj, sed eĉ rekomendindaj. [Respondo 8, *La Revuo*, 1907, Februaro].

ties - Se ni aldonas la literon „t”, ni ricevas vortojn montrajn: tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu [FE 30.4, mankas en UV]. — **ties** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] = apartenanta al tiu.

tif’ [OA 1] typhus | typhus | Typhus | тифъ | tyfus. {MED}

tig/o. [OA 8] Tiu parto de herbecaj plantoj, kiu portas burĝonojn, foliojn kaj florojn, kaj kiu kune kun la radiko konsistigas la akson de la planto. — A. stem, stalk (of plant); F. tige, queue (fleur), pied (herbe); G. Stiel, Stengel; H. {es} tallo; I. {it} gambo, culmo; P. talo, haste, caule. {BOT}

tigr’ - tigre | tiger | Tiger | тигръ | tygrys. {ZOO}

tikl’ - chatouiller | tickle | kitzeln | щекотать | łechtać.

tili’ - tilleul | lime-tree | Linde | липа | lipa. {BOT}

tim’ - craindre | fear | fürchten | бояться | obawiać się. — **timi** - craindre | fear | fürchten | бояться | obawiać się [FE 20]. — … kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin jam ne trovos [FE 20.8]. Timulo timas eĉ sian propran ombron [FE 37.21].

● **timo** — Li paliĝis de timo kaj poste li ruĝiĝis de honto [FE 39.2].

● **timulo** — Timulo timas eĉ sian propran ombron [FE 37.21].

— Lingva Respondo 1890 [„Pri la esprimo “estu timata”]: La esprimo “estu timata” estas uzita tute bone kaj regule. En la rusa lingvo la vorto “timi” ne havas pasivon, sed tio ĉi ja tute ne montras ankoraŭ, ke ankaŭ en Esperanto ĝi ne devas havi pasivon. En ĉiu vivanta lingvo estas permesita uzi nur tiujn formojn, kiujn aliaj personoj jam uzis antaŭ vi; sed en la lingvo internacia oni devas obei sole nur la *logikon*. La logiko diras, ke *ĉia* verbo povas havi pasivon, se nur la *senco* ĝin permesas. Sed en la verbo “timi” la senco tute bone permesas pasivon, kiel en aliaj verboj. Ĉe la timado ni havas ĉiam du personojn aŭ objektojn: unu, *kiu* timas, kaj unu, *kiun* oni timas, aŭ kiu *estas timata*. “De l' malamikoj vi estu timata” signifas: ke la malamikoj timu vin (= je vi aŭ antaŭ vi). Vere, ke en la rusa lingvo oni diras ne “timi *lin”*, sed “timi *de li*” sed tio ĉi estas aparteco de la rusa lingvo, kiu tute ne estas deviga ankaŭ por ĉia alia lingvo. Jam la senco mem permesas tute bone uzi la verbon “timi” kun la akuzativo (en tia maniero ĝi ankaŭ estas uzata en multaj lingvoj, kie ĝi tiel ankaŭ havas pasivon); sed se la senco ĝin ankaŭ ne dirus, ĝin diras ja tute klare nia gramatiko, laŭ kiu en ĉia duba okazo oni povas uzi la prepozicion “je” aŭ la akuzativon sen

prepozicio. Eĉ de vortoj, kiuj per si mem ne postulas la akuzativon, vi povas en nia lingvo libere ĉiam fari pasivon, se nur la senco de tiu ĉi pasivo estos komprenebla. Tiel ekzemple en la versaĵo “Al la Esperantisto”estas ne malregule uzita la esprimo “la celo estos *alvenita*” (= oni alvenos al la celo). [*La Esperantisto*, 1890, p. 32].

timian’ - thym | thyme | Thymian | өиміамъ | macierzanka. {BOT}

timon’ - timon | thill, coach-beem | Deichsel | дышло | dyszel. — [AK] shaft, pole.

tindr-o [OA 2.2] amadou | tinder | Zunder — [EG 2] Zunder.

tine’ - teigne | moth | Motte | моль | mól. {ZOO}

tink-o [OA 2.2] (*zool.*) tanche | tench | Schleie {ZOO} — [EG 2] Schleie.

tinktur-i [OA 2.1] — [EG 2] färben {tinktur-o, Tinktur, (flüssige) Farbe (*zum Färben*)}.

tint’ - tinter | chink, clank, jingle | klirren | бряцать | brząkać. — [RE] [MV] — tint- [1882].

tio - cela | that one | das, jenes | то, это | to, tamto. — **tio** - cela | that, that one | jenes, das | то, это | to, tamto [FE 11]. — [AK] that *(thing)*. — ... se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus ŝanĝo, … [A 4.3]. Tio ĉi {tiu klarigo} povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida ... [A 6.2]. — t. e. (= tio estas) [FE 14.7]. … ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, … [FE 15.6]. De kio tio ĉi {la elfalo de diamantoj} venas, mia filino?” [FE 17.6]. Tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino [FE 17.7]. … tio ĉi estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino ... [FE 19.5].

● **tion** — ... verkoj privataj, kiujn la esperantistoj - se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero - povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga [A 3.6]. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, ..., kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo [A 8.2]. ... ni devas tion ĉi {ĉian « perfektigadon » de la lingvo} fari ne facilanime, ... [A 9.3]. ... fari tion ĉi {ĉian perfektigadon} (...) povas ... nur ia centra institucio [A 9.4].

● **krom tio** — La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi [FE 11.3].

● **pri tio** — Pli detale mi parolos pri tio ĉi {pri tiu ŝajna kontraŭdiro} en la Bulonja kongreso [A 6.5]; nun mi diros pri tio ĉi nur kelkajn vortojn, por ke mia opinio ne ŝajnu tro paradoksa [A 6.6]. ... zorgante pri tio, ke ĉiuj uzu tiujn vortojn en la sama formo ... [A 7.1].

— **Lingva Respondo 1907 [Pri pluralaj „ioj“, „tioj“, „kioj“ k.t.p.]**: Vd. ĉe „kio“.

tiom - autant, tant | so much | so viel | столько | tyle. — Se ni aldonas la literon „t”, ni ricevas vortojn montrajn: tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu [FE 30.4]. {mankas en la vortlisto de FE 30}.

tip’ [OA 1] type | * type | Typus {2012 ankaŭ: Typ} | тіротипъ | typ. — [EG 2] Typus.

tipograf’ (1) [OA 7].

tipografi’ [OA 1] * typographie | typography | Typographie | типографія | drukarnia.

tir’ - tirer | draw, pull, drag | ziehen | тянуть | ciągnąć. — **tiri** - tirer | draw, pull, drag | ziehen | тянуть | ciągnąć [FE 34].

● **kun’tir’** - astreindre | astringe | zusammenziehen, adstringiren {de 1901: adstringieren} | стягивать | ściągać. — [AK] contracter, resserrer.

● **korktirilo** — Ĉu vi havas korktirilon, por malŝtopi la botelon? [FE 34.2].

● **tir’kest’** - tiroir | drawer | Schublade | выдвижной ящикъ | szuflada [UV kest’]. — En mia skribotablo sin trovas kvar tirkestoj [FE 31.24].

tiran’ [OA 1] * tyran | tyrant | Tyrann | тиранъ | tyran.

titan’ [OA 1] * titan | Titan | Titan | титанъ | tytan.

titol’ - titre | title | Titel | титулъ | tytuł. — DL 1888: *titul’*

tiu - celui-là | that | jener | тотъ | tamten. — **tiu** - celui-là | that | jener | тотъ | tamten [FE 13]. — [AK] that *(one) (person or thing)*.

to [OA 7] = nomo de la litero t, dudekkvara litero de la Esperanta alfabeto

tog-o (*romana vesto*) [OA 2.1]. {VEST} — [EG 2] Toga. — **Rim**.: Nek „romana“ (rom’an’a, ne roman’a) nek Rom’o estas elementoj de la Vortaro Oficiala.

tol’ - toile | linen | Leinwand | полотно | płótno. — **tolo** - toile | linen | Leinwand | полотно | płótno [FE 35]. — [AK] linen *(mat.)*. — Ĉemizojn, kolumojn, manumojn

kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35.13].

● **tol'aĵ'** - linge | linen | Wäsche | бѣлье | bielizna. — Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35.13]. — [DL 1888]: *La lavistino alportis mian tolaĵon: ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj viŝilojn (oni nomas ĝin tolaĵo, kvankam ne ĉio estas farita el tolo)* [DL 9.5].

toler' - tolérer | tolerate | toleriren {de 1901: tolerieren} | терпѣть | tolerować, cierpieć. — [AK] dulden, tolerieren | tolerować, znosić.

tomat' [OA 1] tomate | tomato | Tomate | помидоръ | pomidor.

tomb' - tombe | tomb | Grab | могила | grób, mogiła. — [AK] tomb, grave.

tombak' - tombac | pinchbeck | Tomback | томпакъ | tombak. {KEM}

ton' - ton, son, | tone, sound | Ton | тонъ | tom.

tond' - tondre | clip, shear | scheeren | стричь | strzydz. — **tondi** - tondre | clip, shear | scheeren | стричь | strzydz [FE 34]. — **tondi** - tondre | shear | scheeren | стричь | strzydz [FE 16 il']. — ... per tondilo ni tondas, per sonorilo ni sonoras, per fajfilo ni fajfas [FE 34].

● **tond'il'** - ciseaux | scissors | Scheere | ножницы | nożyce. — **tondilo** - ciseaux | scissors | Scheere | ножницы | nożyce [FE 16 il']. — ... per tondilo ni tondas, per sonorilo ni sonoras, per fajfilo ni fajfas [FE 34].

tondr' - tonner | thunder | donnern | гремѣть | grzmieć. {METEO}

tonel/o. [OA 8] Unuo de volumeno, uzata por mezuri la internan kapaciton de ŝipo: *la internacia ~o valoras 2,83m^3*. — A. ton (displacement); F. tonneau (de jauge); G. Tonneau, Tonne; H. {es} tonel, tonelada; I. {it} tonnellata; P. tonelada (mar.) {ankaŭ: tonelada de arqueação}. {MEZ} Kp. tuno {[OA 8]}.

tonsil/o. [OA 9] Ĉiu el pluraj limfaj organoj en la gorĝo ĉirkaŭ la faringo, kiuj protektas kontraŭ infektoj, precipe la du palataj tonsiloj ambaŭflanke de la gorĝo super la bazo de la lango: *palataj tonsiloj*; *faringa tonsilo*; *tuba tonsilo*; *langa tonsilo*. {ANAT}

tonsur' [OA 1] tonsure | tonsure | Tonsur | тонзура | tonsura. {RELI}

topaz' - topaze | topaz | Topas | топазъ | topaz. {MIN}

topograf' (2) [OA 7]

topografi-o [OA 2.1] — [EG 2] Topographie.

torĉ' - torche | torch | Fackel | факелъ | pochodnia. — [RE].

tord' - tordre | wind, twist | drehen, winden (z. B. Stricke) | крутить | kręcić. — [AK] kręcić (np. powróz).

toreador-o [OA 2.1] — [EG 2] Toreador, Torero.

torent' [OA 1] torrent | torrent | Bergstrom | потокъ | potok. {GEO}

torf' - torf | turf | Torf | торфъ | torf. — [AK] {fr} tourbe | peat, turf.

torn' - tourner (avec un tour) | turn (on a lathe) | drechseln | точить | toczyć. — [AK] точить (на токарном станке) | toczyć (na tokarni).

tornistr' - havresac | knapsack | Ranzen, Tornister | ранецъ | tornister. — [AK] havresac, sac d'école.

torped' [OA 1] torpille (engin) | torpedo | Torpedo | торпеда | torpeda. {MIL}

tors-o [OA 2.1] — [EG 2] Torso.

tort' - tourte | tart | Torte | тортъ | tort. {KUIR}

tortur/i. [OA 9] Kruele turmentegi por eltiri konfeson (aŭ alian informon) aŭ por puni: *torturi kaptiton*; *torturi krimulon*.

Tost' [OA 3.1] {en} toast | toast | Toast, Trinkspruch | {es} brindis | {pt} brinde | {it} brindisi | {pl} toast.

tra - à travers | through | durch | черезъ, сквозь | przez (wskroś). — **tra** - à travers | through | durch | черезъ, сквозь | przez (wskroś) [FE 22]. — [AK] through *(place)*. — La soldatoj kondukis la arestitojn tra la stratoj [FE 22.14]. Sur la kameno inter du potoj staras fera kaldrono; el la kaldrono, en kiu sin trovas bolanta akvo, eliras vaporo; tra la fenestro, kiu sin trovas apud la pordo, la vaporo iras sur la korton [FE 25.14]. Mallarĝa vojeto kondukas tra tiu ĉi kampo al nia domo [FE 38.6].

● **traetera** — Tra-e-té-ra [FE 3]. Traetera [FE 4].

● **trairi** — Li estas tiel dika, ke li ne povas trairi tra nia mallarĝa pordo [FE 33.2].

● **traire** — Tra-í-re [FE 3]. Traire [FE 4].

● **trakuri** — Du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo [FE 40.11].

● **tralegi** — Lernolibron oni devas ne tralegi, sed tralerni [FE 31.22].

● **tralerni** — Lernolibron oni devas ne tralegi, sed tralerni [FE 31.22].

● **traulo** — Tra-ú-lo [FE 3].

● **travidebla** — Vitro estas rompebla kaj travidebla [FE 41.2].

— **Lingva Respondo 1908 [Pri la akuzativo post „tra“]**: Povas esti, ke mi baldaŭ proponos al la voĉdonado de la Lingva Komitato, ke post prepozicio oni uzu la akuzativon nur en okazoj de *nepra bezono*, sed en ĉiuj iom dubaj okazoj oni ĝin ne uzu. Se la Lingva Komitato tion akceptos, tiam oni kredeble neniam uzos plu la akuzativon post la prepozicio “tra”. Sed *ĝis nun* la uzado de akuzativo post “tra” tute ne estas kontraŭregula. Nominativon ni uzas nur post tiuj prepozicioj, kies senco estas ĉiam egala; ekzemple la prepozicio “al” ne povas unu fojon signifi direkton kaj alian fojon ne, tial ni post “al” *ĉiam* uzas la nominativon; sed ekzistas prepozicioj (ekzemple “en”, “sur” k.t.p.), kiuj per si mem *ne* montras direkton, tial, por esprimi direkton, ni uzas post ili la akuzativon. Al tiuj prepozicioj apartenas interalie ankaŭ “tra” kaj “kontraŭ”, tial ni post la diritaj prepozicioj povas uzi ambaŭ kazojn, *malgraŭ ke en la aliaj lingvoj oni uzas post ili ĉiam nur unu kazon* (tiu ĉi lasta cirkonstanco kredeble estis la kaŭzo de via erara opinio, kvazaŭ ni post “tra” ĉiam devas uzi *nur* la nominativon). Estas vero, ke dum la diferenco inter “en” direkta kaj “en” sendirekta estas tre granda, la diferenco inter “tra” direkta kaj sendirekta estas tiel malgranda, ke en la plejmulto da okazoj ni povas egale bone uzi la nominativon, kiel la akuzativon; ekzistas tamen okazoj, kiam estas dezirinde fari *diferencon* inter la ambaŭ kazoj. Ekzemple, irante tra la urb*o*, mi povas resti en ĝi sufiĉe longe aŭ eĉ tute ne forlasi ĝin; sed, irante tra la urb*on*, mi celas (tra la urbo) *eksteren* de la urbo. En “La Rabistoj”, Schweizer tute bone povus diri “la sono de lia nazo povus peli homojn tra trueto de kudrilo” tamen la esprimo “tra trueto*n*” estas multe pli forta, ĉar ĝi montras, ke la efiko de la sono estas tiel granda, ke la homoj volus nepre veni *eksteren;* tie ne la trueto mem estas grava, sed nur la celado esti kiel eble plej baldaŭ *ekstere* de la trueto. [LR 81, Respondo 27, *La Revuo*, 1908, Februaro].

trab’ - poutre | beam (of wood) | Balken | бревно | belka.

tradici’ [OA 1] * tradition | tradition | Tradition, Ueberlieferung {legu: Überlieferung} | традиція | tradycja.

traduk’ - traduire | translate | übersetzen | переводить | tłomaczyć.

traf’ - toucher le but | strike, meet, fall in with | treffen | попадать | trafić. — [AK] toucher le but, atteindre | hit the mark. — Trá-fi [FE 2].

Trafik-o, [OA 4] {fr} circulation, trafic | {en} traffic | {de} Verkehr | {it} traffico, circolazione | {es} tráfico, relaciones comerciales | {pt} tráfico, relações comerciais {ankaŭ: tráfego} | {ca} trafec {legu: tràfec}.

tragedi’o – tragédie [FG 15 franca, mankas en UV]. {TEATR} — **tragedi’** [OA 1] * tragédie | tragedy | Tragödie | траге́дія | tragedja. — **tragedi’** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [UL].

● **tragedi’a** - tragique [FG 15 franca, mankas en UV].

Tragik’ [OA 3.2] {en} tragic | {fr} tragique | {de} tragisch | {es} tragico | {pt} tragico {legu: trágico} | {it} tragico | {pl} tragiczny.

tragikomedi’ [OA 1] * tragi-comedie | tragicomedy | Tragikomödie | трагикоме́дія | tragikomedja. {TEATR}

traĥe’ - trachée-artère | wind-pipe | Luftröhre | дыхательное горло | tchawica. {ANAT} — [AK] дыхательное горло, трахея.

trajn/o. [OA 8] 1. Sinsekvo de similaj veturiloj aŭ objektoj trenataj, aŭ (se figure) vice irantaj unu post la alia: *ŝipo~o, flos~o; (f) ondo~o*. 2/ Vagonaro movata de lokomotivo kaj iranta laŭ difinita horaro (= *vagon~o*). 3/ Veturilaro, kiu transportas ĉion, kion la trupoj bezonas por vivi kaj batali (= proviza veturilaro, militista konvojo, loĝistika servo). — A. 1/2/3 train; F. 1/2/3/ train; G. 1/2/ Zug. 3/ Train, Tross; H. {es} 1/2/3/ tren; I. {it} 1/2/ treno, 3/ carreggio, convoglio; P. 1/2/3/ trem. — [EG 1].

trajt’ - trait | lineament, touch | Zug (Gesichts- etc.) | черта (напр. лица) | rys (twarzy). — [AK] trait (*du visage, du caractère,etc.*) | lineament, feature | черта (лица, характера и пр.).

trakt’ - négocier (faire des négociations) | transact | unterhandeln | вести переговоры | porozumiewać się, układać się. — [AK] traiter, négocier | transact, treat of *(a subject)* | verhandeln | вести переговоры, трактовать.

traktat' [OA 1] traité | * treaty, treatise | Abhandlung, Vertrag | трактатъ | traktat.

traktor/o. [OA 8] Potenca motorveturilo uzata por tiri agrajn maŝinojn aŭ ŝarĝveturilojn. — A. tractor; F. tracteur; G. Traktor, Zugmaschine, Schlepper; H. {es} tractor. I. {it} trattore, P. {pt} tractor {de 2009: trator}.

tram-o [OA 2.2] rail creux | tram (rail) | Tramschiene — [EG 2] Falzschiene, leichte Schiene mit einer Rinne, Grubenschiene.

● **tramveturil-o** [OA 2.2] voiture de tramway | tramcar | Tramwagen. — [EG 2] Pferde- oder Straßenbahnwagen.

● **tramvoj-o** [OA 2.2] tramway | tramway | Trambahn — [EG 2] Pferde- oder Straßenbahn, Trambahn oder –way.

tranĉ' - trancher, couper | cut | schneiden | рѣзать | rżnąć. — **tranĉi** - trancher, couper | cut | schneiden | рѣзать | rżnąć [FE 16]. — La tranĉilo tranĉas bone, ĉar ĝi estas akra [FE 16.4]. La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon kaj mi devis uzi mian poŝan tranĉilon [FE 34.1].

● **tranĉilo** — La tranĉilo tranĉas bone, ĉar ĝi estas akra [FE 16.4]. Kie estas la tranĉiloj? [FE 16.10]. La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon kaj mi devis uzi mian poŝan tranĉilon [FE 34.1]. Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo [FE 34.10].

● **al'tranĉ'** - couper, tailler | cut out | zuschneiden | кроить | przykroić.

trankvil' - tranquille | quiet | ruhig | спокойный | spokojny. — **trankvila** - tranquille | quiet | ruhig | спокойный | spokojny [FE 15]. — [AK] tranquil, quiet. — Estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ [FE 25.8].

● **trankvile** — Al ĉiu, kiu montros al mi ian nebonan esprimon en la Fundamenta libro, mi respondos trankvile: jes, ĝi estas eraro, sed ĝi devas resti netuŝebla, ... [A 4.7].

● **trankviligi** — Kiam la bona virino trankviligis sian soifon, ŝi diris al la knabino ... [FE 15.4].

trans - au-delà, trans- | across | jenseit, über | черезъ (надъ), пере- | przez, prze-. — **trans** - au delà | across | jenseit | черезъ, надъ | przez [FE 26]. — La hirundo flugis trans la riveron, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj [FE 26.14].

● **transskribi** — Verkisto verkas librojn, kaj skribisto simple transskribas paperojn [FE 37.17].

transept-o (*arĥ.*) [OA 2.1] {ARKI} **—** [EG 2] (archit.) Transept, Querschiff in Kirchen.

transistor/o. [OA 9] Elektronika duonkonduka elemento uzata kiel signalfortigilo (analoge) aŭ kiel ŝaltilo (ciferece), ordinare kun tri kondukiloj (la kurento ĉe unu el la kondukiloj regas la kurenton tra la du aliaj).

transit' [OA 1] * transit | transit | Transit, (Waren)durchgang | транзитъ | tranzyto.

transitiv-a (*gr.*) [OA 2.1] {GRAM} **—** [EG 2] transitiv, übergehend.

trapez-o (*geom.*) [OA 2.1] {GEOM} — [EG 2] Trapez.

tre - très, fort, bien (adv.) | very | sehr | очень | bardzo. — **tre** - très | very | sehr | очень | bardzo [FE 13]. — Tiun ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori … [A 1.5]. … jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto … [A 2.1]. … mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn, … el kiuj la plej gravaj estas eldonitaj tre bone kaj zorgeme, … [A 5.3]. … ni (…) devas kompreneble esti tre singardaj kun ĉia « perfektigado » de la lingvo [A 9.2]. — La papero estas tre blanka, sed la neĝo estas pli blanka [FE 10.14]. … tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko kaj alporti domen plenan grandan kruĉon [FE 13.3]. "Tre volonte, mia bona,"; diris la bela knabino [FE 15.2]. Mia hundo, vi estas tre fidela [FE 16.18]. Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn; mi ankaŭ tre amas iliajn (infanojn) [FE 18.10]. "Estus tre bele," respondis la filino malĝentile, "ke mi iru al la fonto!" [FE 19.1]. … ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris el la arbaro … [FE 19.5]. Haro estas tre maldika [FE 33.3]. Mia fratino estas tre bela knabino [FE 33.17]. La acideco de tiu ĉi vinagro estas tre malforta [FE 35.8]. La alteco de tiu monto ne estas tre granda [FE 35.11]. Lia heroeco tre plaĉis al mi [FE 35.17]. La pafado daŭris tre longe [FE 40.2]. Mi saltas tre lerte [FE 40.4]. Lia hieraŭa parolo estis tre bela, sed la tro multa parolado lacigas lin [FE 40.6]. Li

kantas tre belan kanton [FE 40.8]. Via ago estas tre laŭdinda [FE 41.10]. Lia edzino estas tre laborema kaj ŝparema, sed ŝi estas ankaŭ tre babilema kaj kriema [FE 41.12]. Li estas tre ekkolerema kaj ekscitiĝas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo; tamen li estas tre pardonema, li ne portas longe la koleron kaj li tute ne estas venĝema [FE 41.13]. Li estas tre kredema: eĉ la plej nekredeblajn aferojn, kiujn rakontas al li la plej nekredindaj homoj, li tuj kredas [FE 41.14]. Li estas tre purema, kaj eĉ unu polveron vi ne trovos sur lia vesto [FE 41.17]. Ni ĉiuj kunvenis, por priparoli tre gravan aferon; sed ni ne povis atingi ian rezultaton, kaj ni disiris [FE 42.1]. La sufikso «um» ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun «um» oni devas lerni, kiel simplajn vortojn [FE 42.9].

tref' - trèfle | club | Treff (Kart[en]sp[iel]) | трефы | tref (w kartach). {LUD} — [AK] trèfle (*cartes*) | clubs *(at cards)*.

trejn/i. [OA 8] Submeti al instruado kaj ekzercado, por konduki ĝis la dezirata stato de kapableco aŭ por prepari al sporto, batalado ktp. — A. to train; F. former (un disciple), instruire (conscrits), préparer (candidat), exercer (oreille), entraîner (sportif); G. trainieren, ausbilden; H. {es} adiestrar, entrenar, ejercitar: I. {it} allenare; P. {pt} treinar, adestrar, exercitar (par esporte, batalha, trabalho) {„par" estu "para" esporte ktp.}. — Kp. dres' [UV].

trem' - trembler | tremble | zittern | дрожать | drżeć, trząść się.

tremol' - tremble | asp | Espe | осина | osina. {BOT} — [AK] tremble (*bot.*) | aspen.

tremp' - tremper | dip, steep | tunken | макать | umoczyć. — [AK] tunken, eintauchen.

tren' – traîner {de 1990: trainer} | drag, trail | schleppen | влачить | wlec.

tret/i. [OA 9] Piedpremi. Premi (forte) per la piedoj: *treti iun/ion (per la piedoj)*; *treti sur iun/ion*; *treti (vinberojn) en vinpremejo*.

trezor' - trésor | treasure | Schatz | сокровище | skarb. — Tre-zó-ro [FE 3].

tri - trois | three | drei | три | trzy. — **tri** – 3 [FG 4.1]. — **tri** - trois | three | drei | три | trzy [FE 12].

● **tri'foli'** - trèfle | trefoil | Klee | трилистникъ | koniczyna. {BOT}

trib/o [OA 9] **1** Etna homgrupo (precipe se nomada aŭ rigardata kiel primitiva) vivanta en komunumo. **2** Subdivido de zoologia aŭ botanika familio (uzata por grupigi genrojn de grandaj familioj). {ZOO}{BOT}

tribun' - tribune | orator's pulpit | Rednerbühne | трибуна | trybuna, mównica.

tribunal' [OA 1] * tribunal | tribunal | Tribunal | трибуналъ | trybunał.

tribut' [OA 1] * tribut | tribute | Tribut, Abgabe, Steuer | дань | danina.

● **tri'foli'** - trèfle | trefoil | Klee | трилистникъ | koniczyna. {BOT}

trigonometri-o [OA 2.1] {MAT} — [EG 2] Trigonometrie.

trik' - tricoter | knit | stricken | вязать (чулки) | robić pończochy. — [AK] robić (na drutach).

trikot' - tricot | cudgel, knit | Tricot {de 1901: Trikot} | трико | trykot. {VEST} — [AK] stockinet *(mat. for tights, jerseys, etc.)*.

tril' - tril, trille | trill | Triller | трель | tryl. {MUZ} — [AK] trille (*mus.*).

trink' - boire | drink | trinken | пить | pić. — **trinki** - boire | drink | trinken | пить | pić [FE 9]. — Donu al la birdoj akvon, ĉar ili volas trinki [FE 9.3]. En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki [FE 15.1]. Kaj ŝi … ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune [FE 15.3]. … kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile." [FE 17.11]. … ŝi vidis unu sinjorinon, … kiu … petis de ŝi trinki … [FE 19.5]. „Ĉu mi venis tien ĉi," … „por doni al vi trinki?" [FE 19.6] "Certe, mi alportis arĝentan vazon speciale por tio, por doni trinki al tiu ĉi sinjorino! [FE 19.7] Mia opinio estas: prenu mem akvon, se vi volas trinki." [FE 19.8] Mi trinkis teon kun kuko kaj konfitaĵo [FE 35.2]. Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklaraĵon [FE 35.4].

trip' - tripes | tripes | Kaldaunen, Kutteln | потроха | bebechy, flaki. {KUIR} — [AK] {en} tripe | потроха, требуха, ливер.

tritik' - froment | wheat | Weizen | пшеница | pszenica. {BOT}

triumf' [OA 1] * triomphe | triumph | Triumph | тріумфъ | tryumf.

trivial' - trivial | trivial | abgedroschen | избитый, пошлый | trywialny, gminny. — [AK] trivial, abgedroschen | избитый, пошлый, тривиальный.

tro - trop | too | zu, zu viel | слишкомъ | zbyt. — [AK] zbyt, za, zanadto. — … nun mi diros pri tio ĉi nur kelkajn vortojn, por ke mia opinio ne ŝajnu tro paradoksa [A 6.6]. Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi … povos proponi formon novan, … [A 8.1]. — Lia hieraŭa parolo estis tre bela, sed la tro multa parolado lacigas lin [FE 40.6].

● **tro'uz'** - abuser | abuse | missbrauchen | злоупотреблять | nadużywać [UV tro'uz']. — Tro-ú-zi [FE 3].

trofe-o [OA 2.1] — [EG 2] Trophäe.

trog' - auge | trough | Trog | корыто | koryto.

tromb' - trombe | water-spout | wirbelwindartiger Orkan | смерчъ | zawierucha. {METEO} — [AK] Wasserhose | trąba (morska).

trombon-o [OA 2.2] trombone | trombone | Posaune {MUZ}

tromp' - tromper, duper | deceive, cheat | betrügen | обманывать | oszukiwać. – **trompi** - tromper, duper | deceive, cheat | betrügen | обманывать | oszukiwać [FE 40] — [AK] täuschen, betrügen.

● **trompiĝi** - Kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi ion novan, sed baldaŭ ni vidis, ke ni trompiĝis [FE 40].

tron' - trône | throne | Thron | престолъ | tron. — [AK] престол, трон.

tropik' - tropique | tropic | Tropicus {ark.; en 2012: Wendekreis}, Wendekreis | тропикъ {de 1918: тропик} | zwrotnik. {GEO}

trop-o (*gram.*) [OA 2.1] {GRAM} — [EG 2] Trope (*bildlicher Ausdruck*).

trot' - trotter | trot | traben | бѣжать рысью | kłusować.

trotuar' - trottoir | side-walk | Trottoir | тротуаръ | trotuar, chodnik. — [AK] pavement.

tro'uz' - abuser | abuse | missbrauchen | злоупотреблять | nadużywać. — Tro-ú-zi [FE 3].

trov' - trouver | find | finden | находить | znajdować. — **trovi** - trouver | find | finden | находить | znajdować [FE 6]. — Tró-vi [FE 2]. — Jen estas la pomo, kiun mi trovis [FE 6]. La pli juna filino, ..., estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi [FE 11]. Ĉu vi jam trovis vian horloĝon? [FE 20]. Mi ĝin ankoraŭ ne serĉis; kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin jam ne trovos [FE 20]. En somero ni trovas malvarmeton en densaj arbaroj [FE 38]. Li estas tre purema, kaj eĉ unu polveron vi ne trovos sur lia vesto [FE 41].

● **sin trovi** — ... el la kaldrono, en kiu sin trovas bolanta akvo, eliras vaporo; tra la fenestro, kiu sin trovas apud la pordo, la vaporo iras sur la korton [FE 25]. Super la tero sin trovas aero [FE 26]. La hirundo flugis trans la riveron, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj [FE 26]. ... la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno ... [FE 28]. En mia skribotablo sin trovas kvar tirkestoj [FE 31]. Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino [FE 32]. Sur la arbo sin trovis multe (aŭ multo) da birdoj [FE 32]. En tiuj ĉi boteletoj sin trovas diversaj acidoj: vinagro, sulfuracido, azotacido kaj aliaj [FE 35]. En nia lando sin ne trovas montoj, sed nur montetoj [FE 38].

● **trovinte** — Trovinte pomon, mi ĝin manĝis [FE 22]. ... la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro [FE 23].

● **troviĝi** — ... ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj ... [A 3.4]. ... la « Fundamento de Esperanto » devas troviĝi en la manoj de ĉiu bona esperantisto ..., por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn oficialajn, kiuj devas troviĝi en ĉiuj lernoverkoj de Esperanto ... [A 5.4]. La «Fundamento de Esperanto» devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta kontrolilo, kiu gardos lin de deflankiĝado de la vojo de unueco [A 5.5]. ... ĉio bona, kio ne troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel rekomendata [12].

tru' - trou | hole | Loch | дыра | dziura.

trud' - contraindre de prendre | press upon, obtrude | dringen, aufdringen | навязывать | nalegać. — [AK] imposer, contraindre | narzucać (co komu).

truf' - truffe | truffle | Trüffel | трюфель | trufla. {KUIR}

trul' - truelle | trowel | Kelle | лопатка | kielnia. — [AK] лопаточка для штукатуров.

trumpet' - trompette | trumpet | Trompete | труба (музык.) | trąba. {MUZ}

trunk’ - tronc, tige | trunk, stem | Stamm, Rumf | стволъ | pień, tułów. — [AK] Stamm, Rumpf.

● **trunk’et’** - tige, queue | stalk | Stengel | стебель | łodyga, trzonek.

trup’ [OA 1] * troupe (théâtre) | troop | Truppe | труппа | trupa. — **Rim.**: Kp. an’ar‘ [UV].

trust-o [OA 2.1] {JUR} **—** [EG 2] Trust. [Kabe] *Grandega sindikato de fabrikantoj, akaparantaj ĉiujn produktaĵojn de unu industrio, por altigi la prezon.*

trut’ - truite | trout | Forelle | форель | pstrąg. {ZOO}

tualet’ - toilette | toilet | Toilette | туалетъ | tualeta.

tub’ - tuyau | tube | Röhre | труба | rura. — **tubo** - tuyau | tube | Röhre | труба | rura [FE 40]. — [AK] Rohr, Röhre.

● **tubeto** - ... tubeto, en kiun oni metas cigaron, kiam oni ĝin fumas, estas cigaringo [FE 40].

● **kamen’tub’** - cheminée | chimney | Schornstein | дымовая труба | komin [UV kamen’].

tuber’ - tubérosité | bulb | Knolle | шишка, бугоръ | guz, opuszka. — [AK] tuber, bump, swelling | guz, sęk.

Tuberkul’ [OA 3.2] {en} tubercle | {fr} tubercule | {de} Tuberkel | {es} tuberculo | {pt} tuberculo {legu: tubérculo} | {it} tubercolo | {pl} gruzelek. {ANAT}

Tuberkuloz’ [OA 3.2] {en} tuberculosis | {fr} tuberculose | {de} Tuberkulose | {es} tuberculosis | {pt} tuberculose | {it} tubercolosi | {pl} gruzlica. {MED}

tuf’ - touffe | tuft | Büschel | хохолъ, пучекъ | kosmek, pęczek.

tuj - tout de suite, aussitôt | immediate | bald, sogleich | сейчасъ | natychmiast. — **tuj** - tout de suite, aussitôt | immediate | bald, sogleich | сейчасъ | natychmiast [FE 15]. — [AK] immediately | sogleich, sofort. — Tuj [FE 2]. — Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto … [FE 15.3]. “Mi volas ke vi tien iru,” diris la patrino, “kaj iru tuj!” [FE 19.2]. Se li scius, ke mi estas tie ĉi, li tuj venus al mi [FE 20.11]. Kaj ŝi tuj kuris bati ŝin [FE 21.5]. Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia deziro [FE 31.14]. La fenestro longe estis nefermita; mi ĝin fermis, sed mia frato tuj ĝin denove malfermis [FE 33.9]. Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3]. Li estas tre kredema: eĉ la plej nekredeblajn aferojn, kiujn rakontas al li la plej nekredindaj homoj, li tuj kredas [FE 41.14]. Li donis al mi monon, sed mi ĝin tuj redonis al li [FE 42.4].

● **tuja** — Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia deziro [FE 31.14].

tuk’ - mouchoir | cloth | Tuch (Hals-, Schnupf- etc.) | платокъ | chustka. — **tuko** - mouchoir | cloth | Tuch (Hals-, Schnupf- etc.) | платокъ | chustka [FE 34]. — [AK] mouchoir, (*un*) linge | a cloth.

● **antaŭ’tuk’** - tablier, devantier | apron | Schürze | передникъ | fartuch [UV antaŭ].

● **telertuketo** — Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo [FE 34].

tukan/o. [OA 9] Birdo el tropika Ameriko, kun brilkoloraj plumoj kaj grandega, sed malpeza forta beko. (Rhamphastidae.) {ZOO}

tul’ - tulle | tulle | Tüll | тюль | tiul.

tulip’ - tulipe | tulip | Tulpe | тюльпанъ | tulipan {BOT}.

tumor/o. [OA 9] Ŝvelaĵo aŭ kreskaĵo en la korpo pro malnormala multobliĝo de ĉeloj, kiu povas esti sendanĝera, se ĝi kreskas malrapide kaj ne disvastiĝas, sed en aliaj okazoj povas esti danĝere rapidkreska kaj invadema. {MED}

tumult’ - tumulte | tumult | Aufruhr | суматоха | zamięszanie. — [AK] суматоха, тревога | zamieszanie, tumult. — Tu-múl-to [FE 3].

tun/o. [OA 8] Mezurunuo de pezo valoranta 1 000 kilogramojn — A. metric ton, tonne, F. tonne. g. Tonne, H. {es} tonelada, I. {it} tonnellata, P. {pt} tonelada (métrica). {MEZ} — Kp. tonelo {[OA 8}.

tunel’ [OA 1] * tunnel | tunnel | Tunnel | тунель | tunel.

tunik-o [OA 2.1] {VEST} — [EG 2] Tunika.

Tunizio [OA 8] {GEO}

tur’ - tour (édifice) | tower | Thurm {de 1901: Turm} | башня | wieża. — **Lingva Respondo 1901**: La nomoj de ŝako estas: ... *Thurm* turo ... [LR 19. Let. al Th. Thorsteinsson (1901), O.V. p. 522]. Z per tio ripetas al nova esperantisto la kutimon de

E-isto Marto 1892, p. 43: „Klarigo de la literoj, kiujn ni uzos en ŝako: ... T = turo“.

● **lum'tur'** - phare | light-house | Leuchtthurm {de 1901: Leuchtturm} | маякъ | latarnia morska [UV lum'].

Turb' [OA 3.1] {en} whipping top | toupie | Kreisel | {es} peon | {pt} turfa {estu: pião. 'turfa' (pt) signifas "torfo"} | {it} trottola | {pl} --- {traduko mankas}. — [EG 2] Kreisel.

turban' - turban | turban | Turban | тюрбанъ | turban {VEST}.

turbin-o [OA 2.1] — [EG 2] Turbine.

turd' - grive | thrush | Drossel | дроздъ | drozd {ZOO}.

turism-o [OA 2.2] tourisme | touring | Reisesport {(ark.) 2012: Tourismus} — [EG 2] Reisesport.

turist' [OA 1] touriste | tourist | Tourist | туристъ | turysta. — [EG 2] Tourist.

Turk' - Turc | [angla mankas] | Türke | Турокъ | turek [UV uj']. — **Turko** - Turc | Turk | Türke | Турокъ | turek [FE 20 uj']. — **turk'** {deklarita Fundamenta de} [OA 7] (nomo de ano de popolo).

● **Turk'uj'** - Turquie | Turkey | Türkei | Турція | Turcya [UV uj'] — **Turkujo** – Turquie | Turkey | Türkei | Турція | Turcya [FE 20 uj'].

turkis' - turquoise | turquoise | Türkis | бирюза | turkus.

turment' - tourmenter | torment | quälen, martern | мучить | męczyć. — **turmenti** - tourmenter | torment | quälen, martern | мучить | męczyć [FE 33]. — [AK] tourmenter, torturer | quälen, peinigen. — Malbonaj infanoj amas turmenti bestojn [FE 33.6].

turn' - tourner | turn (vb.) | drehen, wenden | вращать, обращать | obracać. — [AK] tourner (*trans.*) | turn *(trans.)* | вращать, поворачивать | obracać, kręcić.

turnir' - tournoi | tourney | Turnier | турниръ | turniej, gonitwa. — [AK] {en} tournament.

turt' - tourterelle | turtle-dove | Turteltaube | горлица | gruchawka. {ZOO} — [AK] turkawka.

tuŝ' - toucher | touch | rühren | трогать | ruszać, dotykać. — **tuŝi** - toucher | touch | rühren | трогать | ruszać, dotykać [FE 20]. — [AK] berühren. — Infano, ne tuŝu la spegulon! [FE 20.16].

● **tuŝebla** — estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo [A 1.1].

● **ektuŝi** — … kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus la komenco de nia morto [A 1.5].

● **ektuŝo** — … kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus la komenco de nia morto [A 1.5].

● **netuŝebla** — … esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto [A 2.3]. … la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti netuŝeblaj [A 4.1]. La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj [A 4.4]. … ĝi devas resti netuŝebla, ĉar ĝi apartenas al la fundamenta dokumento, en kiu neniu havas la rajton fari ian ŝanĝon [A 4.7]. … kio en nia lingvo estas oficiala kaj netuŝebla … [A 5.4]. Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara [A 6.1]. … la fundamento de nia lingvo devas resti por ĉiam netuŝebla [11].

● **netuŝebleco** — … severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado … [A 1.3]. … perdinte la severan netuŝeblecon, la verko perdus sian eksterordinare necesan karakteron de dogma fundamenteco, … [A 4.6]. Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon … konstante pliboniĝadi kaj perfektiĝadi [A 6.3]; … la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektiĝado fariĝados … per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera [A 6.4]. Mi montris en principo, kiamaniere la severa netuŝebleco de la « Fundamento » gardos ĉiam la unuecon de nia lingvo, … [A 9.1].

tus' - tousser | cough | husten | кашлять | kaszleć. {MED}

tut' - entier, total | whole | ganz | цѣлый | caly. — **tuta** - entier, total | whole | ganz | цѣлый, весь | cały [FE 14]. — [AK] whole, entire, total. — … ia centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro [A 9.4]. … se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj [FE 14.16]. En la lingvo "Esperanto" ni vidas la estontan lingvon de la tuta mondo [FE 22.10]. Ŝi

rakontis al li sian tutan aventuron [FE 23.2]. Estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ [FE 25.8]. … li staris tutan horon apud la fenestro [FE 26.16]. … oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo [FE 27.5]. … mi malbonigis mian tutan laboron [FE 33.14]. La tuta supraĵo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj kreskaĵoj [FE 35.18]. Mi saltadis la tutan tagon de loko al loko [FE 40.5].

● **tute** — … tute certa vivo kaj uzateco {de Esperanto} [A 1.2]. … ĉiu regnano … devas obei ĉiam nur klarajn, tute difinitajn fundamentajn leĝojn de sia lando, … [A 3.1]. … ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi, … [A 3.3]. {Pliaj trafoj en A, ne registritaj tie ĉi}. — … ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas [FE 18.14]. {Pliaj trafoj en FE, ne registritaj tie ĉi}.

● **surtuto** — vd. tie, difinita kiel surtut-o, ne kiel sur-tut-o.

● **tutmonda** (= de la tuta mondo) [FE 27.6].

U, Ŭ

Uu - ou | u as in “bull“ | u | y | u [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **u** ... [FE 1]. — **u** [OA 7] = nomo de la litero **u**, dudekkvina litero de la Esperanta alfabeto. — **Rim**.: [Lingva Respondo 56 (1893): Pri la nomoj de la literoj]. La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

Ŭŭ - ou bref (dans l’allemand „laut“) | u as in “mount“ (used in diphtongs) | kurzes u | у (краткое) | u (krótkie) [FG alfabet]. — буква ŭ (которая употребляется только послѣ гласной), произносится какъ корокое u въ нѣмецкомъ словѣ kaufen или въ латинскомъ laudo. Лица, не знающія никакой другой азбуки кромѣ русской, могутъ на первыхъ порахъ произносить h какъ русское х, а ŭ какъ русское у [FG A rusa]. — Nomoj de la literoj: … **ŭo** ... [FE 1]. — **ŭo** [OA 7] = nomo de la litero **ŭ**, dudeksesa litero de la Esperanta alfabeto.

— **Rim**.: [Lingva Respondo 69 (1889): Elparolado de *ŭ*]. En la sono *aŭ* la *a* kaj la *ŭ* devas esti aŭdataj klare ĉiu aparte, sed ili faras unu silabon, ĉar efektive la litero *ŭ* ne estas vokalo. Tiel ekzemple la vorto *laŭdi* devas esti elparolata *laŭ-di*. - *La Esperantisto*, 1889, p. 23.

— **Rim**.: [Lingva Respondo 70 (1893): Elparolado de *ŭ* kaj *j*]. Kelkaj amikoj ne bone komprenas kaj ne regule uzas la literojn *u, ŭ, i* kaj *j*. Laŭ ilia opinio (esprimita eĉ en kelkaj lernolibroj) la literoj *u* kaj *i* kune kun antaŭirantaj vokaloj faras “duoblan vokalon” ili sekve elparolas *au* kiel *aŭ*, *ei* *kiel ej* k. t. p. Tio ĉi estas *eraro*. En nia lingvo ne ekzistas duoblaj vokaloj, sed ĉiu litero estas elparolata ĉiam egale kaj ĉiam aparte. Sekve oni devas legi “ba-l*a*-u, pra-*u*-lo, tro-*u*-zi, de-*i*-ri, kr*e*-i, hero-*i*-no” kaj ne “b*a*-laŭ, pr*a*ŭ-lo, tr*o*ŭ-zi, d*e*j-ri, kr*e*j, her*o*j-no” (kiel faras multaj germanoj, havantaj tiun ĉi kutimon en sia lingvo). La literoj *u* kaj *i* devas ĉiam esti elparolataj klare kaj aparte, kiel ĉiu alia litero.

Sed ekster *u* kaj *i* en nia lingvo ekzistas ankoraŭ la literoj *ŭ* kaj *j*, kies elparolado estas simila al la elparolado de *u* kaj *i*, sed pli mallonga kaj ne prezentanta silabon (kiel konsonanto); se ili staras post vokalo, ili estas elparolataj kun ĝi en unu silabo kaj tial faras *impreson* de duobla vokalo. La literoj *ŭ* kaj *j* ĉiam ankaŭ estas elparolataj aparte, sed ili ĉiam estas *konsonantoj*, tute egale, ĉu ili staras antaŭ vokalo aŭ post vokalo. Sekve oni devas legi “ja-ro, jus-ta, kra-jo-no, fraŭ-lo, Eŭ-ro-po, foj-no, paj-lo” kaj ne “i-a-ro, i-us-ta, kra-i-o-no, fra-u-lo, E-u-ro-po, fo-i-no, pa-i-lo”. Se ni la germanajn vortojn *Saite, Traube* volus skribi per ortografio Esperanta, ni devus skribi *Zajte, Traŭbe*. La vorto *laŭta* ekzemple estas dusilaba kaj ne trisilaba, sed ne pro la kaŭzo ke *aŭ* estas kvazaŭ duobla vokalo, sed nur ĉar *ŭ* estas konsonanto (dum *u* estas vokalo). - *Esperantisto*, 1893, p. 15.

— **Rim**.: [Lingva Respondo 56 (1893): La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

u - marque l'impératif | ending of the imperative in verbs | bezeichnet den Imperativ | означаетъ повелительное наклоненіе | oznacza tryb rozkazujący. — **u** - marque l'impératif | ending of the imperative in verbs | bezeichnet den Imperativ | означаетъ повелительное наклоненіе | oznacza tryb rozkazujący [FE 7].

uj' - qui porte, qui contient, qui est peuplé de; ex. pom' pomme - pom'uj' pommier; cigar' cigare - cigar'uj' porte-cigares; Turk' Turc - Turk'uj' Turquie | filled with; e. g. ink' ink - ink'uj' ink-pot; pom' apple - pom'uj' apple-tree; Turk'uj' Turkey | Behälter, Träger (d. h. Gegenstand worin ... aufbewahrt wird, ... Früchte tragende Pflanze, von ... bevölkertes Land); z. B. cigar' Cigarre {de 1901: Zigarre} - cigar'uj' Cigarrenbüchse {de 1901: Zigarrenbüchse}; pom' Apfel - pom'uj' Apfelbaum; Turk' Türke - Turk'uj' Türkei | вмѣститель, носитель (т. е. вещь, въ которой храниться..., растеніе несущее ... или страна заселенная...); напр. cigar' сигара - cigar'uj' портъ-сигаръ; pom' яблоко - pom'uj' яблоня; Turk' Турокъ - Turk'uj' Турція | zawierający, noszący (t. j. przedmtot, w którym się coś przechowuje, roślina, która wydaje owoc, lub kraj, względem zaludniających go mieszkańców; np. cigar' cygaro - cigar'uj' cygarnica; pom' jabłko - pom'uj' jabłoń; Turk' turek - Turk'uj' Turcya. — **uj** - qui porte, qui contient, qui est peuplé de; ex. pomo pomme - pomujo pommier; cigaro cigare - cigarujo porte-cigares; Turko Turc - Turkujo Turquie | containing, filled with; e. g. cigaro cigar - cigarujo cigar-case; pomo apple - pomujo apple-tree; Turko Turk - Turkujo Turkey | Behälter, Träger (d. h. Gegenstand worin... aufbewahrt wird,... Früchte tragende Pflanze, von... bevölkertes Land); z. B. cigaro Cigarre {de 1901: Zigarre} - cigarujo Cigarrenbüchse {de 1901: Zigarrenbüchse}; pomo Apfel - pomujo Apfelbaum; Turko Türke - Turkujo Türkei | вмѣститель, носитель (т. е. вещь, въ которой храниться...; растеніе несущее... и страна, заселенная...); напр. cigaro сигара - cigarujo портъ-сигаръ; pomo яблоко - pomujo яблоня; Turko Турокъ - Turkujo Турція | zawierający, noszący (t. j. przedmiot, w którym się coś przechowuje, roślina, która wydaje owoc, lub kraj, względem zaludniających go mieszkańców; np. cigaro cygaro - cigarujo cygarnica; pomo jabłko - pomujo jabłoń; Turko turek - Turkujo Turcya [FE 20].

1. uj' (kesto)

● **cigar'uj'** - porte-cigares | [angla mankas] | Cigarrenbüchse {de 1901: Zigarrenbüchse} | портъ-сигаръ | cygarnica [UV uj'] — **cigarujo** - porte-cigares | cigar-case | Cigarrenbüchse {de 1901: Zigarren-büchse} | портъ-сигаръ | cygarnica [FE 20 uj']. — ... skatoleto aŭ alia objekto, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarujo [FE 40.15].

● **ink'uj'** - ink-pot [UV uj'] — **inkujo** — Mia skribilaro konsistas el inkujo, sablujo, kelke da plumoj, krajono kaj inksorbilo [FE 34.9].

● **monujo** — En la poŝo de mia pantalono mi portas monujon, kaj en la poŝo de mia surtuto mi portas paperujon [FE 40.18].

● **paperujo** — En la poŝo de mia pantalono mi portas monujon, kaj en la poŝo de mia surtuto mi portas paperujon [FE 40.18]; pli grandan paperujon mi portas sub la brako [FE 40.18].

● **plumujo** — Skatolo, en kiu oni tenas plumojn, estas plumujo, ... [FE 40.16].

● **sablujo** — Mia skribilaro konsistas el inkujo, sablujo, kelke da plumoj, krajono kaj inksorbilo [FE 34.9].

● **sanigilujo** [FE 42.13].

● **sanilujo** [FE 42.13].

— **Lingva Respondo 1904 [Pri "ujo" kaj "ingo"]**: S-ro Fruictier klarigis al mi, ke, laŭ D-ro Zamenhof, *ujo* estas vazo aŭ kesto aŭ io simila, kiu entenas la *tuton*, kaj *ingo* entenas nur *parton*. Carlo Bourlet. [LR 14 B, LInt 1904, p. 170].

2. uj' (arbo)

● **avokad/uj/o**, **avokad/arb/o**. [OA 9] Arbo el tropika Ameriko, kies frukto estas avokado. (*Persea americana*.)

● **gujav/uj/o**, **gujav/arb/o**. [OA 9] Arbo el tropika Ameriko, kreskigata pro sia frukto gujavo. (*Psidium guajava*.)

● **mandarin/uj/o**, **mandarin/arb/o**. [OA 9] Arbeto, kies frukto estas mandarino. (*Citrus reticulata*.) {BOT}

● **mang/uj/o**, **mang/arb/o**. [OA 9] Tropika fruktarbo indiĝena en suda Azio, kies frukto estas mango. (*Mangifera indica*.) {BOT}

● **pom'uj'** - pommier | apple-tree | Apfelbaum | яблоня | jabłoń [UV uj']. —

pomujo -pommier | apple-tree | Apfelbaum | яблоня | jabłoń [FE 20 uj'].
— **Lingva Respondo 1888**: La arbo, sur kiu kreskas pomoj, estas nomata pomujo aŭ pomarbo; sed ne ĉia fruktujo estas arbo [DL 15.10] = [LR 14 A].

3. uj' (lando)

● **patr'uj'o** - enu'o je la patr'uj'o - regret de la patrie | a longing for one's fatherland | Sehnsucht nach dem Vaterlande | тоска по родинѣ | tęsknota za ojczyzną [G 14] — **patrujo** - Morti pro la patrujo estas agrable [FE 20.23].

● **Brit/uj/o** [OA 9] **1** Insulo en Eŭropo, inter Francujo kaj Irlando. **2** Regno, kiu inkluzivas Britujon *1* kaj Nord-Irlandon. Internacia landokodaĵo: GB. {GEO}

● **Ĉin/uj/o**. [OA 9] Lando en orienta Azio, ĉe la Flava Maro, la Orientĉina Maro kaj la Sudĉina Maro, inter Rusujo kaj Birmo. Internacia landokodaĵo: CN. {GEO}

● **Germanujo** — La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo [FE 40.19]. {GEO}

● **Hispanujo** — Mi vojaĝas en Hispanujo [FE 26.5]. — Mi vojaĝas en Hispanujon [FE 26.6]. {GEO}

● **Japan/uj/o**. [OA 9] Lando en orienta Azio, insuloĉeno inter Pacifiko kaj la Japana Maro. Internacia landokodaĵo: JP. {GEO}

● **Rusujo** — Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj [FE 37.9]. La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo [FE 40.19]. {GEO}

● **Rusujano** — Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj [FE 37.9].

● **Turk'uj'** - Turquie | Turkey | Türkei | Турція {de 1918: Турция} | Turcya {de 1936: Turcja} [UV uj']. — **Turkujo** - Turquie | Turkey | Türkei | Турція {de 1918: Турция} | Turcya {de 1936: Turcja} [FE 20 uj']. {GEO}

— **Lingva Respondo 1902 [Pri la nomoj de landoj]**: Vd. [LR 18A, let. al Fruictier (1902), O.V. p. 426)].

— **Lingva Respondo 1911 [Pri la nomoj de landoj]**: De la komenco ĝis nun mi ĉiam uzadis la nomon "Egipto" ne por la lando, sed por la *popolo*; la landon mi nomadis "**Egiptujo**". Mi tion faradis ne pro nesufiĉa pripenso, sed tute pripensite kaj intence. En la *novaj* landoj (ekzemple en ĉiuj landoj Amerikaj), la lando fakte kaj morale apartenas ne al ia difinita gento, sed egalrajte al ĉiuj siaj loĝantoj; tial estas afero tute natura, ke tie la lando ne uzas por si (per *uj*), la nomon de ia gento, sed kontraŭe, ĉiuj ĝiaj loĝantoj uzas por si (per *an*) la nomon de la lando. Tute alia afero estis (kaj tradicie restis) en la landoj malnovaj: ĉiun pecon da tero okupis ia speciala gento, nomis la landon sia speciala genta propraĵo kaj ĉiujn aligentajn loĝantojn aŭ ekstermis, aŭ permesis al ili vivi en la lando kiel "fremduloj" tial la landoj malnovaj preskaŭ ĉiam portas la nomon de tiu aŭ alia gento, kaj en Esperanto, ĝis la tempo, kiam ni havos nomojn pure geografiajn, ni tion esprimas per la sufikso *uj*. La apud-Nila lando en la tempo de sia plej grava historia valoro estis lando *antikva*, aranĝita laŭ la principo "lando apartenas al unu gento", ĝi sekve nepre devas havi la sufikson *uj*, por ke ni povu esprimi la tre gravan por antikva lando diferencon inter la gento-mastro kaj la gentoj-fremduloj; ni scias ja el la Biblio, ke tiu diferenco en Egiptujo estis tre granda! Ĉiuj *novaj* landoj, ne aranĝitaj laŭ la principo "lando apartenas al unu gento", neniam devas uzi la sufikson *uj;* ni devas sekve diri "**Usono**", "**Kanado**" k.t.p. Se mi dum longa tempo uzadis "Brazil*uj*o", "Ĉil*uj*o" k.t.p., mi konfesas nun, ke tio estis eraro. Ni povus diri "Brazilo, Ĉilo" k.t.p., tamen mi ne konsilas tion fari, parte pro tio, ke por la Slavoj kaj la Germanoj, kiuj alkutimiĝis al "Brazil*i*a", "Brazil*i*en", "Ĉil*i*ec", la vortoj "Brazilo", "Ĉilo" ĉiam sonus kiel nomoj de *popoloj*, parte pro tio, ke la longatempe uzitaj formoj "Brazilo", "Ĉilo" en la senco de *popolo* donus nun grandan konfuzon, se la samajn formojn ni uzus nun en senco de lando. Sed tute oportune eviti samtempe ĉiujn tri malbonaĵojn (t.e. eraron, kontraŭkutimecon kaj konfuzon) ni povas tre bone, se ni de nun uzados por la diritaj landoj la formojn "Brazilio", "Ĉilio" kaj tiel mi konsilas agi. Tiel same ni neniam devas diri "Meksik*uj*o" ni devus diri "**Meksiko**", sed, por fari diferencon inter la urbo kaj la samnoma lando, mi konsilas fari tion, kion ni faris kun aliaj similcirkonstancaj landoj, t.e. nomi la urbon "Meksiko" kaj la landon "Meksik*i*o" (kiel Alĝero-Alĝerio, Tuniso-Tunisio k.t.p.).

Nun restas la demando pri la landoj *Eŭropaj*. Pli aŭ malpli frue venos eble la tempo, kiam ĉiuj Eŭropaj landoj ricevos

nomojn neŭtrale geografiajn; sed tiel longe, kiel ni uzas por ili nomojn de gentoj, ni devas ĉiam uzi tiujn nomojn kun la sufikso *uj*. Estas vero, ke ekzistas tri Eŭropaj regnoj, por kiuj la sufikso *uj* estas ne tute logika (**Aŭstrujo**, **Belgujo** kaj **Svisujo**), kaj se la Akademio trovus necesa anstataŭigi en ili la *uj* per *i*, mi tion ne malkonsilus; sed fari *propravole* escepton por tiuj tri regnoj mi al niaj verkistoj ne konsilus, ĉar la Esperantistoj jam tro forte alkutimiĝis al la ĝisnunaj, neniom ĝenantaj nomoj de tiuj tre gravaj kaj ofte citataj regnoj, kaj por fari rompon en tiu alkutimiĝo mi ne vidas ian gravan neceson. Ĉar la tuta esenco de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur *interkonsento*, tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco; oferi la unuan al la dua mi konsilus nur en tia okazo, se nia Lingva Komitato tion postulus. [LR 18B, Respondo 47, *Oficiala Gazeto*, III, 1911, p. 291].

— Rim.: [OA 8] C.3. La sufikso -io

La Akademio, konsiderante, ke la Lingva Komitato, kiam ĝi en 1922 malkonsilis la enkondukon de la sufikso -io por formi landnomojn, bazis sian decidon sur la konstato de la tiama uzado;

konstatante, ke nuntempe, malgraŭ tiu oficiala malkonsilo, la uzado de tiu sufikso -io ne malkreskis, sed male disvastiĝis;

memorante la vojon, indikitan de Zamenhof en la Antaŭparolo al la Fundamento por ebligi senrompan evoluon de la lingvo, kaj konsistantan en la propono de formo nova, uzebla paralele kun la malnova formo;

opinias, ke la okazo de la sufikso -io apud la Fundamenta -ujo por ricevi pli internaciajn formojn de landnomoj estas ĝusta apliko de tiu Zamenhofa metodo;

kaj, nuligante la antaŭan malkonsilon de la Lingva Komitato, sed ne ŝanĝante ĝin al rekomendo, lasas al la ĝenerala uzado libere decidi pri la venko de la pli oportuna formo.

RIM. Pri tiu teksto, el 43 membroj de la Akademio voĉdonis 41; ne voĉdonis 2; la demandon pri -io jesis 33 kolegoj, neis 5, sin detenis 3.

ul' - qui est caractérisé par telle ou telle qualité, telle façon d'être; ex. bel' beau - bel'ul' bel homme; mal'jun' vieux - mal'jun'ul' vieillard | person noted for...; e. g. avar' covetous - avar'ul' miser, covetous person | Person, die sich durch... unterscheidet; z. B. jun' jung - jun'ul' Jüngling; avar' geizig - avar'ul' Geizhals | особа отличающаяся даннымъ качествомъ; напр. bel' красивый - bel'ul' красавецъ; avar' скупой - avar'ul' скряга | człowiek, posiadający dany przymiot; np. riĉ' bogaty - riĉ'ul' bogacz. — **ul** - qui est caractérisé par telle ou telle qualité; ex. bela beau - belulo bel homme | person noted for...; e. g. avara covetous - avarulo miser, covetous person | Person, die sich durch... unterscheidet; z. B. juna jung - junulo Jüngling | особа, отличающаяся даннымъ качествомъ; напр. bela красивый - belulo красавецъ | człowiek, posiadający dany przymiot; np. riĉa bogaty - riĉulo bogacz [FE 37].

● **avar'ul'** - miser, covetous person | Geizhals | скряга [UV ul']. — **avarulo** - miser, covetous person [FE 37 ul'].

● **bel'ul'** - bel homme | красавецъ [UV ul']. — **belulo** - bel homme | красавецъ [FE 37 ul'].

● **garanti'ul'** - otage | hostage | Geissel {2012: Geisel} | заложникъ | zakładnik [UV garanti'].

● **jun'ul'** - Jüngling [UV ul']. — **junulo** - Jüngling [FE 37 ul']. — La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj [FE 39.14].

● **malĝentilulino** — „Jes, patrino", respondis al ŝi la malĝentilulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon [FE 21.2].

● **mal'jun'ul'** - vieillard [UV ul']. — Tiu ĉi maljunulo tute malsaĝiĝis kaj infaniĝis [FE 39.4].

● **malnoblulo** — Li estas mensogisto kaj malnoblulo [FE 37.22].

● **malsaĝulo** — Malsaĝulon ĉiu batas [FE 37.20].

● **malsanulo** — Post infekta malsano oni ofte bruligas la vestojn de la malsanulo [FE 39.5]. malsanulo [FE 42.13].

● **malsanulejo** [FE 42.13].

● **malsanulisto** [FE 42.13].

● **malsanemulo** [FE 42.13].

● **malsanulido** [FE 42.13].

● **malsanulino** [FE 42.13].

● **malsanulista** [FE 42.13].

● **neulo** — Ne-ú-lo [FE 3]. Neulo [FE 4].

● **paculo** — Pa-cú-lo [FE 2].

● **riĉ'ul'** – bogacz [UV ul']. — **riĉulo** – bogacz [FE 37 ul']. — La riĉulo havas multe da mono [FE 37.19].

● **ronĝ/ul/o**. [OA 9] Tia mamula besto kiel ekz. muso, rato, hamstro, kastoro, sciuro aŭ histriko, kiu havas po du grandajn ĉizilformajn tranĉodentojn en la supra kaj malsupra makzeloj. (*Rodentia*.) {ZOO}

● **sanulo** [FE 42.13].

● **sanulaĵo** [FE 42.13].

● **tiamulo** — Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi-tiea, tieulo, tiamulo k. t. p. (= kaj tiel plu) [FE 30.10].

● **tieulo** — Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi-tiea, tieulo, tiamulo k. t. p. (= kaj tiel plu) [FE 30.10].

● **timulo** — Timulo timas eĉ sian propran ombron [FE 37.21].

● **traulo** — Tra-ú-lo [FE 3].

● **virgulino** — Preĝu al la Sankta Virgulino [FE 37.23].

ulan-o [OA 2.1] {MIL} — [EG 2] Ulan.

ulcer' - ulcère | ulcer | Geschwür | язва | wrzód, owrzodzenie. {MED}

ulm' - orme | elm | Ulme, Rüster | вязъ | wiąz. {BOT}

uln' - aune | ell, yard | Elle | локоть | łokieć. {MEZ} — [AK] aune (*mesure de longeur*) | ell *(cloth measure)*.

ultimat-o [OA 2.1] — [EG 2] Ultimatum.

um' - suffixe peu employé, et qui reçoit différents sens aisément suggérés par le contexte et la signification de la racine à laquelle il est joint | this syllable has no fixed meaning | Suffix von verschiedener Bedeutung | суффиксъ безъ постояннаго значенія | przyrostek, nie mający stlałego znaczenia. — **um** - suffixe peu employé, et qui reçoit différents sens aisément suggérés par le contexte et la signification de la racine à laquelle il est joint | this syllable has no fixed meaning | Suffix von verschiedener Bedeutung | суффиксъ безъ постояннаго значенія | przyrostek nie mający stlałego znaczenia [FE 31]. — [UL]. — La sufikso «um» ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun «um» oni devas lerni, kiel simplajn vortojn. Ekzemple: plenumi, kolumo, manumo [FE 42.9]. — Mi volonte plenumis lian deziron [FE 42.10]. — En malbona vetero oni povas facile malvarmumi [FE 42.11].

● **aer'um'** – aérer | expose to the air | lüften | провѣтривать | przewietrzać [UV aer'].

● **am'ind'um'** - courtiser | court, make love | den Hof machen | любезничать | umizgać się [UV am']. — [RE].

● **brul'um'** - inflammation | inflammation | Entzündung | воспаленіе | zapalenie [UV brul']. {MED} — [RE]. — **Rim.**: Arkaismo por **inflam-o** (med.) [OA 4], vd. tie.

● **buŝ'um'** - muselière | mouth-basket | Maulkorb | намордникъ | kaganiec [UV buŝ']. — [AK] {en} muzzle. — [RE].

● **buton'um'** - boutonner | button | zuknöpfen | застегивать | zapinać [UV buton'].

● **cic/um/o**. [OA 9] Longa cicoforma botelkovrilo kun truo ĉe la pinto, tra kiu infano suĉas lakton.

● **gust'um'** – goûter {de 1990: gouter}, essayer | taste | kosten, schmecken | отвѣдывать | kosztować, próbować [UV gust'].

● **kalkanum'** [OA 1] * talon (chauss.) | heel (of a shoe) | каблукъ | Absatz | obcas. {rigardebla kiel la Fundamenta radiko *kalkan'* kun la sufikso *-um'*}

● **kol'um'** - faux-col | collar | Kragen | воротникъ | kołnierz [UV kol']. — [RE]. — Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35.13]. La sufikso «um» ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun «um» oni devas lerni, kiel simplajn vortojn [FE 42.9]. Ekzemple: plenumi, kolumo, manumo [FE 42.10].

● **komun'um'** - commune, paroisse | community, parish | Gemeinde | община | gmina [UV komun'].

● **kruc'um'** - crucifier | crucify | kreuzigen | распинать на крестѣ | ukrzyżować [UV kruc']. — [RE].

● **lakt'um'** - laite | soft-roe, milt | Milch der Fische | молоки | mleczko (ryb) [UV lakt'].

● **lot'um'** - lotir | allot | verloosen {2012: verlosen} | разыгривать | rozegrać [UV lot'].

● **mal'varm'um'** - se refroidir | catch cold | sich erkälten | простудиться | przeziębić się [UV varm']. — [RE]. — **malvarmumi** - En malbona vetero oni povas facile malvarmumi [FE 42.11].

● **man'um'** - manchette | ruffle | Manschette | манжета | mankiet [UV man']. — Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo [FE 35.13]. La sufikso «um» ne havas difinitan signifon, kaj tial la ... vortojn kun «um» oni devas lerni, kiel simplajn vortojn. Ekzemple: plenumi, kolumo, manumo [FE 42.10].

● **mastr'um'** - faire le ménage | keep house, husband | wirthschaften {de 1901: wirtschaften} | хозяйничать | gospodarzyć [UV mastr'].

● **naz'um'** - pince-nez | pince-nez | Pince-nez, Nasenklemmer | пенсне | binokle [UV naz'].

● **palpebr'um'** - cligner, clignoter | twinkle | blinzeln | моргать | mrugać [UV palpebr'].

● **plen'um'** - accomplir | accomplish | erfüllen | исполнять | spełniać [UV plen']. — **plenumi** - accomplir | fulfil, accomplish | erfüllen | исполнять | spełniać.) [FE 31 um']. — Ekzemple: plenumi, kolumo, manumo [FE 42.10]. — Mi volonte plenumis lian deziron [FE 42.11].

● **plenumo** — Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia deziro [FE 31.14].

● **vent'um'** - éventer | fan | fächeln | вѣять | wiać [UV vent'].

umbilik' - nombril | navel | Nabel | пупъ | pępek {ANAT}.

unc' - once | ounce | Unze | унція | uncya {MEZ}. — [AK] once (*mesure de pesanteur*).

ung' - ongle | nail (finger) | Nagel (am Finger) | ноготь | paznokieć. {ANAT} — Ungo [FE 3]. — [UL].

● **ung'eg'** - griffe, serre | claw, clutch | Kralle | коготь | pazur.

uni/o [OA 9] **1** Unuiĝo de landoj, kiuj konsentas pri komunigo de la tuto aŭ parto de sia regpovo. Tia unuiĝo povas esti interŝtata (ekz. Eŭropa Unio en 1992) aŭ unuŝtata (ekz. Sud-Afriko en 1910). **2** Asocio. Kultura, sindikata aŭ partipolitika organizaĵo, forme analoga al unio *1*, konsistanta el regionaj societoj.

uniform' - uniforme | uniform | Uniform | мундиръ | mundur, uniform. {VEST}{MIL} — [AK] uniform *(dress)* | форма, мундир. — [RE].

Unik' [OA 3.1] {en} unique | {fr} unique | {de} einzig | {es} unico | {pt} unico {legu: único} | {it} unico | {pl} --- {traduko mankas}. **—** [EG 2] einzig (in seiner Art).

unison' [OA 1] * unisson | unison | Gleichlaut | унисонъ | unison. — [Verax]. [PV].

univers' - univers | universe | Weltall | вселенная | wszechświat. — [RE].

universal' - universel | universal | allgemein | всеобщій | ogólny, uniwersalny. — [AK] всеобщий, универсальный. — [RE]. — la «Universala Vortaro» [A 2.1]. ... [tiuj samaj eraroj], kiuj sin trovis en la unua eldono de la «Universala Vortaro» [A 4.2]. — UNIVERSALA VORTARO DE LA LINGVO INTERNACIA ESPERANTO [UV, titolo].

universitat' - université | university | Universität | университетъ | uniwersytet. — [1888]. [RE].

unu - un | one | ein, eins | одинъ | jeden. — **unu** - un | one | ein, eins | одинъ | jeden [FE 11]. — 1 [FG 4].

● **unu {en pure nombra senco}** — ... tiam aŭtoritata komitato, ..., havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj [A 1.2]. ... la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, kiuj laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de longe fariĝis fundamento por Esperanto, ... [A 3.3]. — Unu vidvino havis du filinojn [FE 11.1]. Du homoj povas pli multe fari ol unu [FE 12.1]. Mi havas nur unu buŝon, sed mi havas du orelojn [FE 12.2]. Sesdek minutoj faras unu horon, kaj unu minuto konsistas el sesdek sekundoj [FE 12.12]. Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro [FE 14.12]. "Jes, patrino", respondis al ŝi la malĝentilulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon [FE 21.2]. unutaga (= kiu daŭras unu tagon) [FE 27.8]. Mi veturis du tagojn kaj unu nokton [FE 29.6]. Li estas morte malsana, li ne vivos pli, ol unu tagon [FE 31.7]. Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3]. Li estas tre purema, kaj eĉ unu polveron vi ne trovos sur lia vesto [FE 41.17]. Unu fajrero estas sufiĉa, por eksplodigi pulvon [FE 41.18]. El

la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; la dua: al Lia Grafa Moŝto, Sinjoro P.; la tria: al Lia Moŝto, Sinjoro D. [FE 42.8].

● **unu {en la senco de „iu certa“}** — ... estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo [A 1.1]. ... trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, kaj li perdus sian konfidon kaj apogon [A 4.6]. — En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki [FE 15.1]. Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris el la arbaro kaj petis de ŝi trinki ... [FE 19.5]. La loĝantoj de unu regno estas samregnanoj, la loĝantoj de unu urbo estas samurbanoj, la konfesantoj de unu religio estas samreligianoj [FE 37.11]. ... unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis [FE 39.11]. — Vortoj, kiuj formas kune unu ideon, estas skribataj kune, sed dividataj unu de la alia per streketo, ... [UV, enkonduko 2]. — **Rim.**: **1.** Kp. „certa“. **2.** Kp. „Pri speciala uzo de ‚unu'“ en FK 1954, p. 441.

● **unu el** - La pli juna filino, ..., estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi [FE 11.3]. — [DL 1888] *Amiko venis (= unu el la amikoj venis)* [DL 1.1].

● **unu'a** – first [FG 4 en]. — **unua** - Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (precipe en la angla parto) tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2]. Leĝan sankcion ili [= la ideoj] ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita [A 11.2]. — Januaro estas la unua monato de la jaro, Aprilo estas la kvara, Novembro estas la dek-unua, Decembro estas la dek-dua [FE 12.13]. La sepan tagon de la semajno Dio elektis, ke ĝi estu pli sankta, ol la ses unuaj tagoj [FE 12.15]. Tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino [FE 17.7]. Oni ne forgesas facile sian unuan amon [FE 18.19]. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (...), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon ... [FE 27.3]. unuataga (= kiu estas en la unua tago) [FE 27.9].

● **unuataga** - unuataga (= kiu estas en la unua tago) [FE 27.9].

● **unu'e** - firstly [FG 4 en]. — **unue** — Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; due mi dankas vin por la prunto; trie mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon [FE 14.6].

● **unuj** — El ŝiaj multaj infanoj unuj estas bonaj kaj aliaj estas malbonaj [FE 12.5]. — [DL 1888]: *Unuj parolis pri l' aŭtoro, anstataŭ paroli pri l' afero. ... aliaj ... timis, ke ...* [DL A I.2.1]. [1905]: *... tiuj fratoj fariĝis tute fremdaj unuj al aliaj ...* [Kongresa Parolado 1905, O.V.]. — **Rim.**: **1.** Tekstaro montras pliajn 74 trafojn de „unuj“ ĉe Z. **2.** La formo „unuj ... aliaj“ estas internacia: les uns ... les autres | one man's (one person's) ... another man's (one person's) | die einen ... die anderen | одни ... другие. **3.** Kp. „cert'“, „iu“, „kelk'“.

● **unu'o** — (l') unité | [angla mankas] | [germana mankas] | единица | jednostka [FG 4]. — [DL 1888] *... ĉiu maro estas kreita de apartaj gutoj, kaj la plej granda nombro devas kaj povas esti ricevita el apartaj unuoj* [DL A II.4].

● **unueco** - ... estas nur verkoj privataj, kiujn la esperantistoj — se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero — povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga [A 3.6]. La «Fundamento de Esperanto» devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta kontrolilo, kiu gardos lin de deflankiĝado de la vojo de unueco [A 5.5]. ... tiamaniere ni havos la certecon, ke eĉ ĉe la plej granda perfektiĝado la unueco de Esperanto neniam estos rompata ... [A 8.3]. Mi montris en principo, kiamaniere la severa netuŝebleco de la « Fundamento » gardos ĉiam la unuecon de nia lingvo, ... [A 9.1]. 1. pro la unueco de nia afero ĉiu bona esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la fundamenton de nia lingvo [A 10.2].

● **unufoja** — ... li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto [FE 22.7].

● **unu'nombr'** - singulier | singular | Einzahl, Singular | единсвенное число | liczba pojedyńcza [UV nombr']. {GRAM} — [DL 1888] *... „ci“ signifas la duan personon de l' ununombro* [DL 4.4].

● **unutaga** - unutaga (= kiu daŭras unu tagon) [FE 27.8]. — [DL 1888] *La unutaga regado de tiu ĉi estro ne restis sen postsignoj* [DL 7.3].

● **dek unu** — Li havas dek unu infanojn [FE 12.11].

● **dek-unua** — Januaro estas la unua monato de la jaro, Aprilo estas la kvara, Novembro estas la dek-unua, Decembro estas la dek-dua [FE 12.13].

● **kvindek-unua** — La dudeka (tago) de Februaro estas la kvindek-unua tago de la jaro [FE 12.14].

ŭo [OA 7] = nomo de la litero ŭ, dudeksesa litero de la Esperanta alfabeto

ur' - ure, bœuf sauvage | ure-ox, wid-bull | Auerochs | зубръ | żubr. {ZOO} — [AK] aurochs, ure. — [RE].

uragan' [OA 1] * ouragan | hurricane | Orkan | ураганъ | huragan. {METEO} — [EG 2].

urb' - ville | town | Stadt | городъ | miasto. — **urbo** - ville | town | Stadt | городъ | miasto [FE 14]. — [UL]. — Tiu ĉi urbo havas milionon da loĝantoj [FE 14.3]. La pastro, kiu mortis antaŭ nelonge (aŭ antaŭ nelonga tempo), loĝis longe en nia urbo [FE 25.12]. Mi konas neniun en tiu ĉi urbo [FE 28.9]. Li loĝas ekster la urbo [FE 31.12]. Nia urbo havas bonajn policanojn, sed ne sufiĉe energian policestron [FE 37.7]. La loĝantoj de unu regno estas samregnanoj, la loĝantoj de unu urbo estas samurbanoj, la konfesantoj de unu religio estas samreligianoj [FE 37.11].

● **urbanoj** — Urbanoj estas ordinare pli ruzaj, ol vilaĝanoj [FE 37.3].

● **antaŭ'urb'** - faubourg | suburb | Vorstadt | предмѣстье | przedmieście.

● **samurbanoj** — La loĝantoj de unu regno estas samregnanoj, la loĝantoj de unu urbo estas samurbanoj, la konfesantoj de unu religio estas samreligianoj [FE 37.11].

urĝ' [OA 1] être urgent | be urgent | dringend sein | быть спѣшнымъ | być naglącym. — [LInt 6-7/1902]. [EG 2].

urin' - uriner | piss | pissen {2012 prefere: urinieren} | мочиться | urynować. — [RE]. — Kp. pis/i [OA 9].

urn' - urne | urn | Urne | урна | urna. — [RE].

urogal' - coq de bruyère | wild cock | Auerhahn | глухарь | głuszec. {ZOO} — [RE].

urs' - ours | bear (animal) | Bär | медвѣдь | niędźwiedź. {ZOO} — [UL].

urtik' - ortie | nettle | Nessel | крапива | pokrzywa. {BOT} — [RE].

Urugvajo [OA 8] {GEO} — [LEsp 8-9/1898].

us - marque le conditionnel (ou le subjonctif) | ending of conditional in verbs | bezeichnet den Konditionalis (oder Konjunktiv) | означаетъ условное наклоненіе | oznacza tryb warunkowy. — **us** - marque le conditionnel (ou le subjonctif) | ending of conditional in verbs | bezeichnet den Konditionalis (oder Konjunktiv) | означаетъ условное наклоненіе (или сослагательное) | oznacza tryb warunkowy [FE 19]. — **us** - Le *conditionnel*, { est caractérisé} par *us*: *ŝi far'us* - elle ferait | The subjunctive mood ends in *us*, e. g. *ŝi far'us*, „she may do". | Der Konditionalis {endet} auf *us*; z.B. *ŝi far'us*, sie würde machen. | Условное наклоненіе - *us* (*ŝi far|us* она бы дѣлала). | Tryb warunkowy - *us* (*ŝi far/us* ona by czynila). [FG 6ĉ]. — [UL]. — ... kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus la komenco de nia morto [A 1.5]. ... ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem [A 3.4]. ... ĉar se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus ŝanĝo, kiu povus kaŭzi disputojn kaj kiu en verko fundamenta ne povas esti tolerata [A 4.3]. ... oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto [A 4.5]; sed senkompare pli grandan danĝeron prezentus la ŝanĝado de la traduko de ia vorto, ĉar, perdinte la severan netuŝeblecon, la verko perdus sian eksterordinare necesan karakteron de dogma fundamenteco, kaj, trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, kaj li perdus sian konfidon kaj apogon [A 4.6]. ... la fundamento ... devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara [A 6.1]. Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos... [A 6.2] — Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino,

kiam ŝi parolas; ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman kapablon? [FE 17.10]. „Estus tre bele," respondis la filino malĝentile, „ke mi iru al la fonto!" [FE 19.1]. Se mi estus sana, mi estus feliĉa [FE 20.10]. Se li scius, ke mi estas tie ĉi, li tuj venus al mi [FE 20.11]. Se la lernanto scius bone sian lecionon, la instruanto lin ne punus [FE 20.12]. La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, ... [FE 23.3]. ... la malfeliĉa knabino, ... trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro [FE 23.4]. Se mi petus lin, li dirus al mi la veron [FE 24.7]. Mi ne farus la eraron, se li antaŭe dirus al mi la veron (aŭ se li estus dirinta al mi la veron) [FE 24.8]. Mi estus amata [FE 25.1]. Vi estus lavita [FE 25.2]. Li estus invitota [FE 25.3]. Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi [FE 25.9]. Se vi scius, kiu li estas, vi lin pli estimus [FE 26.20]. ... en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon „n" tute egale ĉu ia prepozicio starus aŭ ne [FE 28.3]. Alportu al mi metron da nigra drapo (Metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo) [FE 32.6].

Uson/o. [OA 9] Lando en Nord-Ameriko, inter Atlantiko kaj Pacifiko, inter Kanado kaj Meksiko. Internacia landokodaĵo: US. {GEO} — [Kabe 1910]: *Unuigitaj Ŝtatoj aŭ Usono.* {ĉe „aŭ"}. **Lingva Respondo 1911 [Pri la nomoj de landoj]**: „Usono", vd. ĉe Brazilo.

uter' - matrice | matrix | Gebärmutter | матка (анат.) | macica. {ANAT} — [AK] utérus | matrix *(anat.)*, uterus. — [RE].

util' - utile | useful | nützlich | полезный | pożyteczny. — [AK] useful {nenion ŝanĝas aŭ aldonas}. — [UL]. — U-tí-la [FE 3]. — ... ĉio alia, kion mi verkis aŭ verkos, konsilas, korektas, aprobas k. t. p., estas nur verkoj privataj, kiujn la esperantistoj - se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero - povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga [A 3.6].

● **mal'util'** - nuisible | noxious | schädlich | вредный | szkodliwy. — [AK] harmful.

utopi' [OA 1] * utopie | utopia | Utopie | утопія | utopja. — [E-isto 1/1889]. [Beau].

uvertur' [OA 1] * ouverture (mus.) | overture | Ouverture | увертюра | uwertura. {MUZ} — [EG 2].

uz' - employer | use | gebrauchen | употреблять | używać. — **uzi** - employer | use | gebrauchen | употреблять | używać [FE 16]. — [AK] employer, se servir de, user de | use, employ *(vb.)*. — [UL]. — ... kaj zorgante pri tio, ke ĉiuj uzu tiujn vortojn en la sama formo [A 7.1]. — Ci skribas (anstataŭ „ci" oni uzas ordinare „vi") [FE 16.2]. Ni estu gajaj, ni uzu bone la vivon, ĉar la vivo ne estas longa [FE 20.21]. [Ili] povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ... [FE 27.3]. Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, ... [FE 28.2]. ... en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon „n" ... [FE 28.3]. Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion „je" [FE 29.1]. Anstataŭ la vorto „je" ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio [FE 29.3]. ... ni povas ĉiam uzi la akuzativon [FE 29.8]. Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas [FE 29.10]. La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon kaj mi devis uzi mian poŝan tranĉilon [FE 34.1].

● **uzadi** — ... sed tiuj ĉi vortoj devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj; oni devas ilin uzadi nur en la literaturo; sed en korespondado kun personoj nekonataj estas bone ĉiam peni uzadi nur vortojn el la «Fundamento» [A 7.1]. ... ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova [A 8.1]. Sed estas bone uzadi la vorton „je" kiel eble pli malofte [FE 29.2].

● **uzado** — Ĝia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj [FE 27.2]. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo ..., povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ... [FE 27.3].

● **uzanto** — ... trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, ... [A 4.6].

● **uzata** — La artikolo „la" estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj [FE 27.1]. Metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo [FE 32.6].

● **uzateco** — Kiam ... tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon [A 1.2]

● **uz'aĵ'** - outils | furniture | Geräthschaft {de 1901: Gerätschaft} | утварь | sprzęt.

● **tro'uz'** - abuser | abuse | missbrauchen | злоупотреблять | nadużywać [UV tro]. — Tro-ú-zi [FE 3].

Uzur-o, [OA 4] {fr} usure (fin.) | {en} usury | {de} Wucher | {it} usura | {es} usura | {pt} usura | {ca} usura (fin.). {FIN} — [PV] {ne ĉe Z; antaŭe procent'eg'o [UV]}.

uzurp' - usurper | usurp | usurpiren | беззаконно захватывать | uzurpować. — [AK] узурпировать, беззаконно захватывать. — [RE].

V

Vv - v | v as in "very" | w | в | w [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **vo** ... [FE 1]. — **vo** [OA 7] = nomo de la litero **v**, dudeksepa litero de la Esperanta alfabeto. — **Lingva Respondo 1893**: La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. [LR 56 A. *La Esperantisto*, 1893, p. 32]. — **Lingva Respondo 1912**: „V" devas esti elparolata kiel la franca „V" en „vous", „votre" k.t.p. [LR 71 B. PVZ IX, 277, 1912].

Vad' [OA 3.1] {en} to wade, paddle | {fr} passer à gué, marcher dans l'eau, patauger | {de} waten | {es} vadear, patullar | {pt} passar a vao {legu: passar a vau; ankaŭ: vadear} | {it} guadare, sguazzare | {pl} brodzic {legu: brodzić}. — [EG 2] waten.

vafl' - gaufre, oublie | wafer | Waffel | вафля | wafel. {KUIR} — [AK] gaufre (*pâtisserie*) | wafer *(cake)*. — [MV].

vag' - vaguer | rove, extravagate | herumschweifen | бродить, шляться | włóczyć się. — [AK] vaguer, errer, rôder, vagabonder | rove, wander about. — [RE].

vagin/o. [OA 9] Interna kanalo ĉe virinoj kaj iuj bestinoj, kiun la peniso penetras dum seksumado; ĉe virinoj ĝi kondukas de la vulvo ĝis la utero. {ANAT}

vagon' - wagon | waggon | Wagon | вагонъ | wagon. — [AK] carriage *(railway)*. — [RE].

● **vagon'ar'** - train | train | Zug (Bahn-) | поѣздъ | pociąg. — ... unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis [FE 39.11].

vak' [OA 1] être vacant | be vacant | vakant sein | быть вакантнымъ | wakować. — [EG 2].

vakcin/o. [OA 8] Substanco donanta imunecon kontraŭ mikroba aŭ parazita malsano. — A. vaccine, F. vaccin, G. Impfstoff, Vakzine, H. {es} vacuna, I. {it} vaccino, P. {pt} vacina. {MED}

vakcini' - airelle rouge | red bilberry | Preisselbeere | брусника | borówka czerwona. {BOT} — [AK] vaccinium *(vitisidaea)*. — [RE].

vaks' - cire | wax | Wachs | воскъ | wosk. — [UL].

● **vaks'tol'** - toile cirée | cerecloth, oil cloth | Wachsleinwand | клеенка | cerata.

● **sigel'vaks'** - cire à cacheter | sealing-wax | Siegellack | сургучъ | lak.

vaku/o [OA 9] **1** Kompleta foresto de materio. **2** Senaera malplena spaco.

val' - vallée | valley | Thal {de 1901: Tal} | долина | dolina. {GEO} — [RE].

Valid-a, [OA 4] {fr} valable | {en} valid | {de} rechtsgültig, geltend | {it} valido, valevole | {es} válido | {pt} válido | {ca} valid {legu: vàlid}. — [EG 2].

valiz' - valise | valise | Felleisen | чемоданъ | waliza. — [RE].

valor' – [A, mankas en UV]. — ... neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj [A 8.3]. — **valor'** [OA 1] * valoir | be worth | wert sein | стоить, быть цѣннымъ | mieć wartość. — **valor'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. — [Beau]. [EG 2].

vals' - valse | waltz | Walzer | вальсъ | walc. {MUZ} — [1888]. [RE].

valut/o [OA 9] **1** Mono aŭ monsigno (devizoj, bankbiletoj, moneroj, akciaj kuponoj k.s.) cirkulanta en unu lando aŭ grupo da landoj. **2** Fremda devizo (ĉeko aŭ kambio). **3** Valoro de papermono rilate al la ora aŭ arĝenta metalunuo en valormetalbaza monsistemo. — [EG 1].

vampir' [OA 1] vampire | vampire | Vampir | вампиръ | wampir. {MIT} — [EG 2].

van' - vain | vain, needless | vergeblich | напрасный | daremny. — [AK] {fr} vain,

inutile | futile, vain | напрасный, тщетный. — [UL]. — Vá-na [FE 3].

vand/o. [OA 9] Interna, maldika muro aŭ alispeca apartigaĵo dividanta iun spacon: *vando de ĉelo*; *vando de ĉambro*; *vando de vagono*.

vanel' [OA 1] vanneau | lapwing | Kiebitz | пигалица | czajka. {ZOO} — [EG 2].

vang' - joue | check | Wange | щека | policzek. {ANAT} — **vango** - joue | check | Wange | щека | policzek [FE 31]. — [AK] cheek. — [UL].

● **vang'har'o'j** - favoris | whiskers | Backenbart | бакенбарды | faworyty. — Liaj lipharoj estas pli grizaj, ol liaj vangharoj [FE 31.25].

vanil' - vanille | West-India nut | Vanille | ваниль | wanilia. {KUIR} — [AK] vanilla *(spice)*. — [RE].

vant' - vain, frivole | vain | eitel | суетный | czczy, marny. — [AK] frivolous, vain, empty | eitel, nichtig, leichtfertig | marny, próżny. — [RE].

vapor' - vapeur | steam | Dampf | паръ | para. — **vapor** {sen apostrofo} – vapeur | steam | Dampf | паръ | para [FG 11]. — **vaporo** - vapeur | steam | Dampf | паръ | para [FE 25]. — [AK] vapour, steam | para (wodna). — [UL]. — ... el la kaldrono, en kiu sin trovas bolanta akvo, eliras vaporo; tra la fenestro, kiu sin trovas apud la pordo, la vaporo iras sur la korton [FE 25.14]. vaporŝipo (= ŝipo, kiu sin movas per vaporo) [FE 27.10]

● **vapor'ŝip'o** - bateau à vapeur | steamboat | Dampfschiff | пароходъ | parostatek [FG 11]. — **vaporŝipo** — vaporŝipo (= ŝipo, kiu sin movas per vaporo) [FE 27.10].

varb' - enrôler, engager | list, levy | werben (z. B. zu Kriegsdiensten) | вербовать | werbować, zaciągać. — [AK] enlist, enrol. — [RE].

Vari' [OA 3.1] {en} to vary | {fr} varier | {de} abwechseln, sich ändern | {es} variar | {pt} variar | {it} variare | {pl} wcrwa {kredeble mistraduko kaj / aŭ pres-eraro}. — [EG 2] variieren.

variant-o [OA 2.1] — [PV] [PVS].

variol' - variole | smallpox | Blattern, Pocken | оспа | ospa. {MED} — [RE].

varm' - chaud | warm | varm | теплый | ciepły. — **varma** - chaud | warm | warm | теплый | ciepły [FE 13]. — **varm'** – {franca mankas} | warm | warm | теплый | ciepły [UV eg']. — **varma** – {franca mankas} | warm | warm | теплый | ciepły [FE 13 eg']. — [UL]. — Multaj birdoj flugas en la aŭtuno en pli varmajn landojn [FE 32.10]. Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3].

● **varme** — Ĉu hodiaŭ estas varme aŭ malvarme? [FE 25.13]. — **Rim.**: Kp. *Nun estas varme, sed la nokto kredeble estos tre malvarma [DL 6.3].*

● **varm'eg'** – {franca mankas} | hot | heiss {legu: heiß} | горячій | gorący [UV eg']. — **varmega** – {franca mankas} | hot | heiss {legu: heiß} | горячій | gorący [FE 13 eg']. — La fera bastono, kiu kuŝis en la forno, estas nun brule varmega [FE 31.17]. En varmega tago mi amas promeni en arbaro [FE 34.11]. Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3].

● **varmege** — ... tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna [FE 13.1].

● **varmeta** — Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3].

● **malvarma** — Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma [FE 38.3].

● **malvarme** - Ĉu hodiaŭ estas varme aŭ malvarme? [FE 25.13]

● **malvarmeto** — En somero ni trovas malvarmeton en densaj arbaroj [FE 38.4].

● **mal'varm'um'** - se refroidir | catch cold | sich erkälten | простудиться | przeziębić się. — En malbona vetero oni povas facile malvarmumi [FE 42.12].

Var-o, [OA 4] {fr} marchandise | {en} Wares {pres-eraro, legu: wares}, goods, commodities | {de} Ware | {it} merce | {es} mercancía | {pt} mercadoria | {ca} mercaderia | komercaĵo. — [PV] {antaŭe: komerc/aĵ/o [FE 25.4]}.

Varsovi' – [UV an']. — **Varsovi'o'n** - nach Warschau | въ Варшаву | do Warszawy [FG 13]. — Varsovio, Julio 1905.

[A 11.4]. — **Varsovi'** {deklarita Fundamenta de} [OA 7] (urbnomo). — [UL].

● **Varsovi'an'** - Warschauer | Варшавянинъ | Warszawianin [UV an']. — **Varsoviano** - Warschauer | Варшавянинъ | Warszawianin [FE 37 an'].

vart' - soigner | take care | warten, pflegen | нянчить, ухаживать | pielęgnować, piastować. — [AK] soigner, garder (*un enfant*) | nurse, tend *(children)* | няньчить, ухаживать за детьми | piastować, niańczyć. — [RE]. — **Lingva Respondo 1896**: [Pri „varti" kaj „flegi"] Vd. ĉe fleg'.

vasal' - vassal | vassal | Vasall | вассалъ | dannik, wasal. {JUR} — [RE].

Vaŝington — Georgo Vaŝington {tiel, sen apostrofo} estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua [FE 12.19, mankas en UV]. — **Vaŝington'** [OA 7] (vira nomo) {mallerta difino, anglaj familiaj nomoj ne indikas sekson, sed estas neŭtraj} — [DL]. — [OA 8]: RIM.IV. La nomo Zamenhof komence estis uzata kun apostrofo (ekzemple en la "Unua Libro"); en la Fundamento (fine de la Antaŭparolo) ĝi aperas sen apostrofo, tiel same kiel la virnomo Vaŝington (12, 19). Dume oni trovas en la U.V., ĉe an/, la urbonomon Nov-Jork sen apostrofo, sed en la Ekzercaro (37, L.1) troviĝas Nov-Jorko, kie ne povas temi pri preseraro. Fakte temas pri neesprimita licenco al la 16a Regulo pri apostrofado de substantivoj, licenco, laŭ kiu ĉe propraj nomoj povas esti forlasata ne nur la finaĵo de l' substantivo, sed ankaŭ la apostrofo mem. — [OI 22]: Kromdeklaro pri la nomoj Zamenhof kaj Vaŝington - La Akademio de Esperanto, lige kun sia esploro pri la skribado de diversgrade esperantigitaj propraj nomoj, rekonsideris rimarkon IV en la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro. ... [cito kaj trovloko de RIM.IV, supre citita] ... La Akademio ĉi-pere nuligas tiun licencan interpreton de la apero de senapostrofaj Zamenhof kaj Vaŝington en la Fundamento kaj konstatas, ke tiuj nomformoj estas rigardendaj kiel nur parte esperantigitaj [OI 22 de 2013-10-10]. — [DL 1888, p. 18]: *Georg,o Vaŝington,o est,is nask,it,a la du,dek du,a,n Februar,o,n (aŭ: je l' du,dek du,a Februar,o) de l' jar,o mil sep,cent tri,dek du,a* [DL 3.6].

vast' - vaste, étendu | wide, vast | weit, geräumig | обширный, просторный | obszerny. — **vasta** - vaste, étendu | wide, vast | weit, geräumig | обширный, просторный | obszerny [FE 34]. — [UL]. — ... mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn, multe pli bonajn kaj pli vastajn, kiuj estas eldonitaj de niaj plej kompetentaj amikoj ... [A 5.3]. — Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, precipe aroj da bellanaj ŝafoj [FE 34.15].

● **mal'vast'** - étroit | strait, angust | eng | тѣсный | ciasny. — [AK] narrow, restricted.

● **vast'ig'** - répandre | spread | verbreiten | распространять | rozszerzać, rozprzestrzeniać.

vat' - ouate | wad | Watte | вата | wata. — [AK] wadding. — [Blovado 1888, 12]: ... *vata noktsurtuto* ... [RE].

vaz' - vase | vase | Gefäss {legu: Gefäß} | сосудъ | naczynie. — **vazo** - vase | vase | Gefäss {legu: Gefäß} | сосудъ | naczynie [FE 19]. — [AK] vase (*ustensile*) | vessel, vase. — [UL]. — Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, kiu estis en la loĝejo [FE 19.4]. Certe, mi alportis arĝentan vazon speciale por tio, por doni trinki al tiu ĉi sinjorino! [FE 19.7].

vazelin-o [OA 2.1] — [LInt 4/1899]. [Beau] **vazelin**, vaseline. [EG 2] Vaselin.

ve! - malheur! | wo, woe! | wehe! | увы! | och!. — **ve** - malheur! | woe! | wehe! | увы! | biada! nestety! [FE 21]. — [AK] biada! niestety! — [RE]. — „Ho ve, sinjoro, mia patrino forpelis min el la domo" [FE 21.8].

veget' - végéter | vegetate | vegetiren {de 1901: vegetieren} | прозябать | wegetować. — [AK] pousser, végéter | прозябать, произрастать. — [RE].

vegetal/o. [OA 8] Ĉiu membro de unu el la du regnoj de vivuloj, karakterizita per ĉelparietoj el celulozo, havanta la funkciojn de sinnutrado kaj reproduktо, kaj plej ofte posedanta klorofilon. — A. plant (as opposed to animal); F. un végétal; G. Pflanze, Gewächs; H. {es} un vegetal; I. {it} un vegetale, pianta; P. {pt} vegetal. {BOT} — [EV 1923]. [PV].

vegetar-a [OA 2.1] — [EG 2] vegetar[ian]isch.

vejn' - veine | vein | Ader | жила, вена | żyła. {ANAT} — [RE]. — Véj-no [FE 2].

vek' - réveiller, éveiller | wake, arouse | wecken | будить | budzić. — **veki** - réveiller,

éveiller | wake, arouse | wecken | будить | budzić [FE 20]. — [AK] wake, arouse *(trans.).* — [UL]. — Kiam mi venis al li, li dormis; sed mi lin vekis [FE 20.9].

vekt' - fléau | flail | Schulterjoch, Wagebalken | коромысло | bela wagowa. — [AK] fléau de balance | beam *(of scales, balances, etc.)*. — [RE].

vel' - voile | sail (subst.) | Segel | парусъ | żagiel. {MAR} — [RE].

velen' - vélin | vellum | Velin | веленевая бумага | papier welinowy. — [RE].

velk' - se faner, se flétrir | fade | welken | вянуть | więdnąć. — [UL].

velociped' [OA 1] * vélocipède {(ark.)} | velocipede {(ark.)} | Veloziped {(ark.)} | велосипедъ | welocyped. — [LInt 2/1896, p. 23]: {Pri kontraŭ-esperanta artikolo en la ĵurnalo „Velociped"}: *Mi ĉiam havis simpation por velocipedo, kiel por rimedo de pli rapida proksimiĝo de homoj, sed nun mi vidas, ke la velocipeda afero sen la lingvo internacia estas nur afero de piedoj ...* (Józ. Wasniewski). — [Beau] **velociped**, vélocipède. [EG 2] **velociped-o**, Veloziped, Fahrrad. [PIE 1910] welocyped. [Kabe 1910]: Velocipedo. Malgranda veturilo por sin mem transporti per mekanismo, movata per la piedoj: durada, trirada velocipedo. — **Rim.**: Kp. **bicikl'** [OA 1] kaj **cikl-o** [OA 2.1].

velur' - velours | velvet | Sammet {(ark.) 2012: Samt} | бархатъ | aksamit. — [RE].

ven' - venir | come | kommen | приходить | przychodzić. — **veni** - venir | come | kommen | приходить | przychodzić [FE 8]. — [UL]. — Venu kune kun la patro [FE 8.5]. Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo [FE 9.9]. En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki [FE 15.1]. Mi vokas la knabon, kaj li venas [FE 16.11]. Mi vokas la knabinon, kaj ŝi venas [FE 16.12]. Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto [FE 17.1]. „Ŝajnas al mi, ke el ŝia buŝo elsaltas perloj kaj diamantoj! De kio tio ĉi venas, mia filino?" [FE 17.6]. Venu al mi hodiaŭ vespere [FE 18.5]. Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis unu sinjorinon, ... [FE 19.5]. "Ĉu mi venis tien ĉi," diris al ŝi la malĝentila kaj fiera knabino, "por doni al vi trinki? [FE 19.6]. Kiam mi venis al li, li dormis; sed mi lin vekis [FE 20.9]. Se li scius, ke mi estas tie ĉi, li tuj venus al mi [FE 20.11]. Li venu, kaj mi pardonos al li [FE 20.18]. Venu, ni atendas vin, Savonto de la mondo [FE 22.9]. Li venis al mi tute ne atendite [FE 22.15]. La reĝido, ..., petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas [FE 23.1]. Kiam vi venos al mi, li jam antaŭe diros al mi la veron (aŭ li estos dirinta al mi la veron; aŭ antaŭ ol vi venos al mi, li diros al mi la veron) [FE 24.6]. — Kiam mi venos, diru al mi la veron [FE 24.9]. Kiam mia patro venos, diru al mi antaŭe la veron ... [FE 24.10]. Se li jam venis, petu lin al mi [FE 26.21]. Malamiko venis en nian landon [FE 33.13]. Gesinjoroj N. hodiaŭ vespere venos al ni [FE 36.3]. Mi kredeble ne povos veni al vi hodiaŭ, ĉar mi pensas, ke mi mem havos hodiaŭ gastojn [FE 41.8].

● **venonta** — la tempon venontan neniu ankoraŭ konas [FE 22.8].

● **venigi** — Venigu la kuraciston, ĉar mi estas malsana [FE 39.9]. Li venigis al si el Berlino multajn librojn [FE 39.10].

● **de'ven'** - descendre | descend | abstammen | происходить | pochodzić. — La hebreoj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas de Izraelo [FE 36.13].

● **kunveni** — Ni ĉiuj kunvenis, por priparoli tre gravan aferon; sed ni ne povis atingi ian rezultaton, kaj ni disiris [FE 42.1].

● **reveni** — Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto [FE 17.1]. La filo de la reĝo, kiu revenis de ĉaso, ... [FE 21.7]. La tempo pasinta jam neniam revenos [FE 22.8]. Mi foriras, sed atendu min, ĉar mi baldaŭ revenos [FE 42.5].

vend' - vendre | sell | verkaufen | продавать | sprzedawać. — **vendi** - vendre | sell | verkaufen | продавать | sprzedawać [FE 40]. — [UL]. — La lignisto vendas lignon, kaj la lignaĵisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn [FE 37.14]. Magazeno, en kiu oni vendas cigarojn, aŭ ĉambro, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarejo [FE 40.15].

vendred' - vendredi | Friday | Freitag | пятница | piątek. — **vendredo** - vendredi | Friday | Freitag | пятница | piątek [FE 20]. — [UL]. — Hieraŭ estis vendredo, kaj postmorgaŭ estos lundo [FE 20.5].

venen' - poison | poison | Gift | ядъ | trucizna. — [UL].

Venezuelo [OA 8] {GEO} — [EV 1923].

venĝ' - se venger | vengeance | rächen | мстить | mścić się. — **venĝi** - se venger | revenge | rächen | мстить | mścić się [FE 41]. — [AK] se venger de, venger | take revenge, avenge | *(sich)* rächen. — [UL].

● **venĝema** - ... tamen li estas tre pardonema, li ne portas longe la koleron kaj li tute ne estas venĝema [FE 41.13].

venk' - vaincre | conquer | siegen | побѣждать | zwyciężać. — **venki** - vaincre | conquer | siegen | побѣждать | zwyciężać [FE 14]. — [UL] {vortaro; [UL] teksto: vink'} — Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn [FE 14]. Oni diras, ke la vero ĉiam venkas [FE 16]. Nia lando venkos, ĉar nia militistaro estas granda kaj brava [FE 34].

vent' - vent | wind | Wind | вѣтеръ {de 1918: ветер} | wiatr. — **vento** - vent | wind | Wind | вѣтеръ {de 1918: ветер} | wiatr [FE 39]. — [AK] wind *(subst.)*. — [UL]. — Mi ne pendigis mian ĉapon sur tiu ĉi arbeto; sed la vento forblovis de mia kapo la ĉapon, kaj ĝi, flugante, pendiĝis sur la branĉoj de la arbeto [FE 39.12].

● **vent'um'** - éventer | fan | fächeln | вѣять | wiać.

ventol' - éventer, vanner | ventilate | ventiliren {de 1901: ventilieren} | вентилировать | wentylować, wietrzyć. — [RE].

ventr' - ventre | belly | Bauch | брюхо | brzuch {ANAT}. — [AK] живот. — [UL].

ver' - vérité | true | Wahrheit | истина | prawda. — **vero** - vérité | true | Wahrheit | истина | prawda [FE 16]. — [AK] truth. — [UL]. — Vé-ro [FE 2]. — Oni diras, ke la vero ĉiam venkas [FE 16.19]. Ĉu vi diros al mi la veron? [FE 18.7]. Nun li diras al mi la veron [FE 24.1]. Hieraŭ li diris al mi la veron [FE 24.2]. Li ĉiam diradis al mi la veron [FE 24.3]. Kiam vi vidis nin en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron (aŭ li estis dirinta al mi la veron) [FE 24.4]. Li diros al mi la veron [FE 24.5]. Kiam vi venos al mi, li jam antaŭe diros al mi la veron (aŭ li estos dirinta al mi la veron; aŭ antaŭ ol vi venos al mi, li diros al mi la veron) [FE 24.6]. Se mi petus lin, li dirus al mi la veron [FE 24.7]. Mi ne farus la eraron, se li antaŭe dirus al mi la veron (aŭ se li estus dirinta al mi la veron) [FE 24.8]. Kiam mi venos, diru al mi la veron [FE 24.9]. Kiam mia patro venos, diru al mi antaŭe la veron (aŭ estu dirinta al mi la veron) [FE 24.10]. Mi volas diri al vi la veron [FE 24.11]. Mi volas, ke tio, kion mi diris, estu vera (aŭ mi volas esti dirinta la veron) [FE 24.12].

● **vera** — ... oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto [A 4.5]. — Mi volas, ke tio, kion mi diris, estu vera (aŭ mi volas esti dirinta la veron) [FE 24.12].

verand' [OA 1] veranda | veranda | Veranda | веранда | werenda. — [Neĝa Blovado 1888, 8]: *Manjo ... eliris sur la postan verandon.* [EG 2].

verb' - verbe | verb | Zeitwort | глаголъ | czasownik. {GRAM} — **verbo** - verbe | verb | Zeitwort | глаголъ | czasownik [FE 29]. — [DL]. [RE]. — El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon [FE 29.8].

verben' [OA 1] verveine | vervain | Eisenkraut | вербена | koszysko. {BOT} — [EG 2].

verd' - vert | green | grün | зеленый | zielony. — [UL].

verdigr' - vert-de-gris | verdigris | Grünspan | мѣдянка | rdza miedziana, grynszpan. — [AK] ярь, медянка | grynszpan. — [RE].

verdikt' [OA 1] verdict, arret, sentence | verdict | Verdikt {ark.; en 2012: Urteil} | приговоръ | wyrok. {JUR} — [EG 2].

verg' - verge | rod | Ruthe {de 1901: Rute} | розга | rózga. — [RE].

verk' - composer, faire des ouvrages (littér.) | work (literary) | verfassen, schreiben (Bücher etc.) | сочинять | tworzyć, układać, pisać (dzieło). — **verki** - composer, faire des ouvrages (littér.) | work (literary) | verfassen | сочинять | tworzyć, pisać [FE 37]. — [AK] сочинять, писать (книги). — [UL]. — Verkisto verkas librojn, kaj skribisto simple transskribas paperojn [FE 37.17].

● **verko** — Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto [A 2.1]. Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li [A 2.2]. ... li esperas, ke ... ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan ... fundamenton de Esperanto [A 2.3]. ... ĉiu esperantisto havu la plenan certecon, ke leĝodonanto por li ĉiam estos ne ia persono, sed ia klare difinita verko [A 3.2].

... la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn [A 3.3]. [pliaj trafoj pri verko en A].

● **verkisto** — Verkisto verkas librojn, kaj skribisto simple transskribas paperojn [FE 37.17].

● **lernoverko** - ... por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn oficialajn, kiuj devas troviĝi en ĉiuj lernoverkoj de Esperanto [A 5.4].

verm' - ver | worm | Wurm | червь | robak {ZOO}. — [UL].

vermiĉel' - vermicelle | vermicelli | Nudel | лапша | makaron {KUIR}. — [RE].

vermut-o [OA 2.1] {KUIR} — [EG 2] Wermut.

vers' - vers | verse | Vers | стихъ | wiersz. — [AK] wiersz (poetycki). — [RE]. — Vér-so [FE 3].

verŝ' - verser | pour | giessen {legu: gießen} | лить | lać. — [AK] verser (*un liquide*). — [UL].

versi/o [OA 9] **1** Prezento de afero el iu vidpunkto (normale kontraste al alia vidpunkto): *ŝi rakontis sian version de la aventuro*. **2** Formo, redakto aŭ eldono de teksto, programo k.s. (normale kontraste al alia formo/redakto/eldono): *mi konas nur la germanan version de la poemo, kaj ne la originan polan version*; *Petro uzas la novan version de la programo*.

verst' - verste | verst | Werst | верста | wiorsta {MEZ}. — [Blovado 1888, 6]: ... *ili du devis ... veturi ĉirkaŭ kvin verstojn.* [RE].

vert' - sommet de la tête | crown ot the head | Scheitel (auf dem Kopfe) | темя, макушка | ciemię. {ANAT} — [AK] top *(of head)*, pate. — [RE].

vertebr' - vertèbre | chine-bone | Wirbel (Rücken-) | позвонокъ | kręg {ANAT}. — [AK] vertebra | kręg (anat.). — [RE].

vertic/o. [OA 8] Sekcopunkto de la du lateroj de angulo, ankaŭ se la angulo apartenas al plurlatero aŭ al pluredro. — A. vertex, apex (of an angle); F. sommet (d'un angle); G. Scheitelpunkt (eines Winkels), Ecke (eines Dreiecks); H. {es} vértice (geom.); I. {it} vertice (geom.); P. {pt} vértice (geom.). {GEOM} **—** [EG 2] (geom.) Spitze.

vertikal' - vertical | vertical | senkrecht | вертикальный | pionowy. — [RE].

veruk' - verrue | wart | Warze | бородавка | brodawka. {MED} — [RE].

Verv' [OA 3.2] {en} animation | {fr} verve | {de} Verve | {es} numen | {pt} veia, estro, inspiraçao {legu: inspiração} | {it} verve | {pl} werwa. **—** [EG 2] Verve, Begeisterung, Schwung.

vesp' - guêpe | wasp | Wespe | oca | osa {ZOO}. — [RE].

vesper' - soir | evening | Abend | вечеръ | wieczór. — **vespero** - soir | evening | Abend | вечеръ | wieczór [FE 18]. — [UL].

● **vespere** — Venu al mi hodiaŭ vespere [FE 18.5]. Gesinjoroj N. hodiaŭ vespere venos al ni [FE 36.3].

● **vesper'manĝ'** - souper | sup | zu Abend essen | ужинать | jeść kolacyę, wieczerrzać [UV manĝ']. — Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn; post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo [FE 18.15]. — vespermanĝi [FE 27.13].

vespert' - chauve-souris | bat | Fledermaus | летучая мышь | nietoperz {ZOO}.

veŝt' - gilet | vest | Weste | жилетка | kamizelka. {VEST} — Véŝ-to [FE 3].

vest' - vêtir, habiller | clothe | ankleiden | одѣвать | odziewać, ubierać. — **vesti** - vêtir, habiller | clothe | ankleiden | одѣвать | odziewać, ubierać [FE 18]. — [AK] ankleiden, anziehen.

● **vest'o** - habit | clothes | Kleid | платье | ubiór, odzież. — Vés-to [FE 3]. — Montru al ili vian novan veston [FE 18.11]. En la kota vetero mia vesto forte malpuriĝis; tial mi prenis broson kaj purigis la veston [FE 39.1]. Post infekta malsano oni ofte bruligas la vestojn de la malsanulo [FE 39.5]. Li estas tre purema, kaj eĉ unu polveron vi ne trovos sur lia vesto [FE 41.17].

● **vestita** — Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris el la arbaro kaj petis de ŝi trinki ... [FE 19.5].

● **supervesto** — Li portas rozokoloran superveston kaj teleroforman ĉapelon [FE 31.23].

vestibl' - vestibule | floor | Hausflur | сѣни | sień. — [AK] lobby, vestibule | сени, вестибюль.

vet' - parier | bet, wager | wetten | биться объ закладъ | założyć się. — [AK] założyć się (o co).

veter' - temps (température) | weather | Wetter | погода | pogoda. {METEO} –

vetero - temps (température) | weather | Wetter | погода | pogoda [FE 34]. — Hodiaŭ estas bela frosta vetero, tial mi prenos miajn glitilojn kaj iros gliti [FE 34]. En la kota vetero mia vesto forte malpuriĝis; tial mi prenis broson kaj purigis la veston [FE 39]. En malbona vetero oni povas facile malvarmumi [FE 42]. — *DL 1888: La vetero estis malbona, kaj mi malvarmumis [DL 11].*

veteran' [OA 1] veteran | veteran | Veteran | ветеранъ | weteran.

veterinar' [OA 1] veterinaire | veterinary | Tierarzt {2012 ankaŭ: Veterinär} | ветеринаръ | weterynarz.

vetur' - aller, partir, à l'aide d'un véhicule quelconque: bateau, voiture, etc. | journey, travel | fahren | ѣхать | jechać. — **veturi** - aller, partir | journey, travel | fahren | ѣхать | jechać [FE 28]. — Morgaŭ mi veturos Parizon (aŭ en Parizon) [FE 28.4]. Mi veturis du tagojn kaj unu nokton [FE 29.6]. En somero ni veturas per diversaj veturiloj, kaj en vintro ni veturas per glitveturilo [FE 34.6]. Kiam mi ien veturas, mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo [FE 35.12].

● **veturanta** — ... li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis [FE 39.11].

● **veturigisto** — Ni havas diversajn servantojn: kuiriston, ĉambristinon, infanistinon kaj veturigiston [FE 37.18]. — **Rim.**: Kp. moderne **ŝofor/o.** [OA 8].

● **veturilo** — En somero ni veturas per diversaj veturiloj, kaj en vintro ni veturas per glitveturilo [FE 34.6].

● **enveturi** — Kun bruo oni malfermis la pordegon, kaj la kaleŝo enveturis en la korton [FE 38.8].

● **glitveturilo** — En somero ni veturas per diversaj veturiloj, kaj en vintro ni veturas per glitveturilo [FE 34.6].

● **tramveturil-o** [OA 2.1] voiture de tramway | tramcar | Tramwagen.

vezik' - vessie | blister, bladder | Blase | пузырь | pęcherz.

vezir' - vizir | visier | Vezier {2012: Wesir} | визирь | wezyr.

vi - vous, toi, tu | you | Ihr, du, Sie | вы, ты | wy, ty. — **vi** - vous, toi, tu | you | Ihr, du, Sie | вы, ты | wy, ty [FE 10]. — Ne, vi eraras, sinjoro: via pano estas malpli freŝa, ol mia [FE 10.17]. Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; due mi dankas vin por la prunto; trie mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon [FE 14.6]. "Vi {la juna knabino} estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke …" [FE 15.5]. „... ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono." [FE 15.7]. Ci skribas (anstataŭ „ci" oni uzas ordinare „vi") [FE 16.2]. Knabo, vi estas neĝentila [FE 16.15]. Sinjoro, vi estas neĝentila [FE 16.16]. Vi {la pli aĝa filino} devas nur iri al la fonto ĉerpi akvon; kaj kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile." [FE 17.11]. Ĉu vi diros al mi la veron? [FE 18.7]. Mi amas min mem, vi amas vin mem, li amas sin mem, kaj ĉiu homo amas sin mem [FE 18.12]. Mi jam havas mian ĉapelon; nun serĉu vi vian [FE 18.16].

● **vi** {bestoj} — Mia hundo, vi estas tre fidela [FE 16.18].

● **vi** {3-a persono pluralo} — Vi estas infanoj [FE 16.6]. Sinjoroj, vi estas neĝentilaj [FE 16.17].

● **al vi** — Mi deziras al vi bonan tagon, sinjoro! [FE 10.8]. Ĝojan feston! (mi deziras al vi) [FE 10.10]. Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; … [FE 10.19]. ... mi devas fari al vi {al la juna knabino} donacon" [FE 15.5]. „Mi faras al vi donacon," daŭrigis la feino, ... [FE 15.7]. ... ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman kapablon? [FE 17.10]. Mi rakontos al vi historion [FE 18.6].

● **de vi** — … kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile." [FE 17.11].

● **ol vi** — Mi havas pli freŝan panon, ol vi [FE 10.16].

● **vi'a** - votre, ton | your | Ihr, euer, dein | вашъ, твой | wasz, twój. — Ne, vi eraras, sinjoro: via pano estas malpli freŝa, ol mia [FE 10.17]. „... ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono." [FE 15.7]. Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, … [FE 17.10]. Diru al mi vian nomon [FE 18.3]. Montru al ili vian novan veston [FE 18.11]. Mi jam havas mian ĉapelon; nun serĉu vi vian [FE 18.16].

— Lingva Respondo [Pri la uzado de "vi" kaj "Vi"]: Ordinare mi skribas "vi", kiam mi parolas al unu persono familiare, kaj "Vi", kiam mi parolas al multaj personoj aŭ al unu persono kun respekto. Vi trovas tiun ĉi diferencon ne bezona, kaj mi konsentas, ke vi estas prava. Tiu ĉi maniero de skribado estas nur mia persona kutimo kaj havas nenion komunan kun la gramatiko de nia lingvo. La ĉiama skribado de "vi" per

malgranda litero estas ne sole tute regula, sed mi mem ankaŭ nun provos iom post iom forlasi mian ĝisnunan manieron de skribado, kiam miaj korespondantoj iom alkutimiĝos al la malgranda “vi”. Ankaŭ “Estimata sinjoro”, “Kara amiko” estas pli regula, ol “Estimata Sinjoro”, “Kara Amiko” k.t.p., sed en tiuj ĉi okazoj oni ordinare simple pro ĝentileco skribas grandan literon, kie pli regula estus litero malgranda. [*Esperantisto*, 1893, p. 16].

— **Rim.:** Kp. „ci“ kaj „si“.

viadukt-o [OA 2.1] {ARKI}

viand’ - viande | meat, flesh | Fleisch | мясо | mięso. — **viando** - viande | meat, flesch {legu: flesh kiel ĝuste en FE eld. 1-3} | Fleisch | мясо | mięso [FE 34]. — **viand’o** – [franca mankas] | meat | Fleisch | мясо | mięso [UV da]. — La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon kaj mi devis uzi mian poŝan tranĉilon [FE 34.1].

● **funt’o da viand’o** - a pound of meat [UV da]

● **kilogram’o da viand’o** - ein Kilogramm Fleisch | килограмъ мяса | kilogram mięsa [UV da].

vibr’ [OA 1] vibrer | vibrate | vibrieren | вибрировать | wibrować.

viburn’ - aubier | sap | Schlingstrauch | калина | kalina {BOT}. — [AK] viorne, obier (*boule de neige*) | guelder-rose, viburnum | Schneeball (*Pflanze*).

vic’ - rang, série, tour | row, rank | Reihe, Reihenfolge | рядъ {de 1918: ряд} | rząd. — [AK] rząd, kolej, szereg.

vid’ - voir | see | sehen | видѣть {de 1918: видеть} | widzieć. — **vidi** - voir | see | sehen | видѣть {de 1918: видеть} | widzieć [FE 7]. — Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo [A 8.2]. — Mi vidas leonon [FE 7.4]. Ni vidas per la okuloj kaj aŭdas per la oreloj [FE 9.5]. En la tago ni vidas la helan sunon, kaj en la nokto ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn [FE 10.13]. La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon; ... [FE 11.2]. ... (ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino) [FE 15.6]. „Kion mi vidas!“ diris ŝia patrino kun grandega miro [FE 17.4]. Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis unu sinjorinon, ... (tio ĉi estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino, por vidi, kiel granda estos la malboneco de tiu ĉi knabino) [FE 19.5]. “Ho, ĉielo!” ekkriis la patrino, “kion mi vidas? [FE 21.3]. En la lingvo „Esperanto“ ni vidas la estontan lingvon de la tuta mondo [FE 22.10]. La reĝido, kiu vidis, ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj, petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas [FE 23.1]. Kiam vi vidis nin en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron (aŭ li estis dirinta al mi la veron) [FE 24.4]. Je la lasta fojo mi vidas lin ĉe vi (aŭ: la lastan fojon) [FE 29.5]. Starante ekstere, li povis vidi nur la eksteran flankon de nia domo [FE 31.11]. Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj [FE 32.12]. — La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo [FE 33.4]. Mi vidis vian avinon kun ŝiaj kvar nepinoj kaj kun mia nevino [FE 33.19]. Sur lia vizaĝo mi vidis ĝojan rideton [FE 38.7]. Kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi ion novan, sed baldaŭ ni vidis, ke ni trompiĝis [FE 40.7].

● **vidante** — La filo de la reĝo ... ŝin renkontis; kaj, vidante, ke ŝi estas tiel bela, li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola kaj pro kio ŝi ploras [FE 21.7].

● **travidebla** — Vitro estas rompebla kaj travidebla [FE 41.2].

vidv’ - veuf | widower | Wittwer | вдовецъ | wdowiec. — **vidvo** - veuf | widower | Wittwer | вдовецъ | wdowiec [FE 11]. — [AK] veuf (*subst.*).

● **vidvino** — Unu vidvino havis du filinojn [FE 11.1]. La juna vidvino fariĝis denove fianĉino [FE 33.22].

vigl’ - éveillé, vigilant | awake, gay, vigilant | munter | бодрый | czujny. — [AK] alert, spirited | czujny, rzeźwy.

vikari’ - vicaire | vicar | Stellvertreter {Vikar} | намѣстникъ | zastępcar. — [AK] vicar, deputy | викарий.

Viktim’ [OA 3.2] {en} victim | {fr} victime | {de} Opfer (passiv), Schlachtopfer | {es} victima | {pt} victima {de 2009: vítima} | {it} vittima | {pl} ofiara.

vil’ - touffe, villosité | rag, tuft | Zotte | космa | kłak, kosmyk. {ANAT}

vilaĝ’ - village | village | Dorf | деревня | wieś. — **vilaĝo** - village | village | Dorf | деревня | wieś [FE 15].

● **vilaĝa** — … ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino ... [FE 15.6].

● **vilaĝ'an'** - paysan | countryman | Bauer | крестьянинъ | wieśniak. — **vilaĝano** - paysan | countryman | Bauer | крестьянинъ | wieśniak [FE 37]. — [AK] villager, peasant. — Urbanoj estas ordinare pli ruzaj, ol vilaĝanoj [FE 37.3].

Vilhelmo — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Ernečjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilhečjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo) [FE 38, mankas en UV]. — **Vilhelm'** {deklarita Fundamenta per} [OA 7] (vira antaŭnomo).

vin' - vin | vine | Wein | вино | wino. {BOT}{KUIR} — **vino** - vin | vine | Wein | вино | wino [FE 10]. — [AK] wine. — [UL]. — Lakto estas pli nutra, ol vino [FE 10.15]. Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino; glaso da vino estas glaso plena je vino [FE 32.5]. Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo [FE 34.10]. Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklaraĵon [FE 35.4]. Via vino estas nur ia abomena acidaĵo [FE 35.7].

● **vin'ber'** - raisin | grape | Weintraube | виноградъ | winogrono. — [AK] Weinbeere.

● **sek'vin'ber'** - raisin sec | raisin | Rosine | изюмъ | rodzynka.

vinagr' - vinaigre | vinegar | Essig | уксусъ | ocet. {KUIR} — **vinagro** - vinaigre | vinegar | Essig | уксусъ | ocet [FE 35]. — [RE]. — En tiuj ĉi boteletoj sin trovas diversaj acidoj: vinagro, sulfuracido, azotacido kaj aliaj [FE 35.6]. La acideco de tiu ĉi vinagro estas tre malforta [FE 35.8].

vind' - tortiller | wind, twist | winden | пеленать | powijać. — [AK] emmailloter, enrouler (*autour de*). | swaddle, swathe | powijać (w pieluchy). — [RE].

vinjet' [OA 1] vignette | vignette | Vignette | виньетка | winieta. — [EG 2].

vink' [OA 1] pervenche | periwinkle (bot.) | Immergrün | барвинокъ | barwinek. {BOT} — [UL].

VINKTO [OA 6] *(Industrio) Metala peco uzata por ripari porcelanaĵojn, k. t. p.* | {en} rivet | {fr} agrafe | {de} Niet(e) | {es} laña, grapa | {it} giunto (sost.) | {pl} spoidto {legu: spoidło}. — [EG 2] vinkt-i {verbo}.

vintr' - hiver | winter | Winter | зима | zima. — **vintro** - hiver | winter | Winter | зима | zima [FE 16]. — [UL]. — En la vintro oni hejtas la fornojn [FE 16.20]. En somero ni veturas per diversaj veturiloj, kaj en vintro ni veturas per glitveturilo [FE 34.6].

viol' - violette | violet | Veilchen | фіалка | fiołek. {BOT} — [AK] violet (*flower*). — [RE].

violon' - violon | violin | Geige {2012 ankaŭ: Violine} | скрипка | skrzypce {MUZ}.

violonĉel' - violoncelle | violoncello | Violoncell {legu: Violoncello} | віолончель | wiolonczela {MUZ}. — [AK] Cello.

vip' - fouet | whip | Peitsche | бичъ | bicz. — [RE].

viper/o. [OA 8] Zamenhofa formo de: vipuro (genro de serpentoj: Vipera). — A. viper, F. vipère, G. Viper, H. {es} víbora, I. {it} vipera, P. {pt} víbora. {ZOO} — [RE]. [MV]. [UV eld. 1]. — [OA 8] II.A.2. La formo vipero troviĝis en la unua eldono de la Universala Vortaro (1894) kaj estis la sola uzata de Zamenhof ĝis 1907. Kiel tia ĝi estas paralela formo al vipuro troviĝanta en la Fundamento, kaj povas esti rajte uzata. — **Lingva Respondo 1913 [Pri vipero - vipuro]**: Vd. ĉe „kratago". — **Rim.**: Superrigardo pri la demando vipero / vipuro ĉe Vilborg, kiu konkludas el la kontraŭdiraj respondoj de Z: origina radiko kun –er → preseraro –ur → akcepto de la erara formo fare de Z pro ĝia fundamenteco. Tio konvinkas, ĉar la klarigo bone harmonias kun la ĉiama Z-a principo „en dubaj okazoj kontinueco antaŭ ĝusteco" (kp. A 4).

vipur' - vipère | viper | Viper | ехидна | źmija {ZOO}. — [UV eld. 2-5]. — **Lingva Respondo 1913 [Pri vipero - vipuro]**: Vd. ĉe „kratago". — [OA 8] II.A.2. La formo vipero troviĝis en la unua eldono de la Universala Vortaro (1894) kaj estis la sola uzata de Zamenhof ĝis 1907. Kiel tia ĝi estas paralela formo al vipuro troviĝanta en la Fundamento, kaj povas esti rajte uzata. {UV 1-a eld. 1894 (t.e. 1893) viper'}. — **Rim.**: **1.** Pri vipero / vipuro vd. ĉe vipero. **2.** Pri la maltrafa traduko per la Biblia ехидна anstataŭ la ĝenerallingva гадюка vd. „La rusa serpento": Z interesiĝis pri la Biblia slavona vorto ехидна kaj tradukis ĝin en RE 1889 per „viper-". Pri la realaj serpentoj li ne

interesiĝis, гадюка mankas en la ĝusta alfabeto loko en RE 1889, p. 29. La inversigo en MV 1889 (viper' - Viper) ne kaŭzis problemojn, ĉar la germana, malsame kiel la rusa, ne havas du formojn (Biblian kaj ĝenerallingvan) por la serpento. La eraro okazis, kiam Zamenhof faris el MV (eo → de) 1889 la Universalan Vortaron UV (eo → de+xy) 1893, t.e. aldonis francajn, anglajn, rusajn kaj polajn tradukojn al MV. Tiuokaze li devus aŭ skribi „viper' | vipère | viper | Viper | гадюка, *(Biblio aŭ arkaika) ехидна* | źmija“ aŭ nur anstataŭi la specialan ехидна per la ĝenerallingvan гадюка - ĉar pro la inversigo kaj la aldono de la aliaj lingvoj la semantiko preciziĝis. De nun ĝi celis la ĝeneralan vorton, ne plu la specialan vorton uzitan en Biblio kaj troveblan nur en la rusa, sed ne en la aliaj lingvoj.

vir' - homme (sexe) | man | Mann | мужъ, мужчина | mężczyzna, mąż. — **vir'** - homme [UV ec'] — **viro** - homme (sexe) | man | Mann | мужчина, мужъ | mężczyzna, mąż [FE 15]. — **viro** - homme | man [FE 11 ec']. — [AK] man, male. — [UL].

● **vir'ec'** - virilité [UV ec'] — **vireco** - virilité | manliness [FE 11 ec'].

● **vir'in'** - Weib | женщина [UV ec'] — **virino** - woman | Weib | женщина [FE 11 ec']. — En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki [FE 15.1]. Kaj ŝi ... alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune [FE 15.3]. Kiam la bona virino trankviligis sian soifon, ŝi diris al la knabino ... [FE 15.4]. ... ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino ... [FE 15.6]. Vi devas nur iri al la fonto ĉerpi akvon; kaj kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile." [FE 17.11]. Mia onklino estas bona virino [FE 33.18]. Virino, kiu kuracas, estas kuracistino; edzino de kuracisto estas kuracistedzino [FE 36.9].

● **vir'in'ec'** - Weiblichkeit | женственность [UV ec']. — **virineco** - womanliness | Weiblichkeit | женственность [FE 11 ec'].

— **Lingva Respondo 1906**: La nomo de bestoj signifas ankaŭ la viran sekson; la vorton „viro“ (ekzemple „bovoviro“ {nun oni uzas „virbovo“}) mi aldonas nur en okazo de ekstrema *neceseco*. [LR 17, let. al Th. Thorsteinsson (1906), O.V. p. 523].

virg' - virginal | virginal | jungfräulich | дѣвственный | dziewiczy. — **virga** - virginal | virginal | jungfräulich | дѣвственный | dziewiczy [FE 37]. — [AK] девственный, невинный. — [RE].

● **virgulino** — Preĝu al la Sankta Virgulino [FE 37.23].

● **mal'virg'ig' -** déshonorer, violer | dishonour, violate, deflower | schänden (eine Jungfrau) {2012: entjungfern} | изнасиловать | zgwałcić, bezecnić. — [AK] лишать невинности, растлить.

virt' - vertu | virtue | Tugend | добродѣтель | cnota. — [RE].

virtual/a. [OA 9] Kvazaŭa. Tia, ke ĝi funkcias, efikas aŭ impresas samkiel io, sed efektive estas io alia (plej ofte ne fizike reala): *virtuala memoro*; *virtuala rapido*; *virtuala realo*. (Tiu vorto, kiun *virtuala* gramatike priskribas, ekz. *memoro*, indikas tion, al kio la virtualaĵo similas.).

virtuoz' - virtuose | virtuoso | Virtuos {ĝuste estis jam en 1889: Virtuose} | виртуозъ | wirtuoz. — [RE].

virus/o. [OA 9] Speco de infekta parazito, kiu estas pli simpla ol bakterio, kaj kiu povas reprodukti sin nur ene de kaj helpe de la ĉeloj de plurĉelaj organismoj.

viŝ' - essuyer | wipe | wischen | обтирать | ocierać. — [AK] вытирать. — [Ul].

● **viŝ'il'** - essuie-main | towel | Handtuch | полотенцо | ręcznik.

visk' [OA 1] gui | mistletoe | Mistel | омела | jemiola. {BOT}

viski-o (*trinkaĵo*) [OA 2.1] {KUIR} — [EG 2] Whisky.

vist' [OA 1] whist | whist | Whist | вистъ | wist. {LUD} — [1889]. [EG 2].

vit/o. [OA 8] Vinberplanto (Vitis ampelos, Vitis vinifera). — A. vine, F. vigne (plante), G. Weinstock, H. {es} vid, viña, I. {it} vite, P. {pt} videira. {BOT} — [PV].

vitamin/o. [OA 9] Organika nutrosubstanco, kiu en tre malgranda kvanto estas necesa por la kreskado kaj sano de homoj kaj bestoj: *manko de vitaminoj estigas malsanojn*; *oranĝoj enhavas vitaminon C*; *olesolveblaj vitaminoj (A, D, E, K)*; *akvosolveblaj vitaminoj (B, PP, C, P)*.

vitr' - verre (matière) | glass (substance) | Glas | стекло | szkło. — **vitro** - verre

(matière) | glass (substance) | Glas | стекло | szkło [FE 41]. — [UL]- — Vitro estas rompebla kaj travidebla [FE 41.2].

● **okul'vitr'o** - lunettes | spectacles | Brille | очки | okulary.

vitriol' - vitriol | vitriol | Vitriol | купоросъ | witryol {KEM}. — [RE].

viv' - vivre | live | leben | жить | żyć. — **vivi** - vivre | live | leben | жить | żyć [FE 11]. — [UL]. — ... ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili [FE 11.2]. Li estas morte malsana, li ne vivos pli, ol unu tagon [FE 31.7]. Mi vivas kun li en granda amikeco [FE 35.19].

● **vivo** — Kiam ... tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon ..., tiam ... [A 1.2]. — Ni estu gajaj, ni uzu bone la vivon, ĉar la vivo ne estas longa [FE 20.21].

● **malviva** — Lia filo mortis kaj estas nun malviva [FE 31.5].

VIVISEKCIO [OA 6] *(Anatomio) Operacio praktikata sur vivanta besto por studi fiziologiajn fenomenojn* | {en} vivisection | {fr} vivisection | {de} Tierversuch, Vivisektion | {es} vivisección | {it} vivisezione | {pl} wiwisekcja. — [Verax]. [PV].

vizaĝ' - visage, figure | face | Gesicht | лицо | twarz. — **vizaĝo** - visage | face | Gesicht | лицо | twarz [FE 11]. — [AK] Gesicht, Anlitz {ark.}. — [UL]. — La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon [FE 11.2]. Sur lia vizaĝo mi vidis ĝojan rideton [FE 38.7].

vizier' - visière | visor | Visir {de 1901: Visier} | забрало | przedoblicze. — [AK] Visier (Helm) | przyłbica. — [RE].

VIZIO [OA 6.1] *Imagata objekto, kiun aperigas aŭ Dia revelacio, aŭ iluzio de la vidosento* | {en} vision | {fr} vision | {de} Erscheinung, Wahnbild, „Gesicht" | {es} vision (fantasia imaginacion) | {it} visione | {pl} wizja, zjawa. — [EG 2].

vizit' - visiter | visit | besuchen | посѣщать {de 1918: посещать} | odwiedzić, wizytować. — **viziti** - visiter | visit | besuchen | посѣщать {de 1918: посещать} | odwiedzać [FE 20]. — [RE]. — Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito faris al li plezuron [FE 20.6]. Teatramanto ofte vizitas la teatron ... [FE 32.1]. La doktoredzino A. vizitis hodiaŭ la gedoktorojn P. [FE 36.10].

● **vizito** - Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito faris al li plezuron [FE 20.6].

Viz-o [Z], {legu: viz-o} [OA 4] {fr} visa | {en} visa | {de} Visum | {it} visto, autenticazione | {es} refrendo, visado | {pt} visto (verb. visar) | {ca} visat | oficiala aŭtentikigo de pasporto, ktp. {la komo antaŭ "ktp." mankas en Kajero I}. — **Rim.**: Ne estas evidenta motivo por la interkrampa klarigo „(verb. visar)" en la portugala traduko.

vo [OA 7] = nomo de la litero v, dudeksepa litero de la Esperanta alfabeto

voĉ' - voix | voice | Stimme | голосъ | glos. — [UL].

vodk/o. [OA 9] Brando el greno, terpomoj aŭ aliaj kreskaĵoj, senkolora kaj per si mem praktike sengusta, produktata precipe en Rusujo, Pollando kaj Svedujo. {KUIR}

voj' - route, voie | way, road | Weg | дорога | droga. — **vojo** - route, voie | way, road | Weg | дорога | droga [FE 25]. — [UL]. — Rekta vojo estas pli mallonga, ol kurba [FE 33]. — **Rim.**: Kp. *La venonta gasto estas ankoraŭ en la vojo [DL 5.25].*

● **vojeto** - Mallarĝa vojeto kondukas tra tiu ĉi kampo al nia domo [FE 38].

● **fer'voj'** - chemin de fer | railway | Eisenbahn | желѣзная дорога | droga żelazna, kolej [UV fer']. — **fervojo** - Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj [FE 25.10]. ... promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis [FE 39.11].

● **tramvoj-o** [OA 2.2] tramway | tramway | Trambahn.

vojaĝ' - voyager | voyage | reisen | путешествовать | podróżować. — **vojaĝi** - voyager | voyage | reisen | путешествовать | podróżować [FE 26]. — Mi vojaĝas en Hispanujo [FE 26.5]. Mi vojaĝas en Hispanujon [FE 26.6].

vok' - appeler | call | rufen | звать | wołać. — **voki** - appeler | call | rufen | звать | wołać [FE 16]. — [UL]. — Mi vokas la knabon, kaj li venas [FE 16.11]. Mi vokas la knabinon, kaj ŝi venas [FE 16.12]. — **Lingva Respondo 1913**: *Marie Hankel demandis: „ĉu estas allasebla uzi „voki", por montri plilaŭtigon de la voĉo au iom ekscititan parolmanieron? „Krii" kaj „ekkrii"*

ofte ŝajnas tro forta esprimo. Z respondis: „Mi persone nenion havas kontraŭ la uzado de „voki“ en la senco, kiun vi montris; sed mi dubas, ĉu la esperantistoj ĝin volonte akceptos, ĉar tio estas esprimo germana (aŭ pli vere: hebrea-biblia), kiu por aliaj popoloj eble estos nekomprenebla aŭ eĉ stranga. En ĉiu okazo la aŭtoroj porvas provi. En miaj verkoj mi uzas kelkfoje „voki al Dio“. [LR 46, pk. al Marie Hankel (1913-06-30), OV p. 566.

vokal' - voyelle | vowel | Vokal | гласная | samogłoska. {GRAM} — **vokalo** - voyelle | vowel | Vokal | гласная | samogłoska [FE 27]. — [RE]. — Anstataŭ „la” oni povas ankaŭ diri „l'” (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo) [FE 27].

vokativ-o (*gr.*) [OA 2.1] {GRAM} — [EG 2] Vokativ.

vol' - vouloir | wish, will | wollen | хотѣть | chcieć. — **voli** - vouloir | wish, will | wollen | хотѣть | chcieć [FE 9]. — **voli** - vouloir | wish, will | wollen | хотѣть | chcieć [FE 16]. — [UL]. — Tiun ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori kaj kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ... [A 1.5]. Kiu volas perfektiĝi en Esperanto, al tiu mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn ... [A 5.3]. — Donu al la birdoj akvon, ĉar ili volas trinki [FE 9.3]. Aleksandro ne volas lerni, kaj tial mi batas Aleksandron [FE 9.7]. La infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi [FE 16.13]. La infanoj ploras, ĉar ili volas manĝi [FE 16.14]. Mi volis lin bati, sed li forkuris de mi [FE 18.2]. “Mi volas ke vi tien iru,” diris la patrino, “kaj iru tuj!” [FE 19.2]. ... prenu mem akvon, se vi volas trinki.” [FE 19.8]. Ŝi volas danci [FE 20.22]. ... la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro [FE 23.4]. Mi volas diri al vi la veron [FE 24.11]. Mi volas, ke tio, kion mi diris, estu vera (aŭ mi volas esti dirinta la veron) [FE 24.12]. ... la vortoj „ĝardenon”, „tablon” staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en” kaj „sur” tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton ... [FE 28.3]. ... ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado [FE 28.3]. Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia deziro [FE 31.14]. Mi volis ŝlosi la pordon, sed mi perdis la ŝlosilon [FE 34.3]. Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklaraĵon [FE 35.4]. Ŝi edziniĝis kun sia kuzo, kvankam ŝiaj gepatroj volis ŝin edzinigi kun alia persono [FE 39.7].

volont' - volontiers | willingly | gern | охотно | chętnie. — **volonte** - volontiers | willingly | gern | охотно | chętnie [FE 15]. — [RE]. — “Tre volonte, mia bona,”; diris la bela knabino [FE 15]. Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi [FE 25]. Mi volonte plenumis lian deziron [FE 42].

volum' - tome, volume | volume | Band (der) | томъ | tom. — [RE].

Volumen-o, [OA 4] {fr} volume (géom.) | {en} volume (geom.) | {de} Volumen, Rauminhalt, Umfang | {it} volume (geom.) | {es} volumen (geom) | {pt} volume | {ca} volum. **—** [EG 2] (geom.) Volumen.

volupt' - volupté | sensual pleasure | Wollust | сладострастіе | rozkosz, lubieżność. — [RE].

volv' - rouler, enrouler | turn round, roll up | wickeln | вить | wić. — [AK] wind, wrap round (*trans*.) | wić, zawijać. — [RE].

vom' - vomir | vomit | sich erbrechen | рвать, блевать | wymiotować. — [RE].

vort' - mot | word | Wort | слово | słowo, wyraz. {GRAM} — [**vorto** - mankas en FE 15] — [UL]. — ... ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro ... nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2]. Mi permesis al mi nur korekti la preserarojn; sed se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita, mi ĝin lasis ... [A 4.3]. La erareco en la nacia traduko de tiu aŭ alia vorto ne prezentas grandan malfeliĉon, ... [A 4.5] [pliaj trafoj en A]. — “Mi faras al vi donacon,” daŭrigis la feino, “ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono.” [FE 15.7]. Kaj kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri grandaj diamantoj [FE 17.3]. „Bone, ĉar vi estas tiel servema, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano.“ [FE 19.10]. Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo [FE 27.5]. Ekzemple: por esprimi direkton, ni aldonas al la vorto la

finon „n”; ... tiel same ni ankaŭ diras: “la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon”, kaj la vortoj „ĝardenon”, „tablon” staras tie ĉi en akuzativo ... ĉar ni volis esprimi direkton, ... [FE 28.3]. Sed estas bone uzadi la vorton „je” kiel eble pli malofte [FE 29.2]. Anstataŭ la vorto „je” ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio [FE 29.3]. La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ... [FE 30.2]. Se ni aldonas al ili la literon „k”, ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: ... [FE 30.3]. Se ni aldonas la literon „t”, ni ricevas vortojn montrajn: ... [FE 30.4]. Aldonante la literon „ĉ”, ni ricevas vortojn komunajn: ... [FE 30.5]. Aldonante la prefikson „nen”, ni ricevas vortojn neajn: ... [FE 30.6]. Aldonante al la vortoj montraj la vorton „ĉi”, ni ricevas montron pli proksiman [FE 30.7]. Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „ajn”, ni ricevas vortojn sendiferencajn: ... [FE 30.9]. Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ... [FE 30.10]. „Da” post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro [FE 32.14]. ... la ... vortojn kun «um» oni devas lerni, kiel simplajn vortojn [FE 42.9]. — Vortoj, kiuj formas kune unu ideon, estas skribataj kune, sed dividataj unu de la alia per streketo, tiel ekzemple la vorto « frat'in'o », prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj, el kiuj ĉiun oni devas serĉi aparte [UV, enkonduko 2].

● **vort'ar'** - dictionary [UV ar'] — **vortaro** - dictionnaire | vocabulary | Wörterbuch | словарь | słownik [UV, enk. 1]. — la « Universala Vortaro » [A 2.1]. ... ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro ... nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2]. La « Fundamento de Esperanto » tute ne devas esti rigardata kiel la plej bona lernolibro kaj vortaro de Esperanto [A 5.1]. Kiu volas perfektiĝi en Esperanto, al tiu mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn, ... [A 5.3]. {pliaj trafoj en A}. — Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron [FE 34.14]. — UNIVERSALA VORTARO DE LA LINGVO INTERNACIA ESPERANTO [UV, titolo]. Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro [UV, enk. 1].

vost' - queue | tail | Schwanz, Schweif | хвостъ | ogon. {ANAT} — [UL].

vual' - voile | veil | Schleier | вуаль | wual. {VEST} — [AK] voile (*subst. masc.*) | wual, zasłona. — [RE].

vulgar' [OA 1] vulgaire | vulgar, common | vulgär, gemein | вульгарный | ordynarny. — [Beau].

vulkan' - volcan | vulcan | Vulkan | вулканъ | wulkan. {GEO} — [AK] volcano. — [RE].

vulp' - renard | fox | Fuchs | лисица | lis. {ZOO} — [RE].

vultur' - vautour | vultur | Geier | коршунъ | sęp. {ZOO} — [AK] vulture. — [RE].

vulv/o. [OA 9] La ekstera parto de la inaj seksorganoj ĉe la eniro de la vagino, konsistanta el la klitoro kaj la vaginaj lipoj. {ANAT}

vund' - blesser | wound | verwunden | ранить | ranić. — [UL].

Z

Zz - z | z as in “zeal“ | s (wie in „lesen“) | з | z [FG alfabet]. — Nomoj de la literoj: … **zo** ... [FE 1]. — **zo** [OA 7] = nomo de la litero **z**, dudekoka litero de la Esperanta alfabeto. — **Lingva Respondo 56 (1893)**: La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. - *Esperantisto*, 1893, p. 32.

Zamenhof – L. ZAMENHOF [A 11.3] {mankas en UV}. — [UV 1894] *L. Zamenhof* [UV-titolo]. [FK 1903] *L. L. ZAMENHOF, / Aŭtoro de la lingvo* Esperanto [FK 4.2]. — [OA 8]: RIM.IV. La nomo Zamenhof komence estis uzata kun apostrofo (ekzemple en la “Unua Libro”); en la Fundamento (fine de la Antaŭparolo) ĝi aperas sen apostrofo, tiel same kiel la virnomo Vaŝington (12, 19). Dume oni trovas en la U.V., ĉe an/, la urbonomon Nov-Jork sen apostrofo, sed en la Ekzercaro (37, L.1) troviĝas Nov-Jorko, kie ne povas temi pri preseraro. Fakte temas

pri neesprimita licenco al la 16a Regulo pri apostrofado de substantivoj, licenco, laŭ kiu ĉe propraj nomoj povas esti forlasata ne nur la finaĵo de l' substantivo, sed ankaŭ la apostrofo mem. — Kromdeklaro pri la nomoj Zamenhof kaj Vaŝington - La Akademio de Esperanto, lige kun sia esploro pri la skribado de diversgrade esperantigitaj propraj nomoj, rekonsideris rimarkon IV en la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro. ... [cito kaj trovloko de RIM.IV, supre citita] ... La Akademio ĉi-pere nuligas tiun licencan interpreton de la apero de senapostrofaj Zamenhof kaj Vaŝington en la Fundamento kaj konstatas, ke tiuj nomformoj estas rigardendaj kiel nur parte esperantigitaj [OI 22 de 2013-10-10]. — **Rim.**: La klarigo de OA 8 pri neesprimita licenco, laŭ kiu ĉe propraj nomoj ankaŭ la apostrofo mem povas esti forlasita, estas ĝusta, la „nuligo" de OI 22 erara. La licenco en 1905 jam delonge apartenis al la „silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj" (A 2.1), kiu tamen ne trovis esprimon en la Fundamento. Ĉi tiu ne volis ŝanĝi la lingvon, sed nur fari el silenta interkonsento, eksplicitan kaj skriban interkonsenton (A 3.3). Kvankam tiu skriba konfirmo ne okazis pri la licenco ĉe propraj nomoj, ĝi tamen validas kiel „kutimjura" interkonsento. Por pli detala diskuto vd. la Ĝeneralan Parton.

zebr' - zèbre | zebra | Zebra | зебра | dziki koń {ZOO}. — [AK] zebra. — [RE]. — **Rim**.: Angla AK nenion ŝanĝas aŭ aldonas.

Zefir-o, [OA 4] {fr} zéphyr | {en} zephyr | {de} Zefir {2012: Zephir aŭ Zephyr (poezia, ark.)}, lauer Wind | {it} zefiro | {es} céfiro | {pt} zéfiro | {ca} zéfir {legu: zèfir} | agrabla milda venteto. {METEO} — [RE].

zenit' - zénith | zenith | Zenit | зенитъ | zenit, szczyt. — [RE]. — Ze-ní-to [FE 3].

zibel' - zibeline | sable | Zobel | соболь | sobol {ZOO}. — [RE].

zigzag' [OA 1] * zigzag | zigzag | Zickzack | зигзагъ | zygzag. — [E-isto 3/1889] [EG 2].

zingibr' - gingembre | ginger | Ingwer | имбирь | imbier. {KUIR} — [RE].

zink' - zinc | zinc | Zink | цинкъ | cynk. {KEM} — [RE].

zip/o. [OA 9] Fermilo, konsistanta el du rubandoj kun malgrandaj (metalaj aŭ plastaj) dentoj, kiuj interplektiĝas per ŝovado de movebla peco intera.

zizel' - zizel | zizel | Ziselmaus | сусликъ | suseł. {ZOO} — [AK] marmotte de Sibérie | zizel (*zool*.). — [RE].

zo [OA 7] = nomo de la litero z, dudekoka litero de la Esperanta alfabeto

zodiak' [OA 1] * zodiaque | zodiac | Zodiakus, Tierkreis | зодіакъ | zodiak. — [RE].

zon' - ceinture | girdle | Gürtel | поясъ, кушакъ | pas. {VEST} — [AK] belt, girdle. — [RE]. — Zó-no [FE 3].

zoolog' (1) [OA 7] {ZOO} [Christaller 1923] [EV 1923].

zoologio — Zo-o-lo-gí-o [FE 3, mankas en UV]. — [E-isto 3/1889] [EG 2]. — **zoologi'** [OA 1] * zoologie | zoology | Zoologie | зоологія | zoologja. — **zoologi'** (1) {deklarita Fundamenta per} [OA 7]. {ZOO}

zorg' - avoir soin, prendre soin de | care, anxiety | sorgen | заботиться | troszczyć się. — **zorgi** - avoir soin | care, be anxious | sorgen | заботиться | troszczyć się [FE 18]. — [AK] look after, see to. — [UL]. — Zór-gi [FE 3]. — Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem; sed ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas [FE 18.14].

● **zorg'ant'** - tuteur | tutor | Vormund | опекунъ | opiekun. — [AK] guardian.

● **zorgante** — Riĉigadi la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun, ... zorgante pri tio, ke ĉiuj uzu tiujn vortojn en la sama formo [A 7.1].

● **zorg'at'** - pupille | pupil | Pflegling | питомецъ | wychowaniec. — [AK] ward.

● **zorgeme** — ... mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn, ... el kiuj la plej gravaj estas eldonitaj tre bone kaj zorgeme, sub mia persona kontrolo kaj kunhelpo [A 5.3].

zuav' [OA 1] * zouave | zouave | Zuave | зуавъ | żuaw. {MIL} — [EG 2].

zum' - bourdonner | hum, buzz | summen | жужжать | brzęczeć, mruczeć. — [AK] brzęczeć (o owadach). — [RE].

● **zumo** — Zú-mo [FE 3].

Listo de Rekomendataj Landnomoj

Per siaj Oficialaj Informoj numero 12 de 2009-05-04 (OI 12) la Akademio publikigis „Liston de Rekomendataj Landnomoj“, kiu anstataŭas samteman liston de 1989 (OI 9 en: Aktoj de la Akademio, III, 1975 – 1991). Escepte de kelkaj Fundamentaj aŭ Oficialaj formoj, la listo de 2009 estas nura *nedeviga* rekomendo. Ĝi ne konsistigas oficialigon de landnomoj aŭ popolnomoj. La duliteraj sigloj malantaŭ la lando-nomoj estas la internaciaj landokodaĵoj laŭ ISO-3166 (se tia kodaĵo ekzistas). Ni parte represas la liston tie ĉi informcele. La kompletan rekomendon legu en OI 12, niajn komentojn en pintaj krampoj fine de la listo.

A

Afganujo / Afganio AF — Albanujo / Albanio [OA 8] AL — Alĝerio [OA 8] DZ — Andoro AD — Anglujo / Anglio [FdE] — Angolo AO — Antigvo kaj Barbudo AG — Argentino AR — Armenujo / Armenio [OA 8] AM — Aŭstralio [OA 8] AU — Aŭstrujo / Aŭstrio AT — Azerbajĝano AZ

B

Bahamoj BS — Bangladeŝo BD — Barato (= Hindujo / Hindio) IN — Barbado BB — Barejno BH — Belgujo / Belgio [OA 8] BE — Belizo BZ — Belorusujo / Belorusio BY — Benino BJ — Birmo [OA 8] MM — Bocvano BW — Bolivio [OA 8] BO — Bosnujo / Bosnio kaj Hercegovino BA — Brazilo [OA 8] BR — Britujo / Britio [OA 9] GB — Brunejo BN — Bulgarujo / Bulgario [OA 8] BG — Burkino BF — Burundo BI — Butano BT

C, Ĉ

Centr-Afriko CF — Ĉado TD — Ĉeĥoslovakujo / Ĉeĥoslovakio — Ĉeĥujo / Ĉeĥio CZ — Ĉilio CL — Ĉinujo / Ĉinio [OA 9] CN

D

Danujo / Danio [OA 8] DK — Dominika Respubliko DO — Dominiko DM

E

Ebur-Bordo CI — Egiptujo / Egiptio EG {OI 9, 1989: Egipto} — Ekvadoro [OA 8] EC — Ekvatora Gvineo [OA 8] GQ — Eritreo ER — Estonujo / Estonio [OA 8] EE — Etiopujo / Etiopio [OA 8] ET

F

Fiĝio FJ — Filipinoj PH — Finnlando FI — Francujo / Francio [FdE] FR

G, Ĝ

Gabono GA — Gambio GM — Ganao GH — Germanujo / Germanio [FdE] DE — Grekujo / Grekio [OA 8] GR — Grenado GD — Gronlando GL — Gujano GY — Gvatemalo [OA 8] GT — Gvineo [OA 8] GN — Gvineo-Bisaŭo [OA 8] GW — Ĝibutio DJ

H

Haitio HT — Hindujo / Hindio (= Barato) IN — Hispanujo / Hispanio [FdE] ,ES — Honduro HN — Hungarujo / Hungario [OA 8] HU

I

Indonezio ID — Irako [OA 8] IQ — Irano [OA 8] IR — Irlando [OA 8] IE — Islando [OA 8] IS — Israelo [OA 9] IL — Italujo / Italio [OA 8] IT

J, Ĵ

Jamajko JM — Japanujo / Japanio [OA 9] JP — Jemeno YE — Jordanio JO — Jugoslavujo / Jugoslavio

K

Kaboverdo CV — Kamboĝo KH — Kameruno CM — Kanado [OA 8] CA — Kartvelujo / Kartvelio GE — Kataro QA — Kazaĥujo / Kazaĥio KZ — Kenjo KE — Kipro CY — Kirgizujo / Kirgizio KG — Kiribato KI — Kolombio CO — Komoroj KM — Kongo (Demokratia Respubliko Kongo, Kongo Kinŝasa) CD — Kongo (Respubliko Kongo, Kongo Brazavila) CG — Kosovo — Kostariko [OA 8] CR — Kroatujo / Kroatio HR — Kubo [OA 8] CU — Kuvajto KW

L

Laoso LA — Latvujo / Latvio [OA 8] LV — Lesoto LS — Libano [OA 8] LB — Liberio [OA 8] LR — Libio [OA 8] LY — Liĥtenŝtejno LI — Litovujo / Litovio LT — Luksemburgo LU

M

Madagaskaro MG — Makedonujo / Makedonio MK — Malajzio MY — Malavio MW — Maldivoj MV — Malio ML — Malto MT — Maroko [OA 8] MA — Marŝaloj MH — Maŭricio MU — Maŭritanio MR — Meksiko [OA 8] MX — Mikronezio FM — Moldavujo / Moldavio MD — Monako MC — Mongolujo / Mongolio MN — Montenegro ME — Mozambiko MZ

N

Namibio NA — Nauro NR — Nederlando [OA 8] NL — Nepalo NP — Niĝerio NG — Niĝero NE — Nikaragvo [OA 8] NI — Nord-Koreujo / Nord-Koreio KP — Norvegujo / Norvegio [OA 8] NO — Nov-Zelando NZ

O

Omano OM — Orienta Timoro TL

P

Pakistano [OA 8] PK — Palaŭo PW — Panamo [OA 8] PA — Papuo-Nov-Gvineo PG — Paragvajo [OA 8] PY — Peruo [OA 8] PE — Pollando PL — Portugalujo / Portugalio PT

R

Ruando RW — Rumanujo / Rumanio [OA 8] RO — Rusujo / Rusio [FdE] RU

S

Salomonoj SB — Salvadoro SV — Samoo WS — Sankta Kristoforo kaj Neviso KN — Sankta Lucio LC — Sankta Vincento kaj Grenadinoj VC — Sanmarino SM — Santomeo kaj Principeo ST — Sauda Arabujo / Sauda Arabio [OA 8] SA — Sejŝeloj SC — Senegalo SN — Serbujo / Serbio RS — Siberio — Sieraleono SL — Singapuro SG — Sirio [OA 8] SY — Skotlando — Slovakujo / Slovakio SK — Slovenujo / Slovenio SI — Somalujo / Somalio SO — Sovetio, Sovet-Unio — Srilanko LK — Sud-Afriko ZA — Sud-Koreujo / Sud-Koreio KR — Sudano [OA 8] SD — Surinamo SR — Svazilando SZ — Svedujo / Svedio [OA 8] SE — Svislando CH

T

Taĝikujo / Taĝikio TJ — Tajlando TH — Tajvano TW — Tanzanio TZ — Togolando TG — Tongo TO — Trinidado kaj Tobago TT — Tunizio [OA 8] TN — Turkmenujo / Turkmenio TM — Turkujo / Turkio [FdE] TR — Tuvalo TV

U

Ugando UG — Ukrainujo / Ukrainio UA — Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj AE — Urugvajo [OA 8] UY — Usono [OA 9] US — Uzbekujo / Uzbekio UZ

V

Vanuatuo VU — Vatikano VA — Venezuelo [OA 8] VE — Vjetnamujo / Vjetnamio VN

Z

Zambio ZM — Zimbabvo ZW.

Komentoj

Egiptujo / Egiptio. Laŭ OI 9 de 1989 la landonomo estas Egipto, kiel en la vortaro de Kabe 1910 (*La historiaj monumentoj atestas, ke la antikva Egipto posedis altan civilizacion*. – atesti). La rekomendo estis forte kritikata.

De la sama aŭtoro

2014 / 2015 Berlina Komentita Bibliografio de Vortaroj kaj Terminaroj en Esperanto (BKB). 2 vol. (aperonta).

2014 **Butler**, Montagu C[hristie] (1884-1970) [W]. Esperanto-English Dictionary. London: British Esperanto Association (Inc.), 1967. 450 p.
Html-versio 2014 komentita kaj enkondukita de Bernhard **Pabst** ĉe http://esperilo.be/butler.htm (2,4 kb)

2013 **Kabe** [pseŭd. de Kazimierz **Bein**] (1872-1959) [W]. Vortaro de Esperanto. Paris: Hachette & Cie 1910, [4], 175, [9] p.
5a enhave neŝanĝita eld. Berlino: Bernhard Pabst, **2013**. 208 p. — A4. Skanita, per tekstrekona programo prilaborita kaj komentita versio en nova grafika formato. Rete konsultebla (pdf, 1,5 mb). Kun enkonduko de Bernhard Pabst.

Berlina Komentita Bibliografio

(aperonta)

Specimeno

Tradukoj de la Universala Vortaro

Armena

1912 **Zamenhof**, L.L. Universala vortaro de la lingvo internacia Esperanto. Eldono armena. Paris: Hachette, 1912. 51 p. — pr. Ahmed Ihsan. 19 x 13 cm.

Bulgara

1910 **Oreškov**, G.; **Atanasov**, G.; **Zamenhof**, L.L. k.a. Fundamenta universala vortaro de la lingvo internacia Esperanto (Bulgara eldono) Osnoven universalen rečnik na mezdunardniya ezik Esperanto. Sofia: S.M. Stojkov, 1910. [4], 96 p. — 16x11 cm. ĉ. 2.630 radikoj.

Ĉeĥa

1909 **Kühnl**, Eduard (1884-1966) [W]. Universala Vortaro. En: Fundamento de Esperanto, Eldono Bohema. 2.631 radikoj. Paris: Hachette & Cie, 1909 / Praha: F. Topic, 1909. xi, 92 p. — 17x11 cm.

Ĉina

1930 **Lǐ** Luò [t.e. **Li** Lok]. Universala Vortaro. En: Fundamento de Esperanto (Gramatiko, Ekzercaro, Universala Vortaro) - Shìjièyǔ zhī jichǔ. Guǎngzhōu (Canton): Guǎngzhōu shìlì Shìjièyu shīfan jiǎnɡǐ suǒ (Kantona Esperanto-Instituto), 1930. vi, 104 p.

Greka

1907 **Kuluri**, Konstantino. Universala Vortaro de la Lingvo internacia “Esperanto”. 2.631 radikoj. En: Fundamento de Esperanto, Eldono Greka. Paris: Hachette, 1907. pr. Imprimerie Lahure, Paris. 17x11 cm XI, 105, [6] p.

Hispana

1907 **Inglada [Ors]**, Vicente [W]. Universala Vortaro de la Lingvo Internacia “Esperanto”. En: Fundamento de Esperanto. Paris: Hachette, 1907. — 2.631 radikoj
2a eld. 1913. XI, 92 p. — 17x11 cm.

Hungara

1909 **Lengyel** Paul, de (trad.) (1868-1932) [W]. Universala Vortaro de la Lingvo internacia “Esperanto”. Az Esperanto Nemzetközi Nyelv Egyetemes Szótára. En: Fundamento de Esperanto, Eldono Hungara (Az Esperanto Alapkönyve). p. 51-95. Paris: Hachette / Budapest: Kókai Lajos Könyvkereskedése, 1909. xi, 95, [5] p. — pr. Imp. Paul Brodard, Coulommiers. 17x11 cm. 2.631 radikoj.

2006 **Horvath** J[oszef]. Fundamento de Esperanto, Eldono Hungara. Antwerpen: FEL [Flandra Esperanto-Ligo] 2006. 142 p. — 21 cm. ISBN 9077066241. Foto. Nova traduko.

Itala

1907 **Junck**, Rosa [trad.] (1850-1929) [W]. Universala Vortaro. En: Fundamento de

Esperanto, eldono itala. Paris: Hachette, 1907. ix, 94 p. — 17x11 cm. BIL 2689. 2.631 radikoj. — Rec.
Giambene, Luigi. En: Roma Esperantisto. 1908, p. 99: „pli ol 100 malĝustaĵoj“ (cit. laŭ BIL 2689). Junck devene estis ĉeĥino, edziniĝinta al germano kaj post ties morto translokiĝinta al la itala Lazura Bordo. Ŝi ne sufiĉe bone parolis la italan por senpeke plenumi la tradukon, kiu pro tio estas multloke malĝusta.
2a eld. Milano: Avanti, **1922**. 179 p. —

Japana

1933 **Ishiguro** Yoshi H. [trad.] Universala vortaro de la lingvo internacia Esperanto. En: Fundamento de Esperanto. Gramatiko, Ekzercaro, Universala Vortaro. Tokio: Hakubunkwan, 1933. 352 p. — IEMW. 2.629 radikoj.

Nederlanda

1922 **Schoofs**, Frans [trad.]. Universala Vortaro de la Lingvo internacia “Esperanto”. En: Fundamento de Esperanto, Eldono Flandra-Holanda (Fundament van Esperanto). Antwerpen: Belga Esperanto Instituto / ’s Gravenhage: Centra Esperanto Librejo / Paris: Esperantista Centra Librejo, 1922. 112, [12] p. — pr. Paul Brodard, Coulommiers. 17x11 cm. IEMW. 2.631 radikoj
2a rev. eld. **1929**. Paris : Esperantista Centra Librejo. **1929**, 112 p. — IEMW.
3a rev. eld. **1938**.

2005 **Desmet**, P. [trad.]. Universala vortaro. En: Fundamento de Esperanto. Eldono Nederlanda. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo 2005, 136 p. — 21 cm. ISBN 9077066195. Nova traduko.

Pola (brajla)

1932 **Rytenberg**, Eugenjus. Uniwersalny Słownik. Universala Vortaro. En: Podstawy Języka Międzynarodowego Esperanto (Fundamento de Internacia Lingvo Esperanto). Warszawa: Wydawnictwo Państwowego Instytutu Gluchoniemych i Ociemnialych (Ŝtata Blindul-Instituto), 1932. 48 p. — 33x26 cm. En brajlo. ĉ. 2.630 radikoj.

Slovaka

1907 **Škarvan**, A.; **Evstifejev**, N.P. [trad.]. Fundamento de Esperanto. Eldono Slovaka. 1907.
Faks. repr. Partizánske: Espero. **2007**. — 18 cm. ISBN 9788096953363.

Sveda

1897 **Nylén**, Paul (1870-1958) – [W]. Esperantisk-svensk ordbok efter D:r L. Zamenhofs “Universala Vortaro”. 2.629 radikoj. Uppsala, Uppsala Esperantoförening, [1897]. 68 p. — pr. Uppsala Nya Tidnings Aktiebol[ag] Tr., Uppsala. 18x13 cm. Rete konsultebla.

Rumana

1908 **R[obin]**, G[abrielo]; **M[itrany]**, D. Universala Vortaro de la Lingvo internacia “Esperanto”. En: Fundamento de Esperanto, Eldono Rumana. Paris: Hachette, 1908. IX, 92, [1] p. — pr. Paul Brodard, Coulommiers. 17x11 cm. 2.631 radikoj.

Turka

1910 **Regno**, Ajdina [pseŭd. de J. Guéron] [trad.]. Universala Vortaro. En: Fundamento de Esperanto, Eldono Franca-Turka, Dua Parto. Paris: Hachette, 1910. 126 p. — pr. Ahmed Ihsan et Cie, [Aidin]. 18x12 cm. 2.631 radikoj.

Pri ĉi tiu libro

La Dua Parto de la **Berlina Komentario** precize notas ĉiujn lingvo-elementojn de la Fundamento de Esperanto kaj de la Oficialaj Aldonoj tiel, kiel ili aperas en la oficialaj dokumentoj de la Akademio. Ĉiuj trafoj de vorto en Antaŭparolo, Ekzercaro, la Fundamentaj Gramatikoj aŭ ekster la ĝusta alfabeta pozicio en la Universala Vortaro estas kunigitaj en apartaj artikoloj. Tiel por la unua fojo en la historio de Esperanto eblas per unu rigardo ekscii la plenan enhavon de la Vortaro Oficiala. La kolekton suplementas ĉiuj Akademiaj Korektoj, indikoj pri la deveno kaj pli frua uzo de multaj vortoj, krome Lingvaj Respondoj de Zamenhof kaj privortaj rekomendoj kaj decidoj de la Akademio. Rimarkoj, komentoj pri la referenc-lingvoj kaj plusendoj inter elementoj de la Vortaro Oficiala faciligas la ĝustan interpreton. La **Berlina Komentario** pro tio estas grava helpilo por plenumi la mandaton de la Antaŭparolo al la Fundamento eltrovi „la veran sencon de ĉiu vorto“.

Estas havebla plia volumo pri ĝeneralaj demandoj de la Fundamento, ĝia Antaŭparolo, Gramatiko kaj Ekzercaro. Tiu Unua Parto komentas aspektojn, kiuj transiras la sferon de unuopaj vortoj.

Pri la aŭtoro

Bernhard Pabst estas juristo kaj vivas en Berlino. Li publikigis multajn detal-studojn pri la Fundamento de Esperanto.